

SOLDATO DE NAPOLEONO

romano

de

Erckmann-Chatrian

tradukita el la franca

de

Pieter Jan Doumen

o o o o o

UNUA PARTO:

KONSKRIPTO DE 1813

Antaŭparolo

La du francaj aŭtoroj, Emile Erckmann, naskiĝinta en Falsburgo (1822-1899), Alsaco, kaj Alexandre Chatrian, naskiĝinta en Grand-Soldat (Meurthe, 1826-1890), publikigis siajn verkojn sub la nomo Erckmann-Chatrian. Kune ili skribis grandan nombron da rakontoj, romanoj kaj teatraĵoj: L'Ami Fritz, Histoire d'un Conscrit de 1813, Les Rantzau¹.

Kvankam ne granda literaturo, Soldato de Napoleono, kiu estas la titolo de la Esperanta versio de Histoire d'un Conscrit de 1813, ne malhavas literaturan valoron. Dum la epoko de Napoleono briladas pro militista heroismo, la heroo de tiu ĉi romano, Jozef Seitz, havas nenion heroecan. La iom naiva kaj simpla infano de la popolo, kiu li estas, firme staras per ambaŭ kruoj sur la grundo. Al li ne man-kas prudento. Ne sen ironio li rakontas siajn militspertojn en tiu periodo kaj pri sia amo al Trineĝ. Pro leĝera lameco li komence ne devis servi en la imperiestra armeo, kio multe plaĉas al li. Kaj dum unuj jubiladas pri la gloraj venkoj de la imperiestro kaj aliaj lamentadas pri la multaj mortigitoj, li vivas en la nuboj, pensante pri sia amatino, la bela Trinel. Sed post kiam Napoleono perdis preskaŭ sian tutan armeon en Rusio, ankaŭ li estas rekrutita malgraŭ sia

korpa difekto. Lia mondo ŝajnas kolapsi. Li estas ĵetita en la danĝeran aventuron, kiu estas milito, pacience eltenas sian duran sor-ton kaj iel sukcesas postvivi.

La tuta romano kovras la jarojn 1813 ĝis 1815, fakte de la malvenko de Napoleono en Rusio ĝis lia ekzilo al la insulo Sankta-Helena. La unua parto, Konskripto de 1813, pritraktas la obstina lukto de Napoleono, kiu revenas de Rusio, kontraŭ siaj malamikoj, kaj finiĝas per sia malvenko kaj ezilo al Elbo, kun la batalo apud Leipzig kiel kulmino kaj la reveno de Josef hejmen. La dua parto, Waterloo, pri-skribas la revenon de Napoleono en Francio, la batalon apud Waterloo, en kiu Josef parto-renis, kiu metis definitivan finon al la franca imperio, kaj kiu ebligas la definitivan revenon de Josef al sia hejmo.

La tono de la romano estas realisma, kaj delikate sarkasma, kio faras el tiu verko ankaŭ pledon kontraŭ la militoj. En la verko oni ne trovas tiun pezan romantikismon, kiu karakterizas tiom da tiutempaj verkoj. La vivecaj kaj realismaj priskriboj far la mi-persono donas la impreson, ke oni mem travivas la eventojn. Krom tio oni ricevas bonan ideon pri la tiu-tempa pens- kaj vivmaniero de la ordinaraj homoj en Alsaco. Konklude, tiu senpretenda, sed ĉarma rakonto restis, malgraŭ sia alta aĝo, ne nur bone legebla, sed ankaŭ plene ĝuebla.

La romano, kiu estis verkita ĉirkaŭ 1860, konis almenaŭ 43 represojn, kiu pravas sian grandan popularecon.

La ironio de la sorto volis, ke Alsaco fariĝis parto de Francio, kiu altrudis sian lingvon al ĉiuj nefranclingvaj enloĝantoj, do ankaŭ al la alsacanoj, kiuj parolis germanan dialekton. Unu el la sekvoj estis, ke oni trovis tiutempe en Alsaco pelmele francajn kaj germanajn nomojn kaj antaŭnomojn, kiun mi ne esperantigis, pro la loka koloro. Sed mi uzas esperantajn nomojn nur por la ĉefurboj kaj grandaj, monde konataj urboj.

La tuta historio estas forte ligita al la persono de Napoleono Bonaparte, la tre sukcesa kaj populara franca generalo, kiu naskiĝis en 1769 sur la insulo Korsiko. En 1999 li plenumis ŝtatrenverson, fariĝis Unua Konsulo kaj poste, en 1804, imperiestro. Li aperis same tiel bona administranto kiel generalo. Li reordigis la landon, metante finon al ekscesoj de la Revolucio, sed toleris nenian opozicion. Dum 20 jaroj li dominis la tutan okcidentan Eŭropon per siaj nevenkeblaj armeoj, sed li fine estis venkita de la aliancanoj apud Waterloo (1815). Li mortis ekzilita sur la insulo Helena en 1821.

Pieter Jan Doumen

¹ En Esperanto: Amiko Frederiko, Historio de Konskripto de 1813, La Ranzaŭ-oj.

² Karesnomo por Katarina

SOLDATO DE NAPOLEONO

I

Tiuj kiuj ne vidis la gloron de imperiestro Napoleono Bonaparte dum la jaroj 1810, 1811 kaj 1812, neniam povas kompreni, ĝis kia ŝtupo de potenco homo povas supreniri.

Kiam li trairis Ĉampanjon, Lorenon aŭ Alsaccon, la homoj, meze de la gren- kaj vinberrikolto, forlasis ĉion kaj kuris renkonte al li. Ili nemalofte trairis ok aŭ dek mejlojn por povi vidi lin! Virinoj, infanoj kaj maljunuloj rapidis al la vojo, levis la manojn kaj kriis: «Vivu la Imperiestro! Vivu la Imperiestro!»

Oni eĉ estus kredinta, ke li estas Dio mem, ke li igis spiri la mondon kaj ke, se li hazarde mortus, ĉio estus finita. La kelkaj veteranoj de la Respubliko, kiuj skuis la kapon kaj aŭdacis diri inter du glasoj da vino, ke ankaŭ la impe-riestro povus fali, estis rigardataj kiel frene-zuloj. Tiu opinio ŝajnis kontraŭnatura, kaj oni eĉ neniam pensis pri tiu ebleco.

Ekde 1804 mi estis metilernanto ĉe la maljuna horloĝisto Melñior Gulden en Falsburgo³. Ĉar mi estis malforta kaj lamis iomete, mia patrino volis, ke mi lernu pli trankvilan metion ol tiujn kiujn oni ekzercis en nia vilaĝo. En Dagsberg oni efektive trovas preskaŭ nur arbohakistojn, lignokarbistojn kaj lignosledistojn.

Sinjoro Gulden multe amis min. Ni loĝis en granda domo, kiu formis stratangulon fronte al la gastejo *La Ruga Bovo* proksime al la Franca Pordego.

Tie oni povis vidi alveni princojn, ambasadorojn kaj generalojn, unuj post la aliaj. Unuj alvenis en kaleŝoj, aliaj en berlinoj⁴, en vestaĵoj kun galonoj, plumegoj, peltaĵoj kaj ordenoj el ĉiuj landoj. Kaj sur la granda vojo oni povis vidi pasi kurierojn, stafetojn, konvojojn kun pulvo kaj kanonkugloj, kanonojn, municiaĵojn, furgonojn, kavalerion kaj infanterion!

En kvin aŭ ses jaroj hotelisto Georges fariĝis riĉa viro. Li posedis multajn herbejojn, fruktarbejojn, domojn kaj monerojn, ĉar por ĉiuj tiuj homoj, alvenantaj el Germanio, Svisio, Rusio, Pollando aŭ el alia lando, ne gravis la elspezo de kelkaj manplenoj da oro, disŝutitaj laŭlonge de la grandaj vojoj. Ĉiuj estis nobeloj, por kiuj estis iel ajn honoro nenion ŝpari.

De mateno ĝis vespero, kaj eĉ dum la nokto, la hotelo *La Ruga Bovo* servadis brilajn man-

ĝojn. Tra la altaj fenestroj de la teretaĝo oni vidis nur grandajn blankajn tablotukojn, brilan-tajn pro arĝentaĵoj, kovritaj per ĉasaĵoj, fiŝaĵoj kaj aliaj maloftaj manĝaĵoj, ĉirkaŭ kiuj la voja-ĝistoj venis sidiĝi flankĉeflanken. De la granda korto malantaŭ la hotelo oni aŭdis nur la hena-don de ĉevaloj, la kriadon de postiljonoj, la ridadon de servistinoj, la ruliĝadon de veturiloj alvenantaj kaj forirantaj tra la altaj veturilpordegoj. Ha! La hotelo *La Ruga Bovo* neniam konis aŭ konos tian prosperan tempon!

Oni ankaŭ vidis tie halti homojn el la urbo, kiujn oni konis el la tempo, kiam ili serĉis sekan lignon en la arbaroj aŭ plukis la sterkon de la ĉevaloj de sur la grandaj vojoj. Ili fariĝis generaloj, koloneloj, komandantoj, unu el mil, pro tio ke ili kuraĝe bataladis en ĉiuj landoj de la mondo.

La maljuna Melñior kun sia ĉapo el nigra silko metita sur siajn larĝajn harkovritajn orelojn, siaj malstreĉaj palpebroj, sia nazo pin-ĉita per grandaj kornaj okulglasoj kaj siaj kunpremitaj lipoj, ne povis reteni sin demeti sur la labortablo sian lupeon kaj kontrollilon kaj ĵeti fojfoje rigardon al la gastejo, precipe kiam la fortaj vipobatoj de la postiljonoj, kun iliaj pezaj botoj, ilia malgranda ĵaketo kaj kanaba peruko kovranta la nukon, resonis en la eĥoj de la remparoj, anoncante iun novan gravan personon. Tiam li fariĝis tre atenta, kaj de tempo al tempo mi aŭdis lin ekkrii:

«Hej! Tio estas la filo de la tegmentkovristo Jakob, de la maljuna vestflikistino Marianne, aŭ de la barelfaristo Franz Sepel! Li faris grandan karieron... Jen li estas nun kolonelo kaj barono de la franca imperio. Kial do li ne haltas ĉe sia patro, kiu loĝas tie proksime en la Strato de la Kapuĉenoj?»

Sed kiam li vidis ilin iri tra la strato kaj premi la manon dekstre kaj maldekstre al homoj kiuj konis lin, lia vizaĝo ŝanĝiĝis. Li sekigis la okulojn per sia granda kvadratita naztuko kaj murmuris:

«Tio plezurigos la povran Annette! Bone, bone! Li ne estas malhumila, tiu junulo, sed kuraĝa viro. Nur se kuglo baldaŭ ne forprenos lin!»

Unuj preteriris kvazaŭ hontemaj pri tio, ke ili rekonis sian neston. Aliaj fiere trapaŝis sian urbeton por iri saluti sian fratinton aŭ kuzinon. Pri tiuj ĉi ĉiuj parolis: oni dirus, ke la tuta Falsburgo portis iliajn krucojn kaj epoletojn. La aliajn oni malŝatis same multe kaj eĉ pli kiam ili paŝadis sur la granda vojo.

Preskaŭ ĉiumonate oni kantis la *Te Deum*⁵ pro ia nova venko, kaj la kanono de la arsenalo

³ Phalsbourg, urbeto en la departamento Sarre-bourg, Loreno, kiu ankoraŭ nun havas restaĵojn de la fortikaĵoj de Vauban.

⁴ Vojaĝkaleŝoj sur kvar radoj kun risortoj por kvar personoj (fine de la XVII-a jarcento).

⁵ Latina dankkanto al Dio en la Rom-Katolika Eklezio

tondrigis siajn dudek unu pafojn, kiuj tremigis ĉies koron. Dum la ok tagoj kiuj sekvis, ĉiuj familioj estis maltrankvilaj, ĉefe la povraj maljunaj virinoj, kiuj senpacience atendis leteron. Kiam la unua alvenis, la tuta urbo eksciis tion: «Tiu aŭ tiu ĉi patrino ricevis novaĵon pri Jakob aŭ Klaus!» Kaj ĉiuj aliaj kuris al ŝia domo por ekscii, ĉu li ne diris ion pri ilia Josef aŭ Johann. Mi ne parolas pri la promocioj nek pri la mortaktoj. Ĉe la promocioj ĉiuj kredis, ke necesas antstataŭigi la mortigojn. Sed la mortaktoj la gepatroj atendis plorante, ĉar tiuj ne venis tuj, iafone eĉ tute ne venis, sed la povraj gemaljunuloj ĉiam plu esperis pensante: «Eble nia filo estas militkaptito... Kiam oni faros pacon, li revenos... Kiom da ili jam revenis, kiujn oni kredis jam mortintaj!» Nu, oni neniam faros pacon. Kiam unu milito finiĝas, oni komencas alian. Ĉiam io mankas al ni, jen flanke de Rusio, jen flanke de Hispanio aŭ de alia lando. La imperiestro neniam estis kontenta.

Ofte, kiam la regimentoj pasis tra la urbo, la grandan kapoton refalditan sur la koksojn, la sakon sur la dorso, la altajn gamaŝojn atinantajn la genuojn kaj la fusilon portatan laŭplaĉe, plirapidigante la paŝojn, jen kovritaj per koto, jen grizaj pro polvo, patro⁶ Melĥior, rigardante tiun defilon, ofte demandis min reve :

«Diru, Josef, kiom da ili viaopinie ni jam vidis preteriri tiamaniere ekde 1804?»

«Ho, mi ne scias, sinjoro Gulden,» mi respondis al li, «almenaŭ kvarcent aŭ kvincent mil.»

«Jes... Almenaŭ!» li diris. «Kaj kiom da ili vi jam vidis reveni?»

Tiam mi komprenis, kion li volis diri, kaj mi respondis :

«Eble ili revenas tra Mainz aŭ tra alia vojo... Alie ne eblas.»

Sed li skuis la kapon kaj diris :

«Tiu kiujn ni ne vidis reveni, estas mortintaj, kiel centoj kaj centoj da miloj ankoraŭ mortos, se la bona Dio ne kompatos nin, ĉar la imperiestro ŝatas nur militi ! Li jam verŝis pli da sango por doni kronojn al siaj fratoj, ol nia Granda Revolucio⁷ por defendi la Homajn Raj-tojn.»

Tiam ni rekomencis labori, sed la konsideroj de sinjoro Gulden donis al mi multon pripensendan. Mi ja lamis iomete per mia maldekstra kruro, sed tiom da aliaj kiuj havis fizikan mankon, tamen ricevis sian marsordonon!

Tiaj pensoj kuris tra mia kapo, kaj kiam mi longe pensadis pri tio, mi ekhavis grandan ĉagrenon. Tio ĉi ŝajnis al mi terura, ne nur ĉar

me ne ŝatias militon, sed ankaŭ ĉar mi volis edziĝi al mia kuzino Trinel de la vilaĝo Quatre-Vents⁸. lasence ni estis edukitaj kune. Ne eblis vidi pli freŝan kaj pli ĉarman knabinon. Ŝi estis blonda, havis belajn blujajn okulojn, rozkoloran vangojn kaj dentojn blankajn kiel lakto. Ŝi estis en si sia dek-oka jaro. Mi mem estis dek-naŭjara, kaj onklino Gredel⁹ ŝajnis tre kontenta vidi min veni ĉiun dimanĉon frumatene por matenmanĝi kaj tagmanĝi kun ili.

Tiam Trinel kaj mi iris en la furktarbejon malantaŭ la domo. Ni mordis en la saman pomon kaj la saman piron. Ni estis la plej feliĉaj homoj en la mondo.

Mi kondukis Trinel al la alta meso kaj al la vesproj, kaj dum la kermeso ŝi ne forlasis mian brakon kaj rifuzis danci kun la aliaj knaboj de la vilaĝo. Luj sciis, ke ni estas geedziĝontaj iutage. Sed se mi havus la malfeliĉon devi iri al la armeo, ĉio estus finita. Mi deziris esti milfoje pli lama, ĉar en tiu tempo oni unue prenis la fraŭlojn, kaj tiam la edziĝintajn virojn sen infanoj, kaj nevole mi pensis : «Ĉu lamuloj valoras malpli ol edziĝintaj viroj? Ĉu oni ne povus meti min en la kavalerion?» Tiu penso malĝojigis min: jam mi volus eskapi al mia devo.

Sed ĉefe en 1812, komence de la milito kontraŭ Rusio, mia timo pligrandiĝis. Ekde la monato februaro ĝis la fino de majo ni vidis ĉiutage preteriri unu regimenton post la alia: dragonojn, kirasulojn, karabenistojn, husarojn, lancistojn de ĉiu koloro, artilerion, municion, ambulancojn, veturilojn kun vivrimedoj, seninterrompe, kiel fluantan riveron, kies fino ne videblis.

Mi ankoraŭ memoras, ke tio komenciĝis per grenadistoj, kiuj kondukis ĉaregojn tiratajn de bovoj. Tiuj bovoj anstataŭis ĉevalojn por servi poste kiel nutraĵo, kiam oni estos eluzinta la municion. Ĉiuj diris: «Kia bona ideo! Kiam la grenadistoj ne plu povos nutri la bovojn, la bovoj nutros la grenadistojn! » Malfeliĉe tiuj kiuj diris tion, ne sciis, ke la bovoj jam havis eluzintajn kornojn, pendantajn lipojn, elorbiĝintajn okulojn, la kolon premitan inter la ŝultrojn, kaj ke de ili restis nur la haŭto kaj la ostoj. Dum tri semajnoj pasadis tiuspecaj bestoj, ĉiuj disŝiritaj per bajonetpikoj. Ili eĉ ne povis iri dek mejlojn trans Rejno. Viando fariĝis malmultekosta, ĉar oni buĉadis multajn da tiaj bestoj, sed mal-multaj homoj volis aĉeti la viandon, kiu estis malsaniga.

Post tio ni vidis preterpasi nur lancojn, sabrojn kaj kaskojn. Ĉio eniris tra la Franca Pordego,

⁶ Tre malnova kutimo ĉe la alsacanoj nomi pro respekto ĉiun mezaĝulon 'patro' kaj ĉiujn mezaĝulinon 'patrinon'

⁷ Tiu de 1789-1799, dum kiu reĝo Ludoviko XVI kaj reĝino Maria-Antŭaneta estis senkapigitaj

⁸ Kvar Ventoj (prononcu: katrevã')

⁹ Karesnomo por Margarita

transiris la Armilplacon, laŭirante la grandan vojon, kaj eliris tra la Germana Por-dego

Finfine, la 10-an de majo de tiu jaro 1812-a, frue en la mateno, la kanonoj de la arsenalo anoncis la mastron de ĉio. Mi ankoraŭ dormis, kiam la unua pafego resonis, tremigante la vitretojn de mia ĉambro kiel tamburojn, kaj preskaŭ samtempe sinjoro Gulden, portante kandelon, malfermis la pordon, dirante :

«Ellitiĝu, Josef... Jen li estas!»

Ni malfermis la fenestron. En plena nokto mi vidis proksimiĝi je granda troto tra la Franca Pordego proksimume centon de dragonoj, el kiuj, pluraj portis torĉon. Ili pasadis kun terura ruliĝado kaj trotado. Iliaj lumoj dancadis kontraŭ la fasadoj de la domoj kiel flamoj, kaj el ĉiuj fenestroj oni aŭdis senfinajn kriojn : «Vivu la Imperiestro! Vivu la Imperiestro!»

Mi rigardis la veturilon, kiam ĉevalo stumblis kontraŭ la fosto de la buĉejo Klein, al kiu oni kutime ligis la bovojn. La dragono falis kiel ŝtono kun disetenditaj kruroj. Lia kasko ruliĝis en la defluejon, kaj preskaŭ samtempe kapo kliniĝis el la veturilo por vidi, kio okazas: dika, grasa, pala kapo kun tufo da haroj sur la frunto. Estis imperiestro Napoleono Bonaparte. Li tenis unu manon levita, kvazaŭ por preni pinĉon da flartabako, kaj diris kelkajn vortojn. La oficiro kiu galopadis flanke de la kaleŝpor-do, kliniĝis por respondi lin. Li snufis sin pinĉon da tabako, kaj la kaleŝo deturniĝis malantaŭ la stratangulon, dum la kanono tondradis.

Jen ĉio kion mi vidis.

La imperiestro ne haltis en Falsburgo. Dum li jam rapidis sur la vojo al Saverne, la kanono sputis sian lastan pafon. Tiam denove ekregis silento. La gardostarantoj ĉe la Franca Pordego relevis la ponton, kaj la maljuna horloĝisto diris al mi:

«Ĉu vi vidis lin?»

«Jes, sinjoro Gulden.»

«Nu,» li diris, «tiu viro tenas en siaj manoj la vivon de ĉiuj. Li bezonas nur blovi kontraŭ nin, kaj estus finite. Ni benu la ĉielon, ke li ne estas malbona, ĉar alie ni vidus terurajn aferojn kiel en la tempo de la sovaĝaj reĝoj.»

Li ŝajnis tute revema. Post minuto da pensado li aldiris :

«Vi povas reenlitiĝi, Josef. Jen sonas la tria.»

Li reiris en sian ĉambron, kaj mi rekuŝiĝis sur mian liton. La profunda silento, kiu regis nun ekstere, ŝajnis al mi eksterordinara post tiu tumulto, kaj ĝis la aŭroro mi ne ĉesis revadi pri la imperiestro. Mi pensis ankaŭ pri la dragono, kaj mi deziris ekscii, ĉu li mortis per la falo. La morgaŭon ni eksciiis, ke oni transportis lin al la hospitalo kaj ke li baldaŭ forlasos ĝin.

Ekde tiu tago ĝis la fino de la monato septembro oni ofte kantis la *Te Deum* en la preĝejo, kaj ĉiufoje oni pafis dudek unu fojojn per la kanono pro iu aŭ alia nova venko. Tio okazis preskaŭ ĉiam en la mateno. Sinjoro Gulden tuj ekkriis:

«He, Josef! Ankoraŭ unu batalo kiun ni gajnis! Kvindek mil viroj surtere, dudek kvin flagoj, cent fajrobuŝoj! Ĉio iras glate!... Ĉio iras glate!... Nun restas nur fareda nova kon-skripcio por anstataŭigi tiujn kiuj mortis!»

Li puŝmalfermis mian pordon, kaj mi vidis lin tute griza, tute kalva, en sia ĉemizmanikoj kun nuda kolo, dum li lavis sian vizaĝon super pelvo.

«Ĉu vi kredas, sinjoro Gulden,» mi demandis kun granda ĝeno, «ke oni ankaŭ prenos lamulojn?»

«Ne, ne,» li respondis bonkore, «ne timu, mia infano : vi vere ne povus servi. Cetere ni aranĝos tion. Nur bone laboru, kaj ne maltrankviliĝu pri la resto.»

Li vidis mian maltrankvilecon, kaj tio dolorigis lin. Mi neniam renkontis pli bonkoran viron ol lin. Tiam li vestis sin por iri streĉi la horloĝojn en la urbo: tiujn de la sinjoro urbestro, kaj de aliaj gravaj personoj. Mi restis en la domo.

Sinjoro Gulden revenis nur post la *Te Deum*. Li deprenis sian grandan avelkoloran mantelon, rekaŝis sian perukon en la skatolon kaj denove metis sian silkan ĉapon sur la orelojn, dirante :

«La Granda Armeo estas en Vilno – aŭ en Smolensk – mi ĵus eksciiis tion de la sinjoro komandanto. Bonvolu Dio, ke ni venku ankaŭ tiun ĉi fojon kaj ke oni faru pacon, ju pli bal-daŭ, des pli bone, ĉar milito estas io terura.»

Mi pensis ankaŭ, ke, se ni havus pacon, oni ne bezonus tiom da viroj, kaj ke mi povus edziĝi al mia kara Trinel. Ĉiu povas imagi, kiom da deziroj mi formulis por la gloro de la imperiestro!

II

La 15-an de septembro 1812 ni eksciiis nian grandan venkon apud la rivero Moskvo. Ĉiuj jubilis kaj ekkriis: «Nun ni havos pacon !... Nun la milito estas finita!...» Sed kelkaj malicaj friponoj diris, ke Ĉinio restas ankoraŭ konkerenda. Ĉiam estas tiaj neelteneblaj estaĵoj, kiuj provas malesperigi la homojn.

Ok tagojn poste ni aŭdis, ke niaj trupoj estas en Moskvo, la plej granda kaj plej riĉa urbo de Rusio. Ĉiuj imagis la enorman militkaptajon kiun ni estis havontaj, kaj oni pruvis, ke tio pli-

malaltigos la impostojn. Sed baldaŭ kuris la famo, ke la rusoj ekbruligis sian propran urbon,

kaj ke la niaj estus devigitaj retiriĝi al Pollando, se ili ne volus pereji pro malsato. Oni parolis nur pri tio en la gastejoj, la bierfarejoj, la gren-haloj, ĉie. Oni ne povis renkonti aliajn homojn sen tuj demandi: «Ĉu la retiriĝo jam komen-ciĝis? Oj, oj, tio finiĝos malbone!»

La homoj estis palaj. Antaŭ la poŝtofiĉejoj centoj da kamparanoj atendis de mateno ĝis vespero, sed ne plu alvenis leteroj. Mi rapide paŝis tra tiun homamason sen multe atenti pri ĝi, ĉar mi jam vidis tiom da ili! Kaj plue, mi havis iun ideon kiu gojigis mian koron kaj kiu igis min vidi ĉion bela. Jam ekde kvin monatoj mi volis fari belegan donacon al Trinel pro sia nomfesto, kiu estis okazonta la 18-an de decembro. Inter la poŝthorloĝoj kiuj pendis en la montrofenestro de sinjoro Gulden, estis unu tre malgranda, io tute bela, kies pelvo en arĝento striita per cirkloj, igis ĝin brili kiel stelo. Ĉirkaŭ la cifereplato oni vidis pentritaj du geenamiĝintojn, kiuj iusence faris amdeklaron unu al la alia, ĉar la knabo donis al la knabino granda bukodon da rozoj, dum ŝi modeste mallevis la okulojn, etendante manon.

La unuan fojon kiam mi vidis tiun horloĝeton, mi diris al mi mem: «Vi ne lasos ĝin eskapi. Ĝi estos por Trinel. Eĉ se mi devus labori ĉiutage ĝis noktomezo, necesas, ke ŝi ekhavu ĝin.»

Post la sepa vespere, kiam mi finis mian laboron, sinjoro Gulden, kiu pagis min sufiĉe bone, lasis min labori por mia propra monujo. Ni ĉiam devis purigi, reĝustigi, restreĉi malno-vajn horloĝojn. Tio kostis multan multan tem-pon kaj penon. Sed la horloĝeto valoris tridek kvin frankojn! Tial oni povas imagi la nombron da horoj kiujn mi devis pasigi nokte por havigi ĝin al mi. Mi estas certa, ke sinjoro Gulden donacus ĝin al mi, se li scius, kion mi volas. Sed mi ne volus ricevi rabaton, eĉ ne de centimo. Mi rigardus tion kiel honton. Mi diris al mi: «Necesas, ke vi mem perlaboru ĝin..., ke neniu povu validigi rajton je ĝi.» Kaj timante, ke alia povus ekhavi la ideon aĉeti ĝin, mi metis ĝin en apartan skatoleton, dirante al patro Mel-hior, ke mi konas aĉetonton por tiu horloĝeto.

Ĉiu devas nur kompreni, ke ĉiuj tiuj historioj pri la milito eniris ĉe mi tra unu orelon kaj eliris tra la alia. Laborante mi imagis la ĝojon de Trinel. Dum kvin monatoj mi havis nur tion antaŭ la okuloj. Mi bildigis al mi ŝian mienon, kiam ŝi estis ricevonta mian donacon, kaj mi demandis min: «Kion ŝi diros?»

Jen mi bildigis al mi, ke ŝi ekkrios: «Ho, Josef, pri kio do vi pensas? Tio estas tro belo kaj tro multekostas por mi. Ne, ne, mi ne povas akcepti tian belan poŝthorloĝon!»

Tiam en mia revo mi devigis ŝin akcepti ĝin. Mi glitis ĝin en la poŝon de sia antaŭtuko

dirante: «Nu, Trinel, ĉu vi do volas ĉagreni min?» Mi ja vidas, ke ŝi deziras ĝin, kaj ŝi diris tion al mi nur por ŝajni rifuzi ĝin.

Jen mi bildigis al mi ŝian vizaĝon tute ruĝa. Ŝi levis la manojn, dirante: «Sinjoro Dio! Nun, Josef, mi vidas, ke vi vere amas min!» Kaj ŝi kisis min sur ambaŭ vangojn kun larmoj en la okuloj. Mi estis tre kontenta. Kaj onklino Gredel aprobis ĉion.

Konczadire, mil similaj pensoj pasis tra mia kapo, kaj la vesperon, enlitiĝante, mi pensis: «Ne estas pli feliĉa viro ol Josef Seitz! Jen nun vi povas fari maloftan donacon al Trinel per via laboro. Kaj certe ŝi ankaŭ preparos ion por via nomfesto, ĉar ŝi pensas nur pri vi. Vi ambaŭ estas tre feliĉaj, kaj kiam vi estos geedziĝintaj, ĉio iros glate.» Tiaj ideoj tenerigis min. Neniaj mi spertis tiel grandan kontentecon.

Dum mi tiamaniere laboris, pensante nur pri mia feliĉeco, la vintro venis pli frue ol kutime en la komenco de novembro. Ĝi ne komenciĝis per neĝo, sed per seka malvarmo kaj forta frosto. En kelkaj tagoj falis ĉiuj folioj, la grundo duriĝis kiel ŝtono, kaj ĉio kovriĝis per prujno: la tegoloj, la pavimeroj kaj la vitroj.

Oni devis ekbruligi fajron en la laborĉambro por malhelpi la malvarmon enpenetri tra la fenestroj! Kiam la pordo estis momenton malfermita, la tuta varmo malaperis. La ligno kraketadis en la forno kaj brulis zumante kaj facile kiel pajlo, ĉar la kameno bone tiris.

Ĉiumatene mi rapidis lavi la vitrojn de la montrofenestro per varma akvo. Apenaŭ mi refermis la fenestron, linioj de prujno rekovris ĝin. Ekstere mi aŭdis la homojn kuri spirante, la nazon kaŝitan en la alta kolumo de sia mantelo kaj la manojn en la poŝoj. Neniu haltis, kaj la pordoj de la domoj rapide refermiĝis.

Mi ne scias, kien foriris la paseroj, ĉu ili estas vivaj aŭ senvivaj, sed eĉ ne unu pepetis sur la kamenoj, kaj krom la vek- kaj vespersignalo, kiujn oni resonigis en la kazerno, nenia alia bruo perturbis la silenton.

Ofte kiam la fajro agrable kraketadis, sinjoro Gulden subite ĉesis labori kaj, rigardante momenton la blankajn vitrojn, ekkriis:

«Niaj povraj soldatoj! Niaj povraj soldatoj!»

Li diris tion per tiel trista voĉo, ke mi sentis mian koron kuntiriĝi, kaj mi respondis:

«Sed, sinjoro Gulden, nun ili verŝajne estas en Pollando, en bonaj kazernoj. Ĉar estas nepenseble, ke homaj estaĵoj povas elteni tian malvarmegon.»

«Tian malvarmegon!» li diris, «Jes, en nia lando estas malvarme, tre malvarme pro la ventoj kiuj blovas de la montaro. Tamen, kio

estas tiu ĉi malvarmo kompare al tiu en la nordaj landoj, en Rusio kaj Pollando? Donu Dio, ke ili

foriris sufiĉe frue! Dio mia! Dio mia! Kian pezan taskon portas tiuj kiuj devas gvidi la homojn!»

Tiam li silentis, kaj dum multaj horoj mi pensadis pri tio, kion li diris al mi. Mi bildigis al mi niajn soldatojn kurantajn survoje por varmigi sin. Sed miaj pensoj ĉiam revenis al Trinel, kaj de tiam mi ofte pensis ke, kiam homo estas feliĉa, la malfeliĉo de alia malmulte tuŝas lin, ĉefe dum juneco, kiam la pasioj estas pli fortoj kaj la sperto de grandaj mizeroj ankoraŭ mankas.

Post la frosto falis tiom da neĝo, ke la kurieroj estis haltigataj de ĝi sur la deklivo de Quatre-Vents. Mi timis, ke mi mem ne povos iri al Trinel la tagon de ŝia nomfesto. Sed du rotoj da infanterio eliris kun pioĉoj kaj ŝoveliloj kaj fosis vojon tra la duriĝinta neĝo por lasi trapasi la veturilojn, kaj tiu vojo restis ĝis la komenco de la monato aprilo 1813.

Tamen la nomfesto de Trinel proksimiĝis de tago al tago, kaj mia feliĉeco pligrandiĝis laŭproportio. Mi jam havis la tridek kvin frankojn, sed mi ne sciis, kiel diri al patro Gulden, ke mi estas tiu aĉetonto de la horloĝo. Mi preferus gardi ĉion sekreta, ĉar tedis min, ke mi devas paroli pri tio.

Finfine, la antaŭtagon de la festo, inter la sesa kaj la sepa vespere, dum ni laboris en silento kun la lampo staranta inter ni, mi subite faris decidon kaj diris:

«Vi scias, sinjoro Gulden, ke mi parolis al vi pri aĉetonto por la malgranda arĝenta horloĝo en la montrofenestro.»

«Jes, Josef,» li respondis trankvile, «sed li ankoraŭ ne venis ĝis nun.»

Tiam li rektiĝis, tute mirigita. Mi eligis la tridek kvin frankojn kaj metis ilin antaŭ lin sur la labortablon. Li rigardis min.

«Sed,» li diris, «tio ne estas taŭga horloĝo por vi, Josef. Kion vi bezonas estas granda horloĝo, kiu bone plenigas vian poŝon kaj indikas ankaŭ la sekundojn. Tiuj malgrandaj horloĝoj estas por virinoj.»

Mi ne sciis, kion respondi.

Revinte kelkajn momentojn, sinjoro Gulden ekridis.

“Ha, bone, bone,» li diris, “nun mi komprenas: morgaŭ estas la nomfesto de Trinel! Jen do kial vi laboris tage kaj nokte! Jen, reprenu tiun monon, mi ne volas ĝin.»

Mi estis tute konfuzita.

«Sinjoro Gulden, mi dankas vin,» mi diris al li, «vi pravas: tiu horloĝo estas por Trinel, kaj mi estas tute kontenta, ke mi perlaboris ĝin. Vi ĉagrenus min, se vi rifuzas la monon. Tiam ĝi estus via donaco al Trinel kaj ne la mia.»

Mi same volonte tute ne prenis la horloĝon.»

Li diris nenion kaj prenis la tridek kvin frankojn. Tiam li malfermis sian tirkeston, kaj elek-

tis belan arĝentan ĉenon kun du etaj arĝentaj ŝlosiletoj, kiujn li fiksas al la horloĝo. Post tio li enfermis la tuton en vinruĝa skatoleto kaj metis rozkoloran rubandeton ĉirkaŭ ĝin. Li faris ĉion malrapide kaj kvazaŭ tenerigita. Fine li donis la skatoleton al mi.

«Tio estas tre bela donaco, Josef,» li diris. «Trinel certe konsideros sin tre feliĉa, havante amanton kiel vin. Ŝi estas honesta knabino. Nun ni vespermanĝu. Kovru la tablon, dum mi metos la kaserolon sur la fajron.»

Ni faris tion. Tiam sinjoro Gulden prenis el la ŝranko botelon de sia vino de Metz, kiun li gardis por specialaj cirkonstancoj, kaj ni vespermanĝis kiel kamaradoj, ĉar dum la tuta vespero li ne ĉesis paroli al mi pri la bona malnova tempo de sia juneco. Li rakontis al mi, ke ankaŭ li havis amatinon, sed ke en la jaro 1792 li devis foriri kiel soldato en la amasa rekrutado pro la invado de la prusoj, kaj ke ĉe lia reveno en Fénétrange li trovis ŝin edziniĝinta al alia, kio estis tute komprenebla, ĉar li neniam dekla-ris al ŝi sian amon. Tio kaŭzis al li tiel grandan ĉagrenon, ke li preferis resti fidela al tiu tenera memoro ol edziĝi al alia knabino.

Li parolis pri tio kun grava mieno. Mi aŭs-kultis lin, revante pri Trinel, kaj nur kiam sonis la deka, dum preterpasis la trupanoj kiuj devis anstataŭi la gardopostenulojn ĉiujn dek minu-tojn pro la granda malvarmo, ni metis du gran-dajn ŝtipojn sur la fajron kaj enlitiĝis.

III

La morgaŭon 18-an de decembro mi vekliĝis je la sesa matene. Estis terure malvarme. Mia malgranda fenestro estis kovrita per prujno kvazaŭ per blanka tuko.

La antaŭvesperon mi estis malfaldinta sur la dorson de seĝo mian ĉielbluan jaketon kun hirundovosto, mian pantalonon, mian kaproharan veŝton, mian blankan ĉemizon kaj mian belan kravaton el nigra silko. Ĉio estis preta. Miaj ŝtrumpoj kaj bone poluritaj ŝuoj troviĝis ĉepiede de mia lito. Mi devis ellitiĝi kaj vesti min, sed la malvarmego kiun mi sentis en la vizaĝo, la vido de tiuj vitroj kaj la granda silento ekstere igis min tremeti. Se ne estus estinta la nomfesto de Trinel, mi estus restinta tie ĝis la tagmezo. Sed subite tiu ideo igis min salti el la lito kaj rapide kuri al la granda fajenca forno, en kiu preskaŭ ĉiam restis kelkaj ruĝe ardantaj karbopeĉoj sub la cindroj de la antaŭa vespero. Mi trovis du aŭ tri da ili. Mi rapide forigis la cindrojn, metis sur ilin kelkajn sekajn branĉopecetojn kaj du grandajn ŝtipojn. Post tio mi rekuris al la lito kaj rekuŝiĝis.

Malantaŭ siaj longaj kurtenoj, la litkovrilojn tiritajn sur la nazo kaj la kotonan ĉapon ĝis super la okuloj, Sinjoro Gulden jam estis momenton vekiginta. Li aŭdis min kaj kriis al mi:

«Josef, neniam estis tiel malvarme de kvardek jaroj. Kian vintron ni estas havontaj!»

Sed mi ne respondis lin. Mi rigardis de malproksime, ĉu la fajro ekbrulos: la ardantaj karbopecoj bone lumis, kaj oni aŭdis la fornon tiri aeron. Subite, per obtuza eksplodeto, la fajro ekbrulis. La bruo de la flamoj gojigis min, sed necesis pli ol duona horo por senti iomete varmeton aeron.

Finfine mi ellitiĝis kaj vestis min. Sinjoro Gulden denove parolis. Mi kontraŭe pensis pri Trinel. Mi estis preta je la oka kaj mi volis eliri, kiam sinjoro Gulden, kiu vidis min iri kaj veni, kriis:

«Josef, pri kio do vi pensas, malfeliĉulo? Ĉu en tiuj vestaĵoj vi volas iri al Quatre-Vents? Sed vi jam estos senviva mezvoje! Eniru en mian atelieron kaj prenu tie la grandan mantelon, miajn mufgantojn kaj la ŝuojn kun la duobla plandumo kaj interne garnitajn per flanelo.»

Mi trovis min tiel bela, ke mi demandis min, ĉu mi devas sekvi lian konsilon aŭ ne, kaj li, vidante tion, diris:

«Aŭskultu, hieraŭ oni trovis frostiĝintan viron sur la deklivo de Vechem. Kuracisto Steinbrenner diris, ke li resonis kiel peco da seka ligno, kiam li frapis sur lin. Estis soldato. Li forlasis la vilaĝon inter la sesa kaj la sepa. Je la oka oni trovis lin. Tiel rapide tio okazis. Se vi volas havi la nazon kaj orelojn frostiĝintaj, vi devas nur elirti, kia vi estas.»

Mi bone komprenis, ke li pravas. Mi surmetis liajn pezajn ŝuojn, ĵetis la ŝnurojn de la mufgantoj trans miajn ŝultrojn kaj metis la mantelon super ĉion. Tiel vestita mi eliris, post kiam mi dankis sinjoron Gulden, kiu avertis min ne reveni tro malfrue, ĉar la malvarmo pligrandiĝas dum la nokto, kaj granda kvanto da lupoj ŝajnis esti transirintaj Rejnnon sur la glacio.

Mi ankoraŭ ne estis antaŭ la pregejo, kiam mi levis la kolumon el vulpopelto de la mantelo por protekti miajn orelojn. La malvamo estis tiel morda, ke mi kvazaŭe sentis kudrilojn en la aero. Kaj mi ŝrumpis malgraŭ mi mem ĝis la piedplandoj.

Sub la Germana Pordego mi ekvidis la gardosoldaton en granda griza mantelo, retiriĝinta en la fonon de sia niĉo. Li premis la fusilon per la manikoj por ne ekhavi frostiĝintajn fingrojn pro la glacimalvarma fero. Du glacikonusetoj pendis de liaj lipharoj. Neniu estis sur la ponto nek antaŭ la vojimpostejo. Iom pli malproksime, ekster la avanceo¹⁰ mi vidis tri veturilojn sur la vojo. Kun siaj grandaj blankaj gudrotukoj

kovritaj per prujno ili similis al gigantaj pankorboj. Oni estis maljunginta la ĉevalojn kaj forlasinta la veturilojn meze de la vojo. Ĉio ŝajnis mortinta, ĉiuj estaĵoj kaŝis sin, kunpremante sin en ia truo. Mi aŭdis nur la krietadon de la neĝo sub miaj piedoj.

Kurante preter la tombejo, kies krucoj kaj tomboj siluetiĝis kontraŭ la neĝo, mi diris al mi mem: «Al tiuj kiuj ripozas ĉi tie ne plu estas malvarme!» Mi premis la mantelon kontraŭ mian bruston, kaj kaŝis la nazon en la pelto, dankante sinjoron Gulden pro la bona ideo, kiun li havis. Mi ankaŭ profindiĝis miajn manojn en la mufgantojn ĝis la kubutoj, galopante tra la granda, kvazaŭ senfina tranĉeo, kiun fosis la soldatoj ekde la urbo ĝis la vilaĝo Quatre-Vents. Estis muroj el glacio. Sur kelkaj lokoj la neĝo estis forblovita de la forta vento, kaj mi povis vidi la fundon de la ravino Fiquet kaj trans ĝi la arbaron de kverkoj kaj la bluetan montaron kvazaŭ proksimiĝintajn al mi pro la klareco de la aero. Oni ne plu aŭdis boji la hundojn de farmbienoj. Ankaŭ al ili estis tro malvarme.

Malgraŭ ĉio pensoj pri Trinel varmigis mian koron, kaj baldaŭ mi malkovris la unuajn domojn de Quatre-Vents. La kamenoj kaj la pajlaj tegmentoj dekstre kaj maldekstre de la vojo apenaŭ superis la neĝomontojn, kaj laŭ-longe de la muroj ĝis la fino de la vilaĝo la homoj estis farintaj tranĉeojn por povi iri unuj ĉe la aliajn. Sed tiun tagon ĉiu familio restis en sia domo, sidante antaŭ la fajrejo, kaj oni vidis la rondajn vitretojn kvazaŭ markitaj de ruĝaj punktoj pro la granda fajro interne. Antaŭ ĉiu pordo kuŝis garbo de pajlo por malhelpi la mal-varmegon enpenetri sub ĝi.

Ĉe la kvina pordo maldekstre mi haltis por demeti miajn mufgantojn. Tiam mi malfermis kaj refermis la pordon. Estis la domo de mia onklino Gredel Bauer, la vidvino de Mathias Bauer kaj la patrino de Trinel.

Kiam mi eniris tremante, onklino Gredel, kiu sidis antaŭ la fajrejo, turnis la kapon, tute mirigita pro mia granda vulpokolumo, dum Trinel, dimanĉe vestita per sia bela striita jupo, la ŝalo kun longaj franĝoj kovranta la dorson kaj krucigita sur la brusto, ruĝa antaŭtuko streĉe ligita ĉirkaŭ ŝia tre maldika talio, bela kufo el blua silko kaj rubandoj el nigra veluro enfermantaj ŝian rozkoloran vizaĝon kaj ŝiajn blondajn harojn, kun sia iomete kuspita nazo kaj siaj dolĉaj okuloj, ekkriis: «Josef!»

Kaj sen rigardi duan fojon ŝi alkuris kisi min, dirante:

«Mi ja sciis, ke la varmego ne malhelpos vin veni!»

Mi estas tiel feliĉe, ke mi ne povis paroli. Mi demetis mian mantelon, kiun mi pendigis kun la

¹⁰ Elstara parto de la remparo (neologismo)

mufgantoj sur la muro. Mi ankaŭ demetis la pezajn ŝuojn de sinjoro Gulden, sentante, ke mi estas tute pala pro feliĉeco. Mi estus volinta trovi kelkajn agrablajn vortojn, sed ĉar ili ne venis, mi subite diris:

«Jen, Trinel, io por vi okaze de via nomfesto. Sed necesas, ke vi ankoraŭfoje kisu min antaŭ ol malfermi la skatoleton».

Ŝi etendis al mi siajn belajn rozkolorajn van-
gojn kaj tiam proksimiĝis al la tablo. Ankaŭ onklino Gredel venis rigardi. Trinel malligis la rubandon kaj malfermis la skatoleton. Mi staris malantaŭ ŝi, kaj mia koro saltetadis, saltetadis... Mi timis en tiu momento, ke la horloĝo ne estas sufiĉe bela. Sed post momento Trinel, kunmetante la manojn, suspiris mallaŭte.

«Ho, Dio mia, kiel bela !... Estas horloĝo!»

«Jes,» rimarkis onklino Gredel, «kaj ĝi estas vere belega. Mi neniam vidis tiel belan horloĝon. Oni dirus, ke ĝi estas el arĝento!»

«Sed ĝi estas el arĝento!» replikis Trinel, turniĝante kaj rigardante min por ekscii la veron.

Tiam mi diris :

«Ĉu vi kredas, onklino Gredel, ke mi kapablus donaci horloĝon el arĝentizita kupro al la knabino kiun mi amas pli ol mian propran vivon? Se mi kapablus fari tion, mi malestimus min mem kiel la koton sub miaj ŝuoj.»

Trinel aŭdante tion, metis ambaŭ brakojn ĉirkaŭ mian kolon, kaj dum ni tiel staris, mi pensis: «Jen la plej bela tago de mia vivo!»

Mi ne plu povis delasi ŝin. Tiam onklino Gredel demandis min:

«Kia bildo estas do sur la ciferplato?»

Sed mi ne havis emon tuj respondi, kaj nur, kiam finfine ni estis sidantaj unu flanke de la alia, mi prenis la horloĝon kaj diris:

«Tiu pentraĵo, onklino Gredel, prezentas du gejunulojn, kiuj amas sin pli ol oni povas diri: Josef Seitz kaj Trinel Bauer. Josef ofertas bukedon da rozoj al sia amatino Trinel, kiu etendas la manojn por ricevi ilin.»

Kiam onklino Gredel estis atente rigardinta la horloĝon, ŝi diris:

«Venu, Josef, por ke ankaŭ mi ĉirkaŭbraku vin. Mi ja komprenas, ke vi devis multe labori kaj ŝpari por tiu horloĝo, kaj mi opinias, ke ĝi estas tre bela. Vi estas bona laboristo, kaj tio estas honoro por ni.»

Mi ĉirkaŭbrakis ŝin tre kore, kaj ekde tiu momento ĝis la tagmezo mi ne plu delasis la manon de Trinel: ni estis feliĉaj, kiam ni rigardis unu la alian.

Onklino Gredel iris kaj venis antaŭ la fajrejo por prepari *pfankuchen* (krespojn) kun sekaj prunoj kaj *küchlen* (kuketojn) trempitajn en vino

kun kanelo, kaj aliajn bongustaĵojn. Sed ni ne atentis pri tio, kaj nur kiam la bona onklino, surmetante sian ruĝan kazakenon¹¹ kaj siajn nigrajn botetojn, ekkriis tute kontenta: «Ek, miaj infanoj, al la tablo!» ni vidis la belan tablotukon, la grandan supujon, la kruĉon da vino kaj la tre rondajn kaj tre orkolorajn krespojn sur grandaj teleroj en la mezo de la tablo. Tiu vidaĵo ĝojigis nin, kaj Trinel diris :

«Josef, vi sidiĝu antaŭ la fenestron, por ke mi bone vidu vin. Nur unue surmetu al mi la horloĝon, ĉar mi ne scias kiel fari tion.»

Mi metis la ĉenon ĉirkaŭ ŝian kolon, tiel ke la horloĝo pendis sur ŝia brusto. Tiam, sidiĝinte ĉe la tablon, ni manĝis kun bona apetitio. De ekstere oni aŭdis nenion. La fajro kraketadis en la fajrejo. Estis agrable en tiu granda kui-rejo, kaj la griza, iomete sovaĝa kato rigardis nin de fore tra la balustrado de la ŝtuparo en la fono sen aŭdaci malsupreniri.

Post la tagmanĝo Trinel kantis la kanton *Der liebe Gott*¹². Ŝi havis dolĉan voĉon, kiu supreniris al la ĉielo. Mi kunkantis tre mallate, nur por subteni ĝin. Onklino Gredel, kiu neniam povis sidi sen fari ion, eĉ la dimanĉon, estis komen-cinta ŝpini La zumado de la rado plenigis la silenton, kaj ni estis tute tenerigitaj. Kiam la kanto estis finita, ni komencis alian. Je la tria la onklino servis al ni kuketojn kun kanelo. Ni kune mordis en ili, ridante kiel beatuloj, kaj iafoje la onklino ekkriis :

«Nu, nu, ĉu oni ne dirus, ke vi estas veraj infanoj?»

Ŝi ŝajnis koleriĝi, sed oni bone vidis laŭ la sulketoj ĉe ŝiaj okuloj, ke ŝi ridas profunde en sia koro.

Tio daŭris ĝis la kvara posttagmeze. Tiam la nokto komencis veni. Ombroj eniris tra la malgrandaj fenestroj, kaj pensante, ke ni devos baldaŭ forlasi unu la alian, ni sidiĝis malĝojaj ĉe la farejo, kie dancadis ruĝaj flamoj. Trinel premis mian manon. Klinante la frunton, mi estus doninta ĉion en la mondo, se mi povus resti. Tio jam daŭris pli ol duona horo, kiam onklino Gredel fine diris :

«Josef, estas tempo foriri. La luno ne leviĝos antaŭ noktomezo. Ekstere baldaŭ fariĝos mal-lume kiel en puto, kaj ĉe tia granda malvarmo malfeliĉo facile okazas...»

Tiuj paroloj donis al mi baton, kaj mi sentis, kiel Trinel retenis mian manon, sed mi sciis, ke onklino Gredel pli pravos ol ni.»

«Tio sufiĉas,» ŝi diris, ekstarante kaj dekro-ĉante la mantelon de la muro. «Vi revenos dimanĉon.»

Necesis ja denove surmeti la pezajn ŝuojn, mufgantojn kaj la mantelon de sinjoro Gulden.

¹¹ Speco de pompa virina vestaĵo mallarĝa en la talio kun mallongaj baskoj (neologismo)

¹² En Esperanto: La bona Dio

Mi volonte estus daŭriginta tiun kuneston dum cent jaroj, sed malfeliĉe la onklino helpis min. Kiam la granda kolumo staris kontraŭ miaj oreloj, ŝi diris:

«Kisu nin, Josef.»

Unue mi kisis ŝin, poste Trinel, kiu diris nenion. Post tio, mi malfermis la pordon, kaj la subite eniranta terura malvarmo avertis min, ke mi ne devas atendi.

«Rapidu, Josef, kaj bonan vesperon!» kriis Trinel al mi. «Ne forgesu veni dimanĉon!»

Mi turnis min por svingi la manon kaj mi komencis kuri sen levi la kapon, ĉar la malvarmo estis tia, ke miaj okuloj ekploris malantaŭ la longaj haroj de la kolumo.

Tiamaniere mi kuris dum dudek minutoj, apenaŭ kuraĝante spiri, kiam raŭka voĉo, voĉo de ebrulo, de fore kriis al mi: «*Qui vive*¹³?»

Tiam mi rigardis en la grizan nokton kaj ekvidis je kvindek paŝoj antaŭ mi la kolportiston Pinnacle kun lia granda dorskorbo, lia ĉapelo el lutropelto, liaj lanaj gantoj kaj lia bastono kun fera pinto. La lanterno, pendanta de la portrimeno de la korbo, prilumis lian ebrulan vizaĝon, sian mentonon kovritan per flavaj haroj kaj sian dikan ruĝan nazon en formo de kandelestingilo. Li larĝe malfermis siajn malgrandajn okulojn de lupo ripetante: «*Qui vive?*»

Tiu pinnacle estis la plej granda mizerulo kaj fripono de la regiono. La antaŭan jaron li eĉ faris malbonan serĉon al sinjoro Gulden, kiu postulis de li la prezon de horloĝo, kiun Pinnacle promesis porti al sinjoro Anstett, la pastro de Homert, kies monon li enpoŝigis, dirante, ke li donis ĝin al mi. Sed kvankam la fripono asertis antaŭ la distrikta juĝisto, levante la dekstran manon, ke li pagis la monon, sinjoro Gulden bone sciis, ke la kontraŭo estas vera, ĉar tiun tagon nek li, nek mi eliris el la domo. Krome, tiu Pinnacle estus volinta danci kun Trinel dum la lasta kermeso en Quatre-Vents, sed ŝi rifuzis, konante Pinnacle kaj la historion de la horloĝo. Cetere ŝi ĉiam restis ĉe mia brako.

Tiu malicega fripono do nutris rankoron kontraŭ mi, kaj subite renkonti lin ĉi tie, meze de la vojo for de la urbo kaj ĉia helpo, kun lia sorpa bastono provizita per fera pinto, ne estis ĝojige por mi. Feliĉe, la padeto, kiu turniĝas ĉirkaŭ la tombejon, troviĝis je mia maldekstra flanko, kaj sen respondi mi rapide kuris tien. La neĝotavolo estis tiel alta, ke ĝi atingis mian ventron. Tiam, divenante, kiu mi estas, li furioze ekkriis:

«Ha! Ha! Estas la eta lamulo! Halt! Halt! Necesas, ke mi deziru al vi bonan vesperon! Vi venas de la domo de Trinel, horloĝoŝtelisto!»

Mi saltis kiel leporo trans la neĝamasojn. Unue li provis sekvi min, sed lia korbo ĝenis lin.

Tial, vidante, ke mi gajnis terenon, li metis ambaŭ manojn ĉirkaŭ la buŝon, kaj kriis:

«Estas egale, lamulo, estas egale. Vi tamen havos vian rekompencan: la konskripcio proksimiĝas, la granda konskripcio de la unuokuloj, lamuloj kaj ĝibuloj! Vi foriros! Vi restos tie for kun ĉiuj aliaj!»

Samtempe li daŭrigis sian vojon, ridante kiel ebrulo, kio li vere estis. Preskaŭ ne plu havante la forton spiri, mi reatingis la vojon ĉe la komenco de la neĝokoridoro kaj dankis la ĉielon, ke mi trovis la malgrandan aleon tiel proksime de mi, ĉar tiu Pinnacle, bone konata pro la facileco kun kiu li tiris sian tranĉilon kiam li batalis, estus povinta doni al mi malbonan frapon.

Malgraŭ la movojn kiujn mi faris, miaj piedoj frostiĝis sur la dikaj plandumoj, kaj mi rekomencis kuri.

Tiun nokton la akvo en la citernoj kaj la vino en la keloj de Falsburgo frostiĝis, kion oni ne spertis de pli ol sesdek jaroj.

Apud la avanco, ĉe la unua ponto kaj sub la Germana Pordego, la silento ŝajnis al mi ankoraŭ pli profunda ol ĉi-matene. La nokto aldonis ion teruran al ĝi. Kelkaj steloj briladis inter la grandaj nuboj, kiuj ŝvebis super la urbo. Sur la strato mi renkontis neniun, kaj kiam mi alvenis malsupre en nia strato, ŝajnis al mi, ke tie estas pli varme. Tamen la elfluejo en la korto kiu laŭiris la muron, estis frostinta. La pordo de la domo ne estis ŝlosita. Mi eniris kaj atendis kelkajn momentojn por respiri. Tiam mi supreniris tra la mallumo, la manon sur la balustrado de la ŝtuparo.

Kiam mi malfermis la pordon de la loĝoĉambro, la bona varmo de la forno reĝojigis min. Sinjoro Gulden sidis antaŭ la fajro en sia fotelo, sian ĉapon el nigra silko repuŝitan sur la nukon kaj la manojn sur la genuoj.

«Ĉu estas vi, Josef?» li demandis sen turni la kapon.

«Jes, sinjoro Gulden,» mi respondis «Estas agrable ĉi tie. Kia malvarmo ekstere! Neniame ni havis tian vintron.»

«Ne,» li diris en grava tono, «estas vintro kiun ni longe memoros.»

Tiam mi eniris la atelieron por remeti la mantelon, la mufgantojn kaj la ŝuojn sur ilian lokon. Mi intencis rakonti al li mian renkonton kun Pinnacle kaj reiris en la loĝoĉambron, kiam li demandis al mi:

«Ĉu vi bone amuziĝis, Josef?»

«Ho jes, kaj onklino Gredel kaj Trinel donis al mi siajn salutojn por vi.»

«Nu des pli bone, des pli bone,» li diris. «La

¹³ En Esperanto: 'Kiu vivu?' Franca militista pasvorto, al kiu oni devas respondi: 'Francio!'

junuloj pravas, ke ili amuziĝas, ĉar, kiam oni maljuniĝas, suferinte multe kaj vidinte grandajn maljustaĵojn, egoismon kaj malfeliĉecon, ĉio estas fuŝita anticipe.»

Li diris tiujn vortojn al si mem, rigardante en la flamojn. Mi neniam vidis lin tiel malĝoja, kaj mi demandis:

«Ĉu vi malsanas, sinjoro Gulden?»

«Jes, jes, jen la grandaj militistaj nacioj. Jen kio estas gloro!»

Li skuis sian kapon kaj klinis sin, dum li, revante, kuntiris siajn grandajn grizajn brovojn. Mi ne sciis, kion mi devas pensi pri tio ĉi, kiam rerektiĝinte, li diris al mi:

«En tiu momento, Josef, estas kvarcent mil familioj kiuj ploras en Francio: nia Granda Armeo pereis en la glacio de Rusio. Ĉiuj tiuj viroj, junaj kaj fortaj, kiujn ni vidis preteriri dum du monatoj, kuŝas sub la neĝo. La novaĵo alvenis ĉi-posttagmeze. Kiam oni pensas pri tio, oni malĝojiĝas. Estas terure!»

Mi silentis. Kion mi vidis plej klare, estas, ke baldaŭ ni havos novan konskripcion kiel post ĉiuj militiroj, kaj ke eble ĉi-foje ankaŭ la lamuloj devos servi en la armeo. Tiu ĉi penso paligis min, kaj la antaŭdiro de Pinnacle starigis miajn harojn sur la kapo.

«Iru do, Josef, kaj trankvile enlitiĝu, » diris al mi patro Melhior. «Mi ankoraŭ ne dormemas, mi volas ankoraŭ iomete sidiĝi ĉi tie. Ĉio ĉi profunde tuŝas min. Ĉu vi rimarkis nenion specialan en la urbo?»

«Ne, sinjoro Gulden.»

Mi eniris mian dormoĉambron, malvestis min kaj kuŝiĝis sur la liton. Longe mi ne povis dormi, revante pri la konskripcio, pri Trinell, pri tiuj centmiloj da junaj viroj enterigitaj en la neĝon, kaj diris al mi mem, ke estus pli bone por mi fuĝi al Svislando.

Proksime de la unua mi aŭdis sinjoro Gulden, kiu enlitiĝis siavice. Kelkajn momentojn poste mi endormiĝis per la graco de Dio.

IV

Kiam, je la sepa matene, mi eniris la laborĉambron de sinjoro Gulden, por komenci labori, li ankoraŭ estis en sia lito kaj tute deprimita.

«Josef, ne estas bone al mi. Ĉiuj tiuj teruraj historioj malsanigas min. Mi ne dormis.»

«Ĉu mi faros teon por vi?» mi demandis.

«Ne, mia infano, ne utilas. Zorgu nur iom pri la fajro. Mi ellitiĝos poste. Sed je tiu ĉi horo necesos iri reĝustigi la horloĝojn en la urbo, ĉar estas lundo. Mi ne povas iri tien, ĉar vidi

tiom da honestaj homoj en tia mizero, homoj kiujn mi konas de kvindek jaroj, igus min tute malfeliĉa. Aŭskultu, Josef, prenu la ŝlosilojn kiuj pendas malantaŭ la pordo kaj iru vi en mia loko. Mi provos iomete dormi kaj senti min pli bone... Se mi povus dormi unu horon aŭ du, tio farus bonon al mi.»

Remetante lignon en la fornon, mi prenis la mantelon kaj la mufgantojn, fermis la kurtenon de la lito de sinjoro Gulden kaj eliris, la ŝlosilaron en mia poŝo. La malsaneto de patro Melhior iomete ĉagrenis min, sed unu penso konsolis min. Mi diris al mi mem: «Vi grimpos sur la sonorilturon de la urbo kaj de tie supre vi vidos la domon de onklino Gredel kaj Trinell.»

Revante pri tio, mi alvenis ĉe la domo de la sonorigisto Braunstein, kiu loĝis ĉe angulo de placeto en malnova, kadukiĝinta barako. Liaj du filoj estis teksistoj, kaj en la malnova doma-ĉo oni aŭdis grinĉi la teksilojn kaj sibli la nave-dojn de mateno ĝis vespero. La avino, tiel maljuna, ke oni ne plu vidis ŝiajn okulojn, dor-mis en antikva fotelo, sur kies dorso sidis pigo. Kiam patro Braunstein ne devis sonorigi pro ia bapto, enterigo aŭ geedziĝo, li legis sian alma-nakon malantaŭ la rondaj vitretoj de la kruc-fnestro.

Flanke de lia barako troviĝis loĝejo sub la tegmento de malnova halo, kie laboris la ŝuflikisto Koniam, kaj pli fore troviĝis la montrofenestroj de la buĉistoj kaj fruktvendistinoj.

Mi do alvenis ĉe la Braunstein-oj. Vidante min, la maljunulo ekstaris kaj diris:

«Ĉu estas vi, sinjoro Josef?»

«Jes, patro Braunstein, mi venas anstataŭ sinjoro Gulden, kiu sentas sin malsaneta.»

«Ha ! Bone, bone, estas la samo.»

Li surmetis sian malnovan puloveron kaj sian grandan lanan ĉapon, forpelinte la katon, kiu dormis sur ĝi. Tiam li prenis el tirkesto la grandan ŝlosilon de la sonorilturo, kaj ni eliris.

Mi estis feliĉa retroviĝi en la libera aero malgraŭ la malvarmo, ĉar en tiu truo ĉio estis griza pro vaporo, kaj oni havis tiom da peno spiri kiel en marmito. Mi neniam komprenis, kiel tiuj homoj povis vivi tie tiamaniere.

Fine ni suriris la straton, kaj patro Braunstein demandis mi:

«Ĉu vi jam konas la grandan malfeliĉon kiu okazis en Rusio, sinjoro Josef?»

«Jes, patro Braunstein, estas terure.»

«Ha jes!» li diris. «Kompreneble. Sed tio havigos multajn mesojn al la pregejo, ĉar ĉiuj volos diri mesojn por sia infano, des pli ke li mortis en lando de paganoj.»

«Sendube, sendube,» mi replikis, kaŝante mian miron.

Ni transiris la placon, kaj antaŭ la urbodomo,

fronte al la gardostarantoj, jam staris multaj personoj, kamparanoj kaj urbanoj, legantaj iun proklamilon. Ni suriris la platformon kaj eniris la preĝejon, kie pli ol dudek virinoj, junaj kaj maljunaj, surgenuis sur la planko malgraŭ la terura malvarmo.

«Ĉu vi komprenas,» demandis Braunstein al mi, «kion mi volis diri al vi ? Ili jam venas preĝi, kaj mi estas certa, ke la duono jam estas tie de kvin horoj.»

Li malfermis la pordeton de la turo, tra kiu oni supreniris al la orgeno, kaj ni komencis grimpi supren en la mallumo. Alveninte ĉe la orgeno, ni turniĝis maldekstren ĉe la blovilo kaj supreniris ĝis la sonoriloj.

Mi estis kontenta revidi la bluan ĉielon kaj spiri pli puran aeron, ĉar la malbonaodoro de la vespertoj, kiuj loĝis en la turo, preskaŭ sufo-kis min. Sed kia malvermego en tiu kaĝo malfermita al ĉiuj ventoj, de kie la vido etendiĝis ĝis dudek mejloj en la rondo, kaj kia blindiga lumo ĉe tiu neĝovetero ! La tuta urbo Falsbur-go kun siaj ses bastionoj, siaj tri duonlunoj¹⁴, siaj du avancoj, siaj kazernoj, siaj pulvejoj, siaj pontoj, siaj talusoj, siaj remparoj, sia granda Armilplaco kaj siaj malgrandaj domoj, bone envicigitaj, konturiĝis kiel sur blanka papero. Oni vidis ĝis en la kortoj, kaj mi, ankoraŭ ne kutimiĝinta al tia alteco, staris meze de la platformo pro timo ekhavi la ideon forflugi, kiel oni rakontas pri certaj homoj, kiuj freneziĝas pro granda alteco. Mi ne kuraĝus proksimiĝi al la horloĝo, kies pentrita ciferplato kaj montriloj troviĝis malantaŭe, se sinjoro Braunstein ne estis doninta al mi bonan ekzemplon, mi estus restinta tie al kroĉiĝinta al la trabo de la horloĝoj. Sed li diris al mi:

«Venu, sinjoro Josef, kaj rigardu: ĉu tio estas la ĝusta horo?»

Tiam mi eligis la grandan poŝhorloĝon de sinjoro Gulden, kiu montris la sekundojn, kaj mi konstatis, ke la turhorloĝo multe malfruas. Braunstein helpis min tiri la pesilojn, kaj tiam ni reĝustigis ĝin.

«La horloĝo ĉiam malfruas vintre,» li diris, «pro la fero, kiu maldilatiĝas.»

Alkutimiĝinte iomete al tiuj aferoj, mi komencis rigardi la ĉirkaŭaĵon: mi rekonis la barakojn de Bois-de-Chênes, la monton Bigel kaj fine Quatre-Vents sur la deklivo antaŭ mi kaj la domon de onklino Gredel. El la kameno blua fumrubando supreniris al la ĉielo. Kaj mi revidis la kuirejon: mi bildigis al mi Trinel en lignaj ŝuoj kaj lana jupo, ŝpinantan en angulo de la farejo kaj pensantan pri mi. Mi estis tiel tene-rigita, ke mi ne plu sentis la malvarmon. Mi ne povis depreni miajn okulojn de tiu kameno.

Patro Braunstein, kiu ne sciis, al kio mi rigardis, diris :

«Jes, sinjoro Josef, nun, malgraŭ la neĝo, ĉiuj vojoj estas kovritaj de homoj. La granda novaĵo jam disvastiĝis, kaj ĉiuj venas por ĝuste koni sian malfeliĉon.»

Mi vidis, ke li pravas: ĉiuj vojoj, ĉiuj padoj estis kovritaj de homoj, kiuj venis al la urbo. Kaj rigardante al la Armilplaco, mi vidis kreski la homamason antaŭ la gardistejo de la urbo-domo kaj la poŝtoficejo. Oni aŭdis la bruon de la voĉoj.

Fine, post lasta rigardo al la domo de Trinel, ni komencis turniĝi malsupren sur la malluma ŝtuparo kvazaŭ en puton. Alveninte ĉe la orgeno, ni vidis, ke ankaŭ la homamaso en la preĝejo multe pligrandiĝis: ĉiuj patrinoj, ĉiuj fratinoj, ĉiuj maljunaj avinoj, riĉaj kaj malriĉaj, surgenuis sur la preĝbenkoj. En la plej profunda silento ili preĝadis por tiuj kiuj estis en tre malproksima lando, oferante ĉion por revidi ilin ankoraŭfoje.

Unue mi ne bone komprenis tion, sed subite mi ekhavis la penson ke, se mi estus foririnta la pasintan jaron, ankaŭ Trinel kaj onklino Gredel surgenuis tie por petegi de Dio mian reve-non. Tio trairis mian koron, kaj mi sentis mian tutan korpon tremeti.

«Ni foriru! Ni foriru!» mi diris al patro Braunstein. «Tio estas terura.»

«Kio?» li demandis.

«La milito.»

Tiam ni malsupreniris la ŝtuparon kaj eliris tra la granda pordo, kaj mi transiris al Armilplacon por iri ĉe la sinjoron komandanton Meunier, dum Braunstein reiris hejmen.

Ĉe angulo de la urbodomo mi vidis spektaklon, kiun mi memoros mian tutan vivon. Tie pendis granda proklamilo. Pli ok kvincent personoj – urbanoj kaj kamparanoj, viroj kaj virinoj, starantaj unuj kontraŭ la aliaj, ĉiuj palaj – silente rigardis ĝin kun etenditaj koloj kiel ion teruran. Ili ne povis legi ĝin, kaj de tempo al tempo iu diris germane aŭ france:

«Ili tamen ne estas ĉiuj mortintaj!... Parto da ili tamen revenos.»

Aliaj kriis :

«Sed ni vidas nenion. Ni ne povas alproksimiĝi!»

Iu malica maljunulino, staranta malantaŭe, levis la manojn kaj kriis:

«Kristian... Aĥ, mia povra Kristian!»

Aliaj, kvazaŭ indignaj aŭdi tion, diris:

«Silentigu do tiun maljunulinon!»

Ĉiuj pensis nur pri si mem.

De malantaŭe ĉiam venis aliaj homoj tra la Germana Pordo.

Finfine Harmentier, la urba serĝento, venis el

¹⁴ Ekstera spaco en formo de duonluno en fortikaĵo

la gardejon kaj lokis sin supre de la ŝtuparo kun proklamilo tute simila al tiu kontraŭ la muro. Kelkaj soldatoj sekvis lin. Tiam ĉiuj kuris en lia direkto, sed la soldatoj retenis la unuajn, kaj serĝento Harmentier komencis legi tiun proklamilon, kiun oni nomis la 29-an bultenon, en kiu la imperiestro rakontis, ke dum la reti-riĝo el Rusio la ĉevaloj pereis per miloj ĉiu-nokte. Li diris nenion pri la viroj!

La urba serĝento legis malrapide. Neniu diris eĉ unu vorton. La maljunulino, kiu ne komprenis la francan, aŭskultis kiel la aliaj. Sed kiam venis la frazo «Nia kavalerio estis tiom senigita de ĉevaloj, ke oni devis kunigi la oficiojn al kiuj restis ĉevalon, por formi kvar rotojn de po cent kvindek viroj. La generaloj funkciis kiel kapitanoj, kaj la koloneloj kiel suboficioj. Kiam li legis tiujn tekstparton, kiu diris pli pri la mizero de la Granda Armeo ol la tuta resto, la krioj kaj ĝemoj aŭdiĝis de ĉiuj flankoj. Du aŭ tri virinoj svenis. Oni forkondukis ilin, subtenante ilin sub la akselejo.

Estas vere, ke la proklamilo aldonis: «La sano de Lia Imperiestra Moŝto neniam estis pli bona.»

Kio estis granda konsolo. Malfeliĉe oni ne povis redoni la vivon al tricent mil viroj, kiuj kuŝis sub la rusa neĝo. Tial la homoj foriris tute malĝojaj. Aliaj venis dekoje, kiuj aŭdis anko-raŭnenion, kaj de horo al horo Harmentier eliris por legi la bultenon. Tio daŭris ĝis la ves-pero, kaj ĉiufoje la samo okazis. Mi forkuris.

Mi estus preferinta scii nenion pri tio ĉi.

Tiam mi iris al la domo de la sinjoro loka komandanto. Enirante en lian salonon, mi vidis lin matenmanĝanta. Li jam estis maljuna viro, sed solida, kun ruĝa vizaĝo kaj bona apetito.

«Ha ! Estis vi, Josef ! » li ekkriis. «Sinjoro Gulden do ne venos?»

«Ne, sinjoro komandanto, li estas malsaneta, pro la malbonaj novaĵoj.»

«Ha! Bone, bone! Mi komprenas tion,» li diris, malplenigante sian glason. «Jes, estas malfeliĉe.»

Kaj dum mi relevis la globon de la kamenhorloĝo, li aldiris:

«Ba ! Diru al sinjoro Gulden, ke ni havos nian revenĝon... Diable, oni ne povas ĉiam venki. Por la dekkvin jaroj dum kiuj ni superis, estas nur juste, ke ni lasas al ili tiun malgrandan konsolon... Kaj plue, la honoro estas savita: ni ne estas venkitaj. Sen neĝo kaj malvarmo tiuj provraj kozakoj estus vidintaj ion tute alian... Sed paciencu: la kadroj estos baldaŭ replenigitaj, kaj tiam: atentu!»

Mi streĉis la horloĝon. La komandanto leviĝis de la tablo kaj venis rigardi, estante granda amatoro de horloĝoj. Li gaje pinĉis mian ore-lon, kaj rebutonumante sian grandan kapoton, kiun li estis malferminta por manĝi, li ekkriis, kiam mi estis retiriĝonta.

«Diru al sinjoro Gulden, ke li povos trankvile dormi La dancado rekomenciĝos en la printempo. Ili ne ĉiam havos la vintron kaj la kalmukojn ĉe sia flanko. Diru tion al li!»

«Jes, sinjoro komandanto,» mi respondis, fermante la pordon.

Lia dika figuro kaj lia bonhumora mieno konsolis min iomete. Sed en ĉiuj domoj en kiujn mi iris poste – ĉe la Harwich-oj, ĉe la Franz Toniaj, ĉe la Durlach-oj, – ĉie oni aŭdis nur plendojn. Precipe la virinoj estis konsternitaj. La viroj diris nenion kaj promenadis tien kaj reen kun klinita kapo, eĉ sen rigardi, kion mi faris en ilia domo.

Je la deka restis nur du personoj vizitendaj de mi : senjoro de la Vablerie, estinta nobelo, kiu loĝis fine de la ĉefa strato kun sia edzino, naskita de Chamberlan d'Ecof, kaj fraŭlino Johana, ilia filino. Ili estis elmigrintoj, sed revenis antaŭ tri aŭ kvar jaroj. Ili vizitis nenion en la urbo kaj frekventis nur kelkajn maljunajn pastrojn en la ĉirkaŭaĵo. Senjoro de la Vablerie ŝatis ĉasadon. Li havis ses hundojn en sia korto kaj veturilon por du ĉevaloj. Patro Robert, kiu loĝis en la Strato de la Kapuĉenoj, servis ilin kiel koĉero, ĉevalisto, servisto kaj dresisto. Senjoro de la Vablerie ĉiam portis ĉasjakon, kaskedon el kuirita ledo kaj botojn kun spronoj. La tuta urbo nomis lin la *braque*¹⁵, sed oni diris nenion pri la senjorino nek pri la fraŭlino.

Mi estis malĝoja, kiam mi malfermis la pezan pordon provizitan per sonorileto, kies tintado sonis tra la vestiblo. Kia estis do mia surprizo kiam mi aŭdis, meze de tiu ĝenerala konsterniĝo, kantadon kaj klavicenon! Senjoro de la Vablerie kantis kaj la fraŭlino akompanis lin. En tiu tempo mi ankoraŭ ne sciis, ke la malfeliĉo de unu ofte estas la feliĉo de alia, kaj mi diris al mi mem, la manon sur la klinko: «Ili ankoraŭ ne scias la novaĵon el Rusio.»

Sed dum mi staris tie, la pordo de la kuirejo malfermiĝis, kaj fraŭlino Louise, la servistino, klinetante la kapon, demandis :

«Kiu estas tie?»

«Estas mi, fraŭlino Louise.»

«Ha ! Estas vi, sinjoro Josef. Envenu do.»

Tiuj homoj havis kamenhorloĝon en la granda salono, en kiun oni eniris nur malofte. La altaj fenestroj kaj ĵaluzoj donantaj vidon sur la korto, restis fermitaj, sed mi vidis sufiĉe por fari, kion mi devis fari. Mi do pasis tra la kui-rejon kaj reĝustigis la antikvan kamenhorloĝon, belegan

¹⁵ Prononcu ‘brak ‘ (en Esperanto: sanghundo)

ornamaĵon el blanka marmoro, dum fraŭlino Louise rigardis.

«Ĉu vi havas vizitantojn, fraŭlino Louise?» mi demandis ŝin.

«Ne, sed la sinjoro ordonis min lasi eniri neniun.»

«Oni estas gaja ĉe vi.»

«Ha, jes !» ŝi diris. «Estas la unua fojo de multaj jaroj. Mi ne scias, kio estas al ili.»

Mi relevis la globon kaj eliris, pensante pri tiu ĉi afero, kiu ŝajnis eksterordinara al mi. La penso, ke tiuj hiomoj povus ĝoji pri nia malvenko, ne venis en mian kapon.

Forirante de tie, mi ĉirkaŭiris la angulon de la strato por direktiĝi al la domo de patro Féral, kiun oni nomis la flagportisto, ĉar je la aĝo de kvardek kvin jaroj, estante jam longe forĝisto kaj familia patro, li portis la flagon de la volon-tuloj de Falsburgo en 1792¹⁶ kaj nur revenis post la militiro al Zuriko. Liaj tri filoj estis en la armeo, kiu iris al Rusio : Jean, Louis kaj Georges Féral. Georges jam estis komandanto ĉe la dragonoj, kaj la du aliaj infanterioficiroj.

Mi anticipe bildigis al mi la ĉagrenon de patro Féral, sed ĝi estis nenio kompare al tiu kion mi vidis enirante en lian ĉambron. La povra maljunulo, blinda kaj tute kalva, sidis en fotelo lantaŭ la forno, la kapon klinitan sur la bruston kaj kun grandaj, bluaj, larĝe malferumitaj okuloj, kvazaŭ li estus vidanta siajn tri filojn kuŝantaj antaŭ siaj piedoj. Li diris nenio, sed dikaj gutoj de ŝvito fluadis de lia frunto sur liajn longajn, magrajn vangojn, kaj lia vizaĝo estis tiel pala, ke oni dirus, ke li estas mortanta. Kvar aŭ kvin el liaj kamaradoj el la tempo de la Respubliko – patro Desmarests, patro Nivoi, la maljuna Paradis kaj la granda Froissard – estis venintaj por konsoli lin. Ili staris ĉirkaŭ li en la plej profunda silento, fumante pipon kaj farante malesperajn gestojn.

De tempo al tempo iu el ili diris:

«Nu, Féral, ĉu ni ne plu estas veteranoj de la armeo Sambro-kaj-Mozo?»

Aŭ :

«Kuraĝon flagportisto, kuraĝon!... Ĉu ni ne kaptis kurpaŝe la baterion de Fleurus?»

Aŭ ion similan.

Sed li respondis nenion. Nur iam kaj iam liaj maljunaj kavaj vangoj ŝvelis kaj suspiris, klinante la kapon, kaj la aliaj faris signon unuj al la aliaj, skuante la kapon kvazaŭ por diri:

«Tio iras malbone.»

M rapide reĝustigis la horloĝon kaj foriris, ĉar vidi tiun maljunulon en tia malĝojo, disŝirus mian koron.

Alveninte ĉe ni, mi trovis sinjoron Gulden ĉe la labortablo.

«Jen vi estas, Josef,» li diris. «Nu?»

«Nu, sinjoro Gulden, vi pravis resti hejme: estas terure!»

Kaj mi rakontis ĉion detale.

«Jes, mi sciis tion,» li diris malĝoje, «sed tio estas nur la komenco de pli grandaj malfeliĉoj: tiuj prusoj, aŭstroj, rusojn, hispanoj kaj aliaj popoloj, kiujn ni prirabis ekde 1804, profitos de nia mizero por ataki nin. Ĉar ni volis doni al ili reĝojn, kiuj estas fremdaj al ili kaj kiujn ili ne volis. Nun ili kondukos al ni aliajn kun iliaj nobeloj kaj armeoj. Tiel ke, sangigante nin el niaj kvar membroj pro la imperio, nun ni perdos ĉion, kion ni gajnis per la revolucio. Anstataŭ esti la unuaj, ni estos la lastaj de la lastaj. Jes, jen kio nun okazos al ni. Dum vi trakuris la urbon, mi pensis nur pri tio. Estas preskaŭ neeviteble: ĉar soldatoj estas ĉio por ni, kaj ni jam ne havas soldatojn, ni jam havas nenion!»

Tiam li leviĝis. Mi kovris la tablon, kaj dum ni manĝis en silento, la sonoriloj de la urbo komencis sonori.

«Iu mortis en la urbo,» diris sinjoro Gulden.

«Jes, sed mi ne aŭdis paroli pri tio.»

Dek minutojn poste rabeno Rosen eniris por metigi novan glaseton en sian poŝhorloĝon.

«Kiu do mortis?» demandis lin sinjoro Gulden.

«La maljuna flagportisto.»

«Kiel do ? Ĉu la maljuna Féral?»

«Jes, antaŭ duonhoron aŭ dudek minutoj. Patro Desmarests kaj pluraj aliaj volis konsoli lin. Fine li petis ilin voĉlegi al li la lastan leteron de sia filo Georges, la komandanto de la dragonoj, kiu skribis, ke li esperas veni ĉirkaŭbraki lin en la venonta printempo kun kolonelaj epoletoj. Aŭdante tion, li subite volis leviĝi, sed refalis trafante per la kapo sur la genuojn: tiu letero krevigis lian koron.

Sinjoro Gulden faris nenian rimarkon pri tio.

«Jen, sinjoro Rosen,» li diris, redonante la horloĝon al la rabeno. «Tio faras dek du centimojn.»

Sinjoro Rosen pagis, eliris, kaj ni daŭrigis nian manĝon en silento.

V

Kelkajn tagojn poste la gazetoj anoncis, ke la imperiestro estas en Parizo, kaj ke oni baldaŭ kronos la reĝon de Romo kaj imperiestrion Maria-Luiza. La sinjoro urbestro, la sinjoro adjunkto kaj la urbaj konsilantoj parolis nur pri la rajto de la trono, kaj oni eĉ eldiris specialan paroladon en la salonego de la urbodomo.

nataj de la elmigrintoj kaj la angloj, volis neniigi la Revolucion kaj restaŭri la Malnovan Reĝimon

¹⁶ Aludo pri la batalo apud Jemappes en la nuntempa Belgio, kie la francoj venkis la aŭstrojn, kiuj, subte-

Sinjoro profesoro Bourguet skribis la paroladon, kaj sinjoro barono Parmentier voĉlegis

ĝin. Sed ĝi ne tuŝis la homojn, ĉar ĉiuj timis, ke konskripcio denove forprenos virojn, opini-ante, ke la armeo bezonos multajn novajn sol-datojn. Jen kio perturbis la homojn, kaj mi mem videble maldikiĝis. Sinjoro Gulden povis facile diri al mi: «Nenion timu, Josef, vi ne povas marŝi. Konsideru, mia infano, ke estaĵo tiel lama kiel vi postrestos survoje dum la unua etapo!»

Sed liaj paroloj ne malhelpis, ke mi estis plena ja maltrankvileco.

Oni jam ne pensis pri tiuj kiuj iris al Rusio escepte de iliaj familianoj.

Iam kiam ni estis laborantoj solaj, sinjoro Gulden diris al mi :

«Se tiuj kiuj estas niaj mastroj kaj diras, ke Dio metis ilin sur la teron por feliĉigi nin, povus imagi, komence de militiro, la povrajn maljunulojn la malfeliĉajn patrinon, kies koron kaj inteston ili iusence ekŝiras por kontentigi sian orgojlon; se ili povus vidi iliajn larmojn kaj aŭdi iliajn lamentojn, kiam oni venas diri al ili: «Via infano mortis... Vi neniam plu revidos lin! Li estas dispecigita de kuglo», aŭ: «Li pereis sub la piedoj de malamika ĉevalo », aŭ: « Li krevis en malproksimega hospitalo, distranĉita, febreca, senkonscia, vokante vin, kiel kiam li estis malgranda infano...» Se ili povus bildigi al si la larmojn de tiuj patroj, mi kredas, ke neniu el ili povus esti sufiĉe barbara por daŭrigi tiun buĉadon. Sed ili pensas pri nenio. Ili kredas, ke la aliaj ne amas siajn infanojn tiom, kiom ili. Ili rigardas la homojn kiel bestojn! Sed ili eraras: ilia tuta granda genio kaj ĉiuj iliaj grandj ideoj pri gloro estas nenio, ĉar estas nur unu sola afero pri kiu devas marŝi popolo – viroj, virinoj, infanoj kaj maljunuloj, nome, kiam oni atakas nian liberecon kiel en 1792. Tiam oni mortas aŭ venkas kune. Tiu kiu postrestas, estas kovardulo. Li volas, ke la laiaj batalu por li... La venko ne estas por kelkaj, ĝi estas por ĉiuj. La filo kaj la patro defendas sian familion. Se ili estas mortigitaj, tio estas malfeliĉo. Sed ili mortis por defendi siajn rajtojn. Jen, Josef, la unika justa milito, pro kiu neniu povas plendi. Ĉiuj aliaj estas hontaj, kaj la gloro kiun ili alportas, ne estas la gloro de homo, sed de sovaĝa besto!»

Tiel parolis la bona sinjoro Gulden, kaj mi pensas kiel li.

Sed subite, la 8-an de januaro, oni gluis grandan proklamilon sur la muro, en kiu oni povis legi, ke per senatkonsulto¹⁷ la imperiestro ordonis konskripcii – kiel oni diris tiutempe – unue 150.000 rekrutojn de 1813, poste 100

kohortojn¹⁸ de la una ordono de 1812, kiuj jam kredis sin eskapintaj, tiam 100.000 rekrutojn de 1809 ĝis 1812, kaj tiel plu ĝis la fino, tiel ke ĉiuj truoj estis ŝtopitaj, kaj ke ni havos eĉ pli grandan armeon ol antaŭ nia militiro al Rusio.

Kiam patro Fouze, la vitristo, venis iumatene paroli nin pri tiu proklamilo, mi preskaŭ svenis, ĉar mi diris al mi mem:

«Nun oni forprenos ĉiujn, eĉ la familipatrojn ekde 1809. Mi estas perdita!»

Sinjoro Gulden verŝis akvon sur mian kolon. Miaj brakoj pendis inertaj, kaj mi estis pala kiel mortinto.

Cetere mi ne estus sola sur kiu la proklamilo kontraŭ la urbodomo havis tian efikon. En tiu jaro multaj junuloj rifuzis foriri: unuj rompita al dentojn por ne povi disŝiri kartoĉon, aliaj eksplodigis al si la polekson per pistolo por ne povi teni fusilon, ankoraŭ aliaj fuĝis en la arbarojn. Tiujn ĉi oni nomis servorifuzantoj, kaj oni ne trovis sufiĉe da ĝendarmoj por kuri post ili.

Ankaŭ en la sama tempo la familiaj patrinaj ekhavis la kuraĝon iasence ribeli kaj kuraĝigi siajn filojn ne obei al la ĝendarmoj. Ili helpis ilin ĉiamaniere. Ili kriis kontraŭ la imperiestro, kaj la pastroj de ĉiuj preĝejoj subtenis ilin: fine la buŝelo¹⁹ estis plena ĝisrande !

La saman tagon kiam la proklamo estis algluita, mi iris al Quatre-Vents, sed ĉi-foje ne kun ĝojo en mia koro. Mi sentis min la plej malfeliĉa junulo, al kiu oni forprenis sian amon kaj vivon. Mi ŝanceliĝis sur miaj kuroj, kaj kiam mi alvenis tie, ne sciante, kiel anonci mian malfeliĉecon, mi vidis, enirante, ke oni jam sciis ĉion en la domo, ĉar Trinel ploris kaj onklino Gredel estis pala pro indigno.

Unue ni kisis nin silentante, kaj la unua vorto kiun diris al mi onklino Gredel, bruske repuŝante siajn grizajn harojn malantaŭ la orelojn, estis:

«Vi ne foriros !... Ĉu tiuj militoj koncernas nin? La pastro mem diris, ke fine estas tro, ke oni devus fare pacon. Vi restos! Ne ploru, Trinel, mi diras alvi, ke li restos.»

Ŝi estis verda pro kolero kaj parolante renversis sian marmiton.

«Jam longe tiu granda buĉado naŭzas min,» ŝi diris. «Necesis, ke viaj du povraj kuzoj Kasper kaj Jokel iru rompi siajn ostojn en Hispanio por tiu imperiestro, kaj nun li denove venas postuli de ni la junulojn. Ne sufiĉas, ke li pereigis tricent mil da ili en Rusio. Anstataŭ pensi pri paco, kiel farus prudenta viro, li intencas nun masakrigi la lastajn kiuj restas... Sed oni vidos tion! Oni vidos tion!»

«Nome de la ĉielo, onklino Gredel, silentu, parolu pli mallaŭte,» mi diris al ŝi, rigardante tra

¹⁷ De la latina 'senatusconsultum' = decido de la senato

¹⁸ De la latina 'cohors', dekonon de legio (600 viroj)

¹⁹ Antikva volumena mezurilo de 10 litroj

la fenestron. «Oni povus aŭdi vin, kaj ni ĉiuj pereus!»

«Nu, mi parolas, por ke oni aŭdu min,» ŝi daŭrigis. «Via Napoleono ne timigas min. Li komencis malhelpante nin paroli, por povi fari, kion li volas... Sed tio ĉi estas finiĝonta!... Kvar junaj virinoj estas perdontaj sian edzon nur en unu vilaĝo, kaj dek povraj junuloj estas forlasontaj ĉion, malgraŭ la bona Dio, malgraŭ la religio... Ĉu tio ne abomenas?»

Kaj kiam mi volis respondi:

«Ne, Josef, silentu. Tiu viro tute ne havas koron!... Li finiĝos malbone!... Dio jam montris sin ĉi-vintre: Li vidis, ke oni pli timas tiun homon ol Lin. Kiel en la tempo de Herodo la patrinoj mem ne plu kuraĝas reteni la karnon de sia karno, kiam li postulas ĝin por masakri ĝin. Tial Dio venigis malvarmegon, kaj nia Granda Armeo pereis. Kaj ĉiuj kiuj nun estas forirontaj, estas mortintaj anticipe. Dio estas laca! Vi ne foriros,» diris al mi tiu virino plena je obstineco. «Mi ne volas, ke vi foriru. Vi fuĝos en la arbarojn kiel Johann Kraft, Louis Bême kaj ĉiuj plej kuraĝaj ĉi-tieaj junuloj. Vi iros trans la montojn al Svisio, kaj Trinel kaj mi venos al vi, kaj ni restos tie ĝis la fino de la ekstermo.»

Tiam onklino Gredel eksilentis. Anstataŭ fari por ni ordinaran tagmanĝon, ŝi preparis ankorau pli bongustan tagmanĝon ol tiu de la pasinta dimanĉo, kaj diris al ni en firma tono:

«Bone manĝu, miaj infanoj, ne timu... Ĉio ŝanĝiĝos.»

Je la kvara horo posttagmeze mi reiris al Falsburgo pli trankvila, ol kiam mi venis. Sed kiam mi pasis tra la Strato de la Municiejo, mi aŭdis ĉe la angulo de kolegio la tamburojn de la urba serĝento Harmentier, ĉirkaŭita de granda homamaso. Mli kuris al ĝi por povi aŭskulti la proklamon, kaj mi ĝuste alvenis, kiam ĝi komenciĝis

Harmentier legis, ke, laŭ la senatkonsulto de la 3-a, la dato de la konskripcio estis fiksita je la 15-a. Ni estis la 8-an, kaj restis do ne pli ol sep tagoj. Tio emociis min.

Ĉiuj kiuj troviĝis tie, ekdisiris poste dekstren kaj maldekstren en la plej granda silento. Mi alvenis ĉe ni tre malĝoja, kaj mi diris al sinjoro Gulden:

«Oni lotos venontĵaŭde.»

«Ha!» li replikis. «Oni ne perdas tempon... la afero urĝas...»

Estis facile fari al si ideon pri mia ĉagreno dum tiu tago kaj la sekvantaj. Mi ne povis sidi trankvile. Senĉese mi vidis min forlasanta la regionon. Aŭ ŝajnis al mi, ke mi trakuras la arbarojn, sekvate de ĝendarmoj, kiuj kriadis: «Halt! Halt!» Tiam mi imagis la ĉagrenon de Trinel, de onklino Gredel, de sinjoro Gulden. Fojfoje mi revis, ke mi marŝadas envice kun grupo da aliaj malfeliĉuloj, al kiuj oni kriadas:

«Antaŭen! Bajoneton sur la fusilon!», dum kugloj forprenis tutajn vicojn da ili. Mi jam aŭdis sibli la fusilkuglojn kaj zumi la kanonkuglojn.

«Restu trankvila, Josef, » diris al mi sinjoro Gulden. «Ne tiom turmentu vin. Pripensu, ke en la tuta konskripcio eble ne estas dek kiuj povus doni tiel bonan kialon por resti hejme kiel vi. Necesas, ke la kuracisto estu blinda por akcepti vin. Cetere, mi parolos kun la sinjoro komandanto de la urbo... Trankviliĝu do...»

Tiuj bonkoraj vortoj ne povis trankviligi min.

Tiel mi pasigis la tutan semajnon en mortiga angoro, kaj kiam alvenis la tago de la lotado, jaŭdon matene, mi estis tiel pala, tiel konsternita, ke la gepatroj de la aliaj lotantoj iusence enviis min pro mia mieno.

«Tiu,» ili diri unuj al la aliaj, «estas bonsanĉa... Li falas teren, kiam oni blovas kontraŭ lin... Estas homoj kiuj nakiĝis sub favora stelo.»

VI

Oni devas esti vidinta la urbodomon de Falsburgo la matenon de la 15-a de januaro 1813 dum la lotado. En tiu tago okazis grava evento: se oni malgajnus ĉe la lotado, oni estus devigita forlasi siajn gepatrojn, amikojn, bovojn, sian vilaĝon kaj teron aŭ urbon por iri lerni Dio-scias-kie : « Un' du! Un' du! Halt ! Kapon dekstren!... Kapon maldekstren!... Prezentu fusilon!... k.t.p.»

«Jes, tio estas grava afero, sed oni kutimiĝos al ĝi, kaj oni povos diri al si, plena je memfido: 'Post sep jaroj mi retrovos mian malnovan neston, miajn gepatrojn kaj eble ankaŭ mian amatinon... Mi vidos la mondon... Mi eĉ havos la rajton fariĝi poste arbargardisto aŭ ĝendarmo!»

Tio konsolas la prudentajn virojn. Sed se dum tiu tempo vi havus la malbonan ŝancon perdi la vivon, ĉio estus finita. El cent ofte eĉ ne unu revenis hejme. La ideo foriri por ĉiam preskaŭ ne povis eniri vian kapon.

Tiun tagon tiuj de Hardberg, Garbourg kaj Quatre-vents devis loti la unuaj, tiam tiuj de la urbo, kaj poste tiuj de Vechem kaj Mittelbronn.

Mi ellitiĝis frumatene, kaj kun la du kubutoj sur la labortablo, mi komencis rigardi defili ĉiujn tiujn homojn: la knaboj en bluzoj, la povraj maljunulinoj en lana jupo kaj kazakeno kun kurbiĝinta dorso, konsternita vizaĝo kaj bastono aŭ pluvumbrello sub la brako. Multaj alvenis kun sia tuta familio.

La sinjoro subprefekto de Sarrebourg en arĝentkolora ŝultromanteleto, kaj lia sekretario, alvenintaj la antaŭvesperon en la *Ruĝa Bovo*, ankaŭ rigardis tra la fenestro.

Je la oka sinjoro Gulden, matenmanĝinte, komencis labori. Mi faris nenion kaj rigardis, kiam urbestro Parmentier kaj lia adjunkto venis asisti la sinjoron subprefekton.

La lotado komenĉiĝis je la naŭa, kaj baldaŭ oni aŭdis resoni tra la stratoj la klarneton de Pfiffer-Karl kaj la violonon de la granda Andres. Ili ludis la Marŝon de la Svedoj. Akompanata de tiu melodio, miloj da povraj diabloj estis forlasontaj por ĉiam la malnovan Alsacon. La lotontoj dancadis, balanciĝadis, brakon en brako, eligadis kriojn kiuj kapablis fendi la nubojn, kaj frapadis la grundon per la kalkanumoj, svingante siajn ĉapelojn kaj provante ŝajni gajaj, dum ili havis la morton en la koro... Sed fine tio estis la kutimo. Kaj la granda Andres, magra, rigida, flava kiel ligno, kun sia kamarado, tute ronda, kun vangoj ŝveliĝintaj ĝis la oreloj, similis al tiuj estaĵoj kiuj kondukas onin al la tombejo, babilante inter si pri indiferentaĵoj.

Mi ĵus estis surmetinta mian ĵaketon kun hirundovosto kaj mian kastorharan ĉapelon por eliri, kiam onklino Gredel kaj Trinel eniris.

«Bonan tagon, sinjoro Gulden,» ili diris, «ni venas al la konskripcio.»

Li tuj vidis, ke Trinel estis plorinta. Ŝiaj okuloj estis ruĝaj, kaj ŝi pendigis sin je mia kolo, dum ŝia patrino turniĝis ĉirkaŭ nin.

Sinjoro Gulden demandis ilin:

«Ĉu jam baldaŭ devas alveni la horo por la junuloj de la urbo?»

«Jes, sinjoro Gulden,» respondis Trinel per malforta voĉo. «Tiu de Hardenberg jam finis.»

«Bone, bone ...Nu, Josef, la tempo urĝas: vi devas foriri,» li diris. «Sed ne ĉagreniĝu. Ne timu. Tiu lotado okazas nur pro la formo. Jam delonge oni ne plu gajnas, kaj se oni gajnas nun, oni malgajnos post du aŭ tri jaroj: ĉiuj numeroj estas malbonaj! Kiam la revizia konsilantaro kunvenos, ni vidos, kio estas bona por fari. Hodiaŭ oni donas al la homoj specon de kontentiĝo per tiu lotado... Sed ĉiuj malgajnos!»

«Estas tute egale,» replikis onklino Gredel, «Josef gajnos.»

«Jes, jes,» diris sinjoro Gulden ridentante, «tio nepre okazos.»

Tiam mi eliris kun Trinel kaj onklino Gredel, kaj ni iris al la granda placo, kien rapidis homamaso. En la butikoj dekoj da lotontoj aĉetis rubandon, forpuŝante unuj la aliajn antaŭ la vendotabloj. Oni vidis ilin ploradi, kantante kiel frenezuloj. Aliaj en la gastejoj ĉirkaŭbrakis unuj la aliajn singultante, sed ĉiam kantante. Du aŭ tri muzikbandoj el la ĉirkaŭaĵo, tiuj de la cigano

Waldteufel, tiu de Rosselkasten kaj tiu de Georges Adam, alvenis kaj intermiksiĝis per korŝiraj kaj timigaj melodioj.

Trinel premis mian brakon, onklino Gredel sekvis nin.

Fronte al la gardistejo mi de fore rekonis la kolportiston Pinnacle, kiu estis malferminta sian bulegon²⁰ sur tableto. Tuj apude staris longa ligna stango kun multaj rubandoj, kiujn li vendis al la lotontoj.

Mi rapidis preteriri lin, kiam li kriis :

«He, lamulo ! Halt ! Halt! Venu do... Mi gardis belan rubandon por vi. Vi bezonas belegan... La rubandon de tiuj kiuj gajnas!»

Li svingis super la kapo grandan nigran rubandon, kaj mi nevole paliĝis. Sed kiam ni supreniris la ŝtupojn de la urbodomo, ia lotinto ĝuste malsupreniris. Estis Klipfel, la forĝisto de ĉe la Franca Pordego. Li ĵus tiris la numeron ok kaj jam de fore ekkriis:

«Nigran rubandon, Pinnacle nigran rubandon!... Alportu ĝin, kiom ajn ĝi kostas!»

Lia vizaĝo estis sombra malgraŭ lia rido. Lia malgranda frato Johann ploris kaj kriis post li:

«Ne, Jakob, ne la nigran rubandon!»

Sed Pinnacle jam ligis la rubandon ĉirkaŭ la ĉapelo de la forĝisto, dum li diris :

«Jen kion ni nun bezonas... Ni ĉiuj estas mortontaj... Ni devas porti nia funebbron!»

Kaj per sovaĝa voĉo li kriis :

«Vivu la Imperiestro!»

Mi estis kontenta vidi tiun rubandon ĉirkaŭ la ĉapelo de Klipfel prefere ol ĉirkaŭ la mia, kaj mi rapide glitis en la homamason por eskapi al Pinnacle.

Ni devis multe peni por eniri sub la volbon de la urbodomo kaj supreniri la malnovan kverkan ŝtuparon, laŭ kiu la homoj supren- kaj malsupreniris kiel en vera formikejo. Tra la granda supra salono promenadis ĝendarmo Kelz, konservante kiel eble plej la ordon. Kaj en la konsilantara ĉambro, flanke de tiu, kie troviĝis pentrita damo Justeco kun rubando sur la okuloj, oni aŭdis krii la numerojn. De tempo al tempo lotinto eliris ĝis kun pro sango ŝvelinta vizaĝo, fiksante sian numeron al sia ĉapelo kaj forirante tra la homamaso kun klinita kapo kiel furioza virbovo, kiu jam ne vidas klare kaj volas rompi siajn kornojn kontraŭ muro. Aliaj kon-raŭe trapasis palaj kiel mortintoj.

La fenestroj de la urbodomo estis malfermitaj. Ekstere oni aŭdis la kvin aŭ ses muzikbandojn ludi samtempe. Estis terura kakofonio.

Mi premis la manon de Trinel, kaj malrapide ni alvenis tra tiun homamason en la salono, kie la sinjoro subprefekto, la urbestro kaj la sekretario, sidante sur sia tribunon, laŭte kriis la

²⁰ Kolportistoj metis siajn varojn en grandan tukon kaj nodis la kontraŭajn angulojn.

numerojn, kiel oni prononcas juĝojn, ĉar ĉiuj numeroj estis veraj juĝoj.

Ni longe atendis.

Mi jam ne havis unu guton da sango en miaj vejnoj, kiam oni kriis mian nomon. Mi antaŭeniris sen vidi nek aŭdi, metis la manon en la keston kaj tiris mian numeron. La sinjoro subprefekto prenis ĝin kaj kriis : «La numero dek sep!»

Tiam mi senvorte foriris, Trinel kaj onklino Gredel venis post mi. Ni desendis al la placo, kaj respirante iom da freŝa aero, mi memoris, ke mi tiris la numeron dek sep.

«Mi tamen metis ion en vian poŝon,» diris onklino Gredel, «sed tiu fripono Pinacle ĵetis malbonan sorton sur vin.»

Samtempe ŝi tiris el mia poŝo ŝnurpecon. Dikaj ŝvitgutoj fluis de mia friunto. Trinel estis tute pala, kaj tiam ni reiris al la domo de sinjoro Gulden.

«Kiun numeron vi havas, Josef?» li deman-dis min.

«Dek sep,» respondis la onklino, sidiĝante kun la manoj sur la genuoj.

Momenton sinjoro Gulden ŝajnis konfuzita, sed tiam li diris :

«Tiel bona kiel alia... Ĉiuj foriris... Necesas replenigi la kadrojn. Tio signifas nenion por Josef. Mi iros viziti la sinjoron urbestron kaj la sinjoron komandanton de la urbo... Ne por mensogi, sed por diri, ke Josef lamas, kion scias la tuta urbo. Sed en ilia hasto ili povas esti pretervidinta tion. Tiam, ne maltraktivklĝu, havu fidon.»

Tiuj vortoj trankviligis onklinon Gredel kaj Trinel, kiuj reiris al Quatre-Vents, plenaj je bona espero. Sed por mi estis alia afero. Ekde tiu momento mi havis plu nenian trankvilan minuton, nek tage, nek nokte.

La imperiestro havis bonan kutimon : li ne lasis la rekrutojn suspiri hejme. Tuj post la lotado alvenis la revizia konsilantaro, kaj kelkajn tagojn poste la marŝordono. Li ne agis kiel tiuj dentelŝiristoj, kiuj unue montras al vi siajn prenilojn kaj kroĉiletojn kaj longe rigardas en vian buŝon, tiel ke vi ekhavas kolikon antaŭ ol ili decidiĝas: li iras rekt al sia celo.

Tri tagojn post la lotado la revizia konsilantaro estis en la urbodomo kun ĉiuj urbestroj de la kantono kaj kellokaj gravuloj por doni informojn en kazo de bezono.

La antaŭan tagon sinjoro Gulden estis surmetinta sian grandan kaŝtankoloran kapoton kaj sian belan perukon por iri restreĉi la horlo-ĝon de la sinjoro urbestro kaj de la sinjoro komandanto. Li revenis kun ridanta mieno kaj diris al mi :

«Ĉio iras glate. La sinjoro urbestro kaj la sinjoro komandanto bone scias, ke vi lamas. Tio estas sufiĉe klara, diable ! Ili tuj respondis al mi :

'Hej, sinjoro Gulden, tiu junulo lamas. Pro kio do paroli pri li ? Ne maltrankviliĝu: ni ne bezonas handikapulojn, sed soldatojn!»

Tiuj vortoj ŝmiris balzamon sur mia koro, kaj tiun nokton mi dormis kiel beatulo. Sed la morgaŭon angoro reprenis min. Mi bildigis al mi, kiom da viroj kun fizikaj mankoj tamen foriris, kaj kiom da aliaj havis la madelikatecon inventi ilin por trompi la konsilantaron : ekzem-ple glutante noceblajn aferojn por paliĝi sin, aŭ bandaĝante kruron por doni al si varikon, aŭ ŝajnigante esti surdaj, blindaj, idiotaj. Pensante pri tiuj aferoj, mi bedaŭris esti nesufiĉe lama, kaj ankaŭ mi, sen averti sinjoron Gulden, trin-kis en mia angoro la tutan vinagron kiu troviĝis en boteleto de la vinagro- kaj oleokompleto. Poste mi vestis min, kredante havi la mienon de elterigito, ĉar la vinagro estis tre forta kaj prilaboris mian internon. Sed kiam mi eniris la ĉambron de sinjoro Glden, tiu ĉi, apenaŭ vidin-te min, ekkriis:

«Josef, kio estas al vi ? Vi estas ruĝa kiel virkoko!»

Kaj mi rigardante min en spegulo, vidis, ke mi estas ruĝa ĝis sur la pinto de mia nazo kaj miaj oreloj. Tiam mi timiĝis, ĉar anstatŭ paliĝi mi ruĝiĝis ankoraŭ pli, kaj en mia mizero mi ekkriis:

«Nun mi pereos ! Mi aspektos kiel knabo, kiu ne havas mankoj, sed eĉ fartas tre bone. La vinagro supreniris en mian kapon.»

«Kiu vinagro?» demandis sinjoro Gulden.

«Tiu de la vinagro- kaj oleokompleto. Mi trin-kis ĝin por havi palan mienon, kiel oni rakontas pri fraŭlino Schlapp, la orgenistino. Ho, Dio mia, kiam malbonan ideon mi havis!»

«Tio ne malhelpas, ke vi estas lama, » diris sinjoro Gulden. «Sed vi volis trompi la konsilantaron, kaj tio ne estas honesta! Sed jen sonoras la naŭa kaj duono. Werner venis averti min hieraŭ, ke via vico estas je la deka... Do rapidu!»

Mi do devis foriri en tiu stato. La fajro de la vinagro eliris tra miaj vangoj. Kiam mi renkontis la onklinon kaj Trinel, kiuj atendis min sub la volbo de la urbodomo, ili apenaŭ rekonis min.

«Kiel kontenta kaj ĝoja vi aspektas diris al mi onklino Gredel!»

Aŭdante tion, mi certe estus sveninta, se la vinagro ne estus subteninta min malgraŭ mi. Mi do supreniris la ŝtuparon en eksterordinara konfuzo sen povi movi la langon por respondi, tiom da honto mi sentis pri mia stultaĵo

Supre jam estis ricevitaj pli ol dudek kvin lotintojn kiuj pretendis fizikan mankon, kaj pli ol dudek kvin aliaj, sidantaj sur benko kontraŭ la muro, rigardis teren kun pendantaj vangoj, atendente sian vicon.

La maljuna ĝendarmo Kelz kun sia granda ĉapelo kun kornoj promenadis tien kaj reen. Tuj

kiam li vidis min, li haltis kvazaŭ mirigita, tiam ekkriis:

«Bone, bone! Jen fine junulo kiu ne estas ĉagrenita foriri: la amo de la gloro radias el liaj okuloj!»

Kaj metante manon sur mian ŝultron, li diris :

«Estas bone, Josef, mi antaŭdiras al vi, ke vi estos kaporalo fine de la militiro.»

«Sed mi lamas!» mi ekkriis, indigna.

«Vi lamas!» diris Kelz, palpebrumante kaj ridante. «Vi lamas ! Estas egale. Kun tia mieno oni ĉiam sukcesos.»

Li apenaŭ finis siajn vortojn, la pordo de la salono, kie sidis la revizia konsilantaro, malfermiĝis, kaj Werner, la alia ĝendarmo, elmetis la kapon kaj kriis per raŭka voĉo :

«Josef Seitz!»

Mi eniris, lamante tiom, kiom mi povis, kaj Werner refermis la pordon. La kantonaj urbestroj, la sinjoro subprefekto kaj la sinjoro urbestro de Falsburgo sidis en duoncirklo en foteloj, kaj la sekretario Freylik ĉe sia tablo. Iu lotinto kun longaj haroj pendantaj sur liaj okuloj, nuda kolo kaj malfermita buŝo por suspiri, aspektis kiel viro kiun oni intencis pendumi. Du kuracistoj, la sinjoro ĥirurgo-majoro de la hospitalo kaj alia ĥirurgo en uniformo interparolis meze de la salono. La subprefekto turnis sin al mi:

«Malvestu vin»

Kaj mi malvestis min ĝis la ĉemizo, kiun Werner deprenis de mi. La aliaj rigardis.

La sinjoro subprefekto diris :

«Jen sanega junulo.»

Tiuj vortoj kolerigis min. Malgraŭ tio mi respondis honeste :

«Sed mi lamas, sinjoro subprefekto.»

La ĥirurgoj rigardis min, kaj tiu de la hospitalo, al kiu la sinjoro komandanto sendube estis parolinta pri mi, diris:

«La maldekstra kruro estas iomete pli mallonga.»

«Ba!» diris la alia. «Ĝi estas solida.»

Tiam, metante manon sur mian bruston :

«La staturo estas bona,» li diris. «Tusu.»

Mi tuis kiel eble plej malforte, sed li tamen trovis, ke mihavas bonan tembron, kaj tiam li diris :

«Rigardu tiujn kolorojn. Jen kio nomiĝas bona sango!»

Komprenante, ke oni prenos min, se mi dirus nenion, mi respondis :

«Mi trinkis vinagron.»

«Ha ! Tio pruvas, ke vi havas bonan stomakon, ĉar vi ŝatas vinagron.»

«Sed mi lamas!» mi ekkriis, ĉagrenite.

«Ba ! Ne ĉagreniĝu,» replikis tiu viro. «Mi certigas vin, ke via kruro estas solida.»

«Tio ne malhelpas,» diris la sinjoro urbestro de Falsburgo, «ke tiu ĉi junulo lamas ekde sia

naskiĝo. Tiu fakto estas konata en la tuta Falsburgo.»

«Sendube,» diris la ĥirurgo de la hospitalo, «la maldekstra kruro estas iom tro mallonga.»

«Tio estas kazo de sendevigo.»

«Jes,» diris la urbestro, «mi estas certa, ke tiu ĉi junulo ne povos elteni longan marŝon. Li jam postrestos survoje dum la dua etapo.»

La una kuracisto diris plu nenion.

Mi jam kredis, ke mi estas savita de la milito, kiam la sinjoro subprefekto demandis min:

«Ĉu vi estas Josef Seitz?»

«Jes, sinjoro subprefekto,» mi respondis.

«Nu, sinjoroj, aŭskultu,» li diris, eligante leteron el sia paperujo.

Li komencis legi leteron, en kiu oni rakontis, ke ses monatojn antaŭe mi vetis, ke mi povas iri al Saverne kaj reveni de tie pli rapide ol Pinnacle, ke ni demetis tiun vojon kune en malpli ol tri horoj, kaj ke mi gajnis.

Malfeliĉe, tio estis vera. Tiu fripono Pinnacle ĉiam nomis min lamulo, kaj en mia kolero mi vetis kun li. Ĉiuj sciis tion, kaj mi do ne povis aserti la kontraŭon.

Ĉar mi restis konfuzita, la unua ĥirurgo diris:

«Jen kio decidus pri la demando. Vi povas revestu vin.»

Kaj turnante sin al la sekretario, li diris :

«Taŭga por la servo.»

Mi revestis min en terura malespero.

Werner vokis alian. Mi atentis pri nenio plu. Iu helpis min sur la ŝtuparo, kaj kiam Trinell demandis min, kio okazis, mi eligis teruran singulton, kaj mi estus falinta desupre malsu-pren, se la nklinio ne estus subteninta min.

Ni eliris tra la malantaŭa pordo kaj transiris la malgrandan placon. Mi ploris kiel infano kaj Trinell ankaŭ. Sub la halo, en la ombro, ni haltis kaj ĉirkaŭbrakis nin.

Onkline Gredel kriis :

«Ha! Tiuj rabistoj!... Ili forprenas nun ankaŭ la lamulojn kaj invalidojn! Ili bezonas ĉiujn! Ili venu do ankaŭ forpreni nin!»

La homoj kuniĝis antaŭ la tablo de buĉisto Sepel, kiu, stranĉante sian viandon, diris:

«Patrino Gredel, nome de la ĉielo, silentu... Oni kapablas meti vin en prizanon.»

«Nu, oni metu min en pizonon,» ŝi kriis, «oni masakru min. Mi diras, ke la viroj estas mal-kuraĝuloj, ĉar il permesas tiujn hororaĵojn!»

Sed kiam la urba serĝento alproksimiĝis, ni kune foriris plorante. Ni deturniĝis ĉirkaŭ la angulon de la kafejo Hemmerle, kaj ni eniris nian domon. La homoj rigardis nin de malantaŭ siaj fenestroj, dirante unuj al la aliaj :

«Jen ankoraŭ unu kiu foriros.»

Sciante, ke onkline Gredel kaj Trinell venos vespermanĝi ĉe ni, sinjoro Gulden alportigis de la *Ora Safo* farĉitan anseron kaj du botelojn da bona alsaca vino. Li estis certe, ke Josef estis

deklarita netaŭga por la militservo. Tial, kia estis lia surprizo, kiam li aŭdis ilin nun eniri kune kun maĝojaj mienoj.

«Kio estas?» li demandis, repuŝante sian silkan ĉapon sur la nukon kaj rigardante nun per grande malfermitaj okuloj.

Mi ne havis la forton respondi lin. Mi ĵetis min en la divanon, esplorante. Trinel sidiĝis apud min, la brakojn ĉirkaŭ mia kolo, kaj niaj sin-gultoĵoj duobliĝis.

Onklino Gredel diris :

«a rabistoj prenis lin.»

«Tio estas neebla!» elkriis sinjoro Gulden. «Tio montras nur la krimecon de tiuj homoj.»

Kaj koleriĝante pli kaj pli, ŝi ekkriis :

«Do ne plu okazas revolucio! Tiuj banditoj estos do ĉiam la mastroj!»

«Nu, patrino Gredel, trankviliĝu,» diris sinjoro Gulden, «nome de la ĉielo, ne krii tiel forte. Josef, racie rakontu al ni la aferon. Ili eraris... Alie ne eblas... La sinjoro urbestro kaj la komandanto diris do nenion?»

Ĝemante mi rakontis la historion de la letero, kaj onklo Gredel, kiu sciis nenion pri tio, komencis kriigi, levante la pugnojn :

«Ha! La rabistoj! Donu Dio, ke Pinnacle ankoraufoje eniru mian domon ! Mi fendos lian kapon per mia hakilo!»

Sinjoro Gulden estis konsternita.

«Kiel do? Vi ne diris, ke tiu historio estas falsa!» li diris. «Tiu historio estas do vera?»

Kaj ĉar mi mallevis la kapon, sen respondi, li aldiris, kunigante la manojn

«Ha ! Tiuj junuloj, ili pensas pri nenio... Kia nesingardeco!... Kia nesingardeco!»

Li promenis tien kaj reen tra la ĉambro. Tiam li residiĝis por viŝi siajn okulvitrojn, kaj onklino Gredel diris:

«Jes, sed tamen ili ne havos lin. Ili malicoj servos al nenio. Ĉi-vespere Josef estas en la montaro survoje al Svisio.»

Aŭdinte tion, sinjoro Gulden fariĝis grava. Li kuntiris la brovojn kaj respondis post momento:

«Estas malfeliĉo, ĉar Josef vere lamas... Oni agnoskos tion poste. Li ne povos marŝi du tagojn sen postresti kaj malsaniĝi. Sed vi malpravas, patrino Gredel, ĉar parolante tiamaniere vi donas al li malbonan konsilon.»

«Ĉu malbonan konsilon?» ŝi demandis. «Ĉu ankaŭ vi estas por la mortigo de niaj junuloj?»

«Tute ne,» li respondis trankvile, «mi ne ŝatas la militojn, precipe ne tiujn, dum kiuj centoj da miloj da viroj perdas la vivon pro la gloro de unu sola. Sed tiuj militoj finiĝos. Ne por akiri gloron kaj reĝejoj oni rekrutas nun soldatojn, sed por defendi la landon, kiun oni kompromitis per tiraneco kaj tro granda ambicio. Malfeliĉe la rusoj proksimiĝas, la prusoj kuniĝas kun ili,

kaj niaj amikoj, la aŭstroj, atendas nur la bonan okazon por ĵeti sin sur nian dorson. Se ni ne iros renkonte al ili, ili venos ĉe nin, ĉar ni havos la tutan eŭropon kontraŭ ni kiel en 1793. Estas do tute alia afero ol niaj militoj en Hispanio, Rusio kaj Germanio. Kaj mi, kiel ajn maljuna mi estas, patrino Gredel, se oni bezonos la veteranojn de la Respubliko, mi hontus iri fari horloĝojn en Svisio, dum aliaj verŝas sian sangon por defendi la patruon. Cetere, bone aŭskultu tion ĉi: la dezertintoj estos ĉie malestimataj. Farinte fifaron, oni plu nenie havos radikojn, oni ne plu havos patruon, nek patruon, nek vilaĝon, nek patruon... Oni juĝis sin nekapabla plenumi la unuan el siaj devoj, kiu estas la devo ami kaj subteni sian landon, eĉ se ĝi malpravas.»

Li diris nenion plu pri la aferon en tiu momento kaj sidiĝis ĉe la tablon kun grava mieno.

«Ni nun manĝu,» li aldiris post momento da silento. «Jen jam sonoras la tagmezo. Patrino Gredel klaj Trinel, sidiĝu tien.»

Ili sidiĝis, sed ne manĝis. Mi pripensis la vortojn de sinjoro Gulden, kiuj ŝajnis ĝustaj al mi. Onklino Gredel kunpremis la lipojn, kaj de tempo al tempo ŝi rigardis min por vidi, kion mi pensas. Fine ŝi diris:

«Mi mokas pri lando, kie oni forprenas la familipatrojn kaj knabojn! Se mi estus Josef, mi tuj forkurus.»

«Aŭskultu, onklino Gredel,» mi respondis al ŝi, «vi scias, ke mi ŝatas nenion pli ol pacon kaj trankvilecon. Sed tamen mi ne volus fuĝi kiel senlandano al alia lando. Malgraŭ tio mi faros kion volos Trinel: se ŝi diros al mi, ke mi iru al Svisio, mi iros!»

Tiam Trinel, klinante la kapo por kaŝi siajn larmojn, mallaŭte diris:

«Mi ne volas, ke oni povu nomi vin dezertinto.»

«Nu do, mi faros kiel la aliaj!» mi ekkriis. «Car tiuj de Falsburgo kaj Dagsberg foriros al la milito, ankaŭ mi faros tion.»

Sinjoro Gulden faris nenian rimarkon.

«Ĉiu estas libera,» li diris post kelkaj momentoj, «sed mi estas kontenta, ke Josef pensas kiel mi.»

Tiam refariĝis silento, kaj ĉirkaŭ la dua onklino Gredel leviĝis de la tablo kaj prenis sian korbon. Ŝi ŝajnis deprimita kaj diris al mi :

«Josef, vi ne volas aŭskulti min, sed estas egale. Kun la helpo de la Sinjoro ĉio finiĝos bone. Vi revenos, se Dio volas, kaj Trinel atendos vin.»

Trinel, ĵetante sin ĉe mia kolo, rekomencis plori, kaj ankaŭ mi ekploris, tiel ke sinjoro Gulden mem ne povis retenigi sin verŝi larmojn.

Fine Trinel kaj ŝia patrino malsupreniris la ŝtuparon, kaj de malsupre mia onklino kriis :

«Josef, provu veni ankoraŭ trifoje ĉe nin.»

«Jes, jes, mi provos,» mi respondis, fer-mante la pordon.

Mi ne plu povis stari per miaj kruroj. Neniam mi estis tiel malfeliĉa, kaj eĉ hodiaŭ, kiam mi pensas pri tio, mia koro turnas sin.

VII

Ekde tiu tago mi ne plu povis koncentriĝi sur io ajn. Unue mi provis repreni mian laboron, sed senĉese miaj pensoj estis aliloke, kaj sinjoro Gulden diris al mi:

«Josef, lasu tion... Profitu de la malmultan tempon kiu ankoraŭ restas al vi, pasigante ĝin kun mi. Iru viziti Trinel kaj patriron Gredel. Mi ĉiam ankoraŭ kredas, ke oni deklaras vin netaŭga. Sed kion oni povas scii ? Oni bezonas tiom da viroj, ĉar la milito riskas daŭri tre longe.»

Ĉiumatene mi do iris al Quatre-Vents, kaj mi pasigis miajn tagojn kun Trinel. Ni estis tre malĝojaj, kaj tamen tre feliĉaj vidi nin tiel ofte. Ni amis nin ankoraŭ pli ol antaŭe, se tio estus ebla. Iam kaj iam Trinel provis kanti kiel en la bona tempo. Sed subite ŝi ekploris. Tiam ni ploris kune, kaj onklino Gredel komencis mal-beni la militojn, kiuj malfeliĉigas ĉiujn homojn. Ŝi diris, ke la revizia konsilantaro meritas esti pendumita, ke iuj el tiuj banditoj interkonsentis por veneni nian ekziston. Iomete malpezigis nin aŭdi ŝin kriegi, kaj ni trovis, ke ŝi pravas.

Vespere mi reiris al la urbo ĉirkaŭ la oka aŭ la naŭa, antaŭ la momento, kiam oni fermis la pordegojn, kaj preterirante, mi vidis ĉiujn malgrandajn drinkejojn plenaj ja konskriptoj kaj maljunaj soldatoj, kiu estis deklaritaj netaŭgaj, kiuj drinkis kune. La konskriptoj ĉiam pagis. La aliaj, la grasan polican ĉapon sur la orelo, la malnovan ĉevalharan kolumon rektigita, kun ruĝa nazo, suprenturinis sian lipharojn, rakontante kun majesta sinteno siajn batalojn, marŝojn kaj duelojn.

Oni povis vidi nenion pli abomenan ol tiujn truojn plenajn je fumo kun oleolampoj pendante sub la nigraj traboj, tiujn maljunajn militemulaĉojn kaj tiujn junajn virojn dinkantajn, kriegantajn kaj batantajn sur la tablojn kiel blinduloj. Kaj malantaŭe, en la ombro, la maljuna Aneta Schnapps aŭ Maria Hering kun tordita hartubero sur la nuko kaj tridenta kombilo pikita tra ĝin, rigardantan tiujn scenojn gratante al si la kokson aŭ malplenigante poton je la sano de la bravuloj.

Estis malĝojige vidi filojn de kamparanoj, honestajn kaj diligentajn virojn, vivi tian humiligan ekziston. Sed neniu plu ŝatis labori. Oni estus doninta sian vivon por du moneretoj. Krieginte, drinkeginte kaj malĝojiginte en sia koro, oni ekdormis kun la nazo sur la tablo, kaj la maljunuloj malplenigis siajn kruĉojn, kantante : «*Vokas min la granda gloro... !* »

Vidante tiujn aferojn, mi benis la ĉielon en mia mizero, pro tio ke ĝi donis al mi honestajn homojn por subteni mian kuraĝon kaj malhelpi min fali inter tiajn manojn.

Tio daŭris ĝis la 15-a de januaro. Kelkajn tagojn antaŭe granda nombro da italaj rekrutoj – piemontanoj kaj ĝenovanoj – estis alvenintaj en la urbo. Unuj estis dikaj kaj grasaj kiel savojanoj nutritaj per kaŝtanoj, kun alta pinthava ĉapelo sur la krisphara kapo, en malhelverda farbita krudlana pantalono kaj ĵaketo ankaŭ el kruda lano, sed brikkolore farbita, kaj leda zono ĉirkaŭ la talio. Ili surhavis enormajn ŝuojn kaj manĝis fromaĝon el la mano sidante laŭ-longe de la manova halo. La aliaj – malgrasaj, maldikaj kaj brunaj – tremetadis en siaj bluzoj, kiam ili nur vidis la neĝon sur la tegmentoj, kaj rigardis preteriri la virinojn per siaj grandaj nigraj kaj malgajaj okuloj. Oni ekzercadis ilin ĉiutage sur la placo, ritme marŝigante ilin. Ili estis plenigontaj la kadron de la 6-a armeo en Mainz klaj ripozis iomete en la infanteria kazerno.

La kapitano de la italaj rekrutoj, kiu nomiĝis Vidal, loĝis super nia ĉambro. Li estis larĝa-ŝultra, solida kaj firmega viro, sed ankaŭ tre bonkora kaj honesta. Li venis reparigi ĉe ni la sonorilaron de sia horloĝo, kaj kiam li eksciis, ke mi estas konskripto, kaj ke mi timas, ke mi ne revenos, li kuraĝigis min, dirante, ke ĉio estas nur kutimo, ke post kvin aŭ ses monatoj oni batalas kaj marŝas, kiel oni manĝas supon, kaj ke eĉ multaj tiagrade kutimas paŝi al homoj per fusilo aŭ kanono, ke ili rigardas sin mal-feliĉaj, kiam ili ne havas tiun ĝojon.

Sed lia maniero rezoni ne estis laŭ mia gusto, des pli ke mi ekvidis sur unu el liaj vangoj kvin aŭ ses grandajn pulvogranojn, kiuj profunde penetris en la haŭton, kaj pri kiuj li diris, ke ili devenis de fusilpafo, kiun ruso direk-tis al li preskaŭ tuj sub la nazo. Tiu situacio pli kaj pli maplaĉis al mi, kaj ĉar pluraj tagoj pasis sen novaĵoj, mi komencis kredi, ke oni forgesis min kiel la grandan Jakob de la kampulbieno Chèvre-Hof, pri kiu ĉiuj ankoraŭ parolis pro lia eksterordinara bonŝanco. Onklino Gredel diris al mi iufoje, kiam mi venis ĉe ŝin :

«Nu, nu, ili do volas lasi nin trankvilaj!»

Sed la mateno de la 25-a de januaro, en la momento, kiam mi estis ekironta al Quatre-

Vents, sinjoro Gulden, kiu laboris ĉe sia labor-tablo kun reva mieno, turnis sin al mi kun larmoj en siaj okuloj kaj diris :

«Aŭskulti, Josef, mi volis ankoraŭ lasi vin dormi tiun ĉi nokton, sed tamen necesas, ke vi sciu tion ĉi, mia filo: hieraŭ la serĝento de la ĝendarmejo venis alporti vian marŝordonon. VI foriros kun la piemontanoj kaj ĝenovanoj kaj kvin aŭ ses knaboj de la urbo: la filo Klipfel, la filo Lörig, Johann Fürst kaj Kasper Zebedeus. VI iras al Mainz.»

Aŭdante tion, mi sentis miajn kruojn senfortiĝi, kaj mi sidiĝis sen povi respondi eĉ unu vorton. Sinjoro Gulden eligis el sia tirkesto la marŝordonon skribitan per bela manskribo kaj komencis malrapide legi ĝin.

Ĉio kion mi memoras, estas ke la nomita Josef Seitz, naskiĝinta en Dagsberg, kantono Falsburgo, distrikto Sarrebourg, estas enkorpusigita en la 6-an armeon, kaj ke li devas aliĝi al sia korpuso en Mainz ne pli malfrue ol la 29-an de januaro.

Tiu letero havis sur mi la saman malbonan efikon, kiel se mi estus sciinta nenion antaŭe. Mi rigardis tion kiel ion novan, kaj mi indignis.

Post momento da silento sinjoro Gulden diris ankoraŭ:

«Hodiaŭ ĉirkaŭ la dek-unua la italoj foriros.

Tiam, kvazaŭ vekigante el malagrable sonĝo, mi ekkriis :

«Sed ĉu do mi ne plu revidos Trinel?»

«Jes ja, Josef,» li diris per tremetanta voĉo, «mi avertigis patrinon Gredel kaj Trinel. Ili do venos, mia filo, kaj vi povos ankoraŭ ĉirkaŭbraki ilin antaŭ ol foriri.

Mi vidis lian malĝojon, kaj mi ankoraŭ pli moliĝis, tiel ke mi havis grandan penon malhelpi min eklarmi.

Post minuto li daŭrigis.

«Vi ne bezonas maltraktiĝi pri io ajn, mi preparis ĉion antaŭe. Kaj kiam vi revenos, Josef, se Dio volas, ke vi estu ankoraŭ en tiu ĉi mondo, vi trovos min la sama viro. Jen mi komencas maljuniĝi, kaj mia plej granda feliĉo estus povi gardi vin kiel filon, ĉar mi trovas en vi la bonan koron kaj rektan spiriton de honesta viro. Mi estus doninta al vi mian tutan havaĵon. Al ni estus estinte bone kune... Trinel kaj vi estus estintaj miaj infanoj... Sed ĉar la situacio estas, kia ĝi estas, ni rezignaci. Tio ĉi daŭros nur malmultajn tempon. Mi estas certa, ke vi estos deklarita netaŭga. Oni baldaŭ vidos, ke vi ne povas fari longajn marŝojn.»

Dum li parolis, mi mallaŭte singultis, la kapon sur la genuoj.

Fine li leviĝis kaj prenis el la ŝranko soldatan sakon el bovina ledo, kiun li metis sur la tablon. Mi rigardis lin tute deprimita, pensante nur pri la malfeliĉo devi foriri.

«Jen via sako,» li diris. «Mi metis en ĝin ĉion kion vi bezonas: du tolajn ĉemizojn, du flanelajn veŝtojn kaj la reston. Vi ricevos du ĉemizojn en Mainz. Estas ĉio kion vi bezonas. Sed mi ankaŭ farigis por vi ŝuojn, ĉar estas nenio pli malbona ol la ŝuoj de la liverantoj. Ili pres-kaŭ ĉiam estas el ĉevala ledo, kiu terure varmigas la piedojn. VI ne estas sufiĉe solida sur viaj kruoj, mia povra infano, kaj almenaŭ vi ne havos tiun plian doloron. Jen, estas ĉio.»

Li metis la sakon sur la tablon kaj residiĝis.

Ekstere oni aŭdis la venadon kaj iradon de la italoj, kiuj pretigis sin por foriri. Ni aŭdis kapitanon Vidal doni ordonojn. Li havis sian ĉevalon en la ĝendarmeja kazerno kaj diris al soldato iri rigardi, ĉu ĝi estis bone frotita kaj ricevinta sian avenon.

Ĉiu tiu bruado kaj movado havis sur mi strangan efikon, kaj mi ankoraŭ ne povis kredi, ke mi devis forlasi la urbon. Kiam mi tiel estis en la plej granda konfuzo, jen malfermiĝis la pordo kaj Trinel ĵetas sin ĝemante inter miajn brakojn, dum onklino Gredel ekkriis:

«Mi ja diris al vi, ke, se vi ne fuĝos al Svisio, tiuj rabistoj fine forkonkukos vin... Sed vi ne volis kredi min.»

«Patrino Gredel,» tuj respondios al ŝi sinjoro Gulden, «foriri por plenumi sian devon ne estas tiel granda malfeliĉo kiel esti malestimata de la honestaj homoj. Anstataŭ tiuj krioj kaj riproĉoj, kiuj servas al nenio, estus pli bone, ke vi konsolu kaj subtenu Josef.»

«Ha!» ŝi replikis. « Mi ne faras al li riproĉojn. Ne ! Kvankam estas terure devi vidi tiajn abomenajn aferojn.»

Trinel ne povis delasi min. Ŝi sidis flanke de mi kaj ni ĉirkaŭbrakis nin.

«Vi revenos,» ŝi diris, ĉirkaŭprenante min.

«Jes, jes,» mi respondis mallaŭte. «Kaj vi, ĉu vi ĉiam pensos pri mi? Ĉu vi ne amos iun alian ol min ?»

Tiam ŝi eksingultis, dirante:

«Ho, ne ! Mi ĉiam volos ami nur vin.»

Tio daŭris kvaronhoron, kiam la pordo malfermiĝis, kaj kapitano Vidal eniris, lian volvitan mantelon sur liaj ŝultroj kiel ĉaskornon.

«Nu?» li demandis. Kiel fartas nia junulo?»

«Jen li estas,» respondis sinjoro Gulden.

«Ha! » diris la kapitano. «Ili malĝojas. Estas tute normale... Mi bone memoras tion. Ni ĉiuj postlasas iun en nia lando.»

Tiam, plilaŭtigante la voĉon:

«Ek, junulo, kuraĝon ! Ni jam ne estas infanoj, diable!»

Li rigardis Trinel.

«Estas egale,» li diris al sinjoro Gulden, «mi komprenas, ke li ne ŝatas foriri.»

La tamburistoj batis ĉe ĉiuj stratanguloj, kaj la kapitano aldiris:

«Ni havas ankoraŭ dudek minutojn antaŭ ol ekiri.»

Ĵetante al mi rigardon:

«Ni ne manku al la unua apelo, junulo,» li diris, premante la manon al sinjoro Gulden.

Li eliris. Oni aŭdis lian ĉevalon piedfrapi ĉe la pordo.

La ĉielo estis griza. Malĝojo superfortis min. Mi ne povis forlasi Trinel.

Subite la tamburoj ekulbatis. Ĉiuj tamburistoj kuniĝis sur la placo. Sinjoro Gulden, tuj prenante la sakon per ĝiaj rimenoj de la tablo, diris en grava tono:

«Josef, nun ni ĉirkaŭbraku nin, ĉar la tempo urĝas.»

Mi ekstaris tute pala. Li fiksas la sakon sur mia dorso. Trinel, sidante kun la vizaĝo en sia antaŭtuko, sangultis. Patrino Gredel, starante, rigardis min kun kunpremitaj lipoj.

La rulbatado ĉiam daŭris. Subite ĝi haltis.

«La apelo tuj komenĉiĝos,» diris sinjoro Gulden, ĉirkaŭbrakante min, kaj subite lia koro cedis. Li ekploris, nomante min sia filo, dirante:

«Kuraĝon, Josef!»

Onklino Gredel sidiĝis. Kial mi kliniĝis al ŝi, ŝi prenis mian vizaĝon inter siaj manoj kaj, kisante min, ekkriis:

«Mi ĉiam amis vin, Josef, ekde kiam vi estis nu infaneto. Mi ĉiam amis vin! Vi donis al ni nur kontentecon, kaj nun kiam vi foriras... Dio mia, kia malfeliĉo!»

Post kiam onklino Gredel delasis min, mi rigardis Trinel, kiu ne moviĝis, kaj alproksimiĝinte, mi kisis ŝin sur la nuko. Ŝi ne leviĝis, kaj mi rapide foriris, jam ne havante la forton, kiam ŝi ekkriis per disŝiranta voĉo.

«Josef! Josef!»

Tiam mi turnis min. Ni ĵetis nin inter niajn brakojn kaj kelkaj minutojn ŝi restis tiel, singultante. Trinel jam ne povis teni sin staranta. Mi metis ŝin sur fotelon kaj foriris sen kuraĝi turni la kapon.

Mi jam estis sur la placo meze de la italoj kaj amaso da homoj, kiuj kriadis kaj ploradis, alkondukinte siajn filojn, kaj mi vidis nenion, aŭdis nenion.

Kiam la rulbatado de la tamburoj rekomenĉiĝis, mi rigardis ĉirkaŭ min kaj vidis, ke mi staras inter Klipfel kaj Fürst, ambaŭ kun sako sur la dorso. Iliaj gepatroj antaŭ ni sur la placo ploris kvazaŭ por entombigo. Dekstre apud la urbodomo kapitano Vidal, sidante sur sia malgranda, griza ĉevalino, parolis kun du infanterioficioj. La serĝentoj faris la apelon, kaj ĉiuj respondis. Oni vokis Zebedeus, Fürst, Klipfel, Seitz, kaj ni respondis kiel la aliaj. Tiam la kapitano komandis: «Marŝ!» kaj ni ekiris po du al la Franca Pordego.

Ĉe la angulo de la bakejo Spitz, majunulino kriis de fenestro de la etaĝo per stranga voĉo:

«Kasper! Kasper!»

Tio estis la avino de Zebedeus. Lia mentono tremetis. Zebedeus levis la manon sen respondi. Li estis same tiel malĝoja kaj sinkigis la kapon.

Mi jam tremetis ĉe la penso devi preteriri la pordon de nia domo. Alveninte tie, miaj kruroj fleksiĝis. Mi ankaŭ aŭdis iun krii ekde la fenestro, sed mi turnis la kapon al la gastejo *La Ruĝa Bovo*. La bruo de la tamburoj kovris ĉion.

Infanoj kuris post ni, kriante:

«Jen ili foriras... He! Jen Kasper, jen Johann, jen Jakob, jen Josef!»

Sub la Franca Pordego la viroj de la gardo, vicigitaj en linion, la fusilojn sur la ŝultro, rigardis nin defili. Ni transiris la avanceon, tiam niaj tamburoj eksilentis, kaj ni detruniĝis dekstren. Oni aŭdis nur la plaŭdadon de la paŝoj en la koto, ĉar la neĝo estis fandiĝanta.

Ni estis preteririntaj la farmbienon Gerberhof kaj malsuprenirontaj la deklivon trans la granda ponto, kiam mi aŭdis iun paroli al mi: estis la kapitano, kiu kriis al mi de sur sia ĉevalo:

«Brave, junulo, mi estas kontenta pri vi!»

Aŭdante tion, mi ne povis malhelpi min ankoraŭ verŝi larmojn, tute kiel la granda Johann Fürst. Ni ploris marŝante. La aliaj, palaj kiel mortintaj, diris nenion. Apud la granda ponto Zebedeus eligis sian pipon por fumi. Antaŭ ni la italoj babiladis kaj ridadis inter si, alkuti-miĝintaj jam de tri semajnoj al tia speco de ekzisto.

Alveninte sur la deklivo de Metting, certe pli ol mejlon de la urbo, en la momento kiam ni estis remalsuprenirontaj, Klipfel tuŝis mian ŝultron kaj, turnante la kapon, diris al mi:

«Rigardu tien...»

Mi rigardis kaj vidis Falsburgon jam malproksime de ni, la kazernon, la pulvejojn kaj la preĝejturon, de kiu mi malkovris la domon de Trinel antaŭ ses semajnoj kun la maljuna Braunstein: ĉio ĉi griza, la arbaroj ĉirkaŭe nigraj. Mi estus volinta halti tie kelkajn mo-mentojn, sed la trupo marŝadis pluen, kaj necesis sekvi. Ni descendis al Metting.

VIII

La saman tagon ni iris al Bitche, la postan tagon al Hombach, tiam al Kaiserslautern, ktp. La vetero denove ŝanĝiĝis al neĝado.

Kiom da fojoj dum tiu longa vojiro mi bedaŭ-

ris la bonan mantelon de sinjoro Gulden kaj liajn ŝuojn kun duobla plandumo! Ni trairis sennombrajn vilaĝojn jen en montaro, jen sur ebenaĵo. Enirante ĉiun domaron, la tamburistoj alfiksis siajn tamburojn kaj batadis la marŝritmon. Tiam ni relevis la kapon kaj ekmarŝis

ritme por aspekti kiel veteranoj. La homoj proksimiĝis al siaj malgrandaj fenestroj aŭ ekstaris ĉe sia pordo, dirante: «Estas rekrutoj.»

Vespere, post la halto, ni estis tre kontentaj povi ripozigi niajn lacajn piedojn, precipe mi mem. Mi ne povas diri, ke mia kruro doloris, sed jes la piedoj... Ha! Mi neniam sentis tiel grandan lacecon!

Danke al nia loĝebileto ni rajtis sidi ĉe fajro. Sed la homoj ankaŭ donis al ni sidlokon ĉe sia tablo. Preskaŭ ĉiam ni ricevis kazeiĝintan lakton kaj terpomojn, iafoje ankaŭ freŝan lardon tremetantan sur plado kun saŭrkraŭto. La infanoj venis rigardi nin. La maljunulinoj demandis, el kiu lando ni venis kaj kion ni faris antaŭ ol foriri. La knabinoj rigardis nun kun malĝoja mieno, revante pri sia amato, foririnta antaŭ kvin, ses aŭ sep monatoj. Tiam oni kondukis nin al la lito de la foririnta knabo.

Kun kia feliĉeco mi etendis min ! Kiom mi estus volinta dormi dek du horojn! Sed tre frue ĉe la tagiĝo la rulbatado de la tamburoj vekis min. Mi rigardis la brunajn trabojn de la pla-fono, la malgrandan vitrojn kovritajn per prujno, kaj mi demandis min: «Kie mi estas?» Sed necesis vesti min tre rapide, repreni mian sakon kaj kuri respondi al la apelo

«Bonan vojaĝon!» diris la mastrumantino, vekiginta tre frue.

«Dankon,» respondis la rekrutoj.

Mi neniam forgesos, ke en Kaiserslautern la duan tagon post nia foriro, malfermante mian sakon por surmeti blankan ĉemizon, mi malkovris pezetan paketon, kaj ke, malferminte ĝin, mi trovis tie kvindek frankojn en moneroj de po ses pundoj kaj sur papereto tiujn ĉi vor-tojn de sinjoro Gulden: «Ĉiam estu bonkora kaj honesta en milito. Pensu pri viaj gepatroj, pri ĉiuj pro kiuj vi donus vian vivon, kaj humane traktu la fremdulojn, por ke ili sammaniere agu kontraŭ la niaj. Kaj la ĉielo konduku vin... Ĝi savu vin el ĉiuj danĝeroj! Jen ankaŭ iom da mono, Josef. Estas bone ĉiam havi iom da mono, kiam oni estas malproksime de la siaj. Skribu al ni tiel ofte, kiel vi povos. Mi ĉirkaŭ-brakas vin, mia infano, kaj premas vin kontraŭ mian koron. Melĥior Gulden.»

Legante tion, mi ekploris, kaj mi pensis : «Mi ne estas plene forlasita sur la tero... Bonkoraj homoj pensas pri mi. Mi neniam forgesos iliajn bonajn konsilojn!»

Fine, la kvinan tagon ĉirkaŭ la deka vespere ni eniris Mainz. Tiel longe kiel mi vivos, tiu memoraĵo restos en mia menso. Estis terure malvarme. Ni estis ekirintaj frumatene, kaj longe antaŭ ol alveni en la urbo, ni transiris vilaĝojn plenajn je soldatoj: kavaleriaj kaj infanteriaj. Dragonoj en ĵaketo, la lignajn ŝuojn plenajn je pajlo, estis rompantaj la glacieron de la trogo por trinkigi la ĉevalojn. Aliaj trenis stake-

tojn de furaĝo al la pordoj de la ĉevaloj. Konvojoj kun pulvo kaj kanonkugloj alvenis tute blankaj pro prujno. Stafetoj, artileriaj kaj pontonistaj taĉmentoj iradis kaj venadis sur la blanka kamparo, ne pli atentante pri ni, ol kiam ni ne ekzistus.

Por varmigi sin kapitano Vidal elseliĝis kaj marŝis per firmaj paŝoj. La oficiroj kaj serĝentoj urĝis nin por ne malfrui. Kvin aŭ ses italoj, ne plu povante marŝi, postrestis en la vilaĝoj. Miaj piedoj estis tre varmaj pro doloro. Post la lasta halto mi apenaŭ povis releviĝi. La aliaj falsburganoj bone marŝis.

Venis la nokto. La ĉielo estis plena je steloj. Ĉiuj rigardis en la malproksimecon, dirante al si mem: «Ni alproksimiĝas! Ni alproksimiĝas!» Efektive, ĉe la horizonto malluma linio, nigraj punktoj kaj briletantaj radioj anoncis grandan urbon. Fine ni eniris en la avanceon inter zigzagaj teraj bastionoj. Tiam oni igis nin densigi la viĉojn, kaj ni daŭrigis ritme marŝante, kiel ni kutimis fari, proksimiĝante al fortikigita urbo. Oni silentis. En la lumo de speco de duonluno ni vidis la fosajon de la urbo kovritan de glacio, la brikajn remparojn super ĝi kaj malnovan sombran pordegon kun levita ponto fronte al ni. Supre, gardostaranto, la armilon pretigitan kriis al ni :

«*Qui vive?*»

La kapitano, sola antaŭenirinta, respondis :

«Francio!»

«Kiu regimento?»

«Rekrutoj por la sesa armeo.»

Fariĝis profunda silento. La levponto subiris. La gardostarantoj venis rekonni nin. Unu el ili portis grandan lanternon. Kapitano Vidal iris kelkajn paŝojn antaŭen por paroli kun la ĉefo de la posteno, tiam oni kriis al ni:

«Kiam ajn plaĉos al vi!»

Niaj tamburistoj komencis bati, sed la kapitano igis ilin remeti la tamburojn sur la ŝultrojn, kaj ni paŝis trans la grandan ponton kaj tra la pordegon similan al la unua. Tiam ni estis en la urbo. La strato estis pavimita per grandaj brilaj ŝtonoj. Ĉiuj faris sian eblon por ne lami, ĉar malgraŭ la nokto ĉiuj drinkejoj kaj ĉiuj butikoj de la komercistoj estis malfemitaj. Iliaj grandaj fenestroj briladis, kaj centoj da homoj iradis kaj venadis kiel dum plena tago.

Ni deturniĝis ĉe kvin aŭ ses stratanguloj kaj baldaŭ alvenis sur placeto antaŭ alta kazerno, kie oni kriis al ni: «Halt!»

Estis volbo en angulo de la kazerno, kaj sub tiu volbo staris trikolora pluvumbrello, de kiu pendis du lanternoj. Preskaŭ tuj pluraj oficiroj alvenis: estis komandanto Gémeau kaj kelkaj aliaj, kiujn mi tiam ankoraŭ ne konis. Ridante, ili premis la manon al la kapitano. Tiam ili rigardis nin, kaj oni faris la apelon. Post tio ni ĉiuj ricevis po peco da kazerna pano kaj loĝej-

bileto. Oni avertis nin, ke la morgaŭon la apelo okazos je la oka por distribui la armilojn, kaj tiam oni kriis al ni: «Rompu la vicojn!»

La oficiroj malaperis en straton maldekstre kaj eniris kune en grandan drinkejon, kie ili supreniris dekkvinon da ŝtupoj. Sed ni, kien ni iru kun nia logejbileto meze de tiu urbo, kaj precipe la italoj, kiuj scipovus eĉ ne unu vorton da germana aŭ franca ?

Mia unua ideo estis iri al la kantinistino sub ŝia pluvombrelo. Estis tute ronda kaj dikvanga maljuna alsacano, kaj kiam mi demandis al ŝi germane, kie troviĝas la *Kapuziner Strasse*, ŝi demandis min:

«Kiom vi pagos?»

Mi esti devigita preni kun ŝi glaseton da konjako. Tiam ŝi diris al mi:

«Jen ĝuste fronte al ni post la dekstra angulo vi trovos la *Kapuziner Strasse*. Bonan vesperon rekuto.»

Ŝi ekridis.

Ankaŭ la granda Fürst kaj Zebedeus havis bileton por la *Kapuziner Strasse*, kaj ni foriris feliĉaj ankoraŭ povi lami kaj treni la piedojn kune tra tiu fremda urbo.

Fürst trovis la unua sian domon, sed ĝi estis fermita, kaj dum li frapis sur la pordo mi ankaŭ trovis la mian, kies maldekstraj fenestroj estis prilumitaj. Mi puŝis kontraŭ la pordon. Ĝi malfermiĝis, kaj mi eniris malluman koridoron, kie oni flaris la odoron de freŝa pano. Tio ĝojigis min. Zebedeus iris pli malproksime. Mi kriis en la korodoro:

«Ĉu estas iu ĉie ĉi?»

Kaj preskaŭ tuj poste aperis maljuna virino kun mano antaŭ sia kandelo supre de ligna ŝtuparo.

«Kion vi volas?» ŝi demandis.

Mi diris al ŝi, ke mi havas logejbileton por ŝia domo. Ŝi malsupreniris, rigardis mian bileton kaj tiam diris germane: «Venu!»

Mi do supreniris la ŝtuparon. Samtempe mi ekvidis tra malfermita pordo du virojn en kuloto, nudajn ĝis la zono, kiuj knedis paston en du trogoj. Mi estis ĉe bakisto. Jen kial la maljunulino ankoraŭ ne dormis, sendube ankaŭ havante multan laboron. Ŝi estis nudbraka ĝis la kubutoj, surhavis kufon kun nigraj rubandoj kaj jupon el kruda blua lano supretenatan per ŝelkoj. Ŝi ŝajnis malĝoja. Supre ŝi kondukis min en grandetan ĉambron kun bona fajenca forno kaj lito en la fono.

«Vi alvenas malfrue,» ŝi diris.

«Jes, ni marŝis la tutan tagon ĝis nun,» mi replikis, preskaŭ ne povante paroli. « Mi preskaŭ falis pro malsato kaj laceco.»

Tiam ŝi rigardis min, kaj mi aŭdis ŝin diri:

«Povra infano! Povra infano!»

Tiam ŝi igis min sidiĝi ĉe la forno kaj demandis min:

«Ĉu viaj piedoj doloras?»

«Jes, sinjorino, de tri tagoj.»

«Nu, demetu viajn ŝuojn,» ŝi diris, «kaj surmetu tiujn lignajn ŝuojn. Mi tuj revenos.»

Ŝi lasis la kandelon sur la tablo kaj redescendis. Mi demetis mian sakon kaj miajn ŝuojn. Mi havis blazojn, kaj mi pensis: «Dio mia, Dio mia... Ĉu oni povas tiom suferi? Ĉu ne estus pli bone esti mortinta?»

Tiu ideo jam estis veninta centfoje al mi survoje. Sed tiam, ĉe tiu ĉi bona fajro, mi sentis min tiel laca, tiel malfelica, ke mi estus volinta ekdormi por ĉiam, malgraŭ Trinell, onklino Gredel, sinjoro Gulden kaj ĉiuj kiuj deziris al mi bonon. Jes, mi sentis min tro mizera!

Dum mi pensis pri tiuj aferoj, la pordo malfermiĝis kaj granda, forta viro kun jam griza kapo eniris. Estis unu el tiuj kiujn mi vidis knedi malsupre. Li estis surmetinta ĉemizon kaj tenis kruĉon kaj du glasojn en siaj manoj.

«Bonan nokton!» li diris, rigardante min per grava mieno.

Mi respondis kaj klinis la kapon. La maljunulino reeniris post la viro. Ŝi portis lignan kuveton kaj metis ĝin teren apud mian seĝon.

«Banu viajn piedojn en la kuvo,» ŝi diris. «Tio estos bona por vi.»

Kiam mi vidis tion, mi teneriĝis kaj pensis: «Tamen estas bonaj homoj sur la tero!» Mi demetis miajn ŝtrumpojn. Ĉar la blazoj estis krevintaj kaj sangadis, la bona maljunulino ripetadis :

«Povra infano! Povra infano!»

Mi metis la piedojn en la varman akvon. Tio estis agrabla sento.

La viro demandis al mi :

«El kiu lando vi venis?»

«El Francio.»

«Sed vi parolas germane.»

«Jes, mi estas el Falsburgo en Loreno. Tie oni parolas germane.»

«Tio estas strange,» li diris.

Tiam, post momento, li diris al sia edzino:

«Iru do preni unu el niaj plataj panoj. Tiu junulo trinkos glason da vino, kaj poste ni lasos lin trankvile dormi, ĉar li bezonas ripozon.»

Li ŝovis la tablon antaŭ min, tiel ke mi povis teni la piedojn en la bankuvo kaj la kruĉo troviĝis antaŭ mi. Li plenigis la glasojn per blanka vino kaj diris al mi:

«Je via sano!»

La virino eliris kaj revenis kun granda ankoraŭ varma plata pano, kovrita per freŝa, duone fandiĝinta butero. Nur tiam mi sentis, kiom mi malsatas. Mi sentis min preskaŭ malsaneta. Ŝajnis, ke la bonaj homoj vidis tion, ĉar la virino diris:

«Antaŭ ol manĝi, mia infano, vi devas eligi la piedojn el la akvo.»

Ŝi surgenuiĝis kaj sekigis miajn piedojn per sian antaŭtuko, antaŭ ol mi komprenis, kion ŝi intencis fari.

Tiam mi ekkriis :

«Dio mia, sinjorino, vi traktas min kvazaŭ mi estus via infano!»

Post momento ŝi respondis:

«Ni havas filon en la armeo.»

Mi aŭdis ŝian voĉon tremi, kiam ŝi diris tiujn vortojn, kaj mia koro komencis singulti interne.

«Manĝu kaj trinku,» diris al mi la viro, tranĉante la panon.

Tion mi faris kun tia feliĉeco, kiun mi neniam spertis. Ambaŭ grave rigardis min. Kiam mi finis, la viro leviĝis.

«Jes,» li diris, «ni havas filon en la armeo. Lastjare li foriris al Rusio, kaj ni neniam ricevis novaĵon pri li... Tiuj militoj estas teruraj!»

Li parolis al si mem, paŝante kun reva mieno tra la ĉambro, la manojn krucigitajn sur la dorso. Mi sentis miajn okulojn fermiĝi. Subite li diris :

«Nu bonan vesperon, ju, nulo.»

Li eliris, kaj lia edzino sekvis lin, kunportante la kuveton.

«Dankon!» mi diris al ili. «Dio rekonduku al vi vian filon!»

Mallaŭte ŝi fermis la pordon. Tiam mi malvestis min, enlitiĝis kaj profunde endormiĝis.

IX

La morgaŭon mi vekigis je la oka. Apud la *Kapuziner Strasse* trumpeto sonis la apelon. Ĉio moviĝis. Oni aŭdis preterpasi ĉevalojn, veturilojn kaj homojn. Miaj piedoj ankoraŭ iomete doloris, sed estis negrave kompare al la antaŭaj tagoj. Post kiam mi surmetis purajn ŝtrumpojn, ŝajnis al mi, ke mi renaskiĝis. Mi estis solida sur miaj kruroj, kaj mi diris al mi mem: «Josef, se tio daŭros, vi fariĝos fortikulo. Komenco bona, laboro duona.»

Mi vestis min en tiu feliĉa dispozicio.

La bakistino estis metinta miajn ŝuojn ĉe la bakforno, post kiam ŝi plenigis ilin per varmaj cindroj por malhelpi, ke ili malmoliĝu. Ili estis bone grasigitaj kaj brilis.

Fine mi bukis mian sakon kaj malsupreniris s en havi tempon danki la bonajn homojn, kiuj ricevis min tiel bonkore. Min intencis plenumi tiun devon post la apelo.

Ĉe la stratfino, sur la placo, jam atendis multaj italoj, tremetantaj ĉirkaŭ la fontano. Fürst, Klipfel kaj Zebedeus alvenis momenton poste.

Ĉe unu flanko de la placo oni vidis nur kanojn sur iliaj afustoj. Ĉevaloj de la armetrajno, kondukataj de badenaj husaroj, alvenis ĉe la

trinktrogo. Fronte la ni staris kavaleria kazerno tiel alta, kiel la preĝejo de Falsburgo. Ĉe la tri ceteraj flankoj de la placo staris kelkaj malnovaj domoj kun pintaj tegmentoj kaj skulpturoj kiel en Saverne, sed multe pli grandaj. Neniam mi vidis ion similan, kaj dum mi rigardis ilin kun levita nazo, niaj tamburistoj komencis rukbati. Ĉiuj restariĝis en sia vico. Kapitano Vidal eliris de sub la volbo fronte al ni, kaj oni kriis al ni, unue en la itala, poste en la franca, ke oni estas distribuonta armilojn, kaj ke ĉiu devas eliri el sia vico, tuj kiam li aŭdos sian nomon.

La veturiloj haltis je dek paŝoj de ni, kaj la apelo komenciĝis. Ĉiu siavice eliris el sia vico kaj ricevis fusilon, kartoĉujon, bajoneton kaj sabron. Oni metis ilin sur la bluzon, la jaketon aŭ la jakon. Kun niaj ĉapeloj, kaskedoj kaj armiloj ni aspektis kiel vera bando da rabistoj. Mi ricevis tiel grandan kaj pezan fusilon, ke mi povis apenaŭ porti ĝin, kaj ĉar la kartoĉujo falis ĝis sur mian ŝuojn, serĝento Pinto montris al mi kiel mallongigi la rimenon. Li estis brava viro.

Ĉiuj tiuj portrimenoj kruciĝantaj sur la brusto ŝajnis al mi teruraj, kaj jam tiam mi komprenis, ke niaj mizeroj ne finiĝos tre baldaŭ.

Post la armildistribuo proksimiĝis municicaro, kaj oni disdonis al ni po kvindek kartoĉoj. Tiam anstataŭ rompi la vicojn kaj resendi nin al niaj kvartiroj, kion mi esperis, kapitano Vidal tiris sian sabron kaj kriis:

« En unu vico dekstren... Antaŭen... Marŝ!»

Kaj la tamburistoj komencis bati.

Mi bedaŭris, ke mi ne povis almenaŭ danki miajn gegastigantojn pro la bono, kiun ili faris al mi. Mi diris al mi : «Ili rigardos min kiel sendankulon.» Sed tio ne malhelpis min sekvi la vicon.

Ni iris tra longa serpentumanta strato, kaj subite ekster la talusoj, ni troviĝis apud Rejno, kovrita per glacio tiel for, kiel oni povis vidi. Estis io belega kaj fascina.

La tuta bataliono descendis al Rejno, kiun ni transiris. Ni ne estis solaj sur la rivero. Antaŭ ni, je kvin aŭ ses paŝoj, pulvokonvojo, akompanata de trajnsoldatoj, direktiĝis al la vojo al Frankfurt. La glacio ne estis glita, sed kovrita per speco de tubera prujno.

Alvenante sur la alia bordo, oni igis nin eniri vojon, kiu turniĝis inter du deklivoj. Tiel ni plu marŝadis dum kvin horoj. Jen dekstre, jen maldekstre ni malkovris vilaĝojn, kaj Zebedeus, kiu marŝis flanke de mi, diris al mi:

«Ĉar necesas foriri, mi same multe ŝatas, ke estas por militi. Almenaŭ ni vidas ĉiutage ion

novan. Se ni havos la bonŝancon reiri hejmen, ni povos multe rakonti.»

«Jes, sed mi multe pli ŝatus scii malpli pri la mondo, » mi replikis. « Mi pli ŝatus vivi por mia

propra konto ol por la konto de aliaj, kiuj sidas trankvile en siaj domoj, dum ni plaŭdas ĉi tie en la neĝo.»

«Vi ne konsideras la gloron, » li rimarkis. «Tamen estas io grava, la gloro.»

Kaj mi respondis :

«La gloro estas por aliaj ol ni, Zebedeus. Tiuj vivas bone, manĝas bone kaj dormas bone. Ili dancas kaj amuziĝas, kiel oni vidas en la gazetoj, kaj, krom tio, tiun gloron ni estos akirintaj per multa ŝvitado, fastado kaj penado. Kiam ni, povraj diabloj, kiujn oni devigas foriri, fine havos la ŝancon reiri hejmen, perdinte la kutimon labori kaj ofte ankaŭ membron, ni ne havos multan gloron. Granda nombro de niaj antaŭaj kamaradoj, kiuj ne valoras pli ol ni kaj kiuj laboras eĉ malpli bone, estos perlaborantaj monon dum tiuj sep jaroj. Ili malfermos butikon, ili edziĝos al la amatino de alia, ili havos belajn infanojn, ili fariĝos gravuloj, municipaj konsilantoj, eminentuloj. Kaj kiam tiuj kiuj revenas de sia serĉado de gloro, mortigante homojn, preterpasas kun siaj distingaj galonoj sur la brako, la aliaj rigardos ilin trans sia ŝultro, kaj se hazarde ili havas ruĝan nazon, drinkinte multan konjakon por kuraĝigi sin dum pluvado, neĝado, rapida marŝado, dum la aliaj trinkis bonan vinon, tiuj ĉi diros: 'Estas ebruloj.' Kaj la konskriptoj, kiuj deziris nenion pli ol resti hejme, diligente labori, fariĝas speco de almo-zuloj. Jen kion mi pensas, Zebedeus. Mi ne trovas tion justa, kaj mi preferus vidi la amikojn de la gloro mem iri batali kaj lasi nin trankvilaj.»

Tiam li diris :

«Mi tute ne pensas kiel vi. Sed ĉar ni estas 'pinĉitaj', estas pli bone diri, ke ni batalas pro gloro. Oni ĉiam devas subteni sian staton kaj provi kredigi la homojn, ke estas bone al ni. Sen tio, Josef, oni ankoraŭ kapablu primoki nin.»

Rezonante pri tiuj aferoj kaj aliaj, ni fine malkovris larĝan riveron, pri kiu la serĝento diris, ke estas Majno, kaj apud tiu rivero vilaĝon, tra kiun pasis nia vojo. Ni ne konis la nomon de tiu vilaĝo, sed tie ni denove haltis.

Oni eniris ian domon, kaj ĉiu povis aĉeti al si konjakon, vinon kaj viandon. Tiuj kiuj ne havis monon, rompis sian kruston de bruna pano, rigardante la aliajn.

Vespere, je la kvina, ni alvenis en Frankfurt. Estas ankoraŭ pli bela urbo ol Mainz kaj plena je judoj. Oni kondukis nin al iu loko nomata Saxenhausen, kie troviĝis enkazernita la 10-a de la husaroj kaj badenaj ĉasistoj. Mi igis diri al mi, ke tiu malnova konstruaĵo estis malsanulejo antaŭe, kaj mi volonte kredas tion, ĉar interne troviĝis granda korto kun fermitaj arkadoj. Sub

la arkadoj oni loĝigis la ĉevalojn, kaj supre la virojn.

Ni do alvenis sur tiu loko tra sennombraj stratetoj, kiuj estis tiel mallarĝaj, ke oni apenaŭ povis vidi la stelojn inter la kamenoj. Kapitano Florentin kaj la du leŭtenantoj, Clavel kaj Bretonville, atendis nin. Post la apelo niaj serĝentoj kondukis nin, taĉmenton post taĉmento, al la ĉambregoj super la badenanoj. Estis vastaj salonoj kun malgrandaj fenestroj. Inter la fenestroj staris litoj.

Serĝento Pinto pendigis sian lanternon en la mezo. Ĉiuj demetis sian sakon, sian bluzon kaj siajn ŝuojn sen diri unu vorton. Zebedeus aperis esti mia litkunulo. Dio scias, kiel dormemaj ni estis! Dudek minutoj poste ni ĉiuj dormis kiel novenaskitaj beboj.

X

En Frankfurt mi konatiĝis kun la militista vivo. Ĝis tiam mi estis simple konskripto. Tie mi fariĝis soldato. Kaj mi ne parolis ĉi tie pri la ekzercado, ne! La maniero turni la kapon dekstren kaj maldekstren, tuj sekvi en la paŝoj de alia, levi la manon je alteco de la unua kapuĉeno²¹ aŭ de la dua kapuĉeno por ŝargi la fusilon, ĝustigi kaj levi la armilon laŭ komando: tio ĉi estis la afero de unu aŭ du monatoj kaj iom da bona volo. Sed mi lernis disciplinon, nome, ke la kaporalo ĉiam pravas, kiam li parolas al soldato; ke la serĝento ĉiam pravas, kiam li parolas al kaporalo; la serĝent-majoto kiam li parolas al serĝento; la subleŭtenanto, kiam li parolas al la serĝent-majoro; kaj tiel plu ĝis la marŝalo de Francio, kiam ili dirus, ke du kaj du faras kvin aŭ la luno brilas en plena tagmezo.

Tio eniras malfacile en onian kapon, sed io povas multe helpi onin: speco de afiŝo, kiu pendas en ĉiu ĉambrego kaj estas legata al oni de tempo al tempo por malfermi onian menson. Tiu afiŝo supozas ĉion kion soldato povus deziri fari, sed ne rajtas, ekzemple reiri al sia vilaĝo, rifuzi servi, rezisti al sia ĉefo, ktp., kaj tio ĉiam finiĝis per la morto aŭ kvin jaroj da malliberejo almenaŭ.

La morgaŭon de nia alveno en Frankfurt mi skribis leteron al sinjoro Gulden, Trinel kaj onklino Gredel. Oni povas imagi kun kiom da tenereco. Ŝajnis al mi, ke mi, parolante al ili, estis ankoraŭ meze de ili. Mi rakontis pri mia laceco, la bono, kiun oni faris al mi en Mainz, la kuraĝo kaj volforto, kiujn mi bezonis por ne postresti survoje. Mi ankaŭ diris al ili, ke mi ankoraŭ estas en bona sanstato, danke al Dio,

²¹ Parto de fusilo

ke mi sentas min pli forta ol antaŭ mia foriro, kaj ke mi kisas ilin milfoje.

Mi skribis en nia ĉambrego meze de miaj kamaradoj, kaj la falsburganoj igis min aldoni korajn salutojn por siaj familioj. Koncizadire, tio estis ankoraŭ bona momento.

Poste mi skribis al la bravaj homoj de la *Kapuziner Strasse* en Mainz, kiuj iusence savis min el mia malespero. Mi diris al ili, ke la apelo frumatene devigis min tuj foriri, ke mi esperis reveni al ili por povi danki ilin persone, kaj ke ili devas pardoni min, ĉar la bataliono tuj ekiris al Frankfurt.

Tiun saman tagon posttagmeze ni ricevis la uniformon de la bataliono. Dekoj da judoj venis sur la arkaĵojn, kaj ĉiuj vendis siajn civilajn vestaĵojn. Mi konservis nur miajn ĉemizojn, ŝtrumpojn kaj ŝuojn. La italoj havis multaj malfacilaĵojn komprenigi sin al tiuj komercistoj, kiuj volis esti same tiel ruzaj, kiel la judoj, kaj iliaj diskutoj daŭris ĝis en la nokto. Niaj kaporaloj tiam ricevis pli ol unu glaseton da brando. Estis ja necese fari el ili amikojn, ĉar de mateno ĝis vespero ili ekzercadis nin en la korto plena je neĝo. La kantinistino Kristina ĉiam sidis en sia angulo, varmigilon sub la piedoj. Ŝi prenis en konsideron ĉiujn junulojn de bona familio, kiel ŝi nomis tiujn kiuj havis multan monon. Kiel multaj el ni lasis elpoŝigi de ŝi la lastan moneron! Poste ili estis nur almozuloj. Sed kion vi volas? Vanteco... Tio perdigas la tutan homan specion de la rekrutoj ĝis la generaloj!

Dum tiu tempo alvenis rekrutoj el Francio kaj ĉaroj plenaj je vunditoj el Pollando. Kia spektaklo antaŭ la hospitalo Sankta Spirito trans la rivero! Estis konvojo kiu ne finiĝis! Ĉiuj tiuj malfeliĉuloj havis unuj frostiĝintan nazon, aliaj frostiĝintajn orelojn, aliaj frostiĝintajn krurojn. Oni metis ilin en la neĝon por malhelpi, ke ili falu en pecojn. Neniam oni vidis homojn tiel mizere vestitajn, en virinaj jupoj, senharaj ĉapo, kavetigitaj ĉakoj, kozakaj vestaĵoj, kun naztuko kaj ĉemizoj volvitaj ĉirkaŭ la piedoj. Ili forlasis la ĉarojn kroĉigante sin unuj al la aliaj kaj rigardis onin kiel sovaĝaj bestoj, la okulojn profundiĝintajn en la kapon kaj la harojn de la barbo hirtiĝintajn. Ciganoj, kiuj dormis en angulo de la arbaro, kompatus ilin, kaj ili eĉ estis la plej malfeliĉaj, ĉar ili eskapis al la buĉado, dum multaj miloj de iliaj kamaradoj pereis sur la batalkampo aŭ en la neĝo.

Klipfel, Zebedeus, Fürst kaj mi iris rigardi tiujn malfeliĉulojn. Ili rakontis al ni la tutan ruiniĝon ekde Moskvo, kaj tiam mi komprenis, ke la 29-a bulteno, kiel ajn terura, nur parte diris la veron. Tiaj historioj ekscitis nin kontraŭ Rusio. Multaj el ni diris:

«Ha! Rekomenciĝu baldaŭ tiu milito! Ĉi-foje ili travivos durajn tagojn!... Ankoraŭ ne estas finite!... Ankoraŭ ne estas finite!...»

Ilia kolero infektis min, kaj iufoje mi pensis: «Josef, ĉu vi perdas nun vian prudenton? Tiuj rusoj nur defendas sian patrimon, siajn familiojn, ĉion plej sanktan kion havas la homojn en tiu ĉi mondo. Se ili ne defendus tiujn aferojn, oni tute pravus malestimi ilin.»

En tiu tempo io eksterordinara okazis.

Eble vi jam scias, ke Zebedeus, mia litkamarado, estis la filo de la falsburga tombisto, kaj ke tial oni nomis lin iufoje 'tombisto'. De nia flanko tio ne ofendis lin. Sed iuvespere, post la ekzercado, dum Zebedeus transiris la korton, husaro kriis al li:

«He, tombisto! Venu helpi min treni tiujn pajlogarbojn!»

Turnante sin, Zebedeus respondis lin:

«Mi ne nomiĝas tombisto, kaj vi mem portu viajn pajlogarbojn. Ĉu vi kredas, ke mi estas besto?»

Tiam la alia kriis pli forte:

«Rekruto, ĉu vi volas veni, aŭ atentu!»

Zebedeus, kun sia granda kurba nazo, siaj bluaj okuloj kaj maldikaj lipoj, ne ĝuis bonan karakteron. Li proksimiĝis al la husaro kaj demandis lin:

«Kion vi diras?»

«Mi diras al vi, ke vi levu tiujn pajlogarbojn, kaj baldaŭ. Ĉu vi aŭdas, rekruto?»

Estis majunulo kun lipharo kaj longaj, rufaj vangharoj, tonditaj en formo de broso laŭ la modo de Chamboran. Zebedeus kaptis lin per unu el liaj vangharbrosoj, sed la alia donis al li du durajn vangofrapojn. Malgraŭ tio manpleno da vangharoj restis en la mano de Zebedeus. Kaj ĉar tiu disputo altiris multan publikon, la husaro, levante fingron, diris al li:

«Rekruto, morgaŭ vi ricevos de miaj novaĵoj.»

«Bone,» diris Zebedeus, «ni vidos. Mi ankaŭ havas ion novan por vi, veterano.»

Li tuj venis rakonti tion al mi, kaj mi, sciante, ke li neniam tenis ion alian en la manoj ol pioĉon, ne povis malhelpi tremi pro li.

«Aŭskultu, Zebedeus,» mi diris al li, «ĉio kion vi povas fari nun, estas peti pardonon de tiu veterano, ĉar vi ne povas dezerti. Ĉiuj tiuj veteranoj havas teruran frapon, kiun ilin raportis de Egiptio, Hispanio kaj aliloke. KREDU MIN! Se vi volas, mi pruntas al vi monon por aĉeti botelon da vino por li. Tio mildigos lin.»

Sed kuntirante la brovojn, Zebedeus volis aŭdi nenion.

«Mi preferus tuj pendumi min ol prezenti mian ekskuzon,» li diris. «Mi mokas pri ĉiuj husaroj kune. Se estos frapoj, mi havas lon-

gajn brakojn, kaj ankaŭ mi povas doni durajn frapojn per la finaĵo de mia sabro, kiu eniros inter liajn ostojn, same kiel la liaj en mian karnon.»

Li estis ankoraŭ indigna pro la vangofrapoj. Preskaŭ tuj alvenis skerminstruisto Chazy, kaporalo Fleury, Klipfel, Fürst kaj Léger. Ili ĉiuj konsentis kun Zebedeus, kaj la skerminstruisto diris, ke sango devas flui por forlavi la ofendon de la vangofrapoj, ke batali estas honoro por nova rekruto.

Zebedeus replikis, ke la falsburganoj neniam timis sangadon, kaj ke li estas preta. Tiam la skerminstruisto iris al la kapitano de la roto, nomata Florentin, la plej belega viro kiun oni povis imagi, granda, malgrasa, larĝaŝultra, kun rekta naso. Li ricevis ordenon el la manoj de la imperiestro post la batalo apud Eylau. La kapitano opiniis, ke estas tute normale interbatiĝi pro vangofrapo. Li eĉ diris, ke tio estos bela ekzemplo por la rekrutoj, kaj ke, se Zebedeus ne batalus, li estus maldigna resti en la 3-a bataliono de la 6-a.

La tutan nokton mi ne povis dormi. Mi aŭdis mian kamaradon ronki kaj pensis: «Povra Zebedeus, morgaŭ vespere vi ne plu ronkos!» Mi tremetis, pro tio ke mi kuŝis flanke de tia viro. Fine mi estis ĵus ekdorminta, kiam mi sentis subite tre malvarman aeron. Mi mal-fermis la okulojn, kaj kion mi vidis? La maljuna rufa husaro, kiu fortiris la kovrilon de nia lito kaj diris:

«Ek, ellitiĝu, sentaŭgulo, mi tuj instruos al vi per kia ligno mi varmigas min.»

Zebedeus trankvile elitiĝis kaj respondis:

«Mi dormis, veterano, mi dormis.»

La alia, aŭdante nomi sin veterano, volis fali sur mian kamaradon, sed du grandaj uloj, kiuj estis servontaj al li kiel atestantoj, haltigis lin, kaj cetera ĉiuj falsburganoj estis tie.

«Nu, nu... ni rapidu!» kriis la maljunulo.

Sed Zebedeus vestis sin sen rapidi. Post momento li diris:

«Ĉu vi havas la permeson eliri la kvartiron, maljunulo?»

«Malantaŭ la prizono estas loko, kie oni povas viciĝi,» respondis unu el la husaroj.

Estis loko plena je urtikoj malantaŭ la prizono. Muro ĉirkaŭis ĝin, kaj de niaj fenestro ni povis bone vidi ĝin. Ĝi troviĝis ĝuste malsupre, en la direkto de la rivero.

Zebedeus surmetis sian kapoton kaj diris, turniĝante al mi:

«Josef kaj Klipfel, mi elektas vin kiel miajn sekundantojn.»

Sed mi skuis la kapon.

«Nun, tiam Fürst. Venu!» li diris.

Ĉiuj kune ili malsupreniris la ŝtuparon.

Mi kredis, ke Zebedeus jam pereis. Tio multe dolorigis min, kaj mi pensis: «Ne nur la rusoj kaj prusoj ekstermas nin, sed ankaŭ la niaj mortigas sin reciproke.»

La tuta ĉambrego staris apud la fenestroj. Mi sola restis malantaŭe, sidanta sur mia lito. Post kvin minutoj la bruetado de la sabroj malsupre

igis min paliĝi. Mi jam ne havis eĉ unu guton da sango en miaj vejnoj.

Sed tio daŭris nelonge, ĉar subite Klipfel kriis: «Tuŝite!»

Tiam, mi ne scias kiel, mi kuris al la fenestro kaj, rigardante trans la aliajn, mi vidis la husaron apogi sin kontraŭ la muron, kaj Zebedeus kiu releviĝis, la sabron ruĝan pro sango. Li estis glitinta sur la genuojn dum la batalo. La sabro de la maljunulo antaŭeniĝante pasis super lian ŝultron, kaj li, sen perdi sekundon, pikis la sian en la ventron de la husaro. Se Zebedeus ne estus havinta la bonŝancon gliiti, la maljunulo estus trapikinta lian koro.

Jen kion mi vidis malsupre per unu rigardo. La husaro sinkis kontraŭ la muron, liaj ates-tantoj rapidis subteni lin per la brakoj, kaj Zebedeus, pala kiel mortinta, rigardis sian sabron, dum Klipfel etendis al li lian kapoton.

Preskaŭ samtempe oni batis la veksinalon, kaj ni malsupreniris por la matenapelo. Tio okazis la 18-an de februaro. La saman tagon ni ricevis la ordonon enpaki nian sakon, kaj ni ekiris de Frankfurt al Seligenstadt, kie ni restis ĝis la 8-a de marto.

En tiu momento ĉiuj rekrutoj jam konis la uzon de la fusilo kaj la pelotonajn instrukciojn. De Seligenstadt ni iris la 9-an de marto al Schweinheim, kaj la 24-an de marto 1813, la bataliono aliĝis al la divizio en Aschaffenburg, kie marŝalo Ney revuis nin.

La kapitano de nia roto nomiĝis Florentin, la leŭtenanto Bretonville, la komandanto de la bataliono Gémeau, la kapitano adjutant-majoro Vidal, la kolonelo de la regimento Zapfel, la generalo de la brigado Ladoucette, kaj la generalo de la divizio Souham ĉiu soldato devis scii tion, se li ne volis marŝi kiel blindulo.

XI

La fandiĝo de la neĝo komenciĝis la 18-an aŭ 19-an de marto. Mi memoras, ke dum la grand revuo en Aschaffenburg, sur larĝa ebe-naĵo, de kie oni malkovris la riveron Majno, la pluvo ne ĉesis fali de la deka matene ĝis la tria posttagmeze. Maldekstre ni vidis kastelon, kies loĝantoj tre kviete rigardis tra la altaj fenestroj, dum la akvo fluis en niajn ŝuojn. Dekstre fludis la rivero, kiun ni vidis kvazaŭ tra nebulo.

Por refreŝigi niajn pensojn, oni ofte kriis al ni:

«Portu fusilon! Fusilon suben!»

Marŝalo Ney malrapide antaŭenpaŝis meze de sia armea stabo. Zebedeus estis tre feliĉa,

ke ni fine estis vidontaj «la plej kuraĝan²² inter la kuraĝuloj». Sed mi pensis : «Se mi vidus lin ĉe nia fajrejo, tio farus al mi pli da plezuro.»

Fine li alvenis antaŭ ni, kaj mi ankoraŭ vidas lin kun la granda ĉapelo trempita de pluvo, lia blua uniformo kovrita per brodaĵoj kaj liaj longaj botoj. Li estis bela viro, rufe blonda, kun kus-pita nazo, vivecaj okuloj, kiu ŝajnis treege solida. Li ne estis orgojla, ĉar kiam li rajdis antaŭ nia roto, kaj la kapitano prezentis al li la fusilon, li subite returniĝis sur sia granda ĉeva-lo kaj diris laŭte:

«Jen ! Tio estas Florentin!»

Tiam la kapitano rektiĝis, ne sciante, kion respondi. Ŝajnas, ke la marŝalo kaj li estis simplaj soldatoj kune en la tempo de la Respubliko. La kapitano fine respondis:

«Jes, marŝalo, mi estas Sébastien Florentin.»

«Vere, Florentin, mi estas tre kontenta revidi vin, ĉar mi jam kredis, ke vi kuŝas ie tre for!» diris la marŝalo, etendante la brakon en la direkto de Rusio.

Nia tuta roto estis kontenta, kaj Zebedeus diris al mi:

«Jen kio nomiĝas vera viro. Mi volus rompigi mian kapon por li.»

Mi ne komprenis, ke Zebedeus volus rompigi sian kapon, nur ĉar la marŝalo salutis sian maljunan kamaradon.

Estas ĉio kion mi memoras pri Aschaffenburg.

La vesperon ni reiris manĝi nian supon en Schweinheim, vilaĝo riĉa je vinoj, kanabo kaj sekalo, kie preskaŭ ĉiuj homoj rigardis nin malafable.

Ni loĝis po tri aŭ kvar en domoj kiel garnizonanoj, kaj ĉiutage ni manĝis viandon: jen bovaĵon, jen lardon, jen ŝafaĵon. La pano de la domo estis tre bona, kaj ankaŭ la vino. Sed pluraj el ni ŝajnis trovi ĉion mabona, kredante tiamaniere esti rigardataj kiel grandaj sinjoroj. Sed ili eraris, ĉar mi aŭdis la civiluloj diri en la germana:

«Tiu estas almuzuloj en sia propra lando. Se oni irus rigardi en Fancio, oni eĉ ne trovus terpomojn en ilia kelo.»

Kaj ili ne erararis. Poste tio ofte igis min pensi, ke homoj kiuj kondutas malagrabla al aliaj, estas povraj diabloj en sia propra hejmo.

Nu, koncerne min, mi estis tre kontenta esti loĝigita tiamaniere, kaj mi estus volinta, ke tio daŭru la tutan militiron.

Du rekrutoj de Saint-Dié loĝis kun mi ĉe la poŝtestro de la vilaĝo. Preskaŭ ĉiuj ĉevaloj de la poŝto estis rekviziciitaj por nia kavalerio, kio ne igis lin bonhumora, sed li diris nenion pri tio kaj fumis sian pipon antaŭ la forno de mateno ĝis vespero. Lia edzino estis granda kaj forta virino,

kaj iliaj du filinoj estis tre belaj. Ili timis nin kaj ĉiam malaperis, kiam ni revenis de la ekzercado aŭ de la gardostarado fine de la vilaĝo.

La vesperon de la kvara tago je la sepa, kiam ni estis finintaj la vespermanĝon, alvenis maljunulo vestita en nigra surtuto, kun blanka kapo kaj tute respektinda vizaĝo. Li salutis nin kaj tiam demandis al la poŝtestro:

«Ĉu ili estas novaj rekrutoj?»

«Jes, sinjoro Stenger,» respondis la alia, «neniam ni estos liberigitaj de tiuj viraĉoj. Se mi povus venenigi ĉiujn, mi tuj farus tion.»

Mi trankvile turniĝis al li kaj diris germane:

«Mi scipovas la germanan, sinjoro. Ne diru tiajn aferojn.»

Kiam la poŝtestro aŭdis tion, li paliĝis, kaj la pipo preskaŭ falis el sia mano.

«Vi estas tre nesingarda per viaj vortoj, sinjoro Kalreuth!» diris la maljunulo. «Se aliaj ol tiu junulo aŭdus tion, pripensu, kio povus okazi al vi lak via familio.»

«Estas nur maniero paroli,» respondis la dika viro. «Kion vi volas? Kiam oni forprenas ĉion al vi, kiam oni prirabas vin dum jaroj, oni ne plu scias, kion oni diras, kaj oni diras stultajojn.»

Tiam la maljunulo, kiu estis neniu alia ol la pastro de Schweinheim, venis saluti min, dirante:

«Sinjoro, via maniero agi estas tiu de honesta viro. KREDU min, sinjoro Kalreuth ne kapablas fari ian malbonon, eĉ ne al mal-amikoj.»

«Ankaŭ mi opinias tion sinjoro, alie mi ne manĝus liajn kolbasojn tiel bonapetite.»

Aŭdinte tiujn vortojn, la poŝtestro ekridegis, tenante siajn du grandajn manojn sur la ventro kiel infano kaj ekkriis:

«Mi neniam estus kredinta, ke franco igas min ridi.»

Miaj du kamaradoj devis gardostari kaj eliris. Mi restis sola. Tiam li poŝtestro iris preni botelon da malnova vino, sidiĝis ĉe la tablo kaj diris, ke li volas trinki kun mi, kion mi volonte faris. Kaj ekde tiu tago ĝis nia foriro tiuj homoj havis multan konfidon en mi. Ĉiuvespere ni

babilis ĉe la fajrejo. La pastro venis, kaj la knabinoj malsupreniris por aŭskulti. Ili estis blondaj kaj havis blujajn okulojn. Unu povus havi dek ok jarojn, la alia dudek. Mi trovis, ke ili iel similis al Trinel, kio tuŝis mian koron. Mi rakontis al ili, ke mi havas amatinon en mia lando, ĉar mi ne povis malhelpi mi diri tion, kaj tio mildigis ilin.

La poŝtestro amare plendis pri la francoj. La pastro diris, ke ili estas orgojla kaj neĉasta nacio, kaj ke pro tiuj kialoj la tuta Germanio estis leivĝonta kontraŭ ni, ke ilin naŭzas la mal-bonaj moroj de niaj soldatoj kaj la avideco de niaj

²² Tiel nomis lin Napoleono mem.

generaloj, kaj ke ili formis la *Tugend-bund*²³ por batali kontraŭ nin.

«En la unua tempo,» ili diris al mi, «vi, francoj, parolis pri libereco. Ni ŝatis aŭdi tion, kaj niaj deziroj estis pli por viaj armeoj ol por tiuj de la reĝo de Prusio kaj la imperiestro de Aŭstrio. Vi batalis kontraŭ niajn soldatojn kaj ne kontraŭ nin. Vi subtenis ideojn, kiujn ni ĉiuj trovis justaj kaj grandaj, kaj jen kial ne la popoloj estis kontraŭ vi, sed jes iliaj mastroj. Hodiaŭ estas tute alie. La tuta Germanio estas marŝonta, la tuta junularo estas leviĝonta, ĉar estas ni, kiuj parolas nun pri libereco, pri virto, pri justeco al Francio. Tiu kiu parolas pri tiuj aferoj, ĉiam estas la plej forta, ĉar li havas kontraŭ si nur la friponojn de ĉiuj aliaj landoj, kaj ĉar ili havas por si la junularon, la kuraĝon, la grandajn ideojn, ĉion kio levas la animon super egoismon kaj igas onin oferi sian vivon sen be-daŭro. Vi longe havis tion, sed tio jam ne sufiĉas al vi. Tiutempe viaj generaloj, mi bone memoras tion, batalis pro libereco. Ili dormis sur pajlo en grenejoj kiel simplaj sol-datoj: ili estis teruraj viroj! Nun ili bezonas kanapojn, ili estis pli nobelaj ol niaj nobeluloj kaj pli riĉaj ol niaj bankistoj. Tio efikigas, ke milito, kiu estas antaŭe la plej bela okupo – arto, ofero, dediĉo al la patrio – fariĝis metio, kiu enspezigas pli ol butikoj. Ĝi ankoraŭ ĉiam estis tre nobla, ĉar oni surhavas epoletojn. Sed tamen estas diferenco inter batalado por eternaj, justaj ideoj kaj batalado por riĉigi sian butikon.

«Hodiaŭ estas nia vico paroli prilibereco kaj patrio: jen kial mi opinias, ke tiu milito estos fatala por vi. Ĉiuj pensantaj estaĵoj, de la simplaj soldatoj ĝis la teologiaj profesoroj marŝos kontraŭ vin. Vi havas kiel estro la plej grandan generalon en la mondo, sed ni havas eternan justecon. Vi kredas havi por vi la saksojn, bavarojn, badenanojn kaj hessojn. Elerariĝu: la infanoj de la malnova Germanio bone scias, ke la plej granda krimo kaj la plej granda honto estas batali kontraŭ siajn fratojn. Lasu la reĝojn fari aliancojn kun vi, la popolo estas kontraŭ vi malgraŭ tiuj aliancoj. Ili defendas sian sangon, sian hejmon, sian patrion: ĉion kion Dio igas nin ami kaj kion oni ne povas perfidi sen krimo. Ĉiuj falos sur vian dorson: la aŭstroj masakros vin, tuj kiam ili povos, malgraŭ la edziniĝo de arĥidukino Maria-Luiza al via imperiesro. Oni komencas vidi, ke la interesoj de la reĝoj ne estas ĉio kio gravas en tiu ĉi mondo, kaj la plej grandan geniulo ne kapablas ŝanĝi la naturon de la homo.»

Tiel la pastro parolis en grava tono. Tiam mi ne ĉiam bone komprenis liajn paroladojn, kaj mi pensis: «Vortoj, estas nur vortoj, kaj fusil-pafoj estas fusilpafoj. Se ni renkontos nur studentojn

kaj teologiajn profesorojn por batali kontraŭ nin, ĉio iros glate. Cetere, disciplino ĉiam malhelpos la hessojn, bavarojn, badena-nojn kaj saksojn turni sin kontraŭ nin, tute kiel ĝi devigas nin, francojn, batali, kvankam pli ol unu ne ŝatas fari tion. Ĉu soldato ne obeas al kaporalo, kaporalo al serĝento, kaj tiel plu ĝis la marŝalo, kiu faras, kion volas la imperies-tro? Oni bone vidas, ke la pastro neniam ser-vis en regimento, alie li sciis, ke ideoj ser-vas a nenio kaj ke ordonoj estas ĉio. Sed mi ne volis kontraŭdiri lin, ĉar eble tiam la poŝtestro ne plu alportus botelon da vino post la vesper-manĝo. Ili pensu ĉion, kio plaĉas al ili. Ĉio, kion mi deziris, estis, ke ni renkontos nur teologion.

Dum ni babiladis tiamaniere, la matenon de la 2-a de aprilo subite alvenis la ordono ek-marŝi. La bataliono iris al Lauterbach, tiam la morĝaŭon al Neukirchen, kaj ni faris nenion plu ol marŝadi, ĉiam marŝadi. Tiuj kiuj ankoraŭ ne kutimiĝis al la portado de la sako, ne povis plendi pri manko de ekzercado, ĉar Dio scias, kiom da distanco ni demetis! Mi jam delonge ne plu ŝvitis kun miaj kvindek kartoĉoj en mia kartoĉujo, mia sako kaj mia fusilo sur la ŝultro, kaj mi ne scias, ĉu mi ankoraŭ lamis.

Sed ni ne estis la solaj kiuj moviĝis; ĉio marŝadis, ĉie ni renkontis regimentojn survoje, kavaleriajn taĉmentojn, karavanojn de kanonoj, pulvo kaj kanonkulgoj, kaj ĉio antaŭeniris al Erfurt, kiel post granda pluvado miloj da rojoj fluadas tra ĉiuj vojoj al rivero.

Niaj serĝentoj diris unuj al la aliaj:

«Ni proksimiĝas... Fariĝos varme!»

Kaj ni pensis: «Des pli bone! Tiuj rusaj kaj prusaj friponoj estas la kaŭzo, kial oni prenis nin. Se ili estus restintaj trankvilaj, ni estus ankoraŭ en Francio!»

Tiu penso amarigis nin. Kaj ĉie ni renkontis virojn kiuj ŝatas batali: Klipfel kaj Zebedeus parolis pri atako kontraŭ la prusojn, kaj mi, por ne ŝajni malpli kuraĝa ol ili kaj la aliaj, diris, ke tio ĝojigis ankaŭ min.

La 8-an de aprilo la bataliono eniris la citadelon de Erfurt, urbo tre fortika kaj riĉa. Mi ĉiam memeros, ke post kiam oni rompita la viĉojn sur la placo antaŭ la kazino, la sub-ofiira-poŝtisto enmanigis paketon da leteroj al la serĝento de la roto. Inter ili estis ankaŭ letero por mi. Mi tuj rekons la skribon de Trinel, kio havis tiel fortan efikon sur mi, ke miaj genuoj ekstremis!

Zebedeus, kiu ankaŭ estis tre kontenta ricevi novaĵon el Falsburgo. prenis mian fusilon kaj diris al mi: «Venu!»

Mi kaŝis la leteron en mian poŝon, kaj ĉiuj samregionanoj sekvis min por aŭdi la legadon. Sed mi volis tre trankvile sidiĝi sur mian liton

²³ En Esperanto: Ligo de la Virto

antaŭ ol malfermi la koverton, kaj nur post kiam ni instaligis en angulo de la Finckmatt kaj mia fusilo troviĝis en la fusilkrado, mi komencis legi. Ĉiuj aliaj kliniĝis super miajn ŝultrojn. La larmoj fluis sur miaj vangoj, ĉar Trinel rakontis al mi, ke ŝi ĉiam pensas nur pri mi kaj ke ŝi preĝas por mi.

Kaj aŭdinte tion la kamaradoj diris:

«Ni estas certaj, ke hejme oni preĝas ankaŭ por ni!»

Unu parolis pri sia patrino, alia pri siaj frati-noj, alia pri sia amatino.

Fine sinjoro Gulden skribis, ke la tuta urbo fartas bone, ke mi devas esti kuraĝa, ke tiuj mizero daŭros nur kelkan tempon. Li komisiis min averti la kamaradojn, ke oni pensas ankaŭ pri ili kaj ke iliaj gepatroj plendas pri tio, ke ili ricevas eĉ ne unu vorton da novaĵo de sia filo.

Tiu letero estis granda konsolo por ni ĉiuj.

Kaj kiam mi pensis, ke ni estis tiam la 8-an de aprilo, kaj ke baldaŭ komenciĝos la batalo, mi konsideris ĝin kiel la lasta adiaŭo el nia lando por duono en ni, pluraj neniam plu estis aŭdontaj paroli pri siaj gepatroj, siaj amikoj kaj pri tiuj kiujn ili amis en iu ĉi mondo.

XII

Ĉio ĉi, kiel diris serĝento Pinto, estis nur la komenco de la festo, ĉar la danco estis baldaŭ komenciĝonta.

Intertempe mi servis en la citadelo kun bataliono de la 27-a, kaj de la remparoj ni vidis la tutan ĉirkaŭaĵon kovritan per trupoj en bivako, alaj enloĝigitaj en la vilaĝoj.

La 18-an, revenante de la gardostarado ĉe la Pordego de Warthau, serĝento Pinto, kiu amikiĝis kun mi, diris al mi :

«Fusilisto Seitz, la imperiestro alvenis.»

Ankoraŭ neniu aŭdis paroli pri tio, kaj tial mi respondis:

«Kun respekto por vi, sed mi ĵus prenis glaseton kun pioniro Merlin, kiu staris la antaŭan nokton kiel ordonportisto ĉe la pordo de la generalo, kaj li diris nenion al mi pri tio.»

Tiam li diris palpebrumante :

«Tio estas en la aero, ĉar ĉio moviĝas. Vi ankoraŭ ne komprenas tion, rekruto, sed li estas ĉi tie. Mi sentas tion ĝis en la pintoj de miaj piedfingroj. Kiam li ne estas ĉi tie, ĉio iras nur per unu piedo. Sed nun, jen, rigardu tie for tiujn stafetojn galopantajn sur la vojo: ĉio komencis revivi. Atendu la unuan dancon, aten-du, kaj vi vidos la *Kaiserliche*²⁴ kaj la kozakoj. Ili ne

bezonas lornojn por vidi, ĉu li estas ĉe ni. Ili sentas tion.»

Tiel parolante la serĝento ridis tra siaj longaj lipharoj.

Mi havis la antaŭsenton, ke povos okazi al mi grandaj malfeliĉoj, kaj tamen mi estis devigita surmeti bonhumoran mienon.

Nu, la serĝento ne eraris, ĉar la saman tagon je la tria posttagmeze ĉiuj trupoj enloĝigitaj ĉirkaŭ la urbo ekmoviĝis, kaj je la kvina oni igis nin preni la armilojn: marŝalo Ney, princo de Moskvo, eniris la urbon meze de granda kvanto da generaloj kaj oficiroj. Preskaŭ tuj generalo Souham, viro je ses futoj alta, tute griza, eniris la citadelon kaj revuis nin sur la placo. Per laŭta voĉo li diris al ni, tiel ke ĉiuj povis aŭdi tion:

«Soldatoj! Vi fariĝos parto de la avangardo de la 3-a korpuso. Provu memori, ke vi estas francoj. Vivu la Imperiestro!»

Tiam ĉiuj kriis : «Vivu la Imperiestro!» Kaj tio produktis teruran efikon per la eĥoj sur la placo.

La generalo foriris kun kolonelo Zapfel.

Tiun saman nokton ni estis anstataŭigitaj per la hessoj, kaj ni forlasis Erfurt kun la 10-a de la husaroj kaj regimento de badenaj ĉasistoj. Je la sesa aŭ sepa matene ni troviĝis antaŭ la urbo Weimar, kaj sub la leviĝinta suno ni vidis ĝardenojn, preĝejojn, domojn kaj dekstre ian malnovan kastelon.

Oni igis nin bivaki sur tiu loko, kaj la husaroj foriris skolti la urbon. Je la naŭa, dum ni faris supon, subite ni aŭdis malproksime la kraketadon de fusilpafoj. Niaj husaroj renkontis en la stratoj prusajn husarojn. Ili batalis kaj pafis unuj al la aliaj per pistoloj. Sed estis tie for, ke ni povis vidi preskaŭ nenion de la batalo.

Post unu horo la husaroj revenis. Ili perdis du virojn. Tiumaniere komenciĝis la batalo.

Ni restis tie kvin tagoj, dum kiuj la tuta 3-a korpuso antaŭeniris. Car ni estis la avangardo, ni devis reekiri antaŭen en la direkto de Sulza kaj Warthau. Tiam ni vidis niajn malamikojn: kozakojn, kiuj ĉiam retiriĝis el la atingopovo de la fusiloj, kaj ju pli tiuj virojretiriĝis, des pli ni ekhavis kuraĝon.

Min tedis, ke Zebedeus ĉiam diris kun malbonhumora mieno:

«Ĉu do ili neniam haltas? Ĉu do ili neniam haltas?»

Mi pensis: «Se ili foriras, kion pli bonan ni povus deziri? Ni venkos sen peno.»

Sed fine ili haltis trans sufiĉe larĝa kaj profunda rivero, kaj ni vidis grandan kvanton da ili, kiuj atendis nin por hakmortigi nin, se ni havus la malfeliĉan ideon transiri tiun riveron.

Estis la 29-an de aprilo, komencis malfruiĝi, kaj oni ne povis vidi pli belan sunsubiron.

²⁴ La soldatoj de la imperiestro (germane: Kaiser) de Aŭstrio

Trans la akvo etendiĝis ebenaĵo tiel for, kiel oni povis vidi, kaj kontraŭ la ruĝa rubando de la ĉielo svarmis tiuj kavalerianoj kun antaŭenkurbigitaj ĉakoj, en verdaj jakoj kaj ĉielbluaj pantalonoj kaj kun malgranda kartoĉujo sub la brako. Ankaŭ malantaŭe amaso da lancoj estis videblaj. Serĝento Pinto rekonis ilin kiel rusajn ĉasistojn sur ĉevaloj kaj kozakojn. Li ankaŭ rekonis la riveron kaj diris, ke estas Saal.

Ni proksimiĝis kiel eble plej al la akvo por pafi al la kavalerianoj, kiuj retiriĝis pli foren kaj eĉ malaperis sub la ruĝa ĉielo. Tiam ni starigis la bivakon apud la rivero kaj lokis gardostarantojn. Maldekstre ni ekvidis grandan vilaĝon. Taĉmento direktis si tien por provi ekhavi viandon pagante ĝin, ĉar ekde la alveno de la imperiestro oni ricevis la ordonon ĉion pagi.

En la nokto, dum ni kuiris supon, aliaj regimentoj de la divizio alvenis. Ankaŭ ili starigis sian bivakon laŭlonge de la rivero, kaj estis io belega tiuj fajrostrekoj tremetantaj sur la akvo.

Neniu emis dormi. Zebedeus, Klipfel, Fürst kaj mi manĝis el la sama gamelo, kaj ni diris rigardante nin :

«Morgaŭ estos varme, se ni volos transiri la riveron. Niaj kamaradoj en Falsburgo, kiuj prenas sian glason en la bierfarejo *la Sovaĝa Homo*, ne suspektas, ke ni sidas sur tiu ĉi loko, ĉe borde de rivero, manĝante pecon da bovaĵo kaj ke ni kuŝiĝos sur la teron kaj kaptos reŭmatismen en nia maljunaj jaroj, sen paroli pri la sabrotoj kaj fusilpafoj, kiuj estos rezervitaj al ni, eble pli frue, ol oni kredas.

«Ba,» diris Klipfel. «Tia estas la vivo. Mi ja mokas pr la ebleco dormi en kotono kaj pasigi unu tagon kiel la alian. Por vivi necesas, ke estu bone al oni hodiaŭ kaj malbone morgaŭ. Tiamaniere la ŝanĝiĝoj estas agrablaj. Kaj koncerne la fusilpafojn, sabrofrapojn kaj bajonetpikojn, danke al Dio, ni donos tiom da ili, kiom ni ricevos.»

«Jes,» diris Zebedeus, ekbruligante sian pipon. «Koncerne min, mi esperas, ke, se oni sendos min al la alia mondo, mi estos doninta tiom da frapoj, kiom oni donis al mi.»

Ni tiel babiladis dum du aŭ tri horoj. Léger kuŝis sur la grundo en kapoto, la piedojn apud la flamoj, kaj dormis, kiam la gardostaranto kriis je ducent paŝoj de ni:

«*Qui vive?*»

«Francio!»

«Kiu regimento?»

«La 6-a leĝera.»

Estis marŝalo Ney kaj generalo Brenier kun

la oficiroj de la pontonistoj kaj kanonistoj. La marŝalo respondis 'la 6-a leĝera', ĉar li bone sciis, kie ni estas. Tio ĝojigis kaj eĉ fierigis nin. Ni vidis lin preterpasi surĉevale kun generalo

Souham kaj kvin aŭ ses aliaj superaj oficiroj, kaj malgraŭ la nokto ni bone rekonis lin. La ĉielo estis tute blanka pro steloj, la luno supreniris, kaj oni vidis ĉion preskaŭ kiel en plena tago.

Ili haltis ĉe kurbo de la rivero, kie oni metis ses kanonojn, kaj preskaŭ tuj poste la ponto-nistoj alvenis kun longa vico da veturliloj ŝar-ĝitaj per tabuloj, traboj, fostoj kaj ĉio necesa por konstrui du pontojn. Niaj husaroj kuris laŭlonge de la rivero por malŝarĝi la boatojn, la kanonistoj staris apud siaj pecoj por forbalai tiujn kiu volis malhelpi tiun laboron. Longe ni rigardis, kiel la laboro progresas. Ĉiuflanke oni aŭdis krii : «*Qui vive? Qui vive?*» Estis la regi-mentoj de la 3-a korpuso, kiuj alvenis.

Ĉe la tagiĝo mi fine ekdormis. Necesis, ke Klipfel skuis min por veki min. Oni batis la apelon en ĉiuj direktoj. La pontoj estis pretaj. Oni estis trafrontaj la riveron Saal.

Faladis forta roso. Ĉiuj rapidis sekigi sian fusilon, ruli sian kapoton kaj buki ĝin sur sia sako. Ni helpis unuj la aliajn, kaj Tiam ni envi-ĉiĝis.

Povis esti tiam la kvara matene. Ĉio estis griza pro nebulo, kiu supreniĝis de la rivero. Du batalionoj jam pasis trans la pontojn, la sol-datoj en unu vico, la oficiroj kaj la flago en la mezo. La kanonoj kaj la municiaĵoj pasis poste. Tio kaŭzis surdigan ruliĝadon.

Kapitano Florentin igis nin renovigi la prajmojn, kiam alvenis generalo Souham, generalo Chemineau, kolonelo Zapfel kaj nia komandanto. La bataliono ekmoviĝis. Mi ĉiam rigar-dis pot vidi, ĉu eble la rusoj alkuras galope, sed nenio moviĝis.

Laŭ tio ke oni alvenis sur la alia bordo, ĉiu regimento formis kvadraton, la fusilon ĉe la piedo. Je la kvina la tuta divizio estis pasinta. La suna disipis la nebulon. Je tri kvaronoj de mejlo dekstren ni vidis malnovan urbon kun pintaj tegmentoj, cepoforma preĝejturo kovrita per ardezoj kaj kun kruco supre, kaj pli mal-antaŭe kastelon : estis Weissenfels.

Inter ni kaj la urbo etendiĝis profunda tere-nofaldo. Marŝalo Ney, kiu ankaŭ alvenis, volis scii antaŭ ĉio, kio troviĝas en ĝi. Du rotoj de la 27-a estis malfalditaj en tiraloroj, kaj la kvadratoj ekmarŝis en la kutima paŝo: la oficiroj, la pioniroj kaj la tamburistoj marŝis en la mezo, la kanonoj en la intervalo kaj la municiaĵoj post la lasta vico.

Ĉiuj malfidis tiun kavaĵon, des pli ke la antaŭan tagon ni vidis amason da kavalerianoj,

kiuj ne povis esti forkurintaj al la vasta ebenaĵo, kiun ni malkovris en ĉiuj direktoj. Estis neeble. Tial mi neniam havis pli da malfido ol en tiu ĉi momento : mi atendis ion. Malgraŭ tio, kiam mi vidis nin ĉiujn regule marŝantaj en viĉoj, la

fusilojn ŝarĝitajn, nian flagon en la batalfronto, niajn generalojn malantaŭe plenajn je memfido, - kiam mi vidis nin tiel marŝantaj sen rapidi kaj aŭdante nin amase paŝi kune, tio donis al mi kuraĝon. Mi diris al mi mem: «Eble ke ekvidante nin, ili forkuros. Tio estus la plej bona afero por ili kaj por ni.»

Mi trovis en la dua vico post Zebedeus en la fronto, kaj oni povas imagi, ke mi malfermis la oklojn! De tempo al tempo mi rigardis en la direkto de la kvadrato, kiu antaŭeniris sur la sama linio, kaj mi vidis la marŝalon en la mezo kun sia armestabo. Ĉiuj levis la kapon, iliajn grandajn ĉapelojn surmetitajn transverse por vidi de malproksime kio okazas.

Tiam la tiraljoroj alvenis apud la ravino, kiu estis borderita per vivaj arbustoj kaj heĝoj. Jam kelkajn momentoj antaŭe mi vidis pli fore en la alia flanko ion moviĝi kaj brili kiel spikoj tra kiu pasas vento. La ideo venis al mi, ke la rusoj povas esti tie kun siaj lancoj kaj sabroj. Tamen estis malfacile kredi tion. Sed en la momento, kiam niaj tiraljoroj proksimiĝis al erikejo, kaj la pafado komenciĝis sur pluraj lokoj, mi klare vidis, ke estas lancoj. Preskaŭ tuj fulmo ekbrilis fronte al ni kaj kanono ektondris. Tiuj rusoj havis kanonojn. Ili pafis al ni. Mi ne scias pro kiu bruo mi turnis la kapon, sed mi vidis grandan truon en la vicoj maldekstre.

Samtempe mi aŭdis kolonelon Zapfel, kiu diris trankvile:

«Densigu la vicojn!»

Kaj kapitano Flotentin ripetis:

«Densigu la vicojn!»

Tio fariĝis tiel rapide, ke mi ne havis tempon pensi. Sed kvindek pasojn pli malproksimen ekbrilis alia fumo kaj aŭdiĝis la sama bruo en la vicoj – kvazaŭ forta vento, kiu pasis, - kaj mi vidis denove truegon, tiufoje dekstre.

Kaj ĉar post ĉiu kanonpafado de la rusoj la kolonelo kriis: «Densigu la vicojn», mi komprenis, ke ĉiufoje estis truo. Tiu ideo tute konfuzis min, sed necesis ja marŝi.

Mi ne kuraĝis pensi pri tio, kaj mi deturnis mian menson de tio, kiam generalo Chemineau, kiu ĵus eniris nian kvadraton, kriis per terura voĉo:

«Unua vico, genuon teren... mallevu bajoneton. Pretigu fusilon!»

Ĉar Zebedeus estis metinta la genuon teren, mi iel troviĝis en la unua vico. Sajnis al mi, ke mi vidis ankoraŭ alproksimiĝi en rekta linio tiun amason da ĉevaloj kaj rusoj kurbiĝintaj antaŭ-

en, la sabron en la mano, kaj mi aŭdis la generalon trankvile diri malantaŭ ni, kvazaŭ dumkerco:

«Atentu pri la komando pafi. – Alŝultrigu fusilon... Pafu!»

Ni pafis, la kvar kvadratoj kune. Oni estus kredinta, ke la ĉielo falis. Apenaŭ la fumo iomete supreniris, ni vidis la rusojn, kiuj revenis galope. Sed niaj kanonoj tondris, kaj niaj kugloj iris pli rapide ol iliaj ĉevaloj.

«Ŝargu!» kriis la generalo.

Mi ne kredis, ke mi iam en la vivo havis tian plezuron.

«Jen! Jen! Ili forkuras!» mi diris al mi mem.

Ĉiufanke oni aŭdis la krion: «Vivu la Imperiestro!»

En mia ĝojo mi kriis kiel la aliaj. Tio daŭris minuton. La kvadratoj denove ekmarŝis, oni jam kredis, ke ĉio estas finita, sed je ducent aŭ tricent paŝoj de la ravino aŭdiĝis granda bruo, kaj por la dua fojo la generalo kriis:

«Halt !... Genuon teren !... Mallevu bajoneton!»

La rusoj eliris el la kavaĵo kiel vento por fali sur nin. Ili alvenis ĉiuj kune: la grundo tremis. Oni ne plu aŭdis komandojn. Sed la natura prudento de la francaj soldatoj avertis ilin, ke ili devas pafi en tiun amason, kaj la pafado ekru-liĝis kiel rulbatado de tamburoj ĉe la grandaj revuoj. Tiuj kiuj neniam aŭdis tion, ne povas bildigi tion al si. Iuj rusoj alvenis ĝis ĉe ni. Oni vidis ilin stari en la fumo, tiam, tuj poste, oni vidis plu nenion.

Post kelkaj momentoj, ĉar oni faris nenion alian ol ŝargi kaj pafi, la terura voĉo de generalo Chemineau resonis, kriante: «Cesu pafi!»

Oni preskaŭ ne kuraĝis obei. Ĉiuj rapidis ankoraŭ pafi kuglon. Sed kiam la fumo disipiĝis, oni vidis grandan amason da kavalerianoj re-suprenalopi la transan flankon de la ravino.

Oni tuj malfaldis la kvadratojn por marŝi en kanonoj. La tamburistoj batis la atakon, niaj kanonoj tondris.

«Antaŭen!... Antaŭen !... Vivu la Imperiestro!...»

Ni malsupreniris en la ravinon trans amason da ĉevaloj kaj rusoj ankoraŭ moviĝantaj surtere, kaj supreniris per rapidaj paŝoj la kontraŭan taluson en la direkto de Weissenfels. Ĉiuj kozakoj kaj ĉasistoj, la kartoĉujon sur la lumbo kaj la dorson falditan, galopadis antaŭ ni tiel rapide kiel ili povis: la batalo estis gajnita !

Sed en la momento, kiam ni proksimiĝis al la ĝardenoj de la urbo, iliaj kanonoj, kiujn ili kuntenis kaj metis malantaŭ specon de fruktarbejo, sendis al ni kuglegojn, el kiuj unu rompis la hakilon de pioniro Merlin, forportante lian kapon. La kaporalo de la pioniroj, Thomé, mem

havis la dekstran brakon rompita per peco de la hakilo. Necesis fortranĉi lian brakon vespere en Weissenfels. Tiam oni komencis kuri, ĉar ju pli baldaŭ oni alvenis, des malpli la aliaj havis tempon por pafi: ĉiuj lomprenis tion.

Ni eniris la urbon en tri lokoj, tra irante he-ĝojn, ĝardenojn, lupolstangojn, kaj saltante trans

murojn. La marŝalo kaj la generalo kuris post ni. Nia regimento eniris tra avenuo bor-derita per popoloj, kiu staris laŭlonge de tom-bejo. Kiam ni atingis la placon, alia kolono alvenis tra la ĉefa strato.

Tie ni haltis, kaj la marŝalo, sen perdi unu minuton, sendis la 27-an iri kapti iun ponton kaj provi tranĉi la retirigon de la malamiko. Dum tiu tempo la resto de la divizio alvenis kaj lokis sin laŭvice sur la placon. La urbestro kaj la konsilianoj de Weissenfels staris antaŭ la pordo de la urbdomo por bonvenigi nin.

Kiam ni estis retrovintaj niajn lokojn en al vicoj, la marŝalo, princo de Moskvo, paŝis antaŭen ĝis antaŭ nia batalfronto kaj goje diris al ni :

«Bone! Bone! Mi estas kontenta pri vi! La Imperiestro ekscios vian belegan konduton... Estas bone!...»

Li ne povis malhelpi sin ridi, ĉar ni estis kurintaj al la kanonoj.

Generalo Souham rimarkis :

«Ĉio iras glate.»

«Jes, jes,» la marŝalo respondis, «tio estas en nia sango, tio ests en nia sango.»

Mi ĝojis, ke mi eliris nevundita el tiu afero.

La bataliono restis tie ĝis la morgaŭo. Oni loĝigis nin ĉe civiluloj, kiuj timis nin kaj donis al ni ĉion, pri kio ni petis. La 27-a revenis ves-pere. Ĝi estis loĝigita en la malnova kastelo. Ni estis tre lacaj. Fuminte du aŭ tri pipojn kune, dum ni rakontis pri nia gloro, Zebedeus, Klipfel kaj mi iris dormi en la butikoj de ĉarpentisto sur amaso da rabotaĵoj, kaj ni restis tie ĝis nokto-mezo, momento en kiu oni batis la apelon. Necesis ekstarti. La ĉarpentisto donis al ni brandon, kaj ni eliris. Falis akvo amase. Tiun saman nokton la bataliono iris bivaki antaŭ la vilaĝo Klepen je du horoj de Weissenfels. Ni ne estis tre kontentaj pro la pluvo.

Pluraj aliaj taĉmentoj venis aliĝi al ni. La imperiestro alvenis en Weissenfels, kaj la morgaŭon, je la kvina matene, la bataliono reekmarŝis kiel avangardo.

Fronte al ni fluadis rivero nomata Rippach.

Anstataŭ deturniĝi por iri al ponto, ni transiris surloke. Ni havis akvon ĝis la ventro, kaj retirante miajn ŝuojn el la koto, mi pensis: «Se oni estus rakontinta tion al mi antaŭe, kiam mi timis ekhavi nazkataron ĉe sinjoro Gulden, kaj ŝanĝis la ŝtrumpojn dufoje semajne, mi ne

estus povinta kredi tion ĉi ! Okazas ja teruraj aferoj en onia vivo!»

Dum ni laŭiris la riveron kontraŭflue sur la transa boro, ni malkovris inter la kanoj sur la altaĵoj maldekstre bandon da kozakoj, kiuj observadis nin. Ili malrapide sekvis nin sen kuraĝi ataki, kaj mi komprenis, ke koto estas tamen bona al io.

Tiel ni iradis jam horon – jam estis tagiĝinta –

kiam subite terura pafado kaj kanontondrado igis nin turni la kapon en la direkto de Klepen. La komandanto, sur sia ĉevalo, rigardis trans la kanojn.

Tio daŭris longe. Serĝento Pinto diris:

«La divizio antaŭeniras. Ĝi estas atakata.»

La kozakoj ankaŭ rigardis, sed nur post unu horo ili malaperis. Tiam ni vidis la divizion alproksimiĝi en kolonoj dekstre tra la ebenaĵo, forpelante amason da rusa kavalerio.

«Antaŭen! » kriis la komandanto.

Kaj ni kuris sen scii kial, ĉiam sekvante la rivero kontraŭflue, tiel ke ni alvenis ĉe malnova ponto, kie kunfluis la riveroj Rippach kaj Gruna. Ni devis haltigi la malamikon sur tiu loko. Sed la kozakoj jam malkovris nian ruzon, kaj ilia tuta armeo retiriĝis malantaŭ Gruna, trava-dante la riveron. Tiam la divizion aliĝis al ni, kaj ni aŭdis, ke marŝalo Bessières estis morti-gita per kanonkuglo.

De tiu ponto ni ekiris bivaki antaŭ la vilaĝo Gorschen. La famo kuris, ke granda batalo estas preparata, kaj ke ĉio kio okazis ĝis nun, estis nur komenco por testi ĉu la rekrutoj bone eltenas la pafadon. Ĉiu povas imagi la pensojn de prudenta viro kiu troviĝis tie kontraŭvole inter senzorguloj kiel Fürst, Zebedeus kaj Klipfel, kiuj ĝojis, kvazaŭ tiaj eventoj povus alporti al ili alian alian ol fusilpafojn, sabrofrapojn kaj bajonetpikojn.

La tutan reston de tiu tago kaj eĉ parton de la nokto, pensante pri Trinell, mi preĝis Dion, ke Li protektu mian vivon kaj konservu miajn manojn, kiuj estas necesaj al ĉiuj malriĉuloj por vivteni sin kaj sian familion.

XIII

Oni bruligis fajron sur la monteto antaŭ la vilaĝo Gross-Gorschen. Taĉmento malsupreniris tien kaj revenis kun kvin aŭ ses maljunajn bovinojn por fari supon. Sed ni estis tiel lacaj, ke la plej multaj prefris dormi al manĝi.

Aliaj regimentoj alvenis kun kanonoj kaj municio. Je la dek-unua ni estis dek aŭ dek du mil viroj: la tuta divizio de Souham. La generalo kaj la oficiroj-ordonportistoj troviĝis en granda muelejo maldekstre apud fluejo kiun oni nomis Floss-Graben. La gardostarantoj disstartiĝis ĉirkaŭ la monteto je distanco de fusilpafo.

Fine ankaŭ mi ekdormis pro granda laceco. Sed ĉiun horon mi vekigiĝis, kaj malantaŭ ni, en la direkto de la malnova vojo, kiu iras de la malnova ponto de Poserna, mi aŭdis grandan bruon tra la nokto: ruliĝado de veturiloj, kanonoj kaj municio, kiuj supreniris kaj malsupreniris meze de silento.

Serĝento Pinto ne ne dormis. Li fumis sian pipon, sekigante siajn piedojn apud la fajro. Ĉiufoje kiam iu el ni moviĝis kaj volis paroli, li demandis: «Nu, rekruto?»

Sed oni ŝajnis aŭdi nenion, returnis sin oscedante kaj reendormiĝis.

La horloĝo de Gross-Gorschen resonigis kvin batojn, kiam mi vekigis. La ostoj de miaj femuroj kaj lumboj estis kvazaŭ rompitaĵoj pro la longa marŝado tra la koto. Tamen, apogante min sur la grundo, mi sukcesis sidiĝi por var-migi min, ĉar al mi estis malvarme. La fajroj fumis. De ili restis nur cindroj kaj kelkaj braĝoj. La serĝento, starante, rigardis la blankan ebe-naĵon, super kiu la suno desegnigis kelkajn orajn liniojn.

Ĉiuj dormis ĉirkaŭ ni, unuj sur la dorso, aliaj sur ŝultro, la piedojn turnitajn al la fajro. Pluraj ronkis aŭ sonĝis laŭvoĉe.

La serĝento, vidante min vekiginta, venis preni braĝon, tenis ĝin sur sia pipo kaj, tirante diris:

«Nu, fusilisto Seitz, ni troviĝas do nun en la ariergardo.»

Mi ne komprenis, kion li volas diri.

«Ĉu tio mirigas vin, rekruto?» li demandis.

«Estas tamen sufiĉe klare. Ni ne moviĝis, sed la armeo faris duonturnon. Hieraŭ ĝi estis tie, antaŭ ni, apud Rippach. Nin ĝi estas malantaŭ ni, apud Lutzen. Anstataŭ esti la kapo, ni estas nun la vosto.»

Kaj malice palpebrumante, li tiris du aŭ tri nubetojn el sia pipo.

«Kaj kion ni gajnis per tio?» mi demandis.

«Ni gajnis per tio, ke ni alvenos la unuajn en Leipzig kaj falos sur la prusojn, » li respondis. «Poste vi komprenos tion, rekruto.»

Tiam mi ekstaris por rigardi la pejzaĝon, kaj mi vidis antaŭ ni grandan marĉan ebenaĵon, tra kiu fluadis la roĝo Gruna kaj la fosaĵo Floss-Graben. Kelkaj malgrandaj montetoj superis la bordojn de la fluejoj, kaj malantaŭe pasis larĝa rivero, pri kiu la serĝento diris al mi, ke estas Elster. Matenaj nebuloj etendiĝis super tio ĉi.

Turniĝante, mi ekvidis malantaŭ ni en la valo la pintojn de la preĝejturo de Gross-Gorschen, kaj pli fore, dekstre kaj maldekstre, kvin aŭ ses vilaĝetojn, konstruitajn en la kavaĵoj inter la

montetoj, ĉar estis regiono de montetoj. Estis la vilaĝoj Kaya, Eisdorf, Starsidel, Rahna, Klein-Gorschen kaj Gross-Gorschen, kiun mi jam konis. Ili situas ĉe borde de laĝetoj. Gross-Gorschen, kie ni bivakis, estis la plej proksima al la ebenaĵo en la direkto de Elster. La plej proksima estis Kaya, malantaŭ kiu pasas la granda vojo de Lutzen al Leipzig. Oni ne vidis aliajn fajrojn sur la montetoj ol tiujn de nia divizio, sed la tuta 32-a korpuso okupis la vilaĝon, kaj la stabejo troviĝis en Kaya.

Je la sesa la tamburistoj batis la veksignalon, la trupetoj de la surĉevalaj artilerianoj kaj tiuj de la armetraino ankaŭ resonis. Oni descendis al la vilaĝo, unuj por serĉi lignon, aliaj por alporti fojn kaj pajlon. Alvenis municiaĉaroj, kaj oni distribuis panon kaj kartoĉojn. Ni devis resti tie por lasi defili la armeon al Leipzig. Jen kial serĝento Pinto al mi diris, ke ni estos la ariergardo.

Ankaŭ du kantinistinoj alvenis de la vilaĝo, kaj ĉar mi havis akoraŭ kvin monerojn de po ses pundoj, mi oferis glaseton al Klipfel kaj Zebedeus por forpeli la nebulojn de la nokto. Mi ankaŭ permesis al mi oferi unu al serĝento Pinto, kiu akceptis dirante, ke brando post pano varmigas la koron.

Mi estis tre kontentaj, ĉar neniu el ni atendis la teruraĵojn kiuj estis okazontaj tiun tagon. Oni kredis, ke la rusoj kaj prusoj troviĝis tre malproksime de ni malantaŭ la roĝo Gruna, sed ili sciis, kie ni estas. Kaj subite, je la deka, generalo Souham, meze de siaj oficiroj, rapide suprenrajdis la deklivon: tie li eksciis ion tre gravan. Ĝuste en tiu momento mi gardostaris apud la fusilkradoj. Ŝajnis al mi, ke mi ankoraŭ vidas lin kun lia griza kapo kaj lia granda ĉapelo orlita per blanko, grimpi sur la supron de la monteto, eltiri longan lornon kaj rigardi kaj tiam rapide reveni kaj descendi al la vilaĝo, kriante, ke oni batu la apelon.

Tiam ĉiuj gardostarantoj retiriĝis, kaj Zebedeus, kiu havis okulojn de aglo, diris:

«Mi ja vidas tie for apud Elster homamasojn kiuj moviĝas... Kaj eĉ estas iuj kiuj proksimiĝas bonorde, kaj aliaj kiuj eliras el la marĉoj trans tri pontoj. Kia pluvado, se tio ĉi falos sur nian dorson!»

«Tio,» diris serĝento Pinto, la nazon supren kaj manon kiel vizieron super la okuloj, «estas la komenco de la batalo, aŭ mi komprenas nenion pri milito. Dum nia armeo marŝadas al Leipzig kaj etendiĝas sur distanco de tri mejloj, tiuj rusaj kaj prusaj friponoj volas ataki nin en la flanko per ĉiuj iliaj trupoj kaj tranĉi nin en du. Tio estas bona plano iliaflanke: ĉiujn tagojn ili lernas pli kaj pli la ruzojn de milito.»

«Sed kion ni faros?» demandis Klipfel.

«Estas tute simple, » respondis la serĝento. «Ni estas ĉi tie dek ĝis dek kvin mil viroj kun la maljuna Souham, kiu neniam retroiras unu paŝon. Ni estos starantaj kiel najloj, unu kontraŭ ses aŭ sep, ĝis la imperiestro estos informita pri la situacio kaj revenos helpi nin. Jen la oficiroj-ordonportistoj jam forĝalopas.»

Estis vere: kvin aŭ ses oficiroj transiris la ebenaĵon de Lutzen malantaŭ ni en la direkto de Leipzig. Ili rajdis kiel vento, kaj mi petegis la Sinjoron doni al ili la favoron alveni ĝustatempe

kaj sendi la tutan armeon helpe al ni. Ĉar ekscii, ke oni estas pereonta, estas terure, kaj mi ne deziras, eĉ al mia plej granda malamiko, troviĝi en simila situacio.

Serĝento Pinto ankaŭ diris al ni :

«Vi estas bonŝancaj, rekrutoj. Se vi eskapos el tio ĉi, vi povos poste glori vin pri tio, ke vi vidis ion grandiozan. Rigardu nur tiujn bluajn liniojn kiuj alproksimiĝas, la fusilon sur la ŝultro, laŭlonge de la fosaĵo Floss-Graben. Ĉiu linio estas regimento. Estas tridek da ili. Tio faras sesdek mil prusoj, sen kalkuli la vicojn de la kavalerianoj, kiuj estas eskadronoj, kaj maldekstre de ili, apud Rippach, tiuj aliaj, kiuj venas kaj brilas en la suno. Tio estas la drago-noj kaj kirasuloj de la rusa imperiestra gvardio. Mi unue vidis ilin en Austerlitz, kie ni bele aranĝis ilin. Estas ja dek ok ĝis dudek mil da ili. Malantaŭ tiuj amasoj da lancoj venas la bandoj de la kozakoj. Tiel post unu horo, ni havos la plezuron rigardi en la blankon de la okuloj de cent mil viroj, la plej obstinaj kiuj ekzistas en Rusio kaj Prusio. Estas, se tiel diri, batalo en kiu oni gajnas krucon, kaj se ni ne gajnas ĝin, ni devos neniam plu kalkuli je ĝi.

« Ĉu vi kredas, serĝento? » demandis Zebedeus, kiu neniam havis du klarajn ideojn en la kapo kaj jam imagis havi la krucon. Liaj okuloj brilis la okuloj de malsata besto, kiu ekvidas predon.

« Jes, » respondis la serĝento, « ĉar oni staros tre proksime unuj al al aliaj, kaj ni supozu, ke meze de la batalo oni vidas kolonelon, kanonon, flagon, ion okulfrapan, oni saltis sur ĝin tra batoj de bajoneto, sabro, ŝargobastono aŭ ion ajn kaj oni kaptas ĝin. Kaj se oni revenos, oni estos proponita. »

Kiam ili diris tion, la penso venis en mian kapon, ke la urbestro de Felsenbourg ricevis la krucon, ĉar li kondukis en veturiloj ornamitaj per girlandoj sian vilaĝon renkonte al Maria-Luiza, la nova imperiestrino, kantante malnovajn *lieder*²⁵, sed mi trovis lian manieron meriti la krucon multe pli facila ol tiun de serĝento Pinto.

Mi ne havis la tempon plu pripensi tion, ĉar ĉiuflanke oni batis la apelon. Ĉiu rapidis al la fusilkradoj de sia roto kaj prenis sian fusilon. La oficiroj ordigis nun ĉion por la batalo. Kanonoj alvenis en galopo, kiujn oni metis sur la supron ee iu monteto iomete malantaŭe, por ke la dorso de la deklivo servu al ni kiel sub-teno. Ankaŭ la municiaĵoj alvenis.

Kaj pli malproksime, en la vilaĝoj Rahna, Kaya kaj Klein-Gorschen, ĉio moviĝis. Sed ni estis la unuaj sur kiujn tiu amaso estis falonta.

La malamiko haltis je duobla distanco de kanonatingo, kaj iliaj kavalerianoj svarmis cen-

tope ĉirkaŭ la deklivo por skolti nin. Nur vidante apud la fosaĵo Floss-Graben tiun kvanton da prusoj, kiuj nigrigis ĝiajn du bordojn kaj kies unuaj linioj komencis formi kolonojn, mi diris al mi mem.

« Tiun ĉi fojon, Josef, ĉio estis perdita, ĉio estis finita... Jam ne estas rimedo... Ĉio kion vi povas fari estas venĝi vin, defendi vin, kompati neniun... Defendu vin, defendu vin! »

Kiam mi pensis pri tio, generalo Chemineau sola preterpasis surĉevale antaŭ la batalfronto, kriante al ni :

« Formu kvadratojn! »

Ĉiuj oficiroj dekstre kaj maldekstre, antaŭe kaj malantaŭe, ripetis la saman ordonon. Oni formis kvar kvadratojn de po kvar batalionoj. Tiun ĉi fojon mi troviĝis en unu el la internaj linioj, kio plaĉis al mi, ĉar kompreneble mi opiniis, ke la prusoj, kiuj venis antaŭen en tri kolonoj, certe unue atakos la antaŭan flankon. Apenaŭ mi ekhavis tiun penson, vera hajlo de kugloj flugis tra la kvadrato. Samtempe la bruego de la kanonoj, kiujn la prusoj estis trenintaj sur la montetojn maldekstre, komencis tondri multe pli impone ol en Weissenfels: tio ne finiĝis! Sur tiu deklivo ili havis tridekon da grandaj pecoj. Laŭ tio oni povas imagi kiajn truojn ili faris! La kuglegoj siblis tra la aero, jen penetris tra la vicoj, jen en la grundon, kiun ili plugaĉis kun terura bruado.

Ankaŭ niaj kanonoj pafegis en maniero kiu malhelpis onin aŭdi la duonon de la siblado kaj ronkado de la aliaj. Sed tio servis al nenio. Kaj cetere, malbone efikis sur ni la kriado de la oficiroj, kiuj senĉese ordonis: « Densigu la vicojn! Densigu la vicojn! »

Ni estis en eksterordinare densa nubo de fumo, ne plu povante pafi. Mi diris al mi mem: « Se ni restos ankoraŭ kvaronhoron ĉi tie, ni estos masakritaj sen povi defendi nin! ». Tio ŝajnis al mi terure dura, kiam subite la unuaj kolonoj de la prusoj aperis inter la du montetoj, farante strangan bruegon, kvazaŭ inundo proksimiĝis. Tuj la unuaj tri vicoj de nia kvadrato ekpafis, kiam poste ankaŭ la du aliaj vicoj pafis oblikve celante dekstren kaj maldekstren. Dio scias, kiom da prusoj restis en la kavaĵo! Sed anstataŭ halti, iliaj kamaradoj pli supreniris, kriante kiel lupoj: « *Vaterland! Vaterland!*²⁶! », pafante, se tiel diri, al niaj ventroj ĉiujn siajn batalionajn kuglojn je distanco de cent paŝoj.

Post tio komenciĝis la bajonetpikoj kaj kolbatoj, ĉar ili volis frakasi nin. Ili tial estis tre furiozaj. Mian tutan vivon mi memoros, ke bataliono de prusoj alvenis ĝuste flanke de ni, regalante nin per bajonetpikoj, kiujn ni redonis sen forlasi niajn vicojn, kaj ke ili estis ĉiuj for-

²⁵ Germana por kantoj

²⁶ Patrio! Patrio!

balaitaj de du kanonoj, kiuj troviĝis en pozicio je kvindek paŝoj post nia kvadrato.

Nenia alia trupo provis poste penetri inter niajn kvadratojn.

Ili redescendis la montetojn, kaj ni reŝargis niajn fusilojn por ekstermi ilin ĝis la lasta, kiam iliaj pecoj rekomencis pafi, kaj ni aŭdis grandan bruegon dekstre: estis ilia kavalerio, kiu venis profiti de la truoj kiujn faris iliaj kanonoj. Mi vidis nenion de tiu atako, ĉar ĝi venis de la alia flanko de la divizio. Sed malgraŭ tio la kugloj forfalĉis nin per dekduoj. Generalo Chemineau esti vundita en femuro. Tio ne povis daŭri pli longe tiamaniere, kaj oni ordonis nin retiriĝi. Ni faris tion kun plezuro, kion ĉiu komprenos.

Ni pasis ĉirkaŭ Gross-Gorschen, sekvataj de la prusoj, kiuj pafis al ni, kiel ni al ili. La du mil viroj kiuj troviĝis en la vilaĝo, haltis la malamikon per konstanta pafado el ĉiuj fenestroj, dum ni resupreniris la deklivon por atingi la duan vilaĝon, Klein-Gorschen. Sed tiam la tuta prusa kavalerio alvenis flanke de ni por tranĉi al ni la retiriĝon kaj devigi nin resti sub la pafado de siaj kanonoj. Tio nekredible indig-nigis nin. Tiam mi aŭdis Zebedeus kriigi: «Ni ataku ilin prefere ol resti ĉi tiel!»

Tio ankaŭ estis terure danĝera, ĉar la regimentoj de la husaroj kaj ĉasistoj avancis en bona ordo antaŭ ol komenci sian ekkuron..

Ni estis ankoraŭ ĉiam marŝantaj malantaŭen, kiam desupre de la deklivo oni kriis al ni : «Halt!» kaj en la sama minuto la husaroj, kiuj jam kuris al ni, ricevis malŝargon de kugloj, kiu renversis ilin je centoj. Estis la divizio de la brava generalo Girard, kiu venis de Klein-Gorschen helpi nin. Ĝi estis instalinta dek ses pecojn da baterio iomete pli dekstren. Tio produktis tre bonan efikon: la husaroj forkuris pli rapide ol ili venis, kaj la ses kvadratoj de la divizio Girard kuniĝis al la niaj en Klein-Gorschen por haltigi la infanterion de la prusoj, kiuj akoraŭ ĉiam avancadis, la unuaj tri kolonoj antaŭe kaj tri same tiel fortaj malantaŭ ili.

Ni perdis Klein-Gorschen, sed ĉi-foje inter Klein-Gorschen kaj Rahna la batalo estis fariĝonta ankoraŭ pli terura.

Mi pensis pri nenio plu ol venĝo. Mi freneziĝis, se tiel diri, pro kolero kaj indigno kontraŭ tiuj prusoj kiuj volis forpreni al ni la vivon, la plej grandan bonon de ĉiu homo, kio ĉiu devas konservi, kiel ajn li povas. Mi sentis specon de malamo kontraŭ la prusoj, kies krioj kaj impertinenteco naŭzis min. Mi tamen tre ĝojis revidi Zebedeus apud mi, kaj, ĉar atendante novajn atakojn, ni tenis la fuslon ĉe la piedo, mi prenis lian manon.

«Ba, mi havis bonŝancon,» li diris al mi. « Mi

esperas, ke la imperiestro baldaŭ venos, ĉar ili estas dekoble pli fortaj ol ni... Nur se li venus kun kanonoj!»

Li ne plu parolis pri la krucon, kiun li povis gajni!

Mli rigardis iomete flanken por vidi, ĉu la serĝento ankoraŭ ĉiam estis tie, kaj mi ekvidis lin trankvile viŝanta sian bajoneton. Lia mieno estis neŝanĝinta, kaj tio ĝojigis min. Mi tre volonte estus eksciinta, ĉu Klipfel kaj Fürst ankoraŭ troviĝas en siaj vicoj, sed tiam la ordono «Portu fusilon!» igis min pensi pri io alia.

La unuaj tri malamikaj kolonoj haltis sur la monteto de Gross-Gorschen por atendi la tri aliajn, kiuj proksimiĝis, la fusilon sur la ŝultro. La vilaĝo en la valo inter la du armeoj brulis. La pailaj tegmentoj flamis kaj la fumo supreniris al la ĉielo. Sur deklivo maldekstre, ni vidis alveni inter la plugitaj kampoj longan viĉon da kano-noj por preni nin kvazaŭ en tenaĵlo.

Povis esti tagmezo, kiam la ses kolonoj ekmarŝis. Ni vidis, kiel sur la deklivoj de Gross-Gorschen malfaldiĝas amasoj da husaroj kaj surĉevaloj ĉasistoj. Nia artilerio, lokita malantaŭ la kvadratoj sur la supron malantaŭ la deklivo, eklanĉis teruran fajron kontraŭ la prusajn kanonistojn, kiuj respondis sur la tuta linio.

Niaj tamburistoj komencis bati en la kvadratoj por averti nin, ke la malamiko proksimiĝas. Ni aŭdis lin kiel la zumadon de muŝoj antaŭ fulmo tondro, kaj malantaŭe en la valo la prusoj ekkriis ĉiuj kune: «*Vaterland! Vaterland!*»

Ilia pafado dum ili grimpis sur la monteton, kovris nin per fumo, ĉar la vento blovis ĝin en nian direkton, kio malhelpis nin vidi ilin. Malgraŭ tio ni estis rekomencintaj nian laŭvican pafadon. Ni nek aŭdis nek vidis unuj la aliajn ekde almenaŭ kvaronhoron, kiam subite la prusaj husaroj troviĝis en nia kvadrato. Mi ne scias, kiel tio okazis, sed ili estis en ĝi kaj svarmis dekstren kaj maldekstren kliniĝante sur siaj etaj ĉevaloj por senkompate haki nin en peĉojn. Kriante, ni donis bajonetpikojn dum ili pafadis al ni per pistoloj. Koncizadire estis terure. Zebedeus, serĝento Pinto, mi kaj du-deko da aliaj rotanoj rezistis kune. Mian tutan

vivon mi vidos tiujn palajn vizaĝojn, la longajn lipharojn tuŝantajn la orelojn, la etajn ĉakojn, tenatajn per la submentonaj rimenoj sub la mentono, la ĉevalojn baŭmantajn kaj henantajn Super amasoj da mortintoj kaj vunditoj. Mi ĉiam aŭdos la kriojn kiujn ni eligis, unuj en la germana, aliaj en la franca. Ili nomis nin Schweinpelze²⁷¹, kaj la maljuna serĝento Pinto ne cesis krei: «Ek, miaj infanoj, ek!»

²⁷ Malpuraj porkoj

Mi neniam poste povis bildigi al mi, kiel ni eliris el tio. Ni trafe maltrafe marŝadis tra la fumo, ni svarmadis inter la fusilpafoj kaj sabro-batoj. Ĉio kion mi memoras estas, ke Zebe-deus kriis al mi ĉiumomente: «Venu, Josef, venu!» kaj ke fine ni kun serĝento Pinto kaj sep aŭ ok aliaj rotanoj troviĝis sur kampo en deklivo malantaŭ kvadrato, kiu ankoraŭ kon-traŭstaris.

Ni aspektis kiel buĉistoj !

«Reŝargu!» ordonis nin la serĝento.

Kaj reŝargante, mi vidis, ke estas sango kaj haroj sur la pinto de mia bajoneto, kio montris, ke en mia furiozeco mi donis terurajn pikojn.

«La regimento estas konfuzita... Tiuj prusaj friponoj mortis ĝian duonon... Ni retrovos ĝin poste... Por la momento necesas malhelpi la malamikon penetri en la vilaĝon. En vico maldekstren, antaŭen, marŝ!»

Ni malsupreniris ŝtupetaron, kiu kondukis al ĝardeno en Klein-Gorschen, kaj ni eniris domon, kies pordon, kiu eliris al la kampoj, la serĝento barikadis per granda kuirejo tablo. Tiam li diris, montrante al la antaŭpordo:

«Jen nia rifuĝejo.»

Tiam ni supreniris al la unua etaĝo kaj eniris grandetan ĉambron, kiu formis angulon ĉepiede de deklivo. Ĝi havis du fenestrojn donan-tajn vidon sur la strato kaj du aliajn sur la monteto, kiu estis tute kiovrita per fumo kaj kie plu kraketadis la laŭvicaj pafoj kaj tondradis la kanonoj. Malantaŭe en alkovo troviĝis malordigita lito, kaj antaŭ la lito lulillo. Sendube la loĝantoj fuĝis ĉe la komenco de la batalo. Sed hundo kun grand blanka vosto, rekte starantaj oreloj kaj pinta nazo, duone kaŝita sub la kurtenoj, rigardis nin per brilaj okuloj. Ĉio ĉi revenas al mi kvazaŭ en sonĝo.

La serĝento jam estis malferminta fenestron kaj pafanta al la strato, kie avancis du aŭ tri prusaj husaroj inter amaso da ĉaroj kaj sterko. Zebedeus kaj la aliaj staris malantaŭ li kaj observis la scenon, tenante la fusilon preta. Mi rigardis la deklivon por vidi, ĉu la kvadrato ankraŭ kontraŭstaras, kaj mi ekvidis ĝin je distanco de kvincent aŭ sescent paŝoj retiriĝanta en bona ordo kaj pafanta de la kvar flankoj al la kavalerianoj, kiuj ĉirkaŭis ilin. Tra la fumo mi vidis la kolonelon, malaltan dikan viron, sidanta surĉevalo en la mezo, la sabron enmane, kaj tuj apud li la flago tiel disŝirita, ke ĝi estis nur ĉifono pendanta laŭlonge de la stango.

Pli malproksime maldekstre malamika kolono eliris vojkurban kaj marŝis al Klein-Gorschen. Tiu kolono volis malhelpi nian retiriĝon en la vilaĝon. Sed centoj da vagantaj soldatoj estis alvenintaj, kiel ni. Ili alvenis eĉ de ĉiuj flankoj, unuj returniĝante ĉiun kvindekan paŝon por malŝargi sian fusilon, aliaj, vunditaj, trenante sin por povi eskapi ien. Ili eniris la domon, kaj ĉar la

kolono pli kaj pli alproksimiĝis, daŭra pafado komenciĝis el ĉiuj fenestroj. Tio haltigis ĝin, des pli ke en la sama momento sur la dekstra deklivo malfaldiĝis la divizioj de Bre-nier kaj Marchand, kiujn la princo de Moskvo sendis por helpi nin.

Poste ni eksciis, ke marŝalo Ney sekvis la imperiestron en la direkto de Leipzig, sed ke li revenis, aŭdante la tondradon de kanonoj.

La prusoj do haltis sur tiu loko. La pafado ĉesis ambaŭflanke. Niaj kvadratoj kaj niaj kolonoj resupreniris la deklivon antaŭ Starsiedel, kaj ĉiuj niaj en la vilaĝoj rapidis forlasi la domojn por aliĝi ĉiu al sia regimento. La nia estis miksitita kun du aŭ tri aliaj, kaj kiam la divizioj metis la fusilojn ĉepieden antaŭ Kaya, ni apenaŭ rekonis unuj la aliajn. Oni faris apelon de nia roto. Nur kvindek du viroj restis de ĝi. La granda Fürst kaj Léger ne estis inter ili, sed Zebedeus, Klipfel kaj mi savis nian haŭton el la afero.

Malfeliĉe ne estis finita, ĉar la prusoj plenaj je impertinenteco pro nia retiriĝo, jam faris novan aranĝon por veni ataki nin en Kaya. Amasoj da helptrupoj alvenis ĉe ili. Kaj vidante tion, mi ekpensis, ke la imperiestro, kiu estis tiel granda generalo, havis tamen tre malbonan ideon, kiam li direktis sin al Leipzig kaj lasis nin esti surprizitaj de armeo de pli ol cent mil viroj.

Dum ni estis regroupiĝantaj malantaŭ la divizion de Brenier, dek ok mil veteranoj de la prusa gvardio supreniris la deklivon en atak-paŝo, portante la ĉakojn de niaj mortintoj kiel venkosignojn sur la pinto de siaj bajonetoj. Samtempe la batalo daŭradis maldekstre inter Klein-Gorschen kaj Starsidel. La amaso de la rusa kavalerio, kiun ni vidis brili en la matena suno malantaŭ la roĝo Gruna, volis ĉirkaŭiri nin, sed la 6-a korpuso venis kovri nin, kaj la regimentoj de la mararmeo konstruaŭstaris tie kiel muro. Super la tuta ebenaĵo pendis unu granda nubo, kie oni vidis brileti plurajn kaskojn, kirasojn kaj lancojn.

Niaflanke ni ĉiam estis retroirantaj kiam subite iu pasis antaŭ ni kiel tondro: estis mar-ŝalo Ney! Li alvenis en galopego, sekvata de sia armestabo. Mi neniam vidis similan vizaĝon: liaj okuloj fajreris, liaj vangoj tremetis pro kolero ! En sekundo, li tragalopis la tutan linion en ĝia profundo kaj aperis ĉe la fronto de niaj kolonoj. Ĉiuj sekvis lin kvazaŭ altiritaj de eksterordinara forto. Anstataŭ retiriĝi, ni marŝis renkonte al la prusoj, kaj dek minutoj poste la batalo rekomenciĝis plenforte. Sed la malamiko firme kontraŭstaris. Li jam kredis sin mastro de la tereno kaj ne volis lasi eskapi la venkon, des pli ke li ricevis pli da helptrupoj, dum ni jam estis elĉerpitaj sekve de kvin horoj da batalado.

Ĉifoje nia bataliono troviĝis en la dua linio, la kugloj pasis super niajn kapojn. Sed multe pli

malagrabla bruo, kiu trairis miajn nervojn, estis la tintado de la kugloj kontraŭ la bajonetoj: tio sonis kiel speco de terura muziko, kiu aŭdeblis de tre for.

Meze de la krioj, komandoj kaj pafoj ni tamen komencis remalsupreniri trans amason da mortintoj. Niaj unuaj divizioj reeniris Klein-Gorschen. Oni tie batalis korpoĉekorpe. En la ĉefa strato oni vidis nur fusilajn kolbojn en la areo kaj surĉevalajn generalojn, la sabron enmane kial simplaj soldatoj.

Tio daŭris nur kelkajn minutojn. Ni en la vicoj diris: «Tio iras glate!... Tio iras glate !... Oni avancis!» Sed novaj trupoj alvenis ĉe la prusoj, kaj ni estis devigitaj retroiri duan fojon, malfeliĉe tiel malrapide, ke granda nombro fuĝis al Kaya. Tiu vilaĝo situis sur la deklivo kaj estis la lasta antaŭ la vojo al Lutzen. Estis longa vico da domoj apartigitaj unuj de la aliaj per etaj ĝardenoj, ĉevalejoj kaj abelejoj. Se la malamiko perfortus nin en Kaya, nia armeo estus tranĉita en du partojn.

Kurante mi memoris la parolojn de sinjoro Gulden: «Se hazarde la aliancanoj venkos nin, ili venos ĉe nin venĝi sin pro ĉio kion ni faris al ili dum pli ol dek jaroj.»

Mi jam kredis la batalon malgajnita, ĉar marŝalo Ney mem meze de la kvadrato, retroiris, kaj la soldatoj eliris el la miksbatalo, forportante vunditajn oficirojn sur siaj fusiloj kiel sur blankardoj. Fine tio komencis finiĝi malbone por ni.

Mi eniris en Kaya je la dekstra flanko de la vilaĝo, paŝante trans heĝojn, saltante trans malaltajn barilojn, kiujn la homoj instalas por apartigi la ĝardenojn.

Mi intencis ĉirkaŭiri angulon de tenejo kiam, levante la kapon, mi ekvidis kvindekda surĉevalaj oficiroj haltintaj sur la supro de la monteto fronte al mi. Pli fore malantaŭ ili, amasoj da artilerio rapidege alkuris sur la vojo de Leipzig. Tio igis min rigardi pli bone, kaj mi rekonis la imperiestron, starantan iomete malantaŭ la aliaj. Li sidis kiel sur fotelo sur sia granda blanka ĉevalo. Mi tre bone vidis lin sub la pala ĉielo. Li ne moviĝis kaj rigardis la batalon tra sia lorno.

Tio vidaĵo tiel ĝojigis min, ke mi komencis krii: «Vivu la Imperiestro!» per ĉiuj miaj fortoj. Tiam mi eniris la ĉefan straton de Kaya tra aleo inter du malnovaj domoj. Mi estis unu el la unuaj, kaj mi vidis ankoraŭ homojn de la vilaĝo, virojn, virinojn, infanojn, kiuj rapidis mal-aperi en siaj keloj.

Pluraj personoj al kiuj mi rakontis tion poste, riproĉis al mi, ke mi kuris tiel rapide, sed mi respondis ilin, ke, se marŝalo Ney retiriĝis, ankaŭ Josef Seitz rajtis retiriĝi.

Klipfel, Zebedeus, serĝento Pinto, ĉiuj kiujn mi konis en la roto estis ankoraŭ ekstere, kaj mi aŭdis tiel teruran bruon, ke oni ne povas imagi ĝin. Amasoj da fumo pasis super la tegmentojn. Tegoloj ruliĝis kaj falis sur la straton, kaj la kugloj penetris en la murojn aŭ rompis la trabojn kun horora krakado.

Samtempe niaj soldatoj eniris de ĉiuj flankoj, saltante trans heĝojn kaj barilojn de ĝardenoj, turniĝante por pafi. Inter ili estis soldatoj el ĉiuj regimentoj, sen ĉakoj, en dissiritaj uniformoj kovritaj per sango, kun furiozaj mienoj, kaj nun, kiam mi pensas pri tio post tiom da jaroj, ili ĉiuj estis infanoj, veraj infanoj de dek kvin ĝis dudek jaroj. Neniu jam havis lipharojn. Sed la kuraĝo de la franca raso estas io denaska!

Kaj kiam la prusoj, kondukataj de maljunaj oficiroj, kiuj kriis: «*Vorwärts! Vorwärts!*»²⁸ alvenis kvazaŭ volante grimpi unuj sur la dorson de la aliaj kiel bandoj da lupoj por iri pli rapide, ni, sidante dudek- aŭ tridekope en anĝulo de tenejo fronte al ĝardeno, kie troviĝis ankaŭ eta abelejo kaj grandaj florantaj cerizujoj, kiujn – tio ŝajnas al mi – mi ankoraŭ ĉiam vidas, ni komencis seninterrom-pe pafadi al tiuj friponoj, kiuj volis grimpi trans malaltan muron mal-supre kaj kapti la vilaĝon.

Mi ne scias, kiom da ili, alveninte sur tiu muro, amase refalis de ĝi, sed ĉiam venis aliaj. Centoj da kugloj siblis preter niajn orelojn kaj platiĝis kontraŭ la ŝtonoj. La stuko falis suben, pajlo pendis de la traboj, la granda pordo mal-dekstre estis truita kiel kribrilo. Kaj ni malantaŭ la tenejo, reŝargante niajn fusilojn, alterne pafis en la amason. Tio daŭris ĝuste la tempon bezonatan por ĝustigi kaj streĉi la ellasilon, kaj malgraŭ tio, kvin al ses jam falis en angulon de la fojnejo, la nazon teren. Sed nia furiozeco estis tiel granda, ke ni ne atentis pri tio.

Kiam mi returniĝis por la deka fojo kaj volis alŝultrigi la fusilon, ĝi falis el miaj manoj. Mi kliniĝis por pluki ĝin, sed mi falis sur ĝin: mi ricevis kuglon en la maldekstra ŝultro. La sango fluis sur mia brusto kiel varma akvo. Mi provis restariĝi, sed ĉio kion mi sukcesis fari estis sidiĝi kontraŭ la muron. Tiam la sango malsuprenfluis ĝis miaj femuroj, kaj la penso venis al mi, ke mi mortos sur tiu ĉi loko, kio malvarmigis min ĝisoste.

Miaj kamaradoj daŭrigis la pafadon super mia kapo, kaj la prusoj ĉiam respondis. Pen-sante, ke alia kuglo povus mortigi min, mi alkroĉigis per la dekstra mano al angulo de la muro por fortreni min de tie, sed mi falis en fosaĵeton, tra kiu fluis la akvon de la strato en la ĝardenon. Mia maldekstra brako etis peza kiel plumbo, la kapo turniĝis al mi. Mi ankoraŭ ĉiam aŭdis la

²⁸ Antaŭen! Antaŭen!

pafadon, sed kvazaŭ en sonĝo. Tio daŭris kelkan tempon antaŭ ol mi svenis.

Kiam mi remalfermis la okulojn, estis noktiĝante. La prusoj defilis kurante tra la strateto, kaj en la ĝardeno troviĝis maljuna, nudkapa, blankhara generalo sur granda bruno ĉevalo. Li kriis kiel trumpeto, ke oni altrenu la kano-nojn, kaj oficiroj rapidege forgalopis plenumi liajn ordenojn. Apud li, starante sur la mureto, kiu estas surŝutita per mortintoj, ĥirurggo ban-daĝis unu el liaj brakoj. Malantaŭe je la alia flanko, troviĝis ankaŭ surĉevalo tre maldika rusa oficiro, junulo surhavanta ĉapelon kun verdaj plumoj, kiuj falis en formo de bukado. Mi vidis tion per unu rigardo. La maljuna generalo havis grandan nazon, larĝan kaj platan frunton, vivecajn okulojn kaj kuraĝan mienon. La ĥirurggo estis malgranda, kalva viro kun okulvitroj. Aliaj staris ĉirkaŭ ili. Kaj malantaŭe en la valo, je kvincent aŭ sescent paŝoj, inter du domoj staris niaj soldatoj, kiuj regrupiĝis. Ĉion ĉi mi vidas ankoraŭ nun antaŭ mi, kvazaŭ mi estus ankoraŭ tie.

Oni ne plu pafis, sed inter Klein-Gorschan kaj Kaya supreniris teruraj krioj... Oni aŭdis pezan ruliĝadon, henadon, blasfemadon kaj vipklakadon. Nesciante kial, mi trenis min for de la vojsulkaj kaj residiĝis kontraŭ la muron. Preskaŭ tuj du kanonoj de dek ses, jungitaj per po ses ĉevaloj deturniĝis ĉe la angulo de la unua doo de la vilaĝo. La surĉevalaj artilerianoj plenforte frapis sur la bestojn, kaj la radoj pasis sur amasojn da mortintoj kaj vunditoj kvazaŭ sur pajlo. Oni aŭdis krakadi la ostojn! Jen de kie venis la kriegoj kiujn mi aŭdis. La haroj stariĝis sur mia kapo.

«Ĉi tien!» kriis germane la maljunulo. «Direktu ilin tien, inter la domojn apud la fontano.»

La pecoj esti turnitaj. La veturiloj kun pulvo kaj kuglegoj galope alvenis. La maljunulo iris rigardi, la maldekstran brakon subtenatan per skarpo. Li laŭiris la strateton, kaj mi aŭdis kiel li diris al la juna rusa oficiro en militista tono:

«Diru al imperiestro Aleksandro, ke mi troviĝas en Kaya... La batalo estas gajnita, se oni tuj sendas al mi helprupojn. Oni ne interkonsiliĝu, oni pafu ! Ni devas atendi furiozan kontraŭatakon. Napoleono tuj alvenos, mi iel sentas tion... Post duonhora li falos sur nin kun sia gvardio. Kiom ajn tio kostos, mi kontraŭstaros. Sed nome de Dio oni ne perdu unu minuton, kaj la venko estos nia!»

La junulo forgalopis en la direkto de Klein-Gorschen, kaj tiam iu proksima al mi diris:

«Tiu maljunulo estas Blücher... Ha! La fripono! Se mi havus ankoraŭ mian fuslon!»

Turnante la kapon, mi vidis maljunan maldikan serĝenton kun profundaj sulketoj en la vangoj, sidantan kontraŭ la pordego de la tenejo kaj tenantan sian ventron per ambaŭ manoj, ĉar

kuglo trafis lin en la ventro. Liaj flavaj okuloj strabe sekvis la prusan generalon, kaj lia kurba, jam pala nazo kurbiĝis kiel beko de de birdo en siajn longajn lipharojn. Li aspektis terura kaj fiera.

«Se mi ankoraŭ havus mian fusilon,» diris la vundita serĝento, «vi vidus, ĉu tiu ĉi batalo jam estas gajnita!»

Ni estis la solaj vivaj estaĵoj en tiu angulo plena ja mortintoj. Mi pensis, ke verŝajne oni enterigos min la morĝaŭon en la kontraŭe troviĝanta ĝardeno kun ĉiuj aliaj, kaj ke mi ne plu revidos mian Trinel. Larmoj fluus sur miaj vangoj, kaj mi ne povis malhelpi min diri:

«Nun ĉio estas finita!»

Tiam la serĝento oblikve rigardis min kaj, vidante, ke mi estas ankoraŭ tre juna, li demandis:

«Kio estas al vi, rekruto?»

«Mi havas kuglon en la maldekstra ŝultro, serĝento.»

«En ŝultro estas multe pli bone ol en la pelvo. Oni povas resanigi vin de tio.»

Kaj per malpli kruda voĉo, rigardante min denove, li aldiris:

«Ne timu, vi revidos la patrimon.»

Mi pensis, ke li kompatas min pro mia june-co, kaj ke li volas konsoli min. Sed mi sentis mian bruston kvazaŭ ĝi estis dispecigita, kaj tio prenis al mi la tutan esperon.

La serĝento diris plu nenion. Li provis nur de tempo al tempo relevi la kapon, por vidi ĉu niaj kolonoj alvenas. Li blasfemis inter siaj dentoj kaj fine lasis sin gliki kun la ŝultro en la angulon de la pordego, dirante:

«Mia afero estas farita. Sed tiu granda fripono tamen pagis por tio.»

Li rigardis al la heĝo fronte al li, kie kuŝis surdorse prusa grenadisto, bajoneton ankoraŭ en la ventro. Povis esti la sesa tiam. La malamiko okupis ĉiujn domojn, ĝardenojn, fruktarbejojn, la ĉefan straton kaj la flankstratetojn. Al mi estis malvarme en la tuta korpo, kaj kun obtuzaj sensoj mi ripozigis mian kapon sur la genuoj, kiam tondrado de kanono denove vekis min. La du pecoj en la ĝardeno, kaj pluraj aliaj, instalitaj pli supre en la vilaĝo, pafis ĵetante sian fumon al la ĉefa strato, kien rapidis prusoj kaj rusoj. Oni ankaŭ pafadis el ĉiuj fenestroj.. Sed tio estis nenio kompare al la pafado de la francoj ekde la kontraŭa monteto. Malantaŭe en la valo avancis en ŝturmpaŝoj la kompakta kolono de la juna gvardio, akom-panataj de iliaj surĉevalaj koloneloj, koman-dantoj kaj generaloj, kiuj levis siajn sabrojn meze de la bajonetoj. Ĉio ĉi estis griza, prilumita de tempo al tempo de la okdek kanonoj kiujn la imperiestro instaligis en unu baterio por subteni la movon. Tiu okdek pecoj faris teruran bruegon, kaj malgraŭ la distanco la maljuna barako, kontraŭ kiun mi apogis min,

tremadis ĝis en siaj fundamentoj. Sur la strato, la kugloj forbalais tutajn vicojn da rusoj kaj prusoj, kiel falĉobatoj fortranĉas maturan sekalon: nun estis ilia vico densigi la vicojn.

Malantaŭ ni mi ankaŭ aŭdis respondi la malamikan baterion, kaj mi pensis: «Dio mia ! Dio mia ! Se nur la francoj venkus. Iliaj povraj vunditoj estus kolektitaj. Tiuj prusoj kaj kozakoj pensas unue pri la siaj kaj lasos nin ĉiujn mortaĉi kiel hundoj!»

Mi ne plu atentis pri la serĝento kaj rigardis nur la prusajn kanonistojn, kiuj reŝargis siajn pecojn, direktis ilin kaj pafis, kaj mi malbenis ilin el la profundo de mia animo, kaj mi aŭs-kultis kun ravo la kriojn «Vivu la Imperiestro!», kiuj komencis supreniri el la valo kaj aŭdeblis inter la artileriaj eksplodoj.

Fine, post dudek minutoj, prusoj kaj rusoj komencis retiriĝi. Amase ili repasis tra la strateto kie ni troviĝis, por posteniĝi sur la deklivo. La krioj «Vivu la Imperiestro!» proksimiĝis, kaj la malamikaj kanonistoj antaŭ la niaj rapidis kiel frenezuloj, kiam tri aŭ kvar kugoj alflugis, rompante unu radon kaj kovrante ilin per koto. Unu peco renversiĝis, du artilerianoj estis mortigitaj kaj du aliaj vunditaj.

Tiam mi sentis manon kiu prenis min ĉe la brako. Mi returniĝis kaj vidis la maljunan serĝenton, duone mortintan, kiu rigardis min ridetante kun sovaĝa mieno. La tegmento de nia barako estis disfalinta. La muro kontraŭ kiu ni kuŝis, kliniĝis, sed ni ne atentis pri tio. Ni vidis nur la malvenkon de niaj malamikoj, kaj meze de tiu bruaĉo, ni aŭdis nur la ĉiam plilaŭtiĝantajn kriojn de niaj soldatoj.

Subite la serĝento, tute pala, diris per raŭka voĉo:

«Jen li estas!»

Kaj kliniĝante antaŭen sur la genuoj, unu manon sur la grundo kaj la alia levitan, li kriis per rompanta voĉo:

«Vivu la Imperiestro!»

Tiam li falis teren sur la vizaĝon kaj ne plu moviĝis.

Kaj mi, ankaŭ kliniĝante por pli bone vidi, vidis Napoleonon, kiu supreniris tra la pafado, la ĉapelon profunde premitan sur sian dikan kapon, la grizan kapoton malfermitan, larĝan rubandon diagonale sur lia blanka veŝto, trankvila, malvarma, kvazaŭ prilumita de la rebrilo de la bajonetoj. Ĉio cedis antaŭ li. La prusaj kanonistoj forlasis siajn pecojn kaj saltis trans la ĝardenmuron malgraŭ la krioj de siaj oficiroj, kiuj volis reteni ilin.

Tiun aferojn mi vidis propraokule. Ili restis en mia memoro kvazaŭ tie pentritaj per fajro. Sed ekde tiu momento mi memoris plu nenion de la batalo. Mi svenis kaj restis kuŝanta tie kvazaŭ mortinta inter la mutaj mortintaj.

XIV

Mi vekigis dum la nokto meze de profunda silento. Nuboj trakuris la ĉielon, kaj la plena luno rigardis la forlasitan vilaĝon, la renversi-tajn kanonojn kaj la amasojn da mortintoj, kiel ĝi rigardas ekde la komenco de la mondo la fluantan akvon, la kreskantan herbon kaj la terenfalintajn foliojn. La homoj estas nenio kompare al la eternaj aferoj. Tiuj kiuj estas mortontoj, komprenas tion pli bone ol la aliaj.

Mi preskaŭ jam ne povis moviĝi, kaj mi multe suferis. Sed mi povis ankoraŭ movi la dek-stran brakon. Tiel mi sukcesis rektigi min sur la kubuto, kaj mi vidis la mortintojn amasiĝintaj ĝis malantaŭe sur la strateto. La luno ĵetis sian lumon sur ilin, tiel ke ili estis blankaj kiel neĝo: unuj havis la buŝon kaj la okulojn larĝe malfermitaj, aliaj kuŝis per la vizaĝon surtere, la kartoĉujon kaj la sakon sur la dorso, la manon konvulsie tenantan la fusilon. Mi vidis tion kun speco de teruro, kaj miaj dentoj klakis de konsterniĝo.

Mi volis krei: «Help!» Sed mi aŭdis ion kiel feblan krieton de singultanta infano, kaj mi kolapsis pro malespero... Sed tiun feblan krimon mi eligis en la silento de la nokto, tamen vekis aliajn vunditojn proksime de mi, kaj kredante, ke helpo alvenas, baldaŭ ankaŭ la aliaj kiuj ankoraŭ povis, komencis krei, kaj tiel la helpkriado disvastiĝis al ĉiuj flankoj. Tiuj krioj daŭris kelkajn minutojn, tiam ĉiuj denove silentis, kaj mi aŭdis nenion plu ol la blovadon de ĉevalo kuŝanta malantaŭ la heĝo proksime de mi. Ĝi volis ekstari, kaj mi vidis ĝian kapon sur ĝia longa kolo plurfoje rektiĝi super la heĝo kaj tiam refali.

Pro la klopodoj kiujn mi faris, mia vundo remalfermiĝis, kaj mi sentis denove sangon fluadi sur mia brako. Tiam mi fermis la okulojn por lasi min morti, kaj ĉiuj malproksimaj eventoj ekde la tempo de mia plej frua infaneco en nia vilaĝo Dagsberg revenis al mi kvazaŭ en sonĝo: mia povra patrino, kiu tenis min sur la brakoj kaj kantis por endormigi min; mia patro, kiu revenis ĉiuvespere de la arbaro, gaja, kun hakilo sur la ŝultro, prenis min inter siaj larĝaj manoj kaj kisis min; mia eta ĉambro kun mia lito, kaj la malnova alkovo, kie dormis miaj gepatroj; nia hundo Pommer, kiu ludis kun mi kaj ofte ruliĝis kun mi sur la planko...

Mi pensis: «Aĥ, mia povra patrino kaj mia povra patro!... Se vi sciis, ke vi edukis vian infanon kun tiom da amo kaj penoj, por ke li iam mizere pereu, sola, malproksime de ĉiuj helpo!... Kiel granda estus via malĝojo kaj kiaj estus viaj malbenoj kontraŭ tiuj kiuj metis min en tiun staton!...»

Baldaŭ mi ankoraŭ pensis pri Trinel, onklino Gredel kaj sinjoro Gulden, kaj tio estis ion terura! Estis kvazaŭ spektaklo kiu pasis antaŭ miaj okuloj. Mi vidis ilian miron kaj timon kiam ili aŭdis pri la granda batalo. Onklino Gredel iris ĉiutage al la poŝtoŝeĵo por vidi, ĉu alvenis letero de mi, dum Trinel atendis ŝin preĝante. Kaj sinjoro Gulden, sola en sia ĉambro, legis en la gazeto, ke la 3-a korpuso donis pli ol la aliaj. Li promenis tra la ĉambro kun klinita kapo kaj sidis ĝis tre malfrue ĉe la labortablo, tute revema. Mia animo estis tie for, ĉe ili. Ĝi iel atendis en la poŝtoŝeĵo kun onklino Gredel, ĝi reiris al la vilaĝo deprimita, ĝi vidis mian povran Trinel malgaja.

Tiam, iumatene leterportisto Redig pasis tra Quatre-Vents en sia blua bluzo kaj granda leda sako sur la dorso. Li malfermis la pordon de la kuirejo kaj donis grandan paperon al onklino Gredel, kiu estis tute emociita, dum Trinel staris malantaŭ ŝi, pala kiel mortinta: estis mortakto, kiu ĵus alvenis! Mi aŭdis la korŝirajn singultojn de Trinel, kuŝanta sur la planko, kaj la malbenoj de onklino Gredel, kiu, tute emociita kaj kun malaranĝitaj haroj, kriis, ke jam ne ekzistas justeco, ke estus pli bone por la honestaj homoj ne naskiĝi en tiu ĉi mondo, ĉar Dio forlasis ilin! La bona patro Melhior venis konsoli ilin, sed enirante, li komenĉis singulti kun ili, kaj ĉiuj ploris kun neesprimebla malĝojo, ekkriante:

«Ho, nia povra Josef, nia povra Josef!»

Ankaŭ venis al mi la penso, ke tridek aŭ kvardek mil familioj en Francio, Rusio, Prusio ricevos la saman mesaĝon, kiu estis des pli terura, ĉar granda nombro da tiuj malfeliĉuloj, etenditaj sur la batalkampo ankoraŭ havis siajn gepatrojn. Mi bildigis tion al mi kiel abomenan gigantan krion de la homa speco suprenirantan al la ĉielo.

Tiam mi ankaŭ memoris tiujn povrajn virinojn en Falsburgo preĝantajn en la preĝejo post la katastrofa retiriĝo el Rusio, kaj mi komprenis, kio akazas en ilia koro!... Mi pensis, ke ankaŭ Trinel baldaŭ iros tien, ke ŝi preĝos jaron post jaro, pensante pri mi... Jes, mi sciis tion, ĉar ni amis unu la alian ekde nia infaneco, kaj mi

sciis, ke ŝi neniam povos forgesi min. Mia teneriĝo estis tiel granda, ke larmoj fluis sur miaj vangoj. Sed estis ankaŭ agrabla sento por mi povi fidi ŝin kaj esti certa, ke ŝi gardos sian amon ĝis en la maljuneco, ke ŝi ĉiam havos min antaŭ la okuloj kaj ne prenos alian ol min.

Roso ekis fali en la mateno. Tiu monotona brueto sur la tegmentoj, en la ĝardenoj kaj la strateto plenigis la silenton. Tio igis min pensi

pri Dio, kiu ekde la komenco de la tempo faras la samajn aferojn, kies potenco estas senlima kaj kiu pardonas la erarojn, ĉar Li estas bona, kaj mi esperis, ke Li pardonos min pro miaj grandaj suferoj. »

Ĉar la roso estis forta, ĝi finfine plenigis la rojeton. De tempo al tempo oni aŭdis renver-siĝi muron aŭ disfali tegmenton en la vilaĝo. La bestoj, timigitaj de la batalo, reekhavis fidon kaj eliris en la junan tagon: kaprino blekis en najbara stablo. Granda paŝtista hundo, tre-nante la voston, preterpasis, rigardante kaj pri-flarante la mortintojn. Vidante ĝin, la ĉevalo terure spirblovis – eble ĝi prenis la alian por lupoj – kaj la hundo forkuris.

Ĉiuj tiuj detaloj revenas en mian memoron, ĉar en la momento, kiam oni diras al si mem : «Rigardu... auskultu... ĉar baldaŭ vi aŭdos kaj auskultos plu nenion en tiu ĉi mondo.»

Sed kio restis tre profunde gravurita en mia menso, kion mi neniam povus forgesi, eĉ se mi vivus cent jarojn, tio estas la impresoj, ke mi aŭdis voĉojn parolantaj malproksime de mi. Ho! Kiam mi vekigis, kiel mi auskultis kaj kiel mi rektiĝis sur mia dekstra brako por krei: «*Au secours*²⁹ !»

Ankoraŭ estis nokto, kaj tamen iom da lumo jam paligis la ĉielon. Tute malproksime tra la pluvo, kiu striis la ĉielon, lumo promenis tra la kampoj. Ĝi vagis en mia direkto, haltante tie ĉi, tie for, kaj tiam mi vidis nigrajn formojn klini-ĝantajn ĉirkaŭe. Estis nur konfuzaj formoj, sed ankaŭ aliaj ol mi vidis tiun lumon, ĉar de ĉiu-flanke supreniris plendaj krioj en la nokton, suspiroj, tiel feblaj voĉoj, ke oni dirus, ke estas infanetoj vokantaj sian patrinon!

Dio mia! Kio estas la vivo ? El kio ĝi estas farita, ke oni atribuas al ĝi tiel altan valoron? Tiu mizera spiroblovo, kiu igas nin tiom suferi, kial do mi timas perdi ĝin pli ol ĉion ajn en la mondo? Kio do estas rezervita al ni poste, ĉar ĉe la malplej granda timo de morto, ĉio en ni ekstremas?

Kio scias tion? Ĉiuj homoj parolas pri ĝi dum multaj jarcentoj, ĉiuj pensas pri ĝi, sed neniu povas diri tion.

En mia deziro vivi, mi rigardis tiun lumon, kiel mafeliĉa dronanto rigardas la bordon de la rivero... Mi alkroĉiĝis al ĝi, mi klopodis sekvi ĝin, kaj mia koro bategis pro espero. Mi volis krei, sed mia voĉo ne iris pli malproksimen ol ĉe miaj lipoj. La brueto de la pluvo en la arboj kaj sur la tegmentoj kovris ĉion, sed malgraŭ tio mi diris al mi «Ili aŭdas min... Ili venos!» Ŝajnis al mi, ke mi vidis la lanternon supreniri laŭ la pado al la ĝardeno kaj la lumo pligrandiĝis ĉe ĉiu paŝo. Sed vaginte kelkan tempo, sur la

²⁹ Helpu min!

bataalkampo, ĝi malrapide eniris kavaĵon de la tereno kaj malaperis. Tiam mi denove svenis.

XV

Malantaŭe en granda hangaro en formo de halo kun vicoj da kolonoj mi rekonsciĝis. Iu trinkigis al mi vinon kun akvo, kaj mi trovis tion tre bongusta. Malfermante la okulojn, mi vidis maljunan soldaton kun longaj grizaj lipharoj, kiu relevis mian kapon kaj tenis la glason ĉe miaj lipoj.

«Nu!» li diris al mi bonhumore. «Ĉu estas pli bone al vi?»

Kaj mi ne povis malhelpi min rideti al li, pensante, ke mi ankoraŭ vivas. Mi havis la bruston kaj la maldekstran ŝultron firme bandaĝitaj. Mi sentis doloron kvazaŭ de brulvundo, sed tio estis egale al mi : mi vivis.

Unue mi komencis rigardi la pezajn laborojn, kiuj interkruĉiĝis supre de mi, kaj la tegolojn, kiuj lasis taglumon enpenetri tra pli ol unu truon. Tiam post kelkaj momentoj, mi turnis la kapon kaj mi konstatis, ke mi troviĝas en unu el tiuj vastaj hangaroj, kie la bierfaristoj de la lando metis siajn barelojn kaj veturilojn. Tute ĉirkaŭe, sur la matracoj kaj pajlogarboj estis vicigitaj multego da vunditoj, kaj en la mezo, sur granda kuireja tablo, ĥirurgo kaj liaj du helpantoj kun suprenvolvigitaj manikoj estis tranĉantaj ies kruron. La vundito hurlis pro doloro. Malantaŭ ili troviĝis stako da brakoj kaj kruroj, kaj ĉiu povas imagi la pensojn kiuj trairis mian kapon.

Kvin aŭ ses infanterisoldatoj trinkigis la vunditojn. Ili havis kruĉojn kaj pokalojn.

Sed kio plej impresis min, estis tiu ĥirurgo en ĉemizaj manikoj, kiuj tranĉis sen aŭdi ion ajn. Li havis grandan nazon, kavajn vangojn, kaj li ĉiumomente koleriĝis kontraŭ siaj asistantoj, kiuj ne donis al li sufiĉe rapide la tranĉilojn, prenilojn, vaflokojn kaj tolaĵojn, aŭ kiuj ne tuj forviŝis la sangon per spongo. La laboro tamen iris nemalbone, ĉar en malpli ol kvaronhoron ili fortranĉis du krurojn.

Ekstere, kontraŭ la kolonoj staris almenaŭ ses piedojn alta rusa karabenisto, kiu havis la kolon traborita per kuglo ĉe la orelo, kaj la ĥirurgo petis la malgrandan tondilon por fari ion al li. En tiu momento veturilo haltis antaŭ la pordego de la hangaro, kaj kavaleriĥirurgo, dika, malalta viro kun variomarkita vizaĝo, tenante paperujon sub la brako, aperis en la pordego de la hangaro.

«Hej, Fore!» li kriis gaje.

«Hej, ĉu ests vi, Duchêne?» respondis la infanteriĥirurgo de ŝia tablo, turnante sin.

«Kiom da vunditaj vi havas?»

«De dek sep ĝis dek ok mil.»

«Diable! Nu! Ĉu ĉio iras glate ĉi-matene?»

«Jes. Mi estas serĉanta ŝtopilon.»

La infanteriĥirurgo eliris la hangaron por premi la manon al sia kamarado. Ili komencis trankvile babilu, dum la du asistantoj trinkis glason da vino, kaj la rusoj rulis siajn okulojn kun malespera mieno.

«Aŭskultu do, Duchêne, vi devas nur laŭiri la straton ĝis fronte al la puto...»

«Jes! Bonege!»

«Ĝuste fronte al ĝi vi trovos la kantonon.»

«Ha, bone! Dankon! Mi foriras!»

Tiam Duchêne malproksimiĝis, kaj Forel kriis post li:

«Bonan apetiton, Duchêne!»

Tiam li revenis la la rusoj, kiu atendis lin senpacience sur la tablo, kaj komencis la operacion, malfermante lian kolon de la nuko ĝis la ŝultro. Li laboris malbonhumore, dirante al siaj asistantojn:

«Ek, sinjoroj, ek!»

La rusoj suspiris kaj, sed la ĥirurgo ne atentis pri tio. Finfine li ĵetis la kuglon teren, fermis kaj bandaĝis la vundon kaj diris:

«Forigu lin!»

On forprenis la ruson de la tablo, kaj soldatoj kuŝigis lin sur pajlomatracon flanke de la aliaj, kaj oni alporis lian najbaron.

Mi neniam estus kredinta, ke tia afero okazas en la mondo. Sed mi vidis ankaŭ aliajn, kiuj ankoraŭ longe restos en mia memoro.

Je distanco de kvin aŭ ses pajlomatraĵoj de mia lito sidis maljuna kaporalo kun bandaĝita kruro. Palpebrumante al sia najbaro, kies brako oni ĵus fortranĉis, li diris:

«Rekruto, rigardu do tiun amason. Mi vetas, ke vi ne rekonas vian brakon.»

La alparolato, tute pala, sed kiu tamen estis montrinta la plej grandan kuraĝon, rigardis kaj preskaŭ tiu senkonsciĝis.

Tiam la kaporalo ekridis, dirante:

«Li rekonis ĝin... Estas tiu de malsupre, kun la blua floreto. Tio ĉiam efikas sammaniere.»

Li admiris sin mem, ĉar li malkovris ĝin, sed neniu ridis kun li.

Ĉiumomente la vunditoj kriis:

«Mi soifas!»

Kiam unu vundito komencis, ĉiuj aliaj sekvis.

La maljuna soldato sentis amikecon por mi, ĉar preterpasante, li ĉiufoje prezentis al mi sian glason.

Mi restis en tiu hangaro ne pli ol horon. Dekduo da aliaj veturiloj kun longaj skalaj venis viĉiĝi unuj post la aliaj. Kamparanoj de la regiono en veluraj jakoj kaj kun larĝaj nigraj feltĉapeloj, la vipon sur la ŝultro, atendis, tenante la ĉevalon ĉe la brido. Pikedo de husaroj baldaŭ alvenis. Kavaleria serĝento elseliĝis kaj, enirante la hangaron, diris:

«Ekskuzu min, majoro, sed jen ordono por eskorti dudek veturilojn kun vunditoj al Lutzen. Ĉu estas ĉi tie, kie oni ŝarĝas ilin?»

«Jes, estas ĉi tie,» respondis la ĥirurgo.

Kaj tuj oni komencis ŝarĝi la unuan vicon. Antaŭ ol levi nin, la kamparanoj kaj la ambulancistoj igis nin trinki ankoraŭ iomete da akvo.

Tuj kiam unu veturilo estis plena, ĝi retiriĝis, kaj alia antaŭeniĝis. Mi estis sur la tria, sidanta sur pajlo en la unua vico apud rekruto de la 27-a, kiu ne plu havis sian dekstran manon. Alia malhavis kruron, alia havis fenditan kapon, alia frakasitan makzelon, kaj tiel plu ĝis malantaŭe.

Oni redonis al ni niajn kapotojn, sed estis tiel malvarme al ni, ke oni vidis nur nian nazon, nian polican ĉapon aŭ la tolan ŝultrozono super nia kolumo. Neniu parolis: oni havis ja sufiĉajn kialojn por pensi pri si mem.

De tempo al tempo mi sentis teruran malvarmon, poste subitajn varmpuŝojn, kiuj eniris eĉ ĝis en miajn okulojn: tio estis la komenco de febro. Sed forirante de Kaya, ĉio iris ankoraŭ glate. Mi klare vidis ĉion, kaj nur poste, apud Leipzig, mi sentis min tute malsana.

Finfine oni reŝarĝis nin sekvamaniere: tiuj kiuj povis ankoraŭ teni sin rektaj, devis sidi sur la unuaj veturiloj, la aliajn vunditojn oni kuŝigis sur la lastajn. Kaj tiam ni reekiris. La husaroj, surĉevalaj apud ni, bavardadis pri la batalo, fumadis kaj ridadis sen rigardi nin.

Traveturante Kaya, mi vidis ĉiajn hororojn de la milito. La vilaĝo konsistis nur el stakoj da ruinoj. La tegmentoj estis defalintaj. Plurloke nur la pinjonoj ankoraŭ staris, la traboj kaj latoj estis rompigitaj, kaj oni vidis tra ili la malgrandajn ĉambrojn kun iliaj litoj, alkovoj, pordoj kaj ŝtuparoj. Malriĉaj viroj, virinoj, infanoj kaj maljunuloj iradis kaj venadis interne tute senesperaj. Ili supreniris kaj malsupreniris kvazaŭ en subĉielaj kaĝoj. Kelkfoje tute supre iu kameno en ĉambreto, speguleto kun buksbranceto montris, ke tie vivis knabino en tempo de paco.

Ha! Kiu estus povinta antaŭvidi tiam, ke iutage tiu tuta feliĉeco estos detruita, ne de la furoro de la vento aŭ kolero de la ĉielo, sed de la rabio de la homoj mem, kiu estas multe pli timenda!

Ankaŭ la povraj bestoj aspektis forlasitaj meze de tiuj ruinoj. La kolomboj serĉis siajn kolombejojn, la bovinoj kaj kaprinoj siajn stalojn. Konsternitaj, ili eraradis tra la stratoj,

muĝante kaj blekante per plendaj voĉoj. Ĉie oni renkontis spurojn de kanonkugoloj!

Apud la lasta domo sidis tute blanka maljunulo sur la sojlo de sia ruinigita loĝejo kaj tenis inter siaj genuoj etan infanon. Morna kaj sombra, li rigardis nin preterpasi. Ĉu li vidis nin? Mi ne scias, sed lia sulkiĝinta frunto kaj liaj malbrilaj okuloj montris lian malesperon. Kiom da jaroj da laborado, da ŝparado kaj da suferado li bezonos por certigi al si ripozejon por sia maljuneco! Nun ĉio estis detruita... La infano kaj li ne plu havis tegmenton por ŝirmi siajn kapojn!...

Kaj tiuj duonmejlonoj longaj fosadoj, kie haste laboris ĉiuj homoj de la regiono por malhelpi la peston plenumi la detruon de la homa specio! Mi ankaŭ vidis ilin de la supro de la monteto de Kaya, kaj hororite, mi deturnis de ĝi miajn okulojn! Jes, mi vidis tiujn grandajn tranĉeojn, en kiuj oni enterigis la mortigitojn: rusojn, francojn, prusojn, ĉiujn pelmele, tiaj kiaj Dio kreis ilin por interami sin, antaŭ ol oni inventis armilojn kaj uniformojn, kiuj dividas ilin favore al tiuj, kiuj regas ilin: ili estis ĉirkaŭbrakante unuj la aliajn tie, kaj se io iam revivos en ili, kion oni devas ja esperi, ili amos kaj pardonos sin reciproke, malbenante la krimon, kiu jam tiom de jarcentoj malhelpas ilin esti fratoj antaŭ la morto!

Sed la plej malĝojiga estis la longa vico da veturiloj, forkondukantaj la povrajn vunditojn – tiujn malfeliĉulojn, pri kiuj oni parolas en la oficialaj boltenoj nur por malpliigi ilian nombron, kaj kiuj pereadas en la hospitaloj kiel muŝoj malproksime de tiuj kiujn ili amas, dum oni pafas per kanono kaj kantas en la preĝejoj por ĝoji pri tio, ke oni mortigis milojn da homoj!

Kiam ni alvenis en Lutzen, la urbo estis tiel plenŝtopita per vunditoj, ke nia konvojo ricevis la ordonon plu iri al Leipzig. Sur la stratoj oni vidis nur malfeliĉulojn, trikvarone mortintajn, kuŝantajn sur pajlo laŭlonge de la domoj. Ni bezonis pli ol horon por alveni apud iu preĝejo, kie oni malŝarĝis dek kvin aŭ dudek el ni, kiuj ne plu povis elteni la vojaĝon.

Refreŝiginte sin en drinkejo en angulo de la placo, la kavaleria serĝento kaj liaj viroj resurĉevaliĝis, kaj ni daŭrigis nian vojaĝon al Leipzig.

Tiam mi vidis kaj aŭdis nenion plu. La kapo turniĝadis al mi, miaj oreloj zumadis, mi prenis la arbojn por homoj, mia soifo estis neimagebla.

Jam delonge aliaj sur la veturiloj estis komencintaj kriadi, deliri, paroli al sia patrino, volis stariĝi kaj salti sur la vojon. Mi ne scias, ĉu mi faris la samajn aferojn, sed mi vekigis kvazaŭ per malagrabra sonĝo en la momento kiam du viroj kaptis min per la kruroj, metis

siajn brakojn ĉirkaŭ miajn lumbojn kaj forportis min, transirante vastan sombran placon. En la

ĉielo svarmis la steloj, kaj sur la fasado de granda konstruaĵo, kiu reliefigis nigra kontraŭ la nokto, briladis sennombraj lumoj: estis la hospitalo de la suburbo Hall apud Leipzig.

Ambaŭ viroj supreniris spiralaŝtuparon. Tute supre ili eniris enorman salonegon, kie de unu fino ĝis la alia staris tri vicoj da litoj. La bruado de krioj, blasfemoj kaj plendoj estis neimagebla: tiuj centoj da vunditoj havis ĉiuj febron. La fenestroj estis malfermitaj, la malgrandaj lanternoj trembrilis en la trablovo. Flegistoj, kuracistoj, asistantoj kun granda antaŭtuko ligita sub la brakoj, iradis kaj venadis. La obtuza zumado en la supraj salonegoj, la homoj kiuj supreniradis kaj malsupreniradis, la novaj konvojaj aperantaj sur la placo, la krioj de la veturigistoj, la klakado de la vipoj, la stamfado de la ĉevaloj, ĉio igis onin perdi la kapon.

Tie unuafoje, dum oni malvestis min, mi sentis tiel teruran doloron en la ŝultro, ke mi ne povis reteni min ekkrii. Preskaŭ tuj alvenis ĥirurgo, kiu faris riproĉojn al la viroj, kiuj ne estis sufiĉe singardaj. Estis ĉio kion mi memoras pri tiu nokto, ĉar mi estis kvazaŭ freneza. Mi vokis Trinel, sinjoron Gulden, onklinon Gredel por helpi min – tion rakontis al mi poste mia najbaro, maljuna surĉevala kanonisto, kiun per mia deliro mi malhelpis dormi.

Nur la morgaŭon ĉirkaŭ la oka, dum la unua flegovico, mi pli bone vidis la salonegon. Tiam ankaŭ mi eksciis, ke la osto de mia maldekstra ŝultro estis rompita.

Kiam mi vekigis, mi troviĝis inter dekduo da ĥirurgoj: unu el ili, dika, brunhara viro, kiun oni nomis sinjoro barono, malfermis la bandaĝon. Piede de la lito asistanto tenis pelvon kun varma akvo. La majoro ekzamenis mian vundon, dum ĉiuj aliaj klinis sin por aŭdi, kion li diris. Li parolis al ili kelkajn momentojn, sed ĉio kion mi povis kompreni, estis, ke la kuglo venis de malsupre supren, ke ĝi rompis la oston kaj eliris malantaŭe. Mi vidis, ke li bone konis sian metion, ĉar la prusoj efektive pafis de malsupre trans la muro de la ĝardeno kaj la kuglo devis do supreniri. Li lavis la vundon kaj remetis bandaĝon en manturno, tiel ke mi ne plu povis movi mian ŝultron kaj troviĝis en ordo.

Mi sentis min multe pli bone. Dek minutojn poste flegisto venis surmeti al mi ĉemizon sen dolorigi min, danke al sia longedaŭra sperto.

La ĥirurgo haltis apud la sekvanta lito kaj diris:

«He! Jen ankaŭ vi denove ĉi tie, maljunulo?»

«Jes, sinjoro barono, ankaŭ mi,» respondis la kanonisto, tute fieri vidi, ke la barono reko-nis lin. «La unuan fojon mi estis vundita apud Austerlitz pro pafo de mitrajlo, tiam apud Jena kaj poste apud Smolensk pro du lancpikoj.»

«Jes,» diris la ĥirurgo, kvazaŭ moligita, «kaj nun, kion ni havas nun?»

«Tri sabroatojn sur la maldekstran brakon, kiam mi defendis mian kanonon kontraŭ prusaj husaroj.»

La ĥirurgo proksimiĝis, malvolvis la bandaĝon, kaj mi aŭdis lin demandi al la kanonisto:

«Ĉu vi jam havas krucon?»

«Ne, sinjoro barono.»

«Kiel vi nomiĝas?»

«Kristian Zimmer, kavaleria serĝento en la 2-a de la surĉevala artilerio.»

«Bone! Bone!»

Tiam li bandaĝis la vundojn kaj fine diris, ekstarante:

«Ĉio iros glate.»

Li turnis sin, parolante al la aliaj, kaj eliris, fininte sian rondon kaj doninte kelkajn ordonojn al la flegistoj.

La maljuna kanonisto ŝajnis tute gaja. Kiam mi aŭdis lian nomon, mi konkludis, ke li verŝajne originas el Alsaco, kaj mi komencis paroli al li en nia lingvo, tiel ke li ĝojis ankoraŭ pli. Estis virego de ses futoj kun rondaj ŝultroj, plata frunto, dika nazo, ruĝflavaj lipharojn, mal-mola kiel roko, sed tamen brava viro. Liaj okuloj brilis kaj liaj oreloj rektiĝis, kiam mi parolis alsace al li. Mi povus peti ion ajn de li en la alsaca, li donus al mi tion, se li havus tion. Sed li havis nur manpremojn, kiuj krakigis al vi la ostojn. Li nomis min Josefel³⁰, kiel en nia regiono, kaj li diris al mi:

«Josefel, estu singarda kun la medikamentoj kiujn oni donas al vi. Glutu nur kion vi konas. Ĉio kio odoras malbone, valoras nenion. Se oni donus al ni ĉiun tagon botelon da *rikevir*, ni baldaŭ resaniĝus. Sed estas pli facile detrui al ni la stomakon per manpleno da fiherboj boligitaj en akvo ol alporti al ni blankan alsacan vinon.»

Kiam mi timiĝis kaŭze de la febro kaj de ĉio kion mi vidis, li alprenis koleretan aspekton kaj rigardis min per siaj grizaj okuloj, dirante:

«Josefel, ĉu vi frenezas, ke vi tiom timas? Ĉu viregoj kiel ni povas morti en hospitalo? Ne, ne... Forigu tiun ideon el via kapo.»

Sed li povis facile diri tion: ĉiun matenon la kuracistoj, farante sian rondon, trovis sep aŭ ok mortintojn. Lujn kaptis varma febro, aliajn malvarmiĝo, kaj tio ĉiam finiĝis per brankardo, kiun oni vidis preterpasi portata de flegistoj, tiel ke oni neniam sciis, ĉu devas esti varme aŭ malvarme al oni por farti bone.

Zimmer diris al mi:

«La kaŭzo de ĉio ĉi, Josefel, estas la fi-herboj, kiujn inventas la kuracistoj. Ĉu vi vidas tiun grandan maldikulon? Li povas glori, ke li mortigis pli da homoj ol iu ajn kanono. La

³⁰ Malgranda Jozefo; la s prononciĝas kiel z.

kanono, se tiel diri, ĉiam estis ŝargita per mitrajlo, kaj li tenis la meĉon brulanta. Kaj tiu malgranda brunharulo? Se mi estus la imperiestro, mi sendus lin al la prusoj kaj rusoj. Li mortigus pli da homoj ol armeokorpuso."

Li estus ridiginta min per siaj ŝercoj, se mi ne estus vidinta preterpasi la brankardojn.

Post tri semajnoj la ostoj de mia ŝultro komencis kunkreski, la vundoj iom post iom refermiĝis, kaj mi preskaŭ ne plu suferis. La sabrobatoj, kiujn Zimmer ricevis sur la brako kaj la ŝultro ankaŭ fartis bone. Ĉiun matenon oni donis al ni bonan buljonon, kiu kuraĝigis nin, kaj vespere iom da bovaĵo kun duonpokalo da vino, kies nura vido ĝojigis nin kaj igis nin vidi la estontecon pli rozkolora.

Ĉirkaŭ tiu tempo oni ankaŭ permesis al ni descendi al la granda ĝardeno plena je maljunaj ulmoj malantaŭ la hospitalo. Sub la arboj staris benkoj, kaj ni promenadis tra la aleoj kiel veraj rentuloj en granda griza kapoto kaj katuna ĉapo.

La sezono estis belega. Nia vido etendiĝis super la rivero Partha, kiu estis borderita per poploj. Tiu rivero falas maldekstre en Elster, formante longajn blujajn striojn. Je la sama flanko etendiĝis arbaro de fagoj, kaj antaŭ ĝi pasis tri aŭ kvar grandaj vojoj, kiuj iris tra ebenaĵo plena je tritiko, hordeo kaj aveno, kaj tra plantejoj de lupolo: koncizadire; ĉio plej agrabla kaj riĉa kion oni povis imagi, kiam la vento blovis super ili kaj ĉiuj tiuj kulturoj kliniĝis kaj releviĝis en la suno.

La varmo de la monato junio anoncis bonan jaron. Ofte vidante tiun belan regionon, mi pensis pri Falsburgo, kaj mi ekploris. Zimmer diris al mi:

«Mi ja volus scii, kial diable vi ploras, Josefel. Anstataŭ esti kaptita de la pesto en la hospitalo, esti perdinta brakon aŭ kruron kiel centoj da aliaj, jen ni trankvile sidantaj sur benko en la ombro. Ni ricevas buljonon, viandon kaj vinon. Oni eĉ permesas al ni fumi, kiam ni havas tabakon, kaj vi ne estas kontenta? Kio do mankas al vi?»

Tiam mi parolis al li pri mia amo al Trinel, miaj promenadoj al Quatre-Vents, niaj belaj esperoj, niaj promesoj de geedziĝo, konciza-dire pri tiu tuta bona tempo, kiu jam ne estis pli ol revo. Li aŭskultis min, fumante sian pipon.

«Jes, jes,» li diris, "estas tamen malĝojige. Antaŭ la konskripcio de 1798 ankaŭ mi estis edziĝonta al knabino de nia vilaĝo, kiu nomiĝis Lisel, kaj kiun mi amis kiel la okulojn en mia kapo. Ni estis farintaj promesojn unu al la alia, kaj dum la tuta militiro al Zürich, mi pasis nenion tagon sen pensi pri Lisel.

«Sed jen, mi revenas al mia vilaĝo por miaj unuaj ferioj, kaj kion mi ekscias? Ke ŝi edzi-niĝis tri monatojn antaŭe al ŝufaristo de nia vilaĝo,

nomita Passauf. Vi povas imagi mian koleron, Josefel. Mi ne plu vidis klare, mi volis detrui ĉion, kaj ĉar oni diris al mi, ke Passauf troviĝas en la bierfarejo *la Granda Cervo*, mi iras tien sen rigardi dekstren aŭ maldekstren. Alveninte tie, mi rekonas lin ĉe tablofino apud la kortofenestro kontraŭ la akvopumpilo. Li ridas kun tri aŭ kvar aliaj malbonaj ulaĉoj, trin-kante bieron. Mi proksimiĝas kaj li komencas ekkrii: 'Hej, hej, jen Kristian Zimmer! Kiel vi far-tas, Kristian? Mi devas transdoni al vi salutojn de Lisel!' Kaj li okulumas al mi. Mi koleriĝas, kaptas kruĉon kaj rompas ĝin sur lia maldekstra orelo dirante: 'Iru porti tion ĉi al ŝi de mi, Passauf. Tio estas mia geedziĝa donaco.'

«Kompreneble ĉiuj aliaj falas sur mian dorson. Mi faligas ankoraŭ du aŭ tri aliajn per la kruĉo, mi grimpas sur tablon kaj fuĝas tra la fenestro, kiu eliras sur la placon, kien mi retiriĝas.

«Apenaŭ mi estis alveninta hejme ĉe mia patrino, ĝendarmoj alvenas kaj arestas min laŭ supera ordono. Oni ligas min sur ĉaro kaj kondukas min de brigado al brigado ĝis mia regimento, kiu troviĝis en Strasburgo. Mi restis ses semajnoj en prizono, kaj mi certe estus ricevinta pli gravan punon, se tiam ni ne estis transirontaj Rejnnon por iri al Hohenlinden. Komandanto Courtaud mem diris al mi: 'Vi povas glori, ke vi havas la bonŝancon esti bona direktisto. Sed se denove okazos al vi terenbati homojn per kruĉo, vi finiĝos malbone.

Ĉu tio estas maniero batali, animalo? Kial do ni havas sabron, se ne por uzi ĝin honore al nia patrio?' Mi havis nenion por respondi.

«Ekde tiu tempo, Josefel, mia emo edziĝi pasis. Ne parolu min pri soldato kiu pensas pri sia edzino! Tio estas vera mizero. Rigardu la generalojn kiuj edziĝas: ĉu ili batalas kiel antaŭe? Ne, ili havas nur unu penson en la kapo: pligrandigi sian riĉecon kaj precipe profiti de ĝi, vivante bone kun sia dukino kaj siaj geduketoj ĉe la fajrejo. Mia avo Jerôme, la arbardisto, ĉiam diris, ke bona ĉashundo devas esti maldika. Senkonsidere de la diferenco inter la rangoj, mi pensas la samon pri la bonaj generaloj kaj la bonaj soldatoj. Ni ĉiam estas porciumataj, dum la generaloj plidikiĝas, kaj tion kaŭzas la bonaj manĝoj, kiujn oni preparas en iliaj domoj.»

Tiel parolis Zimmer el la sincereco de lia animo, sed tio ne malhelpis min esti malgaja.

Tuj kiam mi povis ellitiĝi, mi rapidis averti sinjoron Gulden per letero pri tio, ke mi troviĝas en la hospitalo de Hall, unu el la suburboj de Leipzig, pro leĝera vundo en la brako; sed ke oni ne devas maltrankviliĝi pro mi kaj ke mi fartas ĉiam pli bone. Mi petis lin montri mian leteron al Trinel kaj onklino Gredel por plifortigi ilian fidon meze de tiu terura milito. Mi ankaŭ diris al li, ke mia plej granda feliĉeco estos ricevi

novaĵon pri nia regiono kaj la sanstato de ĉiuj kiujn mi amas.

Ekde tiu momento mi ne plu estis maltrankvila. Ĉiumatene mi atendis respondon, kaj kiam mi vidis la serĝenton-leterportiston disdoni dudek aŭ tridek leterojn al la tuta salonego, sen ke mi ricevis ion, mia koro sangis: mi rapide descendis al la ĝardeno kaj ekploris. Tie estis obskura angulo, kie oni forĵetis la frakasitajn potojn kaj kiu plaĉis al mi, ĉar la malsanuloj neniam venis tien. Malbonaj pensoj trairis mian kapon. Mi eĉ kredis, ke Trinel povus forgesi siajn promesojn al mi, kaj mi ekkriis en mi mem: «Ha! Nur se mi ne estus restariĝinta en Kaya, ĉio estus finita!... Kial oni ne estis forlasinta min? Tio estus estinta pli bone ol tiom da suferoj!»

La afero jam venis al tiu punkto, ke mi ne plu deziris resaniĝi, kiam iun matenon la serĝento-leterportisto inter aliaj nomoj kriis mian nomon: "Josef Seitz!" Tiam mi levis la manon sen povi paroli, kaj oni enmanigis al mi dikan kvadratan leteron kovritajn per multaj poŝtmarkoj. Mi rekonis la manskribon de sinjoro Gulden, kio igis min tute paliĝi.

«Nu,» mi diris al Zimmer, ridante, «finfine ĝi tamen venis!»

Mi ne respondis al lia damndo, kaj, vestinte min, mi metis la leteron en mian poŝon, mal-supreniris kaj iris por legi ĝin sola tute malantaŭen en la ĝardeno al la loko kien mi ĉiam iris.

Unue, malferminte ĝin, mi vidis du aŭ tri etajn florojn de pomarbo, kiujn mi prenis en mian manon, kaj poŝtmandaton kun kelkaj vortoj de sinjoro Gulden. Sed kio plej kortuŝis min kaj igis min tremi de la piedoj ĝis la kapo, estis la manskribo de Trinel, kiun mi rigardis kun malklaraj okuloj sen povi legi ĝin, ĉar mia koro bategis eksterordinare forte.

Tamen mi finfine iomete retranskviligis kaj tre malrapide legis la leteron, haltante de tempo al tempo por esti tute certa, ke mi ne eraras, ke estas mia kara Trinel, kiu skribis al mi, kaj ke mi ne sonĝas. Tiam mi relegis ĝin duan fojon.

Tiun leteron mi gardis, ĉar ĝi iel redonis al mi la vivon. Jen ĝi do tia, kia mi ricevis ĝin la 8-an de junio 1813.

Mia kara Josef, mi skribas tiun leteron unue por sciigi al vi, ke mi amas vin ĉiam pli kaj ke mi neniam volos ami alian viron al vin.

Vi devas ankaŭ scii, ke mia plej granda malĝojo estas, ke vi kuŝas vundita en hospitalo, kaj ke mi ne povas flegi vin. Tio kaŭzas al mi grandegan malĝojon. Ekde la foriro de la rekrutoj ni havis nenian trankvilan momenton. La patrino ekkoleriĝis dirante, ke mi frenezas pro tio, ke mi ploras tage kaj nokte. Sed ŝi ploras tiom, kiom mi, tute sola la vesperojn apud la

fajrejo. Mi ja aŭdas ŝin de supre. Kaj ŝia kolero falis sur Pinnacle, kiu ne plu kuraĝas iri al la vendoplaco, ĉar ŝi kunportas martelon en sia korbo.

Sed nian tute plej grandan malĝojon ni spertis, Josef, kiam la famo kuris, ke oni batalis kaj ke miloj kaj ankoraŭ miloj da viroj estis mortigitaj. Ni ne plu vivis. La patrino kuris ĉiun matenon al la poŝtoŝtanco, kaj mi ne plu povis moviĝi de mia lito. Finfine tamen alvenis via letero. Nun ni fartas pli bone, ĉar mi ploras, trankviligita, kaj benas la Sinjoron, kiu savis vian vivon.

Kiam mi pensas, kiel feliĉaj ni estis antaŭe, Josef, kiam vi venis ĉiun dimanĉon, kaj ni sidis unu apud la alia sen moviĝi, kaj ni pensis pri nenio! Ha! Ni ne konis nian feliĉecon, ni ne sciis, kio povos okazi al ni. Sed fariĝu la volo de Dio! Nur ke vi resaniĝu kaj ni povu esperi ankoraŭfoje, ke ni estos kune, kiel ni estis!

Multaj homoj parolas pri paco, ĉar ni suferis tiom da malfeliĉoj, sed imperiestro Napoleono tiom ŝatas militon, ke oni povas kredi nenion.

Kio farus al mi plezuron, estus scii, ke via vundo ne estas danĝera kaj ke vi ankoraŭ amas min... Ha! Josef, mi ĉiam amos vin, mi ne povas diri alian aferon. Estas ĉio kion mi povas tutkore diri al vi, kaj mi scias, ke ankaŭ mia patrino amas vin.

Nun sinjoro Gulden volas skribi al vi kelkajn vortojn, kaj mi kisas vin milfoje.

La vetero estas bela ĉi tie: ni havos bonan jaron. La granda pomarbo en la pomarbejo estas blanka pro floroj. Mi iros pluki kelkajn, kiujn mi metos por vi en la koverton, tuj kiam sinjoro Gulden estos skribinta sian leteron. Eble, per la graco de Dio ni mordos ankoraŭfoje kune en ĝiaj dikaj pomoj. Kisu min, kiel mi kisas vin, kaj ĝis revido, Josef!

Via amanta Trinel

Legante tion mi ekploris, kaj al Zimmer, kiu alvenis, mi diris:

«Jen, sidiĝu, mi volas legi al vi, kion skribas al mi mia amatino. Vi vidis poste, ĉu ŝi estas alia Lisel aŭ ne.»

«Lasu min nur antaŭe ekbruligi mian pipon,» li respondis.

Li ekbruligis sian pipon, remetis la kovrilon sur la tindrujon, kaj tiam diris:

«Vi povas komenci, Josefel, sed mi avertas vin, mi estas maljuna kaj mi ne kredas ĉion, kion oni skribas. La virinoj estas pli fajnaj ol ni.»

Malgraŭ tio mi malrapide legis al li la leteron de Trinel. Li diris nenion, kaj kiam mi finis, li prenis ĝin kaj longe rigardis ĝin kun reva mieno. Tiam li redonis ĝin al mi, dirante:

«Josefel, ŝi estas bonkora knabino, plena je prudento, kiu neniam prenos alian viron ol vin.»

«Ĉu vi kredas, ke ŝi vere amas min?»

«Jes, vi povas est certa pri tio: ŝi neniam edziniĝos al ia Passauf. Mi prefere malfidus la imperiestron ol tiun knabinon.»

Aŭdante la vortojn de Zimmer, mi estus volinta ĉirkaŭbraki lin, kaj mi diris:

«Mi ricevis de mia hejmo poŝtmandaton de cent frankoj, kiujn ni iros ricevi en la poŝt-oficejo. Jen la necesa por havigi al ni vinon. Ni provu eliri de tie ĉi.»

«Bona propono,» li diris, relevante siajn longajn lipharojn, kaj remetante sian pipon en la poŝon. «Mi ne preferas ŝimi en ĝardeno, kiam estas du gastejoj ekstere. Necesas trovi elir-permeson.»

Ni ekstaris tute gajaj kaj supreniris la ŝtuparon de la hospitalo, kiam la serĝento-leterportisto, kiu estis malsupreniranta, haltigis Zimmer kaj demandis lin:

«Ĉu vi estas la nomata Kristian Zimmer, kanonisto de la 2-a de la surĉevala artilerio?»

«Ekskuzu min, serĝento, sed mi havas tiun honoron.»

«Nu! Jen io por vi,» li diris, transdonante al li paketon kun dika letero.

Zimmer estis konsternita, ĉar li neniam ricevis ion de sia hejmo, nek de aliloke. Li malfermis la paketon, en kiu troviĝis skatoleton. Tiam li malfermis la skatoleton kaj vidis en ĝi la honoran krucon. Li tute paliĝis, liaj okuoj malklariĝis kaj li apogis sin momenton per la mano sur la balustradon malantaŭ si. Sed tiam li ekkriis "Vivu la Imperiestro!" per tiel terura voĉo, ke ĝi resonis tra la tri salonejoj kvazaŭ en preĝejo.

La serĝento-leterportisto ridetis bonhumore.

«Ĉu vi estas kontenta?» li demandis.

«Ĉu mi estas kontenta, serĝento? Mankas nur unu afero al mi.»

«Kio?»

«La permeso fari promenon tra la urbo.»

«Por tio vi devas turni vin al sinjoro Tardieu, la ĉefĥirurgo.»

Li malsupreniris, ridante, kaj ĉar estis la horo de la vizito, ni denove supreniris brakon sur brako peti la permeson de la majoro, maljunulo kun griza kapo, kiu ĵus aŭdis la krion «Vivu la Imperiestro!» Li rigardis nin kun grava mieno:

«Kio estas?» li demandis.

Zimmer montris al li sian krucon kaj diris:

«Pardonon, majoro, sed mi fartas mirakle bone.»

«Tion mi kredas,» diris sinjoro Tardieu, ride-tante. «Kaj vi deziras elirpermeson, ĉu ne?»

«Se tio estas la efekto de via boneco, por mi kaj por mia kamarado, Josef Seitz.»

La ĥirurgo estis ekzmeninta mian vundon la antaŭan tagon. Li tiris el sia poŝo paperujon kaj donis al ni du elirpermesojn.

Ni redescendis fieraj kiel reĝoj: Zimmer pri sia honora kruco kaj mi pri mia letero.

Malsupre en la granda vestiblo la pordisto kriis al ni:

«Hej, hej, kien vi iras?»

Zimmer montris al li niajn biletojn, kaj ni eliris feliĉaj, pro tio ke ni povis spiri la eksteran aeron. Sentinelo montris al ni la vojon al la poŝtofacejo, kie mi ricevis miajn cent frankojn.

Tiam, pli seriozaj – ĉar nia ĝojo estis iom malvarmigita – ni atingis la pordegon de Hall, kiu troviĝis je du fusilpafoj maldekstren fine de longa avenuo kun tilioj. Ĉiu suburbo estas apartigita de la malnovaj remparoj per unu el tiuj aleoj, kaj tute ĉirkaŭ Leipzig pasas alia tre larĝa avenuo, ankaŭ kun tilioj. La remparoj estas malnovaj, malstukiĝintaj konstruaĵoj, tiaj kiajn oni vidis en Sankt-Hippolyt en Supra-Rejnlando, kaj kie kreskas herbo, almenaŭ se la germanoj ne riparos ilin post 1813.

XVI

Kiom da aferoj ni eksciis tiun tagon! En la hospitalo neniu maltrankviliĝas pri io ajn. Kiam oni vidas alveni ĉiun matenon kvindekda vunditoj kaj vidas foriri same multe da ili sur brankardo la vesperon, tio montras al vi la universon malgrandigita, kaj oni pensas: "Jen la fino de la mondo!"

Sed ekstere la pensoj ŝanĝiĝas, kiam oni malkovras la ĉefan straton de Hall. Tiu malnova urbo kun ĝiaj butikoj, plenigitaj per varoj, ĝiaj enirpordegoj ĝiaj malnovaj elstarantaj tegmentoj en formo de hangaroj, ĝiaj grandaj malaltaj veturiloj ŝarĝitaj per sakegoj, finfine tiu tuta spektaklo de la aktiva vivo de la komercistoj lasis min mirigita. Mi neniam vidis ion tian, kaj mi diris al mi:

«Jen komerca urbo, kia oni imagas ĝin, plena je diligentaj homoj, provante ĝajni sian porvivon, sian komforton kaj sian riĉecon. Kie ĉiu volas plibonigi sian staton, ne koste de la aliaj, sed laborante, imagante tage kaj nokte rimedojn por prosperigi sian familion, kio ne malhelpas ĉiujn profiti de la inventaĵoj kaj mal-kovroj. Jen la feliĉeco de la paco meze de terura milito.»

Kaj dolorigis min la vido de la povraj vunditoj, kiuj foriris la brakon en skarpo, aŭ trenis krucon, apogante sin sur siajn lambastonojn.

Mi lasis min gvidi de mia amiko Zimmer, kiu

rekonis ĉiujn stratangulojn kaj diris al mi:

«Tio estas la preĝejo Sankta-Nikolao, tiu granda konstruaĵo estas la universitato, tio estas la urbodomo.»

Li memoris ĉion, jam vidinte Leipzig en 1807 antaŭ la batalo en Friedland, kaj ne ĉesis ripeti al mi:

«Tie ĉi estas kiel en Metz, en Strasburgo aŭ ie alikoke en Francio. La homoj estas afablaj kontraŭ ni. Post la militiro de 1806 ĉiujn honorojn kiujn oni povis fari al ni, oni faris. La civiluloj kondukis nin triope aŭ kvarope vespermanĝi ĉe si. Oni eĉ donis balojn honore al ni, oni vokis nin la heroojn de Jena. Vi vidis, kiom oni amas nin ĉi tie. Ni eniru, kien vi volas, ĉie oni akceptos nin kiel bonfaristojn de la lando: estas ni kiuj nomis ilian princ-elektiston reĝo de Saksio, kaj ni donis ankaŭ al li bonan pecon de Pollando.»

Subite Zimmer haltis antaŭ eta pordo kaj ekkriis:

«He, tio estas la bierfarejo *la Ora Ŝafo!* La fasado troviĝas en alia strato, sed ni povos eniri ĉi tie. Venu!»

Mi sekvis lin en specon de serpentumanta tubo, kiu baldaŭ kondukis nin en malnovan korton, ĉirkaŭitan per altaj malbonaspektaj konstruaĵoj kun etaj putrintaj galerioj sub la pinjono kaj ventmontrilo supre kiel en la strato de la Tanistfosaĵo en Strasburgo. Dekstre troviĝis la bierfarejo: oni vidis barelojn ĉirkaŭitajn per feraj bendoj sur sombraj traboj, stakojn da jam boligitaj lupulo kaj hordeo, kaj en angulo grandan radon, en kiu galopadis grandega hundo, por pumpi la bieron al ĉiuj etaĝoj.

La tintado de la stanaj pokaloj kaj kruĉoj aŭdiĝis en la dekstra salono, kiu eliras sur la strato Tilly, kaj sub la fenestroj de tiu salono malfermiĝis profunda kelo, kie resonis la martelo de la barelfaristo. La bonaodoro de la juna marta biero plenigis la aeron, kaj Zimmer, la okulojn levitajn al la tegmento, la vizaĝon radiantan pro kontenteco, ekkriis:

«Jes, ĉi tien ni venis: la granda Ferré, la dika Roussillon kaj mi. Dio en la ĉielo, kiom mi ĝojas revidi ĉion ĉi, Josefel! Jam pasis tamen ses jaroj ekde tiam! Tiu povra Roussillon lasis sian ostojn en Smolensk pasintjare, kaj la granda Ferré devas troviĝi nun en sia vilaĝo apud Toul, ĉar lin perdis unu kruron apud Wagram. Kiel rapide ĉio revenas, kiam oni pen-sas pri tio!»

Samtempe li puŝmalfermis la pordon kaj ni eniris en altan salonegon plenan je fumo. Mi bezonis kelkajn momentojn por vidi tra tiu griza nubo la longan vicon da tabloj ĉirkaŭitaj de drinkemuloj, la plej multaj en mallonga redingoto kaj malgranda ĉapo, kaj la aliaj en saksa uniformo. Estis studentoj, junuloj de bonaj familioj, kiu venis en Leipzig studi juron, medicinon kaj kion ajn oni povas lerni malplenigante pokalojn kaj vivante gajan vivon, kio nomiĝas en ilia lingvo *Fuchscommerce*³¹. Ili ofte interbatalis per speco de latoj, kiuj estis rondaj ĉe la finaĵo kaj akrigitaj nur per kelkaj tranĉoj, kaj

tiel ili vundis unuj la aliajn en la vizaĝo, kiel rakontis al mi Zimmer, sed ilia vivo neniam estis en danĝero. Tio montris la prudenton de la studentoj, kiuj tre bone sciis, ke la vivo estas altvalora afero, kaj ke estas pli bone ricevi kvin aŭ ses vundojn aŭ pli ol tute perdi la vivon.

Zimmer ridis, rakontante al mi tiujn aferojn. Lia amo al gloro blindigis lin. Li diris, ke oni agis same prudente, ŝarĝante la kanonojn per boligitaj terpomoj, kiel la studentoj, batalante per tiuj bastonoj kun rondaj finaĵoj.

Fine ni eniris la salonegon, kaj ni vidis la plej maljunan inter tiuj studentoj – grandan maldikulon kun kavaj okuloj, ruĝa nazo, blonda barbo, flaviĝinta pro la granda kvanto da biero kiu lavis ĝin – , ni vidis lin starantan sur tablo kaj legante laŭvoĉe gazeton, kiu pendis kva-zaŭ antaŭtuko de la dekstra mano. Per la alia mano li tenis longan porcelanan pipon.

Ĉiuj liaj kamaradoj, kun blondaj haroj, pendantaj en bukloj sur la kolumo de ilia mallonga redingoto, aŭskultis lin, levante la pokalojn. En la momento kiam ni eniris, ni aŭdis ilin ripeti inter si: «*Vaterland! Vaterland!*³²!»

Ili drinkis kun la saksaj soldatoj, dum la granda maldikulo kliniĝis por preni sian pokalon. Kaj la dika bierfaristo kun griza krispa kapo, plata nazo, rondaj okuloj kaj vangoj, kriis per grasa voĉo:

*"Gesundheit! Gesondheit!"*³³

Apenaŭ ni faris kvar paŝojn tra la fumo, ĉiuj eksilentis.

«Nu, nu, kamaradoj,» ekkriis Zimmer, «ne ĝenu vin por ni, legu plu, diable! Ni ne estas ĉagrenitaj, kiam ni povas ekscii kelkajn novaĵojn!»

Sed la junuloj ne volis akcepti nian inviton, kaj la maljunulo grimpis de la tablo, faldante la gazeton, kiun li metis en sian poŝon.

«Estis finite,» li diris, «estis finite.»

«Jes, estis finite,» ripetis la aliaj, rigardante unuj la aliajn kun stranga mieno.

Du aŭ tri saksaj soldatoj tuj eliris kvazaŭ por respiri freŝan aeron en la korto kaj malaperis.

La dika gastejestro demandis nin:

«Eble vi ne scias, ke la granda enirejo estas en la strato Tilly.»

«Jes ja, ni scias,» respondis Zimmer, «Sed mi preferas tiun ĉi malgrandan salonon. Tien ĉi ni venis antaŭe, du maljunaj kamaradoj kaj mi, malplenigi kelkajn pokalojn honore al Jena kaj Auerstädt. Tiu ĉi salono vekas en mi agrablajn memoraĵojn.»

«Ha... Kiel vi preferas, kiel vi preferas,» diris la bierfaristo. "Ĉu vi deziras martan bieron?"

"Jes, du pokalojn, kaj gazeton.»

³¹ Esperante: vulpokomercio

³² La patrio! La patrio!

³³ Je via sano! Je via sano!

Li servis al ni du pokalojn, kaj Zimmer, vidante nenion, provis babili kun la studentoj, kiuj ekskuzis sin forirante unuj post la aliaj. Mi sentis, ke ĉiuj tiuj viroj terure malamis nin, sed ke ili ne kuraĝis montri tion al ni.

En la gazeto, kiu venis de Francio, oni parolis nur pri armistiko post du novaj venkoj apud Bautzen kaj Wurtschen. Tiam ni eksciis, ke tiu armistiko komenciĝis la 6-an de junio, kaj ke oni aranĝis konferencojn en Prago, en Bohe-mo, por fari pacon.

Kompreneble tio faris al mi plezuron. Mi esperis, ke oni sendos almenaŭ la lamulojn al iliaj hejmoj. Sed Zimmer, kun sia kutimo laŭte paroli, plenigis la tutan salonon per siaj pripensoj. Li interrompis min ĉe ĉiu linio kaj diris:

«Armistiko?... Ĉu ni bezonas armisticon? Ĉu, post kiam ni venkis tiujn prusojn kaj rusojn apud Lutzen, Bautzen kaj Wurtschen, ni ne estus devintaj tute detruiri ilin? Ĉu ili donus al ni armisticon, se ili estus venkintaj nin? Tio, vi vidas, Josef, estas la karaktero de la imperiestro: li estas tro bonkora, li estas tro bonkora! Estas lia sola manko. Li faris la saman aferon post Austerlitz, kaj ni estis devi-gitaj rekomenci la lukton. Mi diras al vi, ke li estas tro bona. Ha! Se li ne estus tiel bonkora, ni nun estus la mastroj de la tuta Eŭropo!»

Samtempe li rigardis dekstren kaj maldekstren por demandi la opinion de la aliaj. Sed oni montris al ni diablecajn mienojn, kaj neniu volis respondi.

Fine Zimmer ekstaris.

«Ni foriru, Josefel,» li diris. «Mi ne komprenas politikon, sed mi asertas, ke ni ne devis doni armisticon al tiuj almozuloj. Ĉar ili kuŝas surtere, ni estus devintaj treti sur iliajn ven-trojn.»

Post kiam ni pagis, ni eliris, kaj Zimmer diris al mi:

«Mi ne scias, kio estas al tiuj homoj hodiaŭ. Ni ĝenis ilin per io.»

«Tio estas tre eble,» mi respondis al li. «Ili ne aspektis tiel afablaj, kiel vi rakontis.»

«Ne,» li respondis. «Tiuj ĉi junuloj, vi vidas, estas tre malsupre de la antaŭaj studentoj kiujn mi vidis. Tiuj pasigis, se tiel diri, sian ekziston en la bierfarejoj. Ili drinkis dudek aŭ trdek pokalojn en unu tago. Mi mem, Josefel, mi ne povus batali kontraŭ tiaj viregoj. Kvin aŭ ses el ili, kiujn oni nomis *senior*³⁴, havis grizan barbon kaj respektindan mienon. Tiam ni kantis kune *Fanfan-la-Tulipe* kaj *Le Roi Dagobert*³⁵, kiuj ne estas politikaj kantoj. Sed tiuj ĉi ne tiom valoras, kiom la antaŭaj.»

Ekde tiam mi ofte pensis pri tio, kion ni vidis tiun tagon, kaj mi estas certa, ke tiuj srudentoj

estas membroj de la *Tugendbund*³⁶. Reirante al la hospitalo, post kiam ni estis bone man-ĝintaj kaj trinkintaj po botelo da bona blanka vino en la gastejo *la Vinbergrapolo* en la strato Tilly, ni eksciis, Zimmer kaj mi, ke ni iros la saman vesperon dormi en la kazerno de Rosenthal. Estis speco de konservejo por la vunditoj de Lutzen, kiam ili komencis resaniĝi. Oni vivis tie kutime kiel en garnizono. Ni devis respondi al la apelo matene kaj vespere. La reston de la tempo oni estis libera. Ĉiun trian tagon la ĥirurgo venis fari sian viziton, kaj kiam vi estis resaniĝinta, vi ricevis marŝordonon por iri realiĝi al via korpuso.

Oni povas imagi la pozicion de dek du ĝis dek kvin povraj diabloj, vestitaj en grizaj kapo-toj kun plumbaj butonoj, surhavantaj grandajn ĉakojn en formo de florpoto kaj ŝuojn eluzitajn per la longaj marŝoj kaj kontraŭmarŝoj, palaj, mizeraj kaj plej ofte sen mono, en riĉa urbo kiel Leipzig. Ni ne imponis tiujn studentojn, tiujn bonajn civilulojn, tiujn junajn ridantajn virinojn, kiuj, malgraŭ nia tuta gloro, rigardis nin kiel friponojn.

Ĉiujn belajn aferojn kiujn rakontis al mi mia kamarado igis la situacion ankoraŭ pli malĝoja por mi.

Estas vere, ke antaŭe ili bone ricevis nin. Sed niaj maljunuloj ne ĉiam estis konduktintaj honeste kontraŭ la homoj, kiuj traktis ilin kiel fratojn, kaj nun oni fermis la pordojn antaŭ niaj nazoj. Ni estis devigitaj admiri de mateno ĝis vespero la placojn, la preĝejojn kaj la montrofenestrojn de la buĉistoj, kiuj estis tre allogaj en tiu ĉi lando.

Ni serĉis distraĵojn. La maljunuloj ludis je *drogo*, la junuloj je *ŝtopilo*. Ni havis ankaŭ, antaŭ la kazerno, *la voston de la rato kaj la kato*. Oni plantas fosteton en la teron, al kiu oni fiksas du ŝnurojn. La rato tenas unu el la ŝnuroj kaj la kato la alian. Ili havas la okulojn bandaĝitaj, kaj la kato, kiu estas armita per bastoneto, provas tuŝi la raton, kiu akriĝas la orelojn kaj provas eviti la katon tiel longe, kiel ĝi povas. Ili turnas en rondon sur la piedpintoj kaj ofertas spektaklon de lerteco al la tuta kompanio.

Zimmer diris al mi, ke antaŭe la bonaj germanoj venis amase rigardi tiun spektaklon, kaj ke oni aŭdis ilin ridi je distanco de duonmejlo, kiam la kato tuŝis la raton per sia bastoneto. Sed la tempo ŝanĝiĝis. La homoj preterpasis nin sen eĉ turni la kapon. Ni perdis nian penon, volante interesigi ilin pri ni.

Dum la ses semajnoj kiujn ni pasigis en Rosenthal, Zimmer kaj mi ofte promenis tra la urbo por malenuigi nin. Ni eliris tra la suburbo

³⁴ Latina por 'pli aĝa' aŭ 'pliagulo'.

³⁵ Franca por 'Reĝo Dagobert', unu el la merovidoj, sukcesinto de Klodvigo.

³⁶ Esperante: Ligo de la Virto

Randstadt kaj iris ĝis Lindenau sur la vojo al Lutzen. Tie estis nur pontoj, marĉoj, malvastaj arbariĉaj insuloj tiel for, kiel vidis la okuloj. Tie ni manĝis omletojn kun lardo en la gastejo *la Karpo*, kaj ni surverŝis ĝin per botelo da blanka vino. Oni donis al ni plu nenion kredite, kiel oni faris post Jena. Mi kredas, ke male la gastejestroj estus pagigintaj nin duoble kaj eĉ trioble kiel la unue venintan sakson honore al la germana patrio, se mia kamarado ne estus sciinta la prezojn de la ovoj, lardo kaj vino.

La vesperon, kiam la suno subiris malantaŭ la kanoj en la riveroj Elster kaj Pleisse, ni reiris al la urbo ĉe la melankolia kvakado de la ranoj, kiuj vivis en tiuj marĉoj je dekmiloj.

Kelkfoje ni haltis kun krucitaj brakoj sur la balustrado de iu ponto kaj rigardis la malnovajn remparojn de Leipzig, ĝiajn preĝejojn, ĝiajn malnovajn domojn kaj ĝian kastelon de Plessenburg, lumigitajn de la ruĝa krepusko: la urbo finiĝas sur tiu loko. Ĝi konsistigas kva-zaŭe ventumilon: la suburbo Hall troviĝas en la pinto, kaj sep aliaj suburboj konsistigas la branĉojn de la ventumilo. Ni ankaŭ rigardis la mil brakojn de Elster kaj Pleisse, krucante sin reciproke kiel reton inter la jam sombraj insuloj, dum la akvo brilis kiel oro. Ni trovis tion tre bela.

Sed se ni estus sciintaj, ke, malgajninte la plej teruran kaj sangan batalon, ni devos trans-iri iun tagon tiujn riverojn sub la malamikaj kanonoj, kaj ke tutaj regimentoj malaperos en la akvo, kiu nun ĝojigis niajn okulojn, mi kre-das, ke tiu vido estus multe malĝojiginta nin.

Aliajn fojojn ni laŭiris la bordon de Pleisse ĝis Mark-Kleeberg. Tio estas pli ol mejlo, kaj ĉie la ebenaĵo estis kovrita per rikoltoj, kiujn oni rapidis enirigi. La homoj sur siaj grandaj veturiloj ŝajnis ne vidi nin. Kiam ni petis ilin pri informo, ili ŝajnis ne kompreni nin. Zimmer ĉiam volis koleriĝi. Mi retenis lin, dirante, ke tiuj almuzuloj serĉis nur pretekston por fali sur nian dorson, kaj ke cetere ni ricevis la ordonon ŝpari la loĝantaron.

«Estas bone!» li diris. «Se la milito alvenos ĉi tien, ili estu singardaj! Ni superŝutis ilin per bonfaroj, kaj jen kiel il akceptas nin.»

Sed kio montris ankoraŭ pli klare la malbonintencecon de la homoj kontraŭ ni, estis io kio okazis al ni la morgaŭon de la tago, kiam finiĝis la armistico. En tiu tago, ĉirkaŭ la dek-unua, ni volis bani nin en Elster. Ni jam estis deĵetintaj niajn vestaĵojn, kiam Zimmer, vidante alproksimiĝi kamparanon sur la vojo al Konnewitz, kriis al li:

«He, kamarado, ĉu ne estas danĝere naĝi ĉi tie?»

«Tute ne, trankvile eniru la akvon,» respondis tiu viro. «Estas bona loko.»

Kaj Zimmer, enirinte la riveron sen malfido, malsupreniris dek kvin piedojn. Li bone naĝis,

sed lia maldekstra brako estis ankoraŭ malforta. La forto de la fluo kuntrenis lin sen doni al li la tempon alkrociĝi je la branĉoj de la salikoj, kiuj pendis en la akvo. Se li ne estus renkontinta bonŝance pli fore specon de trava-dejo, kiu permesis lin tuŝi la fundon, li estus treninta inter du insulojn de koto, el kiu li neniam estus elirinta.

La kamparano estis haltinta sur la vojo por vidi, kio okazos. Koleri kaptis min, kaj mi revestis min tre rapide, montrante al li mian pugnon, sed li ekridis kaj iris al la urbo per rapidaj paŝoj.

Zimmer ne plu estis si mem pro indigno. Li volis kuri al Konnewitz por malkovri tiun ĉifonulon. Malfeliĉe tio estis neeble: iru do serĉi iun kiu kaŝas sin en unu el tricent aŭ kvarcent barakoj. Kaj cetere, se oni retrovus lin, kion oni povus fari?

Fine ni malsupreniris al la loko, kie oni povis tuŝi la fundon, kaj la freŝeco de la akvo tran-kviligis nin.

«La tuta lando estas kontraŭ ni,» Zimmer diris. «La civiluloj malbone mienas al ni, la virinoj turnas al ni la dorson, la kamparanoj volas dronigi nin, la gastejestroj rifuzas doni krediton al ni, kvazaŭ ni ne venkis ilin tri- aŭ kvarfoje. Kaj ĉion ĉi kaŭzas nia tute eksterordinara bonkoreco: ni devus deklari, ke ni estas la mastroj! Ni donis reĝojn kaj princojn al la germanoj. Ni eĉ faris dukojn, grafojn kaj baronojn, kiuj havas la nomojn de siaj vilaĝoj, ni superŝutis ilin per honoroj kaj jen kiel ili dankis nin!

«Anstataŭ ordoni al ni respekti la loĝantojn, oni devus doni al ni plenpovon super la homoj. Tiam ĉiuj tiuj banditoj ŝanĝus sian vizaĝon kaj farus al ni bonan mienon kiel en 1806. Forto estas ĉio. Unue oni faras rekrutojn perforte, ĉar se oni ne devigus ilin foriri, ili restus hejme. El la rekrutoj oni faras soldatojn perforte, klari-gante al ili la disciplinon. Per la soldatoj oni gajnas batalojn perforte, kaj tiam la homoj donas ĉion al ni pro nia forto: ili starigas al ni triumfarkojn kaj nomas nin herooj, ĉar ili timas nin. Jen!

«Sed la imperiestro estas tro bonkora... Se li ne estus tiel bonkora, mi ne estus riskinta droni hodiaŭ. Vidante nur mian uniformon, tiu kamparano estus treminta kaj ne estus kuraĝinta diri al mi mensogon.»

Tiel parolis Zimmer, kaj tiuj eventoj estas ankoraŭ ĉiam en mia memoro. Ili okazis la 12-an de aŭgusto 1813.

Reirante al Leipzig ni vidis ĝojon sur la vizaĝoj de la loĝantoj. Ĝi ne montriĝis aperte, sed la civiluloj, renkontante sin sur la strato, haltis kaj premis la manon unuj al la aliaj. La virinoj faris vizitojn unuj al la aliaj. Speco de interna kontenteco brilis eĉ en la okuloj de la servistinoj, la servistoj kaj la plej mizeraj laboristoj.

Zimmer diris al mi:

«Oni kredus, ke la germanoj ĝojas. Ili ĉiuj aspektas bonhumoraj.»

«Jes,» mi respondis al li, «tion kaŭzas la belega vetero kaj la engarbejigo de la rikoltoj.»

Estis vere, la vetero estis belega. Sed alvenante apud la kazerno de Rosenthal, ni ekvidis niaj oficiroj sub la granda pordego, vikle parolantaj inter ŝi. La sentineloj aŭskultis, kaj la pasantoj alproksimiĝis por aŭskulti. Oni diris al ni, ke la konferencoj en Prago malsukcesis, kaj ke la aŭstroj ĵus deklaris al ni militon, kiu metos pli ol kvincent mil virojn sur niajn brakojn.

Ekde tiam mi sciis, ke ni estis tricent mil viroj kontraŭ kvincent dudek mil, kaj ke inter niaj malamikoj troviĝas du antaŭaj francaj generaloj: Moreau kaj Bernadotte³⁷. Nun ĉiu povas legi tion en la libroj, sed tiam ni ankoraŭ ne sciis tion, kaj ni estis certaj venki, ĉar ni ankoraŭ neniam malgajnis batalon. Cetere la malbona mieno kiun oni faris al ni, ne mal-trankviligis nin: en milittempo kamparanoj kaj burĝoj estas iel konsiderataj negravaj. Oni nur postulas de ili monon kaj vivrimedojn, kiujn ili ĉiam donas, ĉar ili scias, ke en kazo de la plej malgranda rezisto, oni prenos de ili la lastan cendon.

La morgaŭon de tiu granda novaĵo okazis ĝenerala vizito, kaj mil ducent vunditoj de Lutzen, kiuj estis preskaŭ resaniĝintaj, ricevis la ordonon aliĝi al siaj korpusoj. Ili foriris en kompanioj kun armiloj kaj pakaĵoj, elektante la vojon al Altenburg, kiu laŭiras Elster almonte. La aliaj la vojon al Würtzen, pli maldekstren. Zimmer estis en tiu grupo, petinte mem povi foriri. Mi akompanis lin ĝis ekster la pordegoj kaj tiam ni ĉirkaŭbrakis nin tute emociitaj. Mi restis, ĉar mia brako estis ankoraŭ malforta.

Ni estis ne pli ol kvincent aŭ sescent, inter kiuj certa nombro da instruistoj pri skermado, dancado kaj franca eleganteco, de tiuj viroj kiuj ĝenerale konsistigas la kernon de tiaj konservejoj. Mi ne diziris koni ilin, kaj mia unika konsolo estis pensi pri Trinel kaj kelkfoje ankaŭ pri miaj maljunaj kamaradoj de Falsburgo, Zebedeus kaj Klipfel, pri kiuj mi ricevis nenian novaĵon.

Estis tre malgaja ekzisto. La homoj rigardis nin kun koleraj mienoj, sciante, ke la franca armeo troviĝas je distanco de kvar marŝtagoj, kaj la pruso Blücher kaj la aŭstro Schwarzenberg multe pli fore. Sen tio ili estus saltintaj al niaj gorĝoj!

Luvespere la famo kuris, ke ni ĵus forportis grandan venkon apud Dresden. La konsterno estis ĝenerala. La loĝantoj ne plu eliris el siaj domoj. Mi iris legi la gazetojn en la gastejo *La Vinbergrapulo* en la strato Tilly. La francaj

gazetoj restis tie ĉiam sur la tablo. Nur ilin mi malfermis.

Sed la sekvantan semajnon mi vidis la saman ŝanĝon sur la vizaĝoj, kiel en la tago, kiam la aŭstroj deklaris sin kontraŭ ni. Mi pensis, ke ni spertis malfeliĉon, kio estis vera, kiel mi eksciis pli malfrue, ĉar la gazetoj el Parizo diris nenion pri tio.

La vetero ŝanĝiĝis kaj komencis plui je la fino de aŭgusto. La akvo faladis torente. Mi ne plu eliris el la kazerno. Ofte, sidante sur mia lito, mi rigardis tra la fenestro Elster ŝaŭmantan sub la pluvaĉo, kaj la arbojn de la insuletoj kliniĝantajn sub la forta blovado de la vento, mi pensis: "Povraj soldatoj! Povraj kamaradoj! Kion vi faras en tiu ĉi horo? Kie vi estas? Sur la granda vojo eble, meze de la kampoj!"

Kaj malgraŭ mia malĝojo vivi tie, mi trovis, ke mi estas malpli kompatinda ol ili.

Sed iutage la maljuna ĥirurgo Tardieu faris sian rondon kaj diris al mi:

«Via brako estas denove solida... Levu ĝin... Bone... Bone...»

La morgaŭon post la apelo oni igis min eniri salonegon, kie abundis vestaĵoj, ŝuoj, sako kaj kartoĉuoj. Mi ricevis fusilon, du paketojn da kartoĉoj kaj marŝordonon al la 6-a, kiu bivakis en Gauernitz apud la rivero Elbe. Estis la 1-a de oktobro. Ni ekmarŝis en grupo de entute dek du aŭ dek kvin viroj. Furiero de la 27-a nomata Poitevin kondukis nin.

Survoje jen unu jen alia ŝanĝis la direkton por realiĝi al sia korpuso. Sed Poitevin, kvar infanterisoldatoj kaj mi daŭrigis nian marŝadon ĝis le vilaĝo Gauernitz.

XVII

Ni ekiris do laŭirante la grandan vojon al Würtzen, la fusilon pendantan sur la brusto, la kapoton rebatitan, la dorson rondiĝintan sub la sako kaj la orelojn pendantajn, kiel oni povas facile kredi. La pluvo faladis, la akvo fluadis de nia ĉako sur la nukon. La vento skuadis la poplojn, kies flavaj folioj flugetadis ĉirkaŭ nin, anoncante la vintron, kaj tiel ni plu marŝis multajn horojn.

De tempo al tempo ni renkontis vilaĝon kun ĝiaj hangaroj, sterkostakoj, ĝardenoj, ĉirkaŭitaj per ĉirkaŭbariloj. Virinoj, kiuj staris malantaŭ la malgrandaj fenestroj, rigardis nin preterpasi. Hundoj bojis. Viro, kiu fendis lignon antaŭ sia pordo, turnis sin por sekvi nin per la rigardo, kaj ni ĉiam iradis, trempite ĝisoste. Je la fino de la vilaĝo, ni vidis ke la granda vojo eten-diĝas tiel

³⁷ Bernadotte estis adoptita de la seninfana reĝo de Svedio, kiun li sukcedis kiel reĝo.

for, kiel vidas la okuloj, dum grizaj nuboj drivadis super la nudaj kampoj, kaj kelkaj magraj korvoj malproksimiĝis per rapidaj flu-gilbatoj, lanĉante sian melankolian kriojn.

Nenio estas pli malgajiga ol tia spektaklo, precipe kiam oni pensas, ke vintro proksimiĝas kaj ke necesas baldaŭ dormi ekstere sur la neĝo. Tial neniu diris unu vorton, escepte la furieron Poitevin. Estis maljuna soldato, flava, sulkiĝinta, kun kavaj vangoj, ruĝa nazo, lip-haroj longaj je unu ulno, kiel ĉiuj drinkantaj de brando. Li parolis kultivitan lingvon, kiun li miksis per kazernaj esprimoj. Kaj kiam la pluvado duobliĝis, li ekkriis kun stranga rid-eksplodo:

«Jes, Poitevin, tio instruas al vi fajfi!...»

Rimarkante, ke mi havas kelkajn monerojn profunde en mia poŝo, tiu maljuna drinkemulo tenis sin en mia proksimeco, dirante:

«Junulo, se via sako ĝenas vin, donu ĝin al mi...»

Sed mi dankis lin pro lia afableco.

Malgraŭ mia tedo esti kun viro kiu ĉiam rigardis la ŝildojn de la gastejoj, kiam ni trairis vilaĝon, kaj diris: "Malgranda glaso da brando farus grandan bonon ĉe tia vetero...", mi ne povis retenigi min pagi al li de tempo al tempo kelkajn glasetojn, tiel ke li ne plu forlasis min.

Ni proksimiĝis al Würtzen, kaj la pluvo ĉiam faladis torente, kiam la furiero ekkriis la du-dekan fojon:

«Jes, Poitevin, jen via ekzisto nun. Tio instruas al vi fajfi!»

«Kian proverbon, diable, vi uzas de tempo al tempo, furiero?» mi demandis lin. "Mi volus scii, kiel la pluvo instruas al fajfi.»

«Ne estas proverbo, junulo, estas penso, kiu revenas al mi, kiam mi amuziĝas.»

Tiam, post momento, li diris::

«En la jaro 1806-a, la tempo, kiam mi studis en Rouen, okazis al mi prifajfi teatraĵon kune kun multaj aliaj junuloj kiel mi. Unuj fajfis, aliaj aplaudis, el kio rezultis pugnobatoj, kaj la polico metis nin per dekduoj en la prizanon. La imperiestro, eksciinte la aferon, diris tiam: 'Ĉar ili tiom ŝatas batali, oni enkorpusigu ilin en mian armeon! Tie ili povos kontentigi sian dezi-ron!' Kaj kompreneble tio ankaŭ okazis, ĉar neniu en la lando kuraĝis protesti, eĉ ne la patroj kaj patrinoj!»

«Vi do estis konskripto?» mi demandis.

«Jes, ĉar mia patro ne rajtis aĉeti anstataŭanton por mi. Tio estis bona ŝerco de la imperiestro, unu el tiuj ŝercoj kiujn oni ankoraŭ longe memoros. Intertempe dudek aŭ tridek el ni jam mortis pro mizero. Kelkaj aliaj, anstataŭ okupi honoran postenon en sia lando kiel kuracisto, juĝisto aŭ advokato, fariĝis maljunaj drinkemuloj kiel mi. Jen kio nomiĝas bona ŝerĉo!»

Tiam li ekridis, rigardante min el okulangulo. Mi estis tute pensema, kaj du aŭ tri fojojn antaŭ ol alveni en Gauernitz, ni ekvidis maldekstre de la vojo malnovan akvomuelejon kun ligna ponto, trans kiu kondukis pado. Ni prenis la padon por mallongigi la vojiron, kaj ni troviĝis je ducento da paŝoj de la muelejo, kiam ni aŭdis laŭtajn kriojn. Samtempe du virinoj, unu tre maljuna kaj la alia ankoraŭ juna, kuris tra la ĝardeno, trenante infanojn malantaŭ si. Ili pro-vis atingi arbareton, kiu borderis la vojon en la alia flanko. Preskaŭ tuj ni vidis plurajn en niaj soldatoj, kiuj eliris la muelejon kun sako. Aliaj laŭvice grimpis el la kelo kun bareletoj, kiujn ili rapide ŝarĝis sur ĉaro apud la kluzo. Ankoraŭ aliaj kondukis bovinojn kaj ĉevalon el stalo, dum maljunulo antaŭ la pordo levis la manojn al la cielo, kaj kvin aŭ ses tiaj ŝtelistoj ĉirkaŭis la mueliston. La majunulo estis pala, kaj liaj okuloj minacis salti el siaj orbitoj.

Ĉio ĉi, la muelejo, la digo, la frakasitaj fenestroj, la fuĝantaj virinoj, niaj soldatoj en polic-ĉapoj, la maljunulo, kiu malbenis ilin, kaj la bovinoj, kiuj skuis la kapojn por liberigi sin de tiuj kiuj volis forkonduki ilin, dum la aliaj pikis ilian postajon per siaj bajonetoj, ĉio ĉi staras ankoraŭ nun klare antaŭ miaj okuloj. Ankoraŭ nun mi kredas vidi ĉion!

«Tio,» diris Poitevin, «estas marodistoj. Tio signifas, ke ni jam estas ne tre malproksime de la armeo.»

«Sed tio estas abomeninda!» mi ekkriis. «Tio estas vojrabistoj!»

«Jes, vi pravas,» respondis la furiero, «tio estas kontraŭ la disciplino. Se la imperiestro sciis tion, li certe igus fusili ilin kiel hundojn.»

Ni transiris la ponteton, kaj ĉar iu el la sol-datoj sukcesis trapiki unu el la bareletoj mal-antaŭe sur la ĉaro, la soldatoj forpuŝis sin ĉirkaŭ ĝin kun pokaletoj, trinkante laŭvice. Tiu vido indignigis la furieron, kiu ekkriis en majes-ta tono:

«Kun kies permeso vi faras tiun rabon?»

Pluraj turnis la kapon, kaj vidante, ke ni estis nur trio, ĉar la aliaj daŭrigis sian vojiron sen halti, unu el ili respondis:

«He, maljuna ŝercemulo, ĉu vi volas vian parton de la kuko? Estas tre simple. Sed vi ne bezonas suprentiri viajn lipharojn pro tio. Jen, venu trinki gluton.»

Li etendis al li la pokaleton. La furiero prenis ĝin kaj, rigardante min deflanke, trinkis.

«Nu, junulo,» li diris tiam, «se vi emas trinki guteton, prenu! Tio estas vino, kaj ĝi estas bongustega.»

«Dankon,» mi respondis.

Pluraj el la marodistoj, kiuj ĉirkaŭis nin, ekkriis:

«Ni reekiru! La tempo urĝas!»

Sed aliaj replikis:

«Ne! Atendu! Necesas ankoraŭ rigardi la domon!»

«Atentu do,» diris la furiero en tono de bravulo, «vi scias, kamaradoj, ke necesas procedi milde.»

«Jes, jes, maljunulo,» respondis speco de ĉeftamburisto, kiu surhavis grandan dupintan ĉapelon sur la ŝultroj kaj moke ridetante kun duone fermitaj okuloj. «Jes, trankviliĝu, ni malplumigos la kokinon laŭ la reguloj. Ni havos respekton... ni havos respekton!»

Tiam la furiero diris plu nenion, sed li kva-zaŭe hontis pro mi.

«Kion vi volas, junulo,» li diris al mi, plilongigante la paŝojn por reatingi la kamaradojn, «dum milito, kiel dum milito... Oni ne povas lasi sin pere!»

Mi kredas, ke li volonte estus restinta sen timi esti kaptita. Mi estis malĝoja kaj diris al mi mem: «Jen kiaj estas drinkemuloj! Ili povas havi bonajn inklinojn, sed la vido de pokuleto da vino igas ilin forgesi ĉion.»

Finfine, je la deka vespere, ni malkovris bivakfajron sur sombra taluso dekstre de la vilaĝo Gauernitz kaj malnovan kastelon, kie brilis ankaŭ kelkaj lumoj. Pli malproksime, sur la ebenaĵo, trembrilis aliaj grandnombraj fajroj.

La nokto estis hela. La daŭraj pluvoj estis lavintaj la ĉielon. Kiam ni proksimiĝis al la bivako, oni kriis al ni:

«*Qui vive?*»³⁸

«Francio!» respondis la furiero.

Mia koro forte batis, pensante, ke post kelkaj minutoj mi estis revidonta miajn maljunajn kamaradojn, almenaŭ se ili estis ankoraŭ en tiu ĉi mondo.

Gardistoj jam venis el speco de hangaro, situanta je duona fusilatingo de la vilaĝo por rekoni nin. Ili alvenis ĉe ni. La postenĉefo, maljuna, tute griza subleŭtenanto kun brako en skarpo sub la mantelo, demandis nin, de kie ni venas, kien ni iras, ĉu ni ie renkontis survoje grupon da kozakoj. La furiero respondis anstataŭ ni ĉiuj. La oficiro tiam avertis nin, ke ĉi-matene la divizio Souham forlasis la ĉirkaŭaĵon de Gauernitz. Tiam li ordonis nin sekvi lin por kontroli niajn marŝordonojn, kion ni faris, silente preterpasante la bivakfajrojn, kie la viroj kovritaj per seka koto, dormis dudekope. Eĉ ne unu moviĝis.

Ni eniris hangaron. Estis malnova brikfarejo. La tre larĝa tegmento, en formo de estingilo, ripozis sur kolonoj, kiuj estis ses aŭ sep metrojn altaj. Malantaŭe troviĝis altaj stakoj da ligno. Estis agrable en ĝi. Oni estis ekbruliginta fajron. Laodoro de bakita tero ŝvebis en la ĉirkaŭaĵo. La fornoĉambro estis plenŝtopita de soldatoj, kiuj dormis kiel beatuloj, la dorson turnitan al la

muro. La flamoj prilumis ilin sub la sombraj traboj. Apud la kolonoj brilis la fusiloj kunmetitaj en faskojn. Mi kredas ankoraŭ nun revidi tion: mi ankoraŭ flaras la bonan varmon, kiun mi sentis je kelkaj paŝoj de la forno. Ni paciencie atendis, ĝis la oficiro finis legi la marŝordonojn ĉe la ruĝa lumo de fajro. Mal-juna, magra, bruna soldato maldormis sola apud ĝi. Li sidis sur siaj krucitaj kruroj kaj tenis inter siaj genuoj ŝuon, kiun li estis riparanta per aleno kaj ŝnureto.

Al mi la unua la oficiro redonis la marŝordonon, dirante:

«Morgaŭ vi realiĝos al via bataliono, kiu troviĝas je du mejloj de tie ĉi, apud la vilaĝo Torgau.»

Tiam la maljuna soldato, kiu flikis sian ŝuon, rigardis min kaj metis la manon sur la grundon ĉe sia flanko por indiki al mi, ke tie estas ankoraŭ loko, kaj mi sidiĝis apud li. Mi malfermis mian sakon kaj surmetis aliajn ŝtrumpojn kaj la novajn ŝuojn, kiujn mi ricevis en Leipzig. Tio faris al mi bonon.

La maljunulo demandis min:

«Ĉu vi estas realiĝonta al via divizio?»

«Jes, la 6-a apud Torgau.»

«Kaj de kie vi venas?»

«De la hospitalo de Leipzig.»

«Tio videblas,» li respondis, «vi estas grasa kiel kanoniko. Oni nutris vin tie per kokfemuroj, dum nin manĝis viandon de frenezaj bovinoj.»

Mi rigardis miajn dormantajn najbarojn. Li pravis: tiuj povraj rekrutoj havis nur ostojn kaj haŭton. Ili estis flavaj, plumbokoloraj kaj sulkiĝintaj kiel veteranoj. Oni estus kredinta, ke ili jam ne povas stari.

La maljunulo diris post momento:

«Ĉu vi estis vundita?»

«Jes, maljunulo, apud Lutzen.»

«Kvar monatoj da restado en hospitalo,» li diris, antaŭenigante la lipojn. «Kia bonsanĉo por vi! Mi antaŭ nelonge alvenis el Hispanio. Mi esperis trovi la *Kaiserliche*³⁹ de 1807..., ŝafojn, verajn ŝafojn. Sed ho! Ili fariĝis pli malbonaj ol gerilanoj. Tio estas malbona, tio estas malbona!»

Li parolis al si mem tute mallaŭte sen atenti pri mi kaj tiris la du ŝnuretojn kiel vera ŝufli-kisto, kunpremante la lipojn. De tempo al tempo li surpravis la ŝuon por vidi ĉu la kudraĵo ne ĝenas lin. Finfine li metis la alenon en sian sakon, la ŝuon sur sian piedon kaj kuŝiĝis sur garbon de pajlo.

Mi estis tiel laca, ke mi apenaŭ povis ekdormi. Tamen post horo mi sinkis en profundan dormon.

La morgaŭon mi foriris kun furiero Poitevin kaj tri aliaj soldato de la divizio Souham. Ni baldaŭ atingis la vojon, kiu laŭiras Elbe. La vetero estis

³⁸ Pasvorto, en Esperanto : Kiu vivu?

³⁹ La imperiestraj trupoj de Aŭstrio

humida. La vento, kiu blovis super la rivero, ĵetadis ŝaŭmon ĝis sur la vojo.

Jam unu horon ni marŝis per firmaj paŝoj, kiam subite la furiero diris:

«Atentu!»

Li haltis kun levita nazo kvazaŭ ĉashundo, kiu flaras ion en la aero. Ni ĉiuj aŭskultis sen aŭdi ion pro la bruado de la ondoj sur la bordo kaj de la vento tra la arboj. Sed Poitevin havis pli bone ekzercitan oreilon ol ni.

«Oni pafadas tie for,» li diris, montrante al arbaron je nia dekstra flanko. «La malamiko povas troviĝi tuj apude. La plej bonan, kion ni povas fari, estas singarde daŭrigi nian vojon tra la arbaro. Ĉe la alia fino ni vidos, kio okazas... Se la prusoj aŭ la rusoj estas tie, ni retiriĝos, sen ke ili vidas nin. Se estas francoj, ni antaŭeniros.»

Ĉiuj trovis, ke la furiero pravas, kaj en mia interno mi admiris la sagacecon de tiu maljuna drinkemulo. Ni forlasis la vojon en la arbaro, Poitevin antaŭe kaj ni malantaŭ li, la fusilojn ŝargitajn. Ni marŝis mallaŭte, haltante ĉiujn cent paŝojn por aŭskulti. La pafoj proksimiĝis. Ili sekvis sin unu post la alia, resonante tra la ravinoj. La furiero diris al ni:

«Tio estas tiraljoroj, kiuj observas grupon da kavalerianoj, ĉar la aliaj ne respondas.»

Estis vere. Dek minutojn poste ni ekvidis inter la arboj batalionon de la franca infanterio fari supon meze de erikejo, kaj en la malproksimeco sur la griza ebenaĵo plotonon da kozakoj, rajdantaj de unu vilaĝo al alia. Kelkaj tiraljoroj laŭlonge de la arbaro pafis al ili, sed ili troviĝis preskaŭ ekster atingodistanco.

«Nu, jen vi ĉe vi, junulo,» diris al mi Poitevin, ridetante.

Li devis havi akrajn okulojn por povi legi la numeron de la regimento je tia distanco. Mi vane rigardis, ĉar mi vidis nur estaĵojn en ĉifonoj kaj tiel mizerajn, ke ili havis ĉiuj akrajn nazojn, brilajn okulojn, elstarantajn orelojn sekve de la kaveco de la vangoj. Iliaj kapotoj estis kvarfoje tro larĝaj por ili. Oni estus dirinta, ke estas manteloj pro la multaj faldoj kiujn ili formis sur la brakoj kaj ĉe la lumboj. Pri la koto mi ne parolas: estis sinistre.

En tiu tago mi estis ekscionta, kial la germanoj ŝajnis tiel ĝojaj post nia venko apud Dreseno.

Ni malsupreniris al du malgrandaj tendoj, ĉirkaŭ kiuj tri aŭ kvar ĉevaloj manĝis la maloftan herbon. Mi vidis tie kolonelon Lorain, kiu bivakis sur la maldekstra bordo de Elbe kun la 3-a bataliono. Estis granda, maldika viro kun brunaj lipharoj, kiu ne aspektis dolĉa. Li rigardis nin veni, kuntirante la brovojn, kaj kiam mi

prezentis al li mian marŝordonon, li diris nur kvar vortojn:

«Iru al via roto.»

Mi malproksimiĝis, kredante bone rekoni kelkajn virojn de la 4-a, sed ekde Lutzen la rotoj estis intermiksita, tute kiel la regimentoj kaj la divizioj, tiel ke, alveninte ĉepiede de la taluso, kie bivakis la grenadistoj, mi rekonis nenion. Vidante min alproksimiĝi, la viroj ĵetis deflankan rigardon al mi kvazaŭ por diri:

«Ĉu tiu volas ricevi sian porcion da supo? Momenton! Ni unue vidos, kion li alportos por la kasarolo.»

Mi hontis demandi la lokon de mia roto, kiam iu osteca veterano kun longa aglonazo kaj larĝaj ŝultroj, de kiuj pendis malnova eluzita kapoto, levis la kapon kaj, observante min, diris per trankvila voĉo:

«Hej, ĉu estas vi, Josef? Mi kredis vin ente-rigita jam antaŭ kvar monatoj!»

Tiam mi rekonis mian povran kamaradon Zebedeus. Ŝajnis, ke mia vizaĝo mildigis lin, ĉar sen stariĝi li premis al mi la manon, ek-kriante:

«Klipfel, venu! Jen Josef!»

Alia soldato, sidanta apud la najbara kasarolo, turnis la kapon kaj diris:

«Ĉu estas vi, Josef? Jen! Jen! Vi do ne estis mortigita!»

Estis la solaj bonvenigaj vortoj kiujn mi ricevis. Mizero faris tiajn egoistojn el tiuj viroj, ke ili pensis nur pri sia propra haŭto. Malgraŭ tio, Zebedeus ĉiam konservis bonan koron. Li diris al mi, ke mi sidiĝu apud sia kasarolo, lanĉante al la aliaj unu el tiaj rigardoj kiuj respektigis lin, kaj ofertis al mi sian kuleron, kiun li portis en butontruo de sia kapoto. Sed mi dankis lin, havinte la hieraŭon la bonan ideon eniri ĉe fajnvandisto en Riza kaj metis en mian sakon dekduon da cerbokolbasoj kun bona pankrusto kaj botelo da brando. Mi do malfermis mian sakon, tiris el ĝi rozarion da cerbokolbasoj kaj donis du al Zebedeus, kio plenigis liajn okulojn per larmoj. Mi ankaŭ intencis oferti kelkajn kolbasojn al la kama-radoj, sed divenante mian intencon, li metis manon sur mian brakon kun esprimoplena mieno kaj diris:

«Kio estas bona por manĝi, estas ankaŭ bona por gardi!»

Tiam ni retiriĝis el la rondo kaj ni manĝis, trinkante *schnaps*⁴⁰. La aliaj diris nenion kaj rigardis nin deflanke. Klipfel, flarante la odoron de ajlo, turnis la kapon, ekkriante:

«He, Josef, venu do manĝi el nia kasarolo! Kamaradoj ĉiam restas kamaradoj, diable!»

«Bone, bone,» diris Zebedeus. «Por mi la plej bonaj kamaradoj estas la cerbokolbasoj. Oni ĉiam trovas ilin ĝustamomente.»

⁴⁰ Esperante: brandon

Tiam li mem refermis mian sakon kaj diris al mi:

«Gardu tion, Josef... Jen pli ol monaton mi jam ne tiel bone regalis min. Vi perdos nenion tiel, estu trankvila.»

Duonhoron poste oni batis la apelon. La tiraloj retiriĝis el la arbaro, kaj serĝento Pinto, kiu estis inter ili, rekonis min.

"Nu," li diris al mi, "vi do eskapis! Tio faras al mi plezuron... Sed vi alvenis en malbona momento! – Malbona milito... Malbona milito..." li diris, skuante sian kapon.

La kolonelo kaj la komandantoj surĉevaliĝis, kaj oni ekiris. La kozakoj malproksimiĝis. Ni portis nian armilon laŭplaĉe. Zebedeus marŝis flanke de mi kaj rakontis al mi, kio okazis ekde Lutzen: unue la grandajn venkojn apud Bautzen kaj Wurtschen; la perfortaj marŝoj por atingi la malamikon, kiu retiriĝis; la ĝojo, kiun oni spertis, irante al Berlino; poste la armistico, dum kiu ili restadis en la vilaĝoj; tiam la alveno de la veteranoj el Hispanio, teruraj viroj, kiuj kutimis rabi kaj montris al la junaj, kiel vivi koste de la kamparanoj.

Malfeliĉe, fine de la armistico, la tuta mondo turniĝis kontraŭ nin. La loĝantoj malamis nin. Oni detruis la pontojn post nia dorso, oni avertis la prusojn, la rusojn kaj la aliajn pri niaj plej malgrandaj moviĝoj, kaj ĉiufoje kiam oka-zis malfeliĉo al ni, anstataŭ helpi nin, oni provis kaŭzi al ni ankoraŭ pli grandan mizeron. La grandaj pluvoj venis por ĝeni nin. En la tago de la batalo apud Dresden falis tiom da pluvo, ke la ĉapelo de la imperiestro pendis sur la du ŝultroj. Sed kiam oni forportis la venkon, tio multe ĝojigis nin: estis tamen varme al ni, kaj ni trovis nenion por alivesti nin. La plej malbona de ĉio estis ke, kiam ni estis venkita, ni devis fuĝi tra la koto kun husaroj, dragonoj kaj aliaj viroj malantaŭ ni, kaj ni ne sciis, kiam ni mal-kovros lumon en la nokto, ĉu oni devis antaŭ-eniri aŭ pereji en la diluvo.

Zebedeus detale rakontis al mi tiujn aferojn. Li diris al mi, ke post la venko apud Dresden generalo Vandamme, kiu devis fermi la retiriĝon al la aŭstroj, penetris apud Kulm en specon de funelo, kaj ke tiuj, kiujn ni venkis la antaŭan tagon, falis sur lin de dekstre kaj maldokstre, de antaŭe kaj malantaŭe, ke ili kaptis lin kun pluraj aliaj generaloj kaj detruis lian armeokorpuson.

Du tagojn antaŭe, la 26-an de aŭgusto, la samo okazis al nia divizio kaj al la 5-a, 6-a kaj 11-a korpusoj sur la altaĵoj de Löwenberg. Ni devis venki la prusojn sur tiu loko, sed per malbona moviĝo de marŝalo MacDonald, la malamiko surprizis nin en kavaĵo de ravino kun niaj kanonoj enkotigitaj, nia kavalerio malordigita kaj nia infanterio, kiu ne plu povis pafi pro la torenta pluvo. Oni defendis sin per bajo-

netpikoj, kaj la 3-a bataliono alvenis sub la atakoj de la prusoj ĝis la rivero Kaltzbach. Tie Zebedeus ricevis de grenadisto du kolbobatojn sur la frunto kaj falis en la riveron. La fluo kuntrenis lin, dum li tenis per mano kapitanon Arnould, kaj ambaŭ estus pereintaj, se hazarde la kapitano en la malluma nokto ne estus kaptinta arbobranĉon ĉe la alia bordo kaj retirinta sin kaj lin el la akvo. Li diris al mi, ke tiun tutan nokton, malgraŭ la sango, kiu fluis el lia nazo kaj oreloj, li marŝis ĝis la vilaĝo Gold-berg, mortante pro malsato, laceco kaj la kolbobatoj, kaj ke ĉarpentisto kompatis lin; ke tiu brava viro donis al li pecon da pano, cepojn kaj akvon. Tiam li rakontis al mi, ke la mor-gaŭnon la tuta divizio, sekvata de aliaj korpusoj, marŝos en grupoj tra la kampoj, ĉiuj por sia propra konto, sen ricevi ordonojn, ĉar la gene-raloj, marŝaloj kaj ĉiuj oficiroj surĉevale fuĝis kiel eble plej foren, timante esti kaptitaj. Li asertis min, ke kvindek husaroj kaptis ilin unujn post la aliaj, sed ke bonŝance Blücher ne povis transiri la transbordiĝintan riveron, tiel ke fin-fine ili regroupiĝis en Wolda, kie la tamburistoj de ĉiuj korpusoj batis ĉe la kvar finoj de la vilaĝo la formarŝon de sia regimento. Per tiu rimedo ĉiuj viroj sukcesis elembarsiĝi, mar-ŝante al sia tamburisto.

La plej feliĉa afero en tiu konfuzo estis, ke iom pli for, en Buntzlau, la superaj oficiroj retrovis sin, tute surprizitaj, ke ili havis ankoraŭ kondukendajn batalionojn.

Jen kion rakontis al mi mia kamarado, sen paroli pri la malfido, kion oni devas havi vidalvide de la aliancanoj, kiuj certe ĉiun momente estis forlasontaj nin kaj falontaj sur nin. Li diris al mi, ke ankaŭ la marŝaloj Oudinot kaj Ney estis venkitaj, unu apud Gross-Beeren kaj la alia apud Dennewitz. Estis io tre malĝojiga, ĉar dum tiuj retiriĝoj multaj rekrutoj mortis pro elĉerpiteco, malsanoj kaj ĉiaj mizeroj. Nur la veteranoj de Hispanio kaj Germanio, harditaj de la malbona vetero, povis rezisti al tiu granda laceco...

«Finfine,» diris al mi Zebedeus, «ni havas ĉion kontraŭ ni: la lando, la daŭraj pluvoj kaj niaj propraj generaloj, kiujn tio ĉi lacigiis. Unuj estas dukoj kaj princoj, kiujn tedas la fakto ĉiam troviĝi en koto anstataŭ sidi en belaj foteloj; la aliaj, kiel Vandamme, rapidas por fariĝi marŝalo, plenumante heroaĵojn. Ni, po-vraj soldatoj, kiuj povas gajni nenion alian ol kripligon por la resto de niaj tagoj, kaj kiuj estas la filoj de kamparanoj kaj laboristoj, kiuj batalas por aboli la malnovan nobelaron, ni devas pereji por fari novan!»

Mi tiam vidis, ke la plej malriĉaj, la plej malfeliĉaj ne ĉiam estas la plej stultaj kaj ke, suferante multe, oni fine vidas la malĝojigan veron. Sed mi miris pri nenio kaj petis la

Sinjoron doni al mi forton kaj kuraĝon por povi elteni la mizerojn, kiujn anoncis al ni de fore tiuj ĉi misfaroj kaj maljustaĵoj.

Ni troviĝis do inter tri armeoj, kiuj volis unuiĝi por elvenki nin per unu batalo: la sveda armeo komandata de Bernadotte⁴¹, la armeo de Silezio komandata de Blücher kaj la armeo de Bohemio komandata de Schwarzenberg. Oni jen kredis, ke ni estas transirontaj Elbe por ataki la prusojn kaj svedojn, jen ke ni estas kurontaj kontraŭ la aŭstroj ĉepiede de la mon-toj, kiel ni faris kvindekfoje en Italio kaj aliloke. Sed la aliaj fine komprenis tiun moviĝon, kaj kiam ni ŝajnis proksimiĝi, ili retiriĝis pli foren. Ili malfidis precipe la imperiestron, kiu ne povis esti samtempe en Bohemio kaj Silezio, kaj tio, kaŭzis abomenajn marŝojn kaj kontraŭmarŝojn.

Ĉio kion deziris la soldatoj, estis batali, ĉar marŝante multe, dormante en koto, ricevante duonajn porciojn kaj mordate de fiinsektoj, ili komencis malami la vivon. Ĉiu pensis: «Se nur tio iel finiĝus... Tio estas tro dura.... Tio ne povas daŭri.»

Min mem tiu ekzisto naŭzis post kelkaj tagoj. Mi jam ne sentis miajn krurojn pro laceco kaj doloro, kaj mi videble maldikiĝis.

Ĉiuvespere ni devis gardostari pro iu tiea ĉifonulo nomata Thielmann, kiu incitis la kamparanojn kontraŭ ni. Li sekvis nin kiel nia ombro, observis nin de vilaĝo al vilaĝo, sur la altaĵoj, sur la vojoj, tra la ravinoj. Lia armeo konsistis el ĉiuj kiuj malamis nin. Li ĉiam havis multajn virojn.

Ankaŭ ĉirkaŭ tiu tempo la bavaroj, la bade-nanoj kaj la virtemberganoj deklaris sin kontraŭ ni, tiel ke ni havis la tutan Eŭropon sur nia dorso.

Finfine ni havis la konsolon vidi, ke la armeo kolektiĝis kvazaŭ por granda batalo; Anstataŭ renkonti la kozakojn de Platov kaj la partizanojn de Thielmann en la ĉirkaŭaĵo de la vilaĝoj, ni trovis husarojn, ĉasistojn, dragonojn el Hispanio, artilerion, pontmaterialon, kiuj moviĝis. La pluvo falis torente. Tiuj kiuj jam ne havis la forton treni sin antaŭen, eksidis en la koton piede de arbo, fordonante sin al sia malfeliĉa sorto.

La 11-an de oktobro ni bivakis apud la vilaĝo Lusig, kaj la 12-an apud Grafen-Heinichen. La 13-an ni transiris la riveron Mulda, kaj ni vidis defili sur la ponto la maljunan gvardion kun La Tour-Maubourg. Oni anoncis la preteriron de la imperiestro, sed ni foriris kun la divizio Dombrowski⁴² kaj la korpuso Souham.

En la momento kiam la pluvo ĉesis fali kaj aŭtunaj sunradioj brilis inter la nuboj, oni vidis la tutan armeon en marŝo: la kavalerio kaj infanterio antaŭeniris de ĉie al Leizig. Trans Mulda ankaŭ brilis la bajonetoj de la prusoj. Sed

oni ankoraŭ ne malkovris la aŭstrojn kaj la rusojn. Ili sendube devis veni de aliloke.

La 14-an nia bataliono ankoraŭfoje estis sendita por skolti en la urbo Akeno. La malamiko troviĝis tie kaj ricevis nin per kanonpafado. Ni restis ekstere la tutan nokton sen povi ekbruligi unu solan fajron pro la pluvo. La morgaŭon ni foriris de tie por aliĝi per rapidaj marŝoj al la divizio. Mi ne scias, kial ĉiuj diris:

«La batalo estas proksima!... La batalo estas proksima ... »

Serĝento Pinto sentis en la aeron ke la imperiestro estas venonta. Mi sentis tute nenion, sed mi vidis, ke ni marŝas en la direkto de Leipzig, kaj mi pensis: «Mi esperas, se ni havos batalon, ke min ne trafos kuglo kiel apud Lutzen, kaj ke mi iam povos revidi Trinell!»

La sekvantan nokton la vetero estis iomete pliboniĝinta. Miliardoj da steloj prilumis la ĉielon, kaj ni ankoraŭ ĉiam marŝadis. La morgaŭon ĉirkaŭ la deka apud malgranda vilaĝo, kies nomon mi jam ne memoroas, oni kriis «Halt!» por permesi al ni respiri iomete, kiam ni ĉiuj aŭdis grandan bruon en la aero. La kolonelo, ankoraŭ surĉevale, kaj serĝento Pinto diris:

«La batalo komenciĝis!»

Preskaŭ en la sama momento la kolonelo levis sian sabron kaj kriis:

«Antaŭen!»

Tiam oni ekkuregis: la sakoj, la kartoĉuoj, la fusiloj, la koto, ĉio saltadis. Oni atentis pri nenio. Duonhoron poste ni ekvidis je milo da paŝoj antaŭ la bataliono la voston de kolono kiu etendiĝis senfine: municicaroj, kanonoj, infanterio, kavalerio. Malantaŭ ni sur la vojo al Duben venis ankoraŭ aliaj, kaj ĉio galopadis! Eĉ tra la kampoj alvenis kurante tutaj regi-mentoj.

Tute ĉe la fino de la vojo oni vidis la du sonorilturojn de la preĝejo de Sankta Nikolao kaj Sankta Tomaso kontraŭ la ĉielo, dum dekstre kaj maldekstre, je ambaŭ flankoj de la urbo, leviĝis grandaj nuboj de fumo, tra kiuj pasis fulmoj. La bruado ĉiam kreskadis, kvan-kam ni troviĝis ankoraŭ je unu mejlo de la urbo. Ni devis paroli laŭte por aŭdigi nin, kaj ni rigardis nin, tute palaj, kvazaŭ por diri:

«Jen kio nomiĝas batalo.»

Serĝento Pinto kriis:

«La bruo estas pli forta ol apud Eylau!»

Li ne ridis, nek Zebedeus, nek mi, nek la aliaj, sed tamen ni kuradis, kaj la oficiroj ripetis senĉese:

«Anrtaŭen ! Antaŭen!»

Tamen jen kiel viroj perdas la kontrolon pri si mem. La amo al la patrio estis ja en ni, sed ankoraŭ pli la furoro batali.

⁴¹ Antaŭa marŝalo de Francio, estis adoptiita de la reĝo de Svedio, kiun li sukcedis kiel reĝo..

⁴² Pola generalo kiu kun pola armeo batalis flanke de Napoleono.

Ĉirkaŭ la dek-unua ni malkovris la batalkampon je unu mejlo antaŭ Leipzig. Ni ankaŭ vidis la sonorilturojn de la urbo plenaj je homoj kaj la malnovajn remparojn sur kiuj mi tiel ofte promenis, pensante pri Trinel. Fronte al ni, je 1200 aŭ 1500 paŝoj da distanco, estis ranĝitaj du regimentoj de ruĝaj lancistoj, kaj iom pli maldekstren du aŭ tri regimentoj de surĉevalaj ĉasistoj sur la herbejoj apud la rivero Partha. Inter tiuj regimentoj defiladis la konvojoj kiuj venis de Duben. Pli forte, laŭlonge de malalta taluso, estis eskalokitaj la divizioj Ricard, Dombrowski, Souham kaj pluraj aliaj. Ili turnis la dorson al la urbo. Jungitaj kanonoj kaj municionaroj – la kanonistoj kaj soldatoj de la trajno surĉevala – tenis sin pretaj por foriri.

Finfine, tute malantaŭe, sur la monteto ĉirkaŭ unu el tiuj malnovaj kampuldomoj kun plata tegmento kaj larĝaj hangaroj, kiel oni trovas ilin en tiu lando, brilis la uniformoj de la stabanoj. Estis la rezerva armeo komandata de marŝalo Ney. Ĝia maldekstra alo komunikis kun Marmont, postenigita sur la vojo al Hall, kaj ĝia dekstra alo kun la Granda Armeo, komandata de la imperiestro persone, tiel ke niaj trupoj formis se tiel diri grandan ĉirklon ĉirkaŭ Leipzig, dum la malamikoj, alvenante de ĉiuj flankoj, samtempe provis kuniĝi por fari ankoraŭ pli grandan ĉirklon ĉirkaŭ ni kaj enfermi nin en la urbo kiel en muskaptilo.

Intertempe tri teruraj bataloj okazis samtempe: unu kontraŭ la aŭstroj kaj la rusoj apud Wachau, alia kontraŭ la prusoj apud Mockern sur la vojo al Hall, kaj la tria sur la vojo al Lutzen por defendi la ponton de Lindenau, kiu restis atakata de generalo Giulay.

Tiujn aferojn mi eksciis nur poste. Sed ĉiu devas rakonti, kion li mem vidis kaj spertis: tiumaniere la mondo ekscios la veron.

XVIII

Nia bataliono komencis malsupreniri la monteton fronte al Leipzig por aliĝi al nia divizio, kiam ni ekvidis staboficiron rapide transgalopi la grandan herbejon sube kaj veni en nia direkto. En du minutoj li estis ĉe ni. Kolonelo Lorain rajdis renkonte al li. Ili interŝanĝis kel-kajn vortojn, kaj tiam la oficiro forrajdis. Centoj da aliaj tiel rajdis tra la ebenaĵo porti ordonojn.

"Kapo de la kolono dekstren!" kriis la kolonelo, kaj ni prenis la direkton al la arbaro malantaŭ ni; kiu etendiĝis duonmejlon laŭlonge de la vojo al Duben. Estis arbaro de fagoj, sed tie staris ankaŭ betuloj kaj kverkoj. Kiam ni atingis ĝian randon, oni igis nin renovigi la detonacilon de niaj fusiloj, kaj la bataliono

disfaldiĝis en la arbaro kiel tiraljoroj. Ni esti eskalokitaj dudek kvin paŝoj unuj de la aliaj, kaj ni antaŭeniris, malfermante la okulojn, kiel oni povas imagi. Serĝento Pinto diris ĉiuminute:

«Tenu vin kovritaj!»

Sed li ne bezonis tiel ofte averti nin. Ĉiu rektigis siajn orelojn kaj rapidis trovi dikan arbon por kviete rigardi antaŭ ol iri pluen.

Al kio do pacamaj homoj povas esti elmetitaj dum la vivo!

Finfine ni tiel marŝis jam dek minutojn, kaj ĉar oni vidis nenion, tio komencis doni al ni fidon, kiam subite pafo resonis. Tiam ankoraŭ unu, poste du, tri, ses de ĉiuj flankoj laŭlonge de nia linio, kaj en la sama momento mi vidis kamaradon maldekstre de mi fali, provante reteni sin kontraŭ arbo. Tio vekis min... Mi rigardis al la alia flanko, kaj kion mi malkovris je kvindek aŭ sesdek paŝoj de mi? Maljuna prusa soldato kun malgranda ĉapo kun ĉeneto, la kubuton falditan, liajn longajn lipharojn pendantajn sur la baterio de lia fusilo, kiu celas min, fermante unu okulon. Mi kliniĝis rapide kiel fulmo. En la sama sekundo mi aŭdas la detonacion kaj io krakas sur mia kapo. Mi portis miajn aĵojn – broson, kombilon, kaj naz-tukon – en mia ĉako: la kuglo de tiu ĉifonulo rompita ĉion. Mi sentis min tute malvarma.

«Vi bele eskapis tiun kuglon!» kriis al mi la serĝento, ekkurante. Kaj ĉar mi ne volis resti sola sur tiu loko, mi rapide sekvis lin.

Leŭtenanto Bretonville, portante la sabron sub la brako, ripetis:

«Antaŭen! Antaŭen!»

Pli for je la dekstra flanko oni jam komencis pafi.

Kurante ni atingis la randon de senarbejo, kie kuŝis kvin aŭ ses dikaj dehakitaj kverkotrunkoj. Estis kvazaŭ malgranda insulo plena je longa herbo, sed kun nenia arbo por kovri min. Malgraŭ tio, pluraj kuraĝe antaŭeniĝis, kiam la serĝento avertis min:

«Halt!... La prusoj certe troviĝas en embusko ĉi-apude. Ni do bone malfermu la okulojn.»

Apenaŭ li estis dirinta tion, deko da kugloj siblis tra la branĉoj, dum same tiom da resonis. Samtempe amaso da prusoj etendis la kruojn kaj eniris pli profunde en la arbustaron.

«Jen ili forirontaj. Ek!» diris Pinto.

Sed pafo tra mia ĉako faris min bone atenta. Mi, se tiel diri, vidis ilin tra la arboj, kaj kiam la serĝento volis transiri senarban lokon, mi retenis lin per la brako, montrante al li la tubon de fusilo, kiu eliĝis el granda arbusto je la alia flanko de la senarbejo je cent paŝoj de ni.

La kamaradoj, kiuj proksimiĝis, ankaŭ vidis ĝin. Tial la serĝento diris mallaŭte:

«Vi, Seitz, restu ĉi tie.. Ne perdu lin el la vido. Ni aliaj ĉirkaŭiros la senarbejon.»

Ili tuj malproksimiĝis dekstren kaj maldekstren, dum mi, la kolbon kontraŭ la ŝultro, atendis kiel ĉasisto en embusko. Post du aŭ tri minutoj la pruso, kiu aŭdis plu nenion, mallaŭte leviĝis. Li estis tre juna kun malgrandaj blondaj lipharoj kaj alta svelta staturo. Mi estus povinta pafmortigi lin, sed la penso mortigi tiun elmetitan viron tiel impresis min, ke mi ektemis. Subite li ekvidis min kaj saltis flanken. Tiam mi ellasis mian pafon kaj mi spiris malpezigita, vidante, ke li fuĝis tra la arbustoj kiel cervo.

.Samtempe kvin aŭ ses fusilpafoj ekiris de dekstre kaj maldekstre: serĝento Pinto, Zebedeus, Klipfel kaj la aliaj preterpasis kurante, kaj cent pasojn pli for ni trovis la junan pruson sutere, la buŝon plena je sango. Li rigardis nin tute timigita, levante la brakon kvazaŭ por repuŝi la bajonetpikojn. La serĝento diris al li kun gaja mieno:

«Hej, nenion timu, vi ricevis jam vian plenan sufiĉon.»

Nenio emis mortigi lin. Klipfel nur prenis la belan pipon, kiu elstaris al lia malantaŭa poŝo, dirante:

«Jam delonge mi deziris havi tiel belan pipon, kaj jen tamen unu!»

«Fusilisto Klipfel, » kriis Pinto, vere indigna, «remetu tiujn pipon. Nur kozakoj priŝtelas vunditojn! Franca soldato konas nur honoron!»

Klipfel ĵetis la pipon sur la pruson, kaj finfine li foriris de tie sen turni la kapon. Ni alvenis ĉe la fino de tiu arbaro, kiu finiĝis je tri kvaronoj de la taluso. Densa arbustaro etendiĝis ankoraŭ ducent metrojn pli alte. La prusoj, kiujn ni persekutis, troviĝis kaŝitaj en ĝi. Oni ĉie vidis ilin releviĝi por pafi al ni, tiam tuj poste ili rekasiĝis.

Ni estus povintaj trankvile resti tie, ĉar ni ricevis la ordonon, okupi la arbaron. Tiu arbustaro ne koncernis nin. La kugloj de la prusoj ne estus farintaj malbonon al ni, kiuj estis kaŝitaj malantaŭ la arboj. En la alia flanko de la taluso ni aŭdis teruran batalon. Kanonpafoj sekvis sin seninterrompe, kaj ofte tondris kiel dum tempesto: estis plia kialo resti tie ĉi. Sed niaj oficiroj, unuiĝinte, decidis, ke la arbustaro estas parto de la arbaro kaj ke necesas peli la prusojn ĝis sur la taluso. La sekvo estis, ke multaj viroj perdis la vivon sur tiu loko.

Ni do ricevis la ordonon forpeli la malamikajn tiraljorojn, kaj ĉar ili pafis, laŭ tio ke ni proksimiĝis kaj tiam rekaŝiĝis, ni ekkuris al ili por malhelpi ilin reŝargi. Niaj oficiroj ankaŭ kuris plenaj je fervoro. Ni pensis, ke supre de la monteto la arbustaro finiĝos, kaj ke tiam ni fusilos la prusojn dekduope. Sed kiam ni alvenis supre tute senspiraj, jen la maljuna Pinto ekkrias: «La husaroj!»

Mi levis la kapon kaj vidis la kolpakojn suprenalopii kaj pligrandiĝi malantaŭ speco de azendorso: ili alvenis ĉe ni kiel vento. Apenaŭ

mi ekvidis tion, mi senpripense turniĝis kaj komencis redescendi, farante saltojn de dek kvin futojn malgraŭ la laceco, malgraŭ mia sako kaj malgraŭ ĉio. Mi vidis antaŭ mi serĝenton Pinto, Zebedeus kaj la aliajn, kiuj rapidis kaj saltis, etendante la kruojn tiom, kiom ili povis. Malantaŭe la husaroj amase faris tiom da bruoj, ke tio donis al oni anser-haŭton: la oficiroj kriis komandojn en la ger-mana, la ĉevaloj spirblovis, la sabringoj tintis kontraŭ la botoj, la tero tremis.

Mi estis elektinta la plej mallongan vojon por alveni ĉe la arbaro. Mi kredis esti preskaŭ tie, kiam mi renkontis unu el tiuj grandaj fosaĵojn kie la kamparanoj elfosas argilon por konstrui domojn. Ĝi estis pli ol dudek futojn larĝa kaj kvardek aŭ kvindek futojn longa. La pluvo, kiu falis jam de pluraj tagoj, faris la randojn tre glitigaj. Sed mi aŭdis la ĉevalojn spirblovi ĉiam pli proksime, dum la haroj stariĝis sur mia nuko, kaj sen atenti pro io ajn, mi saltis kaj falis en la truon sur la dorso, la kartoĉujon kaj la kapoton refalditajn preskaŭ trans la kapon. Alia fusilisto de mia roto jam estis tie kaj releviĝis. Ankaŭ li estis saltinta. En la sama sekundo du husaroj, lanĉitaj kiel kugloj, glitis trans la grasan randon sur la dorso de siaj ĉevaloj. La unua el tiuj husaroj, la vizaĝon tutue ruĝan, trafis per sabrobato la orelon de mia povra kamarado, blasfemante kiel posedato, kaj dum li relevis la brakon por mortigi lin, mi plantis mian bajoneton en lia flankon per ĉiuj miaj fortoj. Sed samtempe la alia husaro donis al mi baton sur la ŝultro, kiu, sen mia epoleto, estus splitinta min en du. Li estus transpikinta min, se feliĉe fusilpafo de supre ne estus rompinta al li la kapon. Mi rigardis supren kaj mi vidis unu el niaj soldatoj sinkinta en la argilon ĝis siaj genuoj. Li estis aŭdinta la ĉevalojn kaj la blasfemojn de la husaroj kaj estis kurinta antaŭen ĝis la rando de la truo por vidi, kio okazas tie.

«Ni, kamarado,» li diris al mi, ridante, «urĝis la tempo!»

Mi ne havis la forton respondi al li. Mi tremetis kiel folio. Li forprenis sian bajoneton kaj etendis al mi la finaĵon de sia fusilo por helpi min elgrimpi. Tiam mi prenis la manon de tiu soldato kaj diris:

«Dankon, kamarado! Vi savis min!... Kiel vi nomiĝas?»

Li diris al mi, ke lia nomo estas Jean-Pierre Vincent. Ekde tiam mi ofte pensis, se iam mi denove renkontos tiun junulon, mi estos feliĉa fari al li servon.

La postmorgaŭon okazis la dua batalo apud Leipzig, sed nur post la retiriĝo al Hanau, kaj mi neniam revidis lin.

Serĝento Pinto kaj Zebedeus venis kelkajn momentojn poste, kaj Zebedeus diris al mi:

«Ni ambaŭ estis ankoraŭfoje bonŝancaj, Josef. Ni estas la lastaj falsburganoj en la batalo en tiu ĉi momento... Klipfel ĵus estis dishakita de la husaroj!»

«Ĉu vi vidis lin?» mi demandis, tute pala.

«Jes, li ricevis pli ol dudek sabrobatojn. Li kriis: 'Zebedeus! Zebedeus!'»

Momenton poste li aldiris:

«Estas tamen terure aŭdi maljunan kamaradon de la infaneco krei por helpo sen povi helpi lin... Ili estis tro multaj... Ili ĉirkaŭis lin!»

Tio malĝojigis nin, kaj pensoj pri nia lando ankoraŭfoje revenis al ni. Mi imagis la avinon de Klipfel, kiam ŝi estis ekscianta la novaĵon de lia morto, kaj tio pensigis min pri Trinell.

Ekde la atako de la husaroj ĝis la nokto la bataliono restis en la sama pozicio pafante al la prusoj. Ni malhelpis ilin okupi la arbaron, sed ili malhelpis nin grimpi sur la monteton. La morgaŭon ni eksciis kial. Tiu taluso dominas la tutan fluon de Partha. La granda kanonado kiun nia aŭdis, venis de la divizio Dombrowski, kiu atakis la maldekstran alon de la prusa ar-meo kaj volis sendi helpon al generalo Mar-mont en Mockern: tie dudek mil francoj, pos-tenigitaj apud ravino, haltigis la okdek mil virojn de Blücher! Kaj apud Wachau cent dek kvin mil francoj liveris batalon kontraŭ ducent mil aŭstroj kaj rusoj. Pli mil kvin cent kanonoj tondradis. Nia povra malgranda fusilado sur la taluso de Witterich estis kvazaŭ zumado de abelo meze de fulmotondro. Kaj eĉ kelkfoje ni ĉesis pafi tie ĉi aŭ tie por aŭskulti... Tio ŝajnis al mi esti plena je pulvofumo, kaj la tero tremadis sub niaj piedoj. La maljunaj soldatoj kiel Pinto diris, ke ili neniam aŭdis ion tian.

Ĉirkaŭ la sesa staboficirioj suprenrajdis ĉe nia maldekstra flanko, alportante ordonon de kolonelo Lorrain, kaj preskaŭ tuj oni trumpetis la retiriĝon. La bataliono perdis sesdek virojn per la atako de la prusaj husaroj kaj la pafado.

Estis nokto, kiam ni eliris la arbaron, kaj surborde de Partha – inter la municicaroj, la ĉiuspecaj konvojoj, la armeokorpusoj kiuj retiriĝis, la taĉmentoj, la veturiloj kun vunditoj, kiuj defilis sur la du pontoj – ni devis atendi pli ol du horojn nian vicon. La ĉielo estis malluma, la kanonado ankoraŭ grumblis tie kaj tie ĉi, sed la tria batalo estis finita. Oni aŭdis diri, ke ni venkis la aŭstrojn kaj la rusojn apud Wachau je la alia flanko de Leipzig, sed tiuj kiuj revenis de Mockern, estis sombraj. Neniu kriis kiel post venko: «Vivu la Imperiestro!» Alveninte sur la alia bordo, la bataliono malsupreniris la riveron Partha pli ol duonmejon ĝis la vilaĝo Schönfeld. La nokto estis humida. Ni marŝis per pezaj paŝoj, la fusilon sur la ŝultro, la okulojn duone fermitajn pro dormemo kaj la kapon klinitan.

Post ni la granda defilo de la kanonoj, municicaroj, furgonoj kaj la trupoj retiriĝantaj de

Mockern daŭrigis sian obtuzan iradon. Iam kaj iam la krioj de la soldatoj de la trajneskorto kaj la artilerikondukistoj leviĝis super la tumulto por postuli al si lokon. Sed tiuj bruoj senteble malfortiĝis kaj fine ni alvenis apud tombejo, kie oni igis nin rompi la viĉojn kaj meti la fusilojn en faskojn.

Nur tiam mi relevis la kapon kaj rekonis Schönfeld en la lunlumo. Kiom da fojoj mi estis veninta tien manĝi bongustan fritajojn kaj drinki blankan vinon kun Zimmer en la malgranda gastejo *la Ora Garbo* sub la laŭbo de patro Winter, dum la suno varmigis la aeron kaj la verda foliaro brilis ĉirkaŭ ni!... Tiu tempo estas pasinta!

Oni postenigis gardistojn. Kelkaj viroj eniris la vilaĝon serĉi lignon kaj vivrimedojn. Mi sidiĝis kontraŭ la muron de la tombejo kaj ekdormis. Proksimume de la tria mi estis vekita.

«Josef,» diris al mi Zebedeus, «venu do ĉi tien varmigi vin. Se vi restos tie, vi riskos ekhavi febron.»

Mi releviĝis kvazaŭ ebria de laceco kaj doloro. Fajna pluveto tremetis en la aero. Mia kamarado trenis min ĝis ĉe la fajro, kiu fumis sub la pluvo. Tiu fajro servis nur por povi vidi ion, ĉar ĝi tute ne donis varmon. Sed post kiam Zebedeus drinkigis al mi guton da brando, mi sentis min iom malpli malvarma, kaj mi rigardis la bivakfajrojn, kiuj brilis trans Partha.

«La prusoj varmigas sin,» diris Zebedeus. «Ili estas nun en nia arbaro.»

«Jes,» mi respondis, «kaj ankaŭ la povra Klipfel estas tie. Al li jam ne plu estas malvarme!»

Tiuj vortoj malĝojigis nin. Mi dentoklakis. Kelkajn momentojn poste Zebedeus demandis:

«Josef, ĉu vi memoras la nigran rubandon kiun Klipfel portis ĉirkaŭ sia ĉapelo? Li kriis. 'Ni ĉiuj estas kondamnitaj al morto kiel tiuj en Rusio... Mi volas havi nigran rubandon... Ni devas porti nian funebrojn!' Kaj lia malgranda frato, kiu ploris, diris: 'Ne, Jakob, mi ne volas tion!' Sed Klipfel tamen surmetis nigran rubandon. Li estis vidinta la husarojn en revo!»

Laŭ tio ke Zebedeus parolis, mi rememoris tiujn aferojn, kaj mi vidis tiun almozulon Pinacle sur la placo antaŭ la urbodomo, kiu kriis al mi, svingante nigran rubandon super la kapo:

«He, lamulo, vi bezonas belan rubandon... la rubandon de tiuj kiuj gajnas... Venu!»

Tiu penso kaj la terura malvarmo, kiu penetris ĝis en la medolon, igis min tremeti. Mi pensis: «Mi neniam reiros hejmen... Pinacle pravis... estas finite!»

Mi pensis pri Trinell, onklino Gredel, la bonkora sinjoro Gulden kaj mi malbenis ĉiujn kiuj devigis min veni ĉi tien.

Ĉirkaŭ la kvara matene, kiam la tago komencis blankigi la ĉielon, kelkaj veturiloj alve-

nis kun vivrimedoj. Oni disdonis al ni panon, kaj ni ricevis ankaŭ brandon kaj viandon.

La pluvado ĉesis, tiel ke ni povis fari supon sur tiu loko. Sed nenio povis revarmigi min. Estas tie, ke min trafis febro. Al mi estis malvarme interne, kaj mia korpo brulis. Mi ne estis la sola en la bataliono en tiu stato: tri kvaronoj suferis kaj langvoris. Jam de monato tiuj kiuj ne plu povis marŝi, etendiĝis sur la teron plorante kaj vokante sian patrinon kiel etaj infanoj. Tio ŝiris al vi la koron. Malsato, rapidaj marŝoj, pluvo kaj la malĝojo scii, ke oni ne plu revidos sian landon, nek tiujn kiujn oni amas, kaŭzas al vi tiun malsanon. Feliĉe la gepatroj ne vidis ilin. Tio estus tro terura. Multaj homoj kredus, ke estas kompatato nek sur la tero nek en la ĉielo.

Laŭ tio ke la tago iĝis pli hela, ni malkovris maldekstre, – trans la rivero kaj la longa ravino plena je salikoj kaj tremoloj –, bruligitajn vilaĝojn, stakojn da mortigitaj, renversitajn municiaĉarojn kaj kanonojn, kaj la teron detruitan tiel for, kiel oni povis rigardi sur la vojoj al Hall, Lindenthal kaj Dolitsch. La situacio estis pli grava ol apud Lutzen. Ni vidis ankaŭ la prusojn malfaldiĝi en tiu direkto kaj proksimiĝi al la batalkampo per miloj. Ili estis helpontaj la aŭstrojn kaj rusojn kaj fermontaj la cirkon ĉirkaŭ ni. Neniu povis nun malhelpi ilin fari tion, tiom pli ke Bernadotte kaj la rusa generalo Beningsen, restinte malantaŭe, alvenis kun cent dudek mil freŝaj trupoj. Tiel nia armeo, kiu jam liveris tri batalojn en unu sola tago kaj estis malpliigita al cent tridek mil batalantoj, estis kaptota en cirklo de tricent mil bajonetoj, sen nombri kvindek mil ĉevalojn kaj dek du mil kanonojn.

De Schönfeld la bataliono ekiris por realiĝi al la divizio en Kohlgarten. Sur la tuta vojo oni vidis malrapide flui la konvojojn de vunditoj. Ĉiuj ĉaroj en la lando estis rekviziciitaj por tiu servo, kaj en la intervaloj marŝis ankoraŭ centoj da malfeliĉuloj, brakon en skarpo, la vizaĝon bandaĝitan, palaj, deprimitaj, duone morti-gitaj. Ĉiuj kiuj povis treni sin, ne grimpis sur ĉaron kaj provis tamen atingi hospitalon.

Ni apenaŭ povsi transiri tiujn obstaklojn, kiam, subite proksimiĝante al Kohlgarten, dudeko da husaroj, alvenante tre rapide kun levita pistolo, igis la homamason retiriĝi dek-stren kaj maldekstren en la kampojn. Ili kriis per laŭtaj voĉoj:

«La Imperiestro! La Imperiestro!»

Tuj la bataliono enviciĝis laŭlonge de la ŝoseo, prezentante la armilojn, kaj kelkajn sekundojn poste la surĉevalaj grenadistoj de la gvardio, – veraj gigantoj en siaj longaj botoj kaj kun siaj enormaj harĉapoj kiuj malsupreniris ĝis la ŝultroj, lasante videblaj nur la nazon, la okulojn kaj la lipharojn, – preterpasis en galopo, premante la sabrotenilon kontraŭ la kokson. Ni ĉiuj estis kontentaj povi diri unuj al la aliaj:

«Tiuj staras ĉe nia flanko... Ili estas brutaj viregoj!»

Apenaŭ ili estis defilintaj, la stabo aperis: imagu tion: cent kvindek ĝis ducent marŝaloj, generaloj, superaj oficiroj kaj adjutantoj, rajdantaj sur veraj cervoj kaj kovritaj per tiom da orbrodaĵoj, ke oni apenaŭ vidis la koloron de iliaj uniformoj, – unuj grandaj kaj maldikaj kun orgojlaj mienoj, la aliaj malgrandaj, masiv-korpaj, kun ruĝaj vizaĝoj, ankoraŭ aliaj pli junaj, tute rektaj sur siaj ĉevaloj kiel statuoj kun brilaj okuloj kaj longaj aglonazoj: estis io belega kaj timiga!

Sed kio plej okulfrapis min meze de tiuj kapitanoj, kiuj jam de dudek jaroj tremigis Eŭropon, estis Napoleono kun sia malnova ĉapelo kaj sia griza redingoto. Mi ankoraŭ vidas lin preterpasanta antaŭ miaj okuloj, la larĝan mentonon sur la brusto kaj la kolon retiritan inter la ŝultrojn. Ĉiuj kriadis: «Vivu la Imperiestro!» Sed li aŭdis nenion... Li atentis pri ni malpli ol pri la fajnan pluveton, kiu tremetis en la aero, kaj rigardis kun kuntiritaj brovoj la prusan armeon, kiu etendiĝis laŭ-longe de Partha por helpi la aŭstrojn. Tia mi vidis lin en tiu tago, tia li restis en mia memoro.

La bataliono estis reekmarŝinta jam de kvaronhoro, kiam Zebedeus diris al mi:

«Ĉu vi vidis lin, Josef?»

«Jes,» mi respondis lin, «mi bone vidis lin kaj mi memoros tion mian tutan vivon.»

«Estas strange,» diris mia kamarado, «oni dirus, ke li ne estas kontenta... En Wurtschen, la morgaŭon post la batalo, li ŝajnis tiel ĝoja, aŭdante nin krii: «Vivu la Imperiestro!» Kaj ankaŭ la generaloj havis ridantajn vizaĝojn! Hodiaŭ ĉiuj havas diablecajn mienojn... La kapitano tamen diris ĉi-matene, ke ni venkis en la alia flanko de Leipzig.»

Multaj pensis la samon sen diri tion. Maltrankvileco ekkaptis nin...

Ni trovis la regimenton en bivako je du fusil-pafoj de Kohlgarten. La bataliono ekokupis sian pozicion dekstre de la vojo sur monteto.

En tiu direkto oni vidis la sennombrajn fajrojn de la armeoj sendi sian fumon al la ĉielo. Ankoraŭ ĉiam falis pluveto, kaj la viroj, sidantaj sur siaj sakoj fronte al la malgrandaj fajroj kun krucitaj brakoj, ŝajnis revii. La oficiroj kunvenis. De ĉiuj flankoj oni aŭdis ripeti, ke oni neniam vidis tian militon, kiu estis eksterma milito, ke tiu malvenko tute ne ĝenas la malamikojn, kaj ke ili volas nur malaperigi nin de la tero, sciante, ke finfine restos al ili kvar aŭ kvinfoje pli da viroj ol al ni, kaj ke finfine ili estos la mastroj.

Oni ankaŭ diris, ke la imperiestro gajnis la batalon apud Wachau kontraŭ la aŭstroj kaj la rusoj, sed tio servis al nenio, ĉar la aliaj ne foriris kaj krom tio atendis amason da plifortigo. Ni sciis, ke ni malvenkis apud Mockern. Mal-graŭ

la bela defendo far Marmont, la malamiko venkis nin per sia nombro. Ni havis nur unu veran avantaĝon en tiu tago, nome, ke ni konservis nian retiriĝan vojon al Erfurt, ĉar Giulay ne povis kapti la pontojn trans Elster kaj Pleisse. La tuta armeo, de la simplaj soldatoj ĝis la marŝaloj, pensis, ke nia pozicio estas tre malbona kaj ke necesas retiriĝi kiel eble plej baldaŭ. Malfeliĉe la imperiestro pensis la kontraŭon: necesis do resti!

La tutan tagon de la 17-a ni restis en nia pozicio sen ellasi unu solan fusilpafon. Iuj parolis pri la alveno de generalo Reynier kun dek ses mil saksoj, sed la apostatiĝo de la bavaroj instruis al ni, kian fidon oni povis havi en niaj aliancantoj.

Je la vespero oni anoncis, ke oni komencis malkovri la nordan armeon sur la altebenaĵo de Breitenfeld: Estis pliaj sesdek mil viroj por la malamikoj. Mi kredas ankaŭ, ke mi aŭdis la malbenojn, kiuj leviĝis kontraŭ Bernadotte, la indignajn kriojn de ĉiuj kiuj jam konis lin kiel simplan oficiron en la tempo de la Respubliko, kaj kiuj diris: «Li ŝuldas ĉion al ni! Ni faris lin reĝo per nia propra sango, kaj nun li venas doni al ni la mortigan baton!»

Dum la nokto okazis ĝenerala moviĝo malantaŭen. Tiam ĉio refariĝis trankvila. Sed tio ne malhelpis nin pensi, kaj ĉiu pensis en silento la samon: «Kio okazos morgaŭ? Ĉu morgaŭ je tiu ĉi sama horo mi ankoraŭ vidos la lunon leviĝi inter la nuboj, kiel mi vidas ĝin nun? Ĉu la steloj ankoraŭ brilos por miaj okuloj?»

Kaj kiam oni rigardis en la malluma nokto, la grandajn cirklojn de la fajroj kiuj ĉirkaŭis nin je distanco de preskaŭ ses mejloj, oni kriis al si mem:

«Nun la tuta universo estas kontraŭ ni, ĉiuj popoloj postulas nian ekstermon. Ili ne plu deziras nian gloron!»

Malgraŭ tio oni tamen pensis, ke ni havas la grandan feliĉecon esti francoj, kaj ke necesas venki aŭ morti.

XIX

Kun tiaj pensoj ni komencis la novan tagon. Ankoraŭ nenio moviĝis, kaj Zebedeus diris al mi:

«Kia bonŝanco estus, se la malamiko ne havus la kuraĝon ataki nin!»

La oficiroj babiladis inter si pri armistico. Sed subite, ĉirkaŭ la naŭa, kelkaj kurieroj eniris kun lozaj bridoj, kriante, ke la malamiko moviĝas sur la tuta linio, kaj preskaŭ samtempe tondris kanono je nia dekstra flanko laŭlonge de Elster.

Ni jam estis armitaj kaj marŝadis tra la kampoj apud Partha por reiri al Schönfeld. Jen la rekomenco de la batalo.

Sur la monteto antaŭ la rivero du aŭ tri divizioj atendis la malamikon, metinte siajn bateriojn en la intervaloj kaj la kavalerion je la flankoj. Pli for, trans la bajonetpintoj, ni vidis la prusojn, la rusojn kaj la svedojn en grandaj amasoj proksimiĝi de ĉiuj flankoj: tio ne finiĝis.

Dudek minutojn poste ni atingis nian linion inter du montetoj, kaj ni ekvidis antaŭ ni kvin aŭ ses mil prusojn, kiuj transiris la riveron, kriante kune: "*Vaterland! Vaterland!*". Tio fariĝis kun granda tumulto simila al tiu kaŭzita de tiaj nuboj de korvoj, kiuj kuniĝas por ekflugi al la nordaj landoj.

En la sama momento la pafado komenciĝis de unu bordo al la alia, kaj niaj kanonoj komen-cis tondri. La ravino tra kiu fluas Partha, tiom pleniĝis per fumo, ke ni apenaŭ vidis la prusojn, kiuj jam atingis nin kun siaj furiozaj okuloj, grimacantaj buŝoj kaj mienoj de sovaĝaj bestoj. Tiam ni eligis krion al la ĉielo: «Vivu la Imperiestro!» kaj kuris al ili. La miksbatalo fariĝis terura: en du sekundoj, niaj bajonetoj kruciĝis per miloj, oni puŝadis sin, oni retropaŝis, oni ellasis fusilpafojn de tre proksime, oni batis sin per la kolbo, ĉiuj konfuziĝis, oni tretis sur tiujn kiuj falis. La kanonoj daŭre tondradis, kaj la fumo, kiu treniĝis super la akvofluo inter la montetoj, la siblado de la kugloj, la kraketado de la pafoj ĝis tiu ravino similis al forno, en kiun falis la viroj kvazaŭ ŝtupoj por esti bruligataj.

Kio puŝis nin, estis la malespero, la furiozeco venĝi nin antaŭ ol morti. La pruso havis la orgojlon diri inter si: «Ĉi-foje ni estas venkontaj Napoleonon!» Tiuj pruso estis la plej orgojlaj inter ĉiuj homoj: iliaj venkoj apud Gross-Beeren kaj Katzbach kvazaŭ frenezis ilin. Sed multaj el ili restis en la rivero... jes, en la rivero! Trifoje ili transiris la akvon kaj amase kuris al ni. Ne estis devigitaj retropaŝi pro ilia granda nombro, kaj kiajn kriojn ili eligis tiam! Oni estus dirinta, ke ili volas manĝi nin... Estas malnobla raso... Iliaj oficiroj, kun la sabro levita en la aero inter la densaj bajonetoj, centfoje ripetis: «*Vorwärts! Vorwärts!*⁴³!» Kaj ĉiuj antaŭeniris kun granda kuraĝo kvazaŭ muro: oni ne povas diri la kontraŭon. Niaj kanonoj forfalĉis ilin, sed ili ankoraŭ ĉiam antaŭeniris. Sed de la supro de la monteto ni denove kursvingiĝis kaj reĵetis ilin trans la riveron. Ni certe estus masakrintaj ilin ĉiujn, se unu el iliaj baterioj staranta antaŭ Mockern ne estus celinta nin kaj malhelpis nin persekuti ilin pli foren.

Tio daŭris ĝis la dua horo. La duono de niaj oficiroj estis malkapabligitaj batali. Komandanto Gémeau estis vundita, kolonelo Lorrain

⁴³ "Antaŭen! Antaŭen!"

mortigita, kaj laŭlonge de la rivero oni vidis nun stakojn da mortigitoj kaj vunditojn, kiuj trenis sin for de la batalo. Luj el ili, furiozaj, releviĝis ankoraŭ sur la genuoj por doni ankoraŭ bajonetpikojn aŭ ellasi lastan fusilpafon. Oni neniam vidis ion tian. Sur la rivero flosis vicoj da mortigitoj, unuj montris sian viazaĝon, aliaj sian dorson, aliaj siajn piedojn. Ili sekvis sin kiel flosanta ligno, kaj neniu eĉ atentis pri ili. Ni diris al ni mem, ke la samo povus ĉia-momente okazi al ni.

Tiu granda buĉado okazis laŭlonge de Partha ekde Schönfeld ĝis Grossdorf.

La svedoj kaj la prusoj fine laŭiris la riveron almonte por ĉirkaŭiri nin pli for, kaj amasoj da rusoj venis anstataŭi tiujn prusojn, kiuj ne koleriĝis pro tio, ke ili iris aliloken.

La rusoj formis du kolonojn. Ili malsupreniris en la ravinon, la armilon en la mano, en admirinda ordo kaj dufoje atakis nin kun granda braveco, sed sen eligi tiajn bestoblekojn kiel la prusoj. Ilia kavalerio volis ekkapti la malnovan ponton preter Schönfeld. La kanonado fariĝis ĉiam pli forta. Je ĉiuj flankoj, tiel for kiel oni povis rigardi tra la fumo, oni vidis nur mal-amikojn, kiuj ĉiam pli densiĝis. Kiam ni repuŝis unu el iliaj kolonoj, alvenis alia kun freŝaj trupoj. Nia tasko estis ĉiam rekomencenda.

Inter la dua kaj la tria ni eksciis, ke la svedoj kaj la prusa kavalerio transiris la riveron super Grossdorf kaj volis preni nin de malantaŭe. Tio multe pli plaĉis al ili ol ataki nin de antaŭe. Tuj marŝalo Ney plenumis ŝanĝon de la fronto turnante la dekstran alon malantaŭen. Nia divizio ĉiam restis apogita kontraŭ Schönfeld, sed ĉiuj aliaj retiriĝis de Partha por etendiĝi en la ebenaĵo, tiel ke la tuta armeo formis nur unu linion ĉirkaŭ Leipzig.

Ĉirkaŭ la tria la rusoj preparis sian trian atakon malantaŭ la vojo al Mockern. Niaj oficiroj faris novajn aranĝojn por ricevi ilin, kiam speco de tremeto pasis tra la tuta armeon de unu fino al la alia, kaj ĉiuj eksciis en kelkaj minutoj, ke la dek ses mil saksoj kaj la vir-temberga kavalerio en la centro de nia linio transiris al la malamiko, kaj ke, eĉ anstataŭ alveni de iu normala distanco, ili faris la abo-menaĝon, turni siajn kvardek kanonojn, kiujn ili kuntrenis, kontraŭ siajn eksajn batalkama-radojn de la divizio Durutte.

Anstataŭ malkuraĝigi nin, tiu perfido tiom kreskigis nian furiozecon, ke ni estis trans-irintaj la riveron por ekstermi ilin ĉiujn, se oni estus aŭskultinta nin.

Tiuj saksoj diris, ke ili defendas sian patrimon. Nu, tio estas malvera! Ili jam provis forlasi nin sur la vojo al Duben. Kio malhelpis ilin fari tion tiam? Ili estus povintaj agi kiel la bavaroj kaj deklari sin kontraŭ ni antaŭ la batalo. Ili estus povintaj resti neŭtralaj, ili ankaŭ estis povintaj

rifuzi militservon, sed ili perfidis nin, ĉar la ŝanco turniĝis kontraŭ nin. Se ili estis vidintaj, ke ni gajnos, ili estus restintaj niaj bonaj kamaradoj, kiuj havis sian parton en la venko kiel apud Jena kaj en Friedland. Jen kion ĉiuj pensis, kaj jen kiel la saksoj fariĝis perfiduloj en eterne. Ne nur ili forlasis siajn kamaradojn en malfeliĉo, sed ili eĉ mortigis ilin, por ke la aliaj respektu ilin. Dio estas justa: iliaj novaj aliancanoj tiom malestimis ilin, ke ili perdis la duonon de sia lando post la batalo. La francoj ridis pri la dankemo de la prusoj, aŭstroj kaj rusoj.

Ekde tiu momento ĝis la vespero jam ne estis humana milito, sed milito de venĝo. Nur la granda nombro povis elvenki nin, sed la aliancanoj estis kare pagontaj sian venkon.

Ĉe la noktiĝo, dum du mil kanonoj tondradis kune, ni ricevis ilian sepan atakon apud Schönfeld: en unu flanko la rusoj kaj en la alia flanko la prusoj repuŝis nin en tiun grandan vilaĝon. Ni kontraŭstaris en ĉiu domo, en ĉiu strateto. La muroj falis sub la kugloj, la tegmentoj defalis. Estis malvarme al ni, kaj ni estis palaj de furiozeco. La oficiroj plukis fusilon kaj kartoĉujon de la grundo kaj ŝiris la kartoĉojn tute kiel la simplaj soldatoj.

Post la domoj oni defendis la ĝardenojn kaj tombejon, kie mi dormis la hieraŭon. Estis tiam pli da mortigitoj sur la tero ol en ĝi. Tiuj kiuj falis, ne plendis. Tiuj kiuj restis, kuniĝis mal-antaŭ muro, stako da ruinoj aŭ tombo. Ĉiu colo da grundo kostis la vivon al iu.

Estis nokto, kiam marŝalo Ney alkondukis, mi ne sias de kie, plifortigon: tion kio restis de la divizio Ricard kaj de la dua de Souham. Ĉiuj restoj de niaj regimentoj reunuiĝis, kaj ni rejetis la rusojn trans la malnovan ponton, kiu jam ne havis balustradon pro la forta mitrajlado. Sur tiu ponto ni lokis ses kanonojn de dekdu, kaj ĝis la sepa ni pafegadis unuj al la aliaj sur tiu loko. La restoj de la bataliono kaj de kelkaj aliaj subtenis la kanonojn de malantaŭe, kaj mi memoras, ke ilia fajrado de sur la ponto similis al fulmoj, kaj ke oni vidis tiam ĉevalojn kaj homojn falegi pelmele sub la mallumaj arkoj. Tio daŭris nur sekundon, sed tio estis terura vidaĵo!

Je la sepa kaj duono, dum amasoj da kavalerianoj proksimiĝis al nia maldekstra alo, oni vidis ilin svarmi ĉirkaŭ niaj du grandaj kvadratoj, kiuj retiriĝis paŝon post paŝo. Fine ni ricevis la ordonon retiriĝi.

Apud Schönfeld restis nur du aŭ tri mil viroj kun la ses kanonoj. Ni reiris al Kohlgarten sen esti persekutataj kaj intencis bivaki en la ĉirkaŭaĵo de Rendnitz. Zebedeus ankoraŭ vivis. Ĉar ni silente marŝis unu apud la alia jam de dudek minutoj, aŭskultante la kanonadon, kiu daŭris apud Elster malgraŭ la nokto, li subite diris al mi:

«Kiel fariĝis, ke ni ankoraŭ vivas, Josef,
kiam tiom da miloj da aliaj apud ni mortis?
Nun ni jam ne povas morti.»

Mi respondis nenion.
«Kia batalo!» li diris. «Ĉu oni iam tiumaniere
batalis kontraŭ ni? Estas neeble.»

Li pravis: estis batalo de gigantoj. Jam de la
deka matene ĝis la sepa vespere, ni alfrontis
tricent sesdek mil virojn sen retropaŝi unu
piedon, kaj tamen ni estis nur cent tridek mil!
Oni neniam vidis ion tian.

Dio gardu, ke mi diru ion malbonan pri la
germanoj: ili batalis por la sendependigo de sia
patrio. Sed mi trovas, ke ili malpravas, cele-
brante ĉiujare la datrevenon de la batalo apud
Leipzig, ĉar ili estas tri kontraŭ unu. Estas neniam
kaŭzo fanfaroni.

Proksimiĝante al Rendnitz, ni marŝis trans
stakoj da mortigitoj. Ĉe ĉiu paŝo ni renkontis
defektitajn kanonojn, renversitajn municiaĵojn,
arbojn detruitajn de mitrajlo. Tie divizio de la
juna gvardio kaj surĉevalaj grenadistoj, kon-
dukataj de Napoleono mem, haltigis la sve-dojn,
kiuj antaŭeniris tra la libera spaco kreita de la
perfido de la saksoj. Du aŭ tri malnovaj preskaŭ
forbrulintaj barakoj antaŭ la vilaĝo prilumis tiun
spektaklon. Nur la surĉevalaj grenadistoj
troviĝis ankoraŭ en Rendnitz, sed amaso da
aliaj senordaj trupanoj iradis kaj venadis tra la
ĉefstrato. Ĉiuj serĉis ion man-ĝeblan kaj
trinkeblan.

Defilante antaŭ granda poŝtoŝtacejo, ni vidis
malantaŭ la kortomuro du armeajn kantinis-
tinojn, kiuj verŝis trinkaĵon de sur siaj ĉaroj. Tie
estis ĉasistoj, kirasistoj, lancistoj, husaroj,
infanterianoj kaj gvardianoj, ĉiuj pelmele, kun
ŝiritaj uniformoj, ĉakoj kaj ĉapoj sen plumoj kaj
truigitaj per kugloj kaj batoj. Ĉiuj sajnus mal-
sategi.

Du aŭ tri dragonoj, starante sur la malalta
muro apud poto plena je brulanta peĉo, kun la
brakoj krucitaj sub siaj longaj blankaj manteloj,
estis kovritaj per sango kiel buĉistoj.

Tuj Zebedeus puŝis min per la kubuto sen diri
ion, kaj ni eniris la korton, dum la aliaj daŭrigis
sian vojon. Ni bezonis kvaronhoron por alveni
ĉe la ĉaro. Mi montris sesfuntan moneron. La
kantinistino, sur la genuoj mal-antaŭ sia barelo,
transdonis al mi grandan glason da brando kun
peco da blanka pano, ricevante mian moneron.
Mi trinkis kaj tiam transdonis la glason al
Zebedeus, kiu mal-plenigis ĝin.

Poste ni havis grandan penon eliri el tiu
amaso. Oni rigardis sin kun sombra mieno, oni
faris al si lokon per la ŝultroj kaj kubutoj. Tie oni
povis diri, vidante tiujn durajn vizaĝojn, kavajn

okulojn kaj terurajn mienojn de viroj, kiuj ĵus
trairis mil mortojn kaj estis rekomencantaj la
morgaŭon: «Ĉiu por si mem... Dio por ĉiuj!»

Dum ni forlasis la vilaĝon, Zebedeus deman-
dis al mi:

«Ĉu vi ankoraŭ havas panon?»

«Jes.»

Mi rompis la panon en du kaj donis al li
duonon. Ni manĝis plirapidigante niajn paŝojn.
Oni ankoraŭ aŭdis pafi malproksime. Post
dudek minutoj ni reatingis la voston de la
kolono, kaj ni rekonis la batalionon per ĝia ĉefo,
kapitano adjutant-majoro Vidal, kiu mar-ŝadis
antaŭe. Ni reprenis niajn lokojn en la vico, sen
ke iu estis rimarkinta nian foreston;

Ju pli ni proksimiĝis al la urbo, des pli da
taĉmentoj, kanonoj kaj furgonoj oni renkontis,
kiuj rapidis al Leipzig.

Je la deka ni trairis la suburbon Rendnitz.
Brigadogeneralo Fournier, kiu transprenis la
komandon, ordonis nin turniĝi maldekstren. Je
la noktomezo ni alvenis sur la grandaj pro-
menejoj laŭlonge de Pleisse, kaj ni haltis sub la
maljunaj senfoliaj tilioj. Ni faskigis la fusilojn.
Longa vico da fajroj tremetis tra la nebulo ĝis la
suburbo Randstadt. Kiam la flamoj supreniris, ili
prilumis grupojn da polaj lancistoj, vicajn da
ĉevaloj, kanonojn, furgonojn, kaj tie kaj tie ĉi
kelkajn sentinelojn, kiuj staris senmovaj kiel
ombroj en la nebulo. De la urbo leviĝis granda
bruo, kiu ŝajnis ĉiam kreski kaj konfuziĝis kun la
obtuza ruliĝado de niaj konvojetoj sur la ponto de
Lindenau. Estis la komenco de la retiriĝo.

Tiam ĉiu metis sian sakon ĉepieden de arbo
kaj kuŝiĝis supren, faldante unu brakon sub la
orelo. Kvaronhoron poste ĉiuj dormis.

XX

Kio okazis ĝis la aŭroro, mi ne scias. Sen-
dube la furgonoj, la vunditoj kaj la kaptitoj plu
defiladis trans la ponton. Sed tiam terura
detonacio vekis nin. La tero kaj la malnovaj
domoj tremetis. Neniu viro restis kuŝanta, ĉar
oni kredis, ke temas pri nova atako. Tiam du
husaroficiroj alvenis, kriante, ke ĵus pulvo-
vagono hazarde eksplodis sur la granda avenuo
de Randstadt surborde de la rivero. La malhele
ruĝa fumo turbuladis al la ĉielo, kie ĝi disipiĝis.

Ĉio retranskiviĝis. Luj rekuŝiĝis kaj provis
reekdormi, sed jam tagiĝis, kaj, ĵetante rigar-
don sur la grizetan riveron, oni jam vidis niajn
trupojn, kiuj etendiĝis tiel for, kiel oni povis
rigardi, marŝi al la ponto trans Elster, la sola kiu
restis al ni. Tiu ponto, kiun tiom da viroj devis
transiri, iĝis onin melankolia, ĉar tiu transiro
estis daŭranta tre longe, kaj la penso venis al
ĉiujn, ke estus estinte pli bone konstrui aliajn

pontojn trans la du riveroj, ĉar ĉiu-momente la malamiko povis ataki nin, kaj tiam la retiriĝo fariĝus tre malfacila. Sed la impe-riestro forgesis doni la ordonojn, kaj oni ne kuraĝis fari ion ajn sen lia ordono. Neniu franca marŝalo estus aŭdacinta preni sur sin la respondecon diri, ke estus pli bone havi du pontojn anstataŭ unu! Jen al kio la terura disciplino de Napoleono reduktis ĉiujn tiujn malnovajn kapitanojn: ili obeis kvazaŭ maŝinoj kaj maltraktiviliĝis pri nenialia, timante mal-plaĉi al la mastro.

Vidante tiun ponton, mi tuj pensis: «Se nur oni lasos nin transiri ĝin, ĉar ni jam sufiĉe bataladis kaj buĉadis! Sur la alia bordo ni estos sur la bona vojo al Francio, kaj tiam mi eble povos revidi mian karan Trinel, onklinon Gredel kaj patron Gulden!»

Tiel revante mi teneriĝis kaj ĵaluze rigardis tiujn milojn da surĉevalajn artilerianojn kaj soldatojn de la trajneskorto, kiuj malproksimiĝis tie for kiel formikoj, kaj la grandajn ĉapojn de la muljuna gvardio, la armilon sur la ŝultro, kiu staris senmova sur la monteto de Lindenau trans la rivero.

Zebedeus, kiu pensis la samon, diris:

«He, Josef, se ni estus en ilia loko.»

Ĉirkaŭ la sepa, kiam ni vidis alproksimiĝi tri furgonojn por disdoni al ni kartoĉojn kaj panon, tio ŝajnis al mi tre amara sorto. Estis nun klare, ke ni konsistigos la ariergardon, kaj malgraŭ la malsato mi estis volinta ĵeti la panon kontraŭ muron. Kelkajn momentojn poste preterpasis du eskadronoj da polaj lancistoj, kiuj laŭiris la riveron galopante. Tiam malantaŭ tiuj lancistoj iris kvin aŭ ses generaloj, inter kiuj princo Poniatowski. Estis viro de kvindek jaroj, sufiĉe granda kaj maldika, kiu mienis malĝoje. Li preterpasis sen rigardi nin. Generalo Fournier apartigis sin de sia stabo, kriante al ni:

«Laŭvice maldekstren!»

Neniam mi spertis tian malemon, Mi estis doninta mia vivon por du liardoj⁴⁴, sed necesis ja ekmarŝi kaj turni la dorson al la ponto.

Fine de la promenejoj ni alvenis ĉe la loko nomata Hinterthor. Estas malnova pordego sur la vojo al Kaunewitz. Dekstre kaj maldekstre etendiĝis malnovaj remparoj kaj malantaŭe staris domoj. Oni postenigis nin sur la kovritaj vojoj apud tiu pordego, kiun pioniroj solide barikadis. Kapitano Vidal tiam komandis la batalionon, kiu estis reduktita al tricent dudek kvin viroj. Kelkaj malnovaj putrintaj palisaroj servis al ni kel fortikaĵo, kaj sur ĉiuj vojoj fronte al ni proksimiĝis al ni la malamiko. Ĉi-foje estis blankaj jakoj kaj ĉakoj, kiuj estis plataj sur la

nuko kaj havis specon de alta plato antaŭe, sur kiu oni vidis la dukapan aglon de la *kreutzer*⁴⁵. La maljuna Pinto, kiu tuj rekonis ilin, diris:

«Tiuj estas la *Kaiserliche*⁴⁶! Ni venkis ilin pli ol kvindekfoje ekde 1793. Sed estas egale: se la patro de imperiestrino Maria-Luiza⁴⁷ havus koron, li tamen estus kun ni!».

Jam de kelkaj momentoj oni aŭdis la kano-nadon. En la alia flanko de la urbo Blücher atakis la suburbon Hall. Baldaŭ poste la pafado etendiĝis dekstren. Bernadotte atakis la suburbon Kohlgarten, kaj preskaŭ samtempe la unuaj obusoj de la aŭstroj falis sur nianj kovritajn vojojn. Ili sekvis sin laŭvice. Pluraj pasis super Hintherthor kaj eksplodis en la domoj kaj stratoj de la suburbo.

Je la naŭa la aŭstroj formis atakkolonon sur la vojo al Kaunewitz. De ĉiuj flankoj ili super-fluis nin. Malgraŭ tio la bataliono rezistis ĝis la deka. Tiam ni devis retiriĝi malantaŭ la rem-parojn, kie la *Kaiserliche* persekutis nin tra la breĉoj sub la krucpafado de la 29-a kaj 14-a liniaj regimentoj. Tiuj povraj diabloj ne havis la furiozecon de la prusoj. Ili montris tamen veran kuraĝon, ĉar je la deka kaj duono ili staris sur la remparoj, kaj ni pafadis al ili el ĉiuj najbaraj fenestroj sen povi devigi ilin malsupreniri. Ses monatojn antaŭe tiuj aferoj estus honorigintaj min, sed mi jam vidis tiom da aliaj! Mi jam fariĝis sensenta kiel maljuna soldato, kaj la morto de viro aŭ de cent viroj jam ne impresis min.

Ĝis tiu momento ĉio iris glate. Sed kiel ekiri el la domoj? La malamiko kovris ĉiujn ave-nuojn, kaj se ni ne grimpus sur la tegmentojn, retiriĝo jam estus neebla. Estis ankaŭ unu el tiuj malbonaj momentoj kiujn mi gardis en la memoro. Subite venis al mi la ideo, ke ni estos kaptitaj tie kvazaŭ vulpojn, kiujn oni parfume pelas el ilia truoj. Mi proksimiĝis al malantaŭa fenestro kaj vidis, ke ĝi eliris sur korton, kaj ke tiu korto havis pordon nur en la antaŭa flanko. Mi imagis ke la aŭstroj, post la tuta malbono, kiun ni faris al ili, mortigos nin per la bajoneto. Tio estus sufiĉe komprenebla. Pensante pri tio, mi reeniris la ĉambron, kie ni estis deko kaj ekvidis serĝenton Pinto sidantan kontraŭ muro, tute pala kun pendantaj brakoj. Li ĵus ricevis kuglon en la ventro kaj diris meze de la pafado:

«Defendu vin, rekrutoj! Defendu vin!... Montru al tiuj *Kaiserliche*, ke ni valoras ankoraŭ pli ol ili!...Ba! Tiuj friponoj!»

Malsupre, kontraŭ la pordo kvazaŭe resonis kanonpafegoj. Ni ankoraŭ ĉiam pafadis, sed sen espero, kiam ekstere fariĝis granda bruoj de stamfantaj ĉevaloj. La pafado ĉesis, kaj ni vidis

⁴⁴ Malnova kupra franca monero de malgranda valoro

⁴⁵ Malnova aŭstra monero

⁴⁶ Imperiestraj trupoj de Aŭstrio

⁴⁷ Napoleono divorcis sian edzinon, Jozefina de Beauharnais, ĉar ŝi ne donis al li sekcedonton, kaj reedziĝis al Maria-Luiza, filino de la imperiestro de Aŭstrio.

tra la fumo kvar eskadronojn de lancistoj paŝi kvazaŭ lioj meze de la aŭstroj. Ĉio cedis. La *Kaiserliche* plirapidigis siajn paŝojn, sed la longaj bluetaj lancoj kun siaj ruĝaj ori-flamoj iris pli rapide ol ili kaj penetris en ilian dorsojn kiel sagoj. Tiuj lancistoj estis poloj, la plej teruraj soldatoj kiujn mi iam vidis en mia vivo, kaj por diri la aferojn, kiaj ili estis, niaj fratoj kaj amikoj. Tiuj ne turnis sian kazakon⁴⁸ en momento de danĝero. Ili donis por ni sian lastan guton da sango. Kaj ni, kion ni faris por tiu malfeliĉa lando? Kiam mi pensas pri nia maldankemo, mia koro krevas⁴⁸!

Ankoraŭ ĉi-foje la poloj liberigis nin. Vidinte ilin tiel fieraj kaj bravaj, ni eliris de ĉie, kuris al la aŭstroj kun mallevitaj bajonetoj kaj repuŝis ilin en la fosajojn. Ni ankoraŭfoje forportis la venkon, sed la tempo urĝis por ni retiriĝi, ĉar la malamiko jam plenigis Leipzig: La pordegoj de Hall kaj Grimma jam estis detruitaj kaj tiu de Petersthor liverita fare de niaj amikoj, la bade-nanoj, kaj niaj aliaj amikoj, la saksoj. Soldatoj, studentoj kaj civiluloj pafadis al ni tra la fenestroj.

Ni havis nur la tempon reformiĝi kaj repreni la vojon al la granda avenuo, kiu laŭiras Pleisse. La lancistoj tie atendis nin. Ni defilis malantaŭ ili, kaj ĉar la aŭstroj sekvis nin de proksime, ili ankoraŭ faris kuratakon por repuŝi ilin. Kiaj bravaj viroj kaj kiaj belegaj kavalerianoj estis tiuj poloj! Ha! Ĉiuj kiuj vidis ilin sturmi, estis plenaj je admiro, precipe en tia momento.

La divizio, reduktita de ok mil viroj al kvin-cent, retiriĝis do antaŭ pli ol kvindek mil mal-amikoj, ne sen ankoraŭ returniĝi kaj pafi al la *Kaiserliche*.

Ni proksimiĝis al la ponto, kaj kun kia ĝojo! Mi ne bezonas diri tion. Sed ne estis facile alveni tie, ĉar laŭlonge de la tuta avenuo tiom da viroj kaj ĉevaloj, alvenante el ĉiuj najbaraj stratoj, rapidis tien por transiri ĝin, ke tiu amaso iel formis unu solan blokon, en kiu ĉiuj kapoj intertuŝiĝis kaj malrapide antaŭeniĝis kun suspiroj kaj speco de obtuzaj krioj, kiujn oni povis aŭdi je distanco de kvaronmeilo malgraŭ la pafado. Ve tiuj kiuj paŝis ĉerande de la ponto! Ili falis en la riveron, sen ke iu ajn atentis pri ili! En la mezo viroj kaj eĉ ĉevaloj estis kvazaŭ portataj. Ili ne bezonis movi sin, ili antaŭeniĝis aŭto-mate...

Sed kiel alveni tie? La malamiko avancis de ĉie. Ni estis metintaj kelkajn kanonojn je ambaŭ flankoj por balai la promenejojn kaj la ĉefan straton. Estis ankoraŭ trupoj en linio por repuŝi la unuajn atakojn, sed la prusoj, rusoj kaj aŭstroj ankaŭ havis kanonojn por balai la ponton, kaj

tiuj kiuj restis la lastaj, post kiam ili protektis la retiriĝon de la aliaj, devis ricevi ĉiujn obusojn, ĉiujn kuglojn kaj la tutan mitraj-lon. Oni ne bezonas multan prudenton por kompreni tion: tio estis sufiĉe klara: jen kial ĉiuj volis transiri samtempe.

Je du- aŭ tricent paŝoj de la ponto la ideo venis al mi kuri kaj perdiĝi en la amaso kaj igi porti min al la alia bordo, sed kapitano Vidal, leŭtenanto Bretonville kaj aliaj maljunuloj diris:

«La unuan kiu forlasos sian vicon, mi pafmortigos!»

Kia terura malbeno estis troviĝi tiel proksime kaj pensi: «Necesas, ke mi restu!» Tio okazis inter la tagmezo kaj la dek-unua. Eĉ se mi vivus cent jarojn, mi neniam povus forgesi tiujn momentojn: la pafado proksimiĝis de dekstre kaj maldekstre, kelkaj kanonkugloj komencis zumi tra la aero, kaj apud la suburbo Hall oni vidis la prusojn aperi pelmele kun niaj soldatoj. Proksime de la ponto leviĝis teruraj krioj. La kavalerianoj, por fari al si lokon, sabris la infanterianojn, kiuj respondis per siaj bajonetoj: estis kompleta konfuzo kaj ĝenerala fuĝo. Ĉe ĉiu paŝo de la amaso iu falis de la ponto en la akvon, kaj, provante reteni sin, kuntrenis grapolon de kvin aŭ ses aliaj personoj.

Ĉar la konfuzo, la hurlado, la pafado kaj la plaŭdado de tiuj kiuj falis en la akvon, ĉiu-sekunde kreskadis, kaj ĉar tiu spektaklo fariĝis tiel abomena, ke oni kredus, ke povus okazi nenio pli grava, jen speco de tondro sonas kaj la unua arko de la ponto disfalas kun ĉiuj kiuj troviĝas sur ĝi: centoj da malfeliĉuloj malaperas en la rivero, amasoj de aliaj estas mutilitaj, mortigitaj, stumpitaj per la falantaj ŝtonoj.

Malamikaj pioniroj ĵus eksplodigis la ponton!

Ĉe tiu vido la kriadado resonis ĝis la fino de la promenejoj: Ni pereas!... Ni estas perditaj!»

Oni aŭdis nur tion... Estis enorma terura hurlado. Unuj kaptitaj de malespera furiozeco, turniĝis kontraŭ la malamiko kvazaŭ sovaĝaj bestoj premitaj en angulon, kiuj vidas nenion plu kaj volas nur venĝi sin, dum aliaj rompas siajn armilojn, akuzante ĉielon kaj teron pri sia malfeliĉo. Surĉevalaj oficiroj kaj generaloj saltas en la riveron por transnaĝi ĝin. Multaj soldatoj imitas ilin kaj saltasen la akvon sen depreni siajn sakojn. La ideo, ke oni estus povinta foriri, kaj ke nun, en la lasta minuto, oni riskis esti masakrita, frenezigis onin... La antaŭan tagon mi vidis multajn kadavrojn, kuntrenatajn de Partha, sed nun estis ankoraŭ pli terure. Ĉiuj tiuj malfeliĉuloj baraktis kun ŝirantaj krioj, alkröĉigante unuj al la aliaj. Ili

⁴⁸ Bluzo aŭ kapucmantelo, kiun surhavis la musketeroj.

⁴⁸ Ŝajnis, ke Napoleono promesis al la poloj restarigi la polan reĝejon por danki ilin pro ilia subteno,

sed li neniam faris tion. 40 jarojn antaŭe prusoj, aŭstroj kaj rusoj dividis inter si Pollando.

plenigis la riveron: oni vidis nur brakojn kaj kapojn kiuj moviĝis ĉe la surfaco.

En tiu momento kapitano Vidal, kiu tamen estis trankvila viro, ŝajnis mem malkuraĝigita. Li remetis sian sabron en la sabrington kaj ridante kun stranga mieno diris:

«Nu... estas finite!»

Kaj ĉar mi metis mian manon sur lian brakon, li rigardis min kun granda mildeco.

«Kion vi volas, filo?» li demandis min.

«Kapitano,» mi respondis, ĉar tiu penso revenis al mi tiam, «mi pasis kvar monatojn en la hospitalo de Leipzig, mi banis min en Elster kaj mi konas lokon en rivero kie oni povas tuŝi la fundon.»

«Kie do?»

«Je dek mintuoj almonde de la ponto.»

Tuj li retiris sian sabron de la ingo, kriante per tondra voĉo:

«Infanoj, sekvu min. Vi marŝu antaŭe!»

La tuta bataliono, kiu nombris ne pli ol ducent viroj, ekmarŝis. Centoj da aliaj, kiuj vidis nin foriri per firmaj paŝoj, aliĝis al ni, sen scii, kien ni iras. La aŭstroj jam troviĝis en la avenuo. Pli malsupre etendiĝis la ĝardenoj apartigitaj per heĝoj ĝis Elster. Mi rekonis tiun vojon, kiun Zimmer kaj mi ofte trairis en julio, kiam ĉio ĉi ankoraŭ estis unu sola bukedo da floroj.

Fusilpafoj estis direktataj al ni, sed ni jam ne respondis. Mi eniris la unua en la riveron, tiam kapitano Vidal, poste la aliaj po du. La akvo atingis niajn ŝultrojn, ĉar la rivero estis ŝvelinta per la aŭtunaj pluvoj. Malgraŭ tio ni facile transiris, neniu dronis. Atingante la alian bordon, ni havis preskaŭ ĉiuj niajn fusilojn, kaj ni penetris tute rekte en la kampojn. Pli for ni trovis la malgrandan lignan ponton, kiu kondukas al Schleissig, kaj de tie ni turniĝis al Lindenaŭ.

Ni ĉiuj silentis. Iam kaj iam ni rigardis en la malproksimeco trans Elster la batalon, kiuj daŭris sur la stratoj de Leipzig. Longe la furioza kriadado kaj la obtuza tondrado de la kanonado alvenis ĝis ĉe ni. Nur ĉirkaŭ la dua, kiam ni malkovris la senfinan procesion de trupoj, kanonoj kaj furgonoj, kiuj etendiĝis tiel for, kiel oni povis rigardi, sur la vojo al Erfurt, ke tiuj bruoj konfuziĝis kun la ruliĝado de la veturiloj.

XXI

Ĝis nun mi rakontis la grandajn okazaĵojn de la milito: gloraj bataloj por Francio malgraŭ niaj eraroj kaj malfeliĉoj. Kiam oni batalis sola kontraŭ ĉiuj popoloj de Eŭropo, – ĉiam unu kontraŭ du kaj kelkfoje tri – kaj ke fine oni cedas, ne pro la kuraĝo de la aliaj nek pro ilia genieco, sed pro perfido kaj la granda nombro, oni malpravus, se oni ruĝiĝus pro tiu malven-ko, kaj la venkintaj

malpravus ankoraŭ pli, se ili fierus pri tio. Ne la nombro konsistigas la grandecon de popolo aŭ de armeo, sed ĝia kuraĝo. Mi pensas tion en la sincereco de mia animo, kaj mi kredas, ke la honestaj homoj, en ĉiuj landoj de la tero pensas kiel mi.

Sed nun mi devas rakonti pri la mizeroj de la retiriĝo. Tio ŝajnas al mi la plej doloriga parto.

Oni diras, ke fido donas forton, kaj tio certe validas precipe por la francoj. Tiel longe ke ili marŝas antaŭen, tiel longe ke ili esperas forporti la venkon, ili estas unuigitaj kiel la fingroj de unu mano: la volo de la ĉefoj estas la leĝo por ĉiuj. Ili sentas, ke oni povos nur sukcesi per disciplino. Sed tuj kiam ili estas devigataj retroiri, ĉiuj havas fidon nur en si mem, kaj oni ne plu obeas komandojn. Tiam tiuj tiel fieraj viroj, – tiuj viroj kiuj fiere antaŭeniris al la malamiko por batali –, foriras, unuj dekstren, aliaj maldekstren, jen solaj, jen en grupoj. Kaj tiuj kiuj tremis ĉe ilia proksimiĝo, denove ekhavas kuraĝon. Komence ili antaŭeniras kun timo, sed vidante, ke okazas nenio al ili, ili fariĝas impudentaj. Ili impetas tri- aŭ kvarope la postrestantojn, kiel oni vidas la korvojn vintre fali sur povran vunditan ĉevalon, kiun ili ne estus kuraĝintaj rigardi je duonmeĵlo, kiam ĝi ankoraŭ povis paŝi.

Mi vidis tiujn aferojn... Mi vidis la mizerajn kozakojn – verajn ĉifonulojn kun malnovaj vestaĵoj pendantaj de la lumboj, malnova ĉapo de skrapita felo sur la oreloj, almozuloj, kiuj neniam razas sin, kovritaj de fiinsektoj, sidantaj sur maljunaj maldikaj ĉevalaĉoj sen seloj kun la piedoj en ŝnuroj servantaj kiel piedingoj, kaj malnova rustinta pistolo kiel pafilo kaj najlo ĉe la finaĵo de stako kiel lanco, – mi vidis tiujn almozulojn, kiuj similis al maljunaj, kadukaj flavaj hundoj, haltigi jen dek, jen dek kvin, jen dudek soldatojn kaj forkonduki ilin kiel ŝafojn!

Kaj la kamparanoj, tiuj grandaj mallertuloj, kiuj ankoraŭ tremis antaŭ kelkaj monatoj kva-zaŭ leporoj, kiam oni rigardis ilin oblikve... Nun mi vidis ilin trakti kun arogaj mienoj maljunajn soldatojn, kirasistojn, kanonistojn, dragonojn el Hispanio, virojn, kiuj povis renversi ilin per pugnobato. Mi aŭdis ilin aserti, ke ili ne havas panon por vendi, dum oni flaris la odoron de la forno en la ĉikaŭaĵo, kaj ke ili havas nek vinon, nek bieron, nek ion ajn, dum oni aŭdis la pokalojn tinti dekstre kaj maldekstre kiel la sonoriloj de iliaj vilaĝoj. Kaj oni ne kuraĝis skui ilin, ne kuraĝis konduki ilin al prudento, tiujn ĉifonulojn, kiuj ridis vidante nin retiriĝi, ĉar oni jam ne estis sufiĉe grandnombra, ĉar ĉiuj marŝis por si mem, jam ne rekonante la ĉefojn kaj perdinte disciplinon.

Kaj poste malsato, mizero, laceco, mal-sanoj, ĉio surfalis nin samtempe. La ĉielo estis griza, ne ĉesis pluvi, la aŭtuna vento mal-varmigis nin.

Kiel tiuj povraj rekrutoj, ankoraŭ sen lipharoj kaj tiom maldikiĝintaj, ke oni povis vidi la taglumon tralumi tra iliajn korpojn kiel tra lanternon. Kiel tiuj povraj estaĵoj povis rezisti tiom da mizeroj? Ili pereis je miloj. Oni vidis nur tion sur la vojo. La terura malsano, kiun oni nomas tifo, sekvis nin: Unuj diris, ke estas speco de pesto, generita de la mortigitoj, kiujn oni ne enterigis sufiĉe profunde; aliaj, ke tion kaŭzas la tro grandaj suferoj, kiuj superas la homajn fortojn. Mi scias nenion pri tio, sed la alsacaj kaj lorenaj vilaĝoj, kien ni alportis tifon, ĉiam memoros tion: el cent malsanuloj, dek aŭ dek du aŭ pli ne plu revenis!

Fine, ĉar necesas daŭrigi tiun malĝojigan historion, la vesperon de la 19-a ni bivakis apud Lutzen, kie la regimentoj reformiĝis, kiel ili povis. La morgaŭon, tre frue ekmarŝante al Weissenfels, ni devis pafi al la kelkaj vestfaloj, kiuj sekvis nin ĝis la vilaĝo Eglaystadt. La 22-an ni bivakis sur la taluso de Erfurt, kie oni donis al ni novajn ŝuojn kaj vestaĵojn. Kvin aŭ ses sendisciplinaj rotoj povis fari nenion pli ol spiri. Niaj novaj vestaĵoj kaj ŝuoj sidis al ni kiel tendoj, sed tio ne malhelpis, ke ni sentis la bonan varmon de tiuj vestaĵoj. Ni kredis revivi.

Necesis reekiri la 22-an mem, kaj la sekvantajn tagojn ni pasadis apud Gotha, Teitlebe, Eisenach kaj Saalmünster. La kozo-kaj observis nin de sur siaj ĉevalaĉoj. Kelkaj husaroj forpelis ilin, kaj ili savis sin kvazaŭ ŝtelistoj, sed ili revenis tuj poste.

Multaj kamaradoj havis la malbonan kutimon marodi la vesperon, kiam ili estis en bivako, kaj ili ofte kaptis ion. Sed la morgaŭon ĉiam mankis kelkaj el ili ĉe la apelo, kaj la sentineloj ricevis la ordonon pafi al tiuj kiuj foriĝis de la bivakejo.

Mi havis febron ekde nia foriro de Leipzig. Ĝi ĉiam kreskadis, kaj tage kaj nokte mi tremetadis. Mi fariĝis tiel malforta, ke mi povis apenaŭ ekstari matene por survojiĝi. Zebedeus rigardis min kun trista mieno kaj kelkfoje diris al mi:

«Kuraĝon, Josef, kuraĝon! Ni tamen reatingos nian landon.»

Tiuj vortoj revivigis min. Mi sentis min kvazaŭ fajro suprenirus al mia vizaĝo.

«Jes, jes, ni reatingos nian landon,» mi diris, «necesas, ke ni revidu nian landon.»

«Apogu sur mian brakon... Ni proksimiĝas nun ĉiutage, Josef... Dek kvin da etapoj, kio tio estas por ni?»

Li kuraĝigis min, sed mi jam ne havis la forton porti mian fusilon, ĝi ŝajnis peza al mi kiel plumbo. Mi jam ne povis manĝi, kaj miaj genuoj tremetadis. Malgraŭ tio mi ankoraŭ ne malesperis kaj diris al mi mem: «Estas nenio... Kiam vi vidos la sonorilturon de Falsburgo, via

febro malaperos. Vi havos sanigan aeron, kaj Trinel flegos vin... Vi vidos, ke ĉio iiros glate... kaj vi geedziĝos...»

Mi vidis aliajn, kiuj estis kiaj mi, kiuj postrestis survoje, sed mi estis tiel malsana, kiel ili...

Mi ankoraŭ ĉiam havis bonan fidon, kiam je tri mejloj de Fulda, sur la vojo al Saalmünster, dum halto, oni aŭdis, ke kvindek bavaroj venis kontraŭi nian retiriĝon kaj posteniĝis en la grandaj arbaroj, tra kiujn ni devis pasi. Tiu novaĵo donis al mi la lastan baton, ĉar mi jam ne sentis min sufiĉe forta por antaŭeniri, nek meti la bajoneton sur mian fusilon, nek defendi min per ĝi, kaj ke ĉiuj klopodoj por veni tiel for estis perditaj. Mi tamen faris ankoraŭ klopodojn, kiam oni ordonis nin marŝi, kaj mi provis ekstari.

«Nu, Josef,» diris al mi Zebedeus, «nu, Josef, kuraĝon!»

Sed mi jam ne povis iri plu kaj komencis singulti, kriante:

«Mi ne povas!»

«Stariĝu,» li diris.

«Mi ne povas... Dio mia... mi ne povas!»

Mi alkroĉiĝis al lia brako... Larmoj fluis laŭ lia longa nazo... Li provis porti min, sed li ankaŭ estis tro malforta. Tiam mi retenis lin, kriante:

«Zebedeus, ne forlasu min!»

Kapitano Vidal proksimiĝis, rigardante min malĝoje.

«Nu, filo,» li diris, «post duonhoro la ambu-

lancveturiloj estas pasontaj ... Oni prenos vin.»

Sed sciante, kion tio signifas, mi tiris Zebedeus inter miajn brakojn por premi lin kaj diris en lian oreilon:

«Aŭskultu, vi kisas Trinel anstataŭ mi... Promesu tion al mi! Vi diros al ŝi, ke mi mortis kizante ŝin, kaj ke vi portas al ŝi tiun adiaŭan kison!»

«Jes!...» li diris mallaŭte singultante, «Jes, mi diros tion al ŝi!... Ho, mia povra Josef!»

Mi jam ne povis ellasi lin. Li metis min teren kaj rapide foriris sen turni la kapon. La kolono malproksimiĝis... Mi longe rigardis ĝin, kiel oni rigardas la lastan esperon en la vivo, kiu foriras... La postrestantoj de la bataliono eniris en terfalon... Tiam mi fermis la okulojn, kaj nur horon poste mi estis vekita per la bruo de kanono kaj vidis gvardian divizion pasi sur la vojo per akcelitaj paŝoj kun furgonoj kaj artilerio. Sur la furgonoj mi vidis kelkajn mal-sanulojn; kaj mi kriis:

«Prenu min! Prenu min!»

Sed neniu atentis pri miaj krioj... Ili estis ĉiam ankoraŭ pasantaj, kaj la bruo de la kanonado kreskis. Pli ol dek mil viroj tiel pasadis, kavalerio kaj infanterio. Mi jam ne havis la forton krii.

Finfine la vosto de tiu ĉi trupo alvenis: mi rigardis la sakojn kaj ĉakojn foriĝi, ĝis ĝi malaperis en valetu, kaj mi estis kuŝiĝonta por

ĉiam, kiam mi aŭdis ankoraŭ grandan bruon sur la vojo. Estis kvin aŭ ses kanonoj, kiuj galopadis, tirataj de fortaj ĉevaloj, dum la kanonistoj marŝis dekstre kaj maldekstre de ili, la sabron en la dekstra mano. Post ili venis municiaĉaroj. Mi ne plu esperis je helpo de tiuj ĉi ol de la aliaj, sed tamen mi rigardis ilin, kiam flanke de unu el la kanonoj mi vidis alprok-simiĝi grandan, maldikan ruĝflavan, dekora-ciitan kavalerian serĝenton, kaj mi rekonis Zimmer, mian maljunan kamaradon de Leipzig. Li preteriris sen rekoni min, sed tiam per ĉiuj foroj mi ekkriis:

«Kristian!... Kristian!...»

Kaj malgraŭ la bruado de la kanonoj li haltis, turniĝis kaj ekvidis min ĉepiede de arbo. Li malfermis grandajn okulojn.

«Kristian,» mi kriis, «kompatu min!»

Tiam li revenis, rigardis min kaj paliĝis:

«Kiel do, ĉu estas vi, mia bona Josefel?» li diris, saltante de sia ĉevalo.

Li prenis min sur siaj brakoj kvazaŭ infanon, kriante al la viroj kiuj kondukis la lastan furgonon:

«Halt! Halt!»

Kaj kisante min, li metis min sur la furgonon, la kapon sur sakon. Mi ankaŭ vidis, kiel li sternis grandan kavalerian mantelon sur miajn kruojn kaj piedojn, dirante:

«Nu... Ek!... Estas varme tie for!»

Estas ĉio kion mi memoras, ĉar tuj poste mi perdis ĉiun senton. Ŝajnas al mi, ke mi bone aŭdis bruon kvazaŭ fulmotondron, kriadon, komandojn, kaj eĉ ke mi vidis defili kontraŭ la ĉielo la suprojn de altaj piceoj meze de la nokto. Sed ĉio ĉi estis por mi kvazaŭ sonĝo. Certa estas, ke post Saalmünster, en la arbaroj de Hanau, en tiu tago estis liverita granda batalo kontraŭ la bavaroj, kaj ke oni pasis sur iliaj ventroj.

XXII

La 14-an de januaro 1814, du monatojn kaj duonon post la batalo apud Hanau, mi vekigis en bona lito en malgranda varma ĉambro. Rigardante la trabojn de la plafono super mi, tiam la malgrandajn fenestrojn, sur kiuj la prujno etendis sian blankajn garbetojn mi diris al mi: "Estas vintro." Samtempe mi aŭdis bruon kvazaŭ de kanono, kiu tondras, kaj la kraketaĉon de la fajro en fajrejo. Kelkjan momentojn poste mi turnis la kapon kaj vidis junan virinon, sidantan ĉe la fajrejo, la manojn krucitajn sur la genuoj, kaj mi rekonis Trinel. Mi ankaŭ rekonis la ĉambron; kie mi pasigis tiel agrablajn dimanĉojn antaŭ ol foriri al la milito. Nur pro la bruado

de la kanono, kiu revenis de minuto al minuto, mi timis ankoraŭ sonĝi.

Longe mi rigardis Trinel, kiu ŝajnis al mi tre bela. Mi pensis: «Kie do estas onklino Gredel? Kiel mi revenis hejmen? Ĉu Trinel kaj mi jam geedziĝis? Dio mia! Se nur tio ĉi ne estas sonĝo!» Tiam ŝi turnis la kapon kaj ekkriis:

«Josef, ĉu vi rekonas min?»

«Jes,» mi diris al ŝi, etendante manon.

Ŝi proksimiĝis tute tremante kaj mi longe ĉirkaŭbrakis ŝin. Ni singultis kune.

Kaj ĉar la kanono rekomencis tondri, tio subite ŝrumpigis mian koron.

«Kion mi aŭdas, Trinel?» mi demandis.

«La kanono de Falsburgo,» ŝi respondis, ĉirkaŭbrakante min pli forte.

«La kanono de Falsburgo?»

«Jes, la urbo estas sieĝata.»

«Ĉu Falsburgo?... La malamikoj estas do en Francio!...»

Mi ne povis diri unun plian vorton... Do tiom da suferoj, tiom da larmoj, du milionoj da viroj oferitaj sur la batalkampoj, ĉio ĉi havis nur kiel rezulton, ke nia patrio estis invadita!... Dum pli ol horo, malgraŭ la ĝojo, kiun mi spertis esti hejme kaj teni inter miaj brakoj la knabinon, kiun mi amis, tiu terura penso ne forlasis min unu sekundon, kaj eĉ hodiaŭ, kvankam mi estas nun maljuna kaj blankhara, ĝi revenas al

mi kun amareco... Jes, ni maljunuloj, vidis ĉion ĉi, kaj estas bone, ke la junuloj sciu tion: ni vidis la germanojn, aŭstrojn, prusojn, rusojn, hispanojn kaj anglojn kiel mastroj de Francio, teni garnizonon en niaj urboj, preni el niaj fortresoj ĉion kio plaĉis al ili, insulti niajn soldatojn, ŝanĝi nian flagon kaj dividi inter si ne nur niajn konkeritaĵojn ekde 1804, sed ankaŭ tiujn de la Respubliko. Tio estis alta prezo por dek jaroj da gloro!

Sed ni ne plu parolu pri tiuj aferoj. La estontece juĝos pri ili. Ĝi diros, ke post Lutzen kaj Bautzen la malamikoj ofertis al ni lasi al ni Belgion, parton de Holando, la tutan maldekstran bordon de Rejno ĝis Bazelo, kun Savojo kaj la reĝlando Italio, kaj ke la imperiestro rifuzis akcepti tiujn kondiĉojn, kiuj tamen estis tre belaj, ĉar li metis sian orgojlon super la feliĉeco de Francio.

Por reveni al mia historio, dek kvin tagojn post la batalo apud Hanau miloj da ĉaroj ŝarĝitaj per vunditoj kaj malsanuloj defilis sur la vojo de Strasburgo al Nancy. Ili etendiĝis en unu sola vico de la mezo de Alsaco ĝis en Loreno.

Onklino Gredel kaj Trinel, starante en sia pordo, rigardis preteriri tiun malĝojigan konvojon. Mi ne bezonas priskribi aliajn pensojn! Pli ol ducent ĉaroj jam pasis, kaj mi estis nur neniu el ili. Miloj da patroj kaj patrinoj, alkurintaj de dudek mejloj en la rondo, venis rigardi tiujn

**FINO DE "KONSKRIPTO DE 1813",
LA UNUA PARTO DE
"SOLDATO DE NAPOLEONO"**

ĉarojn... Kiom da ili reiris al sia hejmo, ne trovinte sian infanon!

La trian tagon Trinel rekonis min sur unu el la korboveturiloj en la ĉirkaŭaĵo de Mainz, meze de pluraj aliaj mizeruloj kiel mi, la vangojn kavigintajn, la haŭton algluiĝintan kontraŭ la ostoj, mortantan pro malsato kaj febro.

«Estas li!... Estas Josef!» ŝi ekkriis de fore.

Sed neniu volis kredi tion. Necesis, ke onklistro Gredel longe rigardu min antaŭ ol diri:

«Jes, jes, estas li!... Ni eligu lin de tie... Estas nia Josef!»

Ŝi transportis min al sia domo kaj maldormis apud mi tage kaj nokte. Mi deziris nur akvon kaj mi ĉiam kriis: «Akvo! Akvo!» Neniu en la vilaĝo kredis, ke mi rekonsciĝos. Sed la feliĉo spiri la aeron de mia lando kaj la espero revidi tiujn kiujn mi amas, savis min.

Ĉar mi ankoraŭ ĉiam estis soldato, Trinel kaj mi ne rajtis geedziĝi. Mi reprenis mian laboron ĉe sinjoro Gulden, kiu amis nin kvazaŭ ni estus siaj infanoj. Li transdonis al mi la duonon de sia komerco, kaj mi plu loĝis en lia domo. Sed ĉiudimance mi iris al Quatre-Vents viziti Trinel kaj onklinon Gredel.

Finfine la militoj finiĝis. La aliancanoj reiris al siaj respektivaj landoj etapon post etapo, imperiestro Napoleono estis ekzilita al la insulo Elbo, kaj reĝo Ludoviko XVIII, frato de Ludoviko XVI, donis al ni sufiĉan liberecon. Estis denove la bona tempo de la juneco, la tempo de amo, la tempo de laboro kaj paco. Oni povis esperi je la estonteco, oni povis kredi, ke ĉiu, se li bone kondukus kaj ŝparus, atingus bonan pozicion, akirus la estimon de la honestaj homoj sen timi esti reprenita de la konskripcio ĝis sep kaj eĉ ok jarojn post la restaŭrado de le reĝeco.

Sinjoro Gulden ne estis kontenta revidi niajn eksajn reĝojn kaj nobelojn, sed li tamen kredis, ke ili sufiĉe suferis en fremdaj landoj por kompreni, ke ili ne estas solaj en la mondo, kaj devas respekti niajn rajtojn. Li ankaŭ kredis, ke imperiestro Napoleono havos la prudenton teni sin trankvila en sia insulo... Sed li eraris: la Burbonoj estis revenintaj kun siaj malnovaj ideoj, kaj la imperiestro atendis nur la bonan momenton de sia venĝo.

Ĉio ĉi estis alportonta al ni ankoraŭ multajn mizerojn, kaj mi rakontus ilin al vi kun plezuro, se tiu historio ne ŝajnus iom tro longa al mi. Do ni haltas ĉi tie ĝis nova avizo. Se prudentaj homoj diros al mi, ke mi agis bone, priskribante mian militiron de 1813, kaj ce tio povas ilumini la junecojn de la vanecojn de la militista gloro kaj montri al ĝi, ke oni estas neniam pli feliĉa ol en paco, libereco kaj laboro, nu, tiam mi eble reprenos la sekvon de tiuj ĉi eventoj kaj rakontos al vi mian travivaĵojn en Waterloo!

SOLDATO DE NAPOLEONO

DUA PARTO:

WATERLOO

I

Mi neniam vidis ion tiel ĝojiga kiel la reveno de Ludoviko XVIII en 1814. Estis printempo kaj floris la heĝoj, ĝardenoj kaj fruktarbaroj. Oni havis tiom da mizeroj dum multaj jaroj, tiom da fojoj oni timis, ke oni estos prenita de la konskripcio kaj ne plu revenos hejmen, oni estis tiel laca de ĉiuj tiuj bataloj, tiu tuta gloro, ĉiuj tiuj konkeritaj kanonoj, ĉiuj tiuj *Te Deum*-oj, ke oni deziris nur vivi en paco, ĝui ripozon, akiri iom da bonfarto kaj eduki honeste siajn infanojn per laboro kaj bona konduto.

Jes, ĉiuj estis kontentaj escepte de la maljunaj soldatoj kaj skerminstruistoj. Mi memoras, ke la 3-an de majo, kiam alvenis la ordono hisi la blankan flagon sur la preĝejo, la tuta urbo tremis de timo pro la soldatoj de la garnizono, kaj ke necesis doni ses *louis d'or* al Nikolaus Passauf, la ardezisto, por plenumi tiun heroecan agon. Oni vidis lin de ĉiuj stratoj supreniranta kun sia flago de blanka silko kun la lilio, kaj de ĉiuj fenestroj de la du kazernoj la kanonistoj de la mararmeo pafis al li. Passauf tamen plantis la flagon, descendis kaj kaŝis sin en la garbotenejo de Trois-Maisons, dum la maristoj serĉis lin en la urbo por mortigi lin.

Tiel kondukis la homoj. Sed la laboristoj, kamparanoj kaj burĝoj amase kriadis: «Vivu la paco! For la konskripcio kaj la unuigitaj rajtoj!» Ĉar ĉiuj estis lacaj vivi kiel birdoj sur branĉoj kaj rompi al si la ostojn pro aferoj kiuj ne koncernis ilin.

Oni ja prave pensas, ke meze de tiu granda ĝojo mi estas la plej feliĉa. Aliaj ne havis la bonŝancon eskapi el la teruraj bataloj apud Weissenfelz, Lutzen, Leipzig kaj al la tifo. Mi konis la gloron, kaj tio igis min ankoraŭ pli ŝati pacon kaj abomeni la konskripcion.

Mi estis reveninta ĉe patron Gulden, kaj mian tutan vivon mi memoros la manieron, kiel li ricevis min. Mian tutan vivon mi aŭdos lin ekkrii, disetendante antaŭ mi siajn brakojn:

«Ĉu estas vi, Josef?... Ha, mia kara filo, mi jam kredis vin pereinta!»

Ni ploris, ĉirkaŭbrakante unu la alian. Kaj ekde tiam ni vivis kune kiel du veraj amikoj. Li

igis min rakonti milfoje niajn batalojn kaj nomis min ridante sia maljuna soldato.

Tiam li rakontis al mi la blokadon de Falsburgo: kiel la malamikoj alvenis antaŭ la urbo en januaro; kiel la veteranoj de la Respubliko, restintaj solaj kun kelkcent kanonistoj de la mararmeo, rapidis hisi la kanonojn sur la remparojn; kiel necesis manĝi ĉevalaĵon pro manko de vivrimedoj kaj rompi la fornojn de la burĝoj por fari el ili mitrajlon. Patro Gulden, malgraŭ siaj sesdek jaroj, estis kanondirektisto sur la bastiono de la pulvejo apud Bichelberg, kaj mi imagis lin kun lia ĉapo el nigra silko kaj liaj okulvitroj, direktanta grandan kanonon de dek kvar. Tio igis nin ridi ambaŭ kaj helpis nin pasigi la tempon.

Ni reprenis niajn antaŭajn kutimojn. Mi pretigis la tablon kaj kuiris la manĝojn. Mi ankaŭ reokupis mian ĉambreton, revante pri Trinell tage kaj nokte. Tio estis alia afero ol timi la konskripcion kiel en 1813. La homoj neniam estas tute feliĉaj. Ĉiam estas mizeroj, kiuj turmentas ilin. Kiom da fojoj mi ne vidis tion en mia vivo! Fine, jen kio ĉagrenis min.

Vi scias, ke mi deziris edziĝi al Trinell. Ni interkonsentis pri tio, kaj onklino Gredel ne demandis ion alian. Malfeliĉe oni jes maldungis la konskriptojn de 1815, sed tiuj de 1813 ĉiam restis soldatoj. Jam ne estis tiel danĝere esti soldato kiel dum la Imperio. Multaj el tiuj kiuj retiriĝis en siajn vilaĝojn, trankvile vivis tie sen vidi alveni la ĝendarmojn. Sed tio ne malhelpis ke, por povi edziĝi, mi bezonis permeson. La nova urbestro, sinjoro Jourdain, neniam enskribus min en la geedziĝan registron sen tiu permeso, kaj jen kio maltrankviligis min.

Tuj post la malfermo de la pordegoj, patro Gulden skribis al la ministro de milito, kiu nomiĝis Dupont, ke mi troviĝas en Falsburgo, ankoraŭ iomete malsana, ke mi lamas ekde mia naskiĝo, sed ke oni tamen prenis min kiel konskripton, ke mi estis malbona soldato, kiu fariĝos tre bona familipatro, ke estus vera torturo malhelpi min edziĝi – ĉar oni neniam vidis viron pli malbone konstruita nek pli mankohava –, ke necesis kuŝigi min en hospitalon ktp.

Estis tre bela letero, kiu ankaŭ diris la veron. Nur la penso reforiri estus malsaniginta min.

Fine, de tago al tago ni – tio estas onklino Gredel, patro Gulden, Trinell kaj mi – atendis la respondon de la ministro. Oni ne povas imagi, kiom da malpacienco mi havis, kiam la leterportisto Braunstein, la filo de la sonorigisto, pasis tra la strato. Mi aŭdis lin veni de duonmejlo. Tio maltrankviligis min, sed mi povis fari nenion alian ol apogi min tra la fenestro. Mi rigardis lin eniri en ĉiujn domojn, kaj kiam li haltis iom tro longe, mi ekkriis en mi mem: «Kial do li babilas tiel longe? Ĉu li ne povus doni sian

leteron kaj tuj reeliri? Li estas vera babilaĉemulino, tiu filo de Braunstein!» Mi ekmalŝatis lin, mi eĉ kelfoje descendis kaj kuris renkonte al li, demandante:

«Ĉu vi havas ion por mi?»

«Ne, sinjoro Josef, ne: mi havas nenion por vi,» li diris, rigardante siajn leterojn.

Tiam mi revenis tre malĝoja, kaj patro Gulden, kiu vidis min, ekkriis:

«Infano! Infano! Nu, iom da pacienco, diable! La letero venos... La letero venos... Ni estas en tempo de milito!»

«Sed li estus povinta respondi dekfoje, sinjoro Gulden.»

«Ĉu vi kredas ke li devas solvi nur vian problemon? Li ricevas centojn da tiaj leteroj ĉiutage. Ĉiu ricevos sian respondon laŭvice, Josef. Cetere ĉio estas nun en malordo. Nu, nu, ni ne estas solaj en la mondo. Multaj aliaj bravaj junuloj kiuj volas edziĝi, atendas sian permeson.»

Mi trovis siajn kialojn bonaj, sed mi kriis en mi mem: «Ha! Se tiu ministro scius, kian ple-zuron li povos fari al ni, skribante du vortojn, mi certas, ke li tuj skribus. Kiel ni benus lin, Trinel kaj mi, kaj onklino Gredel kaj ĉiuj amikoj kaj konatoj!» Nu, necesis ankoraŭ ĉiam atendi!

Oni povas esti certa, ke la dimanĉojn mi estis repreninta mian kutimon iri al Quatre-Vents, kaj en tiuj tagoj mi ellitiĝis tre frue. Mi ne scias, kio vekis min. Mi kredis ankoraŭ esti soldato, kaj tiu penso malvarmigis min. Tiam mi malfermis la okulojn kaj rigardis la plafonon, pensante: «Vi estas ĉe patro Gulden en Falsburgo, en via eta ĉambro. Hodiaŭ estas dimanĉo kaj vi iros al Trinel!» Tiu penso tute vekis min. Mi jam vidis Trinel kun ŝiaj rozkoloraj vangoj, bluaj okuloj kaj blondaj haroj. Mi estus volinta tuj ellitiĝi, vesti min kaj foriri, sed la horloĝo sonis la kvaran horon: la pordegoj de la urbo estis ankoraŭ fermitaj.

Necesis resti: tiu malrapidigo multe tedis min. Por pasigi la tempon, mi pensis pri nia amo ekde la komenco. Mi imagis la unuajn tempojn: la timo pro la konskripcio, la malbona numero, la dokumento 'Bona por la Militoservo' de la maljuna ĝendarmo Werner en la urbo-domo, la foriro, la vojo, Mainz, la strato de la Kapucenoj, la bona virino kiu banis miajn piedojn, pli for Frankfurt kaj Erfurt, kie mi ricevis la unuan leteron du tagojn antaŭ la batalo kontraŭ la rusoj kaj la prusoj, ĉio... Kaj mi ploris en mi mem. Mia penso tamen ĉiam revenis al Trinel. La kvina horo sonis. Timigite mi saltis el la lito, lavis, razis kaj vestis min, kaj patro Gulden, ankoraŭ malantaŭ siaj longaj kurtenoj, la nazon en la aero, diris al mi:

«He! Mi aŭdas vin. Ĉu vi ne plu povas dormi? Jam pli ol duonhoron vi turnadas vin. Ha jes, estas dimanĉo hodiaŭ.»

Tio igis lin ridi, kaj mi ankaŭ ridis, salutante lin, kaj rapide malsupreniris la ŝtuparon.

Malmultaj homoj jam estis sur la strato. La buĉisto Sepel ĉiufoje kriis al mi:

«He, Josef, venu do, mi devas rakonti ion al vi.»

Sed mi eĉ ne turnis la kapon, kaj du minutojn poste mi jam estis sur la granda vojo al Quatre-Vents, ekstere de la avanceo kaj la taluso. Ha! Kia bela vetero! Kia bona jaro! Kiel ĉio verdiĝis kaj floris, kaj kiel la homoj rapidis por regajni la perditan tempon, planti siajn brasikojn kaj napojn, turni la teron, pied-premitan de la kavalerio! Kiel oni reprenis kura-ĝon, kiel oni esperis je la boneco de Dio, la suno kaj la pluvo, kiujn oni multe bezonis!

Laŭlonge de la vojo, en la malgrandaj ĝardejoj, virinoj, maljunuloj, ĉiuj fosadis, laboris kaj kuris kun akvumilo.

«He, patro Thiébeau,» mi kriis, «he, patrino Fürst, kuraĝon, kuraĝon!»

«Jes, jes, sinjoro Josef, vi pravas, necesas esti kuraĝa. Tiu blokado malrapidigis ĉion: ni ne povas perdi tempon.»

Kaj la ĉarumoj kaj ĉaroj plenaj je brikoj, tegoloj, tabuloj, traboj, tabulegoj, kiel ĉio ĉi ruliĝadis tre frue al la urbo por rekonstrui la domojn kaj ripari la tegmentojn, detruitajn de la obusoj! Kiel klakadis la vipoj kaj resonis la martelfrapoj for en la kamparo! Ĉie oni vidis ĉarpentistojn kaj masonistojn okupitajn ĉirkaŭ laŭboj. Patro Ulrich kaj liaj tri filoj jam estis sur la tegmento de *la Florkorbo*, forblovita de la urbaj kugloj, muntante la novan tegmentan ĉarpentaĵon. Oni aŭdis ilin fajfi kaj frapi en kadenco. Ha jes, estis la tempo de aktivado, ĉar la paco estis reveninta. Ne tiam oni redemandis militon, ne, ne! Ĉiuj sciis, kion valoras trankvileco hejme. Ĉiuj deziris kiom eble plej baldaŭ ripari ĉiujn damaĝojn kaj forgesi ĉiujn mizerojn. Oni sciis, ke labori per segilo aŭ rabotilo valoras pli ol pafi per kanono. Oni sciis, kiom da penoj, larmoj kaj laceco oni devas suferi por restarigi en dek jaroj, kion bomboj renversis en du minutoj.

Kaj kiel ĝoje mi tiam kuris! Ne plu marŝoj, ne plu kontraŭmarŝoj! Mi ja sciis, kien mi iras sen ricevi ordonojn de serĝento Pinto. Kaj la alaŭdoj, kiuj supreniris al la ĉielo, trilante, kaj la koturnoj kaj perdrikoj! Dio en la ĉielo, oni estas juna nur unufoje! Kaj la bona matena freŝeco, la bona odoro de la eglanterioj laŭlonge de la heĝoj, kaj la pinto de la malnova tegmento en Quatre-Vents, la malgranda kameno, kiu fumas. «Estas Trinel, kiu ekbruligas fajron. Ŝi preparas nian kafon...» Ha! Kiel mi kuris! Fine mi alvenas en la vilaĝo, mi paŝadis iomete malpli rapide por respiri, kaj mi rigardis tiujn malgrandajn fenestrojn, ridante anticipe. La pordo malfermiĝis kaj onklino Gredel, ankoraŭ en lana

jupo, kun granda balailo en la mano, returnis sin. Mi aŭdis ŝin krii:

«Trinel, jen li estas! ...»

Preskaŭ samtempe Trinel, ĉiam pli bela, en sia malgranda blua kufo, alkuris.

«Ha, estas bone... estas bone... Mi atendis vin.»

Kiel feliĉa ŝi estis ! Kaj kiel mi kisis ŝin ! Ha! Vivu la juneco! Ĉion ĉi mi ankoraŭ vidas. Mi eniris la malnovan ĉambron kun Trinel, kaj onklino Gredel, levante sian balailon, ekkriis kun entuziasma mieno:

«Ne plu konskripcio... Estas finite !»

Ni plenkore ridas, oni sidigas min, kaj dum Trinel rigardas min, la onklino rekomencas:

«Nu, ĉu tiu fripona ministro ankoraŭ ne skribis? Ĉu do li neniam skribos? Ĉu li prenas nin por bestoj? La antaŭa moviĝis tro, kaj tiu ĉi moviĝas nesufiĉe! Estas tamen tede, ke oni ĉiam devas atendi por ekhavi sian rajton. Vi jam ne estas soldato, ĉar oni forlasis vin kvazaŭ mortinta. Estas ni kiuj savis vin, vi jam ne koncernas ilin.»

«Sendube, vi pravas, onklino Gredel,» mi diris al ŝi, «sed ni ne povos geedziĝi, se ni ne iros al la urbodomo, kaj se ni ne iros al la urbodomo, la pastro ne kuraĝos geedzigi nin en la preĝejo.»

Tiam la onklino fariĝis tre serioza kaj fine diris:

«Vi vidas, Josef, tiuj homoj, de la unua ĝis la lasta, bone aranĝas ĉion por si mem. Sed kiu pagas la ĝendarmojn kaj juĝistojn? Kiu pagas la pastrojn? Ni! Nu, ili tamen ne kuraĝas nur geedzigi nin. Estas abomenel! Se tio daŭros, ni iros geedziĝi en Svislando.»

Tiuj vortoj trankviligis nin iomete, kaj ni pasigis la reston de la tago, kantante kaj ridante !

II

Meze de tiu granda malpacienco mi vidis ĉiutage novajn aferojn, kiuj revenas nun al mi kvazaŭ vera komedio, kiun oni ludis sur la vendoplaco: mi vidis la urbestrojn, la skabe-nojn kaj la komunumajn konsilantojn, la gren- kaj lignokomercistojn, la arbargardistojn kaj la vilaĝpolicianojn, tiujn ĉiujn homojn, kiujn oni rigardis jam dek jarojn kiel la plej bonajn amikojn de imperiestro Napoleono, kaj kiuj estis eĉ tre severaj, kiam oni diris vorton kontraŭ Lia Imperiestra Moŝto. Mi vidis ilin jen en la kovrita vendejo, jen sur la vendoplaco, jen aliloke

⁴⁹ La jakobenoj estis fervoraj respublikanoj de la unua horo, kiuj pruntis sian nomon de la abatejo Sankta-Jakobo, kie ili kunvenis. Ili estis kontraŭ ĉiuj religioj kaj kontraŭ regeĉo.

kriantaj kontraŭ la tirano, kontraŭ la uzurpinto kaj antropofago el Korsiko. Oni estus dirinta, ke Napoleono faris al ili multan mal-bonon, dum ili kaj iliaj familioj ĉiam tenis la plej bonajn lokojn.

Mi ofte pensis ekde tiam, ke tiamaniere oni sukcesas ĉiam teni la bonajn lokojn sub ĉiuj registaroj, kaj malgraŭ tio, mi estus hontinta krei kontraŭ tiuj kiuj ne povas respondi vin kaj kiujn oni milfoje flatis. Mi estus preferinta resti malriĉa laborante ol fariĝi riĉa kaj grava per tiu rimedo. Jen kiaj estas la homoj!

Mi devas ankaŭ rekoni, ke nia antaŭa urbestro kaj tri aŭ kvar konsilantoj ne sekvis tiun ekzemplon. Sinjoro Gulden diris, ke alme-naŭ tiuj ĉi respektis sin mem, kaj ke tiuj kriaĉantoj ne havas honoron.

Mi memoras eĉ, ke iutage la urbestro de Hacmatt, veninte riparigi sian veŝthorloĝon ĉe ni, komencis tiel fervore paroli kontraŭ la imperiestro, ke patro Gulden diris al li:

«Jen, sinjoro Michel, via horloĝo. Mi ne volas labori por vi. Kiel do!... Kiel do!... Vi, kiu ankoraŭ lastjare diris: 'La granda viro!' kaj kiu neniam povis nomi Bonaparte simple impe-riestro, sed ĉiam diris: 'La Imperiestro kaj Reĝo, Protektanto de la Helveta Konfederacio', kvazaŭ vi havis la buŝon plena je kaĉo, vi nun krias, ke li estas antropofago, kaj vi nomas Ludovikon XVIII 'Ludoviko la Multe-Amata!' Vi devus ruĝiĝi! Vi do prenas la homojn por brutoj. Ĉu vi kredas, ke ili ne havas memo-ron?»

Tiam la alia respondis:

«Oni ja vidas, ke vi estas maljuna ĵakobeno⁴⁹.»

«Kio mi estas, koncernas neniun,» diris patro Gulden, «sed ĉiukaze mi ne estas fiflatulo.»

Li estis tute pala kaj finfine ekkriis:

«Nu, sinjoro Michel, friponoj ĉiam restas friponoj sub ĉiuj registaroj.»

Tiun tagon lia indigno estis tiel granda, ke li preskaŭ ne povis labori, ekstarante ĉiuminute kaj kriante:

«Josef, tiu aro da friponoj jam estus naŭzinta min de la Burbonoj⁵⁰, se mi estus ŝatinta ilin. Estas tiuspecaj homoj kiuj fuŝas ĉion, ĉar ili aprobas ĉion, trovas ĉion bela, belega kaj vidas neniam ie mankojn. Ili levas la manojn al la ĉielo kun krioj de admiro, kiam la reĝo tudas. Fine ili volas havi sian parton de la kuko. Kaj kiam la reĝoj kaj imperiestroj, ofte aŭdante ilin tiel ekstazi, kredas sin dioj kaj okazigas revolucion, tiuj friponoj forlasas ilin kaj reko-mencas la saman komedion sub la sekvanta. Tiumaniere ili ĉiam restas supre, dum la honestaj homoj ĉiam restas en mizero !»

⁵⁰ Nomo de la dinastio de la francaj reĝoj ekde Henriko IV de Burbono (1553-1610)

Tio okazis komence de la monato majo, en la tempo kiam oni afiŝis kontraŭ la urbodomo, ke la reĝo ĵus faris sian solenan eniron en Parizon meze de la marŝaloj de la Imperio, «ke la plej granda parto de la loĝantaro rapidis renkonte al li, ke maljunuloj, virinoj kaj infanoj grimpis sur la balkonojn, kaj ke li unue eniriis la preĝejon Notre-Dame por danki la Sinjoron kaj nur poste sian palacon la Tuileries.»

Oni afiŝis ankaŭ, ke la senato havis la honoron prononci belegan paroladon, dirante, ke li ne devas timiĝi pro la granda malordo, ke li devas preni kuraĝon, kaj ke la senatanoj helpos lin eliri el la embaraso. Ĉiuj aprobis tiun paroladon.

Sed iom da tempo poste ni ĝuis novan spektaklon. Ni revidis la elmigrintojn reveni el Germanio kaj Rusio. Ili alvenis, unuj sur kampulaj ĉaroj sen risortoj aŭ rimenoj, aliaj en simplaj korboĉaroj, kiuj estas speco de ĉaroj plektitaj el salikbranĉetoj kun du aŭ kvar radoj. La damoj surhavis tre larĝajn robojn kaj la viroj preskaŭ ĉiuj la malnovan francan nobelan veston: malgrandan kuloton, longan veŝton, kiu falis sur la sidvangoj, kiel oni prezentis ilin sur bildoj antaŭ la Revolucio.

Ĉiuj ĉi homoj ŝajnis fieraj kaj ĝojaj: ili estis kontentaj reveni en sian landon.

Malgraŭ la maljunaj ĉevalaĉoj, kiuj tiris la ĉarojn, malgraŭ la mizeraj veturiloj plenaj je pajlo kaj la kampuloj, kiujn ili igis grimpi sur la antaŭaĵon kiel postiljonojn, malgraŭ ĉio ĉi, tio emociis min. Mi memoris la ĝojon, kiun mi spertis kvin monatojn antaŭe, kiam mi revidis Francion, kaj mi diris al mi: «Povraj homoj, kiom ili ploras revidante Parizon, kiel feliĉaj ili estos!»

Ĉar ili haltis antaŭ *la Ruĝa Bovo*, la hotelo de la antaŭaj ambasadoroj, marŝaloj, princoj, dukoj kaj de ĉiuj tiuj riĉuloj kiuj ne plu venis, oni vidis ilin en la ĉambroj kombantaj, vestantaj kaj razantaj sin. Je la tagmezo ĉiuj malsupreniris, kriante kaj vokante: «Jean! Claude! Germain!» kun malpacienca ordonante kiel granduloj kaj eksidante ĉirkaŭ grandajn tablojn, dum staris malantaŭ ili iliaj maljunaj mizeraspektaj servistoj kun tablotuko sur la brako. Sed tiuj homoj en siaj vestaĵoj de la Malnova Reĝimo, kun sia gajaj mienoj kaj belaj manieroj tamen faris bonan impreson. Oni diris: «Jen francoj kiuj revenas de forege. Li malpravus, forirante kaj ekscitante Eŭropon kontraŭ ni. Sed pardonon por ĉiuj pekoj. Ili estu feliĉaj, ili fartu bone.» Tio estas la tuta malbono kiun oni deziris al ili.

Iuj el tiuj elmigrintoj alvenis en diliĝenco. Tiam nia nova urbestro, sinjoro Jourdain, kavaliro de sankta Ludoviko, sinjoro pastro Loth kaj la nova loka komandanto, sinjoro Robert de la

Faisanderie, en plena brodita uniformo, atendis ilin antaŭ la krado. Kiam la vipbatoj resonis sur la remparoj, ili avancis kun ridanta mieno, kvazaŭ okazus al ili granda feliĉo, kaj kiam la veturilo haltis, la komandanto kuris malfermi ĝin, eligante kriojn de entuziasmo. Kelkfoje pro respekto ili tute ne movi-ĝis, kaj mi vidis, ke tiuj homoj salutis sin malrapide, grave, unufoje, dufoje, trifoje, prok-simiĝante unuj al la aliaj ĉiufoje iom pli.

Patro Gulden post siaj kurtenoj diris, ride-tante:

«Vi vidas, Josef, tio estas la granda homspeco, la nobela homspeco de la Malnova Reĝimo. Rigardante nur tra la fenestroj, ni povas lerni belajn manierojn por apliki ilin, kiam ni estos dukoj aŭ princoj.»

Aliffoje li diris:

«Tiuj nobelaj maljunuloj, Josef, pafis al ni de siaj linioj apud Wissembourg. Ili estas bonaj kavalerianoj. Ili kuraĝe batalis, kiel batalas ĉiuj francoj: ni tamen bonvenigas ilin.»

Li okulumis kaj reeklaboris, tute gaja.

Sed la geservistoj de la *Ruĝa Bovo* distastigis la famon, ke tiuj homoj ne hontis diri inter si, ke ili fine venkis nin, ke ili estas niaj mastroj, ke reĝo Ludoviko XVIII ĉiam regis ekde la morto de Ludoviko XVII⁵¹, la filo de Ludoviko XVI, ke ni estas ribeluloj kaj ke ili venis ordigi nin. Malbonhumora, Patro Gulden diris al mi:

«Tio iros malbone, Josef! Ĉu vi scias, kion tiuj homoj faros en Parizo? Ili repostulos siajn kastelojn, arbarojn, parkojn, lagetojn, pensiojn, sen paroli pri altaj postenoj, grandaj honoroj kaj ĉiuspeca respekto. Vi trovas iliajn vestaĵojn kaj perukojn tre malmodernaj: nu, iliaj ideoj estas ankoraŭ pli malmalmodernaj ol iliaj vestaĵoj kaj perukoj! Tiuj homoj estas pli danĝeraj por ni ol la rusoj kaj aŭstroj, ĉar la rusoj kaj aŭstroj foriris, sed tiuj ĉi restos. Ili volas detrui ĉion kion ni konstruis ekde dudek kvin jaroj. Vi vidas kiel fieraj ili estas! Multaj el ili tamen vivis en la plej granda mizero trans Rejno. Sed ili kredas, ke ili apartenas al alia raso ol ni, al supera raso. Ili kredas, ke la popolo ankoraŭ ĉiam pretas lasi sin tondi kiel antaŭ 1789. Oni diras ke Ludoviko XVIII havas prudenton, tiom pli bone por li! Ĉar se li havos la malfeliĉon aŭskulti tiujn homojn, se oni nur divenas, ke li kapablas sekvi iliajn konsilojn, ĉio estos pereonta. Estos milito kontraŭ la nacio. La popolo pripensis ĉion tiujn dudek kvin jarojn, ĝi konas siajn rajtojn, ĝi scias, ke unu homo ne pli valoras ol la alia, kaj ke ĉiuj nobelaj rasoj estas ŝercoj. Ĉiu volas gardi sian kampon, ĉiu volas egalajn rajtojn, ĉiu volas defendi sin ĝismorte.»

⁵¹ Filo de Ludoviko XVI kiu mortis kiel juna knabo en prizono dum la Revolucio.

Jen kion diris al mi patro Gulden. Kaj ĉar la permeso ne alvenis, mi pensis, ke la ministro ne havas la tempon respondi nin kun ĉiuj ĉi dukoj, grafoj, kastelgrafoj kaj markizoj sur lia dorso, kiuj repetis de li siajn arbarojn, lagetojn kaj postenojn. Mi indignis kaj ekkriis:

«Kia mizero, Sinjoro Dio! Kiam unu mizero finiĝas, alia komenciĝas, kaj ĉiam estas la pacamaj homoj kiuj suferas pro la kulpo de la aliaj! Dio mia, liberigu nin de ĉiuj malnovaj kaj novaj nobeloj! Superŝutu ilin per viaj benoj, sed ili lasu nin trankvilaj!»

Iumatene onklino Gredel venis viziti nin. Estis vendredo, merkatoĝo. Ŝi havis sian korbon sub la brako kaj ŝajnis gaja. Mi jam rigardis tra la pordo, pensante, ke Trinel alvenas malantaŭ ŝi, kaj mi diris

«He, bonan tagon, onklino Gredel. Trinel certe estas en la urbo. Ĉu ŝi venos?»

«Ne, Josef, ŝi estas en Quatre-Vents,» respondis la onklino. «Ni havas multan laboron pro la semado.»

Tial ke mi malĝojiĝis kaj tio interne kolerigis min, ĉar mi antaŭe ĝojis, la onklino metis sian korbon sur la tablon kaj diris, levante la tualettukon, kiu kovris ĝin:

«Jen, io por vi, Josef, io de Trinel.»

Mi vidis grandan bukedon de malgrandaj majaj rozoj, violoj kaj tri dikaj siringoj kun ĝiaj folioj ĉirkaŭ ili. Tiu vido plaĉis al mi, kaj mi ekridis dirante:

«Kiel bone tio odoras!»

Kaj patro Gulden, turninte sin, ankaŭ ekridis:

«Vi vidas, ke oni pensas pri vi, Josef,» li diris.

Ni ridis ĉiuj kune.

Fine, tute retrovinte mian bonan humoron, mi kisis onklinon Gredel.

«Vi portos tion de mi al Trinel,» mi diris al ŝi.

Kaj tuj mi metis la bukedon en vazon sur la fenestrotabulo apud mia lito. Mi priflaris ĝin, bildigante al mi, ke Trinel eliris frumatene pluki la violojn kaj rozetojn en la freŝeco, ke ŝi ranĝis ilin unu post la alia en la roso, metis la dikajn siringojn ĉirkaŭe kaj ankaŭ priflaris ilin, tiel ke laodoro ŝajnis al mi ankoraŭ pli bona kaj ke mi ne povis ĉesi rigardi kaj priflari ilin. Fine mi eliris, dirante al mi mem:

«Vi povos priflari ilin la tutan nokton. Morgaŭ matene vi donos al ili freŝan akvon. Postmorgaŭ estos dimanĉo, tiam vi revidos Trinel kaj vi kisis ŝin por danki ŝin.»

Mi reiris do en la ĉambron, kie onklino Gredel babilis kun patro Gulden pri la merkato, la prezo de la grenoj ktp., ambaŭ bonhumoraj. Onklino Gredel metis sian korbon teren kaj diris al mi:

«Nu, Josef, ĉu la permeso ĉiam ankoraŭ ne alvenis?»

«Ne... ankoraŭ ne... Estas tamen terure.»

«Jes,» ŝi respondis, «ĉiuj tiuj ministroj ne valoras pli unuj ol la aliaj. Verŝajne oni elektis la

plej malbonan, la plej neniofarantan por tiu posteno!»

Tiam ŝi aldiris:

«Sed estu trankvila, mi havas ideon kiu ŝanĝos ĉion!»

Ŝi ekridis, kaj ĉar patro Gulden kaj mi aŭskultis:

«Antaŭnelonge,» ŝi daŭrigis, «dum mi estis en la kovrita vendejo, la urba serĝento Har-mantier anoncis, ke oni diros altan meson por la ripozo de la animoj de Ludoviko XVI, Pichegru, Moreau kaj alia persono.»

«Jes, Georges Cadoudal,» diris patro Gulden, «mi legis tion en la gazeto hieraŭ vespere.»

«Ĝuste, Cadoudal,» diris la onklino. «Nu, vi vidas, Josef, aŭdinte tiun anoncon, mi tuj pensis: 'Ĉi-foje ni havos la permeson!' Oni faros procesiojn, pentofarojn, kaj ni parto-prenos kune: Josef, Trinel kaj mi. Ni estos inter la unuaj, kaj ĉiuj diros: 'Tiu estas bonaj rojalistoj, bonaj homoj...' La sinjoro pastro ekscios tion – nu, la pastroj havas longajn brakojn, kiel antaŭe la generaloj kaj koloneloj. Ni iros viziti lin, li bone akceptos nin... Li eĉ faros por ni peticion! Mi diras al vi, ke tio sukcesos, ke tiu ne povos fiaski!»

Eksplikante al ni tiujn aferojn, onklino Gredel parolis laŭte, levante la manojn, kaj ŝajnis tre kontenta pri sia saĝeco. Mi ankaŭ estis kontenta kaj mi pensis: «Ŝi pravas, jen kion ni devas fari. Tiu onklino Gredel estas virino plena je prudento.» Sed tiam, rigardante patron Gulden, mi vidis, ke li fariĝis tre serioza, kaj eĉ ke li turnis sin kvazaŭ por rigardi per lupeo en horloĝon, kuntirante siajn densajn blankajn brovojn. Unue en lia vizaĝo mi ĉiam ekvidis, kiam iu afero ne plaĉis al li, kaj mi diris:

«Aŭskultu, onklino Gredel, mi kredas ke tio povos funkcii. Sed antaŭ ol fari tion, mi volus scii, kion pensas pri tio patro Gulden.»

Tiam li turnis sin kaj diris:

«Ĉiu estas libera, Josef, ĉiu devas sekvi sian konsciencon. Fari diservon kiel pentofaron pro la morto de Ludoviko XVI estas bone!... La honestaj homoj de ĉiuj partioj povas nenion kontraŭdiri, kondiĉe ke oni estas rojalisto... Ĉar, se oni surgenuiĝus pro siaj propraj intereso, oni pli bone restus en sia hejmo. Mi konsentas do por Ludoviko XVI. Sed por Pichegru, por Moreau kaj por Cadoudal estas alia afero. Pichegru volis liveri sian armeon al la malamiko. Moreau batalis kontraŭ Francion, kaj Georges Cadoudal estas murdisto: tri specoj de ambiciaj viroj, kiuj provis nur sklavigi nin kaj kiuj, ĉiuj tri, meritis sian sorton. Jen kion mi pensas.»

«He, Dio mia!» ekkriis onklino Gredel. «Per kio tio koncernas nin? Ni ne iros pro ili, ni iros por ekhavi la permeson. Mi ja mokas pri la resto, kaj ankaŭ Josef, ĉu ne, Josef?»

Mi estis embarasita, ĉar tio kion diris sinjoro Gulden, ŝajnis al mi ĝusta. Li, vidante tion, diris:

«Mi komprenas la amon de la gejunuloj. Sed neniam, patrino Gredel, oni rajtas uzi tiajn rimedojn por instigi junulon oferi tion kio ŝajnis al li honesta. Se Josef ne havas la samajn ideojn kiel mi pri Pichegru, Cadoudal kaj Moreau, li iru al la procesio, kaj estas bone. Neniam mi faros al li riproĉojn pro tio. Sed mi ne iros.»

«Kaj ankaŭ mi ne, » mi diris tiam, « mi pensas kiel sinjoro Gulden.»

Mi vidis, ke onklino Gredel estas koleriĝonta. Ŝia vizaĝo fariĝis tute ruĝa, sed ŝi preskaŭ tuj ekdominis sin kaj diris:

«Nu Trinel kaj mi iros, ĉar ni mokas pri ĉiuj tiuj malnovaj ideoj.»

Vidante ŝian koleron, patro Gulden ne povis malhelpi sin rideti.

«Jes, ĉiu estas libera. Agu laŭ via plaĉo!»

Tiam la onklino prenis sian korbon kaj eliris, kaj li, ridante, faris al mi signon, por ke mi elkonduku ŝin.

Mi rapide metis mian redingoton kaj reatingis la onklinon ĉe la stratangulo.

«Aŭskultu, Josef,» ŝi diris al mi, reirante al la vendoplaco, «tiu patro Gulden estas brava viro, sed li estas maljuna stultulo. Ekde kiam mi konas lin, li neniam estis kontenta. Li ne kuraĝas diri tion, sed lia ideo ankoraŭ ĉiam estas la Respubliko... Li pensas nur pri sia malnova Respubliko, kie ĉiuj estas suverenaj: la almozuloj, la kaldronistoj, la ŝuflikistoj, la judoj... Tio ne havas sencon. Kion oni fine volas fari? Se li ne estus tiel brava viro, mi ne tiom ĝeniĝus pro li, sed ni devas konscii, ke sen li vi neniam estus akirinta bonan situacion, ke li faris al ni multan bonon kaj ke ni ŝuldas respekton al li. Jen kial mi rapidis foriri, ĉar alie mi estus estinta kapabla koleriĝi kontraŭ li.»

«Vi agis bone,» mi diris al ŝi, «mi amas sinjoron Gulden kiel mian patron kaj ankaŭ vin, kvazaŭ vi estus mia patrino. Nenio povus kaŭzi al mi pli da ĉagreno ol vidi vin ambaŭ mal-paci.»

«Ĉu mi malpaci kun tia viro?» respondis onklino Gredel. «Mi preferus salti tra la fenestro... Ne, ne...Sed vi ne devas kredi ĉion kion li diras, Josef, ĉar mi asertas, ke tiu procesio estas tre bona afero por ni, ke la sinjoro pastro havigos al ni tiun permeson, kaj tio estas la ĉefa afero. Trinel kaj mi iros. Ĉar sinjoro Gulden restos hejme, ankaŭ vi restos hejme. Sed mi estas certa, ke tri kvaronoj de la urbo kaj de la ĉirkaŭaĵo venos kaj ke, ĉu estas por Moreau, por Pichegru, por Cadoudal, ĉu por iu alia, tio estos tre bela, vi vidos.»

«Mi kredas vin,» mi diris al ŝi.

Intertempe ni alvenis apud la Germana Pordego. Mi denove kisis la onklinon kaj revenis tute gaja.

Se mi memoras tiun viziton de onklino Gredel, tio estas ĉar ok tagojn poste komenciĝis la procesioj, pentofaroj kaj predikoj, kiuj ĉesis nur ĉe la reveno de la imperiestro en 1815 kaj poste estis reprenitaj ĝis la foriro de Karlo X en 1830. Ĉiuj homoj sciis tiutempe, ke tio ne finiĝos. Tial, kiam mi pensas pri Napoleono, mi aŭdas la kanonon de la arsenalo tondri frumatene kaj niajn etajn vitraĵojn tremeti kaj patron Gulden krii al mi de sia lito: «Unu plia venko, Josef!... He ! He ! He ! Ĉiam venkoj!» Kaj kiam mi pensas pri Ludoviko XVIII, mi aŭdas sonori la sonorilojn, mi imagas patron Braunstein kaj liajn du grandajn knabojn pendantaj je la ŝnuregoj, kaj sinjoron Gulden, kiu diras al mi ridante: «Tio, Josef, estas pro sankta Miagloro aŭ sankta Polikarpo!»

Mi ne povas bildigi al mi tiujn tempojn alimaniere.

Mi ankaŭ vidas dum la Imperio, je la noktiĝo, patron Coiffé, Nikolaus Rolfo kaj kvin aŭ ses aliajn veteranojn ŝargi sian kanonon por ripeti la dudek unu pafegojn, dum la duono de Falsburgo, sur la kontraŭa bastiono, rigardas la ruĝan lumon, la fumon kaj la ŝargoŝtopilojn, kiuj saltas en la fosaĵon; tiam vespere la lumigadon, la petardojn, la raketojn, la infanojn kiuj krias: *Vivu la Imperiestro !* kaj kelkajn tagojn poste la mortaktojn kaj la konscripcion.

Sub Ludoviko XVIII mi vidas la ripozaltarojn, la kampulojn, kiuj venas kun siaj ĉaroj plenaj je musko, genisto, malgrandaj piceoj, la virinojn kiuj eliras la domojn kun grandaj vazoj da floroj, la homojn kiuj pretigas siajn kandelingojn kaj krucojn, kaj tiam la procesiojn: sinjoro pastro kaj liaj vikarioj; la akolitoj, Jakob Cloutier, Pyrrhus kaj Tribou kiuj kantas; la bedelo Koekli, en ruĝa robo, kun la flago, kiu balaas la ĉielon; la sonoriloj kiuj sonoras tutforte; sinjoro Jourdan, la nova urbestro, kun sia dika ruĝa vizaĝo, sia bela uniformo kaj sia kruco de sankta Ludoviko; la nova loka komandanto, sinjoro Robert de la Faisanderie, kun sia tripinta ĉapelo sub la brako, sia granda pudrita peruko kaj siaj brodaĵoj brilantaj en la suno; kaj malantaŭ li la komunuma konsi-lantaro, kaj la sennombraj kandeloj, kiujn oni reekbruligas unuj per la aliaj, kiam la vento estingas ilin; la preĝejgardisto, Jean-Pierre Sirou, kun glate razita blua barbo, sia belega ĉapelo transverse sur la ŝultroj, la larĝa balteo el blanka silko prisemita per lilioj sur la brusto, la halebardo tute rekta, kiu brilas en la aero kvazaŭ arĝenta plado; la knabinoj, la virinoj kaj la miloj da homoj de la kamparo en dimanĉaj vestaĵoj, kiuj preĝas kune; la maljunuloj ĉekape de ĉiu vilaĝo, kiuj senĉese ripetadas per klara voĉo: «*Bett fer uns! Bett fer*

uns!»⁵²; la stratoj plenaj je folioj, la girlandoj kaj la blankaj liliflagoj je la fenestroj; la judoj kaj luteranoj supre malantaŭ siaj persienoj, kiuj rigardas el la ombro dum la suno primulas tiun belan spaktaklon! – Jes, tio daŭris de 1814 ĝis 1830 escepte dum la Cent Tagoj, sen paroli pri la misioj, la rundvojaĝoj de la episkopoj kaj la aliaj eksterordinaraj ceremonioj. Mi preferas tuj diri tion ĉi al vi, ĉar priskribi ĉiujn procesiojn unu post la alia daŭrus tro longe.

Nu, tio komenciĝis la 19-an de majo 1814. Kaj en la tago en kiu Harmantier anoncis la grandan pentofaron, alvenis ĉe ni kvin pre-dikistoj el Nancy, junuloj kiuj predikis tutan semajnon de mateno ĝis noktomezo. Tio estis por prepari nin al la pentofaron. Oni parolis nur pri ili en la urbo, kaj la homoj konvertiĝis; ĉiuj virinoj kaj knabinoj iris al la konfeso.

La famo ankaŭ kuris, ke necesos redoni la naciajn propraĵojn, kaj ke la procesio apartigos la friponojn de la honestaj homoj, ĉar la friponoj ne kuraĝus montri sin tie. Oni povas imagi mian ĉagrenon resti iel kontraŭvole kun la friponoj. Dankon al Dio, mi havis nenion riproĉendan al mi koncerne la morton de Ludoviko XVI. Mi ankaŭ ne havis naciajn propraĵojn, kaj ĉio kion mi deziris, estis akiri la permeson edziĝi al mia kara Trinel. Mi ankaŭ pensis, kiel onklino Gredel, ke sinjoro Gulden malpravas obstini, sed mi neniam estus kuraĝinta paroli al li pri tio. Mi estis malfeliĉa, tiom pli ke tiuj kiuj alportis al ni siajn horloĝojn, respektindaj viroj, urbestroj, arbargardistoj, aprobis ĉiujn tiujn predikojn kaj diris, ke oni neniam aŭdis ion tiel belan. Sinjoro Gulden, aŭskultante ilin, daŭrigis sian laboron sen respondi, kaj kiam ĝi estis riparita, li turnis sin al ili, dirante: «Jen, sinjoro Christophe, aŭ sinjoro Nicolas... tio kostas tiom.» Li agis, kvazaŭ li ne interesiĝus pri tiuj aferoj, kaj nur kiam iu menciis la naciajn propraĵojn, la dudekkvinjaran ribelon⁵³, la pentofaron pro la krimoj faritaj dum tiu periodo, tiam li deprenis siajn okulvitrojn, levis la kapon por aŭskulti, kaj diris en tono de surprizo:

«He be! He be! Ĉu tio estas tiel bela, sinjoro Claude? Nu, vi mirigas min... Tiuj junaj predikistoj parolas tiel bone!... Ha! Se la laboro ne tiom urĝus, mi ankaŭ irus aŭskulti ilin.... Mi ankaŭ bezonas instruadon.»

Mi ankoraŭ ĉiam esperis, ke li ŝanĝos sian opinion pri la procesio de Ludoviko XVI, kaj la antaŭvesperon, kiam ni finis vespermanĝi, mi estis tre kontenta, ke li subite diris al mi bonhumore:

«He, Josef, ĉu vi ne estus scivolema aŭdi la predikistojn? Oni rakontas tiom da belaj aferoj

pri ili, ke mi tamen volus ekscii, kion oni povas kredi pri tio.»

«Ha, sinjoro Gulden,» mi diris al li, «mi demandas nur tion. Sed ne necesas perdi tempon, ĉar la preĝejo ĉiam estas plena ĉe la dua sonorado.»

«Nu, ni ekiru,» li diris ekstarante kaj dehokis sian ĉapelon. «Jes, mi estas scivolema, mi volas vidi kaj aŭdi tion... Tiuj junuloj mirigas min. Ni iru.»

Ni malsupreniris. La luno tiel forte brilis ekstere, ke oni rekonis la homojn kiel en plena tago. Ĉe la angulo de la strato Fouquet ni jam vidis la esplanadon de la preĝejo kovrita de homoj. Du aŭ tri maljunulinoj, Annette Petit, patrino Balais kaj Jeannette Baltzer, kun siaj vastaj ŝaloj bone noditaj kaj siaj kufoj kun longaj franĝoj super la okuloj, rapide preterpasis nin.

«Hej!» murmuris sinjoro Gulden, «Jen la maljunulinoj. Hej! Hej! Hej! Ĉiam la samaj!»

Li ekridis kaj diris, ke de post patro Colin oni neniam vidis tiom da homoj en la vesperservo. Mi ne povis imagi, ke li parolas pri la malnova kabareto *la Tri Rozoj*, fronte al la infanteria kvartalo, kaj mi diris al li:

«Ĉu li estis pastro, sinjoro Gulden?»

«Ne, ne,» li respondis ridetante, «mi parolas pri la maljuna Colin. En 1792, kiam ni havis nian klubon en la preĝejo, ĉiu povis prediki, sed Colin parolis plej bone. Li havis superban voĉon kaj diris fortajn kaj ĝustajn aferojn. Oni venis de Saverne, Sarrebourg kaj eĉ de pli fore por aŭdi lin. La damoj kaj fraŭlinoj, la civita-ninoj, kiel oni nomis ilin tiutempe, plenigis la ĥorejon, la galeriojn kaj benkojn. Ili surhavis malgrandajn kokardojn sur la kufo kaj kantis *la Marseillaise*⁵² por vigligi la junularon. Vi neniam vidis ion tian. Jen, Annette Petit, patrino Baltzer, ĉiuj tiuj kiujn vi vidas kuri antaŭ ni kun sia preĝlibro, estis la unuaj. Sed tiam ili havis dentojn kaj harojn, kaj ili ŝatis *liberecon, egalecon kaj fratecon*⁵³. – Hej! Hej! Hej! Povra Bével, povra Annette... nun ili pentos. Ili tamen estis bonaj patriotinoj, kaj mi kredas, ke la bona Dio pardonos ilin...»

Li ridis, memorante tiujn malnovajn historiojn. Sed sur la ŝtupoj de la preĝejo li fariĝis malĝoja kaj diris:

«Jes, jes... Ĉio ŝanĝiĝas... Mi memoras, ke en la tago kiam Colin parolis pri la patrio en danĝero en 1793, tricent knaboj de nia lando foriris al la armeo de Hoche. Li sekvis ilin kaj fariĝis ilia komandanto. Li estis terura viro meze de siaj grenadistoj. Li rifuzis subskribi por nomumi Bonaparte imperiestro. Nun li plenigas malgrandajn glasojn sur la vendotablo.»

⁵² Preĝu por ni! Preĝu por ni!

⁵³ La periodo de 1789 ĝis 1814, kiam Napoleono estis ekzilita al Elbo.

⁵² Nacia himno de Francio, verkita dum la Revolucio de Rouget de Lisle.

⁵³ Devizo de Francio ekde la Revolucio.

Tiam, rigardante min, kvazaŭ mirigita de siaj propraj pensoj, li diris:

«Ni eniru, Josef.»

Ni eniris sub la altaj pilieroj de la orgeno. Ni staris premitaj unuj kontraŭ la aliaj. Li diris nenion plu. Kelkaj lumoj en la ĥorejo brulis super la kapoj. Nur la benkoj, kiuj malfermiĝis kaj refermiĝis, ĝenis la silenton. Tio daŭris eble dek minutojn. Malantaŭ ni ĉiam venis homoj. Fine oni aŭdis la halebardon de Sirou resoni sur la pavimo kaj sinjoro Gulden flustris:

«Jen li estas!»

Lumilo super la sanktakvujo donis al ni iom da lumo. Samtempe ombro supreniris sur la katedron maldekstre, kaj la stango de Koekli lumigis du aŭ tri kandelojn ĉirkaŭe. Tiu predikisto povis havi de dudek kvin al tridek jarojn. Li havis freŝan rozkoloran vizaĝon kaj longajn blondajn harojn sub la tonsuro, kiuj falis en bukloj sur la nukon.

Oni komencis kantante religian kanton. La fraŭlinoj de la urbo kantis ĥore: «Kia feliĉeco esti kristano!» Post tio la predikisto sur la katedro diris, ke li venis defendi la kredon, la religion kaj la dian rajton de Ludoviko XVIII, kaj demandis, se iu havas la aŭdacon aserti la kontraŭon. Sed neniu emis esti ŝtonumita; ĉiuj silentis. Sammomente granda maldikulo en la kontraŭa benko, viro de ses futoj, bruna, en nigra kapoto, ekstaris kriante:

«Mi asertas ke la kredo, la religio, la rajto de la reĝoj kaj la resto estas veraj superstiĉoj. Mi asertas, ke la respubliko estas justa, ke la kulto de la racio valoras pli ol ĉio!...»

Kaj tiel plu. La homoj indigniĝis. Neniam oni vidis ion similan. Kiam li finis paroli, mi rigardis sinjoron Gulden. Li ridis mallaŭte kaj diris al mi:

«Aŭskultu !... Aŭskultu !»

Kompreneble mi aŭskultis: la juna predikisto preĝis al Dio por tiu nekredanto. Tiam li komencis tiel bone paroli, ke la homamaso estis tute ravita. Kaj la granda maldikulo respondis «ke oni bone agis, senkapigante Ludovikon XVI, Marian-Antŭanetan kaj la tutan familion!» Tiel ke la indigno ankoraŭ pligrandiĝis, kaj ke je la fino la loĝantoj de la barakoj en Bois-de-Chênes, kaj precipe iliaj edzinoj, volis penetri en lian benkon por bati lin. Sed tiam Sirou alvenis kriante:

«Residiĝu ! Residiĝu !»

Kaj la maljuna Koekli stariĝis antaŭ la viron, kiu fuĝis en la sakristion, levante ambaŭ manojn al la ĉielo kaj kriante, ke li konvertiĝas, ke li rezignas pri satano, liaj vantecoj kaj laboroj. La alia diris preĝon por la animo de tiu pekulo: estis vera triumfo por la religio.

Ĉiuj eliris ĉirkaŭ la dek-unua kaj oni anoncis, ke la procesio okazos la morgaŭon dimanĉon.

Pro la granda premo, kiu estis puŝinta nin en angulon, sinjoro Gulden kaj mi restis la lastaj.

Kiam ni eliris, la kampuloj de Quatre-Vents, Bois-de-Chênes, Saint-Jean-des-Choux kaj Bigelberg jam estis elirintaj tra la Germana Pordego. Oni aŭdis nur la fenestrovirilojn de la urbanoj, kiuj estis fermataj kaj kelkajn maljunulinojn, kiuj foriris tra la strato de la Arsenalo, babilante inter si pri tiuj eksterordinaraj aferoj.

Patro Gulden kaj mi niaflanke paŝadis en kompleta silento. Li diris nenion kaj ridetis kun klinita kapo. Tiel ni alvenis en nia ĉambro.

Mi ekbruligis kandelon, kaj dum li malvestis sin, mi diris al li:

«Nu, sinjoro Gulden, ĉu ili bone parolas?»

«Jes, jes, Josef,» li respondis ridetante, «por junuloj kiuj vidis nenion, ne estas malbone.»

Tiam li laŭte ekridis kaj diris:

«Sed se la maljuna Colin estus estinta tiu jakobeno, mi kredas tamen, ke li estus terure embarasinta la junulon.»

Tio ĉi mirigis min. Ĉar mi ankoraŭ atendis por aŭdi, kion sinjoro Gulden ankoraŭ diros, li malrapide tiris sian ĉapon el nigra silko sur siajn orelojn, dirante kun pensema mieno:

«Estas egale... Estas egale... Tiuj homoj iras tro rapide... Multe tro rapide! Oni neniam kredigos al mi, ke Ludoviko XVIII scias ĉion ĉi... Ne! Li vidis tro da aferoj en sia vivo por ne koni la homojn pli bone. Nu, bonan vesperon, Josef, bonan vesperon! Ni esperu, ke baldaŭ venos ordono de Parizo por resendi tiujn junulojn al ilia seminario... Bonan nokton!»

Mi eniris mian ĉambron kaj, enlitiĝinte, mi longe revis pri Trinel, pri la jakobenoj kaj la procesio kiun ni estis vidontaj.

IV

La morgaŭon la sonoriloj komencis sonori frumatene. Mi ellitiĝis, malfermis la fenestrovirilojn kaj vidis la ruĝan sunon supreniri malantaŭ la pulvejo super la arbaro de Bonne-Fontaine. Povis esti la kvina. Oni anticipis sentis, ke la vetero estos varma. La odoro de la kverkaj, fagaj kaj ileksaj folioj, disvastigitaj sur la stratoj, plenigis la aeron.

Kampuloj jam alvenis en grupoj, babilante meze de la silento. Oni rekonsis ĉiujn vilaĝanojn: tiujn de Wechem, de Metting, de Graufthal, de Dosenheim per iliaj grandaj tripintaj ĉapeloj surmetitaj kiel vizieroj, per siaj kvadrataj vestaĵoj, la virinoj en longaj nigraj roboj kaj grandaj katunaj kufoj en formo de matraco sur la nuko; tiuj de Dagsberg, Hildehuse, Hardberg kaj Hupe per iliaj larĝaj, rondaj feltaj ĉapeloj, la virinoj kun mallongaj haroj kaj mallongaj jupoj, malgrandaj, brunaj,

magraj kaj viglaj kiel pulvo. La infanoj sekvis ilin, tenante siajn ŝuojjn per la manoj. Sed ili ĉiuj sidiĝis sur la fostoj de Luterspech kaj metis siajn ŝuojn por la procesio.

Kelkaj pastroj ankaŭ alvenis tri- aŭ kvarope malantaŭ siaj vilaĝanoj, parolante kaj ridante bonhumore inter si.

Mi, la kubutojn sur la fenestrotabulo, rigardis ĉion ĉi, imagante, ke tiuj homoj devis ekiri antaŭ noktomezo por alveni tiel frue, ke ili devis transiri siajn montojn, paŝante sub la arboj dum multaj horoj, pasante sur la etaj pontoj en la lunlumo. Mi pensis, ke la religio estas tamen bela afero, ke tiuj de la urboj ne scias tion, sed ke miloj da kamlaboristoj, arbohakistoj, plugistoj, rudaj sed tamen bonkoraj estuloj, kiuj amas siajn edzinojn kaj infanojn, kiuj respektas la maljunecon de siaj gepatroj, helpante ilin kaj fermante al ili la okulojn en la espero je pli bona vivo, havis nur tiun konsolon sur la tero.

Kaj rigardante la homamason, kiu senĉese pasadis, mi imagis, ke onklino Gredel kaj Trinel havis la samajn ideojn. Mi estis feliĉa scii, ke ili preĝas por mi.

La suno supreniris, la sonoriloj eksonoris, kaj mi ĉiam rigardis. Mi aŭdis sinjoron Gulden, kiu ellitiĝis kaj vestis sin. Kelkajn momentojn poste li eniris mian ĉambron en ĉemizmanikoj kaj, vidante min tute pensema, ekkriis:

«Josef, la plej bela afero kiun oni povas vidi en la mondo, estas la religio de la popolo!»

Kaj ĉar mi estis tute mirigita, aŭdante lin diri ĝuste, kion mi pensis:

«Jes,» li diris, «la amo al Dio, la amo al la patrio, la amo al la familio estas nur unu kaj sama afero. Nur, kio kelkfoje ĉagrenas min, estas la vido, ke la amo al la patrio estas ofte deturnita por kontentigi la ambicion de iu homo, kaj la amo al Dio por pligrandigi la orgojlon kaj la spiriton de dominado de malgranda grupo.»

Tiuj vortoj trafis min. Mi konservis ilin en mia memoro, kaj ekde tiam mi ofte pensis, ke tion estas la malĝojiga vero.

Finfine, por reveni al tiu ĉi tago, vi devas scii, ke ekde la blokado ni laboris ankaŭ dimanĉe, ĉar sinjoro Gulden, farante la servon de la kanonoj sur la remparoj, estis negliĝinta sian propran laboron, tiel ke ni postiĝis. Tiun tagon do, kiel en la aliaj, mi ekbruligis la fajron en nia malgranda stovo kaj preparis la matenmanĝon. La fenestroj restis malfermitaj, kaj oni aŭdis grandan bruon ekstere.

Patro Gulden, kliniĝinte tra unu el la fenestroj, diris:

«He, ĉiuj butikoj restas fermitaj hodiaŭ, escepte la gastejoj kaj kabaretoj.»

Li ridis kaj mi diris:

«Ĉu ni malfermu nian montrofenestron, sinjoro Gulden? Tio povus kaŭzi al ni grandan damaĝon.»

Li returnis sin kvazaŭ surprizita:

«Aŭskultu, Josef,» li diris, «mi neniam konis pli bonan knabon ol vi, sed vi malhavas karakteron. Kial do ni fermus nian montrofenestron? Ĉar Dio kreis la mondon en ses tagoj kaj ripozis la sepan? Sed ni ne kreis la mondon kaj ni devas labori por vivi. Se mi fermus nian montrofenestron pro propra intereso, se ni volus ŝajni bonaj apostoloj kaj tiel gajni novajn klientojn, tio estus hipokriteco. Kelkfoje vi parolas senpripense.»

Mi tuj komprenis, ke mi malpravas, kaj mi respondis:

«Sinjoro Gulden, ni prefere lasu nian montrofenestron malfermita: tiel oni vidos, ke ni vendas horloĝojn. Tio povas kaŭzi damaĝon al neniu.»

Apenaŭ ni sidis ĉe la tablo, onklino Gredel kaj Trinel alvenis. Trinel estis vestinta sin tute en nigro pro la servo por Ludoviko XVI. Ŝi surhavis malgrandan kufon en nigra tulo kaj tre bone sidantan nigran robon, kio donis al ŝi vizaĝkoloron tiel blankan, tiel rozkoloran, tiel delikatan, ke mi ne povis iel kredi, ke ŝi estas la amatino de Josef Seitz. Ŝia kolo estis blanka kiel neĝo, kaj sen ŝiaj ruĝaj lipoj kaj ŝia rozkolora mentono, ŝiaj bluaj okuloj kaj blondaj haroj, mi estus kredinta, ke ŝi estas alia knabino, kiu similas al ŝi, sed estas pli bela. Vidante mian eksterordinaran miron, ŝi ekridis. Fine mi diris al ŝi:

«Trinel, nun vi estas tro bela, mi ne plu kuraĝas ĉirkaŭbraki vin.»

«Nu,» ŝi diris, «vi tamen ne devas ĝeni vin.»

Kaj ĉar ŝi disetendis la brakojn, mi longe ĉirkaŭbrakis ŝin, tiel ke patro Gulden kaj la onklino rigardis sin ridetante. Mi estus dezirinta, ke ili troviĝu tre fore de ni por povi diri al Trinel, ke mi amas ŝin ĉiam pli, kaj ke mi donus mian vivon milfoje por ŝi. Sed antaŭ ili tio ne konvenus. Mi pensis tiujn aferojn, kiuj emociis min.

Ankaŭ la onklino surhavis nigran robon kaj tenis sian preĝlibron sub la brako.

«Venu do kisi min, Josef,» ŝi diris, «vi ja vidas, ke mi surmetis mian nigran robon tute kiel Trinel.»

Mi kisis ŝin, dum patro Gulden diris:

«Vi venos vespermanĝi ĉe ni hodiaŭ... Tio estas do interkonsentita, sed dume vi manĝos ion.»

«Ni jam matenmanĝis,» respondis la onklino.

«Ne gravas... Tiu procesio finiĝos Dio scias kiam... Vi ĉiam estos sur viaj piedoj... Necesas plifortigi vin.»

Tiam ili eksidis, la onklino en mia dekstra, Trinel en mia maldekstra flanko, patro Gulden kontraŭ mi. Oni trinkis glason da vino, kaj la onklino diris, ke la procesio estos belega... ke almenaŭ dudek kvin pastroj el la ĉirkaŭaĵo

partoprenos... ke sinjoro pastro Hubert de Quatre-Vents ankaŭ venis... ke la granda ripozaltaro en la kavaleria kvartalo estas pli alta ol la domtegmentoj... ke la piceoj kaj poploj ĉirkaŭe estas ornamitaj per krepo, kaj ke la altaro estas kovrita per nigra tuko.

Ŝi parolis pri ĉio dum mi rigardis al Trinel, kaj ni ambaŭ pensis sen diri ion: «Ho, Dio mia, kiam ni ricevos la permeson geedziĝi? Kiam tiu fripona ministro prenos la tempon skribi: geedziĝu kaj lasu min trankvila!»

Fine, ĉirkaŭ la naŭa la dua sonorado resonis kaj necesis adiaŭi. La onklino diris:

«Jam estas la dua sonorado... Nu, ni venos vespermanĝi kiel eble plej frue.»

«Jes, jes, patrino Gredel,» respondis patro Gulden, «ni atendos vin...»

Tuj ili ekstaris. Mi rekondukis Trinel ĝispiede de la ŝtuparo kaj ĉirkaŭbrakis ŝin ankoraŭfoje, dum la onklino ekkriis:

«Ni rapidu ! Ni rapidu !»

Ili eliris, kaj mi resupreniris por repreni mian laboron. Sed ekde tiu momento ĝis ĉirkaŭ la dek-unua mi povis fari nenion. La homamaso estis tiel granda, ke oni aŭdis ekstere nur unu grandan bruon de mallaŭtaj voĉoj kaj de la folioj sur kiuj oni paŝadas. Kaj kiam la procesio eliris la preĝejon, tio produktis tiel grandiozan efekton, ke eĉ sinjoro Gulden ĉesis labori por aŭskulti la kantojn kaj preĝojn.

Mi imagis Trinel en la homamaso, pli bela ol ĉiuj aliaj knabinoj, kaj onklino Gredel flanke de ŝi, ripetante per laŭta voĉo: «*Bett fer uns! Bett fer uns!*» Mi bildigis ilin al mi tre lacaj, kaj ĉiuj tiuj kantoj kaj preĝoj igis min revii. Mi tenis horloĝon en miaj manoj, kaj mi provis labori, sed mia spirito estis aliloke... Ju pli la suno supreniris, des pli kreskis mia enuo, kiam subite sinjoro Gulden diris al mi, ridetante:

«He, Josef, ĉu tio do ne iras bone hodiaŭ?»

Kaj ĉar mi fariĝis tute ruĝa, li daŭrigis:

«En la tempo, kiam mi revis pri Louise Bénédum, mi ja provis rigardi la risortetojn kaj radetojn, sed mi ĉiam vidis ŝiajn okulojn.»

Li suspiris, kaj ankaŭ mi suspiris, pensante: «Ha! Vi ja pravas!»

«Estas sufiĉe, Josef,» li diris post momento, prenante la horloĝon el miaj manoj. «Iru, mia infano, provu trovi Trinel... Oni ne povas rezisti al sia amo... Ĝi estas pli forta ol oni.»

Aŭdante lin diri tiujn vortojn, mi volonte estus ekkriinta: «Ho, bonkora viro! ... Ho, justa viro!... Vi neniam scios, kiom mi amas vin!» Sed li ekstaris por viŝi al si la manojn per la tualet-tuko malantaŭ la pordo, kaj mi diris:

«Se vi absolute volas tion, sinjoro Gulden...»

«Jes, jes, absolute.»

Mi jam ne aŭskultis, mia koro eksaltis pro ĝojo. Mi surmetis mian ĉapelon kaj rapide malsupreniris ekkriante:

«Ĝis post horo, sinjoro Gulden!»

Mi jam estis ekstere. Sed kiom de homoj... kiom da homoj! Ĉio svarmadis: la tripintaj ĉapeloj, la feltĉapeloj, la kufoj kaj super ĉio la sonoriloj de la preĝejo malrapide sonoradis.

Dum pli ol unu minuto mi staris antaŭ nia pordo, rigardante kaj ne sciante kien turniĝi. Kaj vidante fine, ke ne eblas fari paŝon en tiu homamaso, mi deturniĝis en la strateton Lanche por iri al la remparoj kaj atendi la procesion sur la taluso apud la Germana Pordego, ĉar tiutempe la procesio laŭiris la Strato de la Kolegio.

Povis esti la dek-unua. En tiu tago mi devis vidi aferojn pri kiuj mi ofte pensis ekde tiam. Estis antaŭsignoj de grandaj malfeliĉoj, sed neniuj vidis ilin, ĉar neniuj havis la prudenton kompreni, kion tio signifas. Nur poste, kiam ĉiuj troviĝis ankoraŭ en mizero ĝis la kolo, kiam necesis denove preni la sakon kaj fusilon por igi sin haki en pecojn, nur tiam ĉiuj diris: «Ha! Se oni estus havinta prudenton !... Se oni estus povinta ĝuste juĝi !... Se oni estus estinta singarda!... Al ni estis tiel bone! Ni estus ankoraŭ ĉe ni, sed anstataŭ tio nun rekomenciĝas la buĉado. Kion necesis fari? Tute nenion... Ni devis nur teni nin trankvilaj... Tio ne estus estinta tiel malfacila. Kia mizero !»

Mi laŭiris la strateton Lanche, kie oni fusilis la dizertintojn sub la Imperio. La bruo estis foriĝanta, la kantoj kaj preĝoj, la sono de la sonoriloj ankaŭ. Ĉiuj pordoj kaj fenestroj estis fermitaj, ĉiuj homoj sekvis la procesion. Meze de tiu granda silento mi haltis kelkajn momentojn en la ombro de la malnova kvartalo por respiri. Freŝa venteto blovis de la kampoj super la remparojn. Mi aŭskultis la tumulton en la foreco, mi viŝis la ŝviton de mia vizaĝo kaj mi pensis:

«Kie trovi Trinel nun?»

Mi estis reekironta, grimpante sur la ŝtuparon de la poterno, kiam mi aŭdis iun ekkrii:

«Margarot, marku do la poentojn!»

Nur tiam mi vidis la fenestrojn de patro Colin malfermitaj en la unua etaĝo kaj senjakajn homojn ludi bilardon. Estis figuroj de maljunaj soldatoj kun mallongaj haroj kaj lipharoj kiel brosoj. Ili iradis kaj venadis, kriante ĉirkaŭ la bilardon sen maltrankviliĝi pri Ludoviko XVI, pri la urbestro, pri la komandanto aŭ pri la burĝoj. Unu el ili, malgranda, masivkorpa, la vangharojn en formo de pistoltubo, laŭ la modo de la husaroj, la kravaton malfarita, kliniĝis eĉ eksteren, la bilardbastonon apogitan kontraŭ la rando de la fenestro, kaj rigardis la placon kriante:

«Ni reludos la partion!»

Tuj venis al mi la ideo, ke devas esti oficiroj kiuj ricevas nur duonan soldon kaj tie elspezas siajn lastajn liardojn. Baldaŭ ili troviĝos en

embaraso por vivi. Mi reprenis mian vojon kaj plirapidigis miajn paŝojn sub la volbo de la pulvejo malantaŭ la kolegio, revante pri tiuj aferoj. Sed alveninte sur la taluso apud la Germana Pordego, mi tuj forgesis ĉion. La procesio estis turniĝanta malantaŭ la angulo de Bockholz, la kantoj resonis antaŭ la ripozaltaro kiel trumpetoj. La junaj sacerdotoj de Nancy paŝadis en la homamaso, tenante po krucon en la aero por konservi ordon. La pregeĝgardisto staris majeste sub sia flago. Antaŭe ĉiuj sacerdotoj kaj akolitaj kantis la preĝojn, rigardante la ĉielon. Malantaŭe la homamaso respondis, kaj tio produktis terure obtuzan murmuradon.

Irante sur la piedpintoj, duone kovrita per hangaro, mi pensis nur pri Trinel, kiun mi deziris trovi en la homamaso. Sed kiom da flagoj, tripintaj ĉapeloj kaj kufoj mi vidis defili tra la strato Ulrich! Mi neniam povus imagi, ke vivas tiom da homoj en nia regiono. Devis esti, ke neniu – escepte la etajn infanojn kaj kelkajn maljunulinojn por varti ilin – restis en la vilaĝoj.

Tio daŭris jam dudek minutojn, kaj mi jam ne esperis ekvidi Trinel, kiam subite mi vidis ŝin kun onklino Gredel. La onklino preĝis per tiel klara voĉo, ke oni aŭdis ŝin super ĉiuj aliaj virinoj. Trinel diris nenion kaj avancis per etaj paŝoj, la okulojn mallevitajn. Ha! Se mi rajtus voki ŝin, ŝi eble aŭdus min. Sed jam sufiĉis ne iri al la procesio sen ankoraŭ fari skandalon. Ĉio kion mi povas diri – kaj neniu maljunulo en Falsburgo asertos la kontraŭon – estos, ke Trinel ne estis la malpli bela knabino en la regiono, kaj ke Josef Seitz ne estis kompatinda.

Fine ŝi preterpasis, kaj la procesion alvaris apud la Armilplaco antaŭ granda ripozaltaro dekstre de la preĝejo. Dum la sinjoro pastro oficis, silento disvastiĝis en la tuta urbo. Sur la mallarĝaj stratoj dekstre kaj maldekstre ĉiuj silentis, kvazaŭ ili povus ĉiuj vidi la pastron antaŭ la altaro. Multaj surgenuiĝis, aliaj ripozis sur la ŝtupoj de la domoj, ĉar la varmo estis forta, kaj pluraj foriris de sia domo antaŭ la sunleviĝo. Tiu spektaklo kortuŝis min. Mi preĝis por la patrio, por paco, por ĉio kion mi sentis en mi, kaj mi memoras, ke eĉ en tiu momento voĉoj aŭdiĝis piede de la taluso sub la Germana Pordego, voĉoj kiu diris bonhumore:

«Ek, ek, iomete da loko, amikoj!»

La procesio baris la vojon al kelkaj vojaĝistoj, kiuj trovis sin haltigitaj, kaj tiuj voĉoj ĝenis iomete la rikolekton de la amaso. Kelkaj personoj antaŭ la pordego estis ĝenataj. La pregeĝgardisto kaj la pedelo severe regardis de fore. Scivolema, mi mem iomete proksimiĝis al la deklivo, sub la hangaro. Tiam kvin aŭ ses maljunaj soldatoj, blankaj pro polvo, la ŝultrojn kurbiĝintajn kaj la mienojn torditajn pro laceco, surgrimis la taluson por atingi la straton de la

Arsenalo, kie ili sendube esperis trovi liberan pasejon. Mi kredas ankoraŭ vidi ilin kun iliaj eluzitaj ŝuoj, blankaj gamaŝoj, malnova flikita uniformo kaj peza ĉako taŭzita de la suno, pluvo kaj mizeroj de la militiro. Ili avancis en vico surrante de la gazono sur la deklivo por ĝeni kiel eble malpli la malsupre sidantajn homojn. Maljunulo kun tri ranggalonoj, kiu marŝis antaŭe kaj similis al mia povra serĝento Pinto, mortigita apud Hinterthor ĉe Leipzig, emociis min. Li havis la samajn longajn griziĝantajn lipharojn, la samajn kavajn vangojn kaj la saman kontentan mienon, malgraŭ la suferoj kaj malfeliĉoj. Li ridetis, tenante paketon ĉe la finaĵo de sia bastono, kaj diris mallaŭte: «Ekskuzu nin, gesinjoroj, ekskuzu nin.» La aliaj sekvis lin paŝon post paŝo.

Estis la unuaj militkaptitoj kiujn redonis al ni la traktato de la 23-a de aprilo. Ekde tiam ni vidis preterpasi plurajn ĉiutage ĝis en julio. Tiuj ĉi certe estis duobligintaj la etapojn por revidi Francion pli frue.

Alveninte fine de la strateto, ili ekvidis ke la homamaso iras ankoraŭ pli foren direkte al la arsenalo. Por ne plu ĝeni la homojn, ili iris tra la poternon kaj sidiĝis sur la humidan ŝtupon, metante siajn paketojn teren apud si, atendante la ekiron de la procesio. Ili estis revenintaj de tre fore, sciante apenaŭ, kio estis okazinta ĉe ni.

Malfeliĉe la barakanoj de Bois-de-Chênes, la granda Horni, Zaferi Roller, Nicolas Cochart, la kardisto, Pinnacle, la kolportisto, kiun oni nomumis vilaĝestro por rekompensi lin pro tio, ke li montris en Falberg kaj Grauffthal la vojon al la aliancanoj dum la blokado, kaj aliaj, ĉiuj ĉifonuloj, kiuj volis servi la lilion, kvazaŭ la lilio povus plibonigi ilian staton. Malfeliĉe, tiu malbona raso, kiu vivas per branĉofaskoj ŝtelitaj el la arbaroj, estis rekoninta de fore la malnovan trikoloran kokardon sur la ĉakoj kaj pensis: «Jen bona okazo montri, ke ni estas veraj subtenantoj de la trono kaj altaro.»

Ili alvenis renversante la homojn. Pinnacle, la kolon en granda nigra kravato, alnolongan krepon ĉirkaŭ la ĉapelo, la ĉemizkolumon je du centimetroj de siaj oreloj kaj kun la grava vizaĝesprimo de bandito kiu volas doni al si mienon de honesta viro, Pinnacle do, alvenis la unua. Malkovrante de fore tiujn ĉi homojn kiuj minacis ilin, la maljuna soldato kun la tri ranggalonoj, ekstaris por vidi, kion tio signifas.

«He, ne tiel rapide,» li diris, «ni ne kutimas fuĝi... Nu, kion vi volas de ni?»

Verŝajne Pinnacle timis perdi tiel belan okazon montri sian diligenton por Ludoviko XVIII, kaj anstataŭ respondi, li forte frapis per la mano la ĉakon de la kapo de la soldato : kriante:

«For la kokardoj!»

Kompreneble tiu indigna veterano volis defendi sin, sed la barakanoj alvenis amase,

viroj kaj virinoj. Li impetis sur la soldatojn, renversis ilin, deŝiris iliajn kokardojn kaj epoletojn kaj senhonte distretis ilin per la piedoj. La povra maljunulo plurfoje restariĝis, kriante per voĉo kiu disŝiris al vi la koron:

«Aĥ! Bando de kovarduloj!... Aĥ! Ĉu vi estas francoj?... Aĥ!...»

Kaj ĉiufoje li ricevis novajn batojn. Fine oni lasis lin en tiu angulo, kovrita per sango kaj kun disŝiritaj vestaĵoj. Kaj sinjoro komandanto de la Faisanderie, kiu estis alveninta, diris, ke oni devas meti ilin en la prizanon.

Se mi estus povinta descendi, sen pensi pri Trinel, la onklino kaj sinjoro Gulden, mi estus povinta helpi ilin, kaj la barakanoj estus batintaj min teren kiel ilin. Kiam mi pensas pri tio hodiaŭ, tio igas min tremi pro kolero kaj honto. Feliĉe la muro de la poterno estis pli ol dudek futojn alta, kaj vidante, ke oni for-kondukas ilin tute kovritaj per sango, vidante tiun abomenaĵon, mi komencis kuri direkte al la arsenalo kaj mi realvenis hejmen tiel pala, ke patro Gulden ekkriis:

«Josef, ĉu vi estas vundita?»

«Ne, sinjoro Gulden,» mi diris, «sed mi ĵus vidis ion teruregan.»

Kaj mi ekploris pro kolero, rakontante al li, kion mi vidis. Li promenis tien kaj reen, la manojn sur la dorso, kaj de tempo al tempo haltis por aŭskulti min kun brilaj okuloj kaj kunpremitaj lipoj.

«Josef, ĉu tiuj soldatoj faris ion?»

«Ne, sinjoro Gulden.»

«Tio ne eblas... Tiuj viroj altiris al si tiun traktadon... Ni ne estas sovaĝuloj, diable! Siaflanke la barakanoj certe havis aliajn motivojn ol la kokardo⁵⁴.»

Li ne povis kredi min. Nur post kiam li aŭdis ĉion detale duan fojon, li fine diris:

«Nu, mi kredas vin... Jes, ĉar ĉio okazis antaŭ viaj okuloj, mi kredas vin. Kaj tio estas pli granda malfeliĉo ol vi kredas, Josef. Se tio daŭrigos, se oni ne faros solidan bridon al tiuj neniofarantoj, se la Pinacloj superos, la honestaj homoj devos malfermi la okulojn.»

Li ne diris pli, ĉar la procesio estis finiĝinta, kaj onklino Gredel kaj Trinel alvenis.

Ni vespermanĝis kune: la onklino estis tre kontenta kaj ankaŭ Trinel. Sed la tuta plezuro kiun mi spertis vidante ilin, ne malhelpis min gardi ion sur la koro. Sinjoro Gulden estis tute pensema.

Fine, kiam vesperiĝis, mi rekondukis Trinel kaj la onklinon ĝis la gastejo *la Radeto*, kaj, ĉirkaŭbrakinte ilin, mi deziris al ili bonan vesperon. Povis esti la oka, kaj mi tuj reiris hejmen. Sinjoro Gulden estis elirinta legi la gazeton en la bierfarejo *la Sovaĝa Viro* laŭ sia

ĉiudimanĉa kutimo. Mi enlitiĝis. Ĉirkaŭ la deka li revenis kaj, vidante ankoraŭ kandelon bruli sur la tablo, li malfermis la pordon kaj diris al mi:

«Ŝajnas, ke oni ĉie aranĝas procesiojn, Josef; oni vidas nur tion en la gazetoj.»

Li diris ankaŭ al mi, ke okdek mil militkaptitoj estas revenontaj, kaj ke tio estas bona afero por nia patrio.

V

La morgaŭon ni devis streĉi la horloĝojn en la urbo. Sinjoro Gulden, kiu maljuniĝis, ŝarĝis min per tiu tasko, kaj mi eliris frumatene. Ventopuŝo dum la nokto estis forpelinta la foliojn laŭlonge de la muroj. Ĉiuj venis repreni sur la ripozaltaroj unuj siajn torĉojn, aliaj siajn vazojn kun floroj. Tiu spektaklo ĉagrenis min, kaj mi pensis: «Nun ili estas farintaj sian funebran servon kaj devas esti kontentaj! Se nur la permeso alvenos, ĉio estos en ordo. Sed se tiuj homoj kredas amuzi nin per siaj kantoj, ili eraras. En la tempo de la imperiestro oni foriris al Rusio aŭ Hispanio, estas vere. Sed almenaŭ la ministroj ne igis langvori la junulojn. Mi ja volus scii, al kio utilas paco, se ne estas por edziĝi.»

Tiuj ideoj kolerigis min. Mi koleris kontraŭ Ludoviko XVIII, la grafo de Arsezio, la elmigrintoj, ĉiuj homoj, kaj mi ekkriis: «La nobeloj primokas la popolon!»

Reirinte hejmen, mi trovis sinjoron Gulden kovrantan la tablon. Dum la matenmanĝo mi diris al li, kion mi pensis. Li aŭskultis ridante kaj diris:

«Atentu, Josef, atentu! Ne lasu vin kuntreni. Vi faras al mi la impreson fariĝi jakobeno!»

Li ekstaris por malfermi la ŝrankon. Mi rigardis lin, pensante, ke li prenas botelon, kiam li transdonis al mi grandan kvadratan koverton kun granda ruĝa poŝtmarko.

«Jen, Josef,» li diris al mi, «jen io kion policserĝento Werner petis min transdoni al vi.»

En tiu momento mi sentis mian koron moviĝi, kaj mi rigardis la koverton per malklaraj okuloj.

«Ek, malfermu do!» ordonis min patro Gulden.

Mi malfermis kaj mi provis legi, sed mi bezonis tempon, kaj subite mi ekkriis:

«Sinjoro Gulden, estas la permeso!»

«Ĉu vi estas certa?»

«Jes, estas la permeso!» mi ekkriis levante la manojn.

«Ha! Tiu fripona ministro do fine respondis!» diris sinjoro Gulden.

Sed mi diris al li:

⁵⁴ Ronda trikolora insigno de la Revolucio

«Aŭskultu, mi scias nenion pri politiko. La permeso alvenis kaj la resto ne koncernas min.»

Li laŭte ekridis kaj ekkriis:

«Ha, bona Josef, bona Josef!»

Mi komprenis, ke li primokas min iomete, sed tio estis egala al mi.

«Nun tuj necesas averti Trinel kaj onklinon Gredel,» mi ekkriis en la ĝojo de mia koro... «Ni devas rapide sendi la filon Chadron.»

«He! Iru vi mem, tio estos pli bona,» diris al mi tiu bonega viro.

«Kaj la laboro, sinjoro Gulden?»

«Ba! Ba! En tia kazo la laboro povas atendi. Iru, mia infano, rapidu. Kiel do vi volus labori je tiu ĉi horo? Vi ne plu vidas klare!»

Estis vere : mi estus povinta fari nenion. Mi ekstaris tiel kontenta, ke mi kisis sinjoron Gulden. Tiam, sen preni la tempon ŝanĝi la vestaĵojn, mi foriris kurante. Kaj vidu, kion faras ĝojo: mi jam estis pasinta tra la Germanan Pordegon, sur la ponto, preter la avanceon, la gastejon *la Radeto*, la ĉevalpoŝtejon sen vidi ion ajn, kaj malkovrante nur je ducent aŭ tricent paŝoj de la vilaĝo nian kamenon kaj la malgrandajn fenestrojn – mi memoras ĉion kvazaŭ en sonĝo –, mi relegis la permeson kaj ripetis al mi: «Estas vere! Jes, estas vere! Kia feliĉeco!... Kion ili diros?»

Jen kiel mi alvenis ĉe la onklino. Mi puŝmalfermis la pordon, ekkriante:

«Jen la permeso !»

Onklino Gredel en lignoŝuoj ĵus estis balaanta la kuirejon kaj Trinel estis malsupreniranta la malnovan lignan ŝtuparon kun nudaj brakoj kaj blua ŝalo krucforme nodita ĉirkaŭ ŝiaj mamoj. Ŝi ĵus estis serĉinta dehakajojn en la subtegmento, kaj ambaŭ, vidante min kaj aŭdante min ekkrii: «Jen la permeso!» haltis kvazaŭ kaptitaj. Sed mi ripetis: «Jen la permeso !» Kaj onklino Gredel eklevis la manojn, kiel mi faris antaŭe, ekkriante:

«Vivu la reĝo !»

Trinel, tute pala, apogis sin sur la balustradon. En la sama momento mi estis apud ŝi kaj komencis tiel impete kisi ŝin, ke ŝi fine ripozigis sin sur mian ŝultron kaj ekploris kiel iu Magdalena, kaj mi portis ŝin, se tiel diri, malsupren, dum onklino Gredel saltetis turniĝante ĉirkaŭ nin kaj kriante:

«Vivu la reĝo! Vivu la ministro!»

Koncizadire, oni neniam vidis ion tian. Nia najbaro, la maljuna forĝisto Ruppert, en sia leda antaŭtuko kaj malpura ĉemizo, venis vidi, kio okazas, kaj diris:

«Nu... Nu... Kio do estas, najbarino?»

Li tenis sian grandan pinĉtenaĵlon kaj rigardis nin per siaj malgrandaj okuloj. Tiam ni iomete retransviliĝis, kaj mi respondis:

«Ni ĵus ricevis la permeson geedziĝi.»

«Ha, estas do tio,» li diris, «nun mi komprenas, nun mi komprenas.»

Li estis lasinta la pordon malfermita, kaj kvin aŭ ses genajbaroj, Anna Schmutz, la ŝpinistino, Kristof Wagner, la arbargardisto, Zaferi Gross kaj kelkaj aliaj baldaŭ alvenis. La ĉambro baldaŭ estis plena je homoj. Mi komencis laŭte legi la permeson. Ĉiuj atente aŭskultis. Kiam mi finis, Trinel rekomencis plori kaj la onklino diris:

«Tiu ministro, vi vidas, Josef, estas la plej bona inter la homoj... Se li estus ĉi tie, mi kirus lin kaj invitus lin al la geedziĝa festo. Li havus la honoran placon flanke de sinjoro Gulden.»

Post tio, kiam la najbaroj estis foririntaj por disvastigi la novaĵon, mi rekomencis fari deklarojn al Trinel, kvazaŭ la antaŭaj jam ne estus validaj, kaj mi igis ŝin ripeti milfoje, ke ŝi amas nur min, tiel ke ni estis tute emociitaj kaj poste ĝojaj, kaj tio daŭris ĝisvespere. La onklino, kiu estis kuiranta, kriis, parolante al si mem: «Jen kio estas bona reĝo!» Aŭ: «Se mia povra Franz revenus surteren, li estus feliĉa hodiaŭ, sed oni ne povas havi ĉion !»

Ŝi ankaŭ diris, ke tiu procesio faris al ni multan bonon. Trinel kaj mi respondis nenion : nia ĝojo estis tro granda. Ni tagmanĝis, trinkis kafon je la kvara kaj vespermanĝis sen vidi aŭ aŭdi ion, kaj nur ĉirkaŭ la naŭa vespere mi subite rimarkis, ke estas nokto kaj ke mi devas foriri. Tiam la onklino, Trinel kaj mi eliris kune. Estis bela lunluma nokto. Ili rekondukis min ĝis *la Radeto*, kaj dum la promeno ni inter-konsentis, ke la geedziĝo okazos post du semajnoj. Antaŭ farmbieno, sub maljunaj popoloj, la onklino kisis min, mi ĉirkaŭbrakis Trinel, kaj tiam mi vidis ilin regrimpi la deklivon ĝis la vilaĝo. Ili returnis sin, levante la manon, kaj mi ankaŭ levis la mian. Fine, kiam ili malaperis, mi reprenis mian promenon al la urbo, kie mi alvenis je la deka. Mi trairis la grandan placon kaj mi reiris hejmen.

Sinjoro Gulden ankoraŭ maldormis en sia lito. Li aŭdis min mallaŭte malfermi la pordon. Mi ekbruligis la lampon kaj mi volis eniri mian ĉambron, kiam li vokis min:

«Josef!»

Tuj mi proksimiĝis, kaj li disetendis al mi la brakojn. Ni ĉirkaŭbrakis nin, tiam li diris:

«Estas bone, mia infano, estas bone. Vi estas feliĉa kaj vi meritas tion. Nu enlitiĝu; morgaŭ ni parolos.»

Tiam mi enlitiĝis, sed longe mi ne povis ekdormi. Ĉiumomente mi revekiĝis, pensante: «Ĉu estas vere? Ĉu la permeso vere alvenis?» En la frua mateno tamen mi fine ekdormis. Kiam mi vekigis, jam estis plena tago. Mi saltis el la lito por vesti min, kaj sammomente sinjoro Gulden ĝoje kriis al mi de la najbara ĉambro:

«Josef, venu do sidiĝi ĉe la tablo !»

«Pardonu, sinjoro Gulden,» mi diris al li, «mi estis tiel kontenta, ke mi preskaŭ ne povis

ekdormi.»

«Jes, jes, mi aŭdis vin,» li respondis, ridetante.

Mi eniris nian atelieron, kie la tablo jam estis kovrita.

VI

Post la feliĉo edziĝi al Trinel, mia plej granda ĝojo estis la penso, ke mi fariĝos civilulo, ĉar inter batali kontraŭ la reĝo de Prusio kaj labori por sia propra prospero estis granda diferenco. Sinjoro Gulden diris al mi, ke li asocies min al sia komerco, kaj mi imagis Josef Seitz, kondukanta la dimanĉojn sian edzineton al la meso, poste al promeno al Roche-Plate aŭ Bonne-Fontaine. Tiu revo plaĉis al mi. Dume mi iris viziti Trinel ĉiuvespere. Ŝi atendis min en la fruktarbaro, dum onklino Gredel preparis *kuchlen* kaj la *kugelhof* por la geedziĝa festo. Ni rigardis nin tutajn horojn. Ŝi estis freŝa kaj gaja kaj plibeliĝis ĉiutage.

Sinjoro Gulden, vidante min reeniri ĉiuvespere ĉiam pli kontenta, diris al mi:

«Nu, Josef, tio ŝajnas al mi iri pli glate ol apud Leipzig!»

Kelkfoje mi estis volinta reeklabori, sed li melhelpis min, dirante:

«Ba, Josef! La feliĉaj tagoj estas tiel maloftaj en la vivo! Iru viziti Trinel! Poste, kiam mi ekhavos la ideon edziĝi ankaŭ, vi laboros por ni ambaŭ.»

Li ridis. Ha! Tiaj homoj devus vivi cent jarojn. Kiel bona koro! Kia homo justa kaj simpla! Li estis por ni vera patro. Kaj ofte, ankoraŭ hodiaŭ, kiam mi bildigas lin al mi kun lia ĉapo el nigra silko tirita super la oreloj, lia griza barbo longa je ok tagoj, liaj okuloj duonfermitaj kun esprimo de bona humoro kaj lia rideto sur la lipoj, ofte, post tiom da jaroj ŝajnas al mi, ke mi ankoraŭ aŭdas lian voĉon, kaj larmoj venas en miajn okulojn.

Sed nun mi devas rakonti al vi ion kio okazis la tagon antaŭ nia geedziĝo kaj neniam forviŝiĝos el mia memoro. Estis la 6-a de julio. La geedziĝo estis okazonta la 8-an, kaj la tutan nokton mi sonĝis nur pri tio. Matene mi ellitiĝis inter la 6-a kaj la 7-a. Patro Gulden jam laboris kun malfermitaj fenestroj. Mi lavis mian vizaĝon, intencante kuri al Quatre-Vents. Sed jen trumpetsignalo kaj du tamburbatoj resonas sub la Franca Pordego, kiel kiam alvenas regimento. La trumpetistoj provas sian surbuŝaĵon, kaj la tamburistoj aŭdigas du aŭ tri batetojn por bone enmanigi al si la bastonetojn. Aŭdinte tion, mi sentas kiel la haroj stariĝas sur mia kapo kaj mi ekkrias:

«Sinjoro Gulden, estas la 6-a!»

«Ha, jes,» li diras, «ekde semajno la tuta urbo parolas pri ĝi, sed vi aŭdas nenion plu. Estas la geedziĝa bukedo, Josef, mi volis surprizi vin.»

Tiam mi aŭdis plu nenion, mi trapaŝis la ĉambron kiel vento kaj mi rapidis malsupren. Nia maljuna ĉeftamburisto, Padoue, jam levis sian bastonon sub la sombra pordego, la tamburistoj venis post li balanciĝante sur siaj koksoj; kaj pli fore komandanto Gémeau, surĉevale, kaj la grandaj ruĝaj plumoj de niaj grenadistoj malrapide antaŭeniris: estis la 3-a bataliono. La marŝo komenciĝis, kaj mia sango ĉesis flui. Unuavide mi rekonis la longajn grizajn kapotojn, kiujn ni ricevis la 22-an de oktobro 1813 sur la taluso de Erfurt. Ili fariĝis tute verdaj pro pluvo, neĝo kaj vento. Estis pli malbone ol apud Leipzig. La malnovaj ĉakoj havis truojn de kugloj, nur la flago estis nova en ĝia bela ujo de vaksizita tolo, la lilio sur ĝia finaĵo...

Aĥ, tiuj kiuj neniam militiris, neniam scios, kio signifas, ke oni revidas sian regimenton, aŭdas la samajn tamburruladojn kiel fronte al malamiko, kaj diras al si: «Jen viaj kamaradoj kiuj revenas, venkitaj, humiligitaj, rompita, klinante la kapon sub alia kokardo!» Ne, mi sentis nenion tian. Poste multaj el la viroj de la 6-a regimento, miaj maljunaj oficiroj, miaj maljunaj serĝentoj venis setli en Falsburgo, kie oni ĉiam bone akceptis maljunajn soldatojn: Lafèche, Carabin, Lavergne, Mouyot, Padoue, Chazy kaj ankoraŭ multaj aliaj. Tiuj kiuj komandis min dum la milito, estis fariĝontaj miaj lignosegantoj, portistoj, kovristoj, ĉarpen-tistoj, masonistoj. Doninte antaŭen ordonojn al mi, ili devis nun obei min, ĉar mi havis bonan staton, mi havis butikon. Ili ja estis simplaj laboristoj. Sed estas egale, parolante al ili, mi ĉiam gardis la respekton de miaj eksaj ĉefoj, mi ĉiam pensis: «Tie for apud Weissenfelz, Lutzen kaj Leipzig, tiuj viroj nun devigataj kliniĝi kaj labori kun peno por vivteni sian familion, tie for kondukis la avangardon: ili reprezentas la honoron kaj kuraĝon de Francio.» Sed tiuj ŝanĝoj estis okazontaj nur post Waterloo!... Kaj nia eksa flagportisto, Faizart, balaadis dum dek kvin jarojn la ponton de la Germana Pordego. Ne estas bele... ne... La patrio devus esti pli dankema!

Estis do la 3-a bataliono kiu revenis en tia mizero, ke tio sangis la koron de la honestaj homoj. Zebedeus rakontis al mi, ke ili foriris de Versailles la 31-an de marto, post la kapitulaco de Parizo, kaj ke oni igis ilin marŝi de Versailles al Chartres, de Chartres al Châteaudun, posta al Blois, al Orléans kaj tiel plu kiel veraj almozuloj dum ses semajnoj sen soldo kaj sen ekipaĵo. Fine en Rouen ili ricevis la ordonon tramarŝi la tutan Francion por reveni al Falsburgo kaj ĉie la procesioj kaj funebraj servoj

ekscitis la popolon kontraŭ ili. Ili devis ĉion elteni! Eĉ bivakadon sur kampoj, kiam rusoj, aŭstroj, prusoj kaj aliaj friponoj trankvile vivis en niaj vilaĝoj.

Rakontante al mi tiujn mizerojn multe pli malfrue, Zebedeus ploris pro kolero.

«Ĉu Francio jam ne estas Francio?» li demandis. «Ĉu ni ne defendis ĝian honoron?»

Sed kio ankoraŭ plezurigis miajn maljunulajn tagojn estas la maniero, kiel la 6-a estis akceptita ĉe ni. Oni jam sciis, ke ankaŭ la 1-a bataliono estas revenanta de Hispanio, kaj ke la resto de la regimento kaj tiuj de la 24-a de la leĝera infanterio devos konsistigi la 6-an regimenton de Berrio, tiel ke la tuta urbo ĝojis, pensante, ke ni estas havontaj garnizonon de du mil viroj anstataŭ kelkaj maramearaj kano-nistoj, kiuj similis al veteranoj. Estis granda ĝojo, kaj ĉiuj kriis: «Vivu la 6-a!» La infanoj kuris ĝis sur la deklivo Sankta-Johano renkon-te al ĝi, kaj la bataliono nenie estis akceptita tiumaniere ekde 1813; pluraj maljunuloj ploris, kriante en la vicoj: «Vivu Francio!» Malgraŭ tio la oficiroj, deprimitaj, klinis la kapon. Ili faris nur signon per la mano kvazaŭ por danki la homojn pro tiel bona akcepto.

Mi, sur la sojlo de nia domo, rigardis defili tiujn tricent aŭ kvarcent virojn tiel ĉifonajn, ke mi rekonis nur nian numeron. Sed subite mi ekvidis Zebedeus, kiu marŝis kiel vicfermanto, tiel maldika, ke lia granda aglonazo kvazaŭ beko elstaris de lia kapo. Lia maljuna kapoto pendis en franĝoj de lia dorso, sed li havis la rangalonojn de serĝento, kaj liaj larĝaj ostecaj ŝultroj, kvazaŭ blankardo, donis al li solidan aspekton. Ekvidante lin, mi eligis krion, kiun oni aŭdis super la rulado de la tamburoj:

«Zebedeus!»

Li returniĝis, kaj mi saltis inter liajn brakojn dum li metis la kolbon teren ĉe la angulo de la strato Fouquet. Mi ploris kiel infano. Li diris:

«Ĉu estas vi, Josef? Aĥ, almenaŭ restas du.»

«Jes, estas mi,» mi diris al mia maljuna amiko, «kaj mi estas edziĝonta al Trinel. Vi estos mia honora fraŭlo.»

Tiam ni marŝis pluen. Pli fore, ĉe la angulo de Houte, la maljuna Fürst atendis rigardante per pro larmoj malklaraj okuloj. Tiu povrulo pensis: «Nun ankaŭ mia filo povis reveni!» Kaj vidante Zebedeus proksimiĝi kun mi, li rapide eniris la etan sombran aleon de lia domo. Sur la placo patro Klipfel kaj kvin aŭ ses aliaj ankaŭ rigardis la batalionon marŝantan envice. Ili ricevis la forpasaktojn, sed estis egale: ili eble esperis, ke oni faris erarojn, ĉar la junuloj ne ŝatis skribi leterojn. Ili rigardis kaj poste foriris, kiam la rulado denove malproksimiĝis..

Oni faris apelon. En tiu momento la maljuna tombisto alvenis. Li ĉiam surhavis sian malgrandan veŝton el flava veluro kaj sian ĉapon el

griza kotono. Li rigardis malantaŭ la vicoj, kie mi babilis kun Zebedeus, kaj Zebedeus, returninte sin, vidis sian patron kaj tute paliĝis. Mi prenis lian fusilon, kaj la maljunulo ĉirkaŭ-brakis sian filon. Ili diris nenion kaj longe restis ĉirkaŭbrakantaj unu la alian. Post tio, ĉar la bataliono turniĝis dekstren por iri al la kazerno, Zebedeus petis de kapitano Vidal la permeson iri kun sia patro kaj donis sian fusilon al la unua soldato. Kiam ni kune foriris tra la strato de la Kapucenoj, la patro diris:

«La avino estas tiel maljuna, ke ŝi ne plu povas leviĝi de la lito. Sen tio ŝi estus veninta.»

Mi sekvis ilin ĝis la pordo kaj diris:

«Venu vespermanĝi ĉe ni, patro Zebedeus kaj vi ankaŭ.»

«Mi volonte venos,» respondis la patro, «jes, Josef, ni venos.»

Tiam ili eniris sian domon, kaj mi reiris hejmen averti sinjoron Gulden pri mia invito, kio ĝojigis lin, des pli ke Trinel kaj la onklino ankaŭ devis veni.

Mi neniam estis pli feliĉa ol en tiu ĉi momento, pensante, ke mia plej kara amiko, mia amantino kaj ĉiuj kiujn mi amis, estos kune en nia domo.

Tiun tagon ĉirkaŭ la dek-unua nia granda ĉambro en la unua etaĝo ofertis gajan bildon: la bone purigita planko, la ronda tablo en la mezo kovrita per bela tablotuko kun ruĝaj retoj kaj ses arĝentaj manĝilaroj; la buŝtukoj falditaj en formo de boatoj en la brilaj teleroj; la salujo, la sigelitaj boteloj, la grandaj glasoj kun facetoj, ĉio brilis en la sunlumo, kiu penetris tra la fenestroj trans la vazoj kun siringoj.

Sinjoro Gulden volis, ke ĉio estu farita mal-avare, abunde kaj bele. Li estis retirinta de la korbo sian arĝentaĵojn, afero tute eksterordinara, kaj, escepte de la stufpoto, kiun mi mem vartis kaj en kiu troviĝis tri funtoj da bona viando, kapo de brasiko, abundaj karotoj, resume ĉio sen kio ne estas eble havi bonan manĝon, eĉ ne en hotelo, la tuta resto devis veni de la hotelo *la urbo Metz*, kie sinjoro Gulden estis irinta mem mendi la vesper-manĝon.

Tiel ke, proksime de tagmezo, ni rigardis unu la alian, ridetante kaj frotante al ni la manojn: li en lia bela avelkolora palto, bone razita, lia granda iomete rufa peruko anstataŭ la ĉapo el nigra silko, lia maronkolora kuloto, konvene bukita super liaj dikaj lanaj ŝtrumpoj, liaj ŝuoj kun larĝaj bukoj sur la piedoj; kaj mi en mia helblua palto laŭ la plej nova modo, la fajna ĉemizo plisita sur la antaŭa flanko kun kontenteco en la koro.

Mankis nur la gegastoj: Trinel, onklino Gredel, la tombisto kaj Zebedeus. Ni promenadis tien kaj reen kun ridanta vizaĝo, dirante al ni: «Ĉio estas en ordo, ĉio estas sur sia loko. Nun oni devas pretigi la supujon.» Kaj de tempo al

tempo mi lanĉis rigardon eksteren por vidi, ĉu oni venas.

Finfine onklino Gredel kaj Trinel turnis ĉirkaŭ la angulon de la strato Fouquet: ili revenis de la meso, la misalon sub la brako. Kaj pli fore mi vidis la maljunan tombiston en lia bela palto kun larĝaj manikoj, la malnovan dupintan ĉapelon transverse sur la ŝultroj, kaj Zebe-deus, kiu estis metinta alian ĉemizon kaj razinta sin: ili alvenis de la remparoj, donante al si reciproke brakon kun serioza mieno, kiel teneriĝintaj viroj, ĉar ili estas tute feliĉaj.

Tiam mi diris:

«Jen ili estas, sinjoro Gulden.»

Ni havis ĝuste la tempon verŝi la buljonon sur la jam rostitan panon kaj meti la grandan fumantan supujon mezen de la tablo, kio okazis prospere. Preskaŭ tuj Trinel kaj onklino Gredel eniris. Mi lasas vin imagi ilian surprizon, kiam ili vidis tiun belan tablon. Ni apenaŭ estis kisintaj unuj la aliajn, kiam la onklino ekkriis:

«Estas do hodiaŭ la geedziĝa festo, sinjoro Gulden?»

«Jes, sinjorino Gredel,» respondis la brava viro ridetante – ĉar dum la ceremoniaj tagoj li solene nomis ŝin 'sinjorino Gredel' anstataŭ mia *commère* aŭ patrino Gredel –, «jes, estas la geedziĝa festo de bonaj geamikoj. Vi scias, ke Zebedeus revenis hejmen kaj ke li tag-manĝos ĉe ni kun la maljuna tombisto.»

«Ha!» diris la onklino, «Tio faras al mi plezuron.»

Kaj Trinel, fariĝinta tute ruĝa, mallaŭte diris al mi:

«Nun ĉio estas en ordo... Jen kio mankis al ni por esti tute feliĉaj.»

Ŝi rigardis min, tenante mian manon. Kaj ĉar ni atendis, iu malfermis la pordon: la maljuna Laurent de *la urbo Metz* kun du altaj pankorboj, en kiu la manĝaĵoj estis ranĝitaj en bela ordo unuj sur la aliaj, kriis ekde la aleo:

«Sinjoro Gulden, jen via vespermanĝo!»

«Bone, bone,» respondis sinjoro Gulden, «metu tion sur la tablon vi mem.»

Tiam Laurent surtabligis la malgrandajn rafanetojn, la raguon de kokido, belan grasan anseron dekstre, kaj maldekstre la bovaĵon, kiun mi mem estis metintaj en petroselon. Li ankaŭ surtabligis bonan pladon de saŭrkraŭto kun malgrandaj kolbasetoj, proksime de la supujo, tiel ke neniam nia ĉambro vidis tian vespermanĝon.

En la sama momento ni aŭdis la maljunan tombiston kaj Zebedeus supreniri. Sinjoro Gulden kaj mi iris renkonte al ili, kaj sinjoro Gulden, kisante Zebedeus, diris al li:

«Mi estas kontenta vidi vin! Jes. Mi scias, ke vi montris vin bona kamarado por Josef meze de la plej grandaj danĝeroj.»

Tiam li premis la manon al la maljuna tombisto, dirante al li:

«Patro Zebedeus, mi gratulas vin, ke vi havas tian filon.»

Kaj ĉar Trinel estis veninta malantaŭ ni, ŝi diris al Zebedeus:

«Mi ne povas fari pli grandan plezuron al Josef ol kisante vin. Vi volis porti lin al Hanau, kiam la fortoj ekmankis al vi. Mi konsideras vin kiel frato.»

Zebedeus, tute pala, kisis Trinel sen diri ion, kaj ni eniris la ĉambron silentante, Trinel, Zebedeus kaj mi. La maljuna Gulden kaj la maljuna tombisto sekvis nin. Onklino Gredel estis ankoraŭ aranĝanta la pladojn, kaj tuj ekkriis:

«Estu bonvenaj! Estu bonvenaj! Tiuj kiuj renkontis sin en malfeliĉo, retrovas sin en ĝojo. La Sinjoro ĵetas sian rigardon sur ĉiujn homojn.»

Ŝi kisis Zebedeus, kiu diris al ŝi ridetante:

«Ankoraŭ ĉiam freŝa kaj bonfarta, sinjorino Gredel. Estas plezuro vidi vin!»

«Nu, patro Zebedeus, sidiĝu ĉi tie ĉe la komenco de la tablo,» ekkriis sinjoro Gulden tute gaje, «kaj vi, Zebedeus, tie, kontraŭ via patro, tiel ke mi havas vin ambaŭ je mia dekstra kaj maldekstra flankoj; kaj pli fore Josef fronte al Trinel, apud Zebedeus; kaj sinjorino Gredel ĉe la alia tablofino por gardi la tuton.»

Ĉiuj estis kontentaj pri sia loko. Zebedeus rigardis min ridetante kvazaŭ por diri al mi:

«Se ni estus havintaj kvaronon de tia tagmanĝo en Hanau, ni ne estus falintaj sur la rando de la vojo!»

Koncizadire, ĝojo kaj bona apetito brilis sur ĉiuj vizaĝoj. Patro Gulden, fariĝinte serioza, metis la grandan kuleregion en la supujon sub la okuloj de ĉiuj gegastoj. Unue li servis la maljunan tombiston, kiu diris nenion kaj ŝajnis tenerigita, poste ties filon; tiam Trinel, onklinon Gredel, min kaj sin mem. Kaj la vespermanĝo komenciĝis en speco de silenta enmemiĝo.

Zebedeus okulumis al mi, rigardante min de tempo al tempo kun kontenta mieno. Oni malkorkis la unuan botelon kaj plenigis la glasojn. Oni trinkis bonan, ordinaran vinon, sed estis devonta veni pli bona vino, kaj tial oni atendis por trinki je ĉies sano. Oni manĝis bonan tranĉon da bovaĵo, kaj la maljuna tombisto diris:

«Jen io bongusta... Estas vere bongusta bovaĵo.»

Kaj ĉar li trovis ankaŭ la raguon de kokido tre bona, mi povis konstati, ke Trinel estas sprita virino, ĉar ŝi diris:

«Vi scias, patro Zebedeus, ke ni estus invitintaj vian patrinon Margareta, kiun mi vizitas de tempo al tempo, sed ŝi estas tro maljuna por ellitiĝi. Tial, se vi permesas, mi iros al ŝi, por ke

almenaŭ ŝi manĝu pecon kun ni kaj trinku glason da vino je la sano de sia nepo. Kion vi pensas pri tio, patro Zebedeus?»

«Ĝuste pri tio mi mem estis pensanta,» diris la maljuna tombisto.

Emociita, patro Gulden rigardis Trinel, kiu ekstaris por elekti konvenan pecon. Li kisis ŝin, kaj mi aŭdis, kiel li nomis ŝin sia filino!

Ŝi eliris kun botelo kaj telero. Kiam ŝi estis ekstere, Zebedeus diris al mi:

«Josef, via estonta edzino meritas ĉiujn honorojn. Ŝi ne nur estas honesta knabino, ŝi ne nur estas virino, kiu meritas esti amata, ŝi ankaŭ meritas respekton, ĉar ŝi havas grandan koron. Ŝi sentis, kion pensis mia patro kaj mi antaŭ tia bona tagmanĝo. Ŝi vidis, ke la tagmanĝo farus al ni milfoje pli da plezuro, se ankaŭ mia avino ricevus sian parton, kaj jen kial mi ĉiam amos ŝin kiel fratino.»

Tiam li diris al mi tre mallaŭte:

«Josef, en momento de ĝojo oni pli forte sentas la ĉagrenon esti malriĉa. Ne sufiĉas, ke mi donis mian sangon al la patrio, necesis ankaŭ, ke, revenante hejmen, pro tio mi trovis mizeron en mia hejmo.»

Mi komprenis, ke li fariĝis malgaja. Tial mi plenigis sian glason, ni trinkis, kaj tiuj nigraj pensoj malaperis. Trinel revenis kaj diris, ke la avino estis tre feliĉa, ke ŝi dankas sinjoron Gulden kaj ke estis tre bela tago por ŝi. Tio ĝojigis ĉiujn. Kaj ĉar la tagmanĝo daŭris, onklino Gredel, kiu aŭdis sonorigi por la vespro, eliris, sed Trinel restis, kaj la vikleco, kiun enspiris la bona vino, kiu fine estis veninta, oni komencis paroli pri la lasta militiro.

Estis tiam, ke ni eksciis pri tiu longa retiriĝa marŝo ekde Rejno ĝis malantaŭ Parizo; la bataloj de nia bataliono apud Bibelskirchen kaj Saarbrücken, kie leŭtenanto Baubin trans-naĝis la riveron Saar, dum frostis tiel forte, ke krakis la ŝtonoj, por detruigi kelkajn barkojn, kiujn ankoraŭ posedis la malamiko; la pasado ĉiam en retiriĝo al Narbefontaine, Courcelles, Metz, Enzelvin, Champlon, Verdun; la batalo apud Brienne. Preskaŭ jam ne restis viroj en la bataliono, sed la 4-an de februaro oni replifortigis ĝin per restoj de la 5-a armeo, kaj ekde tiu momento oni estis ĉiutage sub la pafado de la malamiko: la 5-an, 6-an kaj 7-an en Méry-sur-Seine; la 8-an en Sézanne, kie la soldatoj mortis en koto, jam ne havante la forton retiriĝi; la 9-an kaj 10-an en Mûrs, kie, la vesperon, Zebedeus kaŝis sin en la sterkamaso de farmbieno por varmigi sin; la 11-an, la terura batalo apud Marché, kie komandanto Philippe estis vundita per bajonetpiko; la 12-an kaj 13-an, la pasado al Montmirail; la 14-an, la batalo apud Beauchamp; la 15-an kaj 16-an la marŝo malantaŭen al Montmirail, kien la prusoj estis revenintaj; la bataloj apud Ferté-Gaucher,

Jouarre, Gué-au-Train, Neufchettes, kaj tiel plu! Kiam oni estis batinta la prusojn, alvenis la rusoj; post la rusoj, la aŭstroj, la bavaroj, la virtemberganoj, la hesoj, la saksoj, la bade-nanoj.

Mi ofte aŭdis rakonti tiun militiron en Francio, sed neniam kiel faris tion Zebedeus. Kiam li parolis, lia longa, magra vizaĝo tremetadis, lia longa nazo kurbiĝis sur la kvar haroj de lia flava liphararo kaj liaj okuloj fariĝis malklaraj. Li etendis la brakon en la malnova kava maniko, kaj tion kion li diris, oni povis vidi: oni vidis la grandajn ebenaĵojn de Campanjo, kie dekstre kaj maldekstre fumadis la vilaĝoj; virinojn, infanojn kaj gemaljunulojn, kiuj forkuris en grupoj, duone nudajn, forportante unu sian malnovan pajlomatracon, alia kelkajn mal-novajn meblojn sur ĉaro, dum densa neĝo falis el la ĉielo, kanonoj tondris en la foreco kaj kozakoj preterrapidis kiel vento, dum tintadis kuiriloj kaj eĉ malnovaj horloĝoj pendantaj je iliaj seloj, kriante: «Huraa!»

Oni vidis tiujn furiozajn batalojn, unu kontraŭ dek; malesperajn kampulojn, kiuj tuj venis kun forkegoj; kaj vespere la imperiestron, ekstere, rajde sidantan sur ŝego apud fajreto kun la manoj krucigitaj sur la dorsapogilo kaj la generaloj ĉirkaŭe. Tiel li dormis kaj sonĝis! Devis pasi tra lia kapo teruraj pensoj ekde Marengo, Austerlitz kaj Wagram!

«Ha ! Batali, suferi pro malsato, malvarmo, mizero, marŝoj kaj kontraŭmarŝoj, tio estas nenio,» diris Zebedeus, «sed aŭdi plori kaj ĝemi france virinoj kaj infanoj meze de ĉiuj tiuj ruinoj, kaj scii, ke oni ne povos savi ilin; ke je pli da malamiko oni mortigos, des pli da ili venos; ke oni devas retiriĝi malgraŭ la venkoj, malgraŭ la kuraĝo, malgraŭ ĉio... Jen kio disŝiras al oni la koron, sinjoro Gulden !»

Aŭskultante lin, ni rigardis unuj la aliajn. Neniu plu emis trinki, kaj patro Gulden, klinante sian grandan kapon kun reva mieno, mallaŭte diris:

«Jes, jes: jen kion kostas gloro! Ne sufiĉas perdi liberecon, perdi ĉiujn rajtojn kiujn oni gajnis per tiom da peno, necesas ankoraŭ esti prirabita, bruligita, hakita de bandoj de kozakoj; necesas vidi, kion oni ne plu vidis de jarcentoj en nia lando: bandoj de rabistoj, kiuj diktas al ni siajn leĝojn! Ek, ek, ni aŭskultas vin, rakontu ĉion!»

Vidante nian malĝojon, Trinel plenigis la glasojn:

«Ek, je la sano de sinjoro Gulden, je la sano de patro Zebedeus!» ŝi diris. «Ĉiuj tiuj malfeliĉoj estas pasintaj: ili ne plu revenos.»

Kaj ni trinkis ! Kaj Zebedeus rakontis kiel ankoraŭ unufoje necesis renovigi la batalionon sur la vojo al Soissons per soldatoj de la 16-a armeo; kiel ili alvenis en Meaux, kie la hospitalo *la Kompato* disvastigis peston, malgraŭ la

vintro, kaŭze de la amasoj da vunditoj, kiujn oni jam ne povis flegi.

Estis terurege ! Sed la plej grava de ĉio estis, kiam li rakontis al ni sian alvenon en Parizo tra la bariero de Charenton: la imperiestrino, reĝo Joseph, la reĝo de Romo, la ministroj, la novaj princoj, la novaj dukoj, tiu tuta alta mondo, kiu fuĝis en kaleŝoj direkte al Blois, lasante la ĉefurbon al la malamiko, dum povraj laboristoj en bluaj bluzoj – kiuj tamen ricevis nenion de la imperio, sed kontraŭe estis devigataj donaci al ĝi siajn infanojn –, per miloj rapidis al la urbodomoj petante armilojn por defendi la honoron de Francio, kaj kiujn la maljuna Gvardio repuŝis per bajonetoj!... Tiam patro Gulden subite ekkriis:

«Tio sufiĉas, Zebedeus... Jen... Ni lasu tion... Ni prefere parolu pri io alia !»

Subite li paliĝis. En la sama momento onklino Gredel, kiu estis reveninta de la vespro, vidante nin ĉiujn mutaj kaj sinjoron Gulden konsternita, demandis:

«He! Kio do okazas ĉi tie?»

«Ni parolis pri la imperiestrino kaj la ministroj de la imperiestro,» respondis patro Gulden, ridante kun stranga mieno.

«Ha! Tio ne mirigas min, kiam la vino turnis al vi la koron,» ŝi diris. «Ĉiufoje kiam mi pensas pri tio kaj mi hazarde rigardas min en spegulo, mi vidas, ke tio igas min tute verda. Ha! La friponoj! Feliĉe ili estas tre for.»

Zebedeus ŝajnis malbonhumora. Sinjoro Gulden rimarkis tion kaj ekkriis:

«Estas egale, Francio ankoraŭ ĉiam estas granda kaj gloriĉa lando. Se la novaj nobeloj valoras nur ĝuste tiom, kiom la malnovaj, la popolo almenaŭ restas firma. Ili faru, kion ili volos, la burĝoj, laboristoj kaj kampuloj restos kunigitaj: ili havas la samajn interesojn kaj ili ne ellasos, kion ili tenas, kaj ne lasos meti al si la piedon sur la nukon. Kaj nun, amikoj, ni spiru freŝan aeron ekstere. Malfruiĝas. Patrino Gredel kaj Trinel devos ankoraŭ reiri al Quatre-Vents. Josef akompanos ilin.»

«Ne,» diris Trinel, «hodiaŭ Josef devos resti kun sia amiko Zebedeus; ni reiros solaj.»

«Nu, tiel estu, Trinel pravas,» diris sinjoro Gulden. «En tia tago amikoj devas resti kune.»

Ni eliris brakon en brako. Jam noktiĝis. Sur la Armilplaco oni denove kisis sin, kaj onklino Gredel kaj Trinel elektis la vojon al la vilaĝo, dum ni, farinte kelkajn rondojn sub la altaj tilioj, eniris la bierfarejon *la sovaĝa Homo*. Ni refreŝigis nin per bongusta ŝaŭmanta biero. Sinjoro Gulden rakontis pri la blokado, la atako kontraŭ la tegolejo de Pernette, la atakeliroj al la monto Bigel, al la supraj barakoj, kaj la bombardado. Tie mi unuafoje eksciis, ke li estis kanonĉefo, kaj ke li havis la unua la ideon rompi la gisajn fornojn por fari mitrajlon el ili. Tiuj historioj daŭris

ĝis nia reiro je la deka. Fine Zebedeus forlasis nin por iri al la kazerno, la maljuna tombisto reiris al la strato de la Kapucenoj, kaj ni al nia litoj, kie ni dormis ĝis la oka de la morgaŭo.

VII

Du tagojn poste okazis mia edziĝo al Trinel ĉe onklino Gredel en Quatre-Vents. Sinjoro Gulden reprezentis mian patron. Mi estis elektinta Zebedeus kiel honoran fraŭlon, kaj ankaŭ kelkaj malnovaj kamaradoj, restintaj en la bataliono, ĉeestis la nupton.

La morgaŭon post la festo Trinel kaj mi jam ekloĝis ĉe sinjoro Gulden en la du etaj ĉambroj super la ateliero.

Multaj jaroj estas pasintaj ekde tiam. Sinjoro Gulden, onklino Gredel kaj la kamaradoj malaperis de tiu ĉi mondo, Trinel fariĝis tute blanka. Nun ankoraŭ ofte, kiam mi rigardas ŝin, tiuj foraj tempoj resurektas: ŝajnas al mi, ke mi revidas ŝin je la aĝo de dudek jaroj, blonda kaj rozkolora. Mi vidas ŝin ranĝi niajn florpotojn antaŭ la fenestroj supre, mi aŭdas ŝin kanti mallaŭte, mi vidas la sunon brili tra la fenestro. Mi imagas, ke mi malsupreniras kun ŝi laŭ la malgranda kruteta ŝtuparo kaj diras kune, enirante en la atelieron: «Bonan matenon, sinjoro Gulden.» Li returnas sin ridetante kaj respondas nin: «Bonan matenon, infanoj.» Li kisas Trinel, kiu komencas balai la plankon, poluri la meblojn, meti stufpoton sur la fajron, dum ni rigardas la laboron, kiu estas fendanda dum la tago. – Ha! La bela tempo!... La bela vivo!... Kia ĝojo!... Kia plezuro esti juna, havi simplan, bonkoran, laboreman edzinon! Kiel ĉio ridas en via koro!... Kiel ni vidas la vivon etendiĝi antaŭ ni, foren... tre foren!... Ni neniam estos maljunaj!... Ni ĉiam amos unu la alian... Ni ĉiam gardos tiujn, kiujn ni amas !... Ni ĉiam havos kuraĝon!... Ni ĉiam promenos la dimanĉojn, brakon en brako, al Bonne-Fontaine !... Ni ĉiam sidiĝos sur la muskon en la arbaroj, aŭskultante la abelojn kaj la maj-skarabojn zumadi ĉirkaŭ la altaj arboj plenaj je lumo !... Ni ĉiam ridetos !... Kia ekzisto, Dio mia, kia ekzisto !...

Kaj tiam, vespere, ni reiras tre mallaŭte al nia nesto, kaj ni longe rigardas la grandajn orajn trenaĵojn, kiuj etendiĝas tra la ĉielo de Wechem al la arbaro de Mittelbronn, silentante kaj premante la manon unu al la alia, kiam la sonorileto de Falsburgo eksonigas la anĝeluson, kaj tiuj de la ĉirkaŭaj vilaĝoj respondas ĝin sur la jam malluma kamparo. Ha! Bela juneco!.. Bela vivo!... Ĉion tion mi vidas ankoraŭ antaŭ mi, estas la samo hodiaŭ kiel antaŭ kvindek jaroj. Aliaj alaŭdoj kaj aliaj silvioj

nestas en printempo, aliaj floroj blankigas la altajn pomarbojn... Necesas do, ke ni estu ŝanĝiĝintaj ! Necesas, ke ni estu maljuniĝintaj kiel aliaj estis maljunaj en nia juna tempo! Ĉio tio igus min kredi, ke ni refariĝos junaj, ke ni amos nin eterne, ke ni retrovos patron Gulden, onklinon Gredel kaj ĉiujn honestajn homojn. Alie, maljuniĝi estus tro malfeliĉe: Dio ne volus doni al ni tiun ĉagrenon sen espero. Ankaŭ Trinel pensas kiel mi.

Koncizadire, ni estis tute feliĉaj, ni vidis ĉion bela. Nenio povis perturbi nian feliĉecon.

Estis la tempo, kiam la aliancanoj per miloj, infanterio, kavalerio kaj artilerio, piede kaj surĉevale, pasadis preter nia urbo kun kverkofolioj sur siaj ĉakoj, siaj kaskoj, sur la finaĵo de siaj fusiloj kaj lancoj, por reiri hejmen. Ili eligis ĝojkriojn, kiujn oni aŭdis je distanco de unu mejlo, kiel oni aŭdas la kriojn de fringoj, turdoj, merloj kaj mil aliaj birdoj en la sezono de la fagofruktoj. En alia tempo tio ĉagrenus min, ĉar tio estis signo de nia malvenko. Sed tiam mi konsolis min, pensante: «Ili foriru kaj neniam plu revenu !» Kaj kiam Zebedeus venis rakonti al mi, ke ĉiutage rusaj, aŭstraj, prusaj kaj bavaraj oficiroj trairis nian urbon por saluti nian lokan komandanton, sinjoron de la Faisanderie, maljuna elmigrinto, kiu superŝutis ilin per honoroj; ke tiu aŭ alia oficiro de la bataliono provokis unu el tiuj fremduloj; ke tiu aŭ alia duonsolda oficiro mortigis du aŭ tri el ili en duelo, jen en *la Ruleto*, jen en *la Verda Arbo* aŭ en *la Florkorbo* –, ĉar oni duelis ĉie ajn. La niaj ne povis elteni la vidon de la malamikoj. Ĉie oni ĵetis sian palton teren, kaj la blankardoj de la hospitalo senĉese venis kaj reiris. Kiam Zebedeus rakontis al mi tiujn aferojn, aŭ kiam li diris al mi, ke oni metis tiom da oficiroj je duona soldo kaj anstataŭigis ilin per aliaj el Koblenz; ke oni devigas la soldatojn ĉeesti la mesojn vestitaj en ceremonia uniformo; ke la pastroj denove estas potencaj kaj ke epoletoj valoras nenion plu – anstataŭ koleriĝi, mi diris al mi: «Ba! Ba! Finfine ĉio aranĝiĝos... Nur se ni povos gardi trankvilecon, nur se ni povos labori kaj vivi en paco, tio estas la ĉefa afero.»

Mi ne pensis pri tio, ke ne sufiĉas esti mem kontenta por gardi pacon, sed ke necesas, ke ankaŭ la aliaj estu tiaj. Mi estus kiel onkline Gredel, kiu fartis bone post nia geedziĝo. Ŝi ofte venis viziti nin, sian korbon plenan je freŝaj ovoĵoj, fruktoj, legomoj kaj kukoj por nia familio, kaj ekkriis:

«He, sinjoro Gulden, oni ne bezonas demandi, ĉu la infanoj fartas bone, oni bezonas nur rigardi ilian mienon.»

Ŝi diris ankaŭ al mi:

«He, Josef, esti edziĝinta estas tute alia afero ol treni sakon kaj fusilon apud Lutzen, ĉu ne?»

«Jes, jes, patrino Gredel, mi kredas vin !» mi respondis ŝin, bonkore ridante.

Tiam ŝi sidiĝis, la manojn sur la genuoj kaj diris:

«Ĉio tio estas la sekvo de paco... Paco igas ĉiun feliĉa! Kaj kiam oni pensas, ke amaso da almozuloj, da ĉifonuloj ankoraŭ kuraĝas insulti nian reĝon !...»

Komence sinjoro Gulden, kiu laboris, ne respondis. Sed kiam ŝi daŭrigis, li diris:

«Nu, patrino Gredel, restu trankvila. Diable! Vi scias ja, ke nun opinioj estas liberaj. Ni havas du Ĉambrojn, ni havas Konstitucion, ĉiu povas havi sian opinion.»

«Tio estas vera,» replikis la onkline, oblikve rigardante min per maliceta mieno, «en la tempo de la alia, oni devis silenti, tio ankaŭ estas diferenco!»

Sinjoro Gulden ne daŭrigis la diskuton, ĉar li konsideris la onklinon kiel bonkoran virinon, sed kiu ne valoris la penon esti konvertita. Li tamen ridetis, kiam ŝi ne kriis tro forte, kaj la aferoj okazis tiel sen amareco, kiam alvenis novaĵoj.

Komence alvenis ordono de Nancy por devigi la homojn fermi la montrofenestrojn de siaj butikoj dum la dimanĉa diservo. La judoj kaj luteranoj estis devigataj fermi kiel la aliaj. Ekde tiu momento oni jam ne kriadis en la gastejoj, nek en la kabaretoj. Ĉio estis kvazaŭ mortinta en la urbo dum la meso kaj la vesproj. La homoj diris nenion plu kaj oni rigardis sin, kvazaŭ oni estus timigita.

La dimanĉon, kiam ni fermis unuafoje nian montrofenestron kaj ni tagmanĝis en la ombro, patro Gulden, kiu ŝajnis malgaja, diris:

«Mi esperis, miaj infanoj, ke ĉio estas finita, ke oni respektos prudenton, kaj ke ni havos trankvilecon dum multaj jaroj. Malfeliĉe mi vidas, ke tiuj Burbonoj estas speco de Dagobertoj⁵⁵... Ĉio tio refariĝas grava !»

Li ne diris pli tiun dimanĉon kaj eliris post-tagmeze por legi la gazetojn. Ĉiuj viroj kiuj scipovis legi, iris legi la gazetojn, ferminte sian butikon, dum la kampuloj iris al la meso. Ekde tiu tempo la burĝoj kaj la laborestroj kutimiĝis legi la gazetojn, kaj eĉ pli malfrue ili ekdeziris havi kazonon.

Mi memoras, ke ĉiuj parolis pri Benjamin Constant kaj ke oni fidis lin. Sinjoro Gulden multe amis lin, ĉar li kutimis eliri ĉiuvespere legi ĉe patro Colin, kio okazis tiun tagon. Tiel ankaŭ ni ankaŭ eksciis la novaĵojn. Li diris al ni: «La duko de Angulemo⁵⁶ estas en Bordojo, la grafo

⁵⁵ Nomo de merovidaj reĝoj, la tiel nomataj ‘mal-diligentaj’ reĝoj el la VII-a jarcento.

⁵⁶ Plej aĝa filo de la grafo de Artezio, frato de Ludoviko XVI kaj Ludoviko XVIII.

de Artezio⁵⁷ estas en Marsejlo, ili promesis tion ĉi, ili diris tion.»

Trinel estis pli scivolema ol mi, ŝi ŝatis aŭdi la novaĵojn pri la lando, kaj kiam sinjoro Gulden diris ion, mi vidis en ŝiaj okuloj, ke ŝi samopiniis. Luvespere li diris al ni:

«La duko de Berrio⁵⁸ venos ĉe nin.»

Ni multe miris pri tio.

«Kion li do venos fari ĉi tie, sinjoro Gulden?» demandis lin Trinel.

«Li venos revui la regimenton,» li diris ridetante. «Mi estas scivolema vidi lin. La ĵurnaloj rakontas, ke li similas al Bonaparte, sed ke li estas multe pli inteligenta. Tio ne estas miriga por legitima princo. Se li ne estus pli inteligenta ol filo de kampulo, tio estus malfeliĉa! Nu, Josef, vi, kiu konas la alian, vi juĝos pri la afero.»

Oni povas imagi, kiom tiu novaĵo stimulus la regionon. Ekde tiu tago oni pensis nur pri starigo de triumfarkoj, farado de blankaj flagoj; ĉiuj vilaĝoj en la ĉirkaŭaĵo devis veni sur ĉaroj kun girlandoj. Oni starigis triumfarkon en Fals-burgo kaj alian sur la deklivo de Saverne. Tio okazis fine de la monato septembro. Ĉiutage Trinel kaj mi iris vidi la progreson de la triumfarko. Ĝi troviĝis sur la vojo inter la hotelo *la urbo Metz* kaj la sukeraĵfarejo Duer. La maljuna ĉarpentisto Ulrich kaj liaj filoj starigis ĝin. Estis speco de granda pordo, kiun oni kovris per girlandoj de kverfolioj, kaj sur la fasadoj malfaldiĝis belegaj blankaj flagoj.

Dum oni finis tiun konstruaĵon, Zebedeus venis viziti nin du aŭ trifoje. La princo estis alvenonta tra Metz. Oni ricevis leterojn en la regimento, kiuj prezentis lin tiel severa, kiel se li estus gajninta kvindek batalojn. Sed kio precipe kolerigis Zebedeus, estis, ke la princo nomis niajn malnovajn oficirojn okazaj oficiroj.

Fine li alvenis la 1-an de oktobro je la sesa vespere. Oni jam pafis per kanono, kiam li estis nur sur la deklivo de Gerberhof. Li elveturiĝis antaŭ *la urbo Metz*, sen pasi sub la triumfarko. La placo estis plenplena je oficiroj en ceremonia uniformo. El ĉiuj fenestroj oni kriadis: «Vivu la Reĝo! Vivu la duko de Berrio!» ! kiel oni kriadis en la tempo de Napoleono: «Vivu la Imperiestro!»

Sinjoro Gulden, Trinel kaj mi ne povis alproksimiĝi, tiom la placo estis obstrukcita de la homoj. Ni vidis nur defili la kaleŝojn kaj la husarojn. Pikedo de ĉe ni fermis la vojon.

Tiun saman vesperon la duko ricevis la korpuson de oficiroj. Li degnis akcepti tagmanĝon, kiun ofertis al li la oficiroj de la 6-a, sed li invitis nur kolonelon Zapfel. Post la tagmanĝo,

kiu daŭris ĝis la deka, la emi-nentuloj donacis honore de li balon en la kolegio. Ĉiuj oficiroj amikoj de la Burbonoj en nigra vesto, kuloto kaj ŝtrumpoj el blanka silko, iris tien kun la princo. La bondevenaj fraŭlinoj ĉeestis amase en blankaj roboj. Mi kredas ankoraŭ aŭdi pasi meze de la nokto la ĉevalojn de la procesio kaj la milojn da krioj «Vivu la Reĝo! Vivu la duko de Berrio!»

Ĉiuj fenestroj estis prilumitaj. Antaŭ tiuj de la loka komandanto oni vidis grandan ĉielbluan blazonŝildon. La krono kaj la tri oraj lilioj brilis en la ombro. En la granda kolegia salono resonis regimanta muziko. Fraŭlino Bremer, kiu posedis tre belan voĉon, devis kanti antaŭ la princo la kanton *Vivu Henriko IV⁵⁹* ! Sed la morgaŭon la tuta urbo eksciis, ke ŝi estis kvazaŭ mutigita per la vido de la princo, kio malhelpis ŝin diri eĉ unu solan vorton, kaj la homoj ripetadis:

«Povra fraŭlino Félicité! Povra fraŭlino Félicité!»

La balo daŭris la tutan nokton. Sinjoro Gulden, Trinel kaj mi jam longe dormis, kiam proksimume de la tria matene nin vekis la preteriro de la husaroj kaj la krioj: «Vivu la Reĝo, Vivu la duko de Berrio!» La princoj certe havis bonegan sanon por iri al ĉiuj baloj kaj ĉiuj tagmanĝoj, kiujn oni ofertis al ili laŭlonge de la vojo. Verŝajne tio estis tedega por ili, precipe en pli longa daŭro kiam oni konstante nomis ilin: «Via Reĝa Moŝto, Via Duka Moŝto, Via Ekscelenco, Via Boneco, Via Justeco!» Koncizadire, ĉio eksterordinara kaj nova, kion oni povas inventi por kredigi ilin, ke oni adoras ilin kaj konsideras ilin kiel diojn. Jes, se fine ili malestimas la homojn, tio ne estas miriga: se oni farus la saman al ni, ni ankaŭ fine kredus, ke ni estas superhomoj.

Nu, kion mi ĵus rakontis, estas la pura vero, kaj mi diris nenion troan.

La morgaŭon ĉio rekomenciĝis, se tiel diri, kun nova entuziasmo. La vetero estis belega, sed tial ke la princo malbone dormis – ĉar vidi tiujn etajn burĝojn, kiuj volis imiti la kortegon sen sukcesi, multe tedis lin, eble ankaŭ ĉar li trovis, ke oni ne sufiĉe kriis: «Vivu la Reĝo! Vivu la duko de Berrio!», ĉar ĉiuj soldatoj silentis. Li estis tre malbonhumora.

Tiun tagon mi tre bone vidis lin dum la revuo, kiu okupis la flankojn de la placo. Ni estis – sinjoro Gulden, Trinel kaj mi – ĉe la ledokomercisto Wittman en la unua etaĝo, kaj dum la beno de la flago kaj la *Te Deum* en la preĝejo, ni ankaŭ vidis lin, ĉar ni sidis sur la kvaran benkon fronte al la ĥorejo. Oni diris, ke li similas al Napoleono, sed tio ne estas vera. Li

⁵⁷ Pli juna frato de Ludoviko XVI kaj Ludoviko XVIII, poste reĝo sub la nomo Karlo X.

⁵⁸ Dua filo de la grafo de Artezio.

⁵⁹ La unua reĝo de la dinastio de la Burbonoj, kiu estis tre populara. Li reĝis de 1589-1610.

estis bona, dika knabo, malgranda kaj masivkorpa, kun palaj vangoj pro laceco, kaj neniel vigla, kontraŭe. Dum la tuta diservo, li nur oscedadis, malrapide balanciĝante sur la koksoj kvazaŭ kamenhorloĝo. Mi diras, kion mi mem vidis, kaj tio montras, kiom la homoj estas blindaj : ili volas ĉie vidi similecojn.

Mi memoras ankaŭ, ke, dum la revuoj la imperiestro venis surĉevale, kaj ke per unu rigardo li malkovris, ĉu ĉio estas en ordo. Anstataŭe la duko piede proksimiĝis al la vicoj, kaj du- aŭ trifoje li faris riproĉojn al maljunaj soldatoj, rigardante ilin de la kapo ĝis la piedoj. Tio estis la plej grava. Li rigardis Zebedeus tiamaniere, kaj Zebedeus neniam povis pardoni tion al li.

Jen pri la revuo. Sed ankoraŭ pli grava afero estis la distribuo de la krucoj kaj lilioj. Kiam mi diras al vi, ke ĉiuj urbestroj, vilaĝestroj, adjunktoj, konsilantoj de la supraj barakoj, de la barakoj de Bois-de-Chênes, de Holdeloch kaj Hirschland ricevis la lilion, ĉar ili troviĝis ĉekape de sia vilaĝo kun la blanka flago, kaj ke Pinacle, kiu alvenis la unua kun la muziko de la bohemo Waldteufel, kiu ludis: *Vivu Henriko IV*, kaj kun kvin aŭ ses blankaj flagoj, pli grandaj ol la aliaj, ricevis la honoran krucon, kiam mi diras tion al vi, vi komprenos, kion pensas la raciema homoj: estis vera skandalo.

Posttagmeze, proksimume de la kvara, la princo foriris al Strasburgo, akompanata de ĉiuj rojalistoj de la regiono surĉevale, unuj sur bonaj ĉevaloj, aliaj, kiel Pinacle, sur maljunaj ĉevalaĉoj. Oni estis preparinta la tagmanĝon sur la deklivo de Saverne.

Unu afero kiun ankoraŭ memoras ĉiuj loĝantoj de Falsbourg estas, ke la princo jam sidis en sia kaleŝo kaj jam estis foriranta, kiam elmigrinta oficiro, nudkapa sed en uniformo, komencis kuri post li, kriante per lamenta voĉo, kiun oni aŭdis sur la tuta placo:

«Panon, mia princo, mi petas doni panon por miaj infanoj !»

Tio igis ruĝiĝi la homojn, kiuj rapidis for pro honto.

Ni reiris hejmen silentante. Patro Gulden ŝajnis revii, kiam alvenis onklino Gredel.

«Nu, patrino Gredel,» li diris al ŝi, «vi devas esti kontenta.»

«Kial do?»

«Pinacle estas dekoraciita.»

Ŝi fariĝis tute verda kaj sidiĝis, dirante post minuto:

«Tio estas la plej malnobla maliĉaĵo kiun oni iam vidis. Sed se la princo estus sciinta, kion valoras Pinacle, anstataŭ doni al li la krucon, li pli volonte estus penduminta lin.»

«Jen ĝuste la malbono,» respondis sinjoro Gulden, «tiu speco da homoj faras multajn tiajn

aferojn sen scii, kion ili faras, kaj kiam ili ekscios tion, eble estos tro malfrue.»

VIII

Tiel monsinjoro la duko de Berrio vizitis la orientajn departementojn. La famo de eĉ liaj plej signifikaj paroloj disvastiĝis en la tuta regiono. Unuj laŭdis lian senfinan graciecon, aliaj silentis.

Ekde tiu momento pli ol unufoje venis al mi la ideo, ke ĉiuj tiuj elmigrantaj, ĉiuj tiuj duonsoldaj oficiroj, ĉiuj tiuj predikistoj kun siaj procesioj kaj pentofaroj fine malaranĝos ĉion. Kaj kelkan tempon poste, komence de la vintro, ni eksciis, ke ne nur ĉe ni, sed ĝis profunde en Alsaco, la aferoj tiel malboniĝis.

Iumatene kiam patro Gulden kaj mi laboris inter la dek-unua kaj la dek-dua, ĉiu revante laŭ sia maniero, kaj Trinel kovris la tablon, mi eliris por lavi al mi la manojn ĉe la pumpilo, kion mi faris ĉiutage antaŭ ol tagmanĝi. Piede de la ŝtuparo maljuna virino viŝis al si la piedojn sur la piedmato. Ŝi skuis siajn jupojn kovritajn per koto, tenante bastonon kun granda rozario, kiu pendis ĉirkaŭ ŝia kolo. Dum mi rigardis ŝin de la ŝtupara supro, ŝi komencis supreniri, kaj mi tuj rekonis, per ŝiaj malgrandaj plisaj okuloj kaj ŝia malgranda buŝo ĉirkaŭita de sennombraj sulketoj, Marianne, la pilgrimantino de sankta Vito. Tiu malriĉa malju-nulino ofte alportis al ni por ripari horloĝojn de piam personoj, kiuj fidis ŝin. Patro Gulden ĉiam ĝojis vidi ŝin.

«He !» li ekkriis. «Estas Marianne ! Vi certe havas multajn novaĵojn. Kiel fartas la sinjoro pastro de Hirschland? Kaj kiel fartas la sinjoro vikario? Ĉu li ankoraŭ ĉiam havas bonan mienon? Kiel fartas sinjoro Jakob de Dann? Kaj la maljuna sakristiano Nikolaus? Ĉu li ankoraŭ ĉiam sonorigas la sonorilojn en Saint-Jean? Li komencas maljuniĝi!»

«Ha, sinjoro Gulden, dankon pro sinjoro Jakob. Ĉu vi scias, ke li perdis fraŭlinon Christine pasintsemajne?»

«Kiel do... kiel do... ĉu fraŭlinon Christine?»

«Dio mia, jes.»

«Kia malfeliĉo!... Nu, ni ĉiuj devas pripensi, ke ni estas mortemaj.»

«Jes, sinjoro Gulden, sed se oni havas la gracon ricevi la sanktajn konsolojn de la Eklezio...»

«Sendube... tio estas la ĉefa afero!»

Jen kiel ili babilis, kaj patro Gulden ridis interne. Li sciis ĉion, kio okazis en la sakristioj ĝis ses mejloj ĉirkaŭ la urbo. De tempo al tempo li ĵetis al mi malican rigardon. Mi vidis tion centfoje ekde la komenco de mia metilernado.

Sed oni komprenas, ke tiun tagon sinjoro Gulden devis esti ankoraŭ pli scivolema ekscii, kio okazis en la lando.

«He, Marianne, kiom da tempo ni jam ne vidis vin?»

«Tri monatojn, sinjoro Gulden, tri longajn monatojn. Mi pilgrimis al Saint-Vith, Sainte-Odile, Marienthal, Hazlach. Mi havis votojn por ĉiuj sanktuloj en Alsaco, Loreno kaj Vogezoj. Jen fine mi estas preskaŭ malembarasita: restos al mi nur Saint-Quirin.»

«Ha! Tiom pli bone: viaj aferoj prosperas. Tio faras al mi plezuron. Sidiĝu do, Marianne, kaj ripozu iomete.»

Mi vidis en siaj okuloj, kiel kontenta li estis igi la maljunulinon reciti sian rozarion hodiaŭ. Sed ŝajnis, ke Marianne havis aferojn aliloke.

«Aĥ, sinjoro Gulden,» ŝi diris, «hodiaŭ mi ne povas, ĉar aliaj estas antaŭ vi: patrino Evig, Kasper Rosenkrantz kaj Jakob Heilig. Mi devas ankoraŭ iri al Siant-Quirin ĉi-vespere. Mi nur envenis por diri, ke la kamenhorloĝo de Dosenheim estas difekta kaj ke oni atendas vin por ripari ĝin.»

«Ba! Ba! Restu do momenton.»

«Ne, mi ne povas, mi bedaŭras, sinjoro Gulden, sed mi devas fini mian rondon.»

Ŝi jam estis repreninta sian paketon, kaj sinjoro Gulden ŝajnis malkontenta, kiam Trinel, metante grandan pladon kun brasiko sur la tablon, diris:

«Kiel do! Vi jam volas foriri, Marianne? Restu do... Jen jam via telero.»

Tiam, turnante la kapon, Marianne vidis la grandan fumantan supujon kaj la brasikon, kiu disvastigis bonan odoron.

«Mi ne havas multan tempon,» ŝi diris.

«Ba! Vi havas bonajn kruojn,» respondis Trinel, okulumante al sinjoro Gulden.

«Ha, koncerne tion, dankon al Dio, la kruoj estas ankoraŭ bonaj.»

«Nu do, sidiĝu kaj refortigu vin iomete. Ĉiam paŝadi estas dura metio.»

«Jes, sinjorino Seitz, certe. Oni prave meritas la tridek soldojn, kiujn la klientoj donas al oni.»

Mi antaŭenigis la seĝojn.

«Sidiĝu, Marianne, kaj donu al mi vian bastonon.»

«Necesas do, ke mi obeu al vi,» ŝi diris, «sed mi ne haltos longe: mi volas nur preni buŝplenon kaj tiam mi foriros.»

«Jes, jes, memkompreneble, Marianne, ni ne tro malfruigos vin,» diris sinjoro Gulden.

Ĉiu estis okupinta sian sidlokon. Sinjoro Gulden jam estas servanta ĉiun. Trinel rigardis min ridetante, kaj mi diris al mi:

«La virinoj estas tamen pli subtilaj ol ni!»

Mi estis tre ĝoja. Kion viro povas deziri pli ol havi spritan edzinon? Ŝi estas vera trezoro, kaj

mi jam ofte aŭdis, ke la viroj estas feliĉaj, lasante sin konduki de tiaj edzinoj.

Oni komprenas, ke sidiĝinte ĉe tablon apud bona stovo anstataŭ troviĝi ekstere, la piedojn en la koto, kaj senti la novembran venton blovi en siaj jupoj, Marianne jam ne intencis survojiĝi. Ŝi estis bonkora kreitaĵo, kiu, sesdek-kvinjara, ankoraŭ subtenis la du etajn infanojn de sia filo, mortinta antaŭ kelkaj jaroj. Kaj ĉiam trakuri la regionon je tiu aĝo, ricevante venton, pluvon kaj neĝon sur la dorso, dormante en grentenejoj kaj staloj sur pajlo kaj manĝante nur terpomojn tri kvaronojn de la tempo, kaj neniam tiom, kiom oni volus, ne estas de naturo por igi vin malestimi bonan teleron da varma supo, bonan pecon da fumigita lardo kun bongusta brasiko kaj du aŭ tri glasoj da vino, kiuj varmigas al vi la koron! Ne, necesas vidi la aferojn tiaj, kiaj ili estas. La vivo de tiuj malriĉuloj estas malgaja. Estus pli bone, ke ĉiu pilgrimus por si mem.

Fine Marianne komprenis la diferencon inter sidi ĉe tablo kaj vagi sur la vojoj. Ŝi manĝis kun bona apetito kaj plezure rakontis al ni, kion ŝi eksciis dum sia lasta rondvojaĝo.

«Jes, nun ĉio iras glate,» ŝi diris. «Ĉiuj tiuj procesioj kaj pentofaroj, kiujn vi vidis, estas ankoraŭ nenio. Necesas, ke tio pligrandiĝas de tago al tago. Kaj vi vidas, ke venos al ni misiistoj kiel antaŭe al la sovaĝuloj por konverti nin, kaj ke ili venos de sinjoro de Forbin-Janson kaj sinjoro de Rauzan, ĉar la korupto de nia jarcento estas tro granda. Kaj ĉie oni rekonstruos la monaĥejojn, kaj oni relokos la barierojn sur la vojojn kiel antaŭ la dudek-kvinjara ribelo! Kaj kiam la pilgrimantoj alve-nos ĉe la pordo de monaĥejo, ili nur sonorigu, kaj oni tuj malfermos al ili. La deĵora fratulo alportos al ili po pelvo da grasa supo kun pano kaj viando en la ordinaraj tagoj, kaj magran supon kun fiŝo la vendredojn, sabatojn kaj dum la tuta fasto. Tiumaniere la pieco pligrandiĝos. Ĉiu volos fariĝi pilgrimanto. Sed la damoj-monaĥinoj de Bischofsheim diris al mi, ke nur la malnovaj pilgrimantoj de patro al filo, kiel ni, solaj rajtos pilgrimi, ĉar ĉiu devas resti en sia metio: la kampuloj devas resti ligitaj al sia grundo, kaj la senjoroj devas rehavi siajn kastelojn por regi nin. Mi mem aŭdis tiujn vortojn per miaj propraj oreloj ĉe la damoj-monaĥinoj, kiuj rehavos siajn dotojn, ĉar ili revenis de sia ekzilejo, kaj necesas redoni al ili ŝiajn dotojn por rekonstrui la kapelon. Tio estas certa.

«Ha, Sinjoro, se nur tio jam estus farita kaj mi povus profiti de tio dum mia maljuneco! Jen jam tiel longe, ke mi fastas, kaj ankaŭ miaj nepinoj. Mi kunprenus ilin kaj instruus al ili la preĝojn, kaj mi havus la konsolon, ĉe mia morto, lasi al ili bonan metion.»

Aŭskultante ŝin rakonti ĉiujn tiujn aferojn kontraŭajn al la prudento, ni estis ankoraŭ tute

emociitaj, ĉar ŝi ploris, tenerigite de la vido de siaj nepinoj, almozetantaj ĉe la pordoj de la monaĥejoj, kaj de la deĵora fratulo, alportanta al ili supon.

«Kaj vi verŝajne ankaŭ scias ke sinjoro de Rauzan kaj la reverenda patro Tarin volas, ke oni rekonstruu la kastelojn, ke oni redonu al la nobeloj la arbarojn, herbejojn kaj kampojn, kaj ke oni provizore replenigu per akvo la lagetojn, ĉar ili apartenas al la reverendaj patroj, kiuj ne havas tempon plugi, semi kaj rikolti : ĉio devas okazi tiamaniere.»

«Sed diru do, Marianne,» demandis patro Gulden, «ĉu tio kion vi rakontas, estas certa. Mi preskaŭ ne povas kredi, ke tiel granda feliĉo estos rezervita al ni.»

«Tio estas tute certa, sinjoro Gulden,» ŝi diris. «Monsinjoro la grafo de Artezio volas realigi sian savon, kaj por ke li povu realigi sian savon, ĉio devos esti reordigita. En Marienthal la sinjoro vikario Anton diris tiujn aferojn ankoraŭ pasintdimanĉe. Estas aferoj kiuj venas de supre. Oni devas nur iomete pacienci, ĉar necesas, ke la koroj de la homoj kutimiĝu al tio per la predikoj kaj pentofaroj. Tiuj kiuj ne volas kutimiĝi al tio, kiel la luteranoj kaj judoj, estos devigataj. Kaj ankaŭ la jakobenoj...»

Parolante pri la jakobenoj, Marianne subite rigardis sinjoron Gulden kaj tute ruĝiĝis ĝis la oreloj. Sed ŝi denove regis sin, ĉar li ridetis.

«Inter la jakobenoj,» ŝi diris tiam, «troviĝas tamen kelkaj kiuj estas tre bonaj; sed necesas, ke ĉie la malriĉuloj vivu... La jakobenoj prenis la posedaĵojn de la malriĉuloj, kaj tio ne estas bela.»

«Sed de kie do ili prenis la posedaĵojn de la malriĉuloj, Marianne?»

«Aŭskultu, sinjoro Gulden, la monaĥoj kaj kapucenoj havis la posedaĵojn de la malriĉuloj, kaj la jakobenoj dividis ilin inter si.»

«Ha, mi komprenas, mi komprenas,» diris patro Gulden, «la monaĥoj kaj kapucenoj havis vian posedaĵon, Marianne. Mi neniam estus diveninta tion.»

Sinjoro Gulden ankoraŭ ĉiam ridetis, kaj Marianne diris:

«Mi sciis, ke en la daŭro ni akordus.»

«Jes, jes, ni akordas,» li diris bonkore.

Mi aŭskultis sen diri ion, ĉar kompreneble mi estis scivolema ekscii, kio povus okazi al ni. Estis facile vidi, ke Marianne raportis al ni, kion ŝi aŭdis dum sia antaŭa vojaĝo.

Ŝi ankaŭ diris, ke la mirakloj revenos, ke sankta Kvirino, sankta Odila kaj la aliaj sanktuloj ne volis fari miraklojn sub la uzurpinto, sed ke nun jam la mirakloj rekomenciĝis okazi, ke la malgranda nigra sankta Johano en Kortzeroth, vidante reveni la malnovan prioron de sia ekzilejo, jam komencis verŝi larmojn.

«Jes, jes, mi komprenas, » diris sinjoro Gulden, «tio ne mirigas min. Post la procesioj kaj pentofaroj necesas, ke la sanktuloj faru miraklojn. Estas tute nature, Marianne, estas tute nature.»

«Sendube, sinjoro Gulden, kaj kiam oni vidos tiujn miraklojn, oni konvertiĝos.»

«Kompreneble, kompreneble.»

La tagmanĝo finiĝis, kaj Marianne, vidante nenion plu veni sur la tablon, memoris, ke ŝi malfruas, kaj ekkriis:

«Sinjoro Dio, jen sonas la unua. La aliaj devas jam esti apud Ercheviller. Nun estas tempo, ke mi forlasu vin.»

Ŝi leviĝis kaj prenis sian bastonon kun afereca mieno.

«Tiam, bonan vojaĝon, Marianne,» diris al ŝi sinjoro Gulden, «kaj ne plu atendigu nin tiel longe.»

«Ha, sinjoro Gulden,» ŝi diris ĉe la pordo, «se mi ne povas sidi ĉe via tablo ĉiutage, tio ne estas kulpo mia.»

Ŝi ridis, kaj prenante sian pakon, ŝi ankoraŭ diris:

«Nu, ĝis revido, kaj pro ĉio bona kion vi faras al mi, mi preĝos al sankta Kvirino, por ke li sendu al vi bonan, dikan knabon, rozkoloran kaj freŝan kiel pomon. Jen ĉio, sinjorino Seitz, kion povra maljunulino kiel mi povas fari.»

Aŭdante tiujn vortojn, mi diris al mi mem:

«Tiu povra Marianne tamen estas bona virino. Ĝuste tion kion ŝi ĵus diris, mi deziras plej el ĉio. Elaŭdu ŝin Dio !»

Tiu bona deziro moligis min. Dume Marianne malsupreniris la ŝtuparon, kaj kiam oni aŭdis ŝin refermi la pordon malsupre, Trinel ekridis kaj diris:

«Tiun ĉi fojon ŝi tute malplenigis sian sakon.»

«Jes, miaj infanoj,» respondis sinjoro Gulden, kiu ŝajnis tre pensema, «jen kion oni povus nomi la homan nescion. Oni volus kredi, ke tiu malriĉa kreitaĵo inventis ĉion tion. Sed malfeliĉe ŝi kolektas ĉion dekstre kaj mal-dekstre. Tio estas laŭlitere kion pensas la elmigrintoj, tio estas kion ripetadas ĉiutage iliaj ĵurnaloj kaj kion aperte predikas la predikistoj en ĉiuj preĝejoj. Ludoviko XVIII ĝenas ilin : li havas tro da prudento laŭ ili. Ilia vera reĝo estas monsinjoro la grafo de Artezio, kiu volas savi sian animon: necesas, ke ĉio estu restaŭrita kiel antaŭ la dudekkvinjara ribelo; necesas, ke la naciaj posedaĵoj estu redonitaj al siaj eksmastroj; necesas, ke la nobelaro rehavu siajn rajtojn kaj privilegiojn kiel en 1788, kaj ke ĝi okupu ĉiujn rangojn en la armeo; necesas, ke la katolika, apostola kaj roma religio estu la sola religio de la ŝtato; necesas, ke la dimanĉoj kaj festotagoj estu observataj kiel antaŭe; necesas, ke la herezuloj estu forpelitaj el ĉiuj lokoj, kaj ke nur la pastroj instruu la infanojn de la popolo;

necesas, ke tiu granda kaj terura nacio, kiu dum dudek kvin jaroj elportis la ideojn liberecon, egalecon kaj fratecon en la tutan universon per sia prudento kaj venkoj kaj kiu neniam estus venkita, se la imperiestro ne estus farita aliancon kun la reĝoj en Tilsitt; necesas, ke tiu nacio, kiu en kelkaj jaroj produktis tiom da grandaj kapitanoj, grandaj oratoroj, grandaj sciencistoj kaj ĉia-specaj genioj, cedu ĉion, ke ĝi denove gratu la teron, dum la nobeloj, kiuj ne nombras unu kontraŭ mil, de patro al filo profitas de ĝia laboro kaj tre bone vivas je ĝiaj kostoj! Ho, estas certe, ke ĝi redonos ĉiujn kampojn, herbejojn kaj lagojn, kiel diris Marianne, kaj ke ĝi rekonstruu la kastelojn kaj monaĥejojn, tio estas neevitebla por esti agrabla al monsinjoro la grafo de Artezio kaj helpi lin savi sian animon, tio estas la minimumo, kion oni povas fari por tial granda princo !»

Tiam patro Gulden, interplektante la manojn kaj rigardante la plafonon, diris:

«Sinjoro Dio, Sinjoro Dio, vi kiu farigas tiom da mirakloj per la malgranda nigra sankta Johano en Kortzeroth, se vi enirigus nur unu sola radion da prudento en la kapon de monsinjoro kaj liaj amikoj, mi kredas, ke tio estus ankoraŭ pli bela ol la larmoj de la eta sanktulo! Kaj la alia, tie for sur sia insuleto kun siaj klaraj okuloj, estas kvazaŭ nizo, kiu ŝajnigas dormi, rigardante anasojn padeli sur marĉlago... Sinjoro Dio, pensu, ke per kvin aŭ ses flugilbatoj li estos sur ili... la anasoj forfuĝas; sed ni ankoraŭfoje havos la tutan Eŭropon sur nia dorso!»

Li diris tiujn aferojn kun grava mieno, kaj mi rigardis Trinell por vidi, ĉu oni devos ridi aŭ plori. Subite li sidiĝis, dirante:

«Nu, Josef, tio ĉi ne estas ĝojiga, sed kion ni povas fari pri tio? Estas tempo rekomenci labori. Rigardu, kial la horloĝo de sinjoro pastro Jakob ne funkcias.»

Tiam Trinell forprenis la tablotukon, kaj ĉiuj rekomencis labori.

IX

Venis vintro. Estis vintro kun multa pluvo, miksitaj per neĝo kaj vento. La tegmentoj ankoraŭ ne havis defluilojn tiutempe, tiel ke la pluvo, falanta de la tegoloj, estis forblovata de la vento ĝis meze de la stratoj. Oni aŭdis tiun plaŭdadon la tutan tagon, dum la stovo muĝis kaj Trinell turniĝis ĉirkaŭ ni, gardante la fajron kaj levante la kovrilojn de la kaseroloj, aŭ sidis malantaŭ sia ŝpinilo, mallaŭte kantante. Patro Gulden kaj mi estis tiel kutimiĝintaj al tiu ekzisto, ke ni faris nian laboron iel sen pensi pri ĝi. Ni havis plu nenion pri kio maltrankviliĝi. La tablo

estis kovrita kaj la tagmanĝo servita, ĝuste kiam sonis la tagmezo. Estis agrabla familia vivo.

La vesperon sinjoro Gulden eliris post la manĝo legi la gazeton en la kafejo de Hoffmann, surmetinte sian malnovan mantelon sur la ŝultrojn kaj tirante sian grandan ĉapon el vulpofelo ĝis sur la nuko. Malgraŭ tio, ofte, vespere post la deka, kiam ni jam estis enlitiĝintaj, ni aŭdis lin reveni tusante kaj kun malsekaj piedoj. Trinell diris al mi:

«Jen li nun tudas. Li pensas, ke li estas ankoraŭ juna kiel je sia dudeka jaro.»

Kaj la sekvan matenon ŝi ne hezitis fari al li riproĉojn.

«Sinjoro Gulden,» ŝi diris, «vi ne estas prudenta: vi forte malvarmumis, sed tamen vi eliras ĉiuvespere.»

«He ! Kion vi volas, mia infano. Mi kutimas legi la gazetojn. Estas pli forta ol mi mem. Mi volas scii, kion diras Benjamin Constant kaj la aliaj. Estas kvazaŭ dua vivo, kaj tre ofte mi pensas: 'Ili devus ankoraŭ paroli pri tiu aŭ tiu alia afero... Se Melñior Gulden estus tie, li reklamaciis ankaŭ pri tiu aŭ tiu alia ĉapitro, kaj tio certe produktus grandan efekton.»

Tiam li ekridis, skuante la kapon, kaj diris:

«Ĉiu kredas, ke li havas pli da sprito kaj prudento ol la aliaj, sed Benjamin Constant ĉiam plaĉas al mi.»

Ni ne sciis, kion respondi, ĉar lia amo al la gazetoj estis tro granda. Lutage Trinell diris al li:

«Sonjoro Gulden, ĉar vi nun deziras scii ĉiujn novaĵojn, tio ne estas kaŭzo malsanigi vin. Vi devas nur agi kiel la maljuna ĉarpentisto Carabin. La antaŭan semajnon li faris interkonsenton kun patro Hoffmann, kiu sendas al li la ĵurnalon post la sepa – kiam la aliaj jam legis ĝin – por tri frankoj monate. Tiamaniere Carabin scias ĉion kio okazas sen fari klopodojn, kaj lia edzino, la maljuna Bével ankaŭ. Ili babilas inter si pri tiuj aferoj ĉe la farejo kaj disputas kune. Jen kion vi devus fari.»

«He ! Vi scias, Trinell, tio estas bona ideo!» diris sinjoro Gulden. «Jes, sed tri frankoj!...»

«La tri frankoj estas nenio, » ŝi tiam diris. «La ĉefa afero estas ne malsaniĝi. Vi tudas ĉiuvespere kiel mizerulo, kaj tio ne povas daŭri.»

Tiuj vortoj tute ne kolerigis lin, sed kontraŭe ĝojigis lin, ĉar li vidis, ke nia afekcio por li igis nin tiel paroli kaj li devas kredi nin.

«Nu !» li diris. «Ni provos aranĝi la aferojn, kiel vi deziras. Des pli ke amaso da duonsoldaj oficiroj plenigas la gastejon de mateno ĝis vespero, ke ili transdonas la gazetojn unuj al la aliaj, kaj ke ofte necesas atendi du horojn por povi ekhavi unu. Jes, Trinell pravas.»

Kaj la saman tagon li iris paroli al patro Hoffman, tiel ke Michel, unu el la kelneroj de la gastejo, alportis al ni la gazeton ĉiuvespere post

la sepa, kiam ni leviĝis de la tablo. Ĉiufoje kiam ni aŭdis lin supreniri, estis vera ĝojo por ni, kaj ĉiuj diris :

«Jen la gazeto !»

Ni leviĝis. Trinel rapidis forpreni la tablotukon kaj ordigi ĉion. Mi metis bonan ŝtipon en la stovon. Sinjoro Gouden eligis siajn okulvitrojn el la ujo, kaj dum Trinel ŝpinis kaj mi fumis mian pipon kiel maljuna soldato, rigardante kiel la flamoj dancis en la stovo, li legis por ni la novaĵojn de Parizo. Kian feliĉecon kaj kontentecon ni spertis, aŭdante Benjamin Constant kaj du aŭ tri aliajn subteno ĉion kion ni mem pensis, neniuj povas imagi. Kelkfoje sinjoro Gulden devis interrompi la legadon por purigi la okulvitrojn, kaj Trinel tuj ekkriis :

«Kiel bone parolas tiuj homoj! Jen kio nomiĝas prudentaj homoj... Jes, ĉio kion ili subtenas, estas ĝusta, estas la pura vero.»

Ĉiu el ni aprobis. Nur patro Gulden pensis, ke il devus paroli ankoraŭ pri tio aŭ tio alia, sed ke la resto estas bona. Li reprenis sian legadon, kiu okupis nin ĝis la deka. Tiam oni enlitiĝis, pensante pri la aferoj kiujn oni aŭdis.

Ekstere la vento blovdadis, kiel ĝi ofte blovas en Falsburgo. La ventomontriloj turniĝadis grincante sur sia stangeto, kaj la pluvo vipadis la murojn. Kaj ni, varmaj, aŭskultis tion, benante la Sinjoron, ĝis la dormo igis nin forgesi ĉion. Ha ! Kiel bone oni dormas, kiam oni estas feliĉa, kiam oni havas pacon en la animo, forton, sanon, amon kaj respekton por ĉio kion oni amas ! Kion pli oni povus deziri en la mondo? La tagoj, la semajnoj, la monatoj tiel pasis. Ni fariĝis se tiel diri politikistoj, kaj kiam la ministroj estis parolontaj, ni pensis anticipe :

«Ha, la friponoj, ili ĉiuj volas trompi nin... Ha, malbona speco... Oni devus forpeli vin !»

Ĉefe Trinel ne povis toleri tiujn homojn, kaj kiam patrino Gredel venis paroli kun ni kiel antaŭe pri nia bona reĝo Ludoviko XVIII, ni lasis ŝin paroli pro respekto, kompatante ŝin, ĉar ŝi estis tiel blinda koncerne la aferojn de la lando.

Necesas ankaŭ agnoski, ke tiuj elmigrintoj, ministroj kaj princoj kondukis kontraŭ ni kiel veraj impudentuloj. Se Monsinjoro la Grafo de Artezio kaj liaj filoj estis metintaj sin ĉekapen de la vendeanoj kaj bretonoj⁶⁰, se ili estus marŝintaj al Parizo kaj forportintaj la venkon, ili pravus diri al ni : «Ni estas viaj mastroj kaj ni donos al vi la leĝojn.» Sed forpelite kaj poste rekondukite ĉe nin far la prusoj kaj rusoj, ili nur humiligis nin. Jen kio estis malestiminda ! Ju pli mi maljuniĝas, des pli mi estas konvinkita, ke tio estas honto !

Zebedeus ankaŭ venis de tempo al tempo viziti nin, kaj li sciis ĉion kion ni legis en la gazetoj. Li la unua sciigis al ni, ke generalo Vandamme estis forpelita el la ĉeesto de la reĝo. Tiun maljunan soldaton, kiu revenis el la rusaj malliberejoj kaj kiun la tuta armeo respektis malgraŭ lia malfeliĉo apud Kulm, ili kondukis eksteren, dirante al li, ke tie ne estis lia loko. Vandamme estis kolonelo de regimento en Falsburgo kaj la tuta urbo konis lin. Oni ne povas imagi la indignon de la honestaj homoj, aŭdante tiun novaĵon.

Zebedeus ankaŭ rakontis nin, ke oni faris procesojn al la duonsoldaj generaloj, kaj ke oni ŝtelis iliajn leterojn en la poŝtoŝtupo por povi konsideri ilin kiel perfidulojn. Iom poste li diris al ni, ke oni forsendos la filinojn de la eks-oficiroj, kiuj troviĝis en la lernejo Saint-Denis, donante al iliaj patroj pension de ducent fran-koj, kaj poste ke la elmigrintoj solaj volas havi la rajton meti siajn filojn en la lernejojn Saint-Cyr kaj la Flèche por eliri kiel oficiroj, dum la popolo restos soldato je kvin centimoj tage en eterne !

La gazetoj rakontis la samajn aferojn, sed Zebedeus sciis multajn aliajn detalojn. La lastaj soldatoj sciis ĉion. Mi neniam povus prezenti al vi la figuron de Zebedeus, sidanta malantaŭ la stovo, tenante la nigran finaĵon de sia pipo inter la dentoj, kiam li rakontis al ni tiujn mizerojn. Lia granda nazo paliĝis, lia vizaĝo tremetis ĉe la anguloj de liaj helgrizaj okuloj kaj de tempo al tempo li ŝajnis ridi, murmurante :

«Bone !... Bone!...»

«Kaj kion la aliaj soldatoj pensas pri tio?» demandis patro Gulden.

«He ! Ili pensas, ke estas bone. Kiam vi donis vian sangon al Francio dum dudek jaroj, kiam vi partoprenis en dek, dek kvin aŭ dudek militiroj, kiam vi ricevis tri galonojn kaj amason da vundoj, kaj kiam vi poste ekscias, ke oni forpelas viajn eksajn ĉefojn, ke oni metas iliajn filinojn sur la straton, kaj ke la filoj de tiuj homoj fariĝos viaj oficiroj por ĉiam, tio ĝojigas vin, patro Gulden,» li diris dum liaj vangoj tremetadis ĝis la oreloj.

«Sendube, sendube, tio estas malfeliĉiga,» diris sinjoro Gulden. «Sed ankoraŭ ĉiam ekzistas disciplino: la marŝaloj obeas al la ministroj, la oficiroj al la marŝaloj, kaj la soldatoj al la oficiroj.»

«Vi pravas,» respondis Zebedeus. «Sed jen oni batas la fermon.»

Li premis al ni la manon kaj rapidis al la kazino.

⁶⁰ Loĝantoj de Vendeo kaj Bretonio, regionoj en la okcidenta parto de Francio, kiu batalis kontraŭ la Revolucio por defendi la katolikan religion kaj la reĝecon. Oni neniam povis definitive venki ilin. Nur

kiam Napoleono denove rekonis la katolikan religion, farante traktaton kun la papo, ili demetis la armilojn.

La tuta vintro pasis tiu maniere La indigno kreskis de tago al tago. La urbo estis plena je duonsoldaj oficiroj, kiuj jam ne kuraĝis resti en Parizo: leŭtenantoj, kapitanoj, komandantoj, koloneloj de ĉiuj kavaleriaj kaj infanteriaj regimentoj, viroj kiuj vivis per pankrusto kaj glaseto da vino kaj estis tiom pli malfeliĉaj ĉar ili devis porti uniformon. Oni bildigu al si tiajn virojn kun kavaj vangoj, mallonge tonditaj haroj, brilantaj okuloj kaj longaj lipharoj en malnova kapoto, kies perditajn butonojn oni devis anstataŭigi. Oni bildigu ilin al si pro-menantaj triope, sesope, dekope sur la placo, la grandan bastonon kun spado pendantan de butontruo, la grandan dupintan ĉapelon ĉiam bone brositon traverse sur la ŝultroj, sed tiel taŭzigitaj, tiel mizeraj, ke la ideo venas al oni, ke ili ne manĝas laŭ la kvarono de sia apetito. Oni tamen devis diri al si : «Jen la venkintoj de la bataloj apud Jemappes, Fleurus, Zürich, Hohenlinden, Marengo, Austerlitz, Friedland, Wagram... Tial ili fieras esti francoj, sed nek la grafo de Artezio, nek la duko de Berrio aŭ de Angulemo povas glori esti la kaŭzo de tiuj venkoj, sed ili estis. Kaj nun oni lasas ilin pereii, oni rifuzas al ili eĉ la ĉiutagan panon kaj anstataŭigas ilin per elmigrintoj. Estas vere abomeninde.» Necesas havi nek prudenton, nek koron, nek senton de justeco por rekoni, ke tio estas kontraŭnatura.

Mi ne eltenis la vidon de tiuj malfeliĉuloj : tio turnis al mi la koron. Se oni servis, eĉ nur ses monatojn, oni ĉiam respektos siajn ĉefojn, tiujn kiujn oni vidis iri la unuajn renkonte al la mal-amika pafado. Mi hontis pro mia patrio, tial ke ĝi toleris tiajn maldignaĵojn.

Unu aferon mi neniam forgesos : fine de la monato januaro 1815 du el tiuj duonsoldaj oficiroj venis proponi al ni aĉeti superban horloĝon. Unu el ili estis granda, maldika viro kun jam griza kapo, konata sub la nomo kolonelo Falconette, kiu aperis esti servinto en la infanterio. La alia, malgranda, korpulenta viro, kiun oni nomis komandanto Margarot kaj kiu konservis ankoraŭ la vangharojn de husa-ro. Povis esti la deka matene. Mi ankoraŭ vidas ilin eniri kun gravaj mienoj, la kolonelon kun alta kolumo, la alian kun la kapo retiriĝinta inter la ŝultroj. Ilia horloĝo estis el oro, kun duobla pelveto kaj sonorilaro. Ĝi indikis la sekundojn kaj devis esti streĉita nur ĉiu-semajne. Mi neniam vidis tiel belan objekton. Dum sinjoro Gulden ekzamenis la horloĝon, mi turnis min sur mia seĝo kaj rigardis tiujn virojn, kiuj ŝajnis havi grandan bezonon je mono. Ĉefe la husaro kun sia bruna osteca vizaĝo, siaj longaj rufaj lipharoj, malgrandaj brunaj okuloj, larĝaj ŝultroj kaj longaj brakoj, kiuj pendis ĝis la genuoj, inspiris al mi grandan res-pektan. Mi pensis : «Kiam tiu ĉi tenis sian husarsabron fine de sia

brako, ĝi sendube iris tre foren. Liaj malgrandaj okuloj sendube brilis sub liaj densaj brovoj. Defendo kaj kontraŭ-atako sendube okazis fulmorapide.» Mi imagis lin dum atako, duone kaŝita malantaŭ la kapo de sia ĉevalo, la sabropinton antaŭen, tiel ke mia admiro por li ankoraŭ kreskis.

Subite mi rememoris, ke komandanto Margarot kaj kolonelo Falconette mortigis en duelo rusajn kaj aŭstrajn oficirojn malantaŭ la *Verda Arbo*, kaj ke nia tuta urbo parolis nur pri ili antaŭ kvar aŭ kvin monatoj, kiam trapasis la aliancanoj. Ankaŭ la grandulo kun sia kolumo sen ĉemizo, grizaj tempioj kaj malvarma mieno, ŝajnis al mi tre repektinda.

Mi atendis kion patro Gulden estis dironta pri ilia horloĝo. Li ne levis la okulojn, rigardante ĝin kun profunda admiro, dum tiuj du viroj trankvile atendis, sed kiel homoj kiuj suferas pro tio, ke ili jam ne povas kaŝi sian ĝenon.

Finfine sinjoro Gulden turnis sin kaj diris al ili : «Tio ĉi, sinjoroj, estas objekto de grandega beleco. Estas io kion oni povus nomi horloĝo de princo.»

«Sendube,» respondis la husaro, «ĉar mi efektive ricevis ĝin de princo post la batalo apud Rabbe.»

Li ĵetis rigardon al la alia, kiu diris nenion.

Sinjoro Gulden, tiam rigardante ilin, rimarkis, ke ili estas en granda bezono de mono. Li deprenis sian ĉapon el nigra silko, malrapide leviĝis kaj diris :

«Sinjoroj, ne ofendiĝu pro tio kion mi diros al vi. Kiel vi mi estas veterano, ĉar mi servis Francion sub la Respubliko, kaj mi kredas, ke la fakto esti devigata vendi tiuspecan objekton vere ŝiras al vi la koron, ĉar tiu ĉi objekto rememorigas vin pri bela ago en via vivo kaj pri ĉefo kiu estas kara al ni.»

Mi neniam aŭdis patron Gulden paroli kun tia tenereco, lian kalvan kapon malĝoje klinitan kaj la okulojn direktitajn teren kvazaŭ pŝr ne vidi la doloron de tiuj al kiuj li parolis. La ko-mandanto fariĝis tute ruĝa, liaj okuloj ŝajnis malklaraj, kaj liaj grandaj manoj tremetis. La kolonelo estis pala kiel mortinto. Mi estus volinta eliri.

Tiam sinjoro Gulden diris :

«Tiu horloĝo valoras pli ol mil frankojn. Mi ne havas tiun sumon sub la mano, kaj cetere vi sendube multe bedaŭrus disiĝi de tia valora memoraĵo. Jen do kion mi ofertas al vi: mi metos la horloĝon, se vi konsentos, en mian montrofenestron. Ĝi ĉiam restos via propraĵo, kaj mi nun antaŭpagas al vi ducent frankojn, kiujn vi redonos al mi, reprenante ĝin.»

«Vi estas bona patrioto !» ekkriis la komandanto. Colin jam diris tion al ni... Ha, sinjoro ! Mi neniam forgesos la servon kiun vi faras al mi...

Princo Eŭgenio⁶¹ donis al mi tiun horlo-ĝon pro eksterordinara ago sur la bataalkampo. Mi amas ĝin kiel mian propran sangon, sed la mizero devigas min...»

«Komandanto...» diris la alia, tute pala.

Sed la husaro ne volis aŭskulti lin kaj ekkriis, forigante lin per brako:

«Ne, kolonelo, lasu min... Ni estas inter ni... Maljuna soldato povas kompreni nin. Sinjoro, oni malsatigas nin !... Oni traktas nin, kvazaŭ ni estus kozakoj !... Oni estas tro malkuraĝa por pafmortigi nin !...»

Li plenigis la domon per siaj krioj. Mi kuris al Trinel en la kuirejo por ne vidi tiun tristan spektaklon. Sinjoro Gulden trankviligis lin. Ni aŭdis lin diri :

«Jes, sinjoro, mi scias tion,» li diris, «mi metas min en vian pozicion...»

«Ek, Margarot, trankviliĝu!» diris la kolonelo.

Sed la komandanto rifuzis trankviliĝi. Liaj krioj daŭris preskaŭ kvaronhoron. Fine ni aŭdis sinjoron Gulden nombri la monerojn kaj la husaron diri al li :

«Dankon, sinjoro, dankon! Se iam la okazo prezentiĝos, komandanto Margarot rememoros vian bonan agon.»

Tiam la pordo malfermiĝis kaj ili malsupreniris la ŝtuparon, kio multe malpezigis nin, Trinel kaj min, ĉar ni estis ŝokitaj. Ni reeniris la ĉambron. Sinjoro Gulden, kiu elkondukis la oficirojn, preskaŭ tuj resupreniris nudkapa. Li estis emociita.

«Tuj malfeliĉuloj pravas,» li diris, resurmetante sian ĉapon. «La konduto de la registaro kontraŭ ili estas terura. Sed frue aŭ malfrue ĝi pagos por tiu sinteno.»

La reston de tiu tago ni malĝojis. Sinjoro Gulden tamen eksplikis al mi la belecojn de tiu horloĝo kaj diris al mi, ke oni devus ĉiam havi tiajn modelojn antaŭ la okuloj. Tiam ni pendigis ĝin en nia montrofenestro.

Ekde tiu momento la ideo ne plu forlasis min, ke tio finiĝos malbone kaj ke la elmigrintoj, eĉ se ili ĉesus fari tiujn aferojn, jam faris tro. Mi ĉiam aŭdis la voĉon de la komandanto kii en nia ĉambro, ke oni kondukas kontraŭ la armeo kvazaŭ kontraŭ kozakoj ! La memoro pri la procesioj, pentofaroj kaj predikoj pri la dudek-kvinjara ribelo, la restituo de la naciaj proprajoj, la riparo de la monaĥejoj kaj la resto...ĉio ĉi ŝajnis al mi terura miksaĵo, kiu estis sendube produktonta nenion bonan.

X

Tia estis la situacio, kiam komence de marto 1815 la famo disvastiĝis kiel vento, ke la imperiestro surbordiĝis apud Cannes. De kie venis tiu famo? Neniu iam povis diri tion : Falsburgo situas ja je ducent mejloj de Mediteraneo, kaj multaj ebenaĵoj kaj montaroj disigas nin de la suda Francio. Mi mem memoras eksterordinaran aferon. La matenon de la 5-a de marto, ellitiĝinte, mi malfermis la fenestron de nia malgranda dormoĉambro, kiu situis tuj sub la tegmento. Mi rigardis la malnovajn nigrajn kamenojn de la bakejo de Spitz fronte al nia domo. Restis ankoraŭ iom da neĝo sur la tegmentoj. La malvarmo estis morda, sed la suno brilis, kaj mi pensis: «Jen kio nomiĝas bona vetero por marŝi!» Mi memoris, kiel kontentaj ni estis en Germanio, ke, post kiam ni estingis la fajrojn frumatene, ni povis foriri ĉe tia vetero, la fusilon sur la ŝultro, kaj aŭdi la plandumojn de la bataliono resoni sur la malmoliĝinta tero. Kaj subite, mi ne scias kiel, venis en mian kapon penso pri la imperiestro. Mi vidis lin marŝi kun lia griza kapoto, la ronda dorso kaj la kapo kaŝita en la ĉapelo, dum la maljuna gvardio marŝis malantaŭ li. Trinel estis balaanta nian etan ĉambron. Estis kvazaŭ sonĝo ĉe tiu ĉi hela kaj seka vetero.

Dum mi estis tie, ni aŭdis iun supreniri la ŝtuparon, kaj Trinel haltis momenton, dirante :

«Estas sinjoro Gulden.»

Tuj mi rekonis la paŝojn de sinjoro Gulden, kio surprizis min, ĉar li venis kvazaŭe neniam ĉe nin. Li malfermis la pordon kaj diris al ni tre mallaŭte :

«Miaj infanoj, la imperiestro surbordiĝis en Cannes apud Toulon. Li marŝas al Parizo. »

Li diris nenion pli kaj sidiĝis por respiri. Oni povas imagi, kiel ni rigardis unu la alian. Nur post momento Trinel demandis :

«Ĉu tio estas en la gazeto, sinjoro Gulden?»

«Ne,» li diris, «tie oni scias ankoraŭ nenion, aŭ ili kaŝas tion por ni. Sed, nome de la ĉielo, diru nenian vorton pri tio, ĉar ni estus arestitaj ! Ĉi-matene Zebedeus, kiu staris garde ĉe la Franca Pordego, venis averti min ĉirkaŭ la kvina. Li frapis malsupre, vi certe aŭdis lin.»

«Ne,» sinjoro Gulden, «ni dormis.»

«Nu ! Mi malfermis la fenestron por ekscii, kio okazas, kaj mi malsupreniris por retiri la riglilon. Zebedeus rakontis al mi la aferon kiel ion tute certan. La regimento devas resti en la kazerno ĝis nova ordono. Ŝajnas, ke oni timas la soldatojn. Sed tiam, kiel haltigi Napoleonon? Oni povas ankaŭ ne sendi la kampulojn, kiujn oni volas senigi de iliaj posedaĵoj, nek la burĝojn, kiujn oni traktas kiel jakobenojn. Jen

⁶¹ Filo de imperiestro Jozefina kaj ŝia unua edzo generalo de Beauharnais, kaj vicfilo de Napoleono

bona okazo por la elmigrintoj montri sin. Sed antaŭ ĉio, la plej profunda silento... la plej profunda silento pri tio ĉi !...»

Li levis la manon dirante tion, kaj ni mal-supreniris al la ateliero. Trinel ekbruligis bonan fajron, kaj ĉiu komencis labori kiel kutime.

Tiun tagon ĉio restis trankvila, kaj ankaŭ la morgaŭon. Kelkaj najbaroj, patroj Réboc kaj patro Offran venis viziti nin, se tiel diri por igi purigi sian horloĝon.

«Ĉu estas io nova, najbaro?»

«Dio mia!» respondis sinjoro Gulden. «La aferoj iras tre trankvile. Ĉu vi scias ion pli?»

« Ne. »

Kaj tamen oni vidis en iliaj grandaj okuloj, ke ili scias la grandan novaĵon. Zebedeus restis en la kazerno. La duonpagataj oficiroj plenigis la kafejon de mateno ĝis vespero, sed ankoraŭ neniam vorto lekis : estis tro grave.

Nur la trian tagon tiuj duonpagataj oficiroj, kiuj bolis en sia haŭto, komencis perdi paciencon. Oni vidis ilin iradi kaj venadi, kaj per ilia vizaĝo estis facile rekoni ilian teruran maltrankvilecon. Se ili havus ĉevalojn aŭ nur armilojn, mi certas, ke ili provus fari ion. Sed la ĝendarmoj, la maljuna Chancel ĉekape, ankaŭ iradis kaj venadis. Ĉiun horon oni vidis ĝen-darmon foriri kiel kuriero al Sarrebourg.

La ekscitiĝo kreskis. Neniu emis labori. Baldaŭ oni eksciis tra vojaĝaj komizoj, kiuj alvenis de la urbo Balo, ke io moviĝis en Alta-Rejno kaj Juro, ke kavaleriaj kaj infanteriaj regimentoj sekvis unuj la aliajn apud Besançon; ke amasoj da trupoj iris renkonte al la uzurpinto, ktp. Unu el tiuj komizoj, kiu tro parolis, ricevis la ordonon tuj forlasi la urbon. La polica serĝento ekzamenis liajn dokumen-tojn, kaj feliĉe ili estis en ordo.

Ekde tiu tempo mi vidis aliajn revoluciojn, sed neniam tian ekscitecon, precipe la 8-an de marto inter la kvara kaj kaj la kvina vespere, kiam alvenis la ordono igi marŝi sentarde la 1-an kaj la 2-an batalionojn armitajn por milito al Lons-le-Saunier. Tiam oni komprenis la tutan danĝeron, kaj ĉiuj pensis: «Oni bezonas nek la dukon de Angulemo nek la dukon de Berrio por haltigi Napoleonon, sed la tutan Eŭropon.»

Finfine la duonpagataj oficiroj respiris. Iliaj mienoj estis heligitaj kvazaŭ per sunoj.

Je la kvina la unua tamburrulado bruadis sur la placo, kiam Zebedeus bruske eniris.

«Nu?» kriis al li patro Gulden.

«Nu,» li diris, «la unuaj du batalionoj foriras.»

Li estis pala.

«Oni sendas ilin por haltigi lin,» diris sinjoro Gulden.

«Jes, ili estas haltigontaj lin!» li diris, okulumante.

La tamburrulado daŭrigadis.

Li komencis rapide malsupreniri, kaj mi sekvis lin. Malsupre, kaj jam kun unu piedo sur la unua ŝtupo, li tiris min ĉe la brako kaj diris al mi en la orelon, demetante sian ĉakon:

«Rigardu en la fonon de mia ĉako, Josef, ĉu vi rekonas ĝin?»

Mi vidis la malnovan trikoloran kokardon⁶² en la kapvesto.

«Tiu ĉi estas la nia,» li diris. «Nu! Ĉiuj soldatoj havas ĝin.»

Mi apenaŭ havis la tempon vidi ĝin, kiam li premis al mi la manon kaj, rapidigante la paŝadon, turniĝis ĉe la angulo de la strato Fouquet. Mi resupreniris, dirante al mi mem: «Jen denove komenciĝas la ruiniĝo, jen Eŭropo kiu denove baros al li la vojo. Jen la kon-skripcio, Josef, la abolo de ĉiuj forpermesoj ktp., kiel oni legas en la gazetoj. Anstataŭ resti trankvila, oni devas denove moviĝi; anstataŭ aŭdi la sonorilojn, oni aŭdos la kanonojn; anstataŭ paroli pri la preĝejo, oni parolos pri la arsenalo; anstataŭ flari incenson, oni flaros pulvon. Dio en la ĉielo! Tio do neniam finiĝos! Ĉio povus iri tiel bone sen tiuj malbenitaj militoj! Kia mizero! Kia mizero! Kaj ĉiam estas ni kiuj devas pagi. Ĉiam por nia feliĉeco oni plenumas ĉiujn tiujn maljustaĵojn, dum oni primokas nin kaj traktas nin kiel verajn ŝtupojn!»

Multaj aliaj ĝustaj pensoj trairis mian kapon. Sed al kio tio servis min? Mi estis nek la duko de Angulemo nek la duko de Berrio. Oni devas esti princo, por ke la pensoj servu al io kaj por ke ĉiu vorto kiun oni diras, estu rigardata kiel miraklo.

Ekde tiu momento ĝis la vespero patro Gulden ne povis resti sur sia loko. Li havis la saman malpaciencon kiel mi en la tempo, kiam mi atendis la permeson edziĝi. Ĉiun momenton li rigardis tra la fenestro kaj diris:

«Hodiaŭ venos grandaj novaĵoj... oni donis la ordonojn... oni ne plu bezonas kaŝi ion al ni.»

Kaj de minuto al minuto li ekkriis:

«Psst!... Jen la poŝtveturilo.»

Ni aŭskultis : estis la ĉareto de Lanche kun siaj maljunaj ĉevalaĉoj, aŭ la ĉaraĉo de Baptiste, kiu pasis sur la ponto.

La nokto venis, kaj Trinel kovris la tablon, kiam por la dudeka fojo sinjoro Gulden diris:

«Aŭskultu!»

Tiun ĉi fojon aŭdiĝis malproksima bruado en la avanceo. Tiam sen atendi li kuris al la alko-von kaj surmetis sian kamizolon, kriante:

«Josef, venu!»

⁶² Ronda malgranda ŝtofa ruĝa-blanka-blua objekto kun rubandeto, kiu estis la simnolo de la Revolucio kaj kiun oni fiksas sur sia kapvesto.

Li malsupreniris kurante. Vidante lin tiel rapidi, kaj esperante ekhavi novaĵojn, mi sekvis lin. Ni apenaŭ alvenis sur la ŝtupoj de la strato, kiam la poŝtveturilo eliris la malhelan pordegon kun siaj ruĝaj lanternoj kaj pasis antaŭ ni kiel tondro. Ni kuradis, sed ni ne estis solaj : de ĉiuj flankoj oni aŭdis galopadi kaj kriadi la homojn:

“Jen ĝi estas! Jen ĝi estas!”

La poŝtofiĉejo troviĝis ĉe la strato de la Foino apud la Germana Pordego. La poŝtveturilo ruliĝadis rekte ĝis la angulo de la kolegio kaj tiam deturniĝis dekstren. Ju pli foren ni kuradis, des pli multaj homoj svarmadis sur la strato: Ili eliris el ĉiuj pordoj. La eksurbestro, sinjoro Parmentier, lia sekretario Eschbach, la impostkolektisto Cauchois kaj multaj aliaj eminentuloj ankaŭ kuradis, parolante inter si kaj dirante:

“Jen la granda momento!”

Kiam ni alvenis ĉe la kurbiĝo de la Armila Placo, ni vidis homojn, kiuj jam staris antaŭ la poŝtofiĉejo, kaj sennombrajn personojn, kiuj kurbiĝis laŭlonge de la fera balustrado, pridemandante la postiljonon, kiu ne respondis.

La poŝtestro, sinjoro Pernette, malfermis la fenestron, kiu estis prilumata de la interno, kaj la pako da leteroj kaj ĵurnaloj flugis desupre de la veturilo en la ĉambron. La fenestro refermiĝis, kaj la vipbatoj de la postiljono avertis la homamason, ke ĝi devas foriĝi.

“La ĵurnaloj! La ĵurnaloj!”

Oni aŭdis nur tion de ĉiuj flankoj. La poŝtveturilo rekomencis ruliĝi kaj malaperis tra la Germanan Pordegon.

“Ni iru al la kafejo de Hoffmann,” diris al mi sinjoro Gulden, “ni rapidu: la ĵurnaloj estas venontaj. Se ni ankoraŭ atentos, ne plu estos rimedo eniri.”

Kiam ni transiris la placon, ni jam aŭdis la homojn kuradi post ni. Komandanto Margarot diris per sia klara kaj laŭta voĉo:

“Venu... Mi retenos ilin!...”

Ĉiuj duonpagataj oficiroj sekvis lin : oni vidis ilin proksimiĝi per grandaj paŝoj en la lunlumo. Ni baldaŭ eniris la kafejon, kaj ni apenaŭ sidiĝis apud la granda fajenca stovo, ĉiuj homoj kune ĵetis sin tra la du pordojn.

Oni estus devinta vidi la vizaĝojn de la duonpagataj oficiroj en tiu ĉi momento! Iliaj grandaj ĉapeloj kun kornoj defilantaj sub la olelampoj, iliaj senkarnaj mienoj, pendantaj lipharoj, brilantaj okuloj, kiuj rigardis en la ombron, igis ilin simili al sovaĝaj estaĵoj vagantaj ĉirkaŭ predo. Pluraj strabis pro malpacienca kaj maltrankvilo, kaj mi kredas, ke ili vidas nenion, sed ke ilia menso estas aliloke, kun Bonaparte: estis timige.

La homoj ankoraŭ ĉiam eniradis, tiel ke oni minacis sufokiĝi kaj devis malfermi la fenestrojn. Ekstere la strato de la kavaleria kazerno kaj la placo de la Fontano estis plenaj je rumuro.

“Ni bone agis tuj venante,” diris al mi sinjoro Gulden, stariĝante sur sia seĝo, la manon sur la plato de la granda fornelo, ĉar multaj aliaj stariĝis tiamaniere.

Mi sekvis la saman ekzemplon, kaj mi vidis ĉirkaŭ mi nur atentajn kapojn, la grandajn ĉapelojn de la oficiroj en la mezo de la salono, kaj la homamason, kiu etendiĝis sur la placo en la lunlumo. La tumulto duobliĝis. Voĉo ekkriis:

“Silenton!”

Estis komandanto Margarot, kiu estis grim-pinta sur tablon. Malantaŭ li, starante sub la duobla pordo, la ĝendarmoj Keltz kaj Werner rigardis lin, kaj ĉe ĉiuj malfermitaj fenestroj la homoj klinis sin internen. En la sama momento, ĝis sur la placo, oni ripetis: “Silenton! Silenton!” Kaj la silento iĝis tiel profunda, ke oni dirus, ke nenia animo troviĝas tie.

La komandanto legis la gazeton. Tiu klara voĉo, kiu prononcis ĉiujn vorton kun ia interna vibrado, similis al la tiktakado de nia horloĝo en profunda nokto. Sendube oni aŭdis lin ĝis meze de la Armila Placo. Kaj tio daŭris longe, ĉar la komandanto legis ĉion sen transsalti ion. Mi memoras, ke la gazeto komencis dirante, ke la nomata Buonaparte⁶², malamiko de la publika bono, tiu kiu, dum dek kvin jaroj tenis Francion en la sklaveco de sia despotismo, eskapis de sia insulo, kaj ke li aŭdacis remeti la piedojn en la landon, inunditan de sango pro lia kulpo; sed ke la trupoj, fidelaj al la reĝo kaj al la nacio, estis marŝantaj renkonte al li por haltigi lin; ke, vidante tiun ĝeneralan hororon, Buonaparte estis ĵetinta sin en la montaron kun la manpleno de la almozuloj kiuj sekvis lin, ke li estis ĉirkaŭita je ĉiuj flankoj, kaj ke li ne povis eskapi al sia aresto.

Mi memoras ankaŭ, ke, laŭ tiu gazeto, ĉiuj marŝaloj estis rapidintaj meti siajn glorajn sabrojn je la servo de la reĝo, la patro de la popolo kaj de la nacio; kaj ke la fama marŝalo Ney, princo de Moskvo, kisis al li la manon, promesante rekonduki Buonaparte viva aŭ senviva.

Post tio venis latinaj vortoj, kiujn mi ne komprenis, kaj kiujn oni certe skribis por la pastroj.

De tempo al tempo mi aŭdis malantaŭ mi homojn ridi kaj primoki la ĵurnalon. Turninte la kapon, mi vidis, ke estis profesoro Burguet kaj du aŭ tri aliaj gravuloj, kiujn oni arestis post la

⁶² Napoleono ŝanĝis sian nomon Buonaparte, kiu sonis tro itale, en ‘Bonaparte’.

cent Tagoj⁶³ kaj devigis restadi en Bourges, ĉar ili estis tro inteligentaj laŭ diro de patro Gulden, kio klare montras, ke estas pli bone silenti ĉe tiaj okazoj, se oni ne emas batali por aŭ kontraŭ, ĉar vortoj nek varmigas nek malvarmigas kaj servas nur por altiri al ni malagrablajojn.

Sed okazis io multe pli grava je la fino, kiam la komandanto komencis legi la ordonojn. La unua koncerno la moviĝon de la trupoj, la dua ordonis al ĉiuj francoj kuri al Buonaparte, aresti lin kaj liveri lin viva aŭ senviva, ĉar li metis sin super la leĝon. Ĝis tiu momento la komandanto kontentigis sin per rideto, kiam li prononis la nomon Buonaparte, dum lia osteca vizaĝo apud la olelampo iomete tre-metadis sub la rigardo de la aliaj homoj, kiuj sub li aŭskultis lin. En tiu momento lia vizaĝo tute ŝanĝiĝis. Mi neniam vidis ion tiel teruran: ĝi estis nur falto super falto, liaj malgrandaj okuloj briladis kiel tiuj de kato, liaj lipharoj kaj vangharoj hirtis. Li prenis la gazeton kaj disŝiris ĝin en mil pecojn. Tiam li fariĝis tute pala, rektigis sin, etandante ambaŭ brakojn, kaj ekkriis plenforte: *Vivu la Imperiestro!* per voĉo tiel forta, ke tio donis al ni anserhaŭton. Apenaŭ li eligis tiun krion, ĉiuj duonsoldaj oficiroj levis siajn grandajn ĉapelojn, unuj per la mano, aliaj sur siaj sabroj, kaj ekkriis: *Vivu la Imperiestro!* Oni dirus, ke la plafono subenfalos. Al mi estis, kvazaŭ oni verŝus malvarman akvan sur mian dorson. "Nun," mi diris al mi, "ĉio estas finita... Iru do prediki amon kaj pacon al tiaj homoj." Ekstere, meze de grupoj de burĝoj, la soldatoj de la urbodoma posteno ripetis la krion: *Vivu la Imperiestro!* Kaj kiam mi rigardis, kion faros la ĝendarmoj en tiu granda agiteco, ili retiriĝis sen diri ion. Ankaŭ ili iam estis soldatoj.

Sed ankoraŭ ne estis finite. En la momento kiam la komandanto volis malsupreniri de sia tablo, iu oficiro ekkriis, ke necesas porti lin en triumfo, kaj tuj kelkaj aliaj prenis lin sur la ŝultroj kaj portis lin ĉirkaŭ la salono, forpuŝante la homojn kaj kriante kiel frenezuloj: *Vivu la Imperiestro!* – Li, kun siaj du longaj, harozaj manoj sur iliaj ŝultroj kaj sia kapo super iliaj ĉapeloj, vidante sin portata de siaj kamaradoj kaj aŭdante ilin kriadi tion kion li pleje amis, ekploris! Oni neniam kredus, ke tia vizaĝo povas plori. Nur tio perturbis kaj tremetigis onin. Li diris nenion kaj fermis la okulojn, dum larmoj fluadis malsupren sur liaj vangoj ĝis lia nazo kaj laŭloge de liaj lipharoj.

Mi rigardis lin, kiel oni povis imagi, kiam patro Gulden tiris min ĉe la brako. Il estis descendinta de lia seĝo kaj diris:

"Josef, ni foriru, ni foriru... La tempo urĝas!"

Malantaŭ ni la salono jam estis malplena. Ĉiuj homoj rapidis eliri tra la aleo de bierfaristo Klein, timante esti miksitaj en malbonan afe-ron. Ankaŭ ni foriris tra ĝi.

"Tio riskas ricevi malbonan turnon," diris al mi patro Gulden, transirante la placon. Morgaŭ la ĝendarmoj povos komenci militiron. Komandanto Margarot kaj la aliaj ne ŝajnas esti homoj kiuj lasas sin aresti... La soldatoj de la tria bataliono metos sin je ilian flankon, se ili ankoraŭ ne faris tion... La urbo estos ilia."

Li faris tiajn konsiderojn por si mem, kaj mi pensis kiel li.

Ĉe ni en la ateliero Trinel atendis nin tute maltrankvila. Ni rakontis al ŝi, kio okazis. La tablo esti kovrita, sed neniu malsatis. Preninte glason da vino, sinjoro Gulden demetis siajn ŝuojn, ripetante al ni:

"Miaj infanoj, laŭ tio kion ni ĵus aŭdis, la imperiestro certe alvenos en Parizo. La soldatoj volas tion, la kampuloj, kies terojn oni minacas forpreni al ili, ankaŭ volas tion. Ankaŭ la burĝoj, almenaŭ se li bone pripensis ĉion sur sia insulo, se li rezignos pri siaj ideoj de milito, precipe kun bona konstitucio, kiu garantias al ĉiuj ilian liberecon, la plej granda bono. Ni deziras tion por ni kaj por li. Kaj bonan ves-peron!"

Kaj li iris al sia alkovo.

XI

La morgaŭon, vendredon, merkototagon, la granda novaĵo plenigis la tutan urbon. Multaj kampuloj el Alsaco kaj Loreno, en bluzo, en jako, en trikorno, en katuna ĉapo, alvenis en vico sur siaj ĉaroj, ŝajne por vendi tritikon, sekalon aŭ avenon, sed pli ĝuste por ekscii, kio okazis. Ekstere oni aŭdis nur kriadi: "Hu, Bejulo! Hu, Blankulo!" kaj la veturilojn ruliĝi, la vipojn klaki. Sed ankaŭ la virinoj ne restis for. Ili alvenis de Houpe, Dagsberg, Ercheviller, Lutzelburg, la barakoj, en malgrandaj levitaj jupoj kun siaj korboj sur la kapo, rapidigante la paŝojn.

Tiu ĉi homamaso pasis sub niaj fenestroj, kaj sinjoro Gulden diris:

"Kiel ĉio agitiĝas! Kiel ĉio galopadas! Ĉu oni ne kredus, ke la spirito de la alia jam estas en la lando? Oni ne plu marŝas sen kurbigi la genuojn, kun kandeloj en la mano kaj surpluso sur la dorso."

Li aperis kontenta, kio pruvas, kiom ĉiuj ceremonioj tedis lin. Fine, ĉirkaŭ la oka, tamen necesis komenci labori, kaj Trinel eliris kiel

⁶³ Tiel oni nomas la periodon inter la reveno de Napoleono de la insulo Elbo kaj lia malvenko apud Waterloo.

kutime aĉeti panon, buteron, ovojn kaj kelkajn legumojn por la semajno. Je la deka ŝi revenis:

“Ho, Dio mia!” ŝi diris. “Ĉio jam estas returnita.”

Ŝi rakontis, ke ĉiuj duonpagataj oficiroj promenadis kun siaj longaj sabroj, komandanton Margarot en ilia mezo, kaj ke sur la placo, apud la vendohalo, inter la benkoj, antaŭ la montrofenestroj, ĉie, la kampuloj, la burĝoj, ĉiuj homoj premis la manon unuj al la aliaj, ofertis unuj al la aliaj pinĉprenon da flar-tabako, dirante:

“He! He! La komerco reprenas sian kuron.”

Ŝi ankaŭ diris al ni, ke la antaŭan nokton oni afiŝis proklamojn de Bonaparte sur la pordoj de la urbodormo, la tri pordoj de la preĝejo kaj eĉ sur la kolonoj de la vendohalo. Sed ke la ĝendarmoj deŝiris ilin tre frumatene. Koncizadire ke ĉio rekomencis moviĝi. Patro Gulden estis leviĝinta por aŭskulti ŝin. Mi, turninta sur mia seĝo, pensis:

“Jes, estas bone... estas tre bone... Sed nun mia permeso baldaŭ finiĝos. Necesas, ke vi baldaŭ moviĝos, Josef! Anstataŭ resti trankvile ĉi tie ĉe via edzino, vi baldaŭ devos remeti sur la dorson la kartoĉujon, sakon, fusilon kaj du paketojn da kartoĉoj!”

Rigardante Trinel, kiu tute ne pensis pri la malbona flanko de la afero, Weissenfelz, Lutzen, Leipzig repasis tra mia kapo. Mi fariĝis melankolia.

Dum ni sidis tie tute pensemaj, jen la pordo malfermiĝas kaj la onklino Gredel envenas. Komence ni kredis, ke ŝi estas pacama.

“Bonan tagon, sinjoro Gulden. Bonan tagon, miaj infanoj,” ŝi diris, metante sian korbon malantaŭ la fornelo.

“Ĉu vi fartas ankoraŭ bone, patrino Gredel?” demandis ŝin sinjoro Gulden.

“He! La sano... la sano!...” ŝi respondis.

Mi jam vidis, ke ŝi kunpremis la dentojn, kaj ke ŝi havis ruĝajn makuletojn sur la vangoj. Per unu movo de la mano ŝi remetis sub la kufon siajn harojn kiuj pendis laŭlonge de siaj oreloj, kaj rigardis nin unu post la alia per siaj grizaj okuloj por vidi, kion ni pensas. Tiam ŝi komencis paroli per klara voĉo:

“Ŝajnas, ke la fripono eskapis de sia insulo.”

“Pri kiu fripono vi parolas, patrino Gredel?” demandis ŝin sinjoro Gulden en trankvila tono.

“He! Vi bone scias, pri kiu mi parolas,” ŝi diris. “Mi parolas pri via Bonaparte.”

Patro Gulden, kiu vidis ŝian koleron, residigis ĉe nia labortablon por eviti disputon. Li ŝajnis rigardi en horloĝon, kaj mi faris kiel li.

“Jes,” ŝi diris, kriante pli laŭte, “jen li rekomencas fari siajn malbonaĵojn, kiam oni kredis, ke ĉio estas finita... Jen li revenas pli malbona ol antaŭe... Kia pesto!”

Mi aŭdis ŝian voĉon, kiu tremis pro kolero. Sinjoro Gulden ŝajnis daŭrigi sian laboron.

“Kiu kulpas pro tio, patrino Gredel?” li demandis sen turni sin. “Ĉu vi do kredas, ke tiuj procesioj, pentofaroj kaj predikoj kontraŭ la naciaj posedaĵoj kaj la dudekkvinjara ribelo, tiuj daŭraj minacoj restaŭri la malnovan reĝimon, la ordono fermi la butikojn dum la diservoj ktp., ktp., ĉu vi kredas, ke tio povos ankoraŭ longe daŭri? Mi demandas al vi, ĉu oni iam vidis ion tian de kiam la mondo ekzistas, ion pli kapablan ribeliĝi nacion kontraŭ tiuj kiuj volas humiligi ĝin? Ĉu oni ne dirus, ke la diablo flustris en la orelojn de tiuj Burbonoj ĉiujn tiujn stultaĵojn por naŭzi la popolon? Diru..., ĉu oni ne devis antaŭvidi ĉion kio nun okazas?”

Li ĉiam rigardis sian horloĝon per lupeo por resti trankvila. Dum tiu parolado, mi observis la patrinon Gredel el angulo de mia okulo. La koloro de sia vizaĝo ŝanĝiĝis dufoje, kaj Trinel en la fono, apud la fornelo, faris al ŝi signon, ne komenci skandalon ĉe ni. Sed tiu obstina virino mokis pri tiuj signoj.

“Vi do estas tre kontenta?” ŝi demandis. “Vi ŝanĝiĝas de unu tago al la sekvanta tute kiel la aliaj... Vi forlasas vian Respublikon, kiam tio plaĉas al vi!”

Patro Gulden, aŭdinte tion, mallaŭte tusis, kvazaŭ li havis ion en la gorĝo, kaj dum pli ol minuton li ŝajnis pripensi. La onklino malantaŭ ni rigardis lin. Fine sinjoro Gulden, kiu rekvietiĝis, malrapide respondis:

“Vi malpravas, sinjorino Gredel, farante al mi tian riproĉon. Se mi estus volinta ŝanĝiĝi, mi estus komencinta pli frue. Anstataŭ esti horloĝisto en Falsburgo, mi estus kolonelo aŭ generalo kiel ĉiu alia. Sed mi ĉiam estis, estas kaj restos ĝis mi morto por la Respubliko kaj la Homaj Rajtoj.”

Tiam li bruske turnis sin kaj, rigardante la onklinon de la kapo ĝis la piedoj kaj levante la voĉon, li diris:

“Estas pro tio, ke mi preferas Napoleonon al la duko de Artezio, la elmigrintoj, la misiistoj kaj la farantoj de mirakloj. Almenaŭ li estas devigata konservi ion de nia Revolucio, li estas devigata respekti la naciajn posedaĵojn, garantii al ĉiu liajn propraĵojn, lian rangon, kaj ĉion kion ni gajnis laŭ la novaj leĝoj. Sen tio, kiun kaŭzon li havus esti imperiestro? Se li ne konservus la egalecon de ĉiuj civitanoj, kiun kaŭzon havus la nacio deziri lian revenon? La aliaj kontraŭe atakis ĉion novan... Ili volas detruigi ĉion kion ni faris kaj forpreni al ni ĉion kion ni akiris... Jen kial mi preferas lin, ĉu vi komprenas?”

“Ha!” ekkriis patrino Gredel. “Tio estas io nova!”

Ŝi ridis malestime, kaj mi estus doninta ĉion por revidi ŝin en Quatre-Vents.

“Antaŭe vi parolis tute alie,” ŝi ekkriis. “Kiam la alia reestablis la episkopojn, ĉefepiskopojn, kardinalojn; kiam li igis sin kroni de la papo per oleo el la sankta ampolo; kiam li revokis la elmigrintojn, kiam li redonis la kastelojn kaj arbarojn al la nobelaj familioj; kiam li nomumis princojn, dukojn kaj baronojn je dekduoj. Kiom da fojoj mi aŭdis vin diri, ke estas abomene, ke li perfidis la Revolucio... ke vi preferus la Burbonojn... ke almenaŭ tiuj ĉi ne konis ion alian, ke ili estis kiel la merloj, kiuj ĉiam kantas la saman kanton, ĉar ili ne konas alian, kaj ke ili kredas, ke tiu kanto estas la plej bela en la mondo!... Ke li anstataŭe perfidis la Revolucio..., ke lia patro havis kelkdek kaprinojn en la montaro de Korsiko, kaj ke tio devis montri al li, ke ĉiuj homoj estas egalaj, ke nur kuraĝo kaj genio levas ilin! Ke li devus malestimi ĉiujn tiujn kadukajn maljunulojn, kaj militi nur por defendi la novajn rajtojn, la novajn ideojn, kiuj estas justaj, kaj ke nenio iam povos haltigi lin! Ĉu vi diris tion, kiam vi parolis kun patro Colin en la fono de nia ĝardeno malantaŭ nia domo pro timo esti arestitaj, se oni aŭdus vin? Ĉu ne estas tio kion vi diris inter vi kaj antaŭ mi?”

Patro Gulden estis fariĝinta tute pala. Li rigardis siajn piedojn kaj turnis la flartabakujon inter siaj fingroj, kvazaŭ li revus: mi eĉ vidis ian tenerecon sur lia vizaĝo.

“Jes, mi diris tion,” li respondis, “kaj mi ankoraŭ pensas tiel. Vi havas bonan memoron, patrino Gredel. Estas vere. Dum dek jaroj Colin kaj mi estis devigataj kaŝi nin por diri tiujn ĝustajn aferojn, kiuj finfine plenumiĝos, kaj estas la despotismo de unu sola homo, nas-kiĝinta inter ni, kiun ni edukis per nia propra sango, kiu devigis nin agi tiel. Sed hodiaŭ la aferoj sanĝiĝis. Tiu viro, al kiu oni ne povas rifuzi geniecon, vidis, kiel liaj fiflatantoj forlasis kaj perfidis lin. Li fine komprenis, ke liaj veraj radikoj estas en la popolo, kaj ke tiuj grandaj aliancoj, pri kiuj li havis la malfortecon tiel fieri, kaŭzis lian perdiĝon. Nu! Li revenis nun liberigi nin de la aliaj, kaj mi estas kontenta pri tio.”

“Vi mem do ne havas kuraĝon? Ĉu vi bezonas lin?” kriis onklino Gredel. “Se la pro-cesioj ĝenis vin, kaj se vi estus, kio vi diris esti: la popolo! – kial do vi bezonas lin?”

Tiam patro Gulden ekridis kaj diris:

“Se ĉiuj homoj havus la sincerecon agi laŭ sia konscienco, se multaj personoj ne estus partoprenintaj en la procesioj – iuj pro vanteco, por montri siajn belajn robojn, aliaj pro la pro-fito ricevi bonajn lokojn aŭ ekhavi permesojn, tiam vi pravus, sinjorino Gredel. Oni ne estus bezoninta Bonaparte por renversi ĉion tion. Oni estus vidinta, ke la tri kvaronoj kaj duono de la nacio estas prudentaj, kaj eble la duko de Artezio mem estus kriinta: “Halt!” Sed ĉar hipokriteco kaj profito kaŝas kaj malheligas ĉion kaj

kreas nokton en plena tago, ni malfeliĉe bezonas tiajn tondrojn por vidi klare. Vi kaj ĉiuj homoj kiuj similas al vi, estas la kaŭzo, ke homoj kiel mi, kiuj neniam ŝanĝis siajn ideojn, estas devigataj ĝoji, kiam febro anstataŭas testinspasmojn.”

Fine patro Gulden leviĝis kaj komencis promeni tien kaj reen en la ateliero kun granda eksciteco, kaj ĉar patrino Gredel volis ankoraŭ paroli, li prenis sian ĉapon kaj eliris, dirante:

“Mi diris al vi, kion mi pensas. Nun parolu al Josef, kiu ĉiam pravigas vin.”

Li tuj eliris, kaj patrino Gredel ekkriis:

“Li estas maljuna frenezulo... Li ĉiam restas la sama. Nun mi avertas vin, ke, se vi ne iros al Svisio, vi devos iri Dio scias kien. Sed pri tio ni reparolos poste, miaj infanoj. La ĉefa afero estas, ke ni estas avertitaj. Necesas atendi, kion okazos. Eble la ĝendarmoj arestos Bonaparte, sed se li alvenos en Parizo, ni kuron aliloken.”

Ŝi ĉirkaŭbrakis nin, reprenis sian korbon kaj eliris.

Kelkajn momentojn poste patro Gulden revenis, rekomencis labori kun mi sen plu paroli pri tiuj aferoj. Ni estis tute pensemaj, kaj la vespere multe surprizis min, ke Trinel diris al mi:

“Ni ĉiam aŭskultos sinjoron Gulden... Li pravus... Li pli bone komprenas la aferojn, ol mia patrino, kaj ĉiam donas al ni bonajn konsilojn.”

Aŭdante tion, mi pensis:

“Ŝi simpatias kun patro Gulden, ĉar ili kune legas la gazeton. Tiu gazeto ĉiam diras, kio pleje plaĉas al ili, sed tio ne malhelpas, ke, se mi devos repreni la sakon kaj foriri, tio estos terura por ni. Pli bone estos iri al Svislando, ĉu al Ĝenevo, ĉu al la fabriko de patro Rulle en Chaux-de-Fonds, ol al Leipzig aŭ aliloken.”

Mi ne volis kontraŭdiri Trinel, sed ŝiaj paroloj multe tedis min.

XII

Ekde tiu momento ĉie regis konfuzo. La duonsoldaj oficiroj kriadis: *Vivu la Imperiestro!* La loka komandanto volis ja doni la ordonon aresti ilin, sed la batalionon simpatiis kun ili, kaj la ĝendarmoj ŝajnis aŭdi nenion. Oni jam ne laboris. La impostricevantoj, la kontrolistoj, la urbestro, la adjunktoj ktp. ekhavis grizajn harojn, ne jam sciante, per kiu piedo danci. Neniu kuraĝis deklari sin por Bonaparte aŭ por Ludoviko XVIII, escepte de la tegmentistoj, masonistoj, ĉarpentistoj kaj tiuj kiuj perlaboras malmulte, kiujn oni ne povis maldungi kaj kiuj volonte vidus aliajn labori sur sia loko. Tiuj ĉi, hakilon malantaŭ la leda zono kaj paketon da tegeloj sur la ŝultro, ne ĝenis sin kii: “La

elmigrintoj malsupren! Ili eĉ ridis pri la malordo, kiu pligrandiĝis okulvide. Iutage la gazeto diris: "La uzurpinto estas en Grenoble", la morgaŭon, "Li estas en Lyon", la postmorgaŭon, "Li estas en Auxerre", kaj tiel plu.

Vespere legante tiujn novaĵojn, sinjoro Gulden ĝojis.

"Oni vidas nun, ke la francoj estis por la Revolucio," li ekkriis, "kaj ke la aliaj neniam povos sukcesi. Ĉiuj kriadas: "*La elmigrintoj malsupren!*" Kia leciono por tiuj kiuj klare vidas! Tiuj Burbonoj volis fari vendeanojn el ni ĉiuj. Ili devas nun ĝoji, ke ili tiel bone sukcesis."

Sed unu afero ankoraŭ maltrankviligis lin: tio estis la granda batalo, kiun oni anoncis inter marŝalo Ney kaj Napoleono.

"Kvankam Ney kisis la manon de Ludoviko XVIII," li diris, "li ĉiam estas eksa soldato de la Revolucio, kaj mi neniam kredos, ke li batalos kontraŭ la volo de la popolo...Ne, tio ne eblas. Li rememoros la maljunan bareliston de Sarre-Louis⁶⁴, – kiu rompus lian kapon per sia martelo, se li ankoraŭ vivus, eksciante, ke lia Michel perfidis la nacion por plaĉi al la reĝo."

Jen tio kion diris sinjoro Gulden. Sed tio ne malhelpis la homojn esti maltrankvilaj, kiam subite alvenis la novaĵo, ke Ney sekvis la ekzemplon de la armeo, de la burĝoj, de ĉiuj kiuj volis esti liberigitaj de la pentofaroj, kaj ke li aliĝis al Napoleono. Tiam la fido estis pli granda, sed la timo pro eksterordinara okazaĵo ankoraŭ silentigis la prudentulojn.

La 21-an de marto, inter la kvina kaj la sesa vespere, sinjoro Gulden kaj mi estis laborantaj. Jam noktiĝis kaj Trinel bruligis la lampon. Ekstere fajna pluveto fluadis sur la vitroj, Theodor Roeber, kiu direktis la telegrafon, pasis sub niaj fenestroj. Li rajdis sur granda griza ĉevalo. La aero ŝveligis sian bluzon, tiel rapide li rajdis. Per unu mano li tenis sian grandan feltan ĉapelon, kaj per la alia li frapis per bastoneto sian ĉevalon, kiu galopadis kiel vento. Viŝante la vitron, sinjoro Gulden kliniĝis por pli bone vidi kaj diris:

"Estas Roeber, kiu venas de la telegrafo. Alvenis granda novaĵo!"

Liaj iom palaj vangoj ruĝiĝis. Mi sentis mian koron violente bati. Trinel metis la lampon apud ni, kaj mi malfermis la fenestron por subentiri la fenestrovitrilon. Tio daŭris kelkajn momentojn, ĉar necesis forpreni la vitrojn de la labortablo kaj malkroĉi la horloĝojn por povi malfermi la fenestron. Sinjoro Gulden revis. Kiam mi enkroĉis kaj hokon, ni aŭdis bati la apelon je ambaŭ flankoj de la urbo samtempe, apud la bastiono de Mittelbronn kaj sur tiu de Bigelberg. La eĥoj de la remparoj kaj tiuj de la valoj respondis al la tamburado, kaj mallaŭta bruo

plenigis la tutan placon je la horo en kiu komenciĝas la nokto.

Sinjoro Gulden leviĝis.

"La aferoj estas deciditaj nun," li diris per voĉo, kiu malvarmigis min. "Aŭ oni batalas en la ĉirkaŭaĵo de Parizo, aŭ la imperiestro estas en sia malnova palaco kiel en 1809."

Trinel jam kuris serĉi sian mantelon, malgraŭ la pluvo. Sinjoro Gulden, parolante kun grande malfermitaj okuloj, senatente lasis al si surmeti la manikojn. Tiam li eliris, kaj Trinel, tuŝante mian ŝultron, ĉar mi restis, kie mi estis, diris al mi:

"Iru do, Josef, sekvu lin."

Mi tuj malsupreniris. Ni alvenis sur la placo en la momento, kiam la bataliono eliris la ĉefstraton ĉe la angulo de la urbodomo malantaŭ la tamburistoj, kiuj kuris, la tamburojn sur la ŝultro. Homamaso sekvis ĝin. Sub la maljunaj tilioj la tamburrulado rekomenciĝis. La soldatoj metis sin en vicojn, kaj preskaŭ tuj komandanto Gémeau, kiuj suferis pro siaj vundoj kaj jam de du monatoj ne eliris, aperis en uniformo sur la ŝtupoj de la domo Minque. Lia servisto tenis lian ĉevalon per la mano kaj ofertis al li sian ŝultron por enseliĝi. De ĉiuj flankoj oni rigardis. La apelo komenciĝis.

La komandanto transiris la placon, kaj la kapitanoj vigle iris renkonte al li. Ili diris kelkajn vortojn inter si, kaj tiam la komandanto pasis antaŭ la fronto de la bataliono, dum post li antaŭeniris simpla serĝento kun tri galonoj, kiu portis flagon en ĝia ujo de vaksita tolo.

La homamaso ĉiam pligrandiĝis. Sinjoro Gulden kaj mi grimpis sur la kilometrofoŝton fronte al la gardista arkaĵo. Post la apelo la komandanto tiris sian sabron kaj donis la ordonon formi kvadraton.

Mi simple rakontas al vi tiujn aferojn, ĉar ili estis simplaj kaj teruraj. Per la paleco de la vizaĝo de la komandanto oni vidis, ke li havas febron, kaj tamen estis preskaŭ nokto. La grizaj linioj de la kvadrato sur la placo, la komandanto surĉevalo en la mezo, la oficiroj ĉirkaŭe, sub la pluvo, la burĝoj aŭskultantaj, la profunda silento, la fenestroj malfermiĝantaj en al ĉirkaŭaĵo, ĉio ankoraŭ ĉeestas en mia menso, kaj tamen ĉio tio okazis antaŭ preskaŭ kvindek jaroj!

Neniu parolis, ĉar ĉiuj sciis, ke oni ekscios la sorton de Francio.

"Prezentu armilon!...Armilon malsupren!..." kriis kapitano Vidal.

Post la bruo de la armiloj, oni aŭdis nur la voĉon de la komandanto, tiu klara voĉo, kiun mi aŭdis trans Rejno, apud Lutzen kaj Leipzig, kiu kriis al ni: "Densigu la vicojn!" Ĝi trairis min ĝis la osta medolo.

⁶⁴ Nome lia propran patron

“Soldatoj!” li kriis. “Lia Moŝto Ludoviko XVIII forlasis Parizon la 20-an de marto, kaj imperiestro Napoleono eniris la ĉefurbon la saman tagon.”

Speco de tremeto ĉien disvastiĝis, sed tio daŭris nur unu sekundon, kaj la komandanto daŭrigis:

“Soldatoj! La flago de Francio estas la flago de Arcole, de Rivoli, de Aleksandrio, de Chebresse, de la Piramidoj, de Abukir, de Marengo, de Austerlitz, de Jena, de Eylau, de Friedland, de Sommo-Sierra, de Madrido, de Abensberg, de Eckmül, de Essling, de Wagram, de Smolensk, de Moskvo, de Weis-senfelz, de Dresden, de Bischofswarda, de Hanau, de Brienne, de Saint-Dizier, de Cham-pobert, de Château-Thierry, de Joinvilliers, de Méry-sur-Seine, de Montereau, de Montmirail, – Estas la flago, kiun ni farbis per nia sango... estas la flago de nia gloro.”

Kaj la maljuna serĝento eligis la trikoloran flagon tute disŝiritan el ĝia ujo. La komandanto prenis ĝin:

“Jen tiu flago!... Vi rekonas ĝin... estas tiu de nia nacio... Estas tiu kiun la rusoj, prusoj, aŭstroj kaj ĉiuj kiujn ni centfoje ŝparis, forprenis al ni la tagon de sia unua venko, ĉar ili timis ĝin.”

Granda nombro da maljunaj soldatoj, aŭdante tiujn vortojn, forturnis la kapon por kaŝi siajn larmojn. Aliaj, tute palaj, rigardis ĝin per teruraj okuloj.

“Mi,” kriis la komandanto, levante sian sabron, “mi ne konas alian. *Vivu Francio! Vivu la Imperiestro!*”

Apenaŭ li eligis tiun krion, ĉio eksplodis en krioj. Oni aŭdis plu nenion alian. El la fenestroj, sur la placo, sur la stratoj, ĉie la krioj: *Vivu la Imperiestro! Vivu Francio!* sonis kiel trum-petado. La homoj kaj la soldatoj ĉirkaŭbrakis sin. Oni estus dirinta, ke ĉio estas savita, ke ni retrovis ĉion kion Francio perdis en 1814.

Estis preskaŭ nokto. Oni foriris dekstren kaj maldekstren, triope, sesope, dudekope, krian-te: *Vivu la Imperiestro!* kiam je la flanko de la malsanulejo ruĝa fulmo transiris la ĉielon... kanono tondris! Malantaŭ la arsenalo alia respondis, kaj tio daŭris kelkan tempon.

Patro Gulden kaj mi transiris la placon bra-kon en brako, kriante ankaŭ *Vivu Francio!* Kaj ĉar ĉe ĉiu kanonpafo tra la malhela nokto, la lumo venis ĝis super la placo, ni vidis en la fulmolumo Trinell, kiu venis renkonte al ni kun la maljuna sinjorino Madeleine Schuler. Ŝi estis surmetinta sian kapuĉeton. Ŝia rozkolora nazo estis bone kaŝita kontraŭ la nebulo. Vidante nin, ŝi diris:

“Madeleine, jen ili! La imperiestro estas la mastro de la lando, ĉu ne, sinjoro Gulden?”

“Jes, mia infano,” respondis patro Gulden. “Tio estas decidita.”

Tiam Trinell prenis mian brakon, kaj mi ne sciis kial, sed mi komencis kisi ŝin, dufoje, trifoje, reirante hejmen. Mi eble sentis antaŭe, ke mi devos baldaŭ foriri, kaj ke mi ne plu kisos ŝin dum longa tempo. Patro Gulden, antaŭ ni kun Madelon, diris:

“Tiu ĉi vesperon mi volas trinki iomete. Supreniru, Madeleine, mi invitas vin.”

Sed ŝi ne volis kaj forlasis nin ĉe nia pordo.

Ĉio kion mi povas diri, estas, ke la ĝojo de la homoj estas same tiel granda, kiel ĉe la alveno de Ludoviko XVIII, kaj eble ankoraŭ pli granda.

Alveninte en nia ĉambro kaj senigite de sia mantelo, sinjoro Gulden sidigis ĉe la tablon, ĉar la vespermanĝo atendis. Trinell iris en la kelon preni bonan botelon. Ni trinkis kaj ridis, dum la kanono igis tremeti niajn vitrojn. Kelkafoje la homoj perdas la prudenton, eĉ tiuj kiuj amas nur pacon. Tiuj kanonpafoj ĝojigis nin. Ni, se tiel diri, revenis al niaj malnovaj kutimoj.

Sinjoro Gulden diris:

“Komandanto Gémeau bone parolis. Sed li estus povinta daŭrigi ĝis morgaŭ, komencante per Valmy, Hundschott, Wattignies, Fleurus, Neuwied, Ukerath, Fröschwiller, Geisberg, ĝis Zürich kaj Hohenlinden. Tio ankaŭ estis grandaj venkoj, kaj eĉ la plej belaj el ĉiuj, ĉar ili savis liberecon. Li parolis nur pri la lastaj, tio sufiĉas por la momento. La aliancanoj venu... Ili aŭdacu moviĝi! La nacio volas pacon. Sed se la aliancanoj komencas militon, ve ili! Nun oni reparolos pri libereco, egaleco kaj frateco. Pro ili la tuta Francio leviĝos..., mi certigas vin, ĉiuj amase leviĝos. Oni faros naciajn gvardiojn. La maljunuloj kiel mi kaj la edziĝintaj viroj defendos la urbojn. La junaj marŝos, sed oni ne transiros la landlimojn. La imperiestro, instruite de sia spertoj, amos laboristojn, kampulojn kaj burĝojn. Se la aliaj venos, eĉ se ili estos miliono, neniuj eliros el nia lando. La tempo de la soldatoj estas pasinta. La regulaj armeoj estas bonaj por konkerti, sed popolo kiu volas defendi sin, ne timas la plej bonajn soldatojn en la mondo. Ni vidigis tion al la prusoj, aŭstroj, angloj kaj rusoj de 1792 ĝis proksimume 1800. Kaj tiam la hispanoj vidigis tion al ni, kaj eĉ, antaŭ tio, la amerikanoj vidigis tion al la angloj, estu certaj pri tio. Se li volos fari proklamojn en Germanio, multaj germanoj estos kun ni. Oni promesis al ili liberecojn por marŝigi ilin amase kontraŭ Francion, kaj nun la suverenoj, kunvenintaj en Vieno, mokas pri ili kaj ne plenumas siajn promesojn. Ilia celo estas klara: ili dividas inter si la popolojn kvazaŭ ŝafarojn. La prudentaj popoloj subtenos unuj la aliajn. Tiumaniere paco estos establita perforte. Nur la reĝoj profitos de militoj. La popoloj ne bezonas konkerojn, sed pacon por povi trankvile labori kaj komerci. Jen la ĉefa afero!”

En sia ekscitiĝo li vidis ĉion ideala. Mi mem trovis tiel memkomprenebla kion li diris, ke mi estis certa, ke la imperiestro agus tiumaniere. Trinel ankaŭ kredis tion. Ni benis la Sinjoron pro tio kio okazis. Kaj je la dek-unua, bone ridinte, bone parolinte kaj bone kriinte, ni enlitiĝis meze de la plej belaj esperoj. La tuta urbo estis prilumita, ĉar ĉiuj, ankaŭ ni, estis metintaj lampionojn antaŭ la fenestroj. Ĉiu-momente ni aŭdis, kiel petardoj eksplodis, infanoj kriadis: *Vivu la Imperiestro!* kaj soldatoj eliris gastejojn kantante: *La elmigrintoj mal-supren!*

Tio daŭris ĝis tre malfrue, kaj nur je la unua nokte ni ekdormis kun la graco de Dio.

XIII

La kontenteco daŭris ankoraŭ kvin aŭ ses tagojn. Oni renomumis la malnovajn urbestrojn, adjunktojn, lokajn policianojn kaj ĉiujn kiujn oni antaŭe estis metinta flanken. La tuta urbo, inkluzive de la virinoj, portis etajn tri-kolorajn kokardojn, kiujn la kudristinoj rapidis ornamati per ruĝaj-blankaj-blauaj rubandoj. Tiuj kiuj antaŭe kriegis kontraŭ *la Antropofago el Korsiko* nomis Ludovikon XVIII nur *la pansupa reĝo*. La 25-an de marto oni kantis la *Te Deum* en la preĝejo. La tuta garnizono kaj ĉiuj civilaj aŭtoritatuloj ĉeestis ĝin en granda ceremonio.

Post la *Te Deum* la aŭtoritatuloj donis brilegan bankedon al la stabo de la urbo. La vetero estis rebeliĝinta, la fenestroj de *la Urbo Metz* estis malfermitaj, cumoj da olelampoj pendis de ĝia plafono. Vespere Trinel kaj mi eliris por ĝui la spektaklon. Oni vidis la uniformojn kaj nigrajn kostumojn kune interfratiĝi ĉirkaŭ longaj tabloj, kaj ĝis noktomezo jen la urbestro, jen adjunkto, aŭ la nova loka komandanto, sinjoro Brancion, leviĝis por trinki je la sano de la imperiestro, de la ministroj de Francio, je paco, je la venko ktp.

La glasoj tintis. Ekstere infanoj eksplodigis petardojn. Oni estis plantita maston de kokanjo⁶⁵ antaŭ la preĝejo. Lignaj ĉevaloj estis alvenintaj de Saverne kun orgengurdistoj. La kolegianoj feriiis. En la korto de Klein, *en la Bovo*, oni liveris batalon de hundoj kontraŭ du azenoj. Oni faris la samon kion oni faris en 1830 kaj 1848 kaj poste. Ĉiam estas la samo. La homoj inventas nenion novan por glorigi la suprenirintojn kaj primoki la malsuprenirintojn.

Sed ŝajnis, ke la imperiestro ne havis tem-pon perdenda per amuzoj. La gazeto diris ja, ke Lia Moŝto deziris pacon, ke li demandis nenion, ke

li konsentis kun sia bopatro, impe-riestro Francisko, ke Maria-Luiza kaj la reĝo de Romo estis revenontaj... Ke li atendis ilin... Jes, sed intertempe alvenis la ordono armi la urbon. Du jarojn antaŭe Falsburgo troviĝis je cent mejloj de la limo, la remparoj ruiniĝis, la fosaĵoj denove pleniĝis, en la arsenalo restis nur malnova fatraso el la tempo de Ludoviko XIV, remparfusiloj, kiujn oni bruligis per meĉoj, tiel pezaj kanonoj sur siaj masivaj afustoj, ke necesis vicoj da ĉevaloj por treni ilin. La veraj arsenaloj troviĝis en Dresdeno, Hamburgo, Erfurto. Sed nun, sen fari ian movon, ni estis je dek mejloj de la rejnlanda Bavario, kaj sur nin estis falonta la unua pluvado de kugloj kaj grenadoj. Tial tagon post tago ni ricevis la ordonon realtigi la remparojn, reprofundigi la fosaĵojn, remeti la fatrason en bonan staton.

Komence de aprilo oni establis grandan atelieron en la arsenalo por ripari la armilojn. Alvenis pioniroj kaj artilerianoj el Metz por fari terasojn en la bastionoj kaj paftruojn ĉirkaŭe. Estis ankoraŭ pli granda moviĝo ol en 1805 kaj 1813, kaj mi pensis pli ol unufoje, ke la grandaj malproksimaj limoj tamen havis sian avantaĝon, ĉar tiuj en la interno estas protektataj kontraŭ la batoj kaj povas vivi tre longe en paco, dum oni jam bombardas la aliajn.

Koncizadire ni spertis grandan maltrankvilon, ĉar kompreneble, kiam oni replantas novajn fostojn sur la talusoj, metas branĉo-faskojn sur la duonlunojn⁶⁵, ĝustigas kanonojn en ĉiuj anguloj de la fortikigitaj lokoj, oni ankaŭ bezonas virojn por gardi kaj manipuli ĉion ĉi. Pli ol unufoje, aŭskultante vespere la legadon de tiaj dekretoj, ni rigardis nin, la lipojn kunpremitajn. Mi ja antaŭe sentis, ke, anstataŭ plu trankvile purigi kaj ripari horloĝojn, mi eble estis devonta rekomenci la ŝargon de fusilo en dudek tempoj, kaj tio malbone efikis sur min. Malĝojo pli kaj pli superfortis min. Ofte sinjoro Gulden, vidante min tute pensema, ekkriis en ĝojo tono:

“Nu! Kuraĝon, Josef: ĉio bone finiĝos.”

Li volis kuraĝigi min, sed mi pensis:

“Jes, jes, vi diras al mi tiujn aferojn por kuraĝigi min, sed, se oni ne estas blinda, oni vidas en kiu direkto iras la aferoj.”

Ĉio iris tiel rapide, ke la dekretoj sekvis unuj la aliajn kiel hajleroj, ĉiam kun grandaj vortoj por plibeligi ilin. Oni eksciis, ke la regimentoj reprenos siajn malnovajn numerojn “famiĝintajn en tiom da gloraj militiroj”. Sen multe da malico ĉiu bone komprenis, ke la malnovaj numeroj sen regimentoj reekhavas regimentojn. Kaj kvazaŭ tio ankoraŭ ne sufiĉis, oni

⁶⁵ Longa glita ornamita ligna fosto, sur kiu oni grimpis por kapti florbukedon. Antaŭe tre populara dum kermesoj.

⁶⁵ Duoncirkloforma placeto sur bastiono.

eksciis, ke la kadroj de la 3-a, 4-a kaj 5-a infanteribatalionoj, de la 4-a kaj 5-a kavalerieskadronoj, de tridek batalionoj de la artileritrajno, de dudek regimentoj de la juna gvardio, de dek batalionoj de la militistaj trajnoj, de dudek regimentoj de la mararmeo, ke ĉiuj tiuj kadroj estos kreitaj sub la preteksto doni okupon al la duonpagataj oficiroj de ĉiuj teraj kaj maraj armeunuoj. Sed se oni kreas kadrojn, tio estas por plenigi ilin, kaj kiam ili estos plenigitaj, necesas, ke la soldatoj foriru batali. Ha! Kiam mi vidis tion, mia fido malaperis. Kaj oni ĉiam ripetis: "Paco! Paco! Paco!... Ni estis akceptintaj la Parizan Traktaton... La reĝoj kaj imperiestroj unuiĝintaj en Vieno akordiĝis kun ni... Maria-Luiza kaj la reĝo de Romo estas survoje." Ju pli ofte oni ripetis tiujn novaĵojn, des pli kreskis mia malfido. Sinjoro Gulden vane diris al mi:

"Li prenis Carnot! Carnot estas bona patrioto!... Carnot malhelpos lin militi!... Aŭ, se ni estos devigataj militi, li montros al li, ke necesas atendi la malamikon ĉe ni... ke necesas igi la nacion levi sin... deklari la patrion en danĝero... ktp."

Li vane diris al mi tiajn aferojn, kaj mi ĉiam kriis en mi mem: "Ĉiuj tiuj kadroj ne estas kreitaj por nenio... tiuj kadroj estos plenigitaj... tio estas certa."

On ankaŭ eksciis, ke du mil elitaj soldatoj eniros la gvardion, kaj ke la leĝera artilerio estos reorganizita. La leĝera artilerio sekvas la armeojn, ĉiuj scias tion. Por resti malantaŭ la remparoj kaj defendi sin hejme, la leĝera artilerio ne utilas. Tiu penso tuj venis al mi, kaj eĉ vespere mi ne povis malhelpi min diri tion al Trinel. Mi ĉiam zorge kaŝis miajn timojn al ŝi, sed tiun fojon mia timo estis tro forta. Ŝi ne respondis, kio montras, ke ŝi estas prudenta, kaj ke ŝi pensis kiel mi.

Ĉiuj tiuj aferoj multe malvarmigis mian entuziasmon por la imperiestro. Kelkafoje dum la laboro mi diris al mi:

"Mi tamen preferus vidi de mia fenestro la procesiojn, ol foriri batali kontraŭ homojn kiujn mi ne konas! Tiu vido almenaŭ kostus al mi nek brakon nek kruron, kaj se ĝi tro tedus min, mi povus fari promenon al Quatre-Vents."

Mia ĉagreno kreskis tiom pli, ĉar ekde sia disputo kun sinjoro Gulden onklino Gredel ne plu venis viziti nin. Ŝi estis obstina virino, kiu ne pensis racie kaj gardis renkoron kontraŭ la homoj dum multaj jaroj. Ŝi tamen estis nia patrino kaj ni devis cedi al ŝi. Ŝi deziris nur nian feliĉecon. Sed kiel ni povus samtempe konsenti kun ŝi kaj kun sinjoro Gulden? Jen kio embarasis nin, ĉar se ni ŝuldis amon al onklino Gredel, ni ankaŭ ŝuldis la plej grandan respekton al tiu kiu konsideris nin kiel siajn

proprajn infanojn, kaj kiu ĉiutage superŝutis nin per siaj bonfaroj.

Tiuj pensoj multe malĝojigis nin, kaj mi decidis diri al sinjoro Gulden, ke mi kaj Trinel estis jakobenoj kiel li, sed ke, sen kontraŭdiri la ideojn de la jakobeno kaj sen forlasi ilin, ni tamen devis honori nian patrinon kaj informi nin pri ŝia sanstato. Mi ne sciis, kiel li ricevos nian deklaron, kiam iumatene, dimanĉe, descendante je la oka, ni trovis tiun bonegan viron tute vestita. Li ŝajnis bonhumora kaj diris al ni:

"Miaj infanoj, jen preskaŭ monato, ke onklino Gredel ne venis viziti nin. Ŝi obstinas. Nu, mi volas montri pli da sprito ol ŝi, kaj mi pretas cedi al ŝi. Inter homoj kiel ni povas ekzisti nenia nuboj. Post la matenmanĝo ni iros al Quatre-Vents diri al ŝi, ke ŝi estas obstina, sed ke ni amas ŝin malgraŭ ŝiaj mankoj. Vi vidis, kiel ŝi hontos!"

Li ridis, kaj ni estas tuŝitaj.

"Ha, sinjoro Gulden! Kiel bonkora vi estas!" diris al li Trinel. "Tiuj kiuj ne amus vin, havus tre malbonan koron."

"He!" li ekkriis. "Ĉu tio kion mi faras, ne estas tute nature? Ĉu ni devas resti dividitaj pro vortoj? Dankon al Dio, la aĝo instruas nin, ke la plej prudenta ĉiam devas fari la unuan paŝon. Kaj vi scias, ke tio estas skribita eĉ en la Homaj Rajtoj por konservi la konkordon inter la honestaj homoj."

Kiam li citis la Homajn Rajtojn, ĉio estis dirita. Oni povas imagi nian kontentecon. En sia ĝojo Trinel povis apenaŭ atendi la finon de la matenmanĝo. Ŝi kuris dekstren kaj maldekstren, prenante la promenbastonon, la kvadratajn ŝuojn, la skatolon en kiu troviĝis la bela peruko de sinjoro Gulden. Ŝi helpis lin surmeti la manikojn de sia frako. Li rigardis ŝin ride-tante, kaj fine kisis ŝin.

"Ha! Mi ja sciis, ke tiu demarŝo feliĉigos vin. Tial ni perdu nenian momenton kaj foriru."

Ni do eliris kune. La vetero estis tre bela. Sinjoro Gulden donis brakon al Trinel, grave, kiel li ĉiam faris en la urbo, kaj mi marŝis malantaŭ ili kun ĝojo en mia animo. Mi havis antaŭ miaj okuloj la estulojn kiujn mi pleje amis en la mondo, kaj mi pensis pri tio kion diros patrino Gredel. Ni preteriris la avanceon, tiam la talusojn, kaj dudek minutojn poste, sen tro rapidi, ni alvenis antaŭ la pordo de la onklino.

Povis esti la deka. Ĉar mi prenis iom da antaŭeco ekde la gastejo *la Ruleto*, mi unue eniris la aleon de sambukoj kiuj staris laŭlonge de la malantaŭa flanko de la domo, kaj mi rigardis tra la fenestreto por vidi, kion onklino Gredel estas faranta. Ŝi sidis ĝuste fronte al mi apud la fumanta fajrejo. Ŝi surhavis sian malgrandan jupon kun bluaj strioj kaj grandaj poŝoj, ŝian tolan korseton kun ŝelketoj kaj ŝiajn

malnovajn pantoflojn. Ŝi estis ŝpininta kun malĝoje mallevitaj okuloj. Ŝiaj longaj, maldikaj brakoj elstaris el la ĉemizomanikoj ĝis la kubutoj. Ŝiaj grizaj haroj sen kufo estis volvitaj en tuberon sur la nuko.

Vidante ŝin tiel tute sola, mi diris al mi: "Povra onklino Gredel, ŝi certe estas pensanta pri ni... ŝi obstinas en sia ĉagreno... Estas tamen malĝoja ekzisto, se oni vivas sola kaj ne povas vidi siajn infanojn." Tio kunpremias al mi la koron. En la sama momento la pordo ĉe la strata flanko malfermiĝis kaj patro Gulden, tute ĝoja, eniris kun Trinela, ekkriante:

"Ha, patrino Gredel! Vi ne plu venas viziti nin. Necesas do nun, ke mi alkonduku al vi viajn infanojn, kaj ke ankaŭ venu mi mem kisi vin! Vi faros bonan tagmanĝon, ĉu vi aŭdas? Kaj tio servu al vi kiel leciono!"

Li ŝajnis serioza en sia ĝoja. Vidante ilin, la onklino rapidis alkuri kaj ĉirkaŭbraki Trinela. Tiam ŝi falis en la brakojn de sinjoro Gulden kaj pendigis sin ĉe lia kolo.

"Ha, sinjoro Gulden!" ŝi ekkriis. "Kiel feliĉa mi estas vidi vin! Vi estas bona viro, vi valoras milfoje pli ol mi."

Vidante, ke ĉio prenis bonan direkton, mi kuris al la pordo kaj trovis ambaŭ kun larmoj en la okuloj. Patro Gulden diris:

"Ni ne plu parolos pri politiko!"

"Ne! Estu oni jakobeno aŭ kio ajn oni volas," ekkriis la onklino, "la ĉefa afero estas, ke oni havas bonan koron."

Tiam ŝi venis ĉirkaŭbraki ankaŭ min, dirante:

"Mia povra Josef, mi pensis pri vi de mateno ĝis vespero... Nun ĉio estas bona... Mi estas kontenta."

Tiam ŝi kuris en la kuirejon, movante ĉiujn kaserolojn por regali nin, dum sinjoro Gulden metis sian bastonon en angulon, sian grandan ĉapelon sur ĝin kaj sidiĝis apud la fajrejo kun kontenta mieno.

"Kia bela vetero!" li ekkriis. "Ĉio verdiĝas, ĉio floras... Kiel feliĉa mi estus povi vivi en la kamparo, vidi heĝojn tra miaj fenestroj, pomujojn kaj prunuojn tute blankajn kaj rozkolorajn!"

Li estis gaja kiel alaŭdo, kaj ni ĉiuj estus tiaj sen tiuj pensoj pri milito, kiuj trotadis la tutan tempon tra nia kapo.

"Lasu tion, patrino," diris Trinela. "Trankvile sidiĝu apud sinjoro Gulden. Mi preparos la tagmanĝon, kiel antaŭe."

"Sed vi konas la lokon de nenio plu ... Mi rangiĝis ĉion aliloke," diris la onklino.

"Mi petas vin, sidiĝu," ripetis Trinela. "Estu trankvila, mi ja trovos la buteron, la ovojn, la farunon kaj ĉion kio necesas"

"Nu, nu, mi obeos al vi," diris la onklino, malsuprenirante en la kelon.

Trinela pendigis sian belan ŝalon sur la dorson de mia seĝo, metis lignon sur la fajron, buteron

en la paton kaj regardis en la marmitojn por vidi, ĉu ĉio bone kuiris. En la sama momento la onklino resupreniris el la kelo kun botelo da blanka vino.

"Unue vi iros refreŝigi vin antaŭ ol tagmanĝi," ŝi diris. "Kaj dum Trinela kuiras, mi surmetos mian kazakenon kaj kombos al mi la harojn, ĉar, Dio scias, mi bezonas tion. Vi eliru en la fruktarbaron. He, Josef, prenu tiujn glasojn kaj la botelon... Sidiĝu apud la abelejo... La vetero estas bela... Post duonhoro ĉio estos en ordo, kaj mi venos trinki kun vi."

Patro Gulden kaj mi do eliris, transirante la altajn herbojn, la flavajn leontodojn, kiu atingis niajn genuojn. Estis varmega, kaj la abeloj zumadis. Ni instalis nin en la ombro de la abelejo, rigardante la belegan sunbrilon inter la abeluloj. Sinjoro Gulden pendigis sian perukon malantaŭ si por sidi pli komforte. Mi senkor-kigis la botelon, kaj ni trinkis glason da blanka vino.

"Nu, ĉio iras glate," li diris. "Eĉ se la homoj faras stultaĵojn, Sinjoro Dio ĉiam atentis pri siaj aferoj. Rigardu la grenon, Josef, kiel ĝi kreskas... Kian belan rikolton ni havos post tri, kvar monatoj! Kaj tiu napoj, tiuj arbustoj, tiuj abeloj, kiel ĉio laboras, kiel ĉio vivas, kiel ĉio grandiĝas!... Kia malfeliĉo, ke la homoj ne sekvas ilian ekzemplon, ke unuj laboras por nutri la maldiligentecon de la aliaj, kaj ke ĉiam estas ĉiaspecaj neniofarantoj, kiuj traktas nin kiel jakobenojn, ĉar ni volas ordon, justicon kaj pacon!"

Plej en la mondo li ŝatis vidi laboron, ne nur la nian, kiu estas nenio, sed de la insektoj, kiuj rampadas sur la tero inter la herbotigoj kvazaŭ tra senfinaj arbaregoj; kiuj konstruas al si loĝejojn, kiuj pariĝas, kiuj kovas siajn ovojn, kiuj stakigas ilin en magazenoj, kiuj varmigas ilin en la sunbrilo, kiuj enirigas ilin ĉe noktiĝo, kiuj defendas ilin kontraŭ malamikoj; koncize dirite, tiu granda vivo, kie ĉio kantas, kie ĉio estas sur sia loko, ekde la alaŭdo, kiu plenigas la ĉielon per sia gaja muziko, ĝis tiu de la formiko, kiu iradas kaj venadas, falĉas, segas, trenas kaj faras ĉiujn metiojn. Jes, tion sinjoro Gulden admiris. Sed li parolis pri tio nur sur la kampoj, vidante tiun grandan spektaklon. Kaj kompreneble ĉe tio li parolis pri Dio, kiun li nomis ka Plej Alta Estulo, kiel la malnovaj kalendaroj de la Respubliko, dirante, ke Li estas prudento, saĝo, boneco, amo, justeco, ordo, kaj vivo. La malnovaj ideoj de la kalendaro ankaŭ revenis al li. Estis bele aŭdi lin paroli pri pluviozo, la monato de la pluvoj; pri nevozo, la monato de la neĝoj; pri ventozo, la monato de la ventoj; kaj tiam pri florealo, prerialo, fruktodoro. Li diris, ke la ideoj de la homoj tiutempe rilatis al tiuj de Dio, dum julio, septembro, oktobro signifas nenion kaj eĉ estas inventitaj por fuŝi kaj obskurigi ĉion. Alirinte tiun

ĉapitron, li ne povis fini. Oni vidis ĉion tra liaj okuloj. Malfeliĉe mi ne ricevis la instruadon, kiun ricevis tiu bona viro. Alie estus por mi vera plezuro rakonti al vi liajn ideojn.

Ni ĝuste alvenis ĉe tiu ĉapitro, kiam patrino Gredel, bone lavita kaj kombita, en dimanĉaj vestaĵoj, alproksimiĝis de la domangulo al la abelejo, kaj li tuj eksilentis por gardi konkur-don.

“He! Jen mi estas nun,” diris la onklino. “Ĉio estas en ordo.”

“Nu, sidiĝu,” diris sinjoro Gulden, farante al ŝi lokon sur la benko.

“He! Ĉu vi scias, kioma horo jam estas? La tempo urĝas por vi... Aŭskultu!...”

Tiam, streĉante la orelojn, ni aŭdis la urban horloĝon malrapide sonorigi siajn dekdu batojn.

“Kiel? Ĉu jam estas la dekdua?” ekkriis la patro Gulden. “Mi kredis, ke ni alvenis nur antaŭ dek minutoj!”

“Nu! Estas la tagmezo,” diris la onklino, “kaj la tagmanĝo atendas vin.”

“Bonege,” diris sinjoro Gulden, prenante ŝian brakon. “Nu! Venu, patrino. De kiam vi diris al mi la horon, mi havas bonan apetiton.”

Ili transiris la aleon, brakon en brako, kaj mi skevis ilin tre ĝoja. Kaj kiam ni atingis la pordon, la plej agrabla spektaklo prezentis sin al niaj rigardoj: la granda supujo, pentrita per ruĝaj floroj, fumis sur la tablo; farĉita brusto de bovido plenigis la ĉambron per sia bonaodoro, *kuchlen* (kuketoj) kun kanelo estis stakitaj sur granda plado ĉerande de la malnova kverka bufedo; kaj du boteloj, kun la glasoj scintilantaj kiel kristalo, brilis sur la blanka tablotuko malantaŭ la teleroj. Kiam oni vidas nur tion, spontane venas al oni la penso, ke estas ĝojo por la Sinjoro superŝuti siajn infanojn per sennombraj benoj.

Trinel, kun ŝiaj belaj rozkoloraj vangoj kaj ŝiaj blankaj dentoj, ridis pri nia kontenteco, kaj oni povas diri, ke dum la tuta tagmanĝo nia maltrankvilo pri la estonteco estis forgesita. Oni pensis nur pri la bono kiun oni faras unuj al aliaj, kaj oni ridis, trovante ĉion en tiu ĉi malalta mondo en bona stato.

Estis nur pli malfrue, trinkante kafon, ke speco de malĝojo revenis al ni. Sen scii kial, ĉiuj komencis pripensi la situacion. Oni ne volis paroli pri politiko, kaj fine onklino Gredel subite demandis novaĵojn. Tiam sinjoro Gulden diris, ke la imperiestro deziris pacon, ke li nur metis sin en defendostaton, necesa afero por averti siajn malamikojn, ke ni ne timas ilin. Li diris, ke ĉiaokaze la aliancanoj, malgraŭ siaj malbonaj intencoj, ne kuraĝos veni ĉe nin, tial ke lia bopatro, imperiestro Francisko, sen esti grandanima, tamen ne emas renversi duan fojon sian bofilon, sian propran filinon kaj sian nepon; ke tio estus kontraŭnatura, kaj ke cetere nun la nacio ekstarus amase por defendi la patrion, kiun oni deklarus en danĝero; ke estus

milito ne nur de soldatoj, sed milito de ĉiuj francoj kontraŭ tiuj kiuj volus subpremi ilin. Tio devus pensigi la aliancigitajn suverenojn ktp., ktp.

Li ankoraŭ diris multaj aliajn aferojn, kiujn mi jam ne rememoras. Onklino Gredel aŭskultis sen respondi. Fine ŝi ekstaris, malfermis la ŝrankon kaj prenis el pelvo grizan paperon, kiun ŝi donis al la patro Gulden, dirante al li:

“Legu do tion ĉi. Tiaj paperoj cirkuladas tra la tuta lando. Tiun ĉi donis al mi la pastro Die-mer. Vi vidus, ĉu paco estas certa.”

Sinjoro Gulden ne havis sur si siajn okulvitrojn. Mi do legis la paperon anstataŭ li. Mi gardis ĉiujn tiajn malnovajn paperojn jam de multaj jaroj. Ili fariĝis flavaj, kaj mi ne plu pensas pri ili, ne plu parolas pri ili, sed tamen estas bone relegi ilin. Kion oni povas lerni el ili? La antaŭaj reĝoj kaj imperiestroj kiuj deziris malbonon al ni, mortis, post kiam ili faris al ni ĉiun eblan malbonon. Sed iliaj filoj kaj nepoj ankoraŭ estas ĉi tie, kiuj deziras al ni nemulte da bono. Kion ili diris antaŭe, ili povas ankoraŭ rediri, kaj tiuj kiuj helpis la estintajn, povas ankaŭ helpi la estontajn. Jen kion diris la papero:

“La aliancigitaj potencoj, kiuj subskribis la Traktaton de Parizo, reunuiĝintaj en kongreson en Vieno, informitaj pri la invado de Napoleono Bonaparte kaj lia perforta eniro en Francion, ŝuldas al sia digneco kaj al la graveco de la socia ordo solenan deklaron pri la sentoj kiujn tiu evento inspiras al ili.

“Tiel rompante la konsenton kiu instalas lin sur la insulo Elbo, Bonaparte detruas la solan leĝan titolon al kiu lia ekzisto estas ligita. Reaperinte en Francio kun planoj de tumulto kaj perturbo, li senigis sin mem de la protekto de la leĝoj kaj manifestis al la universo, ke povos esti nek paco nek armistiko kun li.”

La aliancanoj daŭrigis tiel du grandajn paĝojn. Kaj tiuj homoj, kiuj havis nenion komunan kun ni, kiujn niaj aferoj ne koncernis kaj kiuj donis al si la titolon de defendantoj de paco, fine deklaris, ke ili reunuiĝos amase por gardi la Parizan Traktaton kaj reenstali Ludovikon XVIII.

Post kiam mi finis, la onklino, rigardante sinjoron Gulden, demandis lin:

“Kion vi pensas pri tio?”

“Mi pensas,” li diris, “ke tiuj homoj mokas pri la popoloj, kaj ke ili ekstermus la homan specon senhonte kaj senkompate por gardi dek kvin aŭ dudek familiojn en abundo. Mi kredas, ke tiuj homoj rigardas sin kiel diojn, kaj ke ili rigardas nin kiel bestojn.”

“Sendube,” diris onklino Gredel, “kaj mi ne diras la kontraŭon. Sed ĉio tio ne malhelpos, ke Josef estos devigata denove foriri.”

Mi paliĝis komprenante, ke la onklino pravus.

“Jes,” respondis sinjoro Gulden, “Mi scias tion jam kelkajn tagojn, kaj jen kion mi faris. Vi

sendube scias, patrino Gredel, ke oni formas grandajn atelierojn por ripari armilojn. Ekzistas unu tia en la arsenalo de Falsburgo, sed mankas bonaj laboristoj. Komprenoble bonaj laboristoj faras tiom da servoj al la ŝtato, riparante armilojn, kiom tiuj kiuj iras batali. Li havas pli da peno, sed almenaŭ ili ne riskas sian vivon kaj restas hejme. Nu, mi tuj iris ĉe la artilerian komandanton, sinjoron de Montravel, kaj mi petis lin, ke Josef estu akceptita kiel laboristo. La riparado de fusilbaterio estas nenio por bona horloĝisto. Sinjoro de Mont-ravel tuj akceptis. Jen lia ordono,” li diris, mon-trante al ni paperon, kiun li havis en la poŝo.

Tiam mi kredis reveni en la mondon, kaj mi ekkriis:

“Ho, sinjoro Gulden, vi estas pli ol nia patro! Vi savas al mi la vivon!”

Kaj Trinel, kiun jam delonge sufokis maltrankvileco, tuj eliris, dum onklino Gredel, ekstarinte, ĉirkaŭbrakis sinjoron Gulden duan fojon, dirante:

“Jes, vi estas la plej bona, la plej prudenta, la plej grandanima el ĉiuj viroj... Ha! Se ĉiuj jakobenoj similus al vi, la virinoj volus nur jakobenojn...”

“Sed kion mi faris, estas tute simpla,” li diris.

“Ne, ne, ne estas tute simple. Estas via bona koro kiu donas al vi bonajn ideojn.”

Pro miro kaj ĝojo al mi mankis vortoj, kaj dum la onklino parolis, mi eliris en la fruktarbaron spiri freŝan aeron. Trinel estis tie, en angulo de la forno. Ŝi ploris varmegajn larmojn.

“Ha! Nun,” ŝi diris, “mi spiras..., mi revivas.”

Mi ĉirkaŭbrakis ŝin kun ekstraordinara tenereco. Mi vidis, kion ŝi suferis jam de monato. Sed ŝi estis kuraĝa virino, kiu kaŝis al mi siajn zorgojn. Ŝi bone sciis, ke mi mem havas sufiĉe da ili. Ni restis tie pli ol dek minutojn por forviŝi niajn larmojn. Tiam, post kiam ni reeniris, sinjoro Gulden diris al ni:

“Nu, Josef, estas por morgaŭ. Vi foriros tre frue. La laboro ne mankos al vi.”

Kia feliĉo pensi, ke mi ne devos foriri! Ha! Mi havis ankoraŭ aliajn kaŭzojn por voli resti. Trinel kaj mi, ni esperis je io!... Dio mia!... Tiuj kiuj ne spertis tion, neniam scios, kion homoj povas suferi, nek kian pezon bona novaĵo forprenas de onia koro.

Ni restis ankoraŭ ĉirkaŭ unu horo en Quatre-Vents. Kaj tiam, en la momento kiam la homoj revenis de la vesproj, ĉe la noktiĝo, ni reformis al la urbo. Onklino Gredel akompanis nin ĝis la ĉevala posteno, kaj je la sepa ni resupreniris nian ŝtuparon.

Tiel la paco inter onklino Gredel kaj sinjoro Gulden reestabliĝis. Ekde tiam ŝi venis viziti nin tiel ofte kiel antaŭe. Ĉiutage mi iris al la arsenalo kaj mi laboris pri la riparado de la baterioj. Kiam sonoris la tagmezo, mi iris hejmen tagmanĝi. Je

la unua mi reformis ĝis la sepa. Mi estis samtempe soldato kaj laboristo, liberigita de apeloj, sed superŝutita de laboro. Ni esperis, ke mi restos en tiu pozicio ĝis la fino de la milito, se ĝi malfeliĉe komenciĝus, ĉar oni estis certa pri nenio.

XIV

Ni denove havis iom da fido de kiam mi laboris en la arsenalo. Sed ni tamen estis ankoraŭ maltrankvilaj, ĉar centoj da eksaj soldatoj, reengaĝitaj por nova militiro, kaj konskriptoj pasadis, sakon sur la dorso, en siaj vilaĝaj vestaĝoj preter nian domon. Ĉiuj ili kriadis: *Vivu la Imperiestro!* kaj aperis furiozaj. En la granda salono de la urbodomo unuj ricevis po kapoton, aliaj po ĉakon, aliaj epo-letojn, gamaŝojn, ŝuojn jekoste de la departamento. Tiel ili reformis por aliĝi al la armeo, kaj mi deziris al ili bonan vojaĝon.

Ĉiuj tajloroj de la urbo faris uniformojn, la ĝendarmoj cedis siajn ĉevalojn por restarigi la kavalerion, kaj la sinjoro urbestro, barono Parmentier, stimulis la junulojn de dek ses kaj dek sep jaroj engaĝi sin en la partizanarmeon de kolonelo Brice, kiu devis defendi la mallarĝajn pasejojn apud la riveroj Zorn, Zinselle kaj Sarre. Sinjoro la barono estis forironta al la *Maja Kampo*. Tio duobligis sian entuziasmon.

“Ek! Kuraĝon!” li kriis al ili, parolante pri la romianoj, kiuj volonte batalis por sia patrio.

Aŭskultante lin, mi pensis:

“Ĉar vi trovas tion tiel bela, kial vi mem ne iras tien?”

Oni povas imagi la kuraĝon kun kiu mi laboris en la arsenalo. Nenio estas troa por mi. Mi estus pasiginta la tagojn kaj noktojn riparante fusilojn, reĝustigante bajonetojn, fiks-turnante ŝraŭbojn. Kiam komandanto de Montravel venis viziti nin, li admiris min:

“Bone,” li diris, “estas tre bone! Mi estas kontenta pri vi, Seitz!”

Tiuj paroloj plenigis min per kontenteco, kaj mi ripetis ilin al Trinel por kuraĝigi ŝin. Ni estis preskaŭ certaj, ke sinjoro de Montravel gardos min en Falsburgo.

La gazetoj parolis nur pri la nova Konstitucio, kiun oni nomis la Akcesora Akto, kaj pri la *Maja Kampo*. Sinjoro Gulden ĉiam trovis ion obĵetendan, jen pri unu artikolo, jen pri alia. Sed mi ne plu enmiksiĝis en siajn aferojn. Mi eĉ pentis, ke mi kriis kontraŭ la procesioj kaj pentofaroj. Politiko naŭzis min.

Tiu daŭris ĝis la 23-a de majo. En tiu tago mi troviĝis en la granda salono de la arsenalo plenigante kestojn per fusiloj. Ambaŭ aloj de la pordego estis malfermitaj. Soldatoj de la

armetrajno kun ĝiaj vagonoj, atendis antaŭ la kugloparko por ŝarĝi la kestojn. Mi najlis la lastan, kiam la gardisto, pioniro Robert, tuŝis mian ŝultron, mallaŭte dirante:

“Seitz, komandanto de Montravel deziras paroli al vi. Li estas en la paviljono.”

Kion la komandanto volis diri al mi? Mi sciis nenion pri tio, kaj tuj mi ekhavis timon. Malgraŭ tio mi tuj foriris transirante la grandan korton, sur kiun eliris la hangaro de la afustoj. Mi supreniris la ŝtuparon kaj mallaŭte frapis sur la pordon.

“Eniru!” ordonis la komandanto.

Mi eniris tute tremetante, la ĉapon en la mano. Komandanto de Montravel estis viro granda, maldika, bruna, la kapon iomete klini-tan. Li promenis tien kaj reen inter siaj libroj, mapoj kaj armiloj, pendigitaj sur la muroj.

“Ha! Estas vi, Seitz,” li diris, vidante min. “Mi devas sciigi al vi malbonan novaĵon: la 3-a bataliono, en kiu vi servas, devas foriri al Metz.”

Aŭdante tion teruran novaĵon, mi sentis mian koron turniĝi, kaj mi povis respondi nenion.

La komandanto rigardis min.

“Ne konfuziĝu,” li diris post momento. “Vi estas edziĝinta jam de kelkaj monatoj kaj cetere bona laboristo, tio meritas konsideron. Vi transdonos tiun ĉi leteron al kolonelo Desmichels en la arsenalo de Metz. Estas amiko mia. Li trovos por vi laboron en siaj atelieroj, estu certa pri tio.”

Mi prenis la leteron, kiun li transdonis al mi kaj, dankante lin, mi eliris timigita.

Ĉe ni Zebedeus, sinjoro Gulden kaj Trinel parolis kune en la ateliero. Konsterno legiĝis sur iliaj vizaĝoj. Ili jam sciis ĉion.

“La 3-a bataliono foriros,” mi diris al ili, enirante. “Sed tio ne gravas. La sinjoro komandanto de Montravel donis al mi leteron por la ĉefo de la arsenalo de Metz. Ne maltankviliĝu, mi ne partoprenos en militiro.”

Mi preskaŭ sufokiĝis. Sinjoro Gulden prenis la leteron kaj diris:

“Ĝi estas malfermita, certe por ke ni povu legi ĝin.”

Tiam li legis la leteron, en kiu sinjoro de Montravel rekomendis min al sia amiko, dirante, ke mi estas edziĝinta, bona laboristo, diligenta, necesa al mia familio, kaj ke mi faros verajn servojn al la arsenalo. Oni ne povis skribi nenion pli bonan. Zebedeus ekkriis:

“Nun via afero estas certa!”

“Jes,” diris sinjoro Gulden, jen vi retenata en la arsenalo de Metz.”

Kaj Trinel venis ĉirkaŭbraki min, tute pala, dirante:

“Kia bonŝanco, Josef!”

Ĉiuj ŝajnis kredi, ke mi restos en la arsenalo de Metz, kaj ankaŭ mi provis kaŝi al ili mian konsternon. Sed tio sufokis min, kaj mi

preskaŭ ne povis malhelpi min eksingulti. Feliĉe venis al mi la ideo anonci la novaĵon al onklino Gredel.

“Aŭskultu,” mi diris al ili, “kvankam ne estos por longa tempo kaj mi devos restadi en Metz, mi tamen devas anonci tiun bonan novaĵon al onklino Gredel. Mi revenos ĉi-vespere inter la kvina kaj la sesa. Trinel havos la tempon pretigi mian sakon, kaj ni vespermanĝos kune.”

“Jes, Josef,” diris sinjoro Gulden.

Trinel diris nenion, ĉar ŝi povis apenaŭ reteni siajn larmojn. Mi foriris kiel frenezulo. Zebedeus, kiu reiris al sia kazino, avertis min ĉe la pordo, ke la ofiro de la vestado troviĝas en la urbodomo, kaj ke mi devos esti tie je la kvina. Mi aŭskultis siajn vortojn kiel en sonĝo, kaj mi rapidis el la urbo. Sur la talusoj mi ekkuris sen rigardi, kien mi metis la piedojn. Mi preterkuris la fontanon de Trois-Châteaux kaj la suprajn barakojn, preter la arbaron, por iri al Quatre-Vents. La pensoj kiuj trairis mian menson estas nepriskribeblaj. Mi estis konsternita, kaj mi volus kuri ĝis en Svislando. Sed kiam mi proksimiĝis al Quatre-Vents tra la pado de Dann – povis esti la tria –, onklino Gredel, kiu estis metanta lignajn stangojn ĉe siajn fazeo-lojn malantaŭe en sia ĝardeno, ekvidis min de fore kaj diris al si mem:

“Sed tio estas Josef. Kion li faras meze de la greno?”

Enirinte la kavan vojon plenan je radsulkoj kaj sablo, kiun la suno varmigis kiel forno, mi malrapide resupreniris kun klinita kapo, pensante: “Vi neniam aŭdacos eniri!” kiam subite de malantaŭ la heĝo la onklino kriis al mi:

“Ĉu estas vi, Josef?”

Mi ekremitis.

“Jes..., estas mi,” mi respondis.

Ŝi eliris la malgrandan aleon de sambukoj, kaj vidante min tute pala:

“Mi scias, kial vi venas, mia infano,” ŝi diris al mi, “vi foriros, ĉu ne?”

“Ho!” mi diris. “Mi estas retenita por la arsenalo de Metz... La aliaj foriros... Mi restos en Metz... Estas feliĉo.”

Ŝi diris nenion. Ni eniris la kuirejon, kiu estas freŝa, ĉar ekstere estis varmege. Ŝi sidiĝis kaj diris:

“Jes, estas feliĉo!”

Kaj ni restis sidantaj, rigardante unu la alian sen paroli. Tiam ŝi prenis mian kapon inter siaj manoj kaj kisis min, kaj mi vidis, ke ŝi ploris varmajn larmojn sen eligi suspiron.

“Vi ploras...” mi diris al ŝi. “sed ĉar mi restados en Metz!...”

Ŝi ne respondis kaj malsupreniris en la kelon preni botelon da vino. Ŝi igis min trinki glason da vino kaj demandis:

“Kion diras Trinel?”

“Ŝi estas kontenta vidi, ke mi restos en la arsenalo,” mi diris, “kaj sinjoro Gulden ankaŭ.”

“Estas bone,” ŝi diris. “Ĉu oni preparas ĉion kion vi bezonas?”

“Jes, onklino Gredel, “kaj mi devas esti antaŭ la kvina en la urbodomo por ricevi mian uniformon.”

“Nu, iru!” ŝi diris. “Kisu min... Mi ne iros tien... Mi ne volas vidi foriri la batalionon... Mi restos.... Mi volas longe vivi... Trinel bezonas, ke mi vivu...”

Ŝi komencis kribi, sed subite ŝi retenis sin, dirante:

“Je kioma horo vi foriros?”

“Morgaŭ je la sepa, patrino Gredel.”

“Nu, mi venos je la oka... Tiam vi jam estos malproksime... Sed vi scios, ke la patrino de via edzino estas tie... ke ŝi reprenos sian filinon... ke ŝi amas vin... ke ŝi havas nur vin en la mondo!...”

Tiel parolante, tiu kuraĝa virino eksingultis. Ŝi kondukis min eksteren sur la vojon, kaj mi foriris. Mi havis plu nenian guton da sango en miaj vejnoj. Mi alvenis antaŭ la urbodomo, kiam sonoritis la kvina. Mi supreniris kaj revidis tiun salonon, kie mi malgajnis, tiun malbenitan salonon, kie ĉiuj tiris malbonajn numerojn. Mi ricevis kapoton, jakon, pantalonon, gamaŝojn kaj ŝuojn. Zebedeus, kiu atendis min tie, diris al unu el siaj fusilistoj porti ĉion al la ĉambrego.

“Vi venos frue surmeti ĉion ĉi. Via fusilo kaj via kartoĉujo jam estas sur la fusilkrado ekde hodiaŭ matene.”

“Venu kun mi,” mi diris.

“Ne,” li respondis, “vidi Trinel ŝiros mian koron, kaj cetere mi devas resti kun mia patro. Kiu scias, ĉu mi revidos la povran maljunulon post unu jaro? Mi promesis vespermanĝi ĉe vi, sed mi ne faros tion.”

Mi devis do reiri hejmen sola. Mia sako estis preta, mia malnova sako, la sola afero kiun mi savis el Hanau, la kapon apogita sur ĝin sur la vagono. Sinjoro Gulden laboris. Li turnis sin sen diri ion.

“Kie do estas Trinel?” mi demandis lin.

“Ŝi estas supre.”

Mi pensis, ke ŝi ploras. Mi volis supreniri, sed miaj kruroj kaj mia kuraĝo estis sen forto. Mi diris al sinjoro Gulden, kiel la aferoj okazis en Quatre-Vents. Post tio ni silentis, revante sen kuraĝi rigardi unu la alian. Noktiĝis. Jam estis malhele, kiam Trinel malsupreniris. Ŝi kovris la tablon en la mallumo, tiam mi prenis sian manon kaj sidigis ŝin sur miajn genuojn. Ni restis tiel sidantaj dum ĉirkaŭ duonhoro.

“Zebedeus ne venos?” demandis sinjoro Gulden.

“Ne, la servo retenas lin.”

“Nu! Ni vespermanĝu!” li diris.

Sed neniu malsatis. Trinel malkovris la tablon je la naŭa, kaj oni enlitiĝis. Estis la plej terura nokto kiun mi pasigis en mia vivo. Trinel estis kvazaŭ mortinta. Mi vokis ŝin, sed ŝi ne respondis. Je meznokto mi iris averti sinjoron Gulden. Li vestis sin kaj suprenvenis. Ni trinkigis al ŝi sukeritan akvon. Ŝi rekonsciĝis kaj ellitiĝis. Mi ne povas diri al vi ĉion. Mi scias nur, ke ŝi sidigis flanke de mi, ĉirkaŭbrakis min kaj petis min, ne forlasi ŝin, kvazaŭ mi estus farinta tion intence. Sed ŝi frenezis. Sinjoro Gulden volis venigi kuraciston, sed mi pre-ventis tion. Ŝi tute retranskiviligis je la tagiĝo, ŝi longe ploris kaj fine endormiĝis inter miaj brakoj. Ni remetis ŝin sur la liton. Kiam venis la momento foriri, mi ne kuraĝis nur kisi ŝin, kaj sinjoro Gulden kaj mi eliris mallaŭte. En tiaj cirkonstancoj oni vidas la mizerojn de la vivo, kaj oni pensas: “Dio mia, kial do vi metis min en la mondon? Kial vi ne lasis min dormi la tutan eternecon? Kion do mi faris antaŭ ol naskiĝi por meriti vidi suferi sen kulpo mia-flanke tiujn kiujn mi amas?” Sed ne estas Dio kiu faras tiajn aferojn: estas la homoj kiuj suferigas unuj la aliajn kaj disŝiras onian koron!

Sinjoro Gulden kaj mi do malsupreniris kaj sidigis en la ateliero. Tiam li diris al mi:

“Ŝi dormas... Ŝi scias nenion... Estas feliĉo. Vi foriras dum ŝia dormo.”

Mi benis la Sinjoron pro tio, ke ŝi endormiĝis.

Ni revis, aŭskultante la plej malgrandajn bruojn, kiam fine oni ektamburis la apelon. Ni ekstaris. Sinjoro Gulden prenis la sakon kaj silentante bukis ĝin sur miaj ŝultroj. Tiam li serioze rigardis min.

“Josef,” li diris, “faru viziton al la komandanto de la arsenalo en Metz, sed esperu nenion. La danĝero estas tiel grava, ke Francio bezonas ĉiujn siajn infanojn por defendi ĝin. Kaj nun jam ne temas pri tio, forpreni la posedaĵojn de iu alia, sed savi nian propran landon. Memoru, ke vi mem, via edzino, ĉio plej kara kion vi posedas sur la tero estas la vetmono. Mi volus havi dudek jarojn malpli por akompani vin kaj doni al vi ekzemplon.”

Ni malsupreniris sen fari bruon, ĉirkaŭbrakis unu la alian kaj mi iris al la kazerno. Zebedeus mem kondukis min al la ĉambrego, kie mi surmetis mian uniformon. Mi ankoraŭ memoras post tiom da jaroj, ke la patro de Zebedeus, kiu estis tie, faris paketon el miaj vestaĵoj, dirante, ke li iros ĉe patron Gulden post nia foriro. Post tio la bataliono ekdefilis tra la straton Lanche sub la Franca Pordego.

Kelkaj infanoj sekvis nin. La soldatoj de la ĉefgvardio ĉe la avanceo prezentis la armilojn. Ni estis survoje al Waterloo.

XV

En Sarrebourg ni ricevis loĝejbiletojn. La mia estis por la maljuna presisto Jareisse, kiu konis patron Gulden kaj onklinon Gredel. Li invitis min vespermanĝi ĉe sia tablo kun mia nova litkamarado, Jean Buche, filo de iu splitisto de Hardberg, kiu nur manĝis terpomojn antaŭ ol esti konskripciita. Li krakigis ankaŭ la ostojn de la viando, kiun oni servis al ni. Mi estis tiel melankolia, ke aŭdi lin krakigi tiujn ostojn, ekscitis miajn nervojn.

Patro Jareisse volis konsoli min, sed ĉio kion li diris, ankoraŭ kreskigis mian ĉagrenon.

Li pasigis la reston de tiu tago kaj la sekvantan nokton en Sarrebourg. La morgaŭ-on ni marŝis al la villaĝo Mézières, la post-morgaŭon ĝis Vic kaj post tio al Solgne; Fine, la kvinan tagon ni proksimiĝis al Metz.

Mi ne bezonas rakonti al vi nian marŝadon: la soldatoj, tute blankaj pro polvo, kiuj iras de etapo al etapo, la sakon sur la dorso, la armilon laŭplaĉe, babilas, ridas kaj trairas la vilaĝojn rigardante la knabinojn, la ĉarojn, la sterkejojn, la hangarojn, la suprenirojn kaj malsuprenirojn, maltrankviliĝante pri nenio. Kaj kiam oni estas malgaja, kiam oni lasas hejme sian edzinon, malnovajn amikojn, homojn kiuj amas vin kaj kiun oni eble neniam revidos, ĉio defilas antaŭ viaj okuloj kiel ombroj. Cent paŝoj pli foren, oni jam ne pensas pri ĉio ĉi.

Tamen la vido de Metz kun sia alta kate-dralo, siaj malnovaj domoj kaj siaj sombraj remparoj revekis min. Du horojn antaŭ la alveno ni kredis povi marŝi sur ombriĉaj vojoj. Estis varmege, kaj oni plirapidigis la paŝojn por troviĝi en la ombro kiel eble plej baldaŭ. La memoro pri kolonelo Desmichels revenis al mi. Mi havis malgrandan esperon, tre malgrandan, kaj mi ekkriis en mi mem: "Ha! Se la sorto volus!" Mi palpis mian leteron. Zebedeus ne plu parolis al mi. De tempo al tempo li turnis sin por ĵeti rigardon al mi. La situacio jam ne estis kiel antaŭe. Li estis serĝento, kaj mi simpla soldato. Kion vi volas? Sed nin ĉiam amis nin kiel fratoj, kaj tio tamen faris grandan diferencon.

Jean Buche marŝis je mia flanko, la dorson ronda kaj la piedojn turnitaj internen kiel la lupoj. La sola afero, kiun li diris al mi, estis, ke la ŝuoj ĝenas lin dum la marŝado, kaj ke oni devus surmeti ilin nur por parado. Dum du monatoj la serĝento-instruisto ne sukcesis igi lin turni la piedojn eksteren, nek rektigi liajn ŝultrojn. Sed li marŝis tre bone laŭ sia maniero kaj sen lacigi sin.

Fine, je la kvina posttagmeze ni alvenis ĉe la avanceo. Oni venis rekonu nin. La kapitano de la gardo mem kriis al ni:

"Eniru, kiel plaĉos al vi!"

La tamburistoj komencis bati, kaj ni eniris la urbon, la plej malnovan kiun mi iam vidis. En Metz renkontiĝas la riveroj Seille kaj Moselle, kaj tie oni vidas kvar- kaj kvinetaĝajn domojn kun malstukiĝintaj muroj plenaj je traboj kiel en Saverne kaj Bouxviller. Iliaj fenestroj estas rondaj kaj kvadrataj, grandaj kaj malgrandaj sur la sama linio, kun kaj sen kovriloj, kun kaj sen vitroj. Metz estis tiel malnova kiel la montoj kaj riveroj, kaj supre la tegmentoj elstaris ses futojn, plilongigante tiel sian ombron sur la nigra akvo, sur kiu floris malnovaj ŝuoj, vesta-ĵoj kaj dronintaj hundoj.

Kiam oni hazarde rigardis supren al la mansardaj fenestroj, oni estis preskaŭ certa vidi maljunan judon kun lia griza barbo kaj lia granda aglonazo, aŭ infanon, kiu minacis fali, aŭ ion similan, ĉar Metz verdire estas urbo de judoj kaj soldatoj. Malriĉuloj tie ankaŭ ne mankis. Estas pli malbone ol en Mainz, Stras-burgo kaj eĉ Frankfurto, almenaŭ se oni ne ŝanĝis ĉion tie intertempe, ĉar la nunaj homoj ŝatas komforto, kaj la urboj plibeliĝas de tago al tago.

Ni do trairis tiun spektaklon, kaj malgraŭ mia granda malĝojo, mi ne povis malhelpi min rigardi tiujn stratetojn. En la urbo tiam svarmis naciaj gardistoj. Ili alvenis de Longwy, Sarre-Louis kaj aliloke. La soldatoj foriris, la naciaj gardistoj anstataŭis ilin.

Ni alvenis sur iu placo plenplena je matracoj, pajlomatracoj kaj aliaj litaĵoj, kiujn la civiluloj liveris al la trupoj. Oni igis nin meti la armilon ĉepieden antaŭ iu kazino, kies fenestroj estis ĉiuj malfermitaj malsupre kaj supre. Ni atendis pensante, ke ni estos loĝigitaj en tiu kazino, sed post dudek minutoj la soldopago komenciĝis. Ni ricevis po dudek kvin pencoj kun loĝejbileto. Oni rompigis la vicojn, kaj ĉiuj foriris en diversaj direktoj. Jean Buche, kiu neniam vidis alian urbon ol Falsburgon, ne forlasis min.

Niaj loĝejbiletoj estis por Elias Meyer, buĉisto en la strato Saint-Valéry. Kiam ni alvenis antaŭ la domo, tiu buĉisto, kiu estis stranĉanta sian viandon antaŭ sia fenestro en formo de volbo provizita de krado, koleriĝis kaj akceptis nin tre malbone. Li estis dika, tute ruĝa judo kun ronda vizaĝo kaj arĝentaj orelingoj kaj ringoj sur siaj fingroj. Lia edzino, maldika kaj flava, venis malsupren, kriante, ke ili jam gastigis soldatojn la hieraŭon, la antaŭhieraŭon... ke la sekretario de la urbodomo rankoras kontraŭ ili, ke li sendis al ŝi soldatojn ĉiutage, ke la najbaroj havis nenian... kaj tiel plu. Ili tamen lasis nin eniri. Ilia filino venis rigardi nin. Malantaŭ ŝi staris dika, krisphara, tre malpura servistino. Ŝajnas al mi, ke tiuj homoj ankoraŭ ĉiam staras tie, antaŭ mi, en la malnova ĉambro panelita de kverko, kun granda kupra lampo pendante de la plafono kaj kradita fenestro eliranta sur malgrandan korton.

La filino, tre pala kaj kun nigraj okuloj, diris ion al sia patrino, kaj la servistino ricevis la ordonon konduki nin al la almozulĉambro en la subtegmento, ĉar ĉiuj judoj akceptas almozulojn, kiujn ili nutras ĉiuvendrede. Mia kamarado el Harberg trovis tion tre bona, sed mi indigniĝis. Malgraŭ tio ni supreniris malantaŭ la servistino la spiralŝtuparon, sur kiu oni glitis pro la multa kraso, kaj ni alvenis en la subtegmentejo en ĉambro konstruita el latoj, tra kiuj oni vidis la malpuran tolaĵaron destinitan al la lesivo. La taglumo enpenetris tra lukon en la tegmento. Sen mia tristeco, mi estus trovinta tiun lokon abomena. Ni havis nur unu seĝon kaj unu pajlomatracon etenditan sur la tabulplanko kun unu kovrilo por ni ambaŭ. La servistino rigardis nin ankoraŭ, starante ĉe la pordo, kvazaŭ ŝi atendis komplimentojn de ni.

Mi sidiĝis kaj demetis mian sakon, tre malĝoja, kiel oni povis supozi. Buche faris la samon. La servistino komencis malsupreniri, kiam mi kriis al ŝi:

“Atendu minuton, ni ankaŭ malsupreniros. Ni ne volas rompi al ni la kolon sur la ŝtuparo.”

Ŝanĝinte niajn ŝtrumpojn kaj ŝuojn, ni refermis la pordon per pendseruro, kaj malsupreniris al la buĉejo aĉeti viandon. Jean iris aĉeti panon ĉe la kontraŭflanka bakisto, kaj ĉar ni havis la rajton uzi la fajron, ni iris en la kuirejon fari supon.

Post kiam ni finis manĝi je la oka, la buĉisto venis saluti nin. Li fumis grandan pipon de Ulm. Li demandis, el kiu lando ni venas. Mi ne respondis lin, ĉar mi tro indignis, sed Jean respondis al li, ke mi estas horloĝisto el Falsburgo, post kio tiu viro bone rigardis min. Li diris, ke lia frato vojaĝis tra Alsaco kaj Loreno vendante horloĝojn, ringojn, horloĝo-ĉenojn kaj aliajn oraĵistajn kaj juvelistajn objektojn; ke li nomiĝas Samuel Meyer, kaj ke eble ni jam negocis unu kun la alia. Mi tiam respondis, ke mi vidis sian fraton du- aŭ trifoje ĉe sinjoro Gulden, kio estis vera. Post tio li ordonis al la servistino suprenigi orelkusenon por ni, sed li ne faris pli por ni, kaj je la deka ni enlitiĝis. La granda laceco endormigis nin tre rapide. Mi volis ellitiĝi tre frue kaj iri al la arsenalo. Sed mi ankoraŭ dormis, kiam mia kamarado skuis min, dirante:

“La rekolektiĝo!”

Mi aŭskultis: estis la rekolektiĝo. Ni havis nur la tempon vesti nin, buki nian sakon, preni nian fusilon kaj malsupreniri. Kiam ni alvenis sur la placo de la kazerno, la apelo komenciĝis. Post la apelo du furgonoj proksimiĝis, kaj ni ricevis po kvindek kartoĉoj. Komandanto Gémeau, la kapitano kaj ĉiuj oficiroj estis tie. Mi vidis, ke ĉio estas finita, ke mi ne plu devas kalkuli je nenio, kaj ke mia letero por kolonelo Desmichels estos nur bona post la militiro, se mi eskapas el ĝi

viva, kaj ke mi devos fini miajn sep jarojn. Zebedeus rigardis min de fore, kaj mi deturnis la kapon. Sammomente oni kriis:

“Portu armilon! Armilon laŭplaĉe! Kolonkapo maldekstren, antaŭen, marŝ!”

La tamburistoj batis, ni ekmarŝis, la tegmentoj, la domoj, la fenestroj, la stratetoj kaj la homoj defilis flanke de ni. Ni transiris la unuan ponton, tiam la levponton. La tamburistoj ĉesis bati, kaj ni iris en la direkto de Thionville. Aliaj trupoj, kavaleriaj kaj infanteriaj, sekvis la saman vojon.

Vespere ni alvenis en la vilaĝo Beauregard, la morgaŭon en la vespero la vilaĝo Vitry, apud Thionville, kie mi estis kvartirigita kun Buche ĉe grandbienulo, kiu nomiĝis sinjoro Pochon, honesta viro, kiu trinkigis al ni blankan vinon, kaj kiu ŝatis paroli pri politiko tute kiel sinjoro Gulden.

Dum nia restado en tiu vilaĝo generalo Schoefer alvenis el Thionville, kaj oni igis nin preni la armilojn por esti revuitaj apud granda farmbieno, kiun oni nomis la farmbieno Silvange.

Tiu regiono estis plena je arbaroj. Ni iris en grupo promenadi en la ĉirkaŭaĵo. Lutage Zebedeus venis al mi kaj kondukis min al la granda fandejo de Moyeuve, kie ni vidis gisi kanonkuglojn kaj obusojn. Ni parolis pri Trinel kaj sinjoro Gulden. Li konsilis al mi skribi al ili, sed mi iel timis ricevi novaĵojn. Mi deturnis mian menson de Falsburgo.

La 8-an de junio frumatene la bataliono ekiris de la vilaĝo kaj repasis apud Metz, sed sen eniri. La urbaj pordegoj restis fermitaj kaj la kanonoj sur la remparoj, kiel en milita tempo. Ni iris dormi en Chatel, la morgaŭon en Etain, la postmorgaŭon en Dannevoux, kie mi loĝis ĉe bona patrioto, kiu nomiĝis sinjoro Sébastien Perrin. Li estis riĉa viro, kiu volis scii ĉion detale, kaj ĉar antaŭ ni granda nombro da batalionoj sekvis la saman vojon, li diris:

“Post monato aŭ eble pli frue ni ekscios grandajn aferojn... Ĉiuj trupoj marŝas al Belgio... La imperiestro estas falonta sur la anglojn kaj prusojn!”

Tio estis nia lasta etapo, ĉar la morgaŭon ni alvenis en Yong, kiu estas malbona regiono. La 12-an de junio ni dormis en Vivier, la 13-an en Cul-de-Sard. Ju pli ni antaŭeniris, des pli da trupoj ni renkontis, kaj ĉar mi jam vidis tion en Germanio, mi diris al mia kamarado, Jean Buche:

“Nun estas varmiĝonte!”

De ĉiuj flankoj, en ĉiuj direktoj kavalerio, infanterio kaj artilerio avancis en kolonoj, kovrante la vojojn tiel for, kiel oni povis vidi. Pli belan veteron kaj pli belajn rikoltojn oni neniam vidis, sed estis tro varmege. Min miris, ke mi

malkovris nenian malamikon, nek antaŭe, nek malantaŭe, nek dekstre, nek maldekstre. Ni sciis nenion. La famo cirkulis inter ni, ke ĉi-foje ni estis falontaj sur la anglojn. Antaŭe mi jam vidis prusojn, aŭstrojn, rusojn, bavarojn, virtemberganojn, svedojn. Mi konis preskaŭ ĉiujn popolojn de la tero, kaj nun ni estis konati-ĝontaj kun la angloj. Mi pensis: “Ĉar necesas ekstermi nin reciproke, mi same tiom ŝatas, ke estu tiuj ĉi anstataŭ la germanoj.” Ni ne povas eviti nian sorton. Se mi devos transvivi tion ĉi, mi transvivos. Se mi devos perdi la vivon, ĉu mi faros ion por savi ĝin aŭ nenion, tio estos la samo. Sed necesos ekstermi la kiel eble plej grandan nombron de la aliaj. Tiel ni grandigos la ŝancojn por ni mem.”

Jen la rezonoj kiujn mi faris, kaj se ili ne faris al mi bonon, ili ankaŭ ne kaŭzis al mi malbonon.

XVI

La 12-an ni transiris Mozon, la 13-an kaj la 14-an ni daŭrigis nian marŝadon sur malbonaj vojoj borderitaj de kampoj kun sekalo, hordeo, aveno, kanabo, kiuj ne finis. La varmege estis eksterordinara. Ŝvito fluis sub la sakon kaj la kartoĉujon ĝis la lumboj. Kia malfeliĉo esti malriĉa kaj ne povi pagi viron kiu marŝas kaj ricevas fusilpafojn anstataŭ ni! Elteninte pluvon, venton, neĝon kaj koton en Germanio, la vico estis nun al polvo kaj la brulanta suno.

Mi ankaŭ vidis, ke la ekstermo proksimiĝis. Ni aŭdis nenion alian ol la batadon de la tamburoj kaj sonadon de la trumpetoj. Kiam la bataliono pasis sur altaĵo, vicoj da kaskoj, lancoj kaj bajonetoj videbliĝis tiel for, kiel oni povis vidi. Zebedeus, la fusilon sur la ŝultro, kelkafoje gaje kriis al mi:

“Nu, Josef, ĉu ni do estas rigardontaj alian fojon en la blankon de okuloj de la prusoj?”

Kaj mi estis devigata respondi:

“Jes, la festeno estas komenciĝonta!”

Kvazaŭ mi estis kontenta riski mian vivon kaj fari Trinel vidvino antaŭ sia tempo pro aferoj kiuj ne rigardis min.

Tiun saman tagon je la sepa ni alvenis en Rôly. Husaroj jam okupaciis tiun vilaĝon, kaj oni igis nin bivaki en kava vojo laŭlonge de taluso.

Niaj fusiloj apenaŭ troviĝis en faskoj, alvenis pluraj superaj oficiroj. Komandanto Gémeau, kiu jam elseliĝis, reenseliĝis kaj galopis renkonte al ili. Ili mallonge interparolis kaj malsupreniris al nia vojo, kie ĉiuj rigardis sin, dirante:

“Io estas okazanta.”

Unu el la plej superaj oficiroj, generalo Pécheux, kiun ni konis ekde tiam, ordonis rultamburi kaj kriis al ni:

“Formu cirklon!”

Sed ĉar la kava vojo estis tro mallarĝa, la soldatoj supreniris la du talusojn. Aliaj restis malsupre. La tuta bataliono rigardis la generalon, kiu ekmalvolvis paperon, kriante al ni:

“Proklamo de la imperiestro!”

Post kiam li diris tiujn vortojn, la silento fariĝis tiel profunda, ke oni kredus esti sola meze de la kampoj. Ĉiuj, ekde la lasta rekruito ĝis komandanto Gémeau, atente aŭskultis. Kaj eĉ hodiaŭ, kiam mi pensas pri tio post kvindek jaroj, tio tuŝas mian koron: estis io grandioza kaj terura. Jen kion legis la generalo:

“Soldatoj! Hodiaŭ estas la datreveno de la bataloj apud Marengo kaj Friedland, kiuj decidis pri la sorto de Eŭropo. Tiam, tute kiel post Austerlitz kaj Wagram, ni estis tro grand-animaj: ni kredis je la deklaroj kaj ĵuroj de la princoj, kiujn ni lasis sur la tronoj. Hodiaŭ tamen, aliancitaj, ili volas detrui la sendepen-decon kaj la plej sanktajn rajtojn de Francio. Ili komencis la plej maljustan inter la agresoj. Ni marŝu renkonte al ili: ili kaj ni, ĉu ni jam ne estas la samaj homoj?”

La tuta bataliono tremetis kaj ekkriis: Vivu la Imperiestro! La generalo levis la manon, kaj ĉiuj eksilentis kaj pli profunde kliniĝis por povi pli bone aŭskulti.

“Soldatoj! Apud Jena, kontraŭ tiuj samaj prusoj, hodiaŭ tiel arogaj, ni estis unu kontraŭ tri, kaj apud Montmirail unu kontraŭ ses. Tiuj el vi kiuj estis kaptitaj de la angloj, rakontu al vi pri iliaj boatoj kaj la teruregaj malbonaĵoj, kiujn ili suferis tie.

“La saksoj, belgoj⁶⁶, hanoveranoj kaj soldatoj de la Rejnkonfederacio ĝemas pro tio, ke ili estas devigataj prunti sian brakon por la afero de princoj malamikaj al justeco kaj la rajtoj de ĉiuj popoloj. Ili scias, ke tiu alianco estas nesatigebla: vorinte dekdu milionojn da poloj, dekdu milionojn da italoj, unu milionon da saksoj, ses milionoj da belgoj, ĝi estas voronta la malgrandajn ŝtatojn de Germanio.

“Kiaj malprudentuloj! Momento de sukceso blindigis ilin. Ili neniam povos subpremi kaj *homiligi la francan popolon*. Se ili eniros Francion, ili tie trovos sian tombon.

“Soldatoj, ni devas fari devigajn marŝojn, batali, elmeti nin al danĝeroj. Sed per persisto la venko estos nia. La Homaj Rajtoj kaj la feliĉeco de la patrio estos rekonkeritaj. Por ĉiu

⁶⁶ Tiutempe Belgio estis parto de la nova reĝlando Nederlando sub reĝo Vilhelmo I de Oranĝo (Traktato de Vieno 1814). Temas pri armeo sendita de la

reĝo kaj kondukata de la kronprinco, kiu estis mortigita en la batalo. Honore al li oni starigis la faman leonon de Waterloo.

*franco, kiu havas koron, la momento venis venki
aŭ pere.*

NAPOLEONO.”

Oni neniam povos imagi la kriojn kiuj tiam leviĝis. Estis spektaklo, kiu grandigis al vi la animon. Oni estus dirinta, ke la imperiestro enspiris al ni sian spiriton de la bataloj, kaj ni deziris nenion alian ol masakri ĉion.

La generalo jam estis delonge foririnta, kiam la krioj ankoraŭ ĉiam resonis, kaj mi estis kontenta, ĉar mi vidis, ke ĉio tio estas vera: ke la prusoj, aŭstroj kaj rusoj, kiuj tiutempe parolis nur pri liberigo de la popoloj, profitis de la unua okazo por kapti ĉion; ke ĉiuj tiuj grandaj vortoj pri libereco, kiujn ili uzis en 1813 por eksciti la junulojn kontraŭ ni, ĉiuj promesoj pri Konstitucioj, kiujn ili faris, ili metis flanken. Mi rigardis ilin kiel friponojn, kiel homojn kiuj ne plenumis siajn promesojn, kiuj mokis pri la popoloj, kaj kiuj havis tre malgrandan, mizeran ideon: nome ĉiam resti sur la plej bona loko kun siaj infanoj kaj posteuloj bonaj aŭ malbonaj, justaj aŭ maljustaj, sen maltrankviliĝi pri la leĝo de Dio.

Jen kion mi vidis. Tiu proklamo ŝajnis al mi tre bela. Mi eĉ pensis, ke patro Gulden estus tre kontenta, ĉar la imperiestro ne forgesis la Homajn Rajtojn, kiuj estas libereco, egaleco, justeco kaj ĉiuj grandaj ideoj kiuj faras, ke la homoj, anstataŭ agi kiel bestoj, respektu sin mem kaj respektu ankaŭ la Homajn Rajtojn.

Nia kuraĝo estis do multe pliigita de tiuj fortaj kaj justaj vortoj. La veteranoj diris riante:

“Tiufoje ni ne malvigliĝos... Ĉe la unua marŝo ni falos sur la prusojn!”

Kaj la rekrutoj, kiuj ankoraŭ ne aŭdis kanonkuglojn zumadi, ĝojis ankoraŭ pli ol la aliaj. La okuloj de Buche brilis kiel tiuj de kato. Li sidiĝis sur la randon de la vojo, sian sakon malfermita sur la taluso kaj malrapide kontrolis la akrecon de sia sabro, provante ĝian tranĉrandon sur la pinto de sia ŝuo. Aliaj akiris siajn bajonetojn aŭ reĝustigis la ŝtonon de sia fusilo, kion oni ĉiam faras dum militiro la antaŭvesperon de renkonto. Dum tiuj ĉi momentoj mil ideoj pasis tra onia kapo, oni kuntiris la brovojn kaj kunpremis la lipojn, tiel surmetante malbelan vizaĝon.

La suno pli kaj pli sinkis malantaŭ la grenon. Kelkaj taĉmentoj iris serĉi lignon en la vilaĝo, de kiu ili ankaŭ reportis cepojn, poreon, salon kaj eĉ bovinkvaronojn, pendigitajn sur longaj stangoj, kiujn ilin portis sur siaj ŝultroj.

Ĉirkaŭ la fajroj, kiam la marmitoj komencis boli kaj la fumo turniĝadis al la ĉielo, oni devus estus esti vidinta la gajajn vizaĝojn kiujn ni havis. Unu parolis pri Lutzen, alia pri Austerlitz, ankaŭ-raŭ alia pri Wagram, Jena, Friedland, Hispanio,

Portugalio, pri ĉiuj landoj en la mondo. Ĉiuj parolis samtempe, sed oni aŭskultis nur la veteranojn, kiuj havis la brakon kovrita per galonoj, kiuj parolis pli bone kaj montris per fingro la poziciojn sur la grundo, eksplikante la moviĝojn de la dekstra kaj maldekstra aloj, kiuj eniris la batalon je tridek aŭ kvardek mil viroj. Oni kredis vidi ĉion, aŭskultante ilin.

Ĉiu havis sian stanan kuleron en la butontruo kaj pensis:

“La buljono estos bongusta... En ĝi estas bona, grasa viando.”

Noktiĝis. Post la disdivido oni ricevis la ordonon estingi la fajrojn kaj ne sonigi la retiriĝon, kio signifis, ke la malamiko troviĝas nefore kaj ke oni timis alarmi lin.

La luno komencis lumi. Buche kaj mi manĝis el la sama gamelo. Kiam ni estis finintaj, li rakontis al mi dum pli ol du horoj sian vivon ĉe sia familio en Harberg, sian grandan mizeron, kiam li devis treni kvin aŭ ses sterojn da ligno sur *schlitte*⁶⁷, riskante esti frakasita, precipe kiam fandiĝis la neĝo. La ekzisto de soldato, la bongusta gamelo, la bona pano, la regula porcio, la varmaj vestaĵoj, la firmaj ĉemizoj en maldelikata tolo, ĉio tio ŝajnis al li admirinda. Neniam li estis imaginta, ke oni povas vivi tiel bone, kaj la sola ideo kiu turmentis lin, estis sciigi al siaj fratoj Gaspard et Jacques sian belan staton por decidigi ilin engaĝiĝi en la armeon tuj kiam ili estis havontaj la necesan aĝon.

“Jes,” mi diris al li, “tio ĉi estas bona, sed la rusoj, angloj, prusoj... vi ne pensas pri ili.”

“Mi mokas pri ili,” li respondis. “Mia sabro tranĉas kiel tranĉilo de ŝuisto, mia bajoneto pikas kiel kudrilo. Estis ili kiuj devas timi renkonti min.”

Ni estis la plej bonaj amikoj en la mondo. Mi amis lin preskaŭ tiom, kiom miajn maljunajn kamaradojn Klipfel, Fürst kaj Zebedeus. Li ankaŭ amis min. Mi pensas, ke li igus sin dishaki por tiri min el embaraso. Maljunaj lit-kamaradoj neniam forgesas sin. En mia juna tempo la maljuna Harwig, kiun mi konis poste en Falsburgo, ankoraŭ ricevis pension de sia maljuna kamarado Bernadotte, reĝo de Svedio. Se mi estus fariĝinta reĝo, mi ankaŭ pagus pension al Jean Buche, ĉar se li ne havis grandan menson, li havis grandan koron, kio estas pli bona.

Dum ni tiel babilis, Zebedeus venis frapi min sur la ŝultron.

“Ĉu vi ne fumas, Josef?” li demandis al mi.

“Mi ne havas tabakon.”

Tuj li donis al mi la duonon de paketo.

Mi vidis, ke li ankoraŭ ĉiam amis min malgraŭ la diferenco de rangoj, kaj tio tenerigis min. Li

⁶⁷ Speco de glitveturilo.

jam ne posedis sian ĝojon, pensante, ke ni estos falontaj sur la prusojn.

“Kia revenĝo!” li ekkriis. “Ĉi-foje nenia kompto por ili... Ĉio devas esti pagita ekde Katzbach ĝis Soissons.”

Oni estus kredinta, ke tiuj prusoj kaj angloj ne defendos sin, kaj ke ni ne riskos ricevi kanonkuglojn kaj mitralon, kiel en Lutzen, Gross-Beren, Leipzig kaj ĉie. Sed kion oni povis diri al homoj kiuj rememoris nenion kaj vidis ĉion bela? Mi trankvile fumis mian pipon kaj respondis:

“Jes, jes. Ni aranĝos tiujn friponojn. Ni renversos ilinli travivos durajn momentojn...”

Mi permesis al Jean Buche plenigi sian pipon. Ĉar ni devis gardostari, Zebedeus, je la naŭa, iris ŝanĝi la gardostarantojn ĉekape de la pikedo. Mi eliris mian cirkolon kaj kuŝiĝis kelkajn paŝojn pli malantaŭen, la oreton sur la sakon ĉerande de sulko. La vetero estis tiel varma, ke oni aŭdis ĉirpi la grilojn ankoraŭ longe post la sunsubiro. Kelkaj steloj briladis en la ĉielo. Neniu venteto blovis sur la ebenaĵo, la spikoj staris rekte kaj senmove, kaj en la malproksimo la horloĝoj de la vilaĝoj sonis la naŭan, la dekan, la dek-unuan. Mi fine endor-miĝis. Tio estis la punkto de la 14-a al la 15-a de junio 1815.

Inter la dua kaj la tria horo matene Zebedeus venis veki min.

“Leviĝu!” li diris. “Estas via vico!”

Li vekis ankaŭ Buche, kiu kuŝis apud mi. Ni ekstaris. Estis nia vico anstataŭi la gardostarantojn. Estis ankoraŭ punkto, sed la tago jam desegnis blankan linion ĉerande de la ĉielo laŭlonge de la greno. Tridek paŝojn pli for nin atendis leŭtenanto Bretonville meze de la pikedo. Estas dure ekstari, kiam oni dormas bone post dek horoj da marŝado. Bukante nian sakon, ni atingis la piketon. Ducent paŝojn pli for, malantaŭ heĝo, mi anstataŭis la gardiston fronte al Roly. La pasvorto estis: “*Jemappes et Fleurus!*” Kiel tamen pasintaj okazaĵoj dormas dum jaroj en nia menso! Tiu pasvorto devis memori al ni la du batalojn, kiujn la Respubliko liveris en Belgio kontraŭ la aŭstroj, kiuj volis detrui ĝin, sed estis venkitaj.

Mi kredas ankoraŭ vidi la piketon reveni al la vojo, dum mi renovigis la prajmon sub la stellumo. Mi aŭdis la aliajn sentinelojn malrapide paŝadi en la malproksimo, dum la paŝoj de la pikedo malproksimiĝadis sur la monteto.

Mi komencis paŝi laŭlonge de la heĝo, la armilon sur la ŝultro. La vilaĝo kun siaj malgrandaj pajlaj tegmentoj kaj sia preĝejturo pli for elstaris super la greno. Surĉevala husaro, gardostaranta meze de la vojo, rigardis ĉirkaŭen, sian muskedon apogita sur la femuron. Estis ĉio, kion oni vidis.

Longe mi atendis tie, pripensante, aŭskultante kaj paŝante. Ĉio dormis. La blanka linio ĉe la horizonto pligrandiĝis.

Tio daŭris pli ol duonhoron. La matena lumo grizigis la landon. Du aŭ tri koturnoj vokis kaj respondis sin de unu flanko de la ebenaĵo ĝis la alia. Mi haltis tute melankolia, ĉar, aŭdante tiujn birdovoĉojn, mi imagis Quatre-Vents, Dann, la barakojn de Bois-de-Chênes, kaj mi pensis: “Tie for, en nia greno, la koturnoj kantas ankaŭ ĉe la rando de la arbaro de Bonne-Fontaine. Ĉu Trinel dormas nun... kaj onklino Gredel, kaj sinjoro Gulden, kaj la tuta urbo?...La naciaj gardistoj de Nancy ansta-taŭis nin.” Kaj mi vidis la gardistojn de la du pulvejoj, la gardostarantojn ĉe la du pordegoj. Mallonge, sennombraj pensoj venis al mi, kiam en la malproksimo, mi aŭdis la galopadon de ĉevalo. Mi rigardis sed komence vidis nenion. Post kelkaj minutoj tiu galopado eniris la vilaĝon. Tiam ĉio eksilentis. Aŭdiĝis nur kon-fuza rumoro. Kion tio signifis? Momenton poste la rajdisto eliris Roly kaj eniris nian vojon plenrapide galopante. Mi antaŭeniris ĝis la rando de la heĝo, la fusilon preta, kriante:

“*Qui vive?*”

“*La France!*”

“Kiu regimento?”

“La dekdua ĉasista... estafeto.”

“Kiam plaĉos al vi.”

Li daŭrigis sian vojon, duobligante sian rapidecon. Mi aŭdis lin halti meze de nia tendaro kaj krii:

“La komandanto!”

Mi antaŭeniris sur la dorso de la monteto por vidi, kio okazas. Preskaŭ tuj fariĝis granda moviĝo: la oficiroj alvenis. La ĉasisto ĉiam surĉevale parolis al komandanto Gémeau. Ankaŭ soldatoj proksimiĝis. Mi aŭskultis, sed estis tro malproksime. La ĉasisto denove forrajdis suprenirante la taluson. Ĉio ŝajnis en revolucio: oni kriadis kaj gestumadis.

Subite la veksignalo ekbatiĝis. La pikedo kiu anstataŭis la postenojn, deturniĝis ĉe la vojkubuto. Zebedeus, kiun mi vidis de fore, ŝajnis al mi tute pala.

“Venu!” li kriis al mi, pasante.

Du sentineloj restis pli for maldekstre. Oni ne parolas portante armilon, sed Zebedeus tamen diris al mi mallaŭte:

“Josef, oni perfidis nin. Bourmont, la generalo de la avangarda divizio, kaj kvin aliaj similaj vojrabistoj transkuris al la malamiko.”

Lia voĉo tremetis. Mia tuta sango ĉesis flui. Rigardante la aliaj pikedanoj, du maljunuloj kun galonoj, mi vidis, ke iliaj grizaj lipharoj tremetis. Ili terure rulis siajn okulojn, kvazaŭ ili serĉus iun por mortigi lin, sed ili diris nenion.

Ni rapidigis niajn paŝojn por anstataŭi la aliajn sentinelojn. Kelkajn minutojn poste, reve-nante

al la bivako, ni jam trovis la batalionon armita, preta ekiri. Kolerio kaj indigno legiĝis sur ĉiuj vizaĝoj. La tamburistoj ekrul-batis. Ni restariĝis en niaj vicoj. La komandanto kaj la kapitano, la adjutanto kaj la majoro, surĉevalo ĉekape de la bataliono, atendis, palaj kiel mortintoj. Mi memoras, ke la komandanto, tirante sian sabron por ĉesigi la rulbatadon, volis diri ion, sed la pensoj ne venis, kaj kiel frenezulo li ekkriis:

“Ha, kanajloj, la mizeraj ŝuanoj⁶⁸! *Vivu la Imperiestro!!* Nenia kompato!”

Li balbutis kaj jam ne sciis, kion li diras. Sed la tuta bataliono trovis, ke li tre bone parolis, kaj oni komencis krei ĉiuj kune kiel lupoj:

“Antaŭen! Antaŭen! Al la malamiko! Nenia kompato!”

Oni trairis la vilaĝon en sturmpaŝo. Oni indignis, ĉar oni ne tuj vidis la prusojn. Nur post unu horo, post kiam ĉiuj faris siajn pripensojn, oni rekomencis blasfemi, krei, komence tre mallaŭte, tiam laŭte, tiel ke fine la tuta bataliono estis kvazaŭ bando da ribeluloj. Unuj diris, ke necesas ekstermi ĉiujn oficirojn de Ludoviko XVIII; la aliaj, ke oni volas liveri nin amase. Kaj kelkaj eĉ kriis, ke la marŝaloj perfidis nin, ke ili devos aperi antaŭ la milita tribunalo por esti pafekzekutitaj, kaj aliajn similajn aferojn.

Tiam la komandanto ordonis nin halti kaj pasis antaŭ ni, kriante “ke la perfidintoj foriris tro malfrue, ke ni atakos la saman tagon, por ke la malamiko ne havos la tempon profiti de la perfido, ke li estos surprizita kaj renversita”.

Tiuj vortoj trankviligis la koleron de granda nombro. Oni rekomencis marŝi, kaj oni ripetis laŭlonge de la tuta vojo, ke la planoj estis liveritaj tro malfrue.

Sed nia kolero ŝanĝiĝis en ĝojon, kiam je la deka ni subite aŭdis kanonon tondri maldekstre de ni je kvin aŭ ses mejloj, trans la rivero Sambro. Tiam la viroj levis siajn ĉakojn sur la pinto de siaj bajonetoj kaj komencis krei:

“Antaŭen! *Vivu la Imperiestro!*”

Multaj maljunuloj ekploris pro emocio. De tiu tuta granda ebenaĵo supreniris unu sola imensa krio. Kiam unu regimento finis, alia rekomencis. La kanono ankoraŭ ĉiam tondris. Oni duobligis la paŝojn, kaj ĉar ni marŝis al Charleroi ekde la sepa, la ordono, alportita de estafeto, venis, ke ni deturniĝu dekstren.

Mi ankaŭ memoras, ke en ĉiuj vilaĝoj tra kiujn ni pasis, la infanoj rigardis nin de post la fenestroj kaj de sur la sojloj de la domoj, ke ili levis la manojn kun ĝoja mieno kaj kriis:

“La francoj! La francoj!”

Oni vidis, ke tiuj homoj amas nin, ke ili havas la saman sangon kiel ni. Kaj eĉ, dum la du haltoj

kiujn ni faris, ili venis kun sia bona pano, blankferan tranĉilon puŝita en la kruston, kaj siaj grandaj kruĉoj da nigra biero, kiujn ili etendis al ni sen demandi ion ajn. Ni iel estis alvenintaj por liberigi ilin sen scii tion. Neniu en ilia regiono sciis ion, kio montris la ruzecon de la imperiestro, ĉar en tiu angulo inter Sambro kaj Mozo, ni jam estis pli ol cent mil viroj sen ke la plej malgranda novaĵo pri tio alvenis ĉe la malamiko. La perfido de Bourmont malhelpis nin surprizi ilin dise en la kantonmentoj: ĉio estus tuj finita. Sed nun estis multe pli mal-facile ekstermi ilin.

Ni daŭrigis nian marŝadon la tutan posttagmezon en tiu granda varmego kaj la polvo de la vojoj. Ju pli ni antaŭeniris, des pli ni vidis da aliaj infanteriaj kaj kavaleriaj regimentoj. Ni amasiĝis pli kaj pli se tiel diri, ĉar malantaŭ ni alvenis ankoraŭ aliaj trupoj. Je la kvina ni alvenis en vilaĝo, kie la batalionoj kaj eskadronoj defilis trans brikan ponton. Trairante tiun vilaĝon, kiun nia avangardo jam konkeris, ni vidis kelkajn prusojn kuŝantajn dekstre kaj maldekstre sur la stratetoj. Mi diris al Jean Buche:

“Tio estas prusoj!... Mi vidis multe da ili apud Lutzen kaj Leipzig, kaj vi ankaŭ vidis multe da ili!”

“Des pli bone!” li respondis. “Estas ĉio kion mi deziras.”

La vilaĝo kiun ni trairis, nomiĝis Châtelet. La rivero estis Sambro: ia akvo plena je argilo kaj profunda. Por tiuj kiuj hazarde fals en ĝin, estis malfacile eliĝi, ĉar la bordoj estas tre krutaj. Ni povis konstati tion poste.

Ni bivakis laŭlonge de la rivero trans la ponto. Ni ne estis ĝustadire la avangardo, ĉar la husaroj estis pasintaj antaŭ ni, sed ni estis la unua infanterio de la korpuso de Gérard.

La tutan reston de tiu tago la kvara korpuso defilis trans la ponton, kaj ni eksciis, ke dum la nokto la armeo ankoraŭ ĉiam transpasadis Sambron, kaj ke oni batalis apud Charleroi, en Marchienne kaj Jumet.

XVII

Alveninte sur la transa bordo de Sambro, ni metis niajn armilojn en faskoj en fruktarbaro, kaj ĉiu povis ekbruligi sian pipon kaj spiri, rigardante la husarojn, ĉasistojn, la artilerion kaj infanterion defili sur la ponto dum multaj horoj kaj preni siajn poziciojn sur la ebenaĵo. Antaŭ ni troviĝis fagarbaro, kiu etendiĝis en la

⁶⁸ La ŝuanoj batalis sub la komando de Jean Chouan en okcidenta Francio kontraŭ la Revolucio

direkto de Fleurus kaj povis mezuri tri mejlojn de unu flanko al la alia. En ĝi oni vidis vastajn flavajn lokojn. Tio estis pajlaj tegmentoj kaj eĉ kvadrataj kampoj de greno anstataŭ rubusoj, genestoj kaj eriko kiel ĉe ni. Kelkdudek domoj, malnovaj kaj kadukaj, staris trans la ponto, ĉar Châtelet estis granda vilaĝo, pli granda ol la urbo Saverne.

Inter la batalionoj kaj eskadronoj, kiuj ĉiam defiladis, alvenis virinoj, viroj, infanoj kun kruĉoj da vineca biero, pano kaj tre forta, blanka brando, kiujn ili vendis al ni por kelkaj pencoj. Buche kaj mi rompis kruston de pano, rigardante tiujn aferojn, kaj eĉ ridante pro la knabinoj, kiuj estis blondaj kaj tre belaj en tiu regiono.

Tre proksime al ni troviĝis la malgranda vilaĝo Chatelineau, kaj maldekstre de ni, tre malproksime, inter la arbaroj kaj la rivero, la vilaĝo Gilly.

La pafado de la fusiloj, kanonoj kaj pelotonoj ĉiam resonis en tiu direkto. Baldaŭ venis la novaĵo, ke la prusoj, repelitaj el Charleroi de la imperiestro, metis sin en kvadratojn ĉe angulo de la arbaro. Ĉiumomente ni atendis la ordonon marŝi por tranĉi al ili la retiriĝon. Sed inter la sepa kaj oka la pafado ĉesis. La prusoj estis retiriĝintaj al Fleurus, perdinte unu el siaj kvadratoj. La resto eskapis en la arbaron. Kaj ni vidis alveni du dragonaj regimentoj, kiuj prenis pozicion dekstre de ni laŭlonge de Sambro.

Kelkajn momentojn poste kuris la famo, ke generalo Le Tort de la gvardio ricevis kuglon en la ventron, sur la sama loko, kie li kiel knabo kondukis paŝti la bovinaron de iu bienulo. Kiajn mirigajn aferojn oni vidas en la vivo! Tiu generalo batalis ĉie en Eŭropo dum dudek jaroj, kaj tie ĉi lin atendis morto.

Povis esti la oka vespere, kaj oni pensis, ke ni restos en Châtelet ĝis post la defilo de niaj tri divizioj. Iu maljuna, kalva kampulo, en blua bluzo kaj katuna ĉapo, maldika kiel kaprino, kiu troviĝis kun ni, diris al kapitano Grégoire, ke trans la arbaro, en valo troviĝas la vilaĝoj Fleurus kaj Lambusart, kiu estis pli malgranda kaj troviĝis dekstre; ke almenaŭ ekde tri semajnoj la prusoj havis tie virojn en tiuj vilaĝoj; ke eĉ alvenis aliaj la hieraŭon kaj antaŭhieraŭon. Li diris ankaŭ al ni, ke laŭlonge de granda blanka vojo, borderita per arboj, kiu iris rekte pli ol du mejlojn maldekstren, la belgoj kaj hanoveranoj havis postenojn en Gosselies kaj apud Quatre-Bras; ke la angloj, hanoveranoj kaj belgoj havis ĉiujn siajn trupojn sur la granda vojo al Bruselo, dum la prusoj je kvar aŭ kvin mejloj dekstre tenis la vojon al Namur. Ke inter tiuj ĉi kaj la angloj, de la altebenaĝo de Quatre-Bras ĝis sur la altebenaĝo de Ligny, malantaŭ Fleurus, etendiĝis

bona ŝoseo, sur kiu de mateno ĝis vespero iradis kaj venadis iliaj estafetoj, tiel ke la angloj eksciis ĉiujn novaĵojn de la prusoj, kaj la prusoj ĉiujn novaĵojn de la angloj, kaj ke tiel ili povis helpi unuj la aliajn, sendante trupojn, kanonojn kaj municion sur tiu vojo.

Kompreneble, aŭdante tion, la penso tuj venis al mi, ke ni havas nenion plej bonan farenda ol preni tiun ŝoseon por malhelpi ilin helpi sin reciproke. Tio estis nur demando de prudento, kaj mi ne estis la sola kiu havis tiun ideon, sed mi diris nenion, timante kontraŭi la majunulon. Kvin minutojn poste duono de la bataliono staris en cirklo ĉirkaŭ li. Li fumis argilan pipon kaj montris al ni la poziciojn per sia piptubo. Estante komisiisto por la pakoj inter Châtelet, Fleurus kaj Namur, li konis la plej malgrandajn detalojn de la regiono kaj vidis ĉiutage, kio okazas en ĝi. Li forte plendis pri la prusoj, dirante, ke ili estas estaĵoj fieraj, insolentaj kaj danĝeraj por la virinoj; ke oni neniam povis kontentigi ilin, kaj ke la oficiroj gloris pri tio, ke ili pelis nin de Dresden al Parizo, igante nin kuri antaŭ ili kiel leporoj.

Jen kio indignigis min! Mi sciis, ke ili estis du kontraŭ unu apud Leipzig, ke la rusoj, aŭstroj, saksaj, bavaroj, virttemberganoj, svedoj, la tuta Eŭropo falis sur nin, dum tri kvaronoj de nia armeo estis malsanaj pro tifo, malvarmo, malsato, marŝoj kaj kontraŭmarŝoj, kio ankoraŭ malhelpis nin marŝi sur iliaj ventroj apud Hanau kaj venki ilin kvinfoje, unu kontraŭ tri, en Ĉampanjo, Alsaco, Vogezoj kaj ĉie. Tiuj fanfaronado de la prusoj kolerigis min. Ilia raso naŭzis min, kaj mi pensis:

“Estas tiaj friponoj kiuj fuŝas vian vivon.”

Tiu maljunulo diris ankaŭ, ke la prusoj senĉese ripetis, ke baldaŭ ili amuziĝos en Parizo, drinkante bonan francan vinon, kaj ke la franca armeo estis nur bando da vojrabistoj.

Aŭdante tion, mi ekkriis en mi mem:

“Josef, tio estas tro forta... Vi ne plu havos kompaton... Estos la kompleta ekstermo!”

Kiam en la vilaĝo Châtelet sonis la naŭa kaj duono, la husaroj sonis la retiriĝon, kaj ĉiuj aranĝis sin malantaŭ heĝo, abelejo aŭ en sulko por dormi, kiam brigadogeneralo Schoeffer venis doni la ordonon al la bataliono transiri la arbaron kiel avangardo. Mi tuj komprenis, ke nia malfeliĉa bataliono ĉiam estas avangardo kiel en 1813. Estas malĝoje por regimento havi bonan reputacion: la viroj ŝanĝiĝas, sed la numero restas. La 6-a leĝera havis tre belan numeron, kaj mi sciis, kion tio kostas, se oni havas tiel belan numeron!

Tiuj inter ni kiuj estis dormemaj, ne povis dormi tre longe, ĉar kiam oni sentas, ke la malamiko estas tute proksima kaj oni diras al si: “Eble tie estas la prusoj, kiuj atendas nin,

embuskante en la arbaro!” tio malfermigas al vi la okulojn;

Kelkaj husaroj, malfalditaj kiel skoltoj dekstre kaj maldekstre de la vojo, antaŭiris la kolonon. Ni marŝis per ordinaraĵoj, niajn kapitanojn en la intervaloj de la kompanioj kaj komandanton Gémeau sur sia malgranda griza ĉevalino meze de la bataliono.

Antaŭ ol ekiri ĉiu soldato ricevis sian rondan trifuntan panon kaj tri funtojn da rizo. Tiel la batalo komenciĝis por ni.

Estis belega plenluno: la tuta lando, kaj eĉ la arbaro, je tri kvaronoj da mejlo antaŭ ni, brilis kiel arĝento. Malgraŭ mi mem, mi pensis pri la arbaro de Leipzig, kie mi glitis en argiltruegon kun du prusaj husaroj, dum iom pli for la povra Klipfel estis hakita en mil pecojn. Tiu penso faris min tre atenta. Neniu parolis. Buche levis la kapon, kunpremante la dentojn, kaj Zebedeus, maldekstre de la kompanio, ne rigardis en mia direkto, sed en la ombron de la arboj kiel ĉiuj.

Ni bezonis pli horon por alveni ĉe la arbaro. Je ducent paŝoj oni kriis: “Halt!” La husaroj retiriĝis al la flankoj de la bataliono, unu kompanio estis malfaldita kiel tiraljoroj inter la arbustoj. Oni atendis proksimume kvin minutojn, kaj ĉar oni aŭdis nenian bruon, nenian averton, ni denove ekmarŝis. La vojo kiun ni sekvis tra tiu arbaro, estis sufiĉe larĝa ĉarvojo. Ĉiumomente vastaj malplenaj lokoj donis aeron kaj lumon. La homoj estis dehakintaj arbojn, kaj la blanka ligno, en steroj inter du pikadoj, brilis tie kaj tie ĉi. Cetere oni aŭdis aŭ vidis nenion.

Buche diris al mi mallaŭte:

“Mi tamen ŝatas la odoron de ligno. Estas kiel en Harberg.”

Kaj mi pensis: “Mi mokas pri laodoro de ligno! Se nur ni ne ricevos fusilpafojn, jen la ĉefa afero.” Fine, post du horoj, la lumo reaperis tra la arbustoj antaŭ ni, kaj ni feliĉaj atingis la kontraŭan flankon sen renkonti ion ajn. La husaroj, kiuj sekvis nin, tuj ekiris, kaj la bataliono metis la fusilon ĉepieden.

Ni estis en grenlando, kiel mi neniam vidis ion similan. La greno floris, ankoraŭ iomete verda, la hordeo jam estis preskaŭ matura. Tio etendiĝis tiel foren, kiel oni povis rigardi. Ni ĉiuj rigardis meze de la plej granda silento, kaj mi komprenis, ke la maljunulo ne trompis nin, ĉar malantaŭe en speco de malaltaĵo, je du mil paŝoj antaŭ ni kaj malantaŭ malgranda altaĵo, elstaris la pinto de malnova preĝejturo kaj kelkaj gabloj kovritaj per ardezoj kaj prilumataj de la luno. Tio sendube estis Fleurus. Pli proksime al ni ke nia dekstra flanko oni malkovris kelkajn pajlajn tegmentojn kaj alian preĝejturon. Tio estis Lambusart. Sed multe pli malproksime, ĉe la fino de tiu vasta ebenaĵo, je pli

ol mejlo malantaŭ Fleurus, la tereno estis monteta, kaj sur la montetoj brilis sennombraj fajroj. Oni bone rekonis de maldekstre dekstren tri gandajn vilaĝojn, kiuj etendiĝis sur tiuj montetoj kaj kies nomojn ni poste eksciis, nome Saint-Amand, la plej proksima, Ligny en la mezo, kaj pli for, je almenaŭ du mejloj, Sombreffe. Oni vidis tion pli bone ol en plena tago pro la fajroj de la malamiko. La prusa armeo troviĝis en la domoj, fruktarbaroj kaj sur la kampoj. Kaj malantaŭ tiuj tri vilaĝoj en unu linio, oni malkovris ankoraŭ alian, pli altan kaj pli malproksiman maldekstre de ni, kiel briladis ankaŭ fajroj. Tio estis la vilaĝo Brye, kie la friponoj sendube havis siajn rezervojn.

Ĉion ĉi mi tre bone komprenis, kaj mi eĉ vidis, dum mi rigardis tiun grandiozan spektaklon, ke estos tre malfacile preni tiujn vilaĝojn.

Sur la ebenaĵo, maldekstre de ni, briladis ankaŭ fajroj, sed estis klare, ke estis tiuj de nia 3-a korpuso, kiu, je la oka, deturniĝis ĉe la angulo de la arbaro, repelinte la prusojn, kaj kiu haltis en iu vilaĝo ankoraŭ tre malproksime de Fleurus. Kelkaj fajroj laŭlonge de la arbaro, en la sama linio kiel ni, apartenis ankaŭ al nia armeo. Mi kredas memori, ke ni havis trupojn je ambaŭ flankoj, sed mi ne estas certa pri tio. Ĉiakaze la granda amaso troviĝis je nia maldekstra flanko. Oni tuj metis sentinelojn en la ĉirkaŭaĵon, post kio ĉiu kuŝiĝis ĉerande de la arbaro, sen bruligi fajrojn, atendante novajn ordonojn.

Generalo Schoefer venis ankoraŭ tiun saman nokton kun la oficiroj de la husaroj.

Komandanto Gémeau gardis la armilojn. Ili parolis laŭte je dudek paŝoj de ni. La generalo diris, ke nia armeokorpuso ankoraŭ ĉiam defilis, sed ke ĝi multe malfruis; ke eĉ la morgaŭon ĝi ne estos kompleta. Poste mi vidis, ke li pravas, ĉar nia kvara bataliono, kiu devis aliĝi al ni en Châtelet, alvenis nur la tagon post la batalo, kiam ni estis preskaŭ ĉiuj ekstermitaj de tiuj friponoj en Ligny, kaj ke restis de ni nur kvarcent viroj. Anstataŭ ke, se ĝi estus estinta tie, ni estus atakintaj kune kaj ĝi estus havinta sian parton de la gloro.

Ĉar mi devis gardostari la antaŭan vesperon, mi trankvile kuŝiĝis ĉepieden de arbo, flankon ĉe flanko apud Buche, meze de niaj kamaraĵoj. Pavis esti la unua matene. Estis la tago de la terura batalo en Ligny. La duono de tiuj kiuj dormis tie, estis devontaj lasi siajn ostojn en tiuj vilaĝoj, kiujn ni vidis, kaj sur tiuj grandaj ebenaĵoj tiel riĉaj je ĉiuspeca greno. Ili estis devontaj helpi kreski la sekalon, hordeon kaj avenon dum jarcentoj kaj jarcentoj. Se ili estus sciintaj, pli ol unu ne estus dorminta tiel bone,

ĉar la homoj ŝatas sian ekziston, kaj estus malĝojiga afero, se oni pensus: “Hodiaŭ mi spiras lastfoje.”

XVIII

Dum tiu nokto la aero estis peza, kaj mi vekigis ĉiun horon malgraŭ mia laceco. La kamaradoj dormis, iuj parolis en sia sonĝo. Buche ne moviĝis. Tuj apude de ni, ĉerande de la arbaro, niaj fusiloj en faskoj briladis en la lunlumo.

Mi aŭskultis. Malproksime je la maldekstra flanko oni plurfoje aŭdis: “Kiu vivu?” en nia fronto, kaj la respondo: “Francio!”

Multe pli proksime al ni, je ducent paŝoj, la batalionaj sentineloj staris senmove ĝis la brusto en la greno. Mi mallaŭte ekstaris kaj rigardis: el la direkto de Sombrefe, je almenaŭ du mejloj dekstre de ni, alvenis grandaj rumoroj, kiuj plilaŭtiĝis kaj tiam cesis. Oni dirus, malgrandaj ventekblovoj tra la foliaro. Sed ne blovis eĉ la plej malforta vento, kaj ne falis unu guto da roso, kaj mi pensis:

“Estas la kanonoj kaj furgonoj de la prusoj, kiuj galopas tie for sur la vojo al Namuro, kaj iliaj batalionoj kaj eskadronoj, kiuj ankoraŭ ĉiam alvenas. Dio mia! En kia pozicio ni estos morgaŭ kun tiu amaso da viroj antaŭ ni, kiuj ankoraŭ plifortiĝas de minuto al minuto!”

Ili estingis siajn fajrojn apud Saint-Amand kaj Ligny, sed apud Sombrefe briladis pli multaj. La prusaj regimentoj, kiuj ĵus alvenis per rapidaj marŝoj, sendube estis boligantaj sian supon. Sennombraj pensoj trapasis mian kapon. Mi rekuŝiĝis kaj reekdormis por duona horo. Revekiĝinte mi kelkfoje diris al mi:

“Vi ja foriris viva de Lutzen, Leipzig kaj Hanau. Kial do ne de ĉi tie?”

Sed tiu espero, kiun mi donis al mi, ne malhelpis min kompreni, ke estos terure.

Fine mi tamen estis definitive reendormiĝinta, kiam la ĉeftamburisto Padoue komencis bati la veksignalon. Li promenis tien kaj reen laŭlonge de la arbarrando, plezuriĝante ĉiujn per siaj ruladoj kaj fortaj batoj. La oficiroj jam estis kuniĝintaj sur la monteto en la greno. Ili rigardis en la direkto de Fleurus, parolante inter si.

Nia veksignalo ĉiam okazis antaŭ tiu de la prusoj, rusoj, aŭstroj kaj ĉiuj niaj malamikoj. Estas kiel la kanto de alaŭdo ĉe la aŭroro. La

prusoj kun siaj larĝaj tamburoj poste komencis siajn obtuzajn ruladojn, kiuj donas al vi pensojn pri enterigo. Sed iliaj trumpetoj havas gajajn melodiojn por soni la vekon. La niaj anstataŭe aŭdigis nur tri aŭ kvar notojn, kiuj ŝajnis diri:

“Ek! Ni ne havas tempon perdenda!”

Dum ĉiuj leviĝis, belega suno supreniris super la greno, kaj oni sentis jam antaŭe, kiel varmege estos je la tagmezo. Buche kaj ĉiuj taskoviroj foriris kun la ladvokoj serĉi akvon, dum aliaj skuis tindron en manpleno da pajlo por bruligi la fajrojn. Ligno ne mankis, kaj ĉiu serĉis sian brakplenon en la dehakajo. Kaporalo Duhem, serĝento Rabot kaj Zebedeus venis paroli kun mi. Ni ĉiuj estis kune foririntaj en 1813. Ili partoprenis en mia edziĝo en Quatre-Vents, tiel ke, malgraŭ la diferenco de rangoj, ili ĉiam konservis amikajn sentojn por Josef.

“Nu!” kriis al mi Zebedeus. “La danco tuj rekomenciĝos!”

“Jes,” mi respondis.

Subite rememorante la vortojn de la povra serĝento Pinto, la matenon en Lutzen, mi respondis lin, okulumante:

“Tio, Zebedeus, kiel diris serĝento Pinto, estas batalo dum kiu oni povos gajni la krucon per batoj de ŝargbastono, fusilkolbo kaj bajoneto. Kaj se oni ne prenos la ŝancon meriti ĝin, oni jam ne devas kalkuli je ĝi.”

Tiam ĉiuj ekridis, kaj Zebedeus ekkriis:

“Jes, la povra maljunulo certe meritis la krucon. Sed estas pli malfacile konkeri ĝin ol la bukedon je la pinto de la kokanjomasto.”

Ni ĉiuj ridis, kaj ĉar ili havis botelon da brando, ni rompis kruston de pano, rigardante la moviĝojn, kiuj komencis videbliĝi. Buche revenis unu el la unuaj kun sia ladvokoj. Li staris malantaŭ ni, la orelojn streĉitajn kiel vulpo en embusko. Vicoj da kavalerianoj eliris la arbaron kaj tragalopis la grenkampojn, direktiĝante al Saint-Amand, la granda vilaĝo maldekstre de Fleurus.

“Tio,” diris Zebedeus, “estas la leĝera kavalerio de Pajol, kiu estas malfaldonta sin en tiraljoroj. Tio ĉi estas la dragonoj de generalo Exelmans⁶⁶. Kiam la aliaj estos esplorintaj la pozicion de la malamiko, ili antaŭeniros en linio, mi avertas vin pri tio. Tio ĉiam fariĝas sammaniere, kaj la kanonoj alvenos kun la infanterio. La kavalerio retiriĝos al la flankoj, dekstre kaj maldekstre. Oni formos atakkolonojn sur la bonaj vojoj kaj la kampoj, kaj la

⁶⁶ René, Isidore, grafo Exelmans, marŝalo kaj senatano de Francio 1775-1852), naskiĝis en Baarle-Hertog en familio kiu devenis de Grote-Brogel (Limburgo, Belgio). En 1791 li volontulis en la franca armeo. Li estis fama rajdisto, kiu partoprenis

en 27 bataloj, dum kiuj li plurfoje distingis sin. En 1815 li venkis prusan eskadronon en Roquencourt, kiam Napoleono revenis de Elbo. Li mortis post grava falo de ĉevalo. En parizo bulvaroj portas lian nomon.

batalo komenciĝos per kanonado dum pli-malpli dudek minutoj ĝis duonhora. La unua parto de batalo ĉiam estas la privilegio de la kanonoj. Kiam ili estas teditaj de tio, kiam la duono de la baterioj kuŝas surtere, la imperiestro elektas la bonan momenton por lanĉi nin. Sed nin trafas mitralon, ĉar ni estas pli proksimaj. Oni antaŭeniras, la fusilon sur la brako, en rapidaj paŝoj, en bona ordo, kaj oni ĉiam finos en kurpaŝoj pro la mitralo, kiu faras nin malpaciencaj. Mi avertas vin, rekrutoj, por ke vi ne miru.”

Pli ol dudek rekrutoj estis ranĝiĝintaj malantaŭ ni. La kavalerio ĉiam eliris el la arbaro.

“Mi vetas,” diris kaporalo Duhem, “ke la 4-a korpuso marŝas malantaŭ ni ekde la frua mateno.”

Kaj Rabot diris, ke necesas tempo por alveni en linio pro la malbonaj pasejoj en la arbaro.

Ni staris tie kiel interkonsultantaj generaloj, kaj ni ankaŭ rigardis la pozicion de la prusoj ĉirkaŭ la vilaĝoj, en la fruktarbaroj kaj malantaŭ la heĝoj, kiuj estis ses ĝis sep futojn altaj en tiu regiono. Granda nombro da iliaj kanonoj staris en baterio inter Ligny kaj Saint-Amand. Oni bonege vidis la bronzon brili en la sunlumo, kio inspiris al ĉiaj ajn pripensoj.

“Mi estas certa,” diris Zebedeus, “ke ili bari-kadis ĉion, ke ili faris fosaĵojn, ke ili faris truojn tra la murojn. Estus estinte pli bone, se ni estus antaŭenirintaj hieraŭ vespere ĝis la unua vilaĝo sur la altaĵo, post kiam ili retiris siajn kvadratojn. Se ni estus sur la sama nivelo kiel ili, ĉio irus glate. Sed grimpi tra heĝoj sub la pafado de la malamiko kostos multajn virojn, almenaŭ se ne alvenos io de malantaŭe, kiel la imperiestro kutimas fari.”

Je ĉiuj flankoj la maljunuloj parolis tiu-maniere, kaj la rekrutoj aŭskultis.

Intertempe la marmitoj pendis super la fajroj, sed oni eksplicite malpermesis uzi ĉe tio bajonetojn, kiuj moliĝas pro la varmego.

Povis esti la sepa, kaj ĉiuj kredis, ke la batalo estos liverita en Saint-Amand, la vilaĝo kiu situis plej proksime al nia maldekstra flanko, ĉirkaŭita de heĝoj kaj densaj arboj kaj kun dika rondo turo en la mezo. Kaj pli alte, malantaŭe, aliaj domoj kun turniĝanta vojo borderita per sekaj ŝtonoj. Ĉiuj oficiroj diris: “Tien ni iros.”

Ĉar niaj trupoj, venante de Charleroi, etendiĝis malsupre sur la ebenaĵo, infanterio kaj kavalerio, ĉio iris en tiu direkto: la tuta korpuso Vandamme kaj la divizio Gérard. Pluraj miloj kaskoj brilis en la sunlumo. Buche, starante apud mi, diris:

“Diable! Rigardu, Josef, rigardu... ili ankoraŭ ĉiam alvenas!”

Vicoj da sennombraj bajonetoj videblis en la sama direkto tiel for, kiel oni povis rigardi.

La prusoj pli kaj pli etendiĝis sur la altaĵo malantaŭ la vilaĝoj, kie staris ventmuelejoj.

Tiu moviĝo daŭris ĝis la oka. Neniu malsatis, sed oni tamen manĝis por ne devi fari al si riproĉojn poste, ĉar kiam la batalo komenciĝis, necesis ekiri, eĉ se tio daŭrus du tagojn.

Inter la oka kaj la dek-unua ankaŭ la unuaj batalionoj de nia divizio eliris la arbaron. La oficiroj venis premi la manon al siaj kamaradoj, sed la stabo restis ankoraŭ malantaŭe.

Subite ni vidis husarojn kaj ĉasistojn pasi, pillongigante nian batalfronton je la dekstra flanko: estis la kavalerio de Morin. Tuj venis al ni la ideo, ke, en la momento kiam la batalo komenciĝos apud Saint-Amand, kaj la prusoj estos sendintaj ĉiujn siajn trupojn en tiu direkto, ni falos sur ilian flankon tra la vilaĝo Ligny. Sed la prusoj havis la saman ideon, ĉar ekde tiu momento ili ne plu defilis al Saint-Amand, sed jam haltis en Ligny. Ili eĉ malsupreniris pli malproksimen, kaj oni bonege vidis iliajn oficirojn postenigi la soldatojn malantaŭ la heĝojn, en la ĝardenojn, malantaŭ malaltajn murojn kaj barakojn. Ni trovis ilian pozicion tre solida. Ili daŭre malsupreniris en faldon de la tereno inter Ligny kaj Fleurus, kaj tio mirigis nin, ĉar ni ankoraŭ ne sciis, ke pli malsupre pasas roĝo, kiu dividas la vilaĝon en du, kaj ke ili estis ekipantaj la domojn je nia flanko. Ni ne sciis, ke, se ni havus la ŝancon repeli ilin, ili povus ankoraŭ retiriĝi pli supren, ĉiam tenante nin sub sia pafado.

Se ni sciis ĉion en tiaj aferoj, oni neniam kuraĝus komenci, ĉar oni ne povus esperi bone fini tian entreprenon. Sed tiajn aferojn oni malkovras iom post iom, kaj en tiu tago ni devis malkovri multe da tiaj aferoj, kiujn ni ne atendis.

Je la oka kaj duono pluraj el niaj regimentoj jam trapasis la arbaron. Baldaŭ oni batis la rekolektiĝon, kaj ĉiuj batalionoj prenis la armilojn. Generalo grafo Gérard kaj lia stabo alvenis. Ili pasis galopante ĝis sur la monteto preter Fleurus sen rigardi nin.

Preskaŭ tuj la pafado komenciĝis. Tiraljoroj de la korpuso Vandamme proksimiĝis al la vilaĝo maldekstre. Ankaŭ du kanonoj ekiris, trenataj de surĉevalaj artilerianoj. Ili pafis kvin aŭ ses kuglojn ekde la montetosupro. Tiam la pafado ĉesis: niaj tiraljoroj estis en Fleurus, kaj ni vidis tri- aŭ kvarcent prusojn resupreniri la deklivon en la direkto de Ligny.

Generalo Gérard rigardis tiun malgrandan atakon, tiam li revenis kun siaj adjutantoj, kaj malrapide pasis antaŭ la fronto de niaj batalionoj, atente rigardante nin kvazaŭ por vidi la mienon, kion ni montris. Li estis masiv-korpa viro kun bruna, larĝa vizaĝo, pinta mentono kaj granda kapo. Li povis havi kvardek kvin jarojn.

Oni trovas multe da kampuloj ĉe ni kiuj similis lin, kaj ili ne estis la plej malprudentaj.

Li diris nenion al ni, kaj, kiam li estis trakurinta la tutan linion de unu fino al la alia, ĉiuj komandantoj kaj koloneloj kuniĝis ĉe nia dekstra flanko. Oni ordonis nin meti la fusilon ĉepieden. Tiam la adjutantoj forgalopis rapide kiel la vento. Nur tion oni vidis, sed nenio moviĝis. Nur la famo cirkulis, ke marŝalo Grouchy ordonos nin, kaj ke la imperiestro atakis la la anglojn je kvar mejloj de ni sur la vojo al Bruselo.

Tiu novaĵo ne faris nin bonhumoraj, kaj pli ol unu diris:

“Ne estas mirige, ke ni ankoraŭ estas ĉi tie ekde la mateno sen fari ion. Se la imperiestro estus kun ni, la batalo estus komenciĝinta jam delonge kaj la prusoj ne estus havintaj la tempon rekonatiĝi unuj kun la aliaj.”

Jen la konversaciojn kiujn ni havis, kio ja montras la maljustecon de la homoj, ĉar tri horojn poste, je la tagmezo, plurmiloj da krioj “*Vivu la Imperiestro!*” supreniris je nia dekstra flanko. Napoleono alvenis. Tiuj krioj proksimiĝis kiel fulmotondro kaj baldaŭ resonis ĝis antaŭ Sombreffe. Oni trovis, ke ĉio estas bona. Tion kion oni riproĉis al marŝalo Grouchy, la imperiestro bone agis farante tion, ĉar estis li.

Tuj alvenis la ordono antaŭeniri kvincent paŝojn, apogante sur la dekstran flankon, kaj ni foriris tra la kampoj de sekalo, hordeo kaj aveno, kies tigoj kurbiĝis antaŭ ni. La granda batallinio je nia maldekstra flanko ankoraŭ ne moviĝis.

Ĉar ni proksimiĝis al granda ŝoseo, kiun ni ankoraŭ ne vidis kaj kiun ni malkovris ankaŭ en Fleurus je mil paŝoj antaŭ ni kun ĝia roĝo borderita de salikoj, oni kriis al ni:

“Halt!”

En la tuta divizio oni aŭdis nur unu murmuron:

“Jen li estas!”

La imperiestro alvenis surĉevalo kun malgranda stabo. De fore oni rekonis nur lian grizan kapoton kaj nigran ĉapelon. Lia veturilo, ĉirkaŭita de lancistoj, estis restinta malantaŭe. Li eniris en Fleurus tra la ŝoseo kaj restis pli ol horon en tiu vilaĝo, dum ni rostiĝis en la greno.

Post tiu horo, dum kiu ni jam pensis, ke tio ne finiĝos, vicoj da adjutantoj forgalopis, la lumbojn falditajn, la nazon inter la oreloj de la ĉevalo. Du haltis ĉe generalo grafo Gérard, unu restis, la alia reforgalopis. Post tio ni ankoraŭ atendis, kaj subite, de unu fino de la ebenaĵo ĝis la alia ĉiuj regimentaj muzikkapeloj ekludis. Ĉio intermiksiĝis: la tamburoj, la trum-petoj, kaj ĉio ekmarŝis. Tiu granda linio, kiu etendiĝis tre foren malantaŭ Saint-Amand ĝis la arbaro, kurbiĝis, la dekstran alon pli antaŭen. Kaj ĉar ĝi

preteriris nian divizion de malantaŭe, oni igis nin ankaŭ oblikviĝi dekstren, tiam oni denove kriis:

“Halt!”

Ni estis fronte al la ŝoseo kiu eliras el Fleurus. Maldekstre ni havis blankan muron. Malantaŭ tiu muro staris arboj kaj granda, kaduka domo, kaj antaŭ ni staris ventmuelejo en ruĝaj brikoj, alta kiel turo.

Apenaŭ ni haltis, la imperiestro eliris tiun muelejon kun tri aŭ kvar generaloj kaj du kampuloj en bluzo, du malunuloj, kiuj tenis sian ĉapon per la mano. Tiam la divizio komencis krii: “*Vivu la Imperiestro!*” kaj mi bone vidis lin, ĉar li alvenis ĝuste fronte al nia bataliono tra pado, la manojn malantaŭ la dorso kaj la kapon klinita, aŭskultante tiujn tute kalvajn maljunulojn. Li ne atentis pri niaj krioj. Dufoje li turnis sin, montrante la vilaĝon Ligny. Mi vidis lin kiel patron Gulden, kiam ni sidis unu fronte al la alia ĉe la tablo. Li fariĝis multe pli dika kaj flava ekde Leipzig. Se li ne surhavis sian grizan kapoton kaj sian nigran ĉapelon, oni apenaŭ estus rekoninta lin: li aspektis maljuna, kaj liaj vangoj pendis. Tion certe esti kaŭzinta liaj ĉagrenoj sur la insulo Elbo, pensante pri ĉiuj eraroj kiujn li faris, ĉar li estis viro plena je prudento, kiu bone vidis siajn erarojn: li detruis la Revolucion, kiu subtenis lin; li revokis la elmigrintojn, kiuj ne amis lin; li edziĝis al arkidukino, kiu restadis en Vieno; li elektis siajn plej gravajn malamikojn por peti de ili konsilojn... Koncizadire, li remetis ĉion en la saman staton kiel antaŭ la Revolucio. Mankis nur Ludoviko XVIII. Tial la reĝoj metis Ludovikon XVIII sur lian lokon. Nun li venis renversi la legitiman reĝon. Unuj nomis lin despoto, aliaj jakobeno! Tio estis malfeliĉa, ĉar li mem estis aranĝinta ĉion antaŭe por reestabli la Burbonojn sur la tronon. Li havis nur sian armeon. Se li perdus ĝin, ĉio estus perdita por li, ĉar en la nacio unuj volis liberecon kiel patro Gulden, kaj la aliaj volis ordon kaj pacon, kiel onklino Gredel, kiel mi, kiel ĉiuj kiujn oni forprenis el ilia hejmo por militi.

Tiuj aferoj devigis lin terure pripensi. Li perdis ĉies fidon. Nur la maljunaj soldatoj gardis sian afekcion por li. Ili volis venki aŭ morti. Kun tiaj ideoj oni ĉiam estas certa, ke unu el la du eblecoj nepre okazos. Tiam ĉio fariĝas klara kaj simpla. Sed multaj el ni ne havis tiajn ideojn, kaj miaflanke mi multe pli amis Trinell ol la imperiestron.

Alvenante ĉe la angulo de la muro, kie la husaroj atendis lin, li surĉevaliĝis, kaj generalo Gérard, kiu vidis lin, malsupreniris la monteton galopante ĝis sur la ŝoseo. Li turnis sin du sekundojn por aŭskulti lin, kaj tiam ili ambaŭ eniris Fleurus.

Necesis ankoraŭ atendi.

Je la dua horo generalo Gérard revenis. Oni igis nin oblikviĝi dekstren la trian fojon, kaj la tuta divizio sekvis en kolonoj la grandan ŝoseon al Fleurus, la kanonojn kaj municiaĵojn en la intervaloj de la brigadoj. Oni ne povas imagi la kvanton da polvo kiu supreniris! Buche diris al mi:

“Ĉe la unua laĝeto kiun ni renkontos, necesas, ke mi trinku.”

Sed ni ne renkontis laĝeton.

La muzikkapeloj ankoraŭ ĉiam ludis. Malantaŭ ni alvenis amasoj da kavalerio, precipe dragonoj. Ni ankoraŭ marŝis, kiam komenciĝis la bruo de la pafado de fusiloj kaj kanonoj kiel digo kiu rompiĝas kaj kies akvo, falante, kuntrenas ĉion kio troviĝas sur ĝia vojo.

Mi konis tion, sed Buche fariĝis tute pala. Li diris nenion kaj rigardis min mirigite.

“Jes, Jean,” mi diris al li, “tio estas la aliaj malsupre kiuj komencas la atakon ekde Saint-Amand, sed baldaŭ estos nia vico.”

La bruo duobliĝis, la muzikkapeloj ĉesis ludi. De ĉiuj flankoj oni kriis:

“Halt!”

La divizio haltis sur la ŝoseo, la kanonistoj venis el la intervaloj kaj metis siajn kanonojn en linio je kvindek paŝoj antaŭ ni. a municiaĵoj metis sin malantaŭ ilin.

Ni alfrontis la vilaĝon Ligny. Oni vidis nur unu blankan linion de domoj duone kaŝitaj de la fruktarbaroj – la preĝejturon super ili –, flavateraj deklivoj, arboj, heĝoj kaj palisaroj. Ni estis dekkvin ĝis dekdu mil viroj, sen enkalkuli la kavalerion, kaj ni atendis la ordonon ataki.

La batalo apud Saint-Amand daŭrigis, amasoj da fumo supreniris al la ĉielo.

Atendante nian vicon, mi komencis pensi pri Trinel kun granda tenereco. La ideo, ke ŝi estas ekhavonta infanon, trairis mian menson, kaj mi komencis preĝi Dion konservi mian vivon. Sed la bona penso ankaŭ venis al mi, ke, se, mi mortus, nia infano estus tie por konsoli ĉiujn, Trinel, onklinon Gredel kaj patron Gulden; ke, se ĝi estus knabo, ili nomus lin Josef, kaj ke ili karemus lin; ke sinjoro Gulden igis lin danci sur siaj genuoj, kaj onklino Gredel amus lin, kaj ke Trinel, kisante lin, pensus pri mi. Mi diris al mi, ke tiam mi ne estus tute mortinta. Sed mi volis ja vivi, kaj mi vidis, ke la batalo estos terura.

Buche ankaŭ diris al mi:

“Aŭskultu, mi havas krucon... Necesas, ke vi promesu ion al mi. Se mi estus mortigita...”

Li premis al mi la manon.

“Mi promesos tion al vi,” mi diris.

“Nu, ĝi estas sur mia brusto. Mi volas, ke vi reportu ĝin al Harberg, kaj ke vi pendigu ĝin en la kapelo memore al Jean Buche, mortinta en la kredo je la Patro kaj la Filo kaj la Sankta Spirito.”

Li parolis al mi serioze, kaj mi trovis sian volon tre komprenebla, ĉar unuj mortas pro la Homaj

Rajtoj, aliaj pensante pri sia patrino, ankoraŭ aliaj laŭ la ekzemplo de la justuloj kiuj oferas sin por la bono de homo raso: ĉio tio estas nur unu kaj sola afero, kiun oni nomas diverse laŭ sia vidpunkto.

Mi do promesis al li, kion li petis min fari, kaj ni atendis ankoraŭ duonhoron. Ĉiuj kiuj eliris el la arbaro venis aliĝi al ni. Ni ankaŭ vidis, kiel la kavalerio malfaldiĝis ĉe nia dekstra flanko kvazaŭ por ataki Sombreffe.

Ĝis la dua kaj duono nenia kuglo estis pafita de ni. Tiam adjutanto de la imperiestro alvenis, ventron ĉetere sur la vojo al Fleurus, kaj mi tuj pensis: “Jen nia vico. Nun, Dio gardu nin, ĉar ni, povruloj ne povos savi nin el tiaj masakradoj!”

Mi havis apenaŭ la tempon fari tiujn pripensojn, du batalionoj kun sia artilerio ekiris deturniĝante dekstren sur la ŝoseo en direkto de Sombreffe, kie prusaj ulanoj kaj husaroj malfaldiĝis fronte al niaj dragonoj kaj haltis tie. Tiuj du batalionoj havis la bonŝancon devi resti en pozicio sur la ŝoseo la tutan tagon por observi la malamikan kavalerion, dum ni iris forpreni la vilaĝon al la multnombraj prusoj, kiuj estis tie.

XIX

Akurate je la tria oni formis atakkolonon. Mi estis en la maldekstra, kiuj ekiris la unua per rapidaj paŝoj, enirante turniĝantan vojon. En tiu flanko de Ligny troviĝis granda brika konstruaĵo. Ĝi estis ronda kaj truita kaj rigardis al la vojo kiun ni supreniris, kaj ni ankaŭ rigardis trans la grenon. Poste ekiris la meza kolono. Ĉar ĝi ne devis trairi tiom da vojo, suprenirante tute rekte, ni estis renkontantaj ĝin ĉe la enirejo de la vilaĝo. Mi ne scias, kiam la tria ekiris. Ni renkontis ĝin nur pli malfrue.

Ĉio iris glate ĝis la loko kie la vojo atingis malgrandan altaĵon kaj malsupreniris pli for al la vilaĝo. Kiam ni alvenis inter tiuj du montetoj kovritaj de greno, ekmalkovrante la unuajn domojn, vera hajlo de pafado alvenis sur la kapo de nia kolono kun terura bruego: el ĉiuj truoj de la granda konstruaĵo, el ĉiuj fenestroj kaj mansardlukoj de la domoj, el la fruktarbaroj, de malantaŭ la heĝoj kaj brikaj muretoj, la pafado direktiĝis al niaj kapoj kvazaŭ fulmoj. Samtempe, ekde kampo malantaŭ la granda turo maldekstre, kaj pli supre ol Ligny, apud la ventmuelejoj, dekkvino da pezegaj kanonoj, metitaj tie tiucele, komencis pafi kun tia bruego, ke kompare kun ĝi la fusilpafado estis, se tiel diri, ankoraŭ nenio. Tiuj kiuj malfeliĉe jam eliris la kavan vojon, amase falis unuj sur

la aliajn en la fumo. Kaj en la momento kiam tio okazis al ni, ni ankaŭ aŭdis la pafadon de la dua kolono, kiu komencis pafi je nia dekstra flanko, kaj la bruego de ĉiuj kanonoj, estis tia, ke ni ne sciis, ĉu estas la niaj aŭ tiuj de la prusoj kiuj pafas.

Feliĉe la bataliono ankoraŭ ne transiris la monteton. La fusilkugloj sibladis kaj la kanonkugloj zumadis super ni en la greno, rabotante la teron, sed sen fari al ni malbonon. Ĉiufoje kiam pasis tiaj skualoj, la rekrutoj apud mi, klinis la kapon. Mi memoras, ke Buche rigardis min per grandaj okuloj. La maljunuloj kun-premis la lipojn.

La kolono haltis. Ĉiuj demandis sin, ĉu ne estus pli bone remalsupreniri, sed tio daŭris nur sekundon. En la momento kiam la pafado ŝajnis malrapidiĝi, ĉiuj oficiroj, la sabron en la aero, komencis krii:

“Antaŭen!”

Kaj la kolono reekiris per rapidaj paŝoj. Unue ĝi lanĉis sin en la vojon kiu malsupreniris inter la heĝoj, trans palisarojn kaj murojn, de kie la embuskantaj prusoj daŭrigis pafi al ni. Ve tiuj kiujn oni trovis! Ili defendis sin kiel lupoj, sed niaj kolbobatoj kaj bajonetpikoj baldaŭ kuŝigis ilin en angulon. Sufiĉe granda nombro da ili, inter kiuj maljunuloj kun grizaj lipharoj, estis preparintaj sian retiriĝon. Ili foriris per firmaj paŝoj, turnante sin por pafi ian lastan kuglon, refermis pordon aŭ glitis tra breĝon. Ni persekutis ilin senhalte. Ni havis jam nek singardon nek kompaton, kaj fine ni alvenis en malordo ĉe la unuaj domoj, kie la pafado al ni rekomenciĝis el la fenestroj, de malantaŭ stratanguloj, de ĉie.

Tiel ni prenis la fruktarbarojn, ĝardenojn kaj ŝtonmurojn, kiuj descendis laŭlonge de la monteto, sed estis tute detruitaj, renversitaj, la palisoj eltiritaj, kiuj jam ne povis servi kiel kaŝejoj. La domaĉoj antaŭ ni, bone barikaditaj, daŭrigis sian senhaltan pafadon al ni. En dek minutoj tiuj prusoj estus ekstermitaj nin ĝis la lasta. Tiam, vidante tion, la kolono komencis malsuprenkuri, la tamburistoj, la pioniroj, la soldatoj, ĉiuj pelmele sen turni la kapon. Mi saltis trans la palisarojn, kvankam mi en alia momento de la vivo, mi neniam estus havinta la sinamon kredi, ke mi povus salti trans ilin kun sako kaj kartoĉujo sur la dorso. Kaj ĉiuj aliaj agis kiel mi: ĉiuj malsupreniĝis kvazaŭ muro.

Alveninte en la kava vojo inter la montetoj, ni haltis por iomete respiri, ĉar mankis al ni spiro. Pluraj eĉ kuŝiĝis surteren, aliaj viŝis al si la dorson kontraŭ la taluso. La oficiroj indigniĝis kontraŭ ni, kvazaŭ ili ne estus sekvintaj la retiriĝon. Multaj kriadis: “Oni antaŭenigu la kanonojn!” Aliaj volis reformi la vicojn, kaj ni apenaŭ aŭdis nin meze de tiu bruego de la kanonado, kiu tremetigis la aeron kiel dum grava fulmotondro.

Mi vidis Buche reveni per longaj paŝoj. Lia bajoneto estis ruĝa pro sango. Li venis meti sin apud min sen diri vorton, reŝargante sian fusilon.

Pli ol cent viroj de la bataliono, kapitano Grégoire, leŭtenanto Certain, pluraj serĝentoj kaj kaporaloj estis restintaj en la fruktarbaroj. La du unuaj batalionoj de la kolono tiom suferis, kiom ni.

Zebedeus kun sia granda aglonazo, tute pala, ekvidis min de fore kaj ekkriis:

“Josef, nenia kompato!”

Amasoj da blanka fumo supreniris super la altaĵo. La tuta deklivo ekde Ligny ĝis Saint-Amand, malantaŭ la salikoj, tremoloj kaj poploj, borderantaj tiujn montetojn, estis brulanta.

Mi grimpis ĝis la nivelo de la greno, ambaŭ manojn surtere, kaj, vidante tiun teruran spektaklon, mi malkovris sur la supro de la deklivo apud la muelejoj longajn liniojn da nigra infanterio, la armilon ĉepiede, pretaj malsupreniri al ni, kaj sennombran kavalerion ĉe la aloj. Mi redescendis, pensante:

“Neniam ni povos venki tiun armeon. Ĝi plenigas ĉiujn vilaĝojn, ĝi gardas la vojojn, ĝi kovras la deklivon tiel for kiel oni vidas, ĝi havas ĉie kanonojn. Estas kontraŭ la prudento obstini en tia entrepreno!”

Mi indignis kontraŭ niaj generaloj. Ili eĉ naŭzis min.

Ĉio tio ne daŭris dek minutojn. Dio scias, kio fariĝis el niaj du aliaj kolonoj. Tiu tuta granda pafado alvenanta de la maldekstra flanko, kaj tiuj mitralsvarmoj kiujn ni aŭdis pasi tra la aero sendube estis destinitaj al ili.

Mi kredis, ke ni jam ricevis nian parton da malfeliĉoj, kiam generalo Gérard kaj du aliaj generaloj, Vichery kaj Schoeffer, algalopis ventron ĉetere de la vojo malsupre de ni, kriante kiel furiozuloj:

“Antaŭen!... Antaŭen!...”

Ili tiris sian sabron, kaj oni diris, ke ni devas nur supreniri. Estas tiuj obstinaj viroj kiuj puŝas la aliajn al ekstermo, ĉar ilia furiozeco transpasis al ĉiuj aliaj.

En tiu momento niaj kanonoj, kiuj staris sur la vojo malsupren, komencis pafi al Ligny. La tegmentoj de la vilaĝdomoj disfalis, la muroj renversiĝis. Tuj ĉiuj rekomencis amase kuri antaŭen. La generaloj kuris ĉekape, la sabron en la mano, kaj la tamburistoj malantaŭ ni, batante la atakon. Oni kriis: “*Vivu la Imperiestro!*” La prusaj kanonkugloj forfalĉis nin je dekduoj, la fusilkugloj venis kiel hajlo, la tamburistoj ĉiam batis: Pam!... Pam!... Pam!... Oni vidis nenion plu, oni aŭdis nenion plu. Oni pasis tra la fruktarbarojn sen atenti pri tiuj kiuj falis, kaj du minutoj poste ni enkuris la vilaĝon kaj batrompis la pordojn per kolbobatojn, dum la prusoj pafis al ni de la fenestroj. Estis bruo

milfoje pli forta ol ekstere, ĉar la furiozaj krioj miksiĝis en ĝin. Oni penetris en la domojn kaj senkompatate masakris la prusojn. De ĉiuj flankoj supreniris nur unu krio:

“*Pas de quartier*!”⁶⁹”

La prusoj, surprizitaj en la unuaj domoj, ankaŭ ne demandis kompaton. Ili estis maljunaj soldatoj, kiuj bone sciis, kion signifas “*Pas de quartier*”. Ili defendis sin ĝismorte.

Mi memoras, ke antaŭ la tria aŭ kvara domo de sufiĉe larĝa strato, kiu pasis antaŭ la preĝejo kaj pli foren trans ponteton, mi memoras, ke fronte al tiu domo je la dekstra flanko – dum la grandaj kavaj tegoloj, ardezoj kaj brikoj pluvadis sur la straton, dum la incendioj bruligitaj de niaj obusoj plenigadis la aeron per fumo, dum ĉio kriadis, sibladis kaj kraketadis ĉirkaŭ ni –, Zebedeus prenis min ĉe brako kun terura mieno, kriante:

“Venu!”

Kaj ni eniris en tiun domon, kies malsupra granda ĉambro, tute malluma, ĉar oni estis blindiginta la fenestrojn per sakoj plenaj je tero, jam estis plena je soldatoj. Malantaŭe oni ekvidis lignan, tre kurtan ŝtuparon, sur kiu fluis sango. Fusilpafoj ekiris de supre, kaj iliaj fulmoj montris de sekundo al sekundo, kiel kvin aŭ kvar de la niaj kiuj supreniris la ŝtuparon, falis malsupren kun pendantaj brakoj, kaj kiel aliaj pasis trans iliajn korpojn, bajoneton en la mano, por perforte penetri en la subtegmentojn.

Estis io horora, tiuj ĉi viroj kun siaj longaj lipharoj, brunaj vangoj, profundaj sulkoj pro furiozeco, kiuj volis supreniri per ĉiuj siaj fortoj. Vidante tion, mi ne scias, kiun rabio ekposedis min, kaj ekkriis:

“Antaŭen! Antaŭen!... Nenian kompaton!...”

Se mi estus troviĝinta apud la ŝtuparo, mi estus provinta supreniri kaj mortigi min. Feliĉe, ĉiuj havis la saman penson, neniu estus cedinta sian lokon. Maljunulo, tute kovrita per sango, supreniris sub la bajonetoj. Alveninte ĉe la subtegmentejo, li etendis siajn brakojn ellasante sian fusilon, kaj alkroĉis sin per ambaŭ brakoj je la balustrado. Du kugloj pafitaj de tre apude ne povis igi lin malsupreniri. Malantaŭ li tri aŭ kvar aliaj, kiuj renversis la aliajn por eniri la unuajn, ĵetis lin en la ĉambron, suprenirante la lastajn ŝtupojn.

Tiam ni aŭdis desupre bruegon, kiun oni ne povas imagi. La fusilpafoj rapide sekvis sin en tiu mallarĝa ĉambro. La paŝado kaj kriadado igis nin kredi, ke la domo disfalos, ke ĉio eks-plodos. Kaj aliaj ankoraŭ ĉiam supreniris! Kiam mi alvenis supre malantaŭ Zebedeus, la tuta ĉambro estis plena je mortigitaj kaj vunditaj, la fenestroj estis rompigitaj, la muroj kovritaj per sango. Eĉ ne unu pruso staris, kaj kvin aŭ ses

de la niaj tenis sin starantaj kontraŭ la mebloj, ridetante kaj rigardante kun sovaĝa mieno. Preskaŭ ĉiuj ili havis kuglojn en la korpo aŭ ricevis bajonetpikon, sed la plezuro de la venĝo estis pli forto ol la doloro. Kiam mi repensas pri tio, la haroj ankoraŭ hirtiĝas sur mia kapo.

Tuj kiam Zebedeus vidis, ke ĉiuj prusoj estis mortigitaj, li remalsupreniris, dirante al mi:

“Venu! Estas nenio plu farenda ĉi tie.”

Kaj ni eliris. Ekstere la kolono jam preteriris la preĝejon. Miloj da fusilpafoj kraketadis sur la ponto, kiel fajro en disfalanta lignokarbejo. La dua kolono, malsuprenirinte la ĉefstraton dekstre, aliĝis al ni. Intertempe unu el tiuj grandaj prusaj kolonoj, kiujn mi vidis sur la deklivo malantaŭ Ligny, malsupreniris por reĵeti nin el la vilaĝo. Tie ni renkontis nin unufoje amase Du staboficioj foriris tra la strato el kiu ni venis.

“Ili venigos kanonojn,” diris Zebedeus. “Kiam ni havos kanonojn ĉi tie, oni vidos, ĉu la prusoj povos forpeli nin.”

Li kuris, kaj mi sekvis lin.

La batalo apud la ponto ankoraŭ ĉiam daŭris. La malnova preĝejo sonis la kvinan. Ni jam ekstermis ĉiujn prusojn cis la roĝo, escepte de tiuj kiuj embuskis en la granda kaduka domo maldekstre de ni. Obusoj ekbruligis la supran parton, sed la fusilpafado daŭris malsupre. Necesus eviti tiun pasejon.

Antaŭ la preĝejo ni estis sufiĉe grandnombraj. Ni trovis la malvastan placon plena je trupoj, kiuj, la armilon sur la brako, estis pretaj marŝi. Alvenis ankoraŭ aliaj tra la ĉefa strato, kiu trairas Ligny en ĝia longeco. Unu sola kolonkapo restis engaĝita fronte al la malgranda ponto. La prusoj volis repuŝi ĝin. La laŭvicaj pafoj sekvis sin senĉese, kiel fluanta akvo. Sur la placo oni vidis tra la fumo nur bajonetojn, la fasadon de la preĝejo, la generalojn sur la perono donantajn siajn ordonojn, la forgalopantajn adjutantojn, kaj en la aero la malnovan turpinton kovritan per ardezoj, ĉirkaŭ kiu turniĝadis la korvoj, timigitaj de la bruoj.

La kanono de Saint-Amand ankoraŭ ĉiam tondris. Inter la pinjonoj maldekstre oni malkovris sur la deklivo grandajn blujajn liniojn kaj amasojn da kavalerio survoje apud Som-brefte por turnigi nin. Tie for, malantaŭ ni, estis luktataj bataloj per la blanka armilo inter prusaj ulanoj kaj niaj husaroj. Kiom da tiuj ulanoj etenditaj sur la ebenaĵo ni estis vidontaj la morgaŭon!

Nia bataliono, kiu suferis plej multe, pasis tiam en la duan linion. Ni tuj retrovis nian kompanion, kiun komandis kapitano Florentin. Ankaŭ kanonoj alvenis sur la sama vojo kiel ni. La ĉevaloj galopis ŝaŭmante kaj skuante la kapojn kvazaŭ furiozaj. La kanonoj kaj la municicaroj frakasis ĉion, sed meze de la

⁶⁹ “Nenian kompaton!”

kanonpafado kaj kraketado de la fusiloj oni aŭdis nenion. Ĉiuj soldatoj kriadis, kelkaj kantadis, la manon supren kaj la fusilon sur la ŝultro, sed oni vidis nur ilian malfermitajn buŝojn.

Mi estis repreninta mian lokon apud Buche, kaj mi komencis respiri, kiam subite ĉio ekmoviĝis. Ĉi-foje ni devis transiri la rojon kaj reĵeti la prusojn el Ligny, resupreniri la deklivon malantaŭ ilin kaj tranĉi ilian armeon en du. Tiam la batalo estus ganjnita! Ĉiuj komprenis tion, sed pro la amaso da trupoj kiun ili tenis en rezervo, tio ne estis facila afero!

Ĉio marŝis por ataki la ponton. Oni vidis nur kvin aŭ ses virojn antaŭ si. Mi estis kontenta, scii, ke la kolono etendiĝis tre for antaŭen. Kio faris al mi grandan plezuron, estis, ke meze de la strato, antaŭ garbejo kies pordo estis rompatita, kapitano Florentin haltigis la kompanion, kaj ke la resto de la bataliono estis postenigita en la dunone detuitaj domoj por subteni la atakkolonon, tirante tra la fenestroj.

Ni estis dek kvin viroj en la garbejo, kie mi vidis skalon, suprenirantan tra kvadrata truo, du aŭ tri mortigitajn prusojn kontraŭ la muroj, la malnovan pordon truitan per kuglojn kaj pendantan de nur unu el siaj hokingoj, mansardlukon elirantan sur alian straton malantaŭe. Zebedeus komandis nian postenon. Leŭtenanto Bretonville establis sin kun alia pelotono en la kontraŭan domon, kapitano Florentin aliloke.

La unuan aferon kiun ni provis fari, estis restarigi kaj plifortigi la pordon. Sed ni apenaŭ komencis tiun laboron, oni aŭdis sur la strato teruran frakoson: muroj, fenestroviroj, tegoloj, ĉio estis forblovitaj per unu pafo. Du viroj kiuj estis restintaj ekstere por subteni la pordon, falis kiel falĉitaj. Samtempe en la malproksimo apud la rojo la paŝoj de retiri-ĝanta kolono komencis rulbati sur la ponto, dum kelkdeko da tiuj pafoj zumis tra la aero kaj igis nin retropaŝi kontraŭvole. Estis ses kano-noj ŝargitaj per mitralo, kiujn Blücher maskis fine de la strato kaj kiuj komencis pafi.

La tuta kolono, tamburistoj, soldatoj, oficiroj, piede aŭ surĉevalo, repasis puŝante kaj renversante unuj la aliajn kvazaŭ vera orkano. Neniu rigardis malantaŭen. Ĉiuj tiuj kiuj falis, pereis. Apenaŭ la lastaj preterpasis nian pordon, Zebedeus klinis sin eksteren por vidi, kio pasas, kaj en la sama sekundo li kriis per terura voĉo:

“La prusoj!”

Li pafis. Pluraj el la niaj jam estis ĉe la skalo, sed antaŭ ol ili ekhavis la penson surgrimpi ĝin, la prusoj alvenis. Zebedeus, Buche kaj ĉiuj kiuj ne havis la tempon grimpi supren, repuŝis ilin per siaj bajonetoj. Ŝajnas al mi, ke mi ankoraŭ

vidas tiujn prusojn kun iliaj longaj lipharoj, ruĝaj vizaĝoj kaj plataj ĉakoj, kiuj estis furiozaj, ĉar oni haltigis ilin. Mi neniam vidis tian kolizion. Zebedeus ekkriis: “Nenia kompa-to!” kvazaŭ ni estus la pli fortaj. Tuj li ricevis baton sur la kapo kaj falis.

Mi vidis, ke li estis masakrota, kaj tio turnis al mi la koron. Mi eliris, kriante: “Bajonetojn!” kaj ĉiuj kune ni falis sur la friponojn, dum la kamaradoj pafis de la grenejo, kaj ke de la kontraŭaj domoj komencis fusilpafado.

Tiuj prusoj tiam retiriĝis, sed de pli fore venis tuta bataliono. Buche prenis Zebedeus sur la ŝultroj kaj supreniris. Ni ne havis la tempon sekvi lin kaj kriis:

“Rapidul!”

Ni helpis lin grimpi per ĉiuj niaj fortoj. Mi estis la antaŭlasta. Mi kredis, ke tiu skalo neniam finos, ĉar la fusilpafoj jam resonis en la garbejo. Finfine ni alvenis supre. Ni ĉiuj havis la saman ideon: retiri la skalon, sed tiam okazis io terurega! Tirante la skalon inter la fusilpafoj, kiuj venis de malsupre, kaj kiuj trairis la kapon de unu el niaj kamaradoj, ni konsciigis, ke ĝi estas tro longa por povi eniri en la grenejon. Tio tute paligis nin. Zebedeus, vekiginte, diris al ni:

“Metu do fusilon inter la ŝtupojn!”

Kaj tiu ideo ŝajnis al ni desupra inspiro.

Sed oni devis aŭdi la bruegon malsupre. La tuta strato estis plena je prusoj, ankaŭ nia garbejo. Tiu viroj ne plu mastris sin pri rabio. Ili estis ankoraŭ pli furiozaj ol ni kaj senĉese ripetis:

“Neniajn kaptitojn!”

Niaj fusilpafoj indignigis ilin. Ili batrompis la pordojn, kaj oni aŭdis la batalojn en la domoj, la blasfemojn en la franca kaj germana, la ordonojn de leŭtenanto Bretonville fronte al ni, tiujn de la prusaj oficiroj ordonante serĉi pajlon por bruligi la domojn. Feliĉe la rikolto ankoraŭ ne estis okazinta. Se ne, ili estus bruligintaj nin vivaj.

Oni pafis en nian plankon, sed feliĉe ĝi konsistis el dikaj kverkaj tabuloj, en kiuj la kugloj batiĝis kiel martelfrapoj. Ni, unuj post la aliaj, daŭrigis nian pafadon al la strato. Ĉiu pafo alvenis.

Ŝajnis, ke la prusoj reprenis la preĝejan placon, ĉar ni aŭdis la pafojn de la niaj nur de sufiĉe fore. Ni estis solaj, ducent ĝis tricent viroj, meze de tri aŭ kvar mil prusoj. Tiam mi ekkriis en mi mem:

“Jen via fino, Josef! Nenia vi povos eskapi de ĉi tie. Estas neeble!”

Kaj mi eĉ ne kuraĝis pensi pri Trinel. Mi koro tremis. Ni jam ne povis retiriĝi: la prusoj tenis ambaŭ finojn de la strato kaj la stratetojn malantaŭe. Ili jam reprenis kelkajn domojn. Sed ĉio silentis... Ili preparis ion: il sendube serĉis fojnon, pajlon, branĉofaskojn, aŭ ili antaŭenigis siajn kanonojn por neniigi nin.

Niaj fusilistoj rigardis tra la fendoj en la planko, sed vidis nenion: la garbejo estis malplena. Tiu silento apud ni estis pli terura ol la tumulto de antaŭ nelonge.

Zebedeus restariĝis, dum sango fluis el lia nazo kaj buŝo

“Atentu!” li diris. “Ni tuj vidos alveni atakon. La friponoj pretigas sin.”

Li apenaŭ povis diri tiun vortojn, la tuta domo, de la pinjonoj ĝis la fundamentoj, skuiĝis, kvazaŭ ĉio estus malaperonta sub la tero. La traboj, la latoj, la ardezoj, ĉio mal-supreniris en tiu skuiĝo, dum ruĝa flamo supreniris de malsupre sub niaj piedoj ĝis super la tegmento.

Ni ĉiuj renversiĝis. Bruligita bombo, kiun la prusoj rulis ĝis en la garbejo, ĵus eksplodis.

Reekstarinte, mi aŭdis daŭran sibladon en miaj oreloj, sed tio ne malhelpis min vidi, ke oni metis skalon kontraŭ nia mansardluko, kaj Buche, kiu donis terurajn bajonetpikojn tra ĝi. La prusoj volis profiti de nia surprizo por supreniri kaj masakri nin ĉiujn. Tiu vidaĵo donis al mi tremetojn, kaj mi tuj kuris helpi Buche. Tiuj el la kamaradoj kiuj ne estis mortigitaj, ankaŭ alkuris, kriante:

“Vivu la Imperiestro!”

Mi, se tiel diri, aŭdis nenion plu, sed la bruego estis terura, kaj la pafado de malsupre kaj tiu tra la fenestroj prilumis la tutan straton, kiel promenantaj flamoj. Ni renversis la skalon, kaj ni estis ankoraŭ ses: du antaŭe, kiuj pafis, kvar malantaŭe, kiuj ŝargis kaj transdonis al ili la fusilojn.

En tiu ekstrema situacio, mi restis trankvila, ĉar mi resignaciis en mia malfeliĉo, pensante: “Provu konservi vian vivon!”

La aliaj sendube pensis la samon, kaj ni kaŭzis grandan buĉadon.

Tiu granda premo daŭris pli ol kvaronhoron. Tiam kanono komencis tondri, kaj kelkajn sekundojn poste la kamaradoj antaŭe kliniĝis ĉe la fenestro, ĉesante pafi.

Mia kartoĉujo estis preskaŭ malplena, kaj mi iris preni kartoĉojn de miaj mortigitaj kamaradoj, kiam mi aŭdis kriadi: *“Vivu la Imperiestro!”* La krioj proksimiĝis: tuj la kapo de nia kolono, la flagon tute nigra kaj disŝirita, aperis sur la malvasta placo en eniris nian straton

La prusoj retiriĝis. Ni ĉiuj volus malsupreniri, sed du- aŭ trifoje nia kolono devis halti pro la mitralo de la malamiko. La krioj kaj la kano-nado denove konfuziĝis. Zebedeus, kiu rigardis eksteren, fine kuris malsupreniri la skalon. Nia kolono preteriris nian garbejon, kaj ni malsupreniris laŭvice, sen rigardi la kamaradojn, dispecigitajn per la bombo, inter kiuj pluraj petegis nin per disŝiranta voĉo kunporti ilin.

Sed tiaj estas la homoj: la timo esti kaptitaj, faras el ili barbarojn!

Post tiom da tempo mi ankoraŭ memoras tiujn abomenajn scenojn. Kaj mi donus ĉion por esti havinta koron, humanecon: sed estas tro malfrue.

XX

Tiel ni estis nur ses kiuj eliris el tiu garbejo, en kiun ni eniris dek kvin nur horon antaŭe. Buche kaj Zebedeus estis en la nombro de la transvivantoj. La falsburganoj do havis bonŝancon.

Elirinte, ni denove devis sekvi la atakon.

Ni antaŭeniris trans stakojn da mortigitaj: ĉio estis mola sub niaj piedoj. Oni ne rigardis por vidi, ĉu oni marŝis sur la vizaĝo de vundito, sur lia brusto aŭ aliaj korpopartoj. Oni antaŭeniris. La morgaŭon ni eksciis, ke tiu amaso da prusoj sur la strato de la Ponteto estis mitralitaj de kelkaj kanonoj antaŭ la preĝejo: la obestineco de tiuj viroj kaŭzis ilian morton.

Blücher atendis nur la momenton fari la samon al ni, sed anstataŭ transiri la ponton oni igis nin deturniĝi dekstren kaj okupi la domojn laŭlonge de la rivero. La prusoj pafis al ni el ĉiuj kontraŭaj fenestroj. Post kiam ni embus-kiĝis en la domoj, ni komencis pafi al iliaj kanonoj, kio devigis ilin retiriĝi.

Oni jam parolis pri atako kontraŭ la alia parto de la vilaĝo, kiam la famo kuris, ke prusa kolono de dek kvin ĝis dudek mil viroj alvenas de Charleroi por ataki nin de malantaŭe. Neniu komprenis tion. Ni balais ĉion ekde la bordoj de Sambro. Tiu kolono, kiu estis falonta sur nian dorson, estis do kaŝita en la arbaro.

Povis esti la sesa kaj duono, kiam la batalo apud Saint-Amand ŝajnis disvastiĝi: Blücher sendis tien ĉiujn siajn trupojn. Tio estis la bona momento kapti la alian parton de la vilaĝo, sed tiu kolono devigis nin atendi.

La vicoj de domoj je ambaŭ flankoj de la rojo estis plenaj je trupoj: dekstre la francoj, maldekstre la prusoj. La pafado estis ĉesinta, kvankam oni aŭdis ankoraŭ kelkajn pafojn, sed tiuj ĉi estis celitaj pafoj. Ni observis nin reciproke kvazaŭ por diri:

“Ni respiru iomete. Baldaŭ ni rekomencos batali.”

La prusoj en la kontraŭaj domoj kun siaj bluaj vestaĵoj, ledaj ĉakoj, siaj supren kurbitaj lipharoj, estis ĉiuj solidaj viroj, maljunaj soldatoj kun kvadrataj mentonoj kaj la oreloj forsta-rantaj de la kapo. Oni dirus, ke ili estas renversontaj nin per unu bato. Ankaŭ la oficiroj rigardis.

Laŭlonge de ambaŭ stratoj kiuj sekvis la rojon, kaj en la rojo mem, la mortigitaj formis nur du longajn vicojn. Granda nombro sidis kun la

dorso kontraŭ la muro: tiuj, danĝere vunditaj dum la batalo, havis ankoraŭ la forton retiriĝi el la batalo. Ili estis rampintaj al la muro, kie sangoperdo igis ilin morti. En la roĝo pluraj restis starantaj, la manojn alkroĉigintajn je la bordo kvazaŭ por elgrimpi, sed ili jam ne moviĝis. Kaj en la mallumaj anguloj, en kiujn apenaŭ penetris la sunradioj, oni ankaŭ vidis malfeliĉulojn frakasitajn sub la rubo, ŝtonoj kaj traboj transverse sur la korpoj.

La batalo en Saint-Amand fariĝis pli kaj pli terura, la kanonpafoj en ambaŭ flankoj ŝajnis leviĝi unuj super la aliajn, kaj, se ni ĉiuj ne alfrontus la morton, ni certe ne povus malhelpi nin admiri tiun grandiozan bruegadon.

Ĉe ĉiu tondro centoj da viroj mortis, kaj tio ne estis interrompita. La tero senĉese tremadis.

Ni respiris, sed baldaŭ ni sentis eksterordinaran soifon. Batalante neniu sentis tiun teruran soifon. Sed poste ĉiuj volis trinki.

Nia domo konsistigis la stratangulon maldekstre de la ponto, kaj la malmulte da akvo kiu fluis sur la koto estas ruĝa pro sango. Sed inter nia domo kaj la najbara, meze de malgranda ĝardeno, troviĝis puto por akvumi la florojn. Ni ĉiuj rigardis tiun puton kun ĝia ŝtona rando kaj ĝiaj du lignaj fostoj. Malgraŭ la mitralo la siteloj ankoraŭ pendis je la ĉeno. Tri viroj, la vizaĝon surtere kaj la manojn antaŭen, kuŝis sur la pado kiu kondukis al tiu loko. Ili sendube ankaŭ volis trinki, sed la prusoj mortigis ilin.

Ni staris do ĉiuj, la armilon ĉepiede, rigardante la puton. Tiam iu diris:

“Mi donus la duonon de mia sango por glaso da akvo.”

Alia:

“Jes, sed la prusoj atendas. Ili certe ne permesos tion”

Estis vere. La prusoj, je cent paŝoj de ni, kaj kiuj eble ankaŭ soifis, divenis, kion ni pensis. La pafoj kiujn oni ankoraŭ tiris, venis de tie: kiam laŭlonge de la strato iu eliris, oni tuj pafis al li, kaj tiel ni suferigis nin reciproke, sentante nin ĉiujn malfeliĉaj.

Tio daŭris almenaŭ duonhoron, kiam kano-nado ekaŭdiĝis inter Saint-Amand kaj Ligny, kaj ni tuj vidis, ke oni pafis per mitralo al la prusoj de la deklivo duonvoje inter ambaŭ vilaĝoj, ĉar ĉiu malŝargo trairis iliajn densajn kolonojn. Tiu nova atako kaŭzis grandan ekscitiĝon. Buche, kiu ne moviĝis ĝis tiu momento, ekiris tra la strateto al la ĝardeno kaj kuris al la puto. Il metis sin malantaŭ la putrandon, kaj la du kontraŭsituantaj domoj komencis pafi al li, tiel ke baldaŭ la rando kaj la siteloj estis truitaj per kugloj. Sed tiam ni komencis pafi al la fenestroj, kaj minuton poste la fusilado prilumis la tutan vilaĝon de unu fino al la alia. Fumo disvastiĝis ĉie.

En tiu momento voĉo kriis de malsupre:

“Josef!... Josef!...”

Estis Buche. Li havis la kuraĝon tiri supren plenan sitelon, malkroĉi ĝin kaj veni kun ĝi, post kiam li mem trinkis.

Pluraj maljunuloj volis forpreni de li la sitelon, sed li kriis:

“Unue mia kamarado Josef! Delasu, se ne mi elverŝos la tutan akvon!”

Necesis do atendi min. Mi trinkis tiom kiom mi povis. Post tio la aliaj, kaj tiuj kiuj restis supre malsupreniris kaj trinkis tiom kiom restis.

En tiu momento Buche montris, ke li estas kuraĝa viro kaj amas min kvazaŭ fraton.

Ni resupreniris kune tre kontentaj. Mi pensas, ke tiam estis la sepa vespere. La suno estis subiranta, la ombro de niaj domoj plilongiĝis ĝis sur la roĝo. Tiuj de la prusoj restis priluma-taj, same kiel la deklivo de Brye, de kiu novaj trupoj malsupreniris rapidpaŝe. La kanonado neniam estis tiel forta je nia flanko.

Hodiaŭ ĉiuj scias, ke inter la sepa kaj la oka vespere, ĉe la noktiĝo, la imperiestro, rekonnante, ke la prusa kolono kiun oni rimarkis malantaŭ ni, estis la korpuso de generalo d'Erlons, vaganta inter la batalo de Ney en Quatre-Bras kontraŭ la angloj, kaj la nia, tuj ordonis la malnova gvardio subteni nin.

La leŭtenanto, kiu estis kun ni, diris:

“Jen granda atako. Atentu!”

La tuta prusa kavalerio svarmis inter la du vilaĝoj. Oni sentis, sen vidi ĝin, grandan moviĝon malantaŭ ni. La leŭtenanto ripetis:

“Atentu la ordonon!” Ke neniu restu post la ordono. Jen la atako.”

Ni bone malfermis la okulojn. Ju pli noktiĝis, des pli la ĉielo ruĝiĝis super Saint-Armand. Aŭdante la kanonadon, ni jam ne atentis pri tio, sed oni povas diri, ke ĉe ĉiu malŝargo, la ĉielo ekbrulis.

La tumulto kreskadis malantaŭ ni.

Subite la granda strato kiu laŭiras la rojon, estis plenigita de niaj trupoj ekde la ponto ĝis la alia fino apud Ligny. Maldekstre kaj ankoraŭ pli fore la prusoj pafis el la fenestroj. Ni jam ne respondis. Oni nur kriadis:

“La gvardio!... La gvardio!...”

Mi ne scias, kiel tiu tuta amaso da viroj trapasis la fosajon plenan je koto. Certe sur tabuloj, ĉar de unu momento al la alia niaj trupoj troviĝis amase sur la maldekstra bordo.

La granda prusa baterio supre de la ravino, inter la du vilaĝoj, faris stratojn tra niaj kolonoj, sed ili tuj densiĝis kaj ĉiam supreniris.

Ĉio kio ankoraŭ restis de nia divizio kuris trans la ponton. Surĉevalaj kanonistoj sekvis ĝin en galopo kun siaj kanonoj.

Tiam ankaŭ ni malsupreniris, sed ni ankoraŭ ne atingis la ponton, kiam nia kirasuloj komencis defili. Malantaŭ la kirasuloj alvenis la

dragonoj kaj surĉevalaj grenadistoj de la gvardio. Ĉie ili pasadis, tra kaj eĉ ĉirkaŭ la vilaĝon: estis kvazaŭ tute nova, sennombra armeo.

La masakrado komenciĝis supre. Ĉi-foje estis batalo en malferma kamparo. Noktiĝis, kaj la prusaj kvadratoj profiliĝis sur la deklivo kontraŭ la fajro de la pafado.

Ni kuradis, transpaŝante la mortigojn kaj vunditojn. Alveninte ekster la vilaĝo, ni vidis, kion oni povas nomi batalon inter kavalerioj. Oni distingis, se tiel diri, nur la blankajn kira-sojn, kiuj tragalopadis la liniojn de la prusaj ulanoj... Ĉio intermiksiĝis. Tiam la kirasuloj regroupiĝis kaj ekiris kvazaŭ muro.

Jam estis mallume, la amaso de fumo malhelpis vidi je kvindek paŝoj antaŭ si. Ĉio foriris, ĉio supreniris al la muelejoj. La bruo de la galopado, la krioj, la ordonoj, la malproksima vicpafado, ĉio kunfandiĝis. Pluraj kvadratoj estis rompitaĵoj. De tempo al tempo fusilpafo montris al ni kelkajn kavalerianojn aŭ lancistojn kurbiĝintaj sur sia ĉevalo, kirasulon kun lia granda blanka dorso, lia kasko kun flirtantaj ĉevalvostoj, lanĉita kiel kuglo, du aŭ tri infanterianojn kurantaj meze de la batalo: tio pasis kvazaŭ fulmo! Kaj la prempatigita greno, la pluvo kiu striis la ĉielon, ĉar fulmotondro ĵus ektondis, la vunditoj sub la ĉevalpiedo, ĉio eliris el la nokto dum kvarono de sekundo.

Ĉe ĉiu fusil- aŭ pistolpafo oni vidis tiajn aferojn je miloj kaj miloj, kiujn oni ne povas ekspliki al si. Sed ĉio supreniris, ĉio foriĝis de Ligny. Ni estis la mastroj, ni rompis la centron de la malamiko. La prusoj jam defendis sin nur sur la supro de la monteto, apud la muelejoj kaj en la direkto de Sombrefe, je nia dekstra flanko: Saint-Amand kaj Ligny restis al ni.

Tiam ni, dek aŭ dek du de la kompanio, kontraŭ la ruinoj de la domoj, la kartoĉujon preskaŭ malplena, jam ne sciis en kiu direkto turniĝi. Zebedeus, leŭtenanto Bretonville kaj kapitano Florentin malaperis. Serĝento Rabot komandis nin. Li estis malgranda maljunulo, maldika, malbonstatura, sed malmola kiel fero. Li okulumis kaj estis sendube rufa dum sia junaĝo. Nur parolante pri li, mi ankoraŭ aŭdas lin trankvile diri:

“La batalo estas gajnita! Kolonkapo dekstren, antaŭen, marŝ!”

Pluraj petis povi kuiri supon, ĉar jam de dekdu horoj oni sentis malsaton. Kaj la serĝento, la fusilon sur la ŝultro, malsupreniris laŭ la strateto, mallaŭte ridante kaj moke ripetante:

“Supon! Supon! Atendu, la administracio de la vivrimedoj baldaŭ venos.”

Ni sekvis lin tra la malluma strateto. Proksimume en la mezo troviĝis surĉevala kirasulo, kiu turnis al ni la dorson. Li ricevis sabropikon en la ventro kaj retiriĝis tien. La

ĉevalo apogis sin kontraŭ muron por malhelpi lin fali. Dum ni preteriris, li vokis nin:

“Kamaradoj!”

Neniu eĉ nur turnis la kapon. Dudek paŝojn pli malproksime troviĝis malnova domaĉo, tute truita per kugloj, sed ĝi havis ankoraŭ la duonon de sia pajltegmento. Tial serĝento Rabot elektis ĝin, kaj ni eniris envice en tiun reduton.

Oni ne vidis tie pli ol en forno. La serĝento eksplodigis prajmon, kaj ni vidis, ke estas kuirejo: la fajrejo dekstre, la ŝtuparo maldekstre, kaj kvin aŭ ses prusoj kaj francoj kuŝantaj surteren, blankaj kiel vakso, la okulojn malfermitaj.

“Nu,” diris la serĝento, “jen via ĉambro. Ĉiu aranĝu sin, kiel li povas. La litkamaradoj ne donos al vi piedfrapojn.”

Ĉar ni vidis, ke ni devas kalkuli je la distribuoservo, ĉiuj senparole malbukis sian sakon, metis ĝin ĉepieden de muro kaj kuŝiĝis, la orelon sur la sako. Oni ankoraŭ aŭdis la pafadon, sed tre malproksime sur la deklivo. La pluvo falis torente. La serĝento fermis la pordon, kiu grinĉis, tiam trankvile ekbruligis sian pipon, dum multaj jam ronkis. Mi vidis lin staranta antaŭ malgranda fenestro, kies vitroj estis ĉiuj rompitaĵoj. Li fumis.

Serĝento Rabot estis malmola, sed justa viro. Li havis tri galonojn kaj sciis skribi kaj legi. Li estus devinta fariĝi oficiro, havante vundojn, sed lia korpo estis malbone konstruita. Finfine li ankaŭ kuŝiĝis, kaj baldaŭ poste ni ĉiuj dormis.

Tio daŭris jam longe, kiam mi estis vekita de bruo... lu vagis ĉirkaŭ nian domaĉon. Mi rektiĝis sur miaj manoj por aŭskulti. En la sama momento oni provis malfermi la pordon. Tiam mi ne povis retenigi kion.

“Kio estas?” demandis la serĝento.

Kaj ĉar paŝoj foriĝis kurante, li diris, turnante sin sur sia sako:

“Aĥ! Tiuj noktobirdoj! Ek, kanajloj! For, se ne mi sendos al vi kelkajn kuglojn!”

Tiam li diris nenion plu. Mi proksimiĝis al la fenestro kaj mi vidis tute laŭlonge de la strateto marodantojn traserĉantaj la vunditojn kaj mortigojn. Mallaŭte ili iris de unu al la alia, dum la pluvo falis torente: estis io horora.

Mi tamen rekuŝiĝis kaj tuj reendormiĝis pro la granda laceco.

Ĉe la aŭroro la serĝento jam estis ekstarinta kaj kriis:

“Ni ekiros!”

Ni reeliris la domaĉon kaj reiris tra la strateto. La kirasulo kuŝis surtere, kaj la ĉevalo ĉiam ankoraŭ atendis. La serĝento prenis la ĉevalo ĉe la brido kaj kondukis ĝin kelkcent paŝojn al fruktarbaro, reitiris ĝian buŝaĵon kaj diris:

“Iru, manĝu: oni baldaŭ retrovos vin.”

Kaj la povra besto malrapide foriris.

Ni plirapidigis la paŝojn sur pado kiu iris laŭlonge de Ligny: la sulkoj kaj kelkaj ĝardenaj kvadratoj finiĝis ĉe tiu ĉi vojeto. La serĝento rigardis ilin preterpasante kaj klinis sin por elterigi kelkajn restaĵojn de karotoj kaj napoj. Mi imitis lin, dum la kamaradoj rapidis sen turni la kapon. Mi vidis tie, ke estas bona afero koni la fruktojn de la tero, ĉar mi trovis du belajn napojn kaj kelkajn karotojn, kiuj, krudaj, estas tre bongustaj. Kaj mi sekvis la ekzemplon de la serĝento, metante ilin en mian ĉakon.

Mi tiam kuris por reatingi la pelotonon, kiu direktis sin al la fajroj de Sombreffe. Cetere mi eĉ ne havas la ideon priskribi al vi la alt-ebenaĵon malantaŭ Ligny, kie niaj kirasuloj kaj dragonoj masakris ĉion. Estis nur stakoj da homoj kaj ĉevaloj: la ĉevaloj kun siaj longaj koloj etendiĝintaj surtere, la homoj kuŝantaj sub ili mortigitaj aŭ vunditaj. Kelkaj levis manon por fari al ni signon. La ĉevaloj provis ekstari, sed refalis frakasante ilin ankoraŭ pli.

Sango! Ĉie sango! La direkto de la kanon-kugloj kaj mitralo estis markita per ruĝa fumo sur la deklivoj, kiel oni vidas ĉe ni la fluadon de la akvo tra la sablo kiam fandiĝas la neĝo. Nu, ĉu vi volas koni la veron? Tio preskaŭ ne tuŝis min.

Antaŭe, antaŭ ol mi foriris al Lutzen, tia spektaklo estus renversinta min. Mi estus pensinta:

“Niaj mastroj rigardas do homojn kiel bestojn! Kial la bona Dio permesas, ke ili donas nin kiel nutraĵon al la lupoj? Ĉu ni ne havas patrinojn, fratinojn, amikojn, estaĵojn sur la tero kiuj amas nin kaj kiuj krias, postulante venĝon?”

Mi estus pensinta mil aliajn aferojn, ankoraŭ pli justajn kaj fortajn. Sed tiam mi pensis nenion. La imperiestro estas la plej forta, il signas nin veni, kaj malgraŭ ĉio necesas veni de Falsburgo, Saverne aŭ aliloke, meti sin en vicojn kaj marŝi. Tiuj kiuj montras reziston nur per la mieno, estas tuj ekzekutitaj. La marŝaloj, la generaloj, la oficiroj, la suboficiroj kaj la soldatoj, de la unua ĝis la lasta, sekvas la instrukciojn. Ili ne aŭdacas fari movon sen ordono, kaj la aliaj obeas al la armeo. Nur la imperiestro ordonas ĉion, rajtas fari ĉion kaj faras ĉion. Nu, ĉu Josef Seitz ne estus besto, se li ne kuraĝus nur kredi, ke la imperiestro povas erari unufoje en sia vivo? Ĉu tio ne estus kontraŭa al la prudento?

Jen kion ni ĉiuj pensis, kaj se la imperiestro estus restinta, la tuta Francio ne havus alian ideon hodiaŭ.

Mia sola plezuro estis havi karotojn kaj napojn en mia ĉako, ĉar proksimiĝante de malantaŭe al la bivakoj por demandi la lokon de nia bataliono, ni eksciis, ke la distribuo de nutraĵo ne estis farita. Oni nur ricevis la porcion da brando kaj da kartoĉoj.

La maljunuloj estis forirantaj por plenigi la marmitojn. La rekrutoj ankoraŭ ne sciis, kiel oni vivas en la kamparo, kaj kiuj malfeliĉe jam manĝis sian panon, kiel tio okazas, kiam oni estas dudekjara, kiam oni marŝadas kaj havas bonan apetiton, tiuj ne povis trempi la kuleron.

Je la sepa ni fine alvenis ĉe nia bivako. Zebedeus, vidante min, ŝajnis ĝoji. Li venis renkonte al mi kaj diris:

“Mi estas kontenta revidi vin, Josef. Sed kion vi alportas? Ni trovis grasegan kapridon. Ni ankaŭ havas salon, sed nenian kruston da pano.”

Mi montris al li la rizon kiu restis al mi, miajn karotojn kaj napojn. Li diris:

“Estas bone: ni kuiras la plej bonan buljonon de la bataliono.”

Mi volis, ke ankaŭ Buche manĝu kun ni, kaj la ses viroj de nia marmito, kiuj hazarde ĉiuj eskapis vivaj el la batalo, ricevante nur kolbobatojn kaj skrapvundojn, konsentis. La ĉeftamburisto Padoue diris riante:

“La maljunuloj ĉiam estos la maljunuloj, ili neniam revenas, la manojn malplenaj.”

Ni rigardis flanken al la marmito de kvin rekrutoj, kie oni vidis boli nur rizon en klara akvo, kaj ni okulumis unuj al la aliaj, ĉar ni havis bonan grasan supon, kiu disvastigis sian bonan odoron en la ĉirkaŭaĵo.

Je la oka ni manĝis kun granda apetito, kion oni povas imagi. Ne, eĉ ne la tagon de mia edziĝo mi havis pli bonan manĝon. Pensi pri tio ĝojigas min ankoraŭ hodiaŭ. Kiam venas maljuneco, oni jam ne havas la entuziasmon de la juneco por tiaj aferoj, sed ĉiam restas agrablaj memoraĵoj. Kaj tiu bona manĝo longe subtenis nin. La povraj rekrutoj, kun sia resto da pano trempita kiel pasto de la pluvado, estis devontaj vidi durajn momentojn la morgaŭon 18-an de junio, ĉar ni estis havontaj tre mal-longan sed teruregan militiron. Nun ĉio estas pasinta, sed ne sen emocio mi pensas pri tiu granda mizero, kaj mi dankas Dion pro tio, ke mi eskapis el ĉio viva.

La vetero ŝajnis refariĝi bela, la suno rekomencis brili inter la nuboj. Ni apenaŭ finis manĝi, oni batis la rekolektiĝon laŭlonge de la tuta linio.

Estas necese scii, ke la prusoj retiris en tiu momento sian ariegardon el Sombreffe, kaj ke oni parolis pri la ebleco persekuti ilin. Pluraj eĉ diris, ke oni devus komenci per tio, sendante tre foren nian leĝeran kavalerion por rikolti kaptitojn. Sed oni ne aŭskultis ilin. La imperiestro bone sciis, kion li faras.

Mi tamen rememoras, ke ĉiuj miris pri tio, ĉar estas la kutimo profiti de venko. La maljunuloj neniam vidis tion. Oni kredis, ke la imperiestro preparas grandan baton, ke li igis turniĝi la malamikon fare de Ney, kaj aliajn similajn aferojn.

Intertempe la apelo komenciĝis. Generalo Gérard venis revui la 4-an korpuson. Nia bataliono estis suferinta plej multe pro la tri atakoj, dum kiuj ni ĉiam estis la kapo de la armeo. Komandanto Gémeau kaj kapitano Vidal estis vunditaj, la kapitanoj Grégoire kaj Vignot mortigitaj, sep leŭtenantoj kaj subleŭtenantoj kaj tricent sesdek viroj malkapablitaj batali.

Zebedeus diris, ke estis pli malbone ol en Montmirail, kaj ke oni certe kompletigos nin antaŭ ol ekiri.

Feliĉe la kvara bataliono komandata de komandanto Delong, alveninta de Metz, venis tiam anstataŭi nin en la linio.

Kapitano Florentin, kiu komandis nin, kriis:

“Kolonkapo maldekstren!” Kaj ni malsupreniris al la vilaĝo ĝis apud la preĝejo, kie staris granda nombro da ĉaroj.

Oni dividis nin en rotojn por gardi la evakudadon de la vunditoj. Kelkaj taĉmentoj da ĉasistoj ricevis la ordonon eskorti la konvojojn ĝis Fleurus, ĉar en Ligny mankis la loko. La preĝejo jam estis plena je malfeliĉuloj.

Ne ni elektis la vunditojn, sed la armeĥirurgoj kaj kelkaj tieaj kuracistoj, kiujn oni rekviziciis. Estis tro malfacile rekoni grandan nombron de tiuj vunditoj inter la mortigitoj. Ni nur helpis meti ilin sur pajlon en la ĉaroj.

Mi jam konatiĝis kun tio en Lutzen. Mi sciis, kiom oni devas suferi por eskapi al kuglo, mitralero aŭ sabropiko, kia ĝin donas unu el niaj kirasuloj. Ĉiufoje kiam mi vidis, kiel oni delevas unu el tiuj malfeliĉuloj, mi laŭdis la Sinjoron pro tio, ke Li ne metis min en tian situacion, kaj, pensante, ke la sama afero povus okazi al mi, mi diris al mi: “Vi ne scias, kiom da kugloj kaj mitraleroj pasis preter vin. Se vi sciis, vi hororus.”

Mi miris, ke tiom da viroj inter ni povis eskapi al tiu buĉado, multe pli terura ol apud Lutzen kaj Leipzig, ĉar la batalo daŭris nur kvin horojn kaj la stakoj de la mortigitoj estis ĝis du aŭ tri futoj altaj. Sango fluis sur la tero kiel rojetoj. Sur la tuta granda strato, kie pasis la kanonoj, la koto estis ruĝa: koto el karno kaj frakasitaj ostoj.

Necesas diri tion por informi la junulojn. Mi ne plu batalos, mi estas tro maljuna, danke al Dio! Sed ĉiuj tiuj junuloj kiuj pensas nur pri milito anstataŭ voli honeste labori kaj helpi siajn maljunajn gepatrojn, kriante dum ili foriĝas: “Mi foriras... Mi revenos kun kruco kaj epoletoj!” Ili devas scii, kiel la homoj estas traktataj dum milito. Ili devas imagi, kion pensas tiuj malfeliĉuloj, kiuj plenumis sian devon, kiam ili kuŝas sur strato aŭ ĉerande de ŝoseo kun mankanta korp parto kaj aŭdas alveni tiujn kanonojn, kiuj pezas de sescent ĝis sepcent kilogramojn kaj iliaj dikaj hufferitaj ĉevaloj, kiuj saltadas henante.

En tiu momento ili devus vidi tiujn povrajn maljunulojn, kiam ili mem aŭdas kraki siajn ostojn, kiam la kanonoj kaj municiaĉaroj kun siaj ŝarĝoj de obusoj kaj kugloj pasas sur ilia korpo kvazaŭ tra koto...

Kiam oni estas maljuna kaj havas infanojn, kiujn oni amas, estas abomene pensi, ke tiaj malfeliĉoj povus okazi al ili, kaj oni donus sian lastan ĉemizon por malhelpi ilin foriri.

Sed ĉio tio servas al nenio: la malbonaj koroj estas neplibonigeblaj, kaj la bonaj faras sian devon. Se okazas al ili malfeliĉoj, almenaŭ restas al ili la fido al la justeco de Dio. Tiuj ĉi ne mortigas siajn similulojn pro la amo al gloro, ili batalas, ĉar oni devigas ilin. Ili ne estas riproĉendaj: ili defendas sian vivon, kaj la verŝita sango ne kulpigas ilin.

Fine, necesas tamen, ke mi finus la rakonton pri tiu batalo kaj la delevo de la vunditoj. Mi tie vidis aferojn kiujn oni povas apenaŭ kredi: viroj mortigitaj en la momento de la plej granda furiozeco, kies hororaj vizaĝoj ne ŝanĝis. Ili ankoraŭ tenis siajn fusilojn, rekte kontraŭ la muroj, kaj nur rigardante ilin, ŝajnis al vi, ke vi aŭdas ilin krei:

“Per bajoneto! Nenian kompaton!”

Kun tiu penso kaj tiu krio ili subite alvenis ĉe Dio, kiu atendis ilin. Li povus diri al ili:

“Jen Mi estas... Ĉu vi volis mortigi viajn fratojn? Ĉu vi ne volis kompati ilin? Ankaŭ Mi ne kompatas!...”

Mi vidis aliajn duone mortintaj, kiuj strangulis sin reciproke. Kaj alveninte en Fleurus oni devis apartigi la prusojn de la francoj, ĉar ili ekstaris de siaj litoj kaj pajlomatracoj por disŝiri kaj vori sin reciproke!

Milito!... Tiuj kiuj volas militon, tiuj kiuj faras la homojn similaj al sovaĝaj bestoj, devas pagi teruregon kalkulon tie supre!...

XXI

La delevido de la vunditoj daŭris ĝisvespere. Je la tagmezo la krioj “*Vivu la Imperiestro*!” resonis laŭlonge de la tuta linio de niaj bivakoj ekde la vilaĝo Brye ĝis Sombreffe. Napoleono estis forlasinta Fleurus kun sia stabo. Li revuis la armeon sur la altebenaĵo. Tiuj krioj daŭris ĉirkaŭ unu horo. Tiam ĉio silentiĝis. Verŝajne la armeo estis tiam marŝanta.

Ni longe atendis la ordonon sekvi. Ĉar ĝi ne venis, kapitano Florentin fine iris informiĝi kaj revenis en galopo kriante:

“Batu la rekolektiĝon!”

La taĉmento de la bataliono kuniĝis, kaj oni komencis rapidpaŝe supreniri al la vilaĝo. Ĉio estis foririnta. Multaj aliaj pelotonoj ne ricevis

ordonojn, kaj apud Saint-Amand la stratoj estis plenaj je soldatoj. Kelkaj kompanioj, restinte malantaŭe, marŝis maldekstren al la vojo tra la grenkampoj, kie oni vidis etendiĝi la kolonvicojn tiel foren kiel oni povis rigardi: municiaĉaroj, furgonoj, ĉiuspecaj pakaĝoj.

Poste mi ofte pensis, ke ni estis bonŝancoj en tiu tago esti lasitaj malantaŭe kiel la divizio Gérard en Saint-Amand. Oni povis riproĉi nenion al ni. Ĉar ni ricevis la ordonon delevi la vunditojn, ni estis en ordo, sed kapitano Florentin povus senti sin senhonorigita.

Ni marŝis rapidigante la paŝojn. Rekomencis plui. Oni glitis en la koto, kaj la nokto venis. Neniam mi vidis pli abomenan veteron, eĉ ne en Germanio dum la retiriĝo el Leipzig. Pluvo falis kiel el akvumilo, kaj ni marŝis, la dorsojn rondigitaj, la fusilon sub la brako, la baskon de la kapoto sur la baterio, tiom trempitaj, ke tio ne povus esti pli malbone, se ni transirus rive-ron. Kaj kia koto! Ĉe tio oni komencis senti malsaton. De tempo al tempo Buche ripetis al mi:

“Estas egale. Dekduo da dikaj terpomoj bakitaj sub la cindroj, kiel en Harberg, multe ĝojigus min. Ĉe ni oni ne manĝas viandon ĉiun tagon, sed ni havas terpomojn!”

Mi revidis en revo nian malgrandan, varman ĉambron en Falsburgo, la blankan tablon, patron Gulden, sidantan antaŭ sia telero, kaj Trinell, kiu servis al ni bongustan supon, dum la kotletoj fumis sur la kradorostilo. Malĝojo pro tio, ke mi ne estis tie kun ili, superfortis min: se sufiĉus al mi nur la deziro morti por esti liberigita de tiu mizero, mi jam delonge ne estus en tiu ĉi mondo.

Jam noktigiĝis. La nokto estis tute griza. Sen la radspuroj, en kiujn oni sinkis ĝis la genuoj, oni apenaŭ rekonas la vojon. Sed oni devis marŝi tra la koto, kaj oni estis certa ne erari. Inter la sepa kaj la oka ni aŭdis en la malproksimo ion kiel tondradon. Unuj diris:

“Estas fulmotondro.”

Aliaj:

“Estas kanonoj.”

Multaj libere vagantaj soldatoj sekvis nin. Je la oka ni alvenis apud Quatre-Bras. Estas du domoj unu fronte al la alia ĉe la kruciĝo de la vojo de Nivelles al Namur kun tiu de Bruselo al Charleroi. Tiuj domoj estis plenaj je vunditoj. Tie marŝalo Ney estis batalinta kontraŭ la angloj por preventi ilin iri helpi la prusojn tra la vojo kiun ni sekvis. Li havis nur dudek mil virojn kontraŭ kvardek mil. Nicolas Cloutier, la tanisto, ankoraŭ hodiaŭ asertas, ke li estus devinta sendi al ni la duonon de siaj trupoj por ataki la prusojn de malantaŭe, kvazaŭ ne jam sufiĉus haltigi la aliajn. Nu, por tiaj viroj ĉio estas facila. Sed se ili mem komandus, kvar viroj kaj kaporalo fuĝigus ilin.

Sube la horde- kaj avenokampoj estis plenaj je mortigitoj. Tie mi vidis la unuajn ruĝajn vestaĵojn de angloj kuŝantaj sur la vojo.

La kapitano ordonis nin halti. Sola li eniris la dekstran domon. Ni jam atendis kelkan tempon en la pluvo, kiam li reeliris kun divizigeneralo Donzelot, kiu ridis, ĉar ni estus devintaj sekvi la armeo de Grouchy direkte al Namur, kaj la manko de ordonoj igis nin turniĝi al Quatre-Bras. Ni tamen ricevis la ordonon senhalte daŭrigi nian marŝon.

Mi kredis sveni ĉiumomente. Sed tio ankoraŭ plimalboniĝis, kiam ni reatingis la furgonojn, ĉar tiam ni devis marŝi flanke de la vojo, tra la kampoj, kaj ju pli ni antaŭeniĝis, des pli oni sinkis en la grasan teron.

Je la deknua ni alvenis en granda vilaĝo nomita Genappe, kiu etendiĝis sur ambaŭ flankoj de la ŝoseo. La multaj furgonoj, kanonoj kaj municiaĉaroj sur tiu vojo, devigis nin transiri la riveron Thy sur ponto dekstre de ni, kaj ekde tiu loko ni marŝis nur tra la kampoj, tra greno, aveno, kanabo, kvazaŭ sovaĝoj, kiuj respektas nenion. La nokto estis tiel malluma, ke surĉevalaj dragonoj, starantaj ĉiujn ducent paŝojn kvazaŭ fostoj laŭlonge de nia itinero, kriadis al ni:

“Ĉi tien! Ĉi tien!”

Je noktomezo ni alvenis ĉe kurbo de iu vojo apud speco de pajlokovrita farmbieno plena je superaj oficiroj. Ne estis tre malproksime de la ŝoseo, ĉar ni aŭdis defili kavalerion, artilerion kaj armetrajnon kvazaŭ torenton.

La kapitano apenaŭ eniris la farmbieron, pluraj el ni sturmis en la ĝardenon tra la heĝoj. Mi agis kiel la aliaj kaj elŝiris napojn. Preskaŭ tuj la tuta bataliono sekvis tiun moviĝon mal-graŭ la krioj de la oficiroj. Ĉiuj komencis elterigi kion li povis per sia bajoneto, kaj dek minutojn poste restis plu nenio. La serĝentoj kaj kapo-raloj estis venintaj kun ni. Kiam la kapitano revenis, ni jam estis reprenintaj niajn poziciojn.

Tiuj kiuj ŝtelas kaj rabas dum militiro meritas esti pafmortigitaj, sed kion vi volas? La vilaĝoj kiujn ni renkontis, ne havis la kvaronon de la vivrimedoj kiuj estis bezonataj por nutri tiom da viroj. La angloj jam prenis preskaŭ ĉion. Restis ja al ni ankoraŭ nur iom da rizo, sed rizo sen viando malmulte valoras. La angloj ricevis bovojn kaj ŝafojn el Bruselo. Ili estis bone nutrataj kaj tute brilantaj pro sano. Sed ni venis tro frue: la konvojoj kun vivrimedoj malfruis. Kaj la morgaŭon, kiam estis okazonta la terura batalo apud Waterloo, ni ricevis nur nian porcion da brando.

Forirante de tie, ni supreniris malfortan deklivon, kaj malgraŭ la pluvo ni ekvidis la bivakojn de la angloj. Oni igis nin preni pozicion meze de la greno inter pluraj regimentoj, kiujn oni ne vidis, ĉar ni ricevis la ordonon ne bruligi

fajrojn, pro timo ke ni timigu la mal-amikon, kaj ke li, vidante nin en linio, decidu daŭrigi sian retiriĝon.

Nu, bildigu al vi virojn kuŝantajn sur grenkampoj sub plaŭdanta pluvo kiel veraj ciganoj, tremante de malvarmo, intencante masakri siajn similulojn kaj kontentaj havi napon, karoton aŭ ion ajn por iomete subteni siajn fortojn. Ĉu tio estas normala vivo por honestaj homoj? Ĉu por tio Dio kreis nin kaj metis nin en la mondon? Ĉu ne estas vere abomene, ke reĝo aŭ imperiestro, anstataŭ gardi la aferojn en sia lando, kuraĝigi komercon, disvastigi instruadon, liberecon kaj bonajn ekzemplojn, metas nin je centmiloj en tian staton? Mi scias, ke oni nomas tion gloro. Sed la popoloj estas tre stultaj, se ili gloras tiajn homojn... Jes, necesas, ke oni perdis ĉian specon de prudento, koro kaj religio.

Ĉio tio ne malhelpis nin klaki per la dentoj kaj vidi fronte al ni la anglojn, kiuj varmiĝis kaj manĝis ĉirkaŭ siaj grandaj fajroj, post kiam ili ricevis sian porcion da bovo, brando kaj tabako. Mi pensis:

“Estas ni, povraj diabloj, trempitaj ĝisoste, kiuj estas devigataj ataki tiujn virojn plenajn je memfido, al kiuj mankas nek kanonoj, nek municio, nek io ajn; kiuj dormas, la piedojn turnitaj al la fajro kaj la ventron plena, dum ni kuŝas en koto!”

La tutan nokton tiu spektaklo indignigis min. Buche diris:

“La pluvo faras nenion al mi. Mi eltenis pli gravajn pluvojn en embusko. Sed tiam almenaŭ mi havis kruston da pano, cepojn kaj salon.”

Li koleriĝis, sed mi emociiĝis pro mia propra sorto kaj diris nenion.

Inter la dua kaj tria nokte la pluvo ĉesis. Buche kaj mi kuŝis dorson kontraŭ dorso en la kavado de sulko por varmigi nin, kaj la granda laceco fine endormigis min.

Io kion mi neniam forgesos, estas la momento kiam mi vekiĝis je la kvina matene: la sonoriloj de la vilaĝoj sonoris super tiu vasta ebenaĵo pro la frumatena meso. Kaj rigardante la renversitan grenon, la kamaradojn kuŝantajn dekstre kaj maldekstre, la grizan ĉielon, tiu granda morna bildo tremetigis mian koron. La sono de la sonoriloj, kiuj respondis sin reciproke en Planchenois, Genappe, Flichemont, Waterloo memorigis min pri Falsburgo. Mi diris al mi:

“Hodiaŭ estas dimanĉo, tago de paco kaj ripozo. Hieraŭ sinjoro Gulden metis sian belan frakon sur dorson de seĝo kune kun blanka ĉemizo. Li ellitiĝas nun kaj pensas pri mi... Trinel ankaŭ ellitiĝas en nia ĉambreto. Ŝi sidiĝas sur la liton kaj ploras. Kaj onklino Gredel en Quatre-Vents malfermas la fenestrokrovri-lojn

kaj prenas el la ŝranko sian preĝolibron por iri al la meso.”

Kaj ŝajnis al mi, ke mi aŭdas la sonorilojn de Dann, Mittelbronn kaj Bigelberg zumadi en la malproksimo. Mi imagis tiun trankvilan vivon... Mi estus povinta esplori!

Sed la tondrado rekomenciĝis, surda tondrado kiel ĉe humida vetero, io sinistra. Apud la granda vojo, maldekstre, oni batis ĝeneralon rekolektiĝon, la kavaleritrumpetoj sonis la vekiĝon. Oni ekstaris kaj rigardis trans la grenon. Tiuj tri tagoj da marŝoj kaj bataloj, la malbona vetero kaj la forgeso de la porcioj faris la virojn pli sombraj. Ni ne parolis kiel en Ligny. Ĉiu rigardis kaj pripensis sian propran situacion.

Ni ankaŭ komprenis, ke okazos pli granda batalo, ĉar anstataŭ havi antaŭ si en la unua linio bone okupitajn vilaĝojn, en kiuj fariĝas same tiom da apartaj bataloj, ĉi tie estis vasta, nuda altebenaĵo, okupita de la angloj. Malantaŭ iliaj linioj, sur la supro de la deklivo, troviĝis la vilaĝo Mont-Saint-Jean, kaj ankoraŭ multe pli malproksimen, je ĉirkaŭ unu mejlo kaj duono vasta arbaro, kiu borderis la ĉielon.

Inter la angloj kaj ni la tereno iomete malaltiĝis kaj plialtiĝis ĉe nia flanko, sed oni devis havi la kutimon militiri por vidi tiun valetan, kiu fariĝis pli profunda dekstre kaj mallarĝiĝis en formo de ravino. Sur la deklivo de tiu ravino, apud ni, malantaŭ heĝoj, poploj kaj aliaj arboj, kelkaj pajlokovritaj domoj indikis domaron: tio estis Planchenois. En la sama direkto, sed multe pli alte kaj malantaŭ la maldekstra flanko de la malamiko, etendiĝis ebenaĵo sursemita per vilaĝoj, tiel foren kiel oni povis vidi.

Ĉe pluvovetero, post fulmotondro, oni plej bone distingis tiujn aferojn. Ĉio estis malhelblua kontraŭ hela fono. Oni eĉ malkovris la etan vilaĝon Saint-Lambert je tri mejloj dekstre de ni. Ĉe nia maldekstra flanko kaj malantaŭ la dekstra de la angloj videblis ankaŭ aliaj vilaĝoj, kies nomojn mi neniam eksciis.

Jen kion ni malkovris unuarigarde en tiu vasta regiono plena je belegaj ankoraŭ flo-rantaj rikoltoj. Kaj ĉiu demandis sin, kial la angloj estas tie, kiun avantaĝon ili havas oku-pante tiun pozicion. Tiel oni observis pli bone ilian linion je mil kvincent ĝis du mil metroj de ni, kaj ni vidis, ke la ŝoseo kiun ni sekvis ekde Quatre-Bras kaj kiu iras al Bruselo, tiu larĝa, iomete ronda vojo pavimita en la mezo, trairis la pozicion de la malamiko proksimume en la centro. Ĝi estas rekta, kaj oni povis sekvi ĝin per la okuloj ĝis ĝi eniris la vastan arbaregon Zonio. La angloj volis do defendi ĝin por malhelpi nin iri al Bruselo.

Se oni bone rigardis, oni vidis, ke la du aloj de ilia batallinio iomete kurbiĝis en nia direkto kaj sekvis kavan vojon, kiu tranĉis en du la vojon al Bruselo. Tiu vojo estis tute kava maldekstre de la ŝoseo. Dekstre ĝi estis borderita per altaj

ileksaj heĝoj, kiaj oni trovas ilin en tiu regiono. Malantaŭ ili estis postenigitaj amasoj de ruĝaj jakoj, kiuj observis nin ekde sia kovrita vojo. La antaŭa parto de ilia deklivo krute malsupreniris kiel taluso. Estis ege danĝere.

Kaj ĉe iliaj aloj, kiuj etendiĝis proksimume tri kvaronojn da mejlo, troviĝis sennombra kavalerio. Oni ankaŭ vidis kavalerion sur la supro de la altebenaĵo, sur la loko kie la ŝoseo, transirinte la monteton, malsupreniras antaŭ ol resupreniri al Mont-Saint-Jean. Ni bone kom-prenis, ke troviĝas kavaĵo inter la pozicio de la angloj kaj tiu vilaĝo, tamen ne tre profunda, ĉar oni vidis la plumojn de la kavalerio, sed sufiĉe profunda por teni tie grandajn fortojn en rezervo protektatajn kontraŭ niaj kugloj.

Mi jam vidis Weissenfels, Lutzen, Leipzig kaj Ligny: mi komencis kompreni, kion signifas tiuj aferoj, kial oni poziciis sin tiel ĉi aŭ tiel, kaj mi trovis, ke la angloj bone lokis sin en sia vojo por defendi la ŝoseon, kaj ke iliaj rezervoj, bone ŝirmitaj sur la altebenaĵo, montris, ke ili havas multe da prudento.

Malgraŭ tio tri aferoj tiam ŝajnis al mi avantaĝaj por ni. Tiuj angloj, kun sia kovrita vojo kaj siaj rezervoj bone kaŝitaj, estis kvazaŭ en granda fortikaĵo. Sed ĉiuj scias, ke en tempo de milito oni tuj detruas ĉirkaŭ la fortaj lokoj la konstruaĵojn tro proksimajn al la remparoj por malhelpi la malamikon ekkupi ilin kaj kaŝi sin malantaŭ ilin. Nu! Ĝuste en ilia centro laŭlonge de la ŝoseo kaj sur la flanko de iliaj deklivoj troviĝis farmbieno simila al Rou-lette aŭ Quatre-Vents, sed kvin- aŭ sesfoje pli granda. Mi tre bone vidis ĝin ekde la altaĵo kie ni estis. Ĝi estis tre granda kvadrato, la kon-struaĵoj, la domo, la ĉevaloj kaj la garbejoj en formo de triangulo ĉe la flanko de la angloj, kaj la alia duono de la triangulo, konsistanta el muro kaj hangaroj ĉe nia flanko. Interne estis la korto. Unu parto de tiu muro havis pordeton, tra kiu oni atingis la kampojn, kaj alia parto kun enirpordego por la kaleŝoj estis turnita al la ŝoseo. Ĝi estis konstruita en solidaj brikoj. Kompreneble la angloj plenigis ĝin per trupoj, kvazaŭ speco de duonluno. Sed se ni havus la bonŝancon kapti ĝin, ni estus tuj apud ilia centro, kaj ni povus lanĉi sur ilin niajn atak-kolonojn sen longe resti sub ilia pafado.

Jen kion plej bonan ni havis. Tiu bieno nomiĝis Haie-Sainte, kiel ni eksciis poste.

Pli for, antaŭ ilia dekstra alo, troviĝis alia bieno kun bosko, kiun ni ankaŭ povus provi kapti. Tiun bienon mi ne povis vidi de tie kie mi estis, sed verŝajne ĝi estis ankoraŭ pli solida ol Haie-Sainte, ĉar ĝin kovris fruktarbaron ĉirkaŭ-itan per muro kaj pli fora fruktarbaro. La pafado el la fenestroj povus kovri la fruktarbaron, la pafado el la fruktarbaro la arbaron, la pafado el la

arbaro la flankon, kaj do la malamiko povus retiriĝi de la unua al la sekvanta pozicio.

Tiujn aferojn mi ne vidis per mia propraj okuloj, sed kelkaj maljunuloj rakontis al mi poste la atakon kontraŭ tiu bieno, kiu nomiĝis Hougoumont.

Estas necese ekspliki ĉion, se oni parolas pri tia batalo, sed la aferoj kiujn oni mem vidis, estas pli gravaj. Oni povas diri: "Mi vidis ilin! Kaj la aliajn mi nur eksciis de honestaj viroj kiuj ne kapablis trompi aŭ mensogi."

Fine, antaŭ ilia maldekstra alo, kie la vojo malsupreniris al Wavre, je kelkcent paŝoj de nia flanko, troviĝis ankoraŭ la bienoj Papelotte kaj Haye, okupitaj de la germanoj, kaj la domaretoj Smohain, Cheval-de-Bois kaj Jean-Loo, kiujn mi vizitis poste por konsciigi pri ĉio okazinta. Tiun domaretojn mi ja vidis, sed mi ne atentis pri ili, tiom pli ĉar ili ne troviĝis sur nia batallinio dekstre kaj oni ne rimarkis trupojn tie.

Ĉiu do bildigu al si la pozicion de la angloj antaŭ ni, la ŝoseon al Bruselo kiu transiris ĝin, la kavan vojon kiu kovris ĝin, la altebenaĵon malantaŭ ili, kie troviĝis la rezervoj, kaj la tri konstruaĵojn Hougoumont, Haie-Sainte kaj Papelotte, antaŭ ili kaj bone defendataj. Ĉiu devis opinii, ke estas malfacile kapti tion ĉi.

Mi tre atente rigardis tion je la deka matene kiel viro kiu riskis perdi la vivon aŭ rompi al si la ostojn en danĝera entrepreno kaj almenaŭ volis scii, ĉu eblas eskapi el ĝi.

Zebedeus, serĝento Rabot, kapitano Florentin, Buche, ĉiuj, leviĝinte, ĵetis rigardon al tiu flanko sen diri ion. Tiam oni rigardis ĉirkaŭ si la grandajn infanterikvadratojn, la eskadronojn de la kirasuloj, dragonoj, ĉasistoj, lancistoj ktp., kampadante meze de la greno.

Tiam neniu plu timis, ke la angloj retiriĝos. Oni bruligis tiom da fajroj, kiom oni volis, kaj la fumo de malseka pajlo supreniris al la ĉielo. Tiuj kiuj havis ankoraŭ iom da rizo, pendigis la marmiton super fajro. La aliaj rigardis, pen-sante:

"Ĉiu laŭvice. Hieraŭ ni manĝis viandon kaj mokis pri rizo. Sed hodiaŭ ni volonte havus ankoraŭ iom da ĝi."

Je la oka alvenis furgonoj kun kartoĉoj kaj bareloj da brando. Ĉiu soldato ricevis duoblan porcion. Kun krusto da pano oni estus kontentigita, sed la pano mankis. Ke oni juĝu, kian mienon ni havis. Tio estis ĉio kion ni ricevis en tiu tago, ĉar tuj poste komenciĝis la grandaj moviĝoj. La regimentoj unuiĝis en brigadoj, la brigadoj en divizioj, la divizioj en korpusoj. La surĉevalaj oficiroj galopis porti ordonojn, ĉio survojiĝis.

Nia bataliono aliĝis al la divizio Donzelot. La aliaj divizioj havis nur ok batalionoj, la nia havis naŭ.

XXIII

Mi ofte aŭdis niajn maljunulojn priskribi la batalordon donitan de la imperiestro. La korpuso de Reille maldekstre de la ŝoseo fronte al Hougoumont; tiu de d'Erlons dekstre fronte al Haie-Sainte; Ney surĉevale sur la ŝoseo, kaj Napoleono malantaŭe kun la maljuna gvardio; la deĵuraj eskadronoj, la lancistoj, la ĉasistoj ktp. Estas ĉio kion mi komprenis, ĉar kiam ili komencis paroli pri la moviĝo de niaj dek unu kolonoj, pri la distanco de la malfaldiĝoj, kaj kiam ili nomis ĉiujn generalojn unuj post la aliaj, ŝajnis al mi aŭdi paroli pri aferoj kiujn mi ne vidis. Mi do preferas tute simple rakonti al vi tion kion mi mem memoras. Kaj por komenci, niaj kvar divizioj ricevis la ordonon antaŭeniri dekstre de la ŝoseo. Ni estis dek kvin ĝis dudek mil viroj, ni marŝis laŭ du linioj, portante la armilon laŭplace, kaj ni sinkis ĝis la genuoj en la koton, sed neniu diris ion.

Pluraj rakontas, ke ni ĝojis kaj kantis, sed tio estas malĝusta! Kiam oni estis marŝinta la tutan nokton sen ricevi manĝaĵon, kiam oni estis kuŝinta en la akvo kun la malpermeso bruligi fajron kaj oni estis ricevinta mitralon, tio forprenas al vi la emon kanti. Ni estis kontentaj retiri niaj ŝuojn el la truoj, en kiujn ni sinkis ĉe ĉiu paŝo. La malseka greno refreŝigis al vi la femurojn, kaj eĉ la plej kuraĝaj, la plej malmolaj aspektis tedataj.

Estas vere, ke la muzikkapeloj ludis la marŝon de sia regimento, kaj ke la kavaleri-trumpetoj, la infanteritamburoj, la grandaj tamburoj kaj la trombonoj intermiksitaĵ produktis teruran efekton kiel ĉiam. Estas ankaŭ vere, ke ĉiuj tiuj miloj da viroj marŝadis bonorde kaj rapidpaŝe, la sakon sur la dorso, la fusilon sur la ŝultro; la blankaj linioj de la kirasuloj, kiuj sekvis la ruĝajn, brunajn, verdajn liniojn de la dragonoj, husaroj kaj lancistoj, kies malgrandaj flagoj en formo de hirundovosto plenigis la aeron; la kanonistoj en la interspacoj inter la brigadoj surĉevale ĉirkaŭ siaj pafiloj, kiuj sinkis en la teron ĝis siaj aksoj – ĉio tio transirante la grenon, tiel ke eĉ ne unu spiko restis staranta – estas vere, ke oni povis vidi nenion pli timigan.

Kaj la angloj fronte al ni, bone envicigitaj, kaj iliaj kanonistoj kun bruligita meĉo, estis ankaŭ io kio igis vin pensi. Sed tio ne tiom ĝojigis nin kiom pluraj aliaj asertas. La viroj kiuj ŝatas ricevi kanonkuglojn estas ankoraŭ sufiĉe mal-oftaj.

Patro Gulden diris al mi, ke en lia tempo la soldatoj kantis, sed ili foriris libervole kaj ne estis devigataj. Ili batalis por gardi siajn kam-pojn kaj por la homaj rajtoj, kiujn ili amis pli ol la okulojn en sia kapo, kaj tio ne estas la samo kiel lacigege

sin por scii, ĉu oni ekhavos mal-novajn aŭ novajn nobelojn. Mi neniam aŭdis kanti en Leipzig aŭ en Waterloo.

Ni marŝadis, la muzikkapeloj ludis laŭ supera ordono. Kiam ili eksilentis, la plej granda silento sekvis. Tiam ni troviĝis ĉerande de la valetoj, je mil aŭ mil ducent paŝoj de la maldekstra flanko de la angloj. Ni konsistigis la centron de nia armeo: ĉasistoj kaj lancistoj svarmis ĉe nia dekstra flanko.

Oni respektis la distancojn, oni densigis la interspacojn, la unua brigado de la unua divizio deflankiĝis maldekstren kaj surĉevaliĝis sur la ŝoseo. Nia bataliono estis parto de la dua divizio: ni do troviĝis sur la unua linio kun nur unu sola brigado de la unua antaŭ ni. Oni metis ĉiujn kanonojn antaŭ ni. Tiuj de angloj estis videblaj fronte al ni. Ankoraŭ aliaj divizioj venis subteni nin. Oni kredus, ke la tuta tero marŝadis. La maljunuloj diris:

“Jen la kirasuloj de Milhaud! Jen la ĉasistoj de Lefebvre-Desnoëttes! Jen tie for la korpuso de Lobau!”

De ĉiuj flankoj, tiel for kiel oni povis rigardi, oni vidis nur kirasulojn, kaskojn, kolpakojn⁷⁰, sabrojn, lancojn, vicojn da bajonetoj.

“Kia batalo!” ekkriis Buche. “Ve la angloj!”

Kaj mi pensis kiel li. Mi pensis, ke neniu anglo povos eskapi. Oni povas diri, ke ni havis malŝancon tiun tagon. Sen la prusoj mi kredis, ke ni estus ekstermitaj ĉion.

Dum du horoj ni restis tie, la armilon ĉepiede. Ni eĉ ne havis la tempon vidi la duonon de niaj regimentoj kaj eskadronoj. Ĉiam venis novaj. Mi memoras, ke post horo oni subite aŭdis leviĝi maldekstre kriadon kvazaŭ fulmotondron: “*Vivu la Imperiestro!*” kaj ke tiuj krioj proksi-miĝis ĉiam pli laŭtiĝante, ke ni rektigis nin sur la piedpintoj plilongigante la kolojn; ke tio disvastiĝis tra ĉiuj viĉoj; ke malantaŭe eĉ la ĉevaloj henis, kvazaŭ ili volus krei; kaj ke en tiu momento grupo da oficiroj plenrapide pasis antaŭ nia linio kvazaŭ kirlovento. Napoleono troviĝis en ĝi, kaj mi kredas, ke mi vidis lin, sed mi ne estas certa. Li pasis tiel rapide, kaj tiom da viroj levis siajn ĉakojn sur la pinto de la bajonetoj, ke oni apenaŭ havis la tempon rekoni lian rondan dorson kaj lian grizan kapoton meze de la galonitaj uniformoj. Post kiam la kapitano kriis: “Portu armilojn!” ĉio jam estis finita.

Jen kia oni preskaŭ ĉiam vidis lin, se oni ne devis gardostari.

Kiam li estis pasinta, dum la krioj ruliĝis dekstren, ĉiam pli foren, ĉiuj pensis, ke dudek minutojn poste la batalo komenciĝos. Sed tio daŭris multe pli longe. Oni malpacientiĝis. La rekrutoj de la korpuso de d'Erlons ekkriis: “Antaŭen!” kiam fine, je la tagmezo, kanono ĉe

⁷⁰ Altaj, imponaj ĉapoj el ursofelto.

nia maldekstra flanko komencis tondri, kaj en la sama sekundo sekvis batalionpafado, tiam rot-pafado. Oni vidis plu nenion: trans la ŝoseo komenciĝis la atako al Hougoumont.

Tuj resonis krioj: *“Vivu la Imperiestro!”* La kanonistoj de niaj kvar divizioj, starante dudek paŝojn unuj de la aliaj, komencis ŝargi. Mi ankoraŭ vidas ilin ĉiujn stari en unu linio, meti la pulvoŝargaĵon, alpremi ĝin, rektiĝi, skui la meĉon sur la brako. Oni dirus unu sola moviĝo, kaj tio donis al oni malvarmon. La ĉefoj de la kanonoj malantaŭe, preskaŭ ĉiuj maljunaj oficiroj, komandis kiel dum parado. Kaj kiam la okdek kanonoj pafis kune, oni aŭdis plu nenion. La tuta valo estis plenigita je fumo.

Post sekundo la trankvilaj voĉoj de tiuj maljunuloj denove aŭdiĝis tra la silbado en viaj oreloj:

“Ŝargu! Alpremu! Direktu! Pafu!”

Kaj tio daŭris senĉese dum duonhoru. Ni jam ne plu vidis nin. Sed de la alia flanko ankaŭ la angloj estis komencintaj pafi. La ronkado de iliaj kugloj tra la aero, la seka bruo de ilia falo en la koton, miksis sin kun alia obtuza bruado en la viĉoj, kiam la fusiloj estis pecigataj kaj la viroj ĵetataj dudek paŝojn malantaŭen kiel sakojn, kie ili falis perdinte brakon aŭ kruron. La buĉado estis komenciĝinta!

Kelkaj krioj de vunditoj resonis tra tiu granda bruo. Oni ankaŭ aŭdis ĉevalojn heni per penetranta voĉo. Tio estas terura krio, ĉar tiuj bestoj estis vere furiozaj: ili estis nur feliĉaj dum buĉado, kaj oni preskaŭ jam ne povis reteni ilin. Malantaŭ ni je pli ol duonmejlo oni aŭdis nur tiun tumulton: la ĉevaloj volis forgalopi.

Kaj ĉar oni jam de longe vidis nenion ekster la ombrojn de niaj kanonistoj manovri en la fumo ĉerande de la ravino, oni aŭdis la komandon: *“Ĉesu pafi!”* Samtempe leviĝis la fortaj voĉoj de la koloneloj de niaj kvar divizioj:

“Plidensigu la viĉojn por la batalo!”

Ĉiuj linioj proksimiĝis unuj al la aliaj.

“Jen nia vico,” mi diris al Buche.

“Jes,” li diris, *“ni ĉiam restu proksime unu de la alia.”*

La fumo de niaj kanonoj tiam supreniris, kaj ni vidis la bateriojn de la angloj, kiuj daŭrigis la pafadon laŭlonge de la heĝoj kiuj borderis ilian vojon. La unua brigado de la divizio Alix avancis sur la ŝoseo al Haie-Sainte. Ĝi iris rapidpaŝe. Mi rekonis marŝalon Ney kun kelkaj staboficiroj.

Ĉiuj fenestroj de la bieno, la ĝardeno kaj la muroj, kiujn oni truis, ĉio brulis. Ĉe ĉiu paŝo kelkaj viroj restis sur la ŝoseo, kuŝiĝante sur ĝin. Ney, surĉevale, la grandan ĉapelon trans-verse, observis la spektaklon, starante meze de la ŝoseo. Mi diris al Buche:

“Jen marŝalo Ney. La dua brigado venas subteni la unuan, kaj tiam estos nia vico.”

Sed mi eraris. En tiu sama minuto la unua bataliono de la dua brigado ricevis la ordonon marŝi en linio dekstre de la ŝoseo, la duan batalionon post la unua, la trian post la dua, kaj fine la kvara kiel en defilo. Oni ne havis tempon meti nin en atakkolonon, sed tio tamen ŝajnis solida. Ni marŝis unuj malantaŭ la aliaj kun cent kvindek ĝis ducent viroj formantaj la fronton. La kapitanoj marŝis inter la kom-panioj, la komandantoj inter la batalionoj. Nur la kanonkugloj, anstataŭ forpreni du virojn, forprenis ok da ili unupafe. Tiuj marŝante malantaŭe ne povis pafi, ĉar la unuaj vicoj ĝenis ilin. Kaj poste oni ankoraŭ vidis, ke ni ne povis formi kvadratojn. Oni estus devinta pensi pri tio antaŭe, sed la elano frakasi la anglojn kaj tuj venki, estis tro granda.

Oni igis marŝi nian divizion en la sama sinsekvo: laŭ tio ke la unua bataliono avancis, la dua tuj sekvis ĝin, kaj tiel plu. Ĉar oni komenciĝis per la maldekstra flanko, mi vidis kun plezuro, ke ni estos en la dudek-kvina linio, kaj ke la angloj devos dishaki terure multajn de la niaj antaŭ ol alveni ĉe ni.

La du divizioj ĉe nia dekstra flanko ankaŭ formis masivajn kolonojn, kiuj staris je tricent paŝoj unu de la alia.

Tiel ni malsupreniris en la valon malgraŭ la pafado de la angloj. La grasa tero en kiun sinkis nian piedojn, malrapidigis nian marŝa-

don, kaj ni kriis ĉiuj kune: *“Per la bajoneto!”*

Suprenirante ni ricevis hajlon de kugloj de trans la ŝoseo maldekstre. Se ni ne estus estintaj tiel grandnombraj, tiu terura pafilado eble estus haltiginta nin. La oficiroj kriis: *“Kurbuĝu maldekstren!”* Sed tiu terura pafado igis nin etendi la dekstran kruron pli ol la alian, tiel ke alvenante apud la vojo borderita de heĝoj, ni estis perdintaj niajn distancojn, kaj ke nia divizio formis, se tiel diri, nur grandan plenan kvadraton kun la tria.

Tiam du baterioj komencis forbalai nin. La mitralo kiu eliris el inter la heĝoj je cent paŝoj faris grandajn truojn en niaj linioj. Ni eligis krion de hororo, ekkuris al la baterioj kaj renversis la ruĝakulojn, kiuj volis haltigi nin.

En tiu momento mi vidis unufoje de proksime la anglojn, kiuj estis solidaj viroj, blankaj, bone razitaj kiel dignaj burĝoj. Ili bone defendis sin, sed ni valoris ilin! Ne ni, simplaj soldatoj, ŝuldas pro tio, ke ili venkis nin. Ĉiu scias, ke ni montris tiom kaj eĉ pli da kuraĝo ol ili! Oni diris poste, ke ni jam ne estis la soldatoj de Austerlitz, Jena, Friedland, Moskvo. Sen-dube! Sed ĉar tiuj ĉi estis tiel bonaj, oni estus devinta ŝpari ilin. Ni ne estus demandintaj alian aferon, ol ke oni metus ilin sur nian lokon.

Ĉiuj kugloj de la angloj trafis sian celon, kio devigis nin rompi la vicojn. Viroj ne estas palisoj:

ili bezonas defendi sin, kiam oni pafas al ili. Granda nombro do falis, kiam miloj da angloj levis sin meze de la greno kaj pafis al ili de proksime, kio kaŭzis grandan buĉadon. Ĉiumomente aliaj vicoj venis helpi la kamaradojn, kaj ni fine estus disvastigitaj kiel formikejo sur deklivo, se ni ne estus aŭdinta krii:

“Atentu! La kavalerio!”

Preskaŭ tuj ni vidis alveni kiel venton amason da ruĝaj dragonoj sur grizaj ĉevaloj. Ĉiuj kiuj flankeniris, estis senkompate dis-hakitaj. Oni ne devas kredi, ke tiuj dragonoj falis sur niajn kolonojn por trapenetri ilin, ĉar ili estis tro masivaj. Ili descendis inter niaj divizioj, sabrante dekstre kaj maldekstre, puŝante siajn ĉevalojn en la flankon de la kolonoj por tranĉi ilin en du, sed ili ne sukcesis. Ili tamen mortigis multajn virojn kaj metis nin en grandan malordon.

Tio estis unu el la plej teruraj momentoj de mia vivo. Kiel maljuna soldato, mi troviĝis en la dekstra flanko de la bataliono. Jam de fore mi vidis, kion tiuj angloj estas farontaj: ili pasis tenante sin kiel eble plej sur la flanko de siaj ĉevaloj por falĉi en la vicoj. Iliaj batoj sekvis sin kiel fulmoj, kaj pli ol dudekfoje mi kredis perdi la kapon. Feliĉe serĝento Rabot sekvis min kiel vicfermanto. Estis li kiu ricevis tiun teruran lavangon. Defendante sin ĝismorte, li ekkriis ĉe ĉiu bato:

“Kovarduloj! Kovarduloj!”

Kaj lia sango saltis sur min kiel pluvo. Fine li falis. Mi havis ankoraŭ ŝargitan fusilon, kaj vidante unu el tiuj dragonoj, kiu de fore rigardis min kaj jam klinis sin por trabori min per la sabropinto, mi paffaligis lin de proksime. Jen la sola viro, kiun mi vidis fali trafita de mia fusilpafo.

La plej malbone estis, ke en la sama momento iliaj infanterianoj rekomencis pafi al ni, kaj ke ili eĉ aŭdacis ataki nin per bajoneto. Nur la du unuaj linioj povis defendi sin. Estis vera abomeno, ke oni envicigis nin tiel.

Tiam la dragonoj, pelmele kun niaj kolonoj, malsupreniris en la valon. Nia divizio defendis sin plej bone, ĉar ni konservis niajn flagojn, dum la du aliaj, flanke de ni, perdis du aglojn.

Ni do malsupreniris tiamaniere tra la koto, inter la kanonoj, kiuj oni estis alveturiginta por subteni nin, kaj kies tirbestoj estis mortigitaj de la dragonoj. Ni kuris en ĉiuj direktoj. Buche kaj mi ĉiam restis kune. Nur dek minutojn poste oni sukcesis rekunigi nin apud la ŝoseo en pelotonoj de ĉiuj regimentoj.

Tiuj kiuj volas enmiksiĝi en la komandadon dum milito, ĉiam devus havi tiajn ekzemplojn antaŭ la okuloj kaj bone pensi antaŭ ol enkonduki novajn inventaĵojn. Tiuj inventaĵoj estas multekostaj por tiuj kiuj estas devigataj praktiki ilin.

Ni rigardis malantaŭ ni respirante, kaj ni jam vidis la ruĝajn dragonojn supreniri la deklivon por konkeri nian grandan baterion de okdek kanonoj. Sed danke al Dio, ankaŭ ilia vico esti masakritaj estis veninta. La imperiestro de malproksime vidis nian retiriĝon, kaj dum la dragonoj supreniris, du regimentoj da kirasuloj dekstre kun regimento da lancistoj maldekstre falis sur ilin deflanke kvazaŭ tondro. Oni aŭdis la sabrobatojn gliti sur la kirasoj kaj la ĉevalojn spiroblovi. Je cent paŝoj oni vidis la lancojn supreniri kaj sinki, la longajn sabrojn etendiĝi, la virojn kurbiĝi por piki desube, la furiozajn ĉevalojn pranci kaj mordi, henante per terura voĉo, la virojn surtere sub la piedoj de la ĉevaloj provi ekstari protektante sin per la manoj.

Kia terurega afero estas batalo!

Buche kriis: “Ek! Ek!” Mi sentis la ŝviton flui sur mia frunto. Aliaj, kun vundoj kaj la okuloj plenaj je sango, forviŝis ĝin ridante kun sovaĝa mieno.

En dek minutoj sepcent dragonoj estis malkapabligitaj batali. Iliaj grizaj ĉevaloj ekforkuregis en ĉiuj direktoj. Kelkaj centoj da ili regalopis al siaj baterioj, sed pli ol unu svingiĝis de dekstre maldekstren kroĉiginte sin je la kolhararo de sia ĉevalo. Ili spertis, ke tiel fali sur la homojn ne estas ĉio, kaj ke povas okazi al oni aferoj kiujn oni ne atendis.

De la tuta terura spektaklo restis plej forte gravurita en mia memoro la reveno de niaj kirasuloj, iliajn grandajn sabrojn ruĝajn ĝis la tenilo, ridante inter si. Dika kapitano kun longaj brunaj lipharoj, pasante apud ni, okulumis kun bonhumora mieno kvazaŭ por diri al ni:

“Nu! ... Vi vidis... Ni vige rekondukis ilin.”

Jes, sed tri mil de la niaj restis en tiu valo! Kaj ankoraŭ ne estis finite. La kompanioj, la batalionoj, la brigadoj reformis sin.

Apud Haie-Sainte la fusilpafado daŭre ruliĝis. Pli malproksime, apud la bieno Hougoumont, tondris kanono. Ĉio tio estis nur malgranda komenco, kaj la oficiroj diris:

“Ĉio estas rekomencenda!”

Oni estus pensinta, ke la vivo de la homoj kostas nenio.

Fine necesis konkeri Haie-Sainte. Necesigis je ĉiu ajn kosto perforti la aliron al la ŝoseo en la centro de la malamiko, kiel oni perforte malfermas la pordegon de fortikaĵo tra la pafado ekde la avancoj kaj duonlunoj. La unuan fojon ni estis repuŝitaj, sed la batalo rekomenciĝis, kaj ni jam ne povis retroiri.

Post la atako de la kirasuloj, ni bezonis tempon por regrupiĝi. La batalo daŭris en Hougoumont. La kanonado rekomenciĝis dekstre de ni: oni estis alveturiginta du bateriojn por purigi la ŝoseon malantaŭ Haie-Sainte, kie la ŝoseo supreniris la deklivon. Ĉiuj vidis, ke la atako okazos tie.

Ni atendis, la armilon sur la brako, kiam, je la tria, Buche, retrorigardante sur la ŝoseo, diris al mi:

“Jen la imperiestro kiu venas.”

Kaj aliaj en la vicoj diris:

“Jen la imperiestro!”

La fumo estis tiel densa ke oni apenaŭ vidis sur la monteto Rossomme la harozajn ĉapojn de la maljuna gvardio. Mi ankaŭ returniĝis por vidi la imperiestron, sed baldaŭ ni rekonis marŝalon Ney kun kvin aŭ ses staboficiroj. Li venis de la komandejo kaj galopis rekte al ni tra la kampoj. Ni turnis la dorson al li. Niaj komandantoj tuj rapidis renkonte al li, kaj ni aŭdis ilin interparoli sen kompreni ion pro la bruego kiu plenigis al ni la orelojn.

Tuj la marŝalo pasis al la fronto de niaj du batalionoj kaj tiris la sabron. Ekde la granda revuo en Asschaffenburg mi ne plu vidis lin de tiel proksime. Li ŝajnis pli maljuna, pli maldika, pli osteca, sed li ankoraŭ ĉiam estis la sama viro. Il rigardis nin per siaj helgrizaj okuloj. Post momento li etendis sian sabron en direkto de Haie-Sainte, kriante:

“Ni estas prenontaj tion!... Tio estas la nodo de la batalo... Mi mem kondukos vin. Ni batalu, kolonkapo maldekstren!”

Ni foriris rapidpaŝe. Sur la ŝoseo oni igis nin marŝi laŭ kompanio en tri vicoj. Mi troviĝis en la dua. Marŝalo Ney antaŭiris nin surĉevale kun la du komandantoj kaj kapitano Florentin. Li estis remetinta sian sabron en la ingon. Centoj da kugloj sibladis preter ni. La kanono tiel forte tondris malantaŭe en Hougoumont maldekstre kaj dekstre de ni, ke estis kvazaŭ granda sonorilo, kies batojn oni fine ne plu aŭdas, sed nur longan bruegadon. Jen unu, jen alia el ni falis, kaj oni pasis trans li.

Du- aŭ trifoje la marŝalo returnis sin por vidi, ĉu ni marŝas bone unuigitaj. Li aspektis tiel trankvila, ke mi trovis tute normala, ke mi ne timis. Lia mieno donis fidon al ĉiuj, kaj ĉiuj pensis:

“Ney estas kun ni... La aliaj estos venkitaj!”

Jen tamen la stulteco de la homa speco, ĉar tiom da viroj restis survoje. Fine, laŭ tio ke ni proksimiĝis al tiu granda konstruaĵo, la bruo de la pafado fariĝis pli kaj pli klare aŭdebla meze de la kanontondrado. Kaj oni vidis ankaŭ pli klare la flamojn de la pafoj kiuj venis el la fenestroj, la vastan nigran tegmenton super la fumo kaj la ŝoseon obstrukcitan de ŝtonoj.

Ni laŭiris heĝon. Malantaŭ tiu heĝo resonis la pafado de niaj tiraljoroj, ĉar la unua brigado de la divizio Alix ne estis forlasinta la fruktarbaron. Vidante nin defili sur la ŝoseo, ĝi komencis krii: “*Vivu la Imperiestro!*” Kaj ĉar la tuta pafado de la germanoj direktis sin kontraŭ nin, marŝalo Ney, tirante sian sabron, ekkriis per voĉo, kiun oni povis aŭdi en la malproksimeco:

“Antaŭen!”

Li forgalopis tra la fumo kun du aŭ tri aliaj oficiroj. Ni ĉiuj kuris, tenante la armilon preta, dum la kartoĉujo svingis tien kaj reen sur la koksoj. Malantaŭe, tre malproksime okazis la atako, kaj oni ne plu vidis la marŝalon. Nur apud hangaro, kiu apartigas la ĝardenon de la ŝoseo, ni malkovris lin sur sia ĉevalo antaŭ la enirpordego. Evidentiĝis, ke aliaj provis konkeri tiun pordegon, ĉar amasoj da mortigitaj, traboj, pavimeroj kaj rubo kuŝis kontraŭ ĝi ĝismeze de la ŝoseo. Pafado eliris el ĉiuj truoj de la konstruaĵo. Oni flaris nur la pezan odoron de pulvo.

“Batrompu ĝin por mi!” ekkriis la marŝalo, kies vizaĝo estis tute ŝanĝiĝinta.

Kaj ni ĉiuj, dek kvin ĝis dudek viroj, ĵetis niajn fusilojn teren, levis trabojn kaj ramis per ili la pordegon, kiu kriis kaj bruis kiel tondro. Ĉe ĉiu bato oni kredis, ke ĝi falos. Tra la fendoj inter ĝiaj tabuloj oni vidis interne amason da alte staplitaj pavimeroj. Ĝi estis perforita de truoj. Falante, ĝi povus frakasi nin, sed nia furiozeco blindigis nin. Ni jam ne similis al homoj: unuj ne plu havis ĉakon, aliaj surhavis diŝiritajn uniformon kaj estis preskaŭ en ĉemizo, kaj la sango fluis sur la vizaĝo aŭ sur la femuroj. Kaj tra la bruo de la pafado mitralpafoj alvenis de la deklivo, tiel ke la pavimoj ĉirkaŭ ni dissaltis en polvo.

Mi rigardis, sed mi ne plu vidis Buche nek Zebedeus, nek iun alian de la kompanio. Ankaŭ la marŝalo estis foririnta. Nia obstineco duobligis. Kaj dum la traboj iris kaj revenis, kaj ni preskaŭ freneziĝis pro kolero, ĉar la pordego ne volis cedi, subite krioj resonis en la korto kun terura tumulto: “*Vivu la Imperiestro!*” Ĉiuj komprenis, ke niaj trupoj estas en la konstruaĵo. Oni rapidis delasi la trabojn, preni la fusilojn kaj salti tra la breĉoj en la ĝardenon por vidi, kie la aliaj eniris. Estis malantaŭ la bieno tra pordo, kiu eliris en la grenejo. Oni eniris laŭvice kiel bando da lupoj. La interno de tiu malnova konstruaĵo estis plenaj je pajlo, la fojnejoj kaj ĉevalejoj, kovritaj per pajlo, similis al unu el tiuj nestoj plenaj je sango, kie pasis la nizoj.

Sur granda sterkostako meze de la korto, oni estis trapikantaj germanojn, kiuj eligis sovaĝajn kriojn kaj blasfemojn.

Mi hazarde trafis sur tiu masakro kaj mi aŭdis krii: “Josef! Josef!” kaj mi rigardis, pensante: “Tio estas Buche, kiu vokas min.” En la sama momento mi ekvidis lin dekstre, antaŭ la pordo de lignotenejo krucigante la bajoneton kontraŭ kvin aŭ ses de la niaj. Samtempe mi vidis Zebedeus, ĉar nia kompanio troviĝis en tiu angulo, kaj kurante al Buche por helpi lin, mi ekkriis:

“Zebedeus!”

Tiam, fendante la amasiĝantan grupon, mi demandis lin:

“Kio okazas?”

“Ili volas masakri miajn kaptitojn.”

Mi stariĝis ĉe lia flanko. La aliaj en sia furiozeco ŝargis siajn fusilojn por mortigi nin. Ili estis tiraljoroj de alia bataliono. Zebedeus venis kun pluraj viroj de la kompanio, kaj ne sciante, kion signifas la vortoj de Buche, li kaptis unu el la plej teruraj ĉe la gorĝo kaj kriis:

“Mi nomiĝas Zebedeus, serĝento de la 6-a leĝera... Poste ni havos interparolon pri tio.”

Tiam la aliaj foriris, kaj Zebedeus demandis min:

“Kio estas, Josef?”

Mi diris al li, ke ni havas kaptitojn, kaj tuj li paliĝis de kolero kontraŭ ni. Sed enirante la lignotenejon li vidis maljunan majoron, kiu silente prezentis al li la tenilon de sia sabro, kaj soldato, kiu diris germane:

“Lasu al ni la vivon, franco!... Ne forprenu al ni la vivon!”

En tia momento, kiam la krioj de tiuj kiujn oni mortigis, ankoraŭ plenigis la korton, tio turnis al vi la koron. Zebedeus diris al ili:

“Estas bone. Mi ricevas vin kiel miajn kaptitojn.”

Li eliris kaj fermis la pordon. Ni ne forlasis la lignotenejon ĝis la momento, kiam oni ekbatis la rekolektiĝon. Kiam la viroj estis reprenintaj siajn vicojn, Zebedeus avertis kapitanon Florentin, ke ni kaptis majoron kaj soldaton. Li igis ilin eliri. Ili transiris la korton sen armiloj kaj estis lokitaj en ĉambron kune kun tri aŭ kvar aliaj. Estis ĉio kio restis de la du batalionoj de Nassau al kiuj estis komisiita la defendo de Haie-Sainte.

Dum tio okazis, du aliaj batalionoj de Nassau, kiuj venis helpi siajn kamaradojn, estis masakritaj ekstere de niaj kirasuloj, tiel ke en tiu momento ni havis la venkon: ni estis la mastroj de la ĉefa avanco de la angloj. Nun ni povis komenci la grandajn atakojn kontraŭ la centron, detranĉi al la malamiko la ŝoseon al Bruselo kaj puŝi lin en la malbonajn vojojn de la arbaro Zonio. Ni havis grandan penon venki, sed la plej grava de la batalo estis farita. Je ducent paŝoj de la linio de la angloj, ni, bone kovritaj, povis fali sur ilin, kaj sen voli glori nin, mi kredas, ke per la bajoneto kaj bone subtenate de la kavalerio, ni estus traborintaj ilian linion. Ni bezonis nur unu horon, bone klopodante, por fini la batalon.

Sed dum ni ĝojis, dum la oficiroj, soldatoj, tamburistoj, trumpetistoj, ankoraŭ ĉiuj sur la ruinoj, volis nur malstreĉi la krurojn, respiri, ĝoji, subite la novaĵo disvastiĝis, ke la prusoj alvenas, kaj ke ili estas falontaj sur nian flankon, ke ni devas liveri du batalojn: unu antaŭ ni kaj alia dekstre de ni, kaj ke ni riskos

esti ĉirkaŭitaj de trupoj duoble pli fortaj ol la niaj.

Tio estis terura novaĵo, sed pluraj senprudentaj viroj diris:

“Tiom pli bone! La prusoj venu... Ni neniigos ilin ĉiujn kune!”

Sed la viroj kiuj ne perdis la saĝon, tuj komprenis, kiom ni malpravis ne profitante de nia venko en Ligny, lasante la prusojn trankvile foriri dum la nokto, kaj ne sendis kavalerion por persekuti ilin, kiel oni ĉiam faras. Oni povas diri sen troigi, ke tiu granda eraro estas la kaŭzo de nia malvenko ĉe Waterloo! Nur la postmorgaŭon je la tagmezo la imperiestro sendis marŝalon Grouchy kun tridek du mil viroj serĉi tiujn prusojn, sed estis multe tro malfrue: ili havis la tempon regroupigi sin kaj akordiĝi kun la angloj. Oni devas scii, ke la morgaŭon de Ligny la prusoj konservis naŭdek mil virojn, inter kiuj tridek mil freŝaj, kaj ducent sepdek kvin kanonojn. Per tia armeo ili povis fari, kion plaĉus al ili. Ili eĉ povis liveri duan batalon kontraŭ la imperiestro. Sed plej plaĉis al ili fali sur nian flankon, dum ni intencis ataki la anglojn. Tio estas tiel simpla kaj klara, ke oni ne komprenas, ke certaj homoj trovas tion miriga. Blücher sammaniere trompis nin ĉe Leipzig, kaj nun li ripetis la saman ruzajon, lasante Grouchy persekuti lin de tre malproksime. Ĉu Grouchy povis revenigi lin al si, dum Blücher volis antaŭeniri? Ĉu li povis malhelpi lin postlasi tridek aŭ kvardek mil virojn por haltigi la trupojn kiuj persekutis lin, dum li mem kuris kun la resto helpi Wellington?

Nia sola espero estis, ke oni estis sendinta al Grouchy la ordonon tuj reveni kaj aliĝi al ni, kaj ke li estis revenanta post la prusoj. Sed la imperiestro ne sendis tiun ordonon.

Vi komprenas, ke ne ni, simplaj soldatoj, faris tiujn pripensojn, sed niaj oficiroj, niaj generaloj. Ni, soldatoj, sciis nenion. Ni estis kiel senkulpuloj kiuj ne suspektis, ke ilia lasta horo estas proksima.

Sume, mi diris ĉion kion mi pensas, kaj nun mi rakontos al vi la reston de la batalo tiel, kiel mi mem vidis ĝin, por ke ĉiuj sciu tiom kiom mi.

XXIV

Preskaŭ tuj post la novaĵo pri la alveno de la prusoj oni ekbatis la rekolektiĝon. La batalionoj reformiĝis. La nia, kun alia de la brigado Quiet, restis por gardi Haie-Sainte, kaj la tuta resto aliĝis al la korpuso de generalo d'Erlons, kiu denove avancis tra la valo kaj provis ĉirkaŭiri la maldekstran flankon de la angloj.

Niaj du batalionoj rapidis fermi la pordojn kaj breĉojn kiel eble plej bone per traboj kaj pavimoj. Oni metis virojn en embuskon ĉe ĉiuj truoj, kiujn la malamiko estis farinta je la flanko de la fruktarbaro.

Kun la resto de la kompanio Zebedeus, Buche kaj mi estis postenigitaj super stalo, ĉe angulo de la bieno je mil aŭ mil ducent paŝoj de Hougoumont. Mi ankoraŭ vidis la linion de truoj je alteco de viro, kiujn la prusoj estis farintaj en la muro por defendi la fruktarbaron. Suprenirante, ni rigardis tra tiuj truoj nian batalinon, la ŝoseon de Bruselo al Charleroi, la malgrandajn bienojn Belle-Alliance, Rosomme, Gros-Caillou, kiuj borderis ĝin jen kaj jen, la maljunan gvardion, starantan trans la ŝoseo, la armilon sur la ŝultro, la stabo sur malalta monteto maldekstre, kaj pli for en la sama direkto malantaŭ la ravino de Planche-nois, la blankan fumon, senĉese renoviĝan-tan, kiu disvastiĝis super la arboj. Tio estis la atako de la unua korpuso de la prusoj.

Poste ni eksciis, ke la imperiestro sendis dek mil virojn sub la komando de Lobau por haltigi ilin. La batalo rekomenciĝis, sed la maljuna kaj la juna gvardioj, la kirasuloj de Milhaud, tiuj de Kellermann kaj la ĉasistoj de Lefèvre-Desnoëttes, sume nia tuta belega kavalerio restis en pozicio: la granda, vera batalo ĉiam estis kontraŭ la angloj.

Kiaj pensoj venas al oni antaŭ tia grandioza spektaklo kaj tiu imensa ebenaĵo, kiujn la imperiestro devis vidi en sia menso pli bone ol ni per niaj okuloj! Ni estus restintaj tie dum multaj horoj, se kapitano Florentin ne estus subite suprenirinta.

“Nu, kion vi faras tie?” li ekkriis. “Ĉu ni defendos la ŝoseon kontraŭ la gvardio? Truu do tiun muron flanke de la malamiko. Ek! Ni rapidu!”

Ĉiuj prenis la pioĉojn, kiujn la germanoj estis lasintaj sur la planko, kaj faris truojn en la muro de la pinjono. Tio daŭris malpli ol duonhoron, kaj tiel ni vidis la batalon ĉe Hougoumont, la brulantajn konstruaĵojn, la obusojn kiuj ĉi-momente eksplodis inter la ruinoj, la skotajn ĉasistojn embuskiĝintajn sur la malantaŭa vojo, kaj dekstre de ni, tute proksime je du fusilpafoj, la anglojn retroigantajn sian unuan linion en la centro kaj fortrenantajn siajn kanonojn, kiujn niaj tiraloroj jam komencis malmunti. Sed la resto de ilia linio ne moviĝis. Ili havis ruĝajn kaj nigrajn kvadratojn kiel ŝaktabulo, unuj antaŭ kaj la aliajn malantaŭ la kava vojo. Tiuj kvadratoj tuŝis sin ĉe la anguloj. Por ataki ilin necesis pasi tra ilia kruĉpafado. Iliaj kanonoj restis en pozicio rando de la ebenaĵo. Pli mal-proksime, en faldo de la deklivo de Mont-Saint-Jean atendis ilia kavalerio.

La pozicio de tiuj angloj ŝajnis al mi nun ankoraŭ pli forta ol hodiaŭ matene. Tial ke ni ankoraŭ ne sukcesis trapenetri ilian maldekstran flankon, ĉar la prusoj atakis nin en la flanko, mi unuafoje ekhavis la ideon, ke ni ne estas certaj gajni la batalon. Mi jam bildigis al mi nian teruran konfuziĝon, se ni havus la malfeliĉon malgajni, premite inter du armeoj, unu antaŭ ni kaj alia flanke de ni, kaj la sekvon: dua invado, truditaj impostoj, sieĝo de niaj urboj, reveno de la elmigrintoj kaj venĝoj.

Mi sentis, ke tiu penso paligas min.

En la sama momento mi lojda krioj “*Vivu la Imperiestro!*” leviĝis malantaŭ ni. Buche troviĝis apud mi en angulo de la subtegmento. Li kriis kun ĉiuj kamaradoj “*Vivu la Imperiestro!*” kaj apogante min trans lian ŝultron, mi vidis nian tutan kavalerion de la dekstra alo: la kirasuloj de Milhaud, la lancistoj de la gvardio, pli ol kvin mil viroj, kiuj antaŭeniris trote. Ili transiris la ŝoseon kaj malsupreniris en la valon inter Hougoumont kaj Haie-Sainte. Mi komprenis, ke ili estas atakontaj la kvadratojn de la angloj kaj ke nia sorto dependas de tio.

La ĉefoj de anglaj kanonoj komandis per tiel akraj voĉoj, ke oni aŭdis ilin tra la tumulton kaj la sennombrajn kriojn “*Vivu la Imperiestro!*”

Estis terura momento, kiam niaj kirasuloj pasis tra la valo. Mi kredis vidi torenton post la fandiĝo de la neĝo, kiam la suno brilas sur la multaj glacieroj. La ĉevaloj kun siaj bluaj kovri-
loj sur la postaĵo ĉiuj kune etendis la femuron kiel cervoj, piedfrapante la teron, la trumpetoj sonis sovaĝe meze de surda bruoj. Kaj en la momento kiam ili pasis, la unua malŝargo de mitralo tremigis nian malnovan hangaron. La vento blovis de Hougoumont kaj plenigis per fumo ĉiujn truojn. Ni apogis nin eksteren: dua malŝargo, tiam tria alvenis pafon post pafo.

Tra la fumo mi vidis la anglajn kanonistojn forlasi siajn kanonojn kaj fuĝi sur siaj ĉevaloj. Kaj preskaŭ tuj niaj kirasuloj troviĝis sur la kvadratoj, kies pafoj zigzagis laŭlonge de la deklivo. Oni aŭdis nur grandan bruon, plendojn, senfinan tintadon, henadon, iam kaj iam malŝargon. Tiam novajn kriojn, novajn bruojn, novajn ĝemojn. Kaj en tiu densa fumo, kiu amasiĝis kontraŭ la biendomo, dudekoj da ĉevaloj pasis kiel ombroj kun flirtanta kolhararo kaj aliaj trenante sian rajdiston, kies piedo estis ankoraŭ kaptita en la piedingo.

Tio daŭris pli ol horon!

Post la kirasuloj de Milhaud alvenis la lancistoj de Lefebvre-Desnoëttes. Post la lancistoj, la kirasuloj de Kellermann. Post tiuj ĉi la surĉevalaj grenadistoj de la gvardio, tiam la dragonoj... Ĉiuj trote supreniris la deklivon kaj kuris al la kvadratoj, la sabron en la aero kaj elegante la krion “*Vivu la Imperiestro!*” kiu supreniris en la ĉielon.

Ĉe ĉiu nova atako ni kredis, ke ili trapenetros ĉion, sed kiam la trumpetoj sonigis la rekollektiĝon, kiam la eskadronoj revenis pelmele galopante, persekutite de mitralo, por reformi sin fine de la ebenaĵo, oni ankoraŭ ĉiam vidis la longajn ruĝajn liniojn, senmovajn en la fumo kvazaŭ muroj.

Tiuj angloj estis bonaj soldatoj. Necesas ankaŭ diri, ke ili sciis, ke Blücher venis helpi ilin per sesdek mil viroj, kaj kompreneble tiu penso donis al ili grandan kuraĝon.

Malgraŭ tio, je la sesa ni jam detruis duonon de iliaj kvadratoj. Sed tiam la ĉevaloj de niaj kirasuloj, elĉerpitaj de dudek atakoj sur tiu graso tero trempita de pluvo, ne plu povis antaŭengalopi meze de la amaso da mortigitoj.

Kaj la nokto proksimiĝis. La granda batalkampoj malantaŭ ni malpleniĝis! Fine la granda ebenaĵo, kie ni kampadis la antaŭan tagon, estis forlasita, kaj tie for la maljuna gvardio restis sola sur la ŝoseo, la armilon en la mano: ĉiuj estis foririntaj, dekstre kontraŭ la prusoj, antaŭe kontraŭ la angloj!

Ni rigardis nin terurite.

Jam mallumiĝis, kiam kapitano Florentin aperis supre sur la skalo, ambaŭ manojn sur la planko, kriante al ni per serioza voĉo:

“Fusilistoj, la horo veni aŭ morti estas veninta!”

Mi memoras, ke tiuj vortoj troviĝas en la proklamo de la imperiestro, kaj ni ĉiuj malsupreniris laŭvice. Ankoraŭ ne estis tute mal-lume, sed sur la detruita korto ĉio estis griza kaj la mortigitaj jam rigidaj sur la sterkejo kaj laŭlonge de la muroj.

La kapitano aranĝis nin dekstre sur la korto, la komandanto de la alia bataliono aranĝis siajn virojn maldekstre. Niaj tamburoj unufoje resonis tra la malnova konstruaĵo, kaj ni defilis tra la malgranda pordo en la ĝardenon. Ni devis klini la kapon unu post la alia.

Ekstere la ĝardenmuroj estis truetitaj. La vunditoj meze de la ruinoj bandaĝis al si, unu la kapon, alia kruron aŭ brakon. Kantinistino kun sia ĉareto kaj sia azeno, grandan pajlan ĉapelon platigitan sur la dorso, staris ankaŭ en tiu angulo. Mi ne scias, kion tiu malfeliĉulino venis fari tie. Pluraj ĉevaloj, faligitaj de laceco, la kapon pendanta, kovritaj per koto kaj sango, similis al maljunaj ĉevalaĉoj.

Kia diferenco disde la mateno! Tiam la kompanioj alvenis ja duone detruitaj, sed ili estis ankoraŭ kompanioj. Nun la konfuziĝo proksimiĝis. Bezonis nur tri tagoj por meti nin en la saman staton kiel apud Leipzig post unu jaro. La resto de nia bataliono kaj la alia formis nur unu bonordan linion. Kaj ĉar necesas, ke mi diru tion al vi: maltrankvileco ekkaptis nin.

Kiam la viroj ne plu manĝis ekde la antaŭa tago, kiam ili batalis la tutan tagon, kaj ke ĉe la

noktiĝo ĉiuj iliaj fortoj estas elĉerpitaj, ili tremas pro malsato, ili ektimas kaj eĉ la plej kuraĝaj perdas esperon: ĉiuj niaj grandaj malfeliĉaj retiriĝoj originis el tiu stato.

Kaj tamen, malgraŭ ĉio ni ne estis venkitaj, kaj la kirasuloj ankoraŭ tenis la ebenaĵon. De ĉiuj flankoj, meze de la tondrado de la kanonoj kaj tumulto ni aŭdis nur unu krimon:

“La gvardio alvenas!”

Ha, jes, la gvardio alvenis... ĝi fine alvenis! De fore ni vidis iliajn altajn harozajn ĉapojn bonorde antaŭengalopi sur la ŝoseo. Tiuj kiuj neniam vidis la gvardion alveni sur batalkampoj neniam komprenos la fidon kiun la viroj povis havi al tiu elita korpuso, specon de respekto kiu donis al oni kuraĝon. La soldatoj de la maljuna gvardio estis preskaŭ ĉiuj eksaj kam-puloj de antaŭ la Respubliko, viroj almenaŭ kvin futojn ses colojn longaj, maldikaj, bonstaturaj. Antaŭe ili kondukis la plugon por ia monaĝejo aŭ kastelo. Poste ili ribelis amase kun la tuta popolo. Ili foriris al Germanio, Holando, Italio, Egiptio, Pollando, Hispanio, Rusio, komence sub Kléber, Hoche, Marceau, poste sub Napoleono, kiu ŝparis kaj bone pagis ilin. Ili konsideris sin iel kiel proprietulojn de granda bieno, kiun ili devas defendi kaj eĉ pligrandigi. Tio altiris al ili respekton: estis sia propra bieno kiun ili defendis. Ili jam ne konis siajn gepatrojn, gekuzojn, la homojn de sia lando. Ili konis nur la imperiestron, kiu estis ilia dio. Kaj fine ili adoptis la reĝon de Romo por heredi ĉion kune kun ili por subteni kaj honori ilian maljunecon. Oni neniam vidis ion tian. Ili tiel kutimiĝis marŝi, meti sin en linion, ŝargi, pafi, krucigi la bajoneton, ke tio iel okazis aŭtomate, laŭbezone. Kiam ili antaŭeniris, la armilon en la mano, kun siaj grandaj ĉapoj, blankaj veŝtoj kaj gamaŝoj, ili ĉiuj similis unuj al la aliaj. Oni bone vidis, ke estas la dekstra mano de la imperiestro kiu antaŭeniris. Kiam oni diris en la vicoj: “La gvardio eniras la batalon!” tio estis kvazaŭ oni dirus: “La batalo estas gajnita!”

Sed en tiu momento, post la granda masakro, tiuj teruraj atakoj al kiuj la angloj rezistis, vidante la prusojn fali sur nian flankon, mi diris al mi mem:

“Jen la granda bato! Se ni malgajnos ĝin, ĉio estos perdita.”

Jen kial ni ĉiuj rigardis la gvardion, kiu alpaŝis sur la ŝoseo. Estis ankoraŭ Ney kiu kondukis ĝin, kiel li estis kondukinta la atakon de la kirasuloj. La imperiestro bone sciis, ke neniu povis konduki la gvardion pli bone, ol Ney. Nur li estus sendinta lin unu horon pli frue, kiam niaj kirasuloj estis en la kvadratoj. Tiam ni estus gajnintaj la batalon. Sed la imperiestro domaĝis sian gvardion kiel sian lastan rifuĝon. Se li ankoraŭ estus havintaj sian gvardion kvin tagojn poste en Parizo, Lafayette kaj la aliaj ne estus

longe restintaj por detronigi lin. Sed li jam ne havis ĝin.

Estas do pro tio, ke li atendis tiel longe por sendi ĝin en la batalon. Li esperis, ke la kavalerio trapenetros ĉion kun Ney, aŭ ke la tridek du mil viroj de Grouchy venos, aŭdante la kanonojn, kaj ke li povos sendi ilin anstataŭ la gvardion, ĉar oni ĉiam povos anstataŭigi tridek aŭ kvardek virojn per konskripcio, sed por ekhavi tian gvardion necesis komenci je la dudek-kvina jaro kaj forporti kvindek venkojn. La plej bona, solida kaj dura parto de la armeo estis la gvardio.

Nu, ĝi alvenis, kaj ni vidis ĝin. Ney, la maljuna Friant kaj tri aŭ kvar aliaj marŝaloj rajdis ĉe ĝia kapo. Ni vidis nur tion. La resto, la kanonpafoj, la fusilado, la krioj de la vunditoj estis kvazaŭe forgesitaj. Sed tio ne daŭris longe, ĉar la angloj ankaŭ komprenis, ke tio estos la granda bato. Ili rapidis kunigi ĉiujn siajn fortojn por ricevi ĝin.

On dirus, ke ĉe nia maldekstra flanko la batalkampoj estas malplena. Oni jam ne pafis, ĉu pro manko de municio, ĉu ĉar la malamiko ŝanĝis sian pozicion. Ĉe la dekstra flanko male, en la direkto de Frichemont, la kanonado duobliĝis, la tuta afero ŝajnis translokiĝinta tien, kaj oni ne kuraĝis diri al si: "Estas la prusoj kiuj atakas nin... Unu plia armeo kiu venas neniigi nin!" Ne, tiu penso ŝajnis al ni tro terura, kiam subite staboficiro pasis kiel fulmo, kriante:

"Grouchy!... Marŝalo Grouchy alvenas!"

Estis en la momento kiam la kvar batalionoj de la gvardio deturniĝis maldekstren de la ŝoseo por supreniri la fruktarbaron kaj komenci la atakon.

Kiomfoje nokte dum kvindek jaroj mi bildigis al mi tiun noktan atakon, kaj kiomfoje mi aŭdis aliajn rakonti ĝin! Aŭskultante tiujn historiojn, oni kredus, ke la gvardio estis sola, ke ĝi antaŭeniris kvazaŭ vicoj de palisaroj kaj ke ĝi sola eltenis la mitralon. Sed ĉio tio okazis en la plej granda konfuzo. Tiun teruran atakon faris nia tuta armeo, ĉiuj restoj de la maldekstra alo kaj de la centro, ĉio kio restis de la kavalerio elĉerpita de ses horoj da batalo, ĉio kio ankoraŭ povis stari kaj levi la brakon: estis la infanterio de Reille kiu koncentriĝis al la maldekstra flanko de la malamiko, estis ni ĉirkaŭ Haie-Sainte, estis ĉio kio ankoraŭ vivis kaj kio ne volis esti masakrita.

Kaj oni ne venu diri, ke ni estis en paniko kaj ke ni volis fuĝi kiel malkuraĝuloj, tio ne estas vera! Kiam la famo kuris, ke Grouchy venas, eĉ la vunditoj ekstaris kaj remetis sin en viĉojn. Oni estus kredinta, ke aerblovo igis marŝi la mortigitojn: ĉiuj tiuj mizeruloj kuŝantaj malantaŭ Haie-Sainte, la kapon, la brakon, la kruron bandaĝita, la vestaĵojn disŝiritaj kaj plenaj je sango, ĉiu kiu povis meti unu piedon antaŭ la alian aliĝis al la gvardio, kiu pasis antaŭ la

breĉoj de la ĝardeno, kaj ĉiuj disŝiris sian lastan kartoĉon.

Oni batis la atakon, niaj kanonoj rekomencis tondri. Sur la deklivo ĉio silentis. Vicoj da anglaj kanonoj restis forlasitaj. Oni kredus, ke la aliaj foriris, kaj nur kiam la harozaj ĉapoj komencis leviĝi super la ebenaĵo, kvin aŭ ses mitralpafoj avertis nin, ke ili atendas nin.

Tiam ni komprenis, ke tiuj angloj, germanoj, belgoj, hanoveranoj, ĉiuj tiuj viroj kiujn ni sabris kaj masakris ekde la mateno, reformis sin malantaŭe kaj ke necesas pasi sur iliaj ventroj. Multaj vunditoj retiriĝis en tiu momento, kaj la gvardio, sur kiu falis la plej granda parto de la pluvado, antaŭeniris preskaŭ sola tra la pafado kaj la mitralo, renversante ĉion. Sed ĝi pli kaj pli densiĝis kaj videble malpliĝis. Post dudek minutoj ĉiuj ĝiaj surĉevalaj oficiroj estis elselitaj. Ĝi haltis antaŭ tiel terura fajro de muskedopafado, ke ni mem, je ducent paŝoj malantaŭ ili, jam ne aŭdis niajn porprajn pafojn: ni kredis bruligi prajmojn!

Finfine ĉiu tiu amaso de malamikoj, antaŭe, dekstre kaj maldekstre, leviĝis kaj falis sur nin, subtenate de sia kavalerio en la flankoj. La kvar batalionoj de la gvardio, malpliigitaj de tri mil al mil ducent, ne povis elteni tian sturmon kaj malrapide retroiris. Ankaŭ ni retiriĝis, defendante nin per fusilpafoj kaj bajoneto.

Ni jam vidis pli terurajn batalojn, sed tiu ĉi estis la lasta.

Kiam ni alvenis ĉerande de la altebenaĵo por remalsupreniri, en la tuta ebenaĵo sub ni jam kovrita de ombro, regis konfuzo. Ĉiuj fuĝis kaj forkuris, unuj piede, aliaj surĉevale. Unu sola bataliono de la gvardio, en kvadrato apud la bieno, kaj tri aliaj batalionoj ĉe la disbranĉiĝo de Planchenois, restis senmovaj kiel konstru-aĵoj meze de inundo, kiu kuntrenas la tutan reston! Ĉiuj foriris – husaroj, ĉasistoj, kirasuloj, artilerio, infanterio – pelmele sur la ŝoseo, tra la kampoj, kvazaŭ armeo de barbaroj, kiu fuĝas. Laŭlonge de la ravino de Planchenois la sombra ĉielo estis prilumita de la pafado. Unu sola kvadrato de la gvardio kontraŭstaris Bulow, malhelpante lin fortranĉi al ni la ŝoseon. Sed pli proksime al ni aliaj prusoj de la kavalerio descendis en la valon kvazaŭ rivero kiu fluas trans siajn kluzojn. La maljuna Blücher ankaŭ alvenis kun kvardek mil viroj. Li kunfaldis nian dekstran alon kaj dispersis ĝin antaŭ si

Kion mi povas ankoraŭ diripri tio? Okazis encirkligo: ni estis ĉirkaŭitaj de ĉiuj flankoj. La angloj repelis nin en la valon, kaj en la valo alvenis Blücher. Niaj generaloj, oficiroj, la imperiestro mem jam ne havis alian rimedon ol meti sin en kvadraton. Kaj oni diris poste, ke ni, povraj malfeliĉuloj, panikegis! Mi neniam aŭdis similan maljustecon!

Mi kuris al la bieno kun Buche kaj kvin aŭ ses kamaradoj. Eksplozantaj obusoj ruliĝis ĉir-kaŭ nin, kaj ni alvenis kiel erarintaj estaĵoj ĉe la ŝoseo, kie surĉevalaj angloj galope pasis, kriante inter si:

“No quarter! No quarter!”

En tiu momento la kvadrato de la gvardio komencis retiriĝi. Ĝi pafis en ĉiuj direktoj por forigi ĉiujn malfeliĉulojn kiuj volis eniri ĝin. Nur la oficiroj kaj generaloj povis savi sin.

Kion mi neniam forgesos, eĉ se mi devus vivi mil jarojn, estas la teruraj, senfinaj krioj kiuj plenigis la valon sur pli ol unu mejlo, kaj tre malproksime aŭdiĝis tamburo, kiu kvazaŭe sonorigis alarmsonorilon meze de incendio. Sed estis ankoraŭ pli terure: tio estis la lasta krio de Francio, de tiu kuraĝa kaj fiera popolo, tio estis la voĉo de la patrio kiu kriis: “Helpu min, infanoj, mi mortas!” Ne, mi ne povas priskribi tion al vi!... Tiu batoj de la tamburisto de la maljuna gvardio meze de nia katastrofo estis io teneriganta kaj terura. Mi singultis kiel infano. Buche kuntrenis min, kaj mi kriis al li: “Jean, lasu min... Ni malgajnis la batalon...

Ni perdis ĉion!”

Pensoj pri Trinel, sinjoro Gulden kaj Falsburgo ne venis en mian kapon. Kio mirigas min ankoraŭ hodiaŭ, estas, ke ni ne estis centfoje masakritaj sur tiu ŝoseo, kie pasis vicoj da angloj kaj prusoj. Eble ili rigardis nin kiel germanojn, eble ili kuris post la imperiestro, ĉar ĉiuj esperis kapti lin.

Antaŭ la bieneto Ronsomme ni devis deturniĝi dekstren tra la kampoj. Estis tie ke la lasta kvadrato de la gvardio ankoraŭ eltenis la atakon de la prusoj. Sed ĝi ne povis persisti multe pli longe, ĉar dudek minutojn poste la malamikoj inundis la ŝoseon. La prusaj ĉasistoj foriris en bandoj por aresti tiujn kiuj postrestis. Oni estus dirinta, ke tiu ŝoseo estas ponto, kaj ke tiuj kiuj ne sekvas ĝin, falas en abismon.

Kiam ni malsupreniris en la ravinon malantaŭ la gastejo Passe-Avant, la prusaj husaroj kuris al ni. Ili estis nur kvin aŭ ses, kaj ni kriis, ke ni kapitulacas. Sed se ni estus levintaj la kolbon, ili estus sabrintaj nin. Ni kuŝis la fusilon kontraŭ la vangon, kaj vidante, ke ni ne estas vunditaj, ili forgalopis. Tio devigis nin denove sekvi la ŝoseon, kies krioj kaj tumulto aŭdeblis je almenaŭ du mejloj: la kavalerio, la infanterio, la Artilerio, la ambulancoj, la furgonoj, ĉio pel-mele treniĝis sur la ŝoseo, hurlante, batante, henante kaj plorante. Ne, eĉ apud Leipzig ni ne vidis tian spektaklon. La luno leviĝis super la arbaroj malantaŭ Planchenois. Ĝi prilumis tiun amason de ĉapsoj⁷¹, harozaj ĉapoj, sabroj, bajonetoj, renversitaj municiaĵoj, haltigitaj kanonoj. Kaj

ĉiun minuton la obstrukco kreskis. Hurlado aŭdiĝis de unu fino de la linio ĝis la alia. Ĝi supreniris kaj malsupreniris la deklivojn kaj finiĝis en la malproksimeco kiel suspiro. Sed la plej malĝojigaj estis la krioj de la virinoj – de tiuj malfeliĉulinoj kiuj sekvas la armeojn – kiam oni renversis ilin aŭ ĵetis ilin kun iliaj ĉaretoj de la taluso suben. Ili eligis kriojn kiujn oni aŭdis super tiu imensa tumulto, kaj neniu returnis la kapon, neniu viro malsupreniris por helpi ilin.

“Ĉiu por si! Mi renversas vin, tiom pli malbone por vi, mi estas pli forta. – Vi krias?... Tio estas egala al mi!... Atentu! Atentu! Mi rajdas sur ĉevalo!... Mi frapas vin!... Faru lokon, nur se mi povas eskapi!... La aliaj agas kiel mi! – Lokon por la imperiestro!... Lokon por la marŝalo!... La pli forta renversas la malpli fortan... Nur forto gravas en la mon-do!... Antaŭen!... Antaŭen! La kanonoj renversas ĉion, nur se oni savas ilin! – La kanonoj ne plu funkcias... Oni maljuntu la ĉevalojn, oni tranĉu la tirrimenojn kaj frapu sur la ĉevalojn, kiuj forportas nin!... Ili kuru tiel foren, kiel ili povas, kaj ili krevu poste! – Per kio la resto koncernas nin? Se ni jam ne estas la pli fortaj, nu, kio? Venis nia vico esti mortigitaj. Ni krias, sed oni mokas pri niaj krioj! – Savu sin kiu povas... kaj vivu la imperiestro!... Sed la imperiestro mortis!”

Ĉiuj kredis, ke la imperiestro mortis kun la maljuna gvardio: tio ŝajnis tuta kompreneble.

La prusa kavalerio pasis per vicoj, la sabron en la aero, kriante: “Hura!” Ĝi ŝajnis eskorti nin kaj sabris ĉion kio deviis de la ŝoseo. Kaptitojn ĝi ne faris kaj jam ne atakis la homamason en la kolono... Kelkaj pafoj ankoraŭ resonis dekstre kaj maldekstre. Malantaŭe, tre malproksime, oni vidis ruĝan flamon tra la nokto: la bieno Caillou brulis.

Ni plirapidigis la paŝojn. Malsato, laceco, malespero pezis sur nin. Oni volus morti, kaj tamen la espero eskapi subtenis onin. Marŝante Buche diris al mi:

“Josef! Ni subtenu unu la alian. Mi neniam forlasos vin.”

Kaj mi respondis al li:

“Ni ĉiuj mortos kune... Mi ne plu povas elteni tion... Estas tro terure... Estus pli bone kuŝiĝi...”

“Ne!... Ni ĉiam marŝu,” li diris, “ĉar la prusoj ne faras kaptitojn. Rigardu... Ili masakras ĉion senkompate, kiel ni apud Ligny.”

Ni ĉiam sekvis la direkton de la ŝoseo kun miloj da aliaj, mornaj, deprimitaj, kaj kiuj tamen returnis sin amase kaj densiĝis por pafi, kiam prusa eskadrono venis tro proksime. Ni estis ankoraŭ la plej firmaj, la plej solidaj. Jen kaj jen ni trovis forlasitajn afustojn, kanonojn, municiaĵojn. La fosaĵoj dekstre kaj maldekstre estis

⁷¹ Speco de kapvestoj.

plenaj je sakoj, kartoĉoj, fusiloj, sabroj: oni forĵetis ĉion por povi marŝi pli rapide!

Sed kio estis la plej terura, tio estis la grandaj ambulancveturiloj, haltigitaj meze de la ŝoseo kaj plenaj je vunditoj. La veturigistoj estis tranĉintaj la tirrimenojn kaj fuĝis sur siaj ĉevaloj, timante esti mortigitaj. Tiuj malfeliĉaj vunditoj duone mortintaj, kun pendantaj brakoj, rigardis nin kun malespero. Ili pensigas min hodiaŭ pri tufoj de pajlo kaj fojno kiuj restas alkroĉitaj je arbustoj post inundo, kaj la homoj diras: "Jen nia rikolto... Jen kio la fulmotondro lasas al ni!" Ha! Kiel ofte mi pensis pri tio dum la lastaj kvindek jaroj!

Kio ankaŭ multe malĝojigis min dum tiu fuĝo, kio disŝiris al mi la koron, estis, ke mi ne revidis nenian viron de nia bataliono krom ni mem. Mi diris al mi: "Ili tamen ne povas esti ĉiuj mortigitaj!" Kaj mi ekkriis:

"Jean, se mi retrovus Zebedeus, tio kuraĝigus min!"

Li ne tuj respondis min, sed post momento diris al mi:

"Ni nur provu savi nin, Josef! Se mi havos la feliĉon revidi Harberg, mi ne plu plendos pri la terpomoj... Ne... Ne... Dio punas min... Mi estus tre kontenta iri labori en la arbaro, la hakilon sur la ŝultro. Se nur mi ne revenu hejmen kripligita kaj ke mi ne estu devigata etendi la manon ĉerande de granda vojo por vivi, kiel tiom da aliaj! Ni provu eskapi sanaj kaj sekuraj."

Mi trovis, ke li estas prudenta.

Je la deka kaj duono ni proksimiĝis al Genappe. Teruraj krioj aŭdiĝis de fore. Ĉar oni bruligis pajlofajrojn meze de la ŝoseo por prilumi la tumulton, vi vidis tie for la domojn kaj la stratojn tiel plenaj je homoj, ĉevaloj kaj furgonoj, ke ni ne povis meti unu paŝon antaŭen. Ni tuj komprenis, ke la prusoj povas veni ĉiumomente, ke ili havas kanonojn kaj ke estas pli bone por ni pasi ĉirkaŭ la vilaĝon ol esti amase kaptitaj. Tial ni deturniĝis maldekstren en la grenon kun granda nombro da aliaj. Ni transiris la riveron Thy, vadante tra la akvo ĝis la zono, kaj ni atingis la du domojn de Quatre-Bras je la meznokto.

Ni saĝe agis ne enirante Genappe, ĉar ni jam aŭdis la fusil- kaj kanonpafojn de la prusoj al la vilaĝo. Sur la ŝoseo alvenis ankaŭ multaj fuĝantoj: kirasuloj, lancistoj, ĉasistoj... Neniu haltis!

Malsato terure turmentis nin. Ni pensis, ke en tiuj domoj jam delonge ĉio estas manĝita. Malgraŭ tio ni eniris tiun maldekstre. La planko estis kovrita per pajlo, sur kiu kuŝis vunditoj. Apenaŭ ni malfermis la pordon, ĉiuj komencis krii... kaj por diri la veron, laodoro estis tiel malbona, ke ni tuj reeliris, reprenante la vojon al Charleroi.

La luno estis belega. Ni malkovris dekstre en la greno kvanton da mortigitoj, kiujn oni ne enterigis. Buche descendis en sulkon, kie oni vidis tri aŭ kvar anglojn etendiĝintajn unuj sur la aliaj dudek kvin paŝojn pli malproksime. Mi demandis min, kion li estas faronta meze de tiuj mortigitoj, kiam li revenis kun ladbotelo, kiun li skuis ĉe sia orelo, dirante al mi:

"Josef, ĝi estas plena."

Sed antaŭ ol malfermi ĝin, li plonĝigis ĝin en akvoplenan fosaĵon. Tiam li malfermis ĝin, trinkis iomete kaj diris:

"Estas brando!"

Li donis ĝin al mi, kaj ankaŭ mi trinkis. Mi sentis la vivon reveni en min, kaj mi redonis al li tiun duonplenan ladbotelon, benante Dion pro la ideo kiun Li donis al Buche.

Ni ankaŭ ekzamenis la mortintojn por vidi, ĉu ili havas ankaŭ panon. Sed ĉar la tumulto plifortiĝis kaj ni ne estus sufiĉe grandnombraj por rezisti atakojn de la prusoj, se ili ĉirkaŭus nin, ni reforiris plenaj je kuraĝo kaj forto. Tiu brando jam igis nin vidi ĉion rozkolora. Mi diris:

"Jean, la plej terura jam estas pasinta. Ni ankoraŭ revidos Falsburgon kaj Harberg. Ni estas sur bona vojo, kiu kondukos nin al Francio. Se ni estus gajnintaj, oni devigus nin iri pli malproksimen ĝis profunde en Germanio. Estus necese batali kontraŭ la aŭstrojn kaj rusojn. Kaj se ni havus la feliĉon eskapi al la morto, ni revenus kiel veteranoj, kun grizaj haroj, kaj estus senditaj al la garnizono de Petite-Pierre aŭ aliloken."

Jen la malbonaj pensoj kiuj pasis tra mia kapo. Sed tio ne malhelpis min marŝi kun pli da kuraĝo, kaj Buche diris:

"La angloj pravas kunporti ladbotelojn. Se mi ne vidis brili la ladon en la lunlumo, la ideo ne estus veninta al mi iri rigardi."

Dum ni parolis tiel, ĉiumomente kavalerianoj pasis apud ni. Iliaj ĉevaloj estis elĉerpitaj, sed frapante kaj spronante ilin, la rajdistoj igis ilin tamen troti. La bruo de multaj fusilpafoj anon-cis la tutan disfalon: feliĉe ni havas iom da antaŭeco. Povis esti la unua matene, kaj ni kredis nin en sekureco, kiam Buche diris al mi:

"Josef, jen la prusoj!"

Kaj rigardante malantaŭ nin, mi vidis en la lunlumo kvin brunajn husarojn, de la sama regimento kiu antaŭ unu jaro dishakis Klipfel. Tio ŝajnis al mi malbona aŭguro.

"Ĉu via fusilo estas ŝargita?" mi demandis al Buche.

"Jes."

"Nu, ni atendu... Ni devas defendi nin, mi ne kapitulacos."

"Ankaŭ mi ne," li diris. "Mi preferas morti ol foriri kiel kaptito."

Samtempe prusa oficiro kriis al ni arogatone:

"Demetu la armilojn!"

Anstataŭ atendi kiel mi, Buche pafis al la busto de la pruso. Tiam la kvar aliaj falis sur nin. Buche ricevis sabrobaton, kiu fendis lian ĉakon ĝis la viziero, sed per bajonetpiko li mortigis la pruson kiu vundis lin. Mi tenis mian ŝargitan fusilon. Buche metis sin kun la dorso kontraŭ nuksarbo. Ĉiufoje kiam la prusoj, kiuj retropaŝis, volis proksimiĝi, mi alŝultrigis ĝin. Neniu el ili volis esti mortigita la unua. Kaj dum ni atendis, Buche kun la bajoneto krucigita, mi kun la kolbo kontraŭ la ŝultro, ni aŭdis galopadon sur la ŝoseo. Tio timigis nin, ĉar ni pensis, ke estas aliaj prusoj, sed estis kelkaj el niaj lancistoj. Tiam la prusoj husaraj galopis malsupren tra la greno, dum Buche rapidis reŝargi sian fusilon. Niaj lancistoj pasis, kaj ni sekvis ilin kurante. Oficiro, kiu troviĝis inter ili, diris, ke la imperiestro foriris al Parizo, kaj ke reĝo Jerôme transprenis la komandon de la armeo.

La tuta haŭto de la kapo de Buche estis fendita, sed la osto estis en bona stato. La sango fluis sur liaj vangoj. Li bandaĝis al si la kapon per sia naztuko, kaj ekde tiu momento ni ne plu renkontis prusojn.

Nur ĉirkaŭ la dua matene ni estis tiel lacaj, ke ni jam ne povis marŝi. Vidante je distanco de kvin aŭ sescent paŝoj fagoboskon je nia maldekstra flanko, Buche diris al mi:

“Hej, Josef, eniru tien... Ni kuŝiĝu kaj dormu.”

Mi ne demandis ion alian.

Ni malsupreniris, transirante avenkampon ĝis la bosko, kaj eniris la densan arbetaron. Ni ambaŭ konservis nian fusilon, nian sakon kaj nian kartoĉujon. Ni metis la sakon teren por etendi nin, la orelon sur ĝi.

Jam delonge tagiĝis, kaj jam de pluraj horoj la tuta mizera resto de nia armeo defilis sur la ŝoseo, kiam ni vekiĝis kaj trankvile reprenis nian vojon.

XXV

Granda nombro da kamaradoj kaj vunditoj restis en Gosselies, sed la amaso daŭrigis sian vojon, kaj je la naŭa oni komencis malkovri la preĝejturojn de Charleroi en la malproksimo, kiam subite aŭdiĝis krioj, plendoj kaj fusilpafoj je duonmejlo antaŭ ni. La tuta imensa kolono de mizeruloj haltis, kriante:

“La urbo fermas siajn pordegojn. Ni estis haltigitaj...”

Malĝojo kaj malespero legiĝis sur ĉiuj vizaĝoj. Sed momenton poste kuris la famo, ke konvojeto kun vivrimedoj proksimiĝis, kaj ke oni ne volis fari distribuojn. Tiam furiozeco ansta-taŭis la

timegon, kaj tute laŭlonge de la ŝoseo oni aŭdis nur unu solan krion:

“Ni falu sur ilin. Ni mortigu la ŝtelistojn kiuj perfidas kaj malsategigas nin!”

La plej timemaj, la plej deprimitaj rapidigis la paŝojn, levante sian sabron aŭ ŝargante sian fusilon.

Oni jam antaŭe vidis, ke okazos vera buĉado, se la kondukantoj kaj la eskorto ne cedos. Buche mem kriis:

“Necesas ĉion masakri... Ni estas perfiditaj!... Venu, Josef!... Ni venĝu nin!...”

Sed mi retenis lin ĉe la kolumo, kriante al li:

“Ne, Jean, ne! Ni faris jam sufiĉe da masakroj... Ni eskapis de ĉio ĝis nun. Ne necesas, ke ĉi tie francoj mortigu nin. Venu!...”

Li rezistis, provante liberigi sin. Finfine tamen, kiam mi montris al li vilaĝon maldekstre de la ŝoseo, dirante al li:

“Hej! Jen la vojo al Harberg, jen domoj kiel en Quatre-Vents! Ni prefere iru tien peti panon. Mi havas monon, ni certe ekhavas iom da ĝi. Venu! Tio estos pli bone ol ataki konvojn kiel bando da lupoj!”

Finfine li lasis sin kuntreni. Ni transiris refoje la grenkampojn. Sen la malsato, kiu rapidigis nin, ni estus sidiĝintaj surrande de la pado ĉe ĉiu paŝo. Sed post duonhoro ni alvenis, danke al Dio, antaŭ speco da forlasita farmbieno. La fenestroj estis rompitaĵoj, la pordo larĝe malfermita kaj altaj stakoj da tero ĉirkaŭ ĝi. Ni eniris, kriante:

“Ĉu estas iu ĉi tie?”

Ni frapis sur la meblojn per niaj kolboj, sed neniam respondis. Nia furiozeco kreskis, tiom pli ke ni vidis kelkajn aliajn mizerulojn alveni sur la sama pado, kaj ni pensis:

“Ili venas manĝi nian panon!”

Aĥ! Tiuj kiuj neniam suferis tiajn mankojn, ne komprenas tiun furiozecon. Estis terure!... Estis terure!... Ni jam rompis la pordeton de ŝranko plena je tolaĵoj, kaj ni renversis ĉion per niaj bajonetoj, kiam maljuna virino eliris de sub la kuirejtablo, kiuj kovris la enirejon de la kelo. Ŝi sangultis kaj diris:

“Dio mia! Dio mia! Kompatu nin!”

Tiu domo estis prirabita frumatene. Oni forprenis la ĉevalojn, la edzo malaperis, la geservistoj fuĝis. Malgraŭ nia furiozeco, la vido de tiu povra maljunulino hontigis nin, kaj mi diris al ŝi:

“Ne timu... Ni ne estas monstroj. Donu nur panon al ni, se ne, ni pereos.”

Ŝi sidiĝis sur malnovan ŝegon, krucigis la manojn sur la genoj kaj diris:

“Mi havas plu nenion, ili forprenis ĉion, Dio mia, ĉion... ĉion.”

Ŝiaj grizaj haroj pendis laŭlonge de siaj vangoj. Mi estus povinta plori pro ŝi kaj ni.

“Ni mem serĉos,” mi diris al Buche, kaj ni pasis de unu ĉambro al alia, eniris la bovinejon, la ĉevalejon, la grenejon... sed ni vidis nenion: ĉio estis forŝtelita aŭ rompita. Mi estis reelironta, kiam malantaŭ malnova pordo mi trovis blanketan murŝrankon. Mi haltis kaj etendis la manon. En ĝi pendis per hoko tola sako, kiun mi rapide dekroĉis per tremantaj manoj.

Buche rigardis min... La sako estis peza... Mi malfermis ĝin... En ĝi estis du dikaj brasiknapoj, duona seka pano, granda tondilo por tondi la heĝojn, kaj tute sube kelkaj cepoj kaj griza salo volvita en papero.

Vidante tion, ni eligis krion. La timo esti vidataj de la aliaj igis ni kuri malantaŭen, tre fore en la sekalon, kliniĝante kaj kaŝante nin kiel ŝtelistoj. Ni retrovis ĉiujn nian fortojn, kaj ni sidiĝis surranden de rojeto. Buche diris al mi:

“Aŭskultu, donu al mi parton!”

“Jes, la duonon de ĉio,” mi diris al li. “Vi lasis min trinki el vi ladbotelo. Mi volas dividi ĉion.”

Tiam li trankviliĝis.

Mi tranĉis la panon per mia sabro, dirante:

“Elektu, Jean, jen via brasiknapo, jen la duono de la cepoj, kaj la salo en la saketo inter ni.”

Ni manĝis la panon sen trempi ĝin en akvon. Ni manĝis nian brasiknapon, la cepojn kun salo. Ni estus volontaj daŭrigi ĉiam manĝi. Ni tamen estis satigitaj. Ni surgenuiĝis surrande de la rojo, plonĝigis la manojn en la akvon kaj trinkis.

“Nun ni foriru,” diris Buche. “Lasu la sakon ĉi tie.”

Malgraŭ nia lacego, kiu kvazaŭe rompis niajn kruojn, ni ekiris maldekstren, dum malantaŭ ni apud Charleroj la krioj kaj fusilpafoj duobliĝis, kaj ke sur la tuta longo de la ŝoseo ni nur vidis batalantajn virojn. Sed tio okazis jam malproksime de ni. De tempo al tempo ni returnis la kapon, kaj Buche diris al mi:

“Josef, vi bone agis kuntrenante min. Sen vi mi eble kuŝus tie for, ĉerande de la ŝoseo, batmortigita de franco. Mi tro malsatis. Sed kien ni fuĝu nun?”

“Sekvu min!”

Ni baldaŭ transiris grandan kaj belan vilaĝon, ankaŭ prirabitan kaj forlasitan. Pli for ni renkontis kampulojn, kiuj rigardis nin kun malfidaj vizaĝoj, ranĝante sin ĉerande de la vojo. Verŝajne ni havis malbonaspektajn mienojn, precipe Buche kun sia bandaĝita kapo kaj barbo de ok tagoj, nigra, densa kaj malmola kiel la haroj de apro.

Ĉirkaŭ la unua posttagmeze ni jam transpasis la riveron Sambro tra la ponto de Châtelet, sed ĉar la prusoj estis survoje, ni ankoraŭ ne haltis en tiu loko. Mi tamen jam havis bonan fidon, kaj mi pensis:

“Se la prusoj daŭrigas sian persekuton, ili certe sekvos la grandan amason por fari pli da

kaptitoj kaj kolekti kanonojn, municiaĉarojn kaj furgonojn.”

Jen kiel viroj, kiuj ankoraŭ tremigis la mondon tri tagojn antaŭe, estis devigataj rezoni! Mi memoras, ke, alvenante ĉirkaŭ la tria en malgranda vilaĝo, ni haltis antaŭ forĝejo por demandi trinkaĵon. Tuj la homoj de la lando ĉirkaŭis nin, kaj la forĝisto, granda kaj bruna viro, diris al ni eniri la kontraŭe situantan gastejon, ke li tuj venos, kaj ke ni prenos kruĉon da biero kun li.

Kompreneble tio plezurigis nin, ĉar ni timis esti arestitaj, kaj ni vidis, ke la homoj simpatias kun ni.

Ankaŭ venis al mi la ideo, ke restas mono en mia sako kaj mi estas povonta uzi ĝin. Ni do eniris tiun gastejon, kiu estis tre malgranda kun du fenestretoj elirantaj sur la strato, ronda pordo kun du aloj, kiel en la vilaĝoj ĉe ni. Post kiam ni sidiĝis, la tuta salono tiom pleniĝis je homoj – viroj kaj virinoj –, ke ni apenaŭ povis spiri.

La forĝisto venis. Li estis demetinta sian antaŭtukon kaj surmetinta bluan bluzon. Kaj tuj, kiam li eniris, ni konstatis, ke kvin aŭ ses aliaj honestaj burĝoj sekvis lin: tio estis la vilaĝestro, la adjunkto kaj la municipaj konsilantoj de la loko.

Ili sidiĝis sur benkojn kontraŭ ni kaj igis servi al ni acidan bieron, kia oni ŝatis ĝin en tiu regiono. Buche petis panon, kaj la gastejestrino tuj alportis al ni tutan panon kaj grandan pecon da bovaĵo en pelvo. Ĉiuj diris al ni:

“Manĝu! Manĝu!”

Kiam iu direktis al ni demandon pri la batalo, la vilaĝestro aŭ la forĝisto ekkriis:

“Lasu do tiujn virojn fini la manĝon... Vi vidas, ke ili venas de malproksime.”

Kaj nur ĉe la fino ili pridemandis nin, demandante:

“Ĉu estas vere, ke la francoj malgajnis grandan batalon? Oni unue raportis al ni, ke ni venkis la malamikojn, kaj nun la famo disvastiĝas, ke ni estas venkitaj.” li diris.

Ni komprenis, ke li parolas pri Ligny, kaj ke tio konfuzis liajn pensojn.

Mi hontis konfesi al ili nian malvenkon, kaj mi rigardis Buche, kiu diris:

“Ni estis perfiditaj!... La perfidistoj liveris niajn planojn!... La armeo estis plena je perfidistoj, kiuj havis la taskon diri: ‘Fuĝu kiu povas!’ Kiel vi volas, ke tiamaniere ni ne malgajnu?”

Estis la unua fojo, ke mi aŭdis paroli pri tiu perfido. Kelkaj vunditoj ja kriis: “Ni estas perfiditaj!” Sed mi neniam atentis pri tiuj vortoj. Kaj kiam Buche savis nin el nia embaraso per tiu rimedo, mi estis kontenta kaj eĉ mirigita.

Tiam tiuj homoj indigniĝis kun ni kontraŭ la perfidistoj. Necesis ekspliki al ili la batalon kaj la perfidon. Buche diris, ke la prusoj povis reveni danke al la perfido de marŝalo Grouchy. Tio

tamen ŝajnis al mi tro forta, sed ĉar la kampuloj, plenigitaj je tenereco, ofertis al ni ankoraŭ bieron kaj eĉ donis al ni tabakon kaj pipojn, mi fine konfirmis la diron de Buche. Nur poste, foririnte de tie, la ideo de niaj abomenaj mensogoj hontigis min pri mi mem, kaj mi ekkriis:

“Ĉu vi scias, Jean, ke niaj mensogoj pri la perfidistoj ne estas belaj? Se ĉiuj rakontos tiom da mensogoj, kiom ni, ni ĉiuj fine estos perfidistoj, kaj sola la imperiestro estos honesta viro. Estus honto por nia patrio, se ni havus tiom da perfidistoj inter ni... Tio ne estas vera!”

“Ba! Ba!” li diris. “Ni estis perfiditaj. Sen tio neniam la angloj kaj prusoj estus devigintaj nin retiriĝi.”

Kaj ĝis la oka vespere ni nur disputis pri tio. Tiam ni alvenis en alia vilaĝo nomita Bouvigny. Ni estis tiel lacaj, ke niaj kruroj estis rigidaj kiel pikadoj, kaj ke ekde longa tempo ni devis havi grandan kuraĝon por fari unu paŝon.

Ni kredis esti tre malproksime de la prusoj. Ĉar mi havis monon, ni eniris gastejon, petante dormi tie.

Mi eligis moneron de ses pundoj por montri, ke ni povos pagi. Mi decidis ŝanĝi miajn vestaĵojn la morgaŭon, lasi tie miajn fusilon, sakon kaj kartoĉujon, kaj reiri hejmen, ĉar mi kredis, ke la milito finis, kaj meze de tiuj grandaj malfeliĉoj, mi ĝojis, ke mi sukcesis retiri miajn krurojn kaj brakojn sanaj el tiu batalo.

Kuŝiĝinte tiun vesperon en malgranda ĉambro, kie super ni en niĉo staris la Sankta Virgulino kun la infano Jesuo surbrake, Buche kaj mi, dormis kiel beatuloj.

La morgaŭon, anstataŭ daŭrigi nian vojon, ni estis tiel kontentaj sidi sur bona ŝego en la kuirejo, etendi niajn krurojn kaj fumi nian pipon, rigardante boli la marmiton, ke ni diris:

“Ni restu trankvile ĉi tie! Morgaŭ ni estos bone ripozitaj. Ni aĉetos du tolajn pantalonojn, du bluzojn, ni tranĉos du bastonojn el heĝo kaj ni reiros hejmen en malgrandaj etapoj.

La penso pri tiuj agrablaj aferoj tenerigis nin.

Ankaŭ de tiu gastejo mi skribis leteron al Trinel, onklino Gredel kaj sinjoro Gulden. Mi diris al ili nur unu vorton:

“Mi estas savita... Ni danku Dion pro tio! Mi alvenos post kelke da tagoj. Mi tutkore ĉirkaŭbrakas vin ĉiujn mil fojojn! Josef Seitz.”

Skribante mi laŭdis la Sinjoron. Sed multaj aferoj estis ankoraŭ devontaj okazi, antaŭ ol mi povis supreniri nian ŝtuparon ĉe la angulo de la strato Fouquet fronte al la hotelo *la Ruĝa Bovo*. Kiam oni estas prenita de la konskripcio, oni ne devas rapidi skribi, ke oni estas delasita. Tiu feliĉo ne dependas de ni, kaj la bona volo foriri servas al nenio.

Bone vespermanĝinte, ni supreniris enlitiĝi. Mi diris al Buche:

“Hej, Jean! Estas ja tute alia afero fari, kion oni volas, ol esti devigata respondi al apelo.”

Ni ambaŭ ridis, malgraŭ la malfeliĉoj de la patrio, sen pensi kompreneble pri tio, ke ni estis veraj mizeruloj.

Fine duafoje ni kuŝis en nia bona lito, kiam ĉirkaŭ la unua matene ni estis vekitaj en eksterordinara maniero: tamburo batis. Kaj oni aŭdis marŝi tra la tuta vilaĝo. Mi puŝis Buche, kiu diris:

“Mi bone aŭdas: la prusoj estas ekstere.”

Oni povis imagi nian timegon. Sed post momento, la situacio estis ankoraŭ pli malbona, ĉar oni frapis sur la pordon de la gastejo, kiu malfermiĝis, kaj du sekundojn poste, la granda salono estis plenaj je homoj. Oni supreniris la ŝtuparon. Buche kaj mi estis ellitiĝintaj, kaj li diris:

“Mi defendos min, se oni volas kapti min.”

Mi ne kuraĝis pensi pri tio, kion mi estas faronta. Ni jam preskaŭ estis vestintaj nin, kaj mi esperis povi fuĝi tra la nokto, antaŭ ol esti rekonita, kiam batoj resonis sur nia pordo. Oni kriis: “Malfermu!”

Necesis ja malfermi. Eniris infanteria oficiro, trempita de pluvo, sian grandan bluan mantelon gluanta sur la epoletoj, kaj sekvata de maljuna serĝento, kiu tenis lanternon. Ni vidis, ke ili estas francoj. Bruske la oficiro diris:

“De kie vi venas?”

“De Mont-Saint-Jean, leŭtenanto,” mi respondis al li.

“De kiu regimento vi estas?”

“De la 6-a leĝera.”

Li rigardis la numeron de mia ĉako sur la tablo, kaj mi samtempe vidis la lian: li ankaŭ apartenis al la 6-a.

“De kiu bataliono?” li demandis, kuntirante la brovojn.

“De la 3-a.”

Buche, tute pala, diris nenion. La oficiro rigardis niajn fusilojn, niajn sakojn kaj kartoĉujojn malantaŭ la lito en angulo.

“Vi dezertis!” li diris.

“Ne, leŭtenanto, ni foriris la lastaj, ĉirkaŭ la oka, de Mont-Saint-Jean.”

“Malsupreniru, ni ekzamenos tion.”

Ni malsupreniris. La granda salono estis plenaj je oficiroj de la 12-a surĉevalaj ŝasistoj kaj de la 6-a leĝera. La komandanto de la 4-a bataliono de la 6-a promenis tien kaj reen, fumante malgrandan lignan pipon. Ĉiuj tiuj viroj estis trempitaj kaj kovritaj de koto.

La oficiro diris kvar vortojn al la komandanto, kiu haltis kaj fiksrigardis nin, sian hoknazon en siaj grizaj lipharoj. Li ne aspektis afabla kaj faris al ni kvin aŭ ses demandojn pri nia foriro de Ligny, pri la ŝoseo al Quatre-Bras kaj la batalo. Li okulumis, kunpremante la lipojn. La aliaj

iradis kaj venadis, trenante siajn longajn sabrojn sen aŭskulti. Fine la komandanto diris:

“Serĝento, tiuj du viroj eniras la 2-an kompanion. Ek!”

Li reprenis sian pipon de sur la kameno, kaj ni eliris kun la serĝento, tre feliĉaj ke ni eliĝis tiel malkare el tiu embaraso, ĉar oni estus povinta pafmortigi nin kiel dezertintoj. La ser-ĝento kondukis nin al hangaro je ducent paŝoj malantaŭ la vilaĝo. Oni bruligis du fajrojn sub la hangaro, kontraŭ la ĉevaleja pordo kaj kontraŭ kolono. Falis fajna pluveto sur la straton. Ĉiuj flakoj tremetadis en la griza lumluno. Ni restis starantaj sub elstarajo de la tegmento de malnova domo, pensante pri niaj mizeroj.

Unu horon poste la tamburisto komencis mallaŭte rulbati, la viroj skuis la pajlon kaj fojnon de siaj vestaĵoj, kaj ni ekiris. La nokto estis ankoraŭ sombra. Malantaŭ ni la ĉasistoj resonigis la resurĉevaliĝon.

Inter la tria kaj la kvara frumatene ni vidis grandan nombron da aliaj regimentoj, kavalerion, infanterion kaj artilerion marŝantaj kiel ni sur diversaj vojoj. La tuta korpuso de marŝalo Grouchy, kiu retiriĝis! La malseka vetero, la sombra ĉielo, tiuj longaj vicoj de lacegaj viroj, la timo esti rekaptita kaj la penso, ke tiom da penoj, tiom da verŝita sango finos por la dua fojo nur per invado. Ĉio tio igis nin klini la kapon. Oni aŭdis nur la bruon de paŝoj tra la koto.

Tiu malĝojo daŭris jam longe, kiam iu voĉo diris al mi:

“Bonan tagon, Josef!”

Mi vekigis el mia sensobtuzo, rigardante la viron kiu alparolis min, kaj mi rekonis la filon de tornisto Martin, nia najbaro en Falsburgo. Li estis kaporalo en la 6-a kaj marŝis kiel vicfermanto, portante la armilon laŭplaĉe. Ni premis al ni la manon. Estas vera konsolo por mi vidi iun de mia regiono. Malgraŭ la pluvo, kiu ankoraŭ ĉiam falis, kaj la granda laceco, ni parolis nur pri tiu terura militiro. Mi rakontis al li la batalon de Waterloo. Li diris al mi, ke la 4-a bataliono marŝis ekde Fleurus al Wavre kun la tuta korpuso de Grouchy; ke dum la posttagmezo de la sekvanta tago, la 18-a de junio, oni aŭdis kanonojn maldekstre, kaj ke ĉiuj volis marŝi en tiu direkto; ke tio ankaŭ estis la opinio de la generaloj, sed ke la marŝalo, ricevinte striktajn ordonojn, daŭrigis la marŝon al Wavre. Nur inter la sesa kaj la sepa vespere, kiam fariĝis klare, ke la prusoj eskapis, ni ŝanĝis la direkton maldekstren por iri aliĝi al la imperiestro. Malfeliĉe jam estis tro malfrue, kaj ĉirkaŭ la noktomezo necesis preni pozicion en la grenkampoj. Ĉiuj batalionoj formis kvadraton. Je la tria matene la kanono de la prusoj vekis la bivakojn, kaj oni neregule pafis unuj al la aliaj

ĝis la dua posttagmeze, momento kiam venis la ordono retiriĝi.

“Estis ankoraŭfoje tro malfrue,” diris Martin, “ĉar parto de malamika armeo, kiu venkis tiun de la imperiestro, troviĝis malantaŭ ni, kaj tio devigis nin marŝi la tutan reston de la sekvantaj tago kaj nokto ĝis la sesa matene por liberigi nin de ĝi. Je la sesa la bataliono prenis pozicion apud la vilaĝo Temploux. Je la deka la prusoj alvenis kun superaj fortoj. Oni oponis al ili la plej fortan reziston por doni al la artilerio kaj furgonoj la tempon transpasi la ponton en Namuro. La tuta armeokorpuso pros-pere defilis tra la urbon, escepte la kvaran batalionon pro eraro de komandanto Delong, kiu igis ĝin deturniĝi dekstren de la vojo kaj sekve devis ĵeti sin en Sambron por ne esti detranĉita. Pluraj viroj estis kaptitoj, aliaj dronis provante transiri la riveron naĝante.”

Estas ĉio kion rakontis al mi Martin. Li havis nenian novaĵon de Falsburgo.

La saman tagon ni trairis Givet. La bataliono bivakis apud la vilaĝo Hierches, duonmejlon pli foren. La morgaŭon, trapasinte Fumay kaj Rocroy, ni dormis en Bourg-Fidèle, la 23-an de junio en Blombay, la 24-an en Saulse-Lenoy, kie ni eksciis la abdikon de la imperiestro, kaj la sekvantajn tagojn en Vitry, apud Reims, en Jonchery kaj Soissons. De tie la bataliono prenis la vojon al Villers-Cotterets, sed ĉar la malamiko estis preterpasinta nin, ni ŝanĝis la direkton tra Ferté-Milon, kaj bivakis en Neuchelles, vilaĝo ruinigita dum la invado de 1814, kaj kiu ankoraŭ ne estis rekonstruita.

Ni foriris de tiu loko la 29-an ĉirkaŭ la unua matene kaj ni iris tra Meaux. Necesis preni la vojon al Lagny, ĉar la prusoj okupis la vojon al Claye. Ni daŭrigis nian marŝon la tutajn sekvantajn tagon kaj nokton.

La 30-an je la kvina matene ni troviĝis apud la ponto de Saint-Maur La saman tagon je la tria posttagmeze ni atingis Parizon kaj ni biva-kis apud loko riĉa je ĉio nomita Vaugirard, ĉe la vojo al Versailles. La 1-an de julio ni bivakis apud belega loko nomita Meudon. Laŭ la ĝar-denoj kaj fruktarbaroj ĉirkaŭitaj per muroj, laŭ la eksterordinara grandeco de la domoj kaj ilia bonege prizorgita stato ni vidis, ke ni estas en la ĉirkaŭaĵo de la plej bela urbo en la mondo, Parizo, kaj tamen ni vivis meze de mizeroj kaj danĝeroj. Niaj koroj sangis pro tio! La homoj estis bonvolaj kaj amis soldatojn. Ili nomis nin la defendantojn de la patrio, kaj la plej malriĉaj volis batali ĉe nia flanko.

La 1-an de julio ni forlasis la pozicion je la dek-unua vespere por iri al Saint-Cloud, kiu estas palaco flanke de palaco, ĝardeno flanke de ĝardeno, altaj arboj, belegaj aleoj, ĉio plej admirinda, kion oni povas imagi. Je la sesa ni foriris de Saint-Cloud por reveni preni pozicion

en Vaugirard. Teruraj famoj kuris tra la urbo. La imperiestro estis foririnta al Rochefort. Oni diris:

“La reĝo de Romo⁷² estas revenonta... Ludoviko XVIII estas survoje al Parizo...”

Oni sciis nenion en tiu urbo, kie oni devus scii ĉion la unuaj.

En Vaugirard la malamiko venis ataki nin ĉirkaŭ la unua posttagmeze en la ĉirkaŭaĵo de la vilaĝo Issy. Ni batalis ĝis noktomezo por defendi nian ĉefurbon. La loĝantoj helpis nin, forportante niajn vunditojn sub la pafado de la prusoj. La virinoj kompatis nin.

Nia sufero esti devige kondukita ĝis tie estis neesprimebla... Mi vidis Buche mem plori, ĉar ni estis iel senhonorigitaj. Mi estus ja volinta ne vidi tion! Dudek tagojn antaŭe mi ankoraŭ ne povis bone imagi, kia estas Francio. Vidante Parizon kun siaj preĝejturoj kaj sennombraj palacoj, kiuj etendiĝis tiel foren, kiel iras la ĉielo, mi pensis:

“Tio estas Francio!... Jen kion niaj antaŭuloj amasigis dum centoj kaj ankoraŭ centoj da jaroj. Kia malfeliĉo devi diri, ke la angloj kaj prusoj alvenis ĝis tie ĉi.”

Je la kvara matene ni atakis la prusojn kun nova furiozeco, kaj ni reprenis la poziciojn perditajn la antaŭtagon. Estas tiam, ke generaloj venis anonci al ni militpaŭzon. Tiuj aferoj okazis la 3-an de julio 1815. Ni pensis, ke tiu militpaŭzo servis por averti la malamikon pri tio, ke, se li ne retiriĝus, la tuta Francio eksta-rus kiel en 1792 kaj neniigus lin! Tiajn ideojn ni havis, kaj mi, vidante tiun popolon, kiu subtenis nin, mi memoris tiujn amasleviĝojn, pri kiuj ĉiam parolis al mi sinjoro Gulden.

Malfeliĉe granda nombro estis tiel laca de Napoleono kaj de la soldatoj, ke ili oferis la patron mem por esti liberigitaj de ili. Ili metis la tutan kulpon sur la dorson de la imperiestro kaj diris al la popolo, ke sen li la aliaj havus nek la forton nek la kuraĝon veni, ke li elĉerpis nin, kaj ke la prusoj donos al ni pli da libereco.

La popolo parolis kiel sinjoro Gulden, sed ĝi havis nek armilojn nek kartoĉojn. Ĝi estis farinta pikilojn antaŭe...

Kaj dum oni revis pri tiuj aferoj, la 4-an oni anoncis al ni armisticon, per kiu la prusoj kaj la angloj devis okupacii la barierojn de Parizo, kaj la franca armeo retiriĝi post la riveron Luaro.

Tiam la indigno de ĉiuj honestaj homoj estis tre granda, ke nia kolero faris nin furiozaj. Unuj rompis sian fusilon, aliaj disŝiris sian uniformon, kaj ĉiuj kriis:

“Ni estas perfiditaj!... Ni estas liveritaj!...”

La maljunaj oficiroj estis palaj kiel mortintoj pro malĝojo. Larmoj fluis sur iliaj vangoj. Neniu

povis trankviligi nin. Ni estis falintaj pli suben ol nenio: ni estis konkerita popolo!

Post ducent jaroj oni ankoraŭ diros, ke Parizo estis okupaciita de la angloj kaj prusoj... Tio estas eterna honto, sed tiu honto ne ripozas sur ni.

La bataliono foriris de Vaugirard je la kvina vespere la 5-an de julio por bivaki en Mont-Rouge. Kiam komenciĝis la moviĝo de la armeo al Luaro, ĉiuj demandis sin:

“Kio do ni estas? Ĉu ni obeu la prusojn? Ĉu ni devas obei, ĉar la prusoj volas vidi nin sur la alia bordo de Luaro? Ne! Ne! Tio ne povas esti. Nu, ni partu, ĉar oni perfidis nin! Ĉio tio ne plu koncernas nin. Ni faris nian devon.... Ni ne volas obei al Blücher!”

Kaj tiun saman vesperon la dezertado komenciĝis. Ĉiuj soldatoj foriris, unuj dekstren, aliaj maldekstren. Viroj en bluzoj kaj malriĉaj virinoj volis konduki nin tra siaj sennombraj stratoj kaj provis konsoli nin: sed ni ne bezonis konsolon. Mi diris al Buche:

“Ni lasu ĉion tion... Ni reiru al Falsburgo... al Harberg... Tie ni reprenos nian antaŭan staton kaj vivos kiel honestaj homoj. Se la prusoj, aŭstroj aŭ rusoj venos tien, la montanoj kaj urbanoj scios defendi sin. Ne ni bezonos grandajn batalojn por ekstermi milojn kaj milojn! Ni survojiĝu!”

Ni estis prioksimume dek kvin el Loreno en la bataliono. Ni foriris kune de Montrouge, kie troviĝis la stabo, kaj ni pasis tra Ivry kaj Bercy, kiuj estas belegaj lokoj. Sed malĝojo malhelpis nin vidi la kvaronon de tio kio valoris la penon esti rigardata. Unuj konservis sian uniformon, aliaj havis nur sian kapoton, ankoraŭ aliaj aĉetis bluzon.

Post Saint-Mandé tute proksime de arbaro, kie ni vidis altajn turojn maldekstre, kaj pri kiu oni diris, ke estas Vincennes, ni fine trovis la vojon al Strasbourg. Estis la sesa matene, kaj ekde tiu urbo ni regule trairis dek du mejlojn ĉiutage.

La 8-an de julio ni jam eksciis, ke Ludoviko XVIII estas revenonta, kaj ke monsinjoro la grafo de Arcezio bonvenigos lin. Ĉiuj veturiloj kaj diligencoj jam portis la blankan flagon. En ĉiuj vilaĝoj, tra kiujn ni pasis, oni kantis *Te Deum*. La urbestroj kaj adjunktoj laŭdis kaj gloris la Sinjoron pro la reveno de Ludoviko, kiun oni nomis la Multamato.

Ĉifonuloj, vidante nin preterpasi, nomis nin *bonapartistoj!* Ili eĉ incitis la hundojn kontraŭ nin... Sed mi preferas ne paroli pri tio. Tiuspecaj homoj estas la honto de la homa specio. Ni respondis ilin nur per malestima rigardo, kiu

⁷² Filo de Napoleono kaj de lia dua edzino, Maria-Luiza, filino de la imperiestro de Aŭstrio.

faris ilin ankoraŭ pli insolentaj kaj furiozaj. Pluraj el ni balancis al ili sian bastonon kvazaŭ por diri: "Se ni tenus vin en angulo, vi estus dolĉaj kiel ŝafoj."

Sed la ĝendarmoj protektis tiun specon de Pinacl-oj. En tri aŭ kvar vilaĝoj la krioj de la malbona raso kaŭzis nian areston. La ĝendarmoj alvenis demandi niajn dokumentojn. Oni kondukis nin al la komunuma domo, kaj la ĉifonuloj devigis nin krii "*Vivu la reĝo!*"

Estis vera abomenaĵo. La maljunaj soldatoj, prefere ol krei tion, lasis sin konduki al prizono. Buche volus sekvi ilian ekzemplon, sed mi diris al li:

"Kion tio faras al ni, se ni krias 'Vivu Jean-Claude', aŭ 'Vivu Pierre-Nicolas'? Ĉiuj tiuj reĝoj, imperiestroj, malnovaj kaj novaj, eĉ ne donus unu solan el siaj ĉevaloj por savi al ni la vivon, kaj ni estus pretaj suferi ion ajn, rifuzante krei iun aŭ alian nomon? Ne, tio ne koncernas nin. Ĉar la homoj estas tiel stultaj kaj ni ne estas pli fortaj ol ili, ni ne devas kontentigi ilin. Poste ili krios ion alian, kaj ankoraŭ poste ree ion alian... Ĉio ŝanĝiĝas!... Nur prudento kaj bonkoreco restos."

Buche ne volis kompreni tiujn kialojn, sed kiam la gendarmoj alvenis, li tamen obeis.

Laŭ tio ke ni avancis, jen unu, jen alia kamarado forlasis la grupon por iri al sia vilaĝo, tiel ke malantaŭ Toul Buche kaj mi restis solaj.

Ni ankoraŭ vidis la plej malĝojigan spektaklon: amasoj da germanoj kaj rusoj, kiuj estis la mastroj en Loreno kaj Alsaco. Ili ekzercadis en Lunéville, Blamont, Sarrebourg, kun kverko-branĉoj sur siaj malbelaj ĉakoj. Kia ĉagreno vidi tiujn sovaĝulojn vivi kaj satigi sin je la kosto de niaj kampuloj!... Aĥ, sinjoro Gulden pravis dirante, ke la gloro de la armiloj kostas multe... Ĉio kion mi deziras, estas, ke la Sinjoro liberigu nin de ili por ĉiam.

Fine, la 16-an de julio 1815, je la dek unua matene, ni alvenis en Mittelbronn, la lasta vilaĝo sur la deklivo antaŭ Falsburgo. La blokado estis levita ekde la armistico, kaj kozakoj, *landwehr*⁷³ und *kaiserliche* plenigis la regionon. Ili havis ankoraŭ siajn bateriojn en pozicio ĉirkaŭ la placo, sed oni ne plu pafis. La pordegoj de urbo estis malfermitaj kaj la homoj eliris por rikolti sian grenon.

Oni multe bezonis la tritikon, sekalon kaj avenon, kiujn oni enirigis, ĉar oni povas imagi ilian mizeron kun tiom da miloj da neutilaj estaĵoj nutrendaj, kiuj rifuzis al si nenion sed postulis ĉiutage *schnapps*⁷⁴ kaj lardon.

Antaŭ ĉiuj pordoj kaj ĉiuj fenestroj oni vidis iujn el tiuj maldiligentaj kaj ebriaj diknazuloj kun longaj, flavaj kaj grasaj barboj, en blankaj vestaĵoj plenaj je fibestetoj kaj en blankaj ĉakoj, kiuj

rigardis vin, fumante sian pipon. Necesis labori por ili, kaj fine niaj honestaj homoj estis ankoraŭ devigataj donaci al ili du miliardojn da frankoj por decidigi ilin foriri.

Kiom da aferoj oni povus ankoraŭ diri pri tiuj neniofarantoj el Rusio kaj Germanio, se ni ne estus farintaj dekofoje pli da ili en iliaj landoj!... Sed estas pli bone, ke ĉiu pripensu siajn proprajn farojn kaj imagu la reston.

Antaŭ la gastejo de Heitz mi diris al Buche:

"Ni eniru... Miaj kruroj jam ne povas porti min."

Patrino Heitz, kiu en tiu tempo estis ankoraŭ juna virino, jam ekkriis, la manojn en la aero:

"Aĥ, Dio mia! Tio estas sinjoro Josef Seitz! Dio en la ĉielo, kia surprizo en la urbo!..."

Tiam mi eniris, sidiĝis kaj kliniĝis min super la tablon plorante. Patrino Heitz kuris serĉi botelon da vino en la kelo. Mi aŭdis ankaŭ Buche singulti en angulo. Ni ne povis paroli, nek unu, nek la alia, pensante pri la ĝojo de niaj parencoj. La vido de nia regiono emociis nin, kaj ni estis kontentaj ĉe la penso, ke iutage niaj ostoj pace ripozas en la tombejo de nia vilaĝo.

Intertempe ni iris ĉirkaŭbraki tiujn, kiujn ni plej amis en tiu mondo. Kiam ni estis iomete retransviliĝintaj, mi diris al Buche:

"Vi foriru antaŭ mi, kaj mi sekvos vin de for, por ke mia edzino kaj sinjoro Gulden ne estu tro surprizitaj. Vi komencu dirante, ke vi vidis min la morgaŭon de la batalo sen vundoj. Poste ke vi refoje vidis min en la ĉirkaŭaĵo de Parizo... kaj eĉ survoje, kaj nur ĉe la fino vi diru al ili: 'Mi kredas, ke li ne estas tre for de ĉi tie kaj ke li baldaŭ venos!' Ĉu vi komprenas?"

"Jes, mi komprenas," li diris kaj leviĝis, eltrinkinte sian glason, "kaj mi faros la samon por mia avino, kiu amas min pli ol siajn aliajn nepojn. Mi sendos iun antaŭe."

Li tuj eliris, kaj mi atendis kelkajn momentojn. Patrino Heitz parolis al mi, sed mi ne aŭskultis ŝin. Mi pensis pri la vojo, kiun Buche jam povis esti irinta. Mi vidis lin apud la ponto, en la avanceo, sub la pordego. Subite mi ekiris, kriante:

"Patrino Heitz, mi pagos vin poste."

Kaj mi komencis kuri. Ŝajnis al mi, ke mi renkontis tri aŭ kvar personojn, kiuj diris:

"Hej! Tio estas Josef Seitz!..."

Sed mi ne estis certa. Subite mi staris antaŭ nia domo. Mi supreniris la ŝtuparon kaj tiam mi aŭdis laŭtan krimon. Trinel estis inter miaj brakoj!... Mi iel havis konfuzan kapon, kaj nur momenton poste, mi eliris kvazaŭ el sonĝo: mi vidis la ĉambron, sinjoron Gulden, Jean Buche, Trinel, kaj mi komencis singulti tiel forte, ke oni povus kredi, ke okazis al mi la plej granda malfeliĉo. Sinjoro Gulden diris nenion, nek Jean

⁷³ Prusa armeo, laŭlitere defendo de la landa.

⁷⁴ Brandon.

Buche. Mi tenis Trinel sidanta sur miaj genuoj kaj kisis ŝin. Ankaŭ ŝi ploris. Kaj tre longe post tio, mi ekkriis:

“Aĥ, sinjoro Gulden, pardonu min! Mi volus, ke mi jam estu ĉirkaŭbrakinta vin, vin, mian patron, kiun mi amas tiom, kiom mi mem.”

“Estas bone, Josef,” li diris, tute teneriĝinte. “Mi scias... Mi ne estas ĵaluza.”

Li forviŝis la larmojn en siaj okuloj.

“Jes, amo... familio... kaj poste la amikoj.. Tio estas komprenebla, mia infano... Ne konfuziĝu.”

Tiam mi iris al li kaj premis lin sur mian koron.

La unuajn vortojn kiujn Trinel diris al mi, estis:

“Josef, mi scias, ke vi revenos. Mi fidis al Dio!... Nun niaj plej grandaj mizeroj estas pasintaj. Ni ĉiam restos kune.”

Mi denove igis ŝin sidiĝi sur miajn genuojn, siajn brakojn sur miaj ŝultroj. Mi regardis ŝin, ŝi mallevis la okulojn: kion ni esperis antaŭ mia foriro, okazis. Ŝi diris, ke ŝi estas graveda. Ni estis tre feliĉaj.

Sinjoro Gulden, ĉe la stablo, ridetis. Jean, starante apud la pordo, diris:

“Nun mi foriras, Josef, mi iras al Harberg. La patro kaj la avino atendas min.”

Li etendis al mi la manon, sed mi retenis ĝin, dirante:

“Jean, restu, tagmanĝu kun ni.”

Sinjoro Gulden kaj Trinel ankaŭ insistis, por ke li restu, sed li ne plu volis atendi. Ĉirkaŭbrakante lin malsupre de la ŝtuparo, mi sentis, ke mi amas lin kiel fraton. Il ofte revenis ekde tiam. Ĉiufoje kiam li venis al la urbo dum tridek jaroj, li vizitis nin. Nun li ripozas malantaŭ la preĝejo de Hommert. Li estis brava, bonkora viro.

Sed pri kio do mi pensas? Necesas tamen fini tiun ĉi historion, kaj mi diris ankoraŭ nenion pri onklino Gredel, kiu venis unu horon poste. Ŝi levis la brakojn kaj premis min kontraŭ sin, kriante:

“Josef!... Josef!... Jen vi do eskapinta el ĉio! Oni venu nun repreni vin... Oni venu! Ha! Kiom mi bedaŭris, ke mi lasis vin foriri... Kiom mi malbenis tiun konskripcion kaj la reston... Sed jen vi estas... Estas bone!... Estas bone! La Sinjoro kompatis nin.”

Jes, ĉiuj tiuj malnovaj historioj, kiam oni pensas pri ili, ankoraŭ venigas al vi la larmojn en la okulojn. Estas kiel sonĝo, sonĝo forgesita ekde multaj jaroj, kaj tamen tia estas la vivo. Tiuj ĝojoj kaj malĝojoj kiujn oni memoras, estas la solaj aferoj kiuj ligas onin ankoraŭ al la tero, kaj kiuj faras, ke dum la maljunaĝo, kiam la fortoj malaperas, kiam la vidkapablo malpliĝas kaj oni estas nur ombro de si mem, oni ne volas foriri. Oni neniam diras: ‘Nun sufiĉas!’”

Tiuj malnovaj memoraĵoj ankoraŭ ĉiam estas vivaj: kiam oni parolas pri siaj malnovaj

danĝeroj, oni kredas ankoraŭ troviĝi en ili. Pri siaj maljunaj amikoj oni kredas ankoraŭ premi al ili la manon. Pri ŝi, kiun oni amis, oni kredas ankoraŭ teni ŝin sur la genuoj kaj pensi, rigardante ŝin: ‘Kiel bela ŝi estas!’ Kaj kio ŝajnis al vi antaŭe justa, honesta kaj saĝa, ankoraŭ nun estas justa, honesta kaj saĝa.

Mi memoras – kaj tio devas fini tiun ĉi historion –, ke post mia reveno dum multaj monatoj, kaj eĉ jaroj, granda malĝojo regis en la familioj, kaj ke oni ne plu kuraĝis sincere paroli nek eligi dezirojn pro la gloro de la patrio. Zebedeus, reveninte kun tiuj kiujn oni eksigis malantaŭ Luaro, perdis kuraĝon. La kaŭzo estis ĉiuspecaj venĝoj, juĝoj, ekzekutoj kaj masakroj. Tion kaŭzis nia humiligo: la cent kvindek mil germanoj, angloj kaj rusoj kiuj tenis garnizonon en niaj fortikaĵoj, la altaj milit-kompensaĵoj, la miloj da elmigrintoj, la devigaj impostoj kaj ĉefe la leĝoj kontraŭ la suspek-tatoj, la sakrilegioj kaj la rajto de la plejaĝulo, kiun oni volis reestabli.

Ĉiuj tiuj aferoj kontraŭaj al la prudento, la justeco kaj la honoro de la nacio kun la denuncoj far la Pinacl-oj kaj la ofendoj kiujn oni igis suferi al la maljunaj revoluciuloj, ĉiuj tiuj aferoj fine faris nin sombraj. Tial, ofte kiam mi estis sola kun Trinel kaj la malgranda Josef, kiun Dio sendis al ni por konsoli nin meze de tiuj grandaj mizeroj, sinjoro Gulden, revante, diris al mi:

“Josef, nia malfeliĉa patrio sinkis tre malalten! Kiam Napoleono ekregis la landon, ĝi estis la plej granda, la plej libera, la plej potenca inter la nacioj. Ĉiuj popoloj admiris kaj enviis nin! Hodiaŭ ni estas venkitaj, ruinigitaj, sangigitaj. La malamikoj plenigas niajn fortika-fojn kaj tenas sian piedon sur nia ĝorgo... Kion oni neniam vidis ekde kiam Francio ekzistas – fremduloj mastroj de nia ĉefurbo! – ni vidis tion dufoje en du jaroj! Jen kion kostas al ni, ke ni metis nian liberecon, sorton kaj honoron en la manojn de ambiciulo!... Jes, ni troviĝas en tre malĝojiga situacio. Oni kredas, ke nia granda Revolucio mortis kaj ke la Homaj Rajtoj estas neniigitaj!... Nu! Ni ne malkuraĝiĝu: ĉio tio pasos!... Tiuj kiuj marŝas kontraŭ justeco kaj libereco estos forpelitaj. Tiuj kiuj volas reestabli la privilegiojn kaj titolojn estos konsiderataj kiel frenezuloj. La granda nacio ripozas, pripen-sante siajn erarojn. Ĝi observas tiujn kiuj volas konduki ĝin kontraŭe al ĝiaj intereso. Ĝi legas en la profundo de iliaj animoj. Kaj malgraŭ la vizioj, malgraŭ la reĝa gvardio, malgraŭ la Sankta Alianco, kiam ĝi estos laca de sia mizero, ĝi metos tiujn homojn eksteren. Kaj estos finite, ĉar Francio deziras liberecon, egalecon kaj justecon! La sola afero kiu man-kas al ni, estas instruado. Sed la popolo instruiĝas ĉiutage. Ĝi profitas de nia spertoj kaj malfeliĉoj. Mi eble ne havos la feliĉon vidi la revekiĝon de la patrio. Mi

estas tro maljuna por esperi tion. Sed vi vidos ĝin, kaj tiu spektaklo konsolos vin pro ĉio. Vi estos fiera aparteni al tiu grandanima nacio, kiu marŝas tre antaŭe de la aliaj ekde 1789. Ĝiaj haltomomentoj estas nur mallongaj ripozoj dum tiu longa vojaĝo.”

Tiu bonkora kaj justa viro konservis ĝis sia lasta horo sian trankvilecon kaj fidon.

Kaj mi vidis la plenumon de siaj vortoj: mi vidis la revenon de la flago de libereco; mi vidis la nacion kreski en riĉeco, feliĉo kaj instruado; mi vidis tiujn kiuj volis haltigi justecon kaj reestabli la malnovan reĝimon; kaj mi vidas, ke la spirito estas ankoraŭ ĉiam marŝanta, ke la kampuloj donus ĝis sia lasta ĉemizo por antaŭenigi siajn infanojn.

Malfeliĉe ni ne havas sufiĉe da instruistoj! Ha! Se ni havus almenaŭ malpli da soldatoj kaj pli da instruistoj, ĉio irus multe pli rapide! Sed, paciencon, tio venos. La popolo komencas kompreni siajn rajtojn. Ĝi scias, ke militoj nur alportas kreskojn de la impostoj, kaj kiam ĝi diros: “Anstataŭ ke miaj filoj estas senditaj por pereji je dekmiloj sub sabro kaj kanono, mi volas, ke oni instruu ilin kaj faru homojn el ili!” Kiu kuraĝus voli la kontraŭon, ĉar hodiaŭ la popolo estas la mastro? Kun tiu espero, mi diras al vi adiaŭ, miaj amikoj, kaj mi tutkore ĉirkaŭbrakas vin.

**FINO DE ‘WATERLOO’,
DUA PARTO DE
‘SOLDATO DE NAPOLEONO’**

